

Prof. D-ro Ivo Lapenna

**Elektitaj tekstoj
pri
Internacia Juro**

**Editoris:
Reinhard Haupenthal**

Durdevac, 2017

Ivo Lapenna:

ELEKTITAJ TEKSTOJ PRI INTERNACIA JURO

© *Birthe Lapenna*

Editoris:

Reinhard Haupenthal

Redaktis:

Birthe Lapenna

Antaŭparolis:

Klaus Perko

Kompostis kaj grafike aranĝis:

Josip Pleadin

Provlegis:

Birthe Lapenna

Christer Kiselman

Klaus Perko

Eldonis:

Dokumenta Esperanto-Centro

Đurđevac (Kroatio)

kunlabore kun

Fondaĵo Ivo Lapenna

Kopenhago (Danio)

Kunlaboris:

Mogens Rude Andersen

Torben Svendsen

Steen Vester

Pierre Peter Zacho

Peter Lucas Zacho

Michael Niclas Zacho

ISBN 978-953-58418-9-0



**Ivo Lapenna
(1909–1987)**

ENKONDUKO

Birthe Lapenna

La ideo pri la aperigo de tiu ĉi verko estis de S-ro Reinhard Haupenthal. Bedaŭrinde li forpasis en septembro 2016, kiam ni nur komencis plani la aperigon de la libro.

Tamen – kun danko kaj respekto al R.H. – ni publikigis la plej grandan parton de lia *Editora Noto*.

Ne malofte mi ricevas leterojn kaj telefonalkvokojn de diversaj universitatoj el la mondo. Mi sufiĉe surpriziĝas pro la fakto, ke ili petas de mi artikolojn en diversaj lingvoj verkitaj de Ivo Lapenna, mia edzo, eĉ tiom longe post lia forpaso en 1987. Komprenoble, ke ili mem posedas ilin, sed "por ĉiu okazo", ili diris, "se vi havas ion, kion ni hazarde ne posedas...". Ili skribis kaj diris, ke la kaŭzo estas, ke "Prof. d-ro Ivo Lapenna ja estas unu el la plej grandaj kaj gravaj sciencistoj en la mondo, i.a. rilate al Internacia Juro, kaj la plej granda kaj grava rilate al Kompara Juro – Soveta kaj Orienteŭropa Juro. Ni instruas la studentojn pere de liaj verkoj, ĉar ili estas same aktualaj hodiaŭ kiel iam.". Tion, komprenoble, mi ja bone scias. Nu, pro tio mi sendas al la universitatoj artikolojn, prelegojn, intervjuojn ktp. el mia propra arkivo. Jam troviĝas amasego da materialo en la Dana Ŝtata Arkivo en la Kastelo Christiansborg, la koro de Kopenhago, kie troviĝas ankaŭ la Dana Parlamentejo (v. la hejmpaĝon de *Fondaĵo Ivo Lapenna*: www.ivolapenna.org).

Pro la elstara pozicio de Ivo Lapenna BBC en Londono oftege vokis lin kiel eksperton, por ke li esprimu en la radio kaj la televido sian opinion pri plej diversaj kazoj, ekzemple pri aviadilaj akcidentoj, politikaj problemoj, juraj aferoj ktp.

En la Esperanto-Movado certe troviĝas sufiĉe multaj juristoj, kiuj ŝatus legi la interesajn artikolojn kaj prelegojn en tiu ĉi libro. Ankaŭ por ne-juristoj ĝi estas interese, kaj oni povas multon lerni. Inter la ampleksaj temoj (i.a., komprenoble, la Internacia Lingvo) Ivo Lapenna tuŝas ankaŭ la temon "Homaj Rajtoj", por kiuj li senlace laboris dum sia tuta vivo.

Fine mi tre kore dankas al la verkisto S-ro Josip Pleadin, la presisto kaj eldonisto de la libro, kiu faris grandegan laboron. Same tre kore mi dankas al D-ro Klaus Perko kaj al Prof. D-ro Christer Kiselman, kiuj multege helpis pere de kontrollegado de la libro, kaj al Mogens Rude Andersen, Torben Svendsen, Pierre Peter Zacho, Peter Lucas Zacho kaj Michael Niclas Zacho, kiuj helpis pere de konsiloj kaj teknikaj aferoj.

Frederiksberg, Kopenhago 2017.

ANTAŬPAROLO

*Klaus Perko**

La ampleksa volumo *Eseoj memore al Ivo Lapenna* (2001) detale prezentis vivon kaj verkojn de Prof. D-ro Ivo Lapenna; la *Biografiaj Notoj* menciis i.a. ke li verkis ne nur konsiderindan nombron da sciencaj libroj, sed ankaŭ ĉ. 1500 artikolojn... en Esperanto kaj en diversaj naciaj lingvoj...

Aparta kontribuado en la menciita volumo estas *Bibliografio de juraj artikoloj de Ivo Lapenna*, kompilita de Reinhard Haupenthal. Granda parto de tiuj artikoloj en Esperanto estis aperintaj en *Internacia Jura Revuo* (IJR), sed multaj aliaj ankaŭ en *La Monda Lingvo-Problemo*, *Scienca Revuo*, *Kontakto*, *Sennacieca Revuo* kaj aliaj publikaĵoj. Jam tiam estiĝis la ideo, iam estonte eldoni tiujn kolektitajn jurajn artikolojn en aparta volumo por plifaciligi la aliron al tiuj valoraj tekstoj dise troveblaj. Ankaŭ Reinhard Haupenthal mem plurfoje akcentis la dezirindecon de tiu projekto. Longan tempon la manko de sufiĉaj financaj rimedoj kaj aliaj malfavoraj cirkonstancoj bedaŭrinde malhelpis la realigon de la ideo, ĝis finfine en la jaro 2016 estis eble trovi taŭgan vojon. Reinhard Haupenthal deklaris sin preta, havigi kaj prilabori la koncernajn tekstojn, kaj Josip Pleadin ebligis la eldonon.

Je nia granda bedaŭro, dum la preparaj laboroj Reinhard Haupenthal neatendite forpasis. Postume ni devas sincere danki lin pro lia valora klopodado, liaj instigoj kaj konsiloj.

Ĉe la represado de la tekstoj ni principe transprenis ĉion tute sensanĝe, escepte de evidentaj presezaroj, kiujn ni korektis en la senco de la ekkonebla intenco de la aŭtoro.

Juro estas sistemo de devigaj normoj, kiuj regulas homan konduton. Tial ĝi ĉiam spegulas la sociajn, politikajn kaj ekonomiajn cirkonstancojn de la tempo, en kiu ĝi estiĝis. Kiam tiuj cirkonstancoj ŝanĝiĝas, ordinare tre baldaŭ fariĝas necese adapti ankaŭ amason da juraj preskriboj. Pro tio juraj verkoj malaktualiĝas ofte nur tre mallongan tempon post sia eldono.

D-ro Klaus Perko, sekretario-kasisto de IEAJ (1976–1987) kaj redaktoro de *Internacia Jura Revuo* (1980–1987)

Ĉi tiu kolekto aperas ne nur en la 130-a jaro post la Unua Libro de la Internacia Lingvo de d-ro Esperanto kaj en la 100-a jaro post la morto de L. L. Zamenhof, sed ankaŭ en la 30-a jaro post la forpaso de Ivo Lapenna. Do eĉ la plej nova el liaj artikoloj aĝas jam pli ol 30 jarojn. Jen oni ja povas demandi: Kiu volos legi tiel malaktualajn artikolojn? Kian valoron ili ankoraŭ havas hodiaŭ?

Kvankam en la plej multaj kazoj tiuj artikoloj nuntempe ne plu povas doni precizajn respondojn al konkretaj demandoj pri la jura prijuĝo en aktualaj problemoj, pro la intertempe ŝanĝitaj juraj normoj, mi tamen vidas plurajn argumentojn por la daŭranta valoro de la nun represitaj artikoloj:

En siaj artikoloj Ivo Lapenna tre ofte traktas bazajn principojn, kiuj karakterizas aŭ difinas diversajn jurajn fakojn. Tio koncernas la sisteman enordigon de juraj demandoj, la nociojn aplikatajn en la jura scienco, la ĝeneralajn bazajn principojn komunajn al ĉiuj juraj fakoj, kiel ekz. Kio estas internacia juro? Kio estas homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj? Kio estas jura persono? Kio karakterizas la kriminalan juron? – Ĉiuj tiuj difinoj kaj sistemaj enordigoj, ellaboritaj de la juroscienco, restas ĉiam validaj sendepende de la oftaj ŝanĝoj en la unuopaj naciaj juroj.

La ĝusta aplikado de la jam firmiĝinta jura faka terminaro estas ege grava por la plua evoluado de la juroscienco en Esperanto. Ĉiuj tekstoj de Ivo Lapenna havas modelan karakteron kaj meritas la plurfojan relegadon fare de ĉiuj, kiuj intencas verki en Esperanto pri juraj temoj.

Cetere, ne nur la juraj artikoloj, sed ankaŭ ĉiuj aliaj tekstoj de Ivo Lapenna estas modelaj ankaŭ didaktike: Temas ne nur pri la enhavo mem, sed ankaŭ – konservante la sciencan nivelon – pri la maniero prezenti ĝin al la adresitoj tiel, ke eĉ malfacila kaj komplika materio fariĝas bone komprenebla al klera kaj interesita publiko, ankaŭ se tiu ne konsistas el samfakuloj.

Fine, preskaŭ superflue diri: Kompreneble ĉiu, kiu interesiĝas pri historio, kaj speciale pri la jura historio, precipe tiu de la erao post la dua mondmilito, certe trovos multajn artikolojn nepre legendajn.

Specialan dankon pro la konsciencia kontrolado kaj aranĝado de la tekstoj meritas s-ino Birthe Lapenna, s-ro Josip Pleadin kaj ĉiuj aliaj, kiuj donis sian helpon, por ke ĉi tiu libro povu aperi.

EDITORIA NOTO

Reinhard Haupenthal

La nun prezentata kolekto de 42 fakaj tekstoj pri internacia juro verkitaj de Ivo Lapenna (1909–1987) aperintaj inter 1949 kaj 1992 baziĝas sur mia „Bibliografio de juraj artikoloj de Ivo Lapenna“.

Jam siatempe mia ideo estis, ke la dise aperintaj tekstoj (ofte temis pri prelegoj) devus kuniĝi en unu volumo por savi ilin de disperdiĝo kaj sekve de forgesiĝo. La momento nun venis. Kiam en printempo 2016 mi proponis la projekton al Birthe Lapenna, ŝi tuj konsentis. Feliĉe en la persono de Josip Pleadin ni same tuj trovis eldoniston pretan komposti kaj presigi la libron. Aparte ĝojindas la fakto, ke dank' al Josip Pleadin la verko povas aperi en la patrolando de Ivo Lapenna, Kroatio.

* * *

Ĉi-sekve mi prezentas korektitan kaj ĝisdatigitan version de mia bibliografio de 2001, kiu servas samtempe kiel fontindiko kaj bibliografia referenco. La antaŭmetitaj numeroj estas la samaj kiuj troviĝas antaŭ la surskribo de la unuopaj kontribuoj.

1. Ĉefprincipoj de la nuntempa internacia juro.
En: *Somera Universitato*. Malmö 1948. Rickmansworth, Herts.: The Esperanto Publ. Co. 1949. 108 p., p. 43–57.
2. La lingva problemo en la scienco.
En: *Scienca Revuo* 4. 1952/53: 2/3 (14/15), p. 43–46.
3. Pri nia lingva kritiko.
En: *Scienca Revuo* 4. 1952/53: 273 (14/15), p. 85–90.
4. Genocido – Nova kategorio de internacia krimo.
En: *Scienca Revuo* 7. 1955: 3 (27), p. 82–89. – Ankaŭ en: Ivo Lapenna (red.): *Elektitaj prelegoj 1949–1954*. Vol. 2. Purmerend: Muusses 1955. 104 p., p. 21–28.
5. La maro en la internacia juro.
En: *Scienca Revuo* 9. 1957/58: 1 (33), p. 14–25.

6. La jura karaktero de rekomendoj.
En: Paul Neergaard (red.): *Sciencaj Studoj bazitaj sur originalaj esploroj kaj observoj*. Kopenhago: ISAE 1958. 238 p., p. 83–93.
7. La lingva problemo en la internaciaj rilatoj.
En: *Scienca Revuo* 13. 1963: 174 (49/52), p. 17–34.
8. Kelkaj aspektoj de la lingva problemo en internacia publika juro kaj kompara juro. En: *Scienca Revuo* 13. 1963: 1/4 (49/52), p. 67–78.
9. La homaj rajtoj kaj lingva diskriminacio.
En: *Kontakto* 2. 1965: 3, p. 11–13.
10. La principo de egalrajteco de seksoj en la familia juro de Sovetunio kaj Jugoslavio. (Resumo.)
En: *Internacia Jura Revuo* 1. 1966: 1, p. 22–24.
11. Internaci-Juraj Problemoj de Spacveturado.
En: *La mondpercepto de la modernaj natursciencoj*. Nürnberg: (Pickel) 1967. 170 p., p. 37–45. (Internaciaj Seminarioj 1.)
12. La protekto de aŭtoraj rajtoj kun aparta konsidero al la Universala Konvencio de Unesko.
En: *Internacia Jura Revuo* 2. 1967: 2, p. 3–15.
13. Komparaj informoj pri la pozicio de advokato en Soveta Unio kaj Jugoslavio.
En: *Internacia Jura Revuo* 2. 1967: 4 (6), p. 2–5.
14. Ŝtataneco laŭ la Soveta kaj Jugoslavia Juroj.
En: *Internacia Jura Revuo* 3. 1968: 7 82), p. 2–4.
15. Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj.
En: *Internacia Jura Revuo* 3. 1968: 3 (8), p. 2–6.
16. La rajto de kunvenado kaj organiziĝo de Soveta Unio kaj Jugoslavio.
En: *Internacia Jura Revuo* 4. 1969: 1 (9), p. 2–3.
17. Genocido.
En: *Internacia Jura Revuo* 4. 1969: 2 (10), p. 2–7.
18. Testamentoj laŭ soveta juro.
En: *Internacia Jura Revuo* 5. 1975: 1 (11), p. 27–29.

19. Atingoj kaj malsukcesoj de Unuiĝintaj Nacioj. En:
Internacia Jura Revuo 5. 1976: 1 (13), p. 1–13.
20. Marksisma koncepto pri ŝtato kaj juro.
En: *Internacia Jura Revuo* 5. 1976: 2 (14), p. 2–8.
21. Kompenso pro domaĝoj kaŭzitaĵ per akcidentoj laŭ la juro de Soveta Unio.
En: *Internacia Jura Revuo* 5. 1976: 2 (14), p. 20–24.
22. Propono de Perspektiva Agadprogramo de la Eŭropa Klubo por la solvo de la lingva problemo en Eŭropo.
En: *Eŭropa Dokumentaro* 1978: 18, p. 3–8; ankaŭ en: *Horizonto* 2. 1977: 12 (6), p. 122–127.
23. Jura valoro de la fina akto de Helsinki.
En: *Internacia Jura Revuo* 6. 1977: 1 (15), p. 19–30.
24. Kelkaj juraj aspektoj de multlingveco en EEK.
En: *Internacia Jura Revuo* 7. 1977: 2 (16), p. 11–17; ankaŭ en: *Eŭropa Dokumentaro* 1979: 22, p. 3–6.
25. La politika kaj lingva mapo de Eŭropo. Aktuala kaj Potenciala Roloj de la Internacia Lingvo.
En: *Horizonto* 3. 1978: 17 (5), p. 113–119.
26. J. S. Belov: Plia kazo de kontraŭleĝeco kaj psikiatria misuzo.
En: *Internacia Jura Revuo* 8. 1978: 1 (17), p. 18–28.
27. La Internacia Lingvo kiel jurscienca komunikilo.
En: *Internacia Jura Revuo* 8. 1978: 2 (18), p. 2–17.
28. La koncepto de neŭtraleco en internaciaj rilatoj kaj internacia juro. En: *Internacia Jura Revuo* 9. 1979: 1 (19), p. 2–10.
29. Sovetaj konstitucioj 1918–1977 en la lumo de la konflikto inter marksisma ideologio kaj ruslanda/sovetia realaĵo.
En: *Internacia Jura Revuo* 10. 1980: 1 (21), p. 2–18; 2 (22), p. 2–15.
30. Juraj aspektoj de informperdo pro traduko.
En: Helmar Frank, Yashovadhan, Reinhard Cziske (komp.): *Kibernetiko de la homa lingvo kaj aliaj internacilingvaj aktoj de la IX-a Internacia Kongreso*

de Kibernetiko. Budapeŝt, Paderborn: Hungara Esperanto-Asocio, Inst. pri Kibernetiko 1981. 192 p., p. 82–91; ankaŭ en: Helmar G. Frank, Yashovardan, Brigitte Frank-Böhringer (ed.): *Lingvokibernetiko kaj aliaj internacilingvaj aktoj de la IX-a Internacia Kongreso de Kibernetiko*. *Sprachkybernetik und andere internationalsprachige Akten vom IX. Internationalen Kybernetikkongreß*. Tübingen: Narr (1982). 190 p., p. 82–91.

31. Eŭropa konvencio de Homaj Rajtoj.
En: *Internacia Jura Revuo* 11. 1981: 2 (24), p. 2–9.
32. La koncepto de krimo laŭ la Kriminala juro de USSR kaj SFR Jugoslavio. En: *Internacia Jura Revuo* 12. 1982: 1 (25), p. 4–18.
33. Kelkaj sovetiaj spertoj pri aplikado de kibernetiko al juro.
En: *Internacia Jura Revuo* 13. 1983: 2 (28), p. 2–17.
34. Marksisma koncepto pri ŝtato kaj juro.
En: *Monato* 4. 1983: 6/7, p. 28–31.
35. Diktaturo de la proletaro kaj tutpopola ŝtato en la lumo de originala marksismo.
En: *Internacia Jura Revuo* 14. 1984: 1 (29), p. 2–5.
36. Koncepto de jura persono laŭ sovetia juro.
En: *Internacia Jura Revuo* 14. 1984: 2 (30), p. 7–13.
37. Etapoj en la formiĝo de UN.
En: *Internacia Jura Revuo* 15. 1985: 2 (32), p. 2–5.
38. La mortpuno en Soveta Unio.
En: *Internacia Jura Revuo* 16. 1986: 2 (34), p. 8–12.
39. Sovetia koncepto de paca kunekzistado.
En: *Sennacieca Revuo*. N. S. 1987: 115, p. 12–19.
40. Juraj terminologiaj problemoj kun aparta konsidero al la esperantlingva jura terminologio.
En: *Serta Gratulatoria in honorem Juan Régulo*. II. Esperantologio. La Laguna: Universidad de La Laguna 1987. 790 p., p. 333–352.
41. Tridek jaroj de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj (IEAJ).
En: *Internacia Jura Revuo* 17. 1987: 1 (35), p. 2–8.

42. La principo de leĝeco en la Sovetia kaj Jugoslavia juraj sistemoj.
En: Paul Neergaard, Christer Kiselman (red.): *Aktoj de Internacia Scienca Akademio Comenius*. Vol. 1. Pekino: Ĉina Esperanto-Eld. 1992. 118 p., p. 7–13.

Malaucène, julio 2016

ĈEFPRINCIPOJ DE LA NUNTEMPA INTERNACIA JURO

La temo, kiun mi prezentos en tiu ĉi prelego, ne estas hazarde elektita. Du konsideroj instigis min paroli en la Internacia Somera Universitato ĝuste pri la fundamentaj principoj de la nuntempa Internacia Juro.

Antaŭ ĉio, la interesiĝo pri la internaciaj kaj interŝtataj rilatoj grave kreskis en la lastaj jaroj, precipe post la Dua Mondmilito, ne nur en la rondoj de fakuloj, sed ankaŭ en la larĝaj tavoloj de la popoloj. En tiuj rilatoj partoprenas ĉiam pli kaj pli, krom la oficialaj reprezentantoj de la ŝtatoj, ankaŭ la simplaj civitanoj, kiuj sentas sian individuan feliĉon kaj personan sorton ĉiam pli ligitaj kaj kondiĉitaj de la fortiĝo aŭ malfortiĝo de la interŝtataj ligoj kaj interpopolaj kunlaboro kaj amikeco. La traktota problemo, sekve, transpasas la murojn de sciencaj kabinetoj, kaj reprezentas ĝeneralan intereson.

La dua konsidero estas, ke nia Internacia Somera Universitato estas – kaj laŭ la konsisto de la prelegantoj, kaj laŭ la karaktero de la publiko, kaj laŭ la lingvo uzata – fakte internacia. Unu tia vere internacia institucio, kredeble, havas apartan intereson pri la fundamentaj juraj principoj, regantaj hodiaŭ la rilatojn inter la nacioj.

I.

Antaŭ ol pritakti la temon mem, ŝajnas al mi necese tuŝi unu alian, pli ĝeneralan demandon. Oni, nome, ne povas paroli pri la ĉefprincipoj de Internacia Juro, se oni, antaŭ tio, ne diras almenaŭ kelkajn vortojn pri la juro ĝenerale. Kio estas juro? Kie troviĝas la plej profundaj radikoj de la juro? Kiel ĝi ekestas kaj kiuj faktoroj kondiĉas ĝian evoluon?

Jen la demandoj, kiuj en la teorio de la jura scienco altiris la atenton de verkistoj kaj profesoroj. Ekestis amaso da teorioj, formiĝis apartaj skoloj, kiuj penis solvi la problemon. Ne dezirante, en la kadro de tiu ĉi prelego, prezenti ĉiujn ĉi diversajn faktorojn en la jura scienco, ni tamen povas ilin dividi je du ĉefaj grupoj: idealismaj konceptoj kaj materialismaj konceptoj. Al la unuaj apartenas ĉiuj teorioj, kiuj serĉas la plej profundajn radikojn de juro ekster la homa socio, en la abstrakta ideo, tute egale ĉu tiun ideon oni nomas dio, eterna justeco, racio, naturo aŭ simile. La duaj rigardas la juron kiel esprimon de konkretaj materiaj kondiĉoj en kiuj vivas la homara socio.

La idealismaj konceptoj ĉiam enhavas certan duecon. Laŭ adeptoj de tiuj konceptoj, ĉiam ekzistas du juroj: unu abstrakta, la alia konkreta. La abstrakta juro troviĝas en la pura ideo, en la homa naturo kiel tia, en la racio. Tiu ĉi abstrakta, nenie en la mondo ekzistanta juro, estas la sola juro objektivite plene justa, validanta en ĉiuj epokoj kaj en ĉiuj sociordoj, sed neniel fakte aplikata. Oni ĝin nomas ekz. natura juro, ĉar ĝi korespondas al la plej profunda esenco de la natura ordo; aliaj donas al ĝi la nomon racia juro, ĉar ĝi estas perfekta kaj ĉar oni povas ĝin ekkoni per cerbumado. Senkonsidere al la nomo, tiu ĉi abstrakta juro devus esti – kompreneble – laŭ la cititaj teorioj, la sola fonto de la pozitiva juro, t.e. la juro ekzistanta en certa konkreta socio en formo de juraj kutimoj aŭ de leĝoj. La pozitiva juro neniam plene korespondas al la abstrakta juro. Tial ĝi neniam povas esti plene justa. Sed la progreso de la pozitiva juro konsistas ĝuste en la senĉesa celado ekkoni la principojn kaj regulojn de la abstrakta, perfekte justa juro kaj, ekkoninte ilin, apliki tiujn regulojn en la praktiko en formo de leĝoj kaj aliaj devigaj ordonoj. Tiamaniere la pozitiva juro troviĝus en procedo de konstanta perfektigado.

Eble neniu verkisto formulis pli simple kaj pli klare la esencon de la idealismaj konceptoj, ol la fama franca internaciisto Le Fur. Laŭ tiu ĉi verkisto, la rolo de la racia juro konsistas en tio, ke ĝi eltrovas la regulojn kiuj estas bonaj. Tiun taskon havas la filozofoj. Ili per sia cerbumado malkovras parton post parto la juston. Poste venas la juristoj-sciencistoj, kiuj, akceptinte la akiraĵojn de la filozofio, prilaboras tiujn malkovritajn justajn principojn en juraj sistemoj. Fine, la leĝdonantoj formulas ilin en leĝoj, kreante tiamaniere la pozitivan juron. “El ĉio dirita”, konkludas Le Fur, “sekvas ... ke unu kompleta juro konsistas el du elementoj: unu fundamenta elemento – la natura juro, racia aŭ objektiva juro kun morala bazo, per si mem abstrakta vero objektivite ekzistanta, sed nekonata al homoj antaŭ ol la homa racio malkovras ĝin; la alia elemento estas formala, ĝi estas la pozitiva juro, pere de kiu la regantoj provas efektivi la unuan por la bono de la komunumo, urbo, ŝtato.”

Oni, do, vidas klare la esencon de tiaspecaj teorioj: ekzistas ie (kie?!) certaj eternaj juraj principoj, perfekte justaj, sed (bedaŭrinde!) nekonataj al homoj. Tial, se en la mondo estas malbone, se la laborantaj klasoj suferas sub la jugo de ekspluatado, la malbonon ne kaŭzas la reganta klaso, sed la nesufiĉa kapablo ekkoni la plej justan ordon! Sekve: nenia revolucio, sed cerbumado de filozofoj, por ke ili eltrovu la eterne justajn regulojn! Intertempe la suferantoj pacienciĝu kaj atendu ke el ĉielo falu la justeco!

Por prui la ekziston de certaj eternaj principoj, validaj en ĉiuj epokoj, oni volonte citas la leĝaron de Hamurabi (ĉ. 2.000 j. antaŭ nia erao), la Pentalogon (5 budistajn leĝojn) kaj la Pentatekon (5 librojn de Moseo). Oni penas prui, ke en tiuj tre malnovaj dokumentoj oni trovas tiajn moralajn kaj jurajn regulojn, kiuj esence identas al niaj hodiaŭaj. Oni tie parolas pri justeco kaj pri egaleco, oni ekzemple malpermesas ŝtelon k.t.p. Do, tute same kiel hodiaŭ!

Tamen, oni forgesas du aferojn.

Unue, ĉiuj ĉi dokumentoj devenas el epoko, kiam la socio estis organizita surbaze de privata posedo. Sekve, estas tute klare, ke ankaŭ la moralaj kaj juraj principoj, kiuj tiras sian devenon el tiu ĉi ĝenerala fakto, devas esti esence egalaj en ĉiuj sociordoj bazitaj sur privata posedo, tute egale ĉu temas pri sklaveco, feŭdismo

aŭ kapitalismo. Tial la morala kaj jura ordono “ne ŝtelu” fakte – principe – validas en ĉiu socio organizita surbaze de ekspluatado aŭ de sklavoĵoj aŭ de servutuloj aŭ de laboristoj. Kontraŭe, en socio sen privata posedo povos ekzisti nek la morala nek la jura regulo pri ŝtelo de privata posedo, ĉar – tute simple – tia posedo ne ekzistas!

Estas akcentite, ke ankaŭ en socio bazita sur privata posedo tiuj moralaj kaj juraj reguloj validos nur principe. Fakte ekzistos grandaj diferencoj inter ilia enhavo, kiu varias laŭ la epokoj, rezulte de la konkreta socia kaj ekonomia ordoj. Estas konate, ekzemple, ke la sklavo povis havi nenian posedon kaj ke ĉio, kion li perlaboris, apartenis al la mastro. Sekve, la ordono “ne ŝtelu” tute ne rilatis la sklavoĵojn. De ili nenion oni povis “ŝteli”, ĉar ili nenion havis. Same la ordono “ne mortigu homon” havis tute alian sencon en epoko de sklaveco ol en epoko, ni diru, de kapitalismo. Sklavon oni libere povis mortigi (almenaŭ en la fruaj epokoj) kaj tio estis tute laŭjura. Ankaŭ morale justa ĝi estis – almenaŭ el vidpunkto de la mastroj! En la epoko de kapitalismo, la kapitalisto ne havas rajton mortigi laboriston. Almenaŭ ne rekte!

Sekve, la moralaj kaj juraj principoj bazitaj sur la ĝenerala fakto de privata posedo validas kaj devas validi en ĉiuj epokoj, kies fundamentoj kuŝas sur la privata posedo, sed ili ne validas en socioj, kiuj sukcesis nuligi la privatan posedon. Kontraŭe, la moralaj kaj juraj principoj, elkreskintaj ekskluzive surbaze de iu konkreta, aparta formo de privata posedo (sklaveco, feŭdismo, kapitalismo), ne validos en socio, bazita sur alia aparta formo de privata posedo. Ne temas, do, pri “esenca identeco” de la homa naturo, sed temas pri identeco aŭ neidenteco de la ekonomia bazo de la socio. Se tiu materia identeco ekzistas, ekzistas ankaŭ morala kaj jura identecoj. Se, kontraŭe, mankas la materia identeco, mankas ankaŭ la morala kaj la jura.

Due, oni forgesas, ke la lingvo evoluas malpli rapide ol la socio. La lingvo havas certan konservativan karakteron. La lingvo ofte enhavas formojn kaj esprimojn, kiuj fakte tute malaktualiĝis. La formo tamen konserviĝis, sed la enhavo de la vorto grave ŝanĝiĝis. Estas, laŭ mia opinio, granda eraro konkludi pri identeco de enhavo surbaze de forma identeco. La vortoj justeco, egaleco, k.t.p. havas hodiaŭ esence alian sencon, ol ili havis en la pasintaj tempoj. Eĉ pli, ankaŭ hodiaŭ ili havas alian signifon, ekzemple, en la buŝo de unu kapitalisto kaj alian en tiu de unu laboristo!

La leĝaro de Hamurabi kaj la aliaj antikvaj dokumentoj tute ne pruvas la eternecon de certaj principoj. Kontraŭe, tiuj historiaj aktoj pruvas, ke ĉiu socio havas siajn proprajn moralon kaj juron, kies radikoj troviĝas en la materia, ekonomia vivo.

Tiel ni venas al materialisma koncepto de juro. Laŭ ĝi la juro estas socia fenomeno, troviĝanta en funkcia rilato kun sia bazo. La materialisma scienco difinas la juron kiel aron da kondutoreguloj, ordonitaj aŭ sankciitaj de la ŝtata povo, kiuj esprimas la volon de la reganta klaso kaj kies apliko estas certigata de la deviga ŝtata povo kun la celo defendi, efektivigi kaj evoluigi la sociajn rilatojn kaj ordojn, konvenajn kaj utilajn por la reganta klaso. Diference de la sennombraj difinoj de burĝaj aŭtoroj, kiuj deziras prezenti la juron kiel esprimon de “eterna justeco”, aŭ almenaŭ kiel rezulton de celado al tiu “eterna justeco”, la donita difino honeste kaj reale ĉirkaŭprenas ĉiujn esencajn elementojn de juro, aparte atentigante al ĝiaj plej profundaj, materiaj radikoj. Ĝi malkovras la klasan karakteron de juro, ĝian relativecon kaj kondiĉitecon de la konkreta soci-ekonomia ordo.

La juro, do, estas nenio alia ol aro da ordonoj de la reganta klaso. Sekve, ĝi ekestas samtempe kun la ekesto de la klasoj. Tio signifas: samtempe kun la ŝtato. Tiamaniere solviĝas ankaŭ la alia problemo, turmentanta la burĝajn teoriistojn: kio estas *prius* la juro aŭ la ŝtato; ĉu, nome, la ŝtato estas kreaĵo de juro, aŭ inverse? Juro kaj ŝtato ekestas samtempe kun la disfalo de la socio en antagonismajn klasojn. Ĝiaj fontoj ne estas ie “en aero”, nek en la kapoj de la filozofoj, sed en la materiaj bazoj de la socio. Tial, por eltrovi ilin, oni sendube devas cerbumadi, sed ne abstrakte, en kabinetoj. Oni devas nur reale rigardi ĉirkaŭ si, oni devas esplori la kondiĉojn materiajn, la rilatojn ekonomiajn, kaj oni tuj komprenos la esencon de la juro.

Estus, tamen, eraro rigardi nur tiun flankon de la juro. Ĝi ne estas nur ordono de la reganta klaso. Tiu ordono estas farita kun la celo progresigi ĝiajn interesojn. La interesoj de la reganta klaso egalas al konservado kaj evoluigo de la ekzistanta sociordo. Tial, post la juraj ordonoj, diference de la moralaj, troviĝas la organizita ŝtata povo, kiu zorgas pri ilia deviga efektivigo en la praktiko. Tiamaniere la juro, kiel ĉiu alia socia fenomeno, siavice influas sian propran bazon, la bazon, el kiu ĝi elkreskis. Ĝi troviĝas en funkcia rilato kun la ekonomia fundamento.

II.

La juro, kiel konate, dividiĝas je pluraj branĉoj. Oni parolas pri konstitucia, administra, civila, k.t.p. juro. Por ni estas grava la divido je interna juro kaj internacia juro. La unua validas interne de la ŝtato, la dua reguligas la interŝtatajn rilatojn aŭ la rilatojn inter privataj personoj, apartenantaj al diversaj ŝtatoj. Se la juro reguligas la rilatojn inter la ŝtatoj aŭ, en certaj okazoj, inter aliaj subjektoj internaciaj (ekz. la estinta Danuba Komisiono), oni parolas pri internacia publika juro. Se temas pri la reguligo de rilatoj inter privataj personoj en internacia kadro, oni parolas pri internacia privata juro. En la limoj de tiu ĉi prelego ni dediĉas nian tutan atenton nur al fundamentaj principoj de la internacia publika juro, kiu kutime estas tute simple nomata internacia juro.

Ofte aŭdiĝas la demando ĉu la Internacia Juro estas entute juro kaj ĉu la nomo de tiu scienca branĉo estas korekta. Laŭ nia opinio, la Internacia Juro sendube estas juro, sed ĝi tamen havas certajn apartajn ecojn, kiuj klare distingas ĝin de la ceteraj juraj branĉoj. Ĝia nomo prefere devus esti interŝtata juro, ĉar temas, ja, pri juraj reguloj kiuj validas en la rilatoj inter la ŝtatoj. Tamen la vorto “internacia” jam tiom enradikiĝis, ke ĝin oni ĝenerale uzas kaj en la scienco kaj en la praktiko. Tial ni opinias, ke en la Internacia Lingvo estas preferinde diri “internacia” ol “interŝtata” juro.

Se la internacia juro estas fakte juro kaj se la difino supre donita estas korekta, tiam ankaŭ la Internacia Juro devus esti enkadrigita per tiu difino. Estas necese tute mallonge esplori tiun demandon, por ke pli reliefe montriĝu la apartaj karakterizaj trajtoj de Internacia Juro kaj de ĝia hodiaŭa signifo.

Antaŭ ĉio estas akcentinde, ke la ŝtatoj, ek de la momento de ilia formiĝo ĝis momento de ilia malapero, ĉiam venadis, venadas kaj venados en reciprokan kontakton. Plena izoliteco ne ekzistas kaj ne povas ekzisti. Inter la ŝtatoj ekestas, evoluas kaj rompiĝas tuta aro da ligoj: ekonomiaj, komercaj, politikaj, kulturaj,

militaj, k.t.p. Tiuj ĉi rilatoj estas reguligitaj aŭ en internaciaj kontraktoj aŭ pere de la t.n. kutima juro, kiu formiĝas en la internacia praktiko. Senkonsidere al demando ĉu temas pro kontrakta aŭ pri kutima juro, estas sendube ke la Internacian Juron en ĉiu okazo formas la ŝtatoj surbaze de ilia reciproka kunlaboro aŭ lukto. Tial ankaŭ la internacia juro estas “aro da kondutoreguloj, ordonitaj aŭ sankciitaj de la ŝtata povo”. Nur ĉi tie la regulojn ne alportas unu ŝtata povo, sed pluraj ŝtataj povoj. Krome, la kondutoreguloj rilatas al la ŝtatoj kaj ne al privataj fizikaj aŭ juraj personoj. Tio ĉi estas la unua karakterizo de la Internacia Juro.

La juro estas ordono de la reganta klaso. En la historio ekzistas epokoj, kiam la samspeca klaso estis reganta en ĉiuj ŝtatoj, ekzemple la sklavposedanta klaso de la urboj-ŝtatoj de antikva Grekujo. En tiuj epokoj la reguloj de la Internacia Juro respegulis la interesojn de tiu samspeca reganta klaso. Sed ekzistas ankaŭ epokoj, kiam ne la sama klaso estis la reganta en diversaj ŝtatoj. Tia, ekzemple, estas nia epoko. Hodiaŭ ekzistas ŝtatoj kun kapitalisma sistemo, ekzistas ankoraŭ duonfeŭdaj ŝtatoj, sed en la internaciajn rilatojn eniras ankaŭ socialistaj ŝtatoj. Kiu klaso en tiaj kondiĉoj estas la “reganta”? Kies esprimo nun estas la Internacia Juro?

Estas sendube, ke malgraŭ la diverseco de la ekonomiaj kaj sociaj sistemoj, tamen ĉiuj ŝtatoj, respektive ĉiuj regantaj klasoj en diversaj ŝtatoj, havas certajn komunajn interesojn. Sekve ili estas rekte interesitaj je kreo kaj konservo de certaj juraj reguloj, ekzemple pri la devo efektivigi la internaciajn kontraktojn, pri la diplomataj privilegioj, pri la militkaptitoj, pri neinterveno en la internajn aferojn de la ŝtato, k.t.p. Tiamaniere unu parto de reguloj de la internacia juro esprimas la volon de diversspecaj regantaj klasoj, kiuj tamen havas certajn komunajn interesojn pri la ekzisto de difinitaj ĝeneralaj principoj kaj reguloj de Internacia Juro.

De la alia flanko oni ne rajtas forgesi, ke la ekstera politiko de unu ŝtato esence respegulas ĝian internan ekonomian kaj socian ordojn. Tiu fakto, interalie, manifestiĝas en la ofte akraj bataloj inter diversaj ŝtatoj por fiksi kiel devigajn regulojn de la internacia juro tiujn principojn, kiuj estas reflektado de la specifeco de la interna ordo. Tial la nuntempa internacia juro ne estas kaj ne povas esti monolita (unueca) kiel la Interna Juro, kiu ĉiam estas esprimo de unueca reganta klaso. Kontraŭe ĝi enhavas kaj kelkajn restaĵojn de feŭdismo (ekz. certajn regulojn de diplomacia ceremoniaro) kaj multajn elementojn de kapitalismo (ekz. la interesajn sferojn, diversajn formojn de protektorato) kaj ĉiam pli da novaj, demokrataj principoj, esence ligitaj al socialismo. La heterogeneco de la Internacia Juro, kaŭzita de la heterogeneco de la regantaj klasoj en diversaj ŝtatoj, estas ĝia dua karakterizo.

Fine, en la Internacia Juro la apliko de la juraj reguloj estas certigata per devigo fare de la unueca ŝtata povo en la manoj de unueca reganta klaso. Kontraŭe en la Internacia Juro la devigo efektivigi per individuaj aŭ kolektivaj mezuroj de la interesitaj ŝtatoj. Ĝi estas la tria karakterizo de la Internacia Juro, kiu per tio distingiĝas de la interna.

III.

Post la supraj skizaj klarigoj pri la karaktero de la internacia publika juro, estos, espereble, pli klaraj ĝiaj hodiaŭaj fundamentaj principoj.

La baza ŝtono, sur kiu kuŝas la tuta konstruaĵo de la nuntempa Internacia Juro estas la principo de *suverena egaleco de ĉiuj pacemaj ŝtatoj* (art. 2 kaj 4 de la Ĉarto de UN). La principo konsistas el tri elementoj, kiuj kompletigas unu la alian: (a) suvereneco, (b) egaleco kaj (c) pacemo.

La *suvereneco*, en plej larĝa senco de l' vorto, estas jura kaj fakta kapablo de la ŝtato efektivigado plenrajte kaj sendepende siajn funkciojn. La koncepto pri suvereneco kiel jura kategorio ekestis en la epoko de formiĝo de unuecaj feŭdisme-absolutistaj monarĥioj, precipe en Francujo. En tiu epoko ĝi havis duoblan socipolitikan sencon. Unuflanke ĝi estis faktoro de unuecigo, utiligata de la reĝo por larĝigi sian povon kontraŭ la feŭdismaj disrompiteco kaj ĥaoso. Aliflanke ĝi estis armilo kontraŭ la universalismaj tendencoj de papismo kaj de la t.n. Sankta Roma Imperio. La suvereneco estis atributo de la monarĥo. Li estis suverena kaj rilate al la civitanoj kaj rilate al la aliaj, eksterŝtataj potencoj. Estas konata la eldiro de Louis XIV: "La ŝtato estas mi". Tiu frazo klare montras la esencon de suvereneco, kiel ĝi tiam estis komprenata.

La franca revolucio proklamis la principojn de popola suvereneco. Kompreneble, la vorto "popola" fakte signifis "burĝa". Nun denove la suvereneco havis duoblan signifon, sed ĉi-foje ĝi estis, unuflanke, direktita kontraŭ la reĝon, kiu estis la elstara pinto de la mortanta feŭdismo, kaj aliflanke kontraŭ la intervenon de la reakcia feŭdisma Eŭropo en la internajn aferojn de Francujo. La suvereneco fariĝis potenca armilo por venkigi la revolucion interne kaj por defendi ĝin de la eksteraj atakoj.

En la epoko de firmiĝo de la kapitalismo, la koncepto de suvereneco ĉiam pli kaj pli perdas sian progresivan karakteron. Ĝi estas komprenata kiel senlima potenco interne de la ŝtato kaj kiel senkondiĉa rajto agi plene laŭ siaj plaĉo kaj bontrovo en la internaciaj rilatoj. Tiu suvereneco, nomita absoluta, estis pravigonta ĉiuspecan ekspluatadon de aliaj popoloj, malobservon de internaciaj kontraktoj, internacian terorisman kaj atakmilitojn.

La teorio pri absoluta suvereneco precipe floris en Germanujo. Hegel, ekzemple, diris, ke ĉiu ŝtato rajtas atake almiliti la aliajn. Laŭ li, la milito estas "suprema esprimo de suvereneco". La fama politikisto Bismarck kutimis diri, ke li ĉiam agas laŭ sia plaĉo kaj ke poste facile troviĝas teoriuloj, kiuj pravigas lian agon. Von Treitzschke opiniis "supera devo de la ŝtato grandigi sian potencon senkonsidere al kontraktoj". Similajn ideojn esprimas Momsen, Bernhardi, Betmann kaj aliaj. La absoluta suvereneco atingis sian kulminon en la krimaj teorio kaj praktiko de la hitlera reĝimo. Por la nazioj la suvereneco signifis ĉionpovecon en la propra domo kaj malkaŝan terorisman en la internaciaj rilatoj. Rompo de internaciaj kontraktoj, sklavigo de aliaj popoloj, atakmilito kaj ĉiaspecaj aliaj internaciaj krimoj – ĉion ĉi la nazioj volis pravigi per la principo de suvereneco!

La moderna koncepto pri suvereneco, kiel ĝi estas formulita en la Ĉarto, signifas gravan progreson. Laŭ tiu koncepto la suvereneco de ĉiu ŝtato estas limigita per same tia suvereneco de la aliaj ŝtatoj, ĉar estas proklamita la principo de suverena *egaleco* de ĉiuj *pacemaj ŝtatoj*. Sekve, la progresiva koncepto de suvereneco haltigas la suverenajn rajtojn de unu pacema ŝtato sur la limoj de same tiaj rajtoj, apartenantaj al alia pacema ŝtato. La suvereneco estas garantiita de la internacia juro kaj ĉiu atako

kontraŭ ĝin estas konsiderata kiel kontraŭjura. Dum la absoluta suvereneco, fakte, pravigas la atakmiliton, la progresiva koncepto de suvereneco estas unu jura armilo por malhelpi la atakmiliton. Plue, ĝi estas instrumento de amikeca kunlaboro inter la popoloj surbaze de ilia plena suverena egaleco kaj reciproka respektado.

La alia elemento estas la *egaleco*. Tiu principo estas ofte malbone komprenata. La egaleco ne signifas la aplikon de egala mezurilo al neegalaj kvantoj kaj kvalitoj. La egaleco signifas adekvate procedi, apliki adekvatajn metodojn. Doni al muso kaj al leono same grandan peceton de lardo kun la celo satigi ilin, absolute ne signifas egale konduti rilate al ili! Leono kaj muso objektive, fakte ne estas egalaj en siaj specifaj ecoj de leono resp. de muso. Sed ili estas egalaj en sia kvalito de vivantaj estaĵoj. Sekve: apliki al ili – kiel du specifaj kvalitoj – la saman procedon, signifas agi malegale; apliki al ili adekvatan procedon, aŭ apliki al ili – kiel tenantoj de identaj kvalitoj (vivantaj estaĵoj) – la saman procedon, signifas agi egale!

En la socio, same kiel en la naturo, interplektiĝas sameco kun malsameco, egaleco kun malegaleco. Du objektoj aŭ aĵoj, rigardataj el unu vidpunkto, estas samaj aŭ egalaj, sed samtempe, rigardataj el alia vidpunkto, ili montriĝas malsamaj aŭ malegalaj. La homoj, sendube, en sia pura eco de “homo” estas egalaj kaj samaj; tamen, rigardataj laŭ aliaj kriterioj, oni trovos inter ili sennombrajn diferencojn: unuj estas altaj, grandaj, nigraj, k.t.p., la aliaj malaltaj, malgrandaj, blondaj, k.t.p.; unuj estas pli fortaj aŭ pli saĝaj aŭ pli kleraj, la aliaj posedas malpli da tiaj ecoj. Ekzistas inter ili naturaj diferencoj, sed ekzistas ankaŭ sociaj diferencoj, kaŭzigitaj de ilia pozicio en la ekonomia vivo. Dum la unuaj estas pli malpli enmaskitaj, la aliaj estas rezulto de konkreta organizoformo de la ekonomio kaj, sekve, ne nur ŝanĝendaj sub certaj kondiĉoj. La celo de tiuj ŝanĝoj estas krei tian ekonomian kaj socian ordon, en kiu la socia pozicio de l’ homo korespondos al lia ĝenerala eco de homo, t.e. en kiu la homoj, senkonsidere al koloro de ilia haŭto aŭ al lingvo parolata aŭ al iu alia akcesora diferenco, atingos tian ekonomian egalecon, kiu respegulos ilian homecan egalecon.

Malproksima eĉ de la nura penso biologiigi unu tian socian aĵon kia estas la ŝtato, mi ne povas ne akcenti unu tre evidentan fakton, ke, nome, ankaŭ inter la ŝtatoj ekzistas kaj sameco kaj malsameco. La ŝtatoj estas samaj en sia eco de “ŝtato”. Tial estas solene proklamita la principo de ilia suverena egaleco, ĉar kiel suverenaj ŝtatoj ili estas, aŭ almenaŭ devas esti, plene egalaj. Tio signifas, ke ĉiu ŝtato havas rajton je ekonomia kaj politika sendependeco; ke la aliaj ŝtatoj ne rajtas enmiksiĝi en ĝiajn internajn aferojn (principo de t.n. ekskluziva jurisdikcio de la art. 2/VII de la Ĉarto); ke ĉiu ŝtato rajtas defendi sin kontraŭ ĉiuj atakoj al sia suvereneco; ke ĉiu ŝtato rajtas postuli egalan konduton en la internaciaj komerco kaj trafiko.

De la alia flanko inter la ŝtatoj ekzistas rimarkindaj diferencoj, precipe koncerne ilian grandecon kaj ekonomian resp. militan povojn. Tiuj diferencoj estas realaj, objektivaj. Unu jura sistemo, kiu ne konsiderus ilin estus ne nur malreala, sed ankaŭ maljusta. Vane oni proklamas ke Usono aŭ Sovjetunio estas laŭ siaj ekonomia aŭ milita fortoj egalaj al ekzemple, Nikarago! La realaĵon oni ne povas ŝanĝi per proklamoj aŭ deklaracioj! Sekve, la principo de unanimeseco, akceptita en la art. 27/III de la Ĉarto por ĉiuj decidoj (krom por la proceduraj) de la Konsilantaro de Sekureco, korespondas al realaĵo. Tial ĝi estas ankaŭ justa. Tial samtempe, ĝi tute ne

kontraŭdiras al principo de suverena egaleco de la pacemaj ŝtatoj. Oni, nome, ne rajtas forgesi, ke al Konsilantaro de Sekureco la aliaj membroj de la Organizaĵo transdonis libervole la ĉefan respondecon por konservi la pacon kaj sekurecon internacian (art. 2). Kiamaniere, se ni deziras resti sur la tereno de realeco, oni do povus konservi tiun plej grandan bonon de la homaro, se ne per komuna, interkonsenta agado de la kvin plej grandaj kaj plej fortaj potencoj, kiuj estas konstantaj membroj de la Konsilantaro? Estas pli ol klare, ke – tute egale ĉu tiu principo de unanimeco estus akceptita aŭ ne – la paco fakte povas esti konservata nur se la plej grandaj potencoj penas trovi kaj trovas komunan starpunkton. Tial, ataki tiun principon signifas aŭ ne vidi la realaĵon aŭ agi direkte kaj intence kontraŭ la interesoj de la paco.

En la kadro de tiuj ĉi pensoj oni devas ankaŭ memori, ke multaj nomas la principon de unanimeco alimaniere, nome “rajto de veto”^{*} Tio, laŭ mia opinio, estas malkorekta. La tiel nomita “veto” havas sian historion, ne tro brilan, cetere. Ĝin uzis la monarĥoj en sia lukto kontraŭ la rajtoj de la parlamentoj. Ĝi, do, havis en la ne malproksima historio reakcian signifon. La “veto” estas unu negative jura regulo por malhelpi la progreson; la unanimeco estas pozitiva principo por konservi la pacon. Ĝia pozitiveco konsistas en tio, ke originale ĝi estis imagita kiel regulo deviganta la kvin grandajn potencojn serĉi kaj trovi komunan starpunkton en la intereso de la paco kaj, sekve, de la tuta homaro. Tiun originalan sencon ĝi devas konservi. La provoj anstataŭigi ĝin per simpla aŭ kvalifikata plimulto de fakte neegalaj unuoj signifas minadon de la tuta sekureca sistemo. Samtempe ĝi signifas nekomprenon de la ideo pri egaleco. Ĉar, oni bone komprenu, la pacon ne povas defendi malgrandaj kaj malfortaj ŝtatoj, sed nur la plej fortaj!

La principo de suverena egaleco respeguliĝas en la Ĝenerala Kunveno de UN, kie ĉiu ŝtato havas unu voĉon. Kontraŭe la malegaleco koncerne la faktan materian forton por konservi la pacon, reflektiĝas en la principo de unanimeco de la konstantaj membroj de la Konsilantaro de Sekureco. Tiu principo efektivas la postulon de vera egaleco kaj justeco, t.e. ke al malegalaj kvantoj oni ne povas apliki la samajn mezurilojn, sed nur la adekvatajn.

La tria elemento estas la *pacemo*. Jam antaŭ la Dua Mondmilito la apliko de perforto estis malpermesita en pluraj internaciaj aktoj. Surbaze de tiuj aktoj, la Interkonsento de la 8 de Aŭgusto 1945 difinis la atakmiliton kiel internacian krimon. Iom pli poste la Internacia Milita Tribunalo en Nürnberg kondamnis la ĉefajn hitlerajn krimulojn, interalie, ankaŭ pro tiu kategorio de internacia krimo. De la alia flanko la Ĉarto de UN malpermesas en sia art. 2. ĉiun minacon per perforto aŭ la aplikon de perforto, kiu estus kontraŭa al la celoj de UN. Estas do sendube, ke, laŭ hodiaŭa pozitiva Internacia Juro, la atakmilito estas ne nur malpermesata, sed ĝi eĉ estas konsiderata plej granda internacia krimo. Konsidere tiun ĉi fakton, estas klare, ke kiel membroj de la Organizaĵo povas esti akceptitaj nur la pacemaj ŝtatoj, t.e. la ŝtatoj kiuj laŭ sia interna socipolitika organizo, donas sufiĉajn garantiojn pri sia neatakemo. Tial, ekzemple, Hispanujo de Franko ne povas esti membro de UN kaj al ĝi oni povus, principe, apliki metodojn, kiujn kontraŭ la pacemajn ŝtatojn oni

* Rimarkigo: la vorto *veto* ĉi tie estas latina, sed ne la Esperanta vorto kun malsama signifo. Ĉi tie temas pri “malpermeso”.

ne rajtas direkti. La ŝtatoj ne pacemaj, ĝuste tial ĉar ili ne estas pacemaj, ne povas havi samajn rajtojn en unu jura sistemo kreita por defendi la pacon kaj efektiviĝi la sekurecon!

Post la analizo de ĉiuj tri principoj – suvereneco, egaleco, paco – kiuj samtempe estas la konsistigaj elementoj de la fundamenta kaj plej larĝa principo de suverena egaleco de la pacemaj ŝtatoj, pli klare elsaltas kaj la signifo de ĉiu opa elemento kaj la senco preciza de la ĝenerala principo. La suvereneco estas limigita per la principoj de egaleco kaj pacemo. La egaleco havas sian radikon en la moderna koncepto pri suvereneco, ŝirmante samtempe la suverenecon, sed ĝi ne koncernas la atakemajn ŝtatojn. La postulo pri pacemo eliras el deziro de la homaro defendi sin kontraŭ la plej terura krimo – la atakmilito, kiu samtempe signifas plej grandan danĝeron por la suvereneco de la aliaj, precipe la pli malfortaj ŝtatoj, kaj kontraŭas esence al egaleco.

El tiu fundamenta principo sekvas tuta aro da aliaj, el kiuj ĉi tie oni povas suprajĉe tuŝi nur du:

Antaŭ ĉio estas menciinda la principo de *kolektiva sekureco*. Ĝi devigas la membrojn de UN apliki komunajn, kolektivajn mezurojn por konservi aŭ restarigi la pacon, kiu estas konsiderata nedividebla. Tio signifas, ke ĉiu ajn danĝero kontraŭ la paco en kiu ajn parto de la mondo, interesas la tutan homaron. Tial la membroj devigas sin, unuflanke, peni solvadi ĉiujn konfliktojn per pacaj rimedoj (diplomataj traktadoj, enketoj, perado, juĝa aŭ arbitracia solvo k.t.p.) dum aliflanke la Organizaĵo, pere de siaj kompetentaj organoj, rajtas rekomendi sub certaj kondiĉoj, tiajn solvojn. Se tiuj metodoj ne efikas, la Organizaĵo rajtas apliki eĉ devigajn rimedojn, inter kiuj la plej radikala kaj la plej forta estas la armita interveno. La individua uzo de armitaj fortoj estas permesita nur en du okazoj: (1) por defendi sin kontraŭ la armita atako, (2) por apliki devigajn rimedojn kontraŭ kiu ajn eksmalamika ŝtato el la pasinta milito, se tiu ŝtato renovigus sian atakpolitikon (art. 51 kaj 53).

Grava progreso estas farita per la akcepto de la demokrata principo, ke *ĉiu popolo rajtas disponi pri si mem* (art. II de la Ĉarto). Ĝi estas pli detale prilaborita en la ĉapitroj XI kaj XII, kiuj pritraktas la tiel domitajn neaŭtonomajn teritoriojn kaj la internacian reĝimon de kuratoreco. La celo de kuratoreco estas helpi la evoluon de la popoloj sub tiu reĝimo en la direkto de memadministrado aŭ sendependeco. Oni, do, ne nur ebligas al tiuj popoloj krei sian propran ŝtaton, sed eĉ devigas la organizaĵon de UN helpi iliajn tiudirektajn penadojn. Eĉ pli, la principo de la art. 1/ II estas potenca armilo en la manoj de ĉiu kolonia popolo (do ne nur de popoloj sub reĝimo de kuratoreco) atingi ankaŭ sian sendependecon per kreo de aparta ŝtato. Laŭ tiu principo, unu konflikto inter kolonio kaj metropolo ne devus esti konsiderata kiel interna afero de la koncerna ŝtato, sed kiel internacia konflikto kun ĉiuj juraj konsekvencoj elirantaj el tiu fakto.

IV.

La ĉefprincipoj de la hodiaŭa Internacia Juro respegulas la nuntempan realaĵon, karakterizitan per la kunekzisto de du ĉefaj ekonomiaj, sociaj kaj politikaj sistemoj: en unu parto de la mondo ankoraŭ regas la kapitalismo, en la alia

konstruiĝas la socialismo. Tiuj principoj grandparte estas kompromisaj formuloj, ebligantaj pacan kunvivadon surbaze de reciproka respekto de ĉiuj ŝtatoj kaj popoloj.

En la kadro de tiu realaĵo, kian sencon povas havi la ideoj pri “mondparlamento” aŭ pri “mondfederacio” aŭ pri “mondregistaro” k.t.p.? Ŝajnas superflue akcenti, ke unu tia “superŝtato” senkonsidere al konkreta nomo, kiun oni povus doni al ĝi, povus konstruiĝi nur surbaze de unueca ekonomia sistemo, kiu nun, kiel konate, ne ekzistas. Sekve, propagandi tiujn ideojn signifas: aŭ ke oni ne komprenas sufiĉe tiun fakton kaj ke, do, oni vole-nevole malgraŭ la plej sincera honesteco kaj idealismo, tamen restas en la limoj de sufiĉa naiveco; aŭ ke oni ĝin komprenas bone kaj ke, do, oni fakte propagandas novan militon kun la celo restarigi la kapitalismon en la tuta mondo. En ambaŭ kazoj povas temi, kompreneble, nur pri iluzioj – honestaj aŭ ne!

La hodiaŭa Internacia Juro estas sufiĉe progresiva, por ke la homaro povu vivi en paco. Oni nur devas ĝin respekti de ĉiuj flankoj; tien direktu sian aktivecon ĉiu bonintenca homo, ĉiu movado vere deziranta la mondpacon. Kaj la rezultoj, espereble, ne forestos!

Noto: La aŭtoro uzas la sufikson -io. Tamen li permesas la ŝanĝon al -ujo ĉar Esperanto Publishing Company ne uzas -io ĝis la Akademio oficiale permesos tion.

LA LINGVA PROBLEMO EN LA SCIENCO

Raporto al la II-a sekcio en Oslo de Prof. I. LAPENNA

Objektiva studo de la lingva problemo en la scienco montras, ke ĝi havas plurajn aspektojn:

La sciencaj esploroj en ĉiu branĉo de la scienco estas objekte malhelpataj ofte eĉ malebligataj pro manko de komuna lingvo kaj pro la neebleco regi kontentige multajn naciajn lingvojn ne nur pasive, sed ankaŭ aktive. Scienca esploristo ofte bezonas verkojn aŭ dokumentojn, skribitajn en aliaj lingvoj. Li ne povas utiligi la necesan materialon pro la nescio de la koncernaj lingvoj. Tial liaj esploroj ofte estas mankaj. La rezultoj de esploroj de unu sciencisto, precipe se li apartenas al malgranda nacio, ne estas alireblaj al la sciencistoj de aliaj nacioj. Eĉ se oni kelkfoje sukcesas venki tiun lingvan malfacilaĵon, ĝi ĉiam estas ligita kun granda tempoperdo kaj kun altaj elspezoj. La perdoj, kiujn devas pro tiu fakto suferi la scienco, estas vere nemezureblaj.

La personaj kontaktoj inter la sciencistoj de diversaj landoj estas treege limigitaj. Tio ne nur ĝenas la interŝanĝadon de spertoj, la liberan diskutadon pri sciencaj problemoj kaj la rapidan diskonigon de la sciencaj akiraĵoj, sed ankaŭ prezentas gravegan obstaklon al la kreo aŭ al la plifirmigo de internacia solidareco inter la sciencistoj. Sufiĉas ĉeesti unu solan internacian sciencon kongreson, por ke tiu ĉi bedaŭrinda vero estu palpeble sentata. La situacio hodiaŭ estis tia, ke fakte dum gravaj internaciaj renkontiĝoj libere evoluigas siajn pensojn preskaŭ ekskluzive nur la sciencistoj, kies gepatraj lingvoj estas la oficialaj, dum la aliaj limigas sin al pasiva aŭskultado. Tial vere intensaj kaj larĝaj intelektaj interŝanĝoj forestas en internaciaj kadroj.

La popularigo de la sciencaj akiraĵoj en la plej larĝaj popoltavoloj estas malhelpata kaj eĉ malebligata pro manko de komuna lingvo. La scienco ĉiam pli kaj pli disbranĉiĝas kreante senĉese novajn specialecojn. En tia situacio nur la sciencaj rezultoj, kiuj havas almenaŭ relative ĝeneralan intereson, povas esti publikigitaj en presita formo, kaj ankaŭ tio povas okazi nur en la plej gravaj naciaj lingvoj de la mondo, kiaj estas la angla, la franca, la hispana, la germana, la japana, la rusa, parte la itala kaj la portugala. En aliaj lingvoj – pro manko de sufiĉa nombro da legantoj-specialistoj – tio ne estas ebla. Tamen, eĉ en la t.n. grandaj lingvoj la publikigo de tre specialaj verkoj estas malfacila kaj ofte neebla. Okazas, ke eĉ en la angla aŭ la rusa, tia verko povas esti publikigita nur en kelkcento da ekzempleroj!

Tia prezentigās la objektiva situacio en ĉiuj branĉoj de la scienco. Tiu stato estas rekonita ankaŭ en la baza programo de UNESKO. En ĝi oni plurloke parolas pri la lingvaj malfacilaĵoj kaj oni akcentas, ekzemple, ke unu el la celoj de tiu organizaĵo estas “rekompensi la malfacilaĵojn, kiuj devenas de la diverseco de la lingvoj” per “progresiva normigo de la terminologio”, per “preparado de multlingvaj vortaroj” per “servoj de tradukado kaj dokumentado”. Mi ne deziras esplori ĉi tie kiom UNESKO sukcesis realigi tiujn taskojn, sed mi nur deziras akcepti la fakton, ke ankaŭ tiu organizaĵo rekonas la lingvajn malfacilaĵojn en la scienco kiel objekte ekzistantajn.

Alia afero estas la subjektiva sento de la unuopaj laborantoj en kiu ajn scienca branĉo. Kiam ni parolas pri tiu ĉi aspekto de la problemo, ni ne povas disigi la lingvan demandon en la scienco de la tuta pozicio kiun tendencas havi la scienco en la hodiaŭa mondo.

Ke la scienco laŭ sia esenca karaktero devus principe servi al la tuta homaro, ke, do, kaj laŭ siaj celoj kaj laŭ sia enhavo mem la scienco devus esti universala, pri tio ne ekzistas ia ajn dubo. Tamen, malgraŭ kaj eĉ spite al tiu sia esenca karaktero, la scienco estis en la lastaj jaroj kaj estas ĉiam pli metata en la servon de unuopa ŝtato. La ondo de naciismo, kiu denove surverŝigās sur nian mondon, ne ŝparis la sciencon. De la sciencistoj oni ĉiam pli postulas, ke ili aktivu nur en la direkto, kiu povas esti utila por la milita potenco de la ŝtato. Multaj sciencaj esploroj, kiuj pli frue estis konsiderataj kiel havantaj intereson por la tuta homaro, nun estas konsiderataj kiel ŝtataj sekretoj. Ofte okazas, ke ne nur oni ne sentas bezonon por reciproka rilatado en internaciaj kadroj, sed eĉ pli, ke tia rilatado estas konsiderata kiel nedezirinda. Mallonge, kiel en la aliaj sferoj de la vivo, ankaŭ en la scienco ekregas ĉiam pli spirito de nacia memsufiĉo. Tiu tendenco manifestigās je la psiko de multaj sciencistoj tiamaniere, ke ili sentas kaj pensas en mallarĝaj naciaj kadroj. Subjektive ili, do, ne sentas en iu ajn pli forta formo bezonon por internaciaj kontaktoj. Sekve ili ankaŭ ne sentas la mankon de komuna lingvo en la internaciaj kontaktoj. Tiu ĉi subjektiva sento sendube malutilas al la scienco kiel tia kaj ĝi ankaŭ malhelpas la firmigon de la pozicioj de Esperanto kiel lingvo taŭga por la scienco.

Inter tiuj du faktaj statoj, nome inter la objektiva universaleco de la scienco kaj la objektivaj lingvaj baroj kiuj ĝenas tiun universalecon, unuflanke, kaj la subjektiva starpunkto de multaj sciencistoj, kaŭzita de la naciisma spirito, aliflanke, troviĝas la problemo kiun ni sciencistoj-esperantistoj devas solvi.

Solvotaj demandoj. Ŝajnas al mi, ke en la nuna situacio, la kunveno de nia sekcio devus pritrakti kaj laŭ ebleco solvi jenajn demandojn:

Kiamaniere prezenti al la sciencaj medioj la lingvan problemon, kiu objekte ekzistas en la scienco, kiamaniere sentigi al ĉiuj sciencistoj la bezonon pri komuna lingvo en la internaciaj sciencaj rilatoj, bezonon, kiun multaj el ili subjektive ne sentas, sed kiu objekte ekzistas; kiamaniere plej trafe montri al la sciencaj medioj la solvon, kiun donas Esperanto?

Por tiu ceo mi sugestas jenajn rimedojn: 1. prelegoj en la universitatoj kaj sciencaj organizaĵoj; 2. artikoletoj kaj informoj pri la ĝisnuna utiligo de Esperanto por la scienco en sciencaj revuoj kaj gazetoj; 3. raportoj pri la laboroj de la sekcio, de ISU, de ISAE, de Scienca Revuo k.t.p. en nacilingvaj sciencaj revuoj kaj gazetoj; 4. recenzoj pri originalaj sciencaj verkoj, publikigitaj en Esperanto, en sciencaj kaj fakaj revuoj; 5. memorando al UNESKO.

La dua demando estas kiamaniere plue disvolvi per niaj propraj fortoj multe pli vastan aplikon de Esperanto por la scienco.

Por atingi tiun celon mi sugestas jenajn rimedojn: 1. instigi la esperantistojn-sciencistojn verkadi originale en Esperanto; 2. nepre aldoni al ĉiu nacilingva verko, skribita de esperantisto, resumon en Esperanto; skribi originalajn studojn en Esperanto kaj klopodi aperigi ilin en la nacilingvaj revuoj; 3. nepre kreskigi la nombron de esperantistoj-intelektuloj per apartaj kursoj por studentoj kaj intelektuloj, per fondado de apartaj studentaj kaj intelektulaj Esperanto-grupoj.

Mi forte emfazas, ke la paraleleco de la laboro sur tiu ĉi kampo estas nepre kondiĉo de la sukceso. Oni ne povas originale verki en Esperanto, se ne ekzistas sufiĉe da legantoj, kiuj aĉetos la publikaĵojn. Oni ne povas havi sufiĉe da tiaspecaj legantoj, se ne ekzistas literaturo, kiu povus ilin interesi. Nur la paralela agado donos kontentigajn rezultojn. Tial estas necese, ke kaj la landaj asocioj kaj ĉiufakaj sciencaj Esperanto-organizaĵoj donu la plej grandan atenton al instruado de Esperanto en la universitatoj kaj ĝenerale en la intelektulaj medioj. Se ni ne solvos tiun demandon, ni ne povos esperi je iu ajn pli rimarkinda paŝo antaŭen sur tiu ĉi kampo.

La Dua Sekcio “Esperanto en Scienco kaj Tekniko” de la 37-a Universala Kongreso de Esperanto en Oslo, post raporto kaj diskuto, kun la celo antaŭenigi la uzadon de la Internacia Lingvo por sciencaj celoj,

r e k o m e n d a s

al la kompetentaj instancoj de la Esperanto-movado kaj al la unuopaj sciencistaj Esperantistoj:

A. *Por disvastigi Esperanton en sciencaj medioj* (1) okazigi prelegojn pri Esperanto kaj scienco en la universitatoj kaj sciencaj organizaĵoj; (2) aperigi artikolojn kaj informojn pri la ĝisnuna utiligo de Esperanto por la scienco (scienca literaturo, I.S.U., I.S.A.E.) en sciencaj revuoj kaj gazetoj; (3) aperigi recenzojn pri originalaj sciencaj verkoj, publikigitaj en Esperanto, en sciencaj kaj fakaj revuoj; (4) interŝanĝi Esp-lingvajn sciencajn verkojn kun la celo diskonigi la Esp-lingvan sciencajn literaturon en sciencaj medioj; (5) ISAE entreprenu paŝojn kun la celo influi nacilingvajn sciencajn gazetojn akcepti Esperantajn artikolojn kaj resumojn; (6) dediĉi la necesan atenton ankaŭ al la scienca laboro farata en la esploraj branĉoj de la industrio.

B. *Por plua utiligo de Esperanto en la Scienco kaj Tekniko*: (1) verkadi originale en Esperanto sciencajn verkojn; (2) skribi originalajn studojn en Esperanto kaj klopodi aperigi ilin en nacilingvaj revuoj; (3) aldoni al ĉiu nacilingva scienca verko, skribita de Esperantisto, resumon en Esperanto kaj/aŭ tradukojn en Esperanton de la registroj; (4) ke la aŭtoroj sendu siajn Esp-lingvajn publikaĵojn al la biblioteko de ISAE, kaj Scienca Revuo aperigu pri tio bibliografion; (5) utiligi Esperanton por internaciaj rilatoj de universitataj internaciaj kluboj laŭ la ekzemplo de la universitato en Zagreb; (6) kreskigi la nombron de Esperantistoj-intelektuloj per apartaj kursoj por tiuj medioj kaj per fondado de apartaj studentaj aŭ ĝenerale intelektulaj grupoj.

C. *Por daŭrigi la esploron pri la materia situacio de la sciencistoj* oni apogon respondante al enketo farata de prof. d-ro F. Egami, kunlaboranto de CED, disponigante al li la necesajn informojn.

D. *Por sukcese fini la enketon pri la socia konsisto de la Esperantomovado*: helpi la laborojn de s-ro C. Keur, kunlaboranto de CED, realigante laŭ eblecoj liajn proponojn.

Prezidanto:
Prof. D-ro I. LAPENNA

En: *Scienca Revuo* 4. 1952/53: 273 (14/15), p. 85–90.

PRI NIA LINGVA KRITIKO

Ke nia literatura kaj scienca kritiko estas la plej forta branĉo de nia tuta aktiveco sur la kultura kampo, tio estas pli-malpli ĝenerale konata. Nia “kritiko” kutime (ne ĉiam, feliĉe!) limigas sin al mallonga resumado de la verko, al kvalitoj de la papero kaj bindo, al nombrado de preseraroj, al fina konkludo, ke la libro estos (aŭ ne estos) “bela ornamaĵo de ĉies biblioteko!”. La kelkaj esceptoj estas ankoraŭ tro kelkaj por povi iel ajn ŝanĝi tiun juĝon. Ĝuste pro sia escepteco ili konfirmas la regulon.

Pri tio, tamen, mi ne deziras hodiaŭ paroli. La problemo estas vere tre grava kaj oni devos iam dediĉi al ĝi profundan kaj ampleksan studon, eble sub la titolo “Kritiko pri kritiko”.

Preskaŭ ĉiu recenzo pri Esperantaj verkoj entenas ankaŭ lingvan kritikon. Iam ĝi estis farata kun tre granda atento. La kritikanto bone studis la problemon antaŭ ol eldiri sian opinion. En la lastaj jaroj okazas ĉiam pli ofte, ke la recenzantoj komprenas tiun sian taskon iom supraĵe. Ne malofte oni prijuĝas la lingvan valoron de iu verko ne el la vidpunkto de la Fundamento, de la lingva tradicio kaj, eventuale, de la faktaj bezonoj pri la plua evoluo de Esperanto, sed pure laŭ siaj personaj gustoj kaj preferoj, kiuj havas nenion komunan kun la menciitaj kriterioj.

Kaj tio povas esti tre danĝera. Des pli, ke la legantoj ordinare estas pli inklinaj akcepti la asertojn de la kritikanto ol la lingvan principon, entenatan en la fakta uzado de iu formo fare de la aŭtoro. Se malantaŭ la aŭtoritato de la recenzanto troviĝas ankaŭ tiu de la revuo, en kiu aperis la kritiko, la tuta afero fariĝas ankoraŭ pli danĝera.

Ĝuste tial mi decidiĝis – vere tre kontraŭvole – respondi al kelkaj prilingvaj rimarkoj de nia tre ŝatata amiko S. Pragano en lia recenzo pri mia verko “Aktualaj Problemoj” (vidu S.R. n-ro 1/1952, p. 31–36).

Antaŭ ĉio mi diru, ke la recenzo apartenas al la supre aludita kategorio de esceptoj. La recenzinto, kun multe da konscienco, klopodis doni seriozan kritikon pri la verko. Tiu aprezado de lia laboro kompreneble ne signifas, ke mi kiel aŭtoro plene konsentas kun ĉiuj liaj diroj. Evidente, tia konsento estas absolute superflua.

Tamen, eĉ en tia altnivela kritiko enŝteliĝis kelkaj eraroj, el kiuj mi ne povas – almenaŭ pretere – ne menci du ĉefajn:

1. En la libro mi diris, ke “la internacia juro rekonas *la* homajn rajtojn”. S. Pragano opinias, ke la artikolo “*la*” (kursivigita de li mem) tute ne havas vivrajton

tie, ĉar la Ĉarto de U.N. rekonas nur nerekte “la ekziston de homaj rajtoj”, do sen la artikolo. Li opinias, ke mia argumentado “elrealiĝas” ĝuste pro tiu nekorekte uzita “la”. Nu, la Ĉarto parolas pri *la* homaj rajtoj en la franca teksto de ĉiuj artikoloj cititaj en la koncerna parto de la libro. Eĉ en la Universala Deklaracio mem estas dirite en la Enkonduko, ke “en la Ĉarto la popoloj de U.N. proklamas ankoraŭfoje sian fidon je *la* fundamentaj homaj rajtoj (france: dans *les droits fondamentaux de l’homme*). Cetere, entute povas temi nur pri la rajtoj, ĉar aŭ iu rajto estas *la*, aŭ ĝi ne estas rajto! “Eta elreliĝo”, do, okazis. Sed ne en la libro.

2. La recenzinto diras, ke la Universalan Deklaracion “trijarojn poste voĉdonis iu komisiono – nek pli, nek malpli!” (p. 33 de S.R.). La ĉapitron pri la homaj rajtoj mi komencis jene: “La 10-an de decembro 1948 la Ĝenerala Asembleo de U.N. akceptis en Parizo la Universalan Deklaracion pri la homaj rajtoj” (p. 73, linio 1 de Aktualaj Problemoj). En tiu ĉapitro estas plurloke – en tiu aŭ alia formo – ripetita tiu konstato. La recenzinto bedaŭrinde ne rimarkis tion. La Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj estas, evidente, multe pli ol “iu komisiono”.

Ŝajnas al mi, ke kritikante tiaspecan verkon oni devus iom pli atente kontroli siajn asertojn.

II.

Kaj nun pri la lingva kritiko:

– “*Kaj ... kaj ...*”. – Ĝi estas logika kaj absolute konforma al la Fundamento. Tial mi uzas kaj uzos ĝin por doni la necesan nuancon. S. Pragano preferus la formon “*ankaŭ ... kaj ankaŭ ...*”. Prof. Privat preferus “*ambaŭ ... kaj ...*”. La propono de S. Pragano ŝajnas al mi erara, ĉar “ankaŭ” signifas “kaj plie, same, egale kiel aliaj”, kio – en la ekzemplo prenita el Aktualaj Problemoj – signifus, ke ne nur la federalaj unuoj kaj ne nur la federacio, sed ankaŭ io tria estas suverena. Kaj tion mi neniel povis nek volis diri. La formon “*ambaŭ bona kaj prava*” Zamenhof malrekomendis en Lingvaj respondoj (Plena Kolekto, p. 64). Ĝi estas anglismo. Cetere, Zamenhof mem uzis la formon “*kaj ... kaj ...*”, ekzemple: “*Kaj mi kaj mia frato*” (Plena Vortaro, p. 213). Tiun formon rekomendas ĉiuj bonaj lernolibroj por komencantoj.

2. “*Konsilo de Sekureco*”. – La vorto “Konsilo” ne plaĉas al la recenzinto. Prof. Privat proponis “Koncilo”. S Pragano preferas “Konsilantaro”. Mi mem uzas “Konsilo”, ĉar

a. Zamenhof mem ofte uzis tiun vorton en la sama senco, ekz. “*konsil*-ano, kunvoki la *konsilon*”;

b. tiel ĝi estas difinita en la Plena Vortaro (p. 253);

c. ĝi havas la saman duoblan signifon en pluraj lingvoj (france *conseil*, itale *consiglio*, ruse *sovjet*, serbokroate *savjet*, germane *Rat* k.t.p.), kio montras la internaciecon de tiu ĝia duobla enhavo;

d. ĝi ne estas malpli logika ol “konsilantaro”: temas, ja, pri nomo de organo kun difinitaj funkcioj kaj neniel pri aro da personoj, kiuj donus iajn “konsilojn”;

e. ĝi estas multe pli eleganta kaj malpeza ol “konsilantaro, konsilanaro aŭ konsilistaro”.

3. “*Ĉiu ajn, ĉiam ajn ...*”. – Sendube la *k*-formoj estas korektaj, sed la *i*-formoj aŭ *ĉ*-formoj ne estas kontraŭaj al la Fundamento. Ofte ili helpas pliprecizigi la penson, ekzemple: “*Ĉu vi aŭdis iun ajn diri tion?*” – “*Ne nur iun ajn, sed ĉiun ajn!*” Afero de tre delikataj nuancoj. Cetere, ilin uzis kaj uzas multaj bonaj stilistoj. Ankaŭ la Plena Vortaro, kompreneble, permesas ilin.

4. “*-ata, -ita*”. – S-ro Pragano diras: “Malpli, kaj nerevokeble, mi povas konsenti pri la uzado de la participaj formoj en la lingvo de Lapenna”. (p. 35 de S.R.). Li diras, ke sur la p. 83 mi skribis “la militkrimuloj estis persekutataj kaj punataj” kaj ke, kelkajn liniojn poste, mi skribis “juĝataj kaj punitaj”. S. Pragano esperas, mi ne informos lin (ridete, krome), ke temas pri preseraro. Mi tuj trankviligu lin: fakte kun rideto mi deklaras, ke tute ne temas pri preseraro. Li, plue, trovas, ke en la frazo “Tiu artikolo estis tiel kunmetita, ke ĝi ne povu esti aplikita” (p. 67 de A.P.), la kursivigita *it* estas erara kaj ke devus esti “aplikata”. Fine, mi skribis, ke post la Unua Mondmilito “estis fondita la Ligo de Nacioj” (p. 95). Kaj S. Pragano kun patoso ekkrias: “Ne, s-ro Lapenna, la Ligo de Nacioj estis fondita ...”.

Mi devas diri, ke la demando pri *-ata, -ita* estis por mi solvita (ne solvata, mi petas) antaŭ 24 jaroj, kiam mi tralegis la unuan lernolibron de Esperanto. Ĉar en kelkaj medioj ĝi bedaŭrinde estas ankoraŭ nur solvata (ne solvita, mi denove petas), ni tuŝu ankaŭ ĝin.

En sia letero de la 23.II.1901 De Beaufront skribis al Bourlet:

“Kiel principon ĝeneralan por *-ata*, prenu: ke tempo *estanta* ekzistas nur, kiam la ago aŭ stato daŭras sufiĉe. En alia kondiĉo la ago aŭ stato jam finiĝis, kiam ni parolas pri ili; sekve ni ne povas uzi *-ata*, sed devas uzi *-ita*. Tiel same se ni parolas ne pri la malvolvado de l’ ago, sed nur pri ĝia rezulto (Ekz.: la proksiman lundon mi estos kunvokita kiel membro de la kriminala juĝantaro) mi uzos *-ita*, ne *-ata*.” (Leteroj de L. L. Zamenhof, p. 17).

Kaj Prof. Waringhien aldonas tute prave: “Bonegaj konsultoj, kiujn pluraj, eĉ eminentuloj, povus ankoraŭ nun konsideri kun profito!” (Leteroj de L. L. Zamenhof, p. 18).

El tiu simpla kaj klara principo sekvas:

1. La formo *-ata* esprimas la *daŭron* de la stato aŭ ago: *La domo estas konstruata jam plurajn monatojn, sed ĝi ankoraŭ ne estas konstruita*. Male, la formo *-ita* esprimas finitecon: *La domo estas konstruita kaj oni povas ekloĝi en ĝi*.

2. Depende de la senco de la verbo kaj de la kunteksto, *-ata* povas signifi ripetiĝon de la ago, ekz.: *La membroj de la komitato estas elektataj ĉiun trian jaron; en la oficejo de UEA estis ĉiutage ricevataj multaj leteroj*. Male, *-ita*, pro sia esenca karaktero de finiteco, neniam per si mem povas signifi ripetiĝon, ekz.: *La membroj de la estraro estas (ĵus) elektitaj; la komitato estis elektita antaŭ du jaroj; en la oficejo de UEA estis ricevitaj, en 1951, dudek mil leteroj*. En la lastaj ekzemploj tute ne temas pri ripetiĝo de la ago, sed pri unufoja apliko de la koncernaj verboj (elekti, ricevi) al unu sola subjekto konsistanta el pluraj eroj.

3. Ekzistas verboj, kiuj, pro sia interna signifo, lasas ian rezulton post kiam ili estas efektivigitaj (ekz.: vesti, skribi, fondi, legi, apliki, ricevi k.t.p.), sed ekzistas ankaŭ verboj, kies senco elĉerpiĝas en la ago mem (ekz.: havi, ami, posedi, vivi k.t.p.). Tial, la formo *-ita*, se oni uzas ĝin kun la verboj de rezulto, signifas, ke la

koncerna ago *komplete* finiĝis kaj ke, pro la karaktero de la verbo, restis rezulto. Se ni diras “*la letero estas skribita*”, ke oni ĵus skribis la *tutan* leteron, *de la komenco ĝis la fino*, kaj tute ne signifas, ke oni skribis *nur parton* de ĝi. Sekve, la rezulto estas “*skribita letero*“, nome plene finita letero. Ĉe la verboj de daŭro sen rezulto *-ita* same tiel, signifas finiĝon de la ago, sed, pro la karaktero mem de tiuj verboj, restas nenia rezulto. Ĉe ili, kompreneble, gravas antaŭ ĉio la ago mem. Ĝin oni kutime deziras akcenti. Tial la formo *-ata* estas multe pli ofta: *amata virino, konata homo*. Ankaŭ la finiĝon de la ago oni prefere esprimas per *-ata*, sed, kompreneble, kun aldona vorto, kiu tion montras, ekz.: *ne plu amata*. Tamen, ankaŭ la formo *-ita* estas tute bona, se *-ita*, pro la senco de la verbo en tiu konteksto, povas montri *nur la finiĝon* de la koncerna ago kaj *neniel ian ajn ĝian rezulton*, ekz. *Havata pasero estas pli bona ol havita ansero*.

4. La formo *-ata* montras samtempecon kaj la formo *-ita* antaŭtempecon en la kompleksaj tempoj. Pro la esenca karaktero de *-ata* (daŭro), tio estas tre klare videbla kaj forte sentata. Se ni diras “*Kiam la Ligo de Nacioj estis fondata, multaj homoj esperis ...*”, oni tuj komprenas, ke la homoj esperis en la tempo kiam okazadis la fondado de la Ligo kaj ne en la tempo antaŭ tiu fondado aŭ post ĝi. Kiel ni vidis, *-ita* montras ne nur ke la ago okazis, sed ankaŭ ke ĝi *finiĝis*. Ĝuste pro tiu tre akcentita senco de finiteco estas konsilinde uzi adverbbon por pli klare montri la antaŭtempecon, ekz. “*Ĵus kiam la letero estis skribita, li alvenis*”.

Pro la fakto, ke kutime estas multe pli grave scii ĉu iu ago finiĝis ol ĉu ĝi nur okazis (daŭris), en la praktiko la formo *-ita* estos multe pli ofta ol la formo *-ata*. Des pli, ke uzante tiun formon oni ĉiam inkluzivas la ideon, ke la koncerna ago estis ankaŭ *-ata*.

El ĉio dirita sekvas, ke la uzon de unu aŭ de la alia diktas: a. la ĝenerala signifo de la koncerna verbo; b. ĝia konkreta signifo en difinita kunteksto; c. tio, kion oni fakte deziras diri, precipe ĉu oni volas akcenti la agon mem, ĝian daŭron, do ĝian nefinitecon (*-ata*), aŭ la rezulton de la ago, ĝian finitecon (*-ita*).

La ĉefa kaŭzo de eraroj sur tiu ĉi kampo estas, ke oni forgesas al la esenca karaktero de *-ita*, nome al ĝia finiteco, kaj al la esenca karaktero de *-ata*, nome al ĝia signifo de daŭro aŭ ripetiĝo.

Oni, fine, komprenu, ke *estis -ata* absolute ne signifas, ke la koncerna ago finiĝis, sed nur ke ĝi daŭris aŭ ripetiĝis en la pasinteco. Se oni deziras diri, ke ĝi finiĝis, tiam la formo estos *-ita*. Se la ago finiĝis en la estanteco, onid evas diri *estas -ita*, ekz.: *La preĝejo estas konstruita*. Se tiu ago finiĝis en la pasinteco, oni devas diri *estis -ita*, ekz.: *La preĝejo estis konstruita* (en 1526). En tiu ĉi lasta ekzemplo *estis* rilatas al difinita pasinta momento, kiun fiksas la verbo kun la pasiva participo, nome al momento, kiam la lasta ŝtono estis metita (ne metata) en la konstruaĵon, kiam la preĝejo ne plu estis konstruata, sed konstruita. Se tio okazis la 23-an de Novembro 1526 precize je la 11-a h matene, tiam tiu *estis* rilatas ĝuste al tiu momento, ĉar en tiu momento ĉesis la aga funkcio de la verbo *konstrui* kaj komenciĝis la stato, kiun ĝi rezultigis (konstruita).

Oni, plue, komprenu, ke ĉiu *-ita* inkluzivas la ideon de *-ata*, ĉar nenio povas esti *-ita*, kio ne estis antaŭ tio *-ata* (por ke infano estu vestita, ĝi, evidente, antaŭ tio devis esti vestata), sed ke neniu *-ata* ion ajn diras pri *-iteco*. Iu artikolo – ekzemple

tiu ĉi – povas esti legata, sed ĉu ĝi estos ankaŭ legita dependas de la pacienco de la leganto elteni ĝis la fino tiun ĉi klarigadon pri kelkaj aferoj. Se li tion ne faros, tiam post kelka tempo, kiam tiu legado fariĝos pasinteco, li povos diri, ke la artikolo *estis legata*, sed li ne povos diri, ke ĝi *estis legita*. Se, male, li venos ĝis la fino, li povos diri ankaŭ tion. Li eĉ diros nur tion (legita). Kaj tio, samtempe, signifos, ke la artikolo estis antaŭ tio legata kaj, se oni insistas, eĉ legata. Tiamaniere *-ita*, kiu signifas antaŭtempecon en la kompleksaj tempoj, ĉi tie (kiel ĉiam cetere) – pro sia karaktero de finiteco – signifas posttempecon en la rilato al la antaŭaj stadioj de la sama verbo (*legata* kaj, antaŭ tio, *legota*). Tiu ĉi fakto povas krei konfuzon kaj rezultigi erarojn, se oni ne atentis al ĝi.

III.

Nun ni revenu al la pasivaj participoj kritikitaj de S. Pragano:

1. Sur la p. 83 de Aktualaj Problemoj oni fakte legas pri militkrimuloj, kiuj estis persekutataj kaj punataj. La formo *-ata* estas korekta, ĉar temas pri pluraj internaj leĝoj, surbaze de kiuj multaj krimuloj en diversaj landoj estis persekutataj kaj punataj. Estas akcentita la ripetiĝo de la agoj (persekuti kaj puni). Ĝuste tiun faktan mi deziris reliefigi uzante la formon *-ata*.

2. Sur la sama paĝo oni povas legi, ke “la ĉefaj militkrimuloj estis juĝataj kaj punitaj”. Ĉi tie temas pri difinita kategorio de militkrimuloj (la ĉefaj). Kiam mi skribis tiujn liniojn, ili ĉiuj jam estis punitaj. La ago “puni” tiam jam okazis kaj finiĝis. Ne temas pri ripetiĝo. Sekve, la sola korekta formo estas *punitaj*. Male, la formo *-ata* estas preferinda en *juĝataj*, ĉar tiamaniere estas akcentita la ago mem de juĝado kaj ĝia daŭro (oni juĝadis ilin dum pluraj monatoj).

3. Mi skribis, ke la art. 227 de la Versaja kontrakto estis tiel kunmetita, ke ĝi ne povu esti *aplikita*. Sinjoro Pragano demandas kial ne *aplikata*. Jen la respondo:

La menciita artikolo entenis preskribon pri juĝado al germana eksimperiestro Vilhelmo la Dua. Tiun artikolon, se ĝi ne estus tiel kunmetita, oni estus povinta apliki nur unu fojon, nome nur por juĝi la eksimperiestron. Sekve, neniel estas imagebla la ripetiĝo de la ago. Tial oni devas diri *aplikita*, des pli ke temas pri negativa formo, kio implicas la ideon “eĉ ne unu fojon”.

4. Fine, pri la Ligo de Nacioj, kiu laŭ mi estis fondita kaj laŭ s-ro Pragano nur fondata. Evidente, mi tute ne volis paroli pri la sufiĉe longdaŭra fondado de la Ligo, sed mi volis akcenti la rezulton de tiu fondada laboro, nome, ke la Ligo estis fondita, ke oni finfondis ĝin. Kompreneble, oni povus uzi ankaŭ la formon *-ata*, se oni dezirus diri ion alian. Kaj mi havas absolute nenion kontraŭ tio, ke nia amiko Pragano aŭ kiu ajn diru, ke la Ligo estis fondata, ĉar tio ĝi sendube estis antaŭ ol esti fondita. Nur, en tiu kazo, ili ne miru, se – pro ebla nescio de la faktoj – oni demandos ĉu ĝi estis ankaŭ fondita.

Mi esperas, ke nun la afero estas klarigita. Se jes, oni ne diru post kelka tempo: ĝi estis klarigata, ĉar *-ita* devas resti *-ita* ne nur en la estanteco, sed ankaŭ tiam, kiam la estanteco jam fariĝis estinteco. Kaj oni bone memoru, ke *estas -ita* neniam povas egali al *estis -ata*, nek tiu lasta al *estis -ita*. Tio, kio estas *-ita*, restas *-ita*. Se la pomo estas manĝita, tiam – parolante morgaŭ pri tiu sama manĝita pomo

– oni devas diri: *La pomo estis manĝita kaj ne manĝata*. Nenia escepto por la Ligo de Nacioj!

La lingva kritiko estas sendube tre necesa. Ĝi helpas al la aŭtoroj plibonigi sian lingvon: ĝi atentigas la legantojn pri eraraj formoj; ĝi kontribuas al konservo de la lingva unueco; ĝi montras la vojon por la plua evoluigo de Esperanto. Tial ĉiuj, inkluzive la aŭtoroj, devas esti dankemaj al la recenzantoj pro tiu grava laboro, kiun ili faras. Tamen, se la kritiko korektas fakte korektajn formojn – nome formojn, kiuj estas konformaj al la Fundamento – ĝi ne nur ne atingas sian celon, sed, male, ĝi kreas superfluan konfuzon.

Fine, ankoraŭ io: Ekzistas lingvoj, kiuj pro siaj rigidaj reguloj katenas la penson. La genia simpleco de la Internacia Lingvo eligas ĝin el miljaraj ĉenoj kaj regalas ĝin per potencaj flugiloj de libera, adekvata esprimo. Ni ne fortranĉu tiujn flugilojn! Ni ne permesu, ke la ombro de la naciaj lingvoj malklarigu la brilon de Esperanto. Nia penso ne estu perfortata de la lingvo, sed la lingvo estu regata de ĝi!

Komento de la Redaktoro:

Ni konsentas – tiel ŝajnas al mi – ke *-ita* signifas finitecon. Se ni do pri io malkonsentas – kaj nekontesteble malkonsento ekzistas – evidente la objekto de nia malkonsento estas *-ata*. Laŭ profesoroj Lapenna, Waringhien, k.a. *-ata* esprimas *daŭron* aŭ *ripetiĝon*. Laŭ alia esperantistoj, inter kiuj s-ro Pragano kaj mi mem, *-ata* signifas nur la *okazon*, la aktualan “suferon” de la ago.

Estas verboj esprimantaj nedaŭran, nepre kompletan agon kiu lasas ian rezulton, ekz. *ricevi, fondi, elekti, perdi, trafi*, k.t.p. Se io estas ricevata, fondata, elektata, perdata, trafata, k.t.p., tio nepre implicas ke post tiu okazo ĝi estas ricevita, fondita, elektita, perdata, trafita, k.t.p.

Ekzistas ankaŭ verboj esprimantaj daŭran agon, ĉesigeblan antaŭfine, kiu do eventuale lasas nekompletan, nefinitan rezulton, ekz. *skribi, legi, konstrui*, k.s. Pri tiaj ĉi prof-o Lapenna asertas ke *skribita*, leg *ita*, konstru*ita*, k.t.p. signifas, kaj signifas nur, *finskribita, finlegita, finkonstruita*, k.t.p. En Amsterdamo – kaj kredeble simile en multaj urboj de la mondo – ekzistas malnova preĝejo (la t.n. Nova Preĝejo), konstruita antaŭ pluraj jarcentoj, preĝejo kiu laŭ la lingvouzo de prof-o Lapenna ne estas konstruita (ĉar oni projektis surkonstrui turon, kiu turo tamen restis nur projekto), nek konstruata (ĉar la konstrulaborojn oni definitive ĉesigis antaŭ jarcentoj). La libroj – por jam ne paroli pri ĵurnaloj kaj gazetoj – kiuj estas nek legitaj (laŭ prof-o Lapenna), nek legataj, evidente estas multegaj. Se mi do komence diris, ke ŝajnas ke ni konsentas pri tio ke *-ita* signifas finitecon, tiu konsento tamen ne estas absoluta. En kazoj kie miskompreno eblas, mi preferus diri eksplicite, ke libro estas aŭ parte legita, aŭ, kontraŭe, ĝisfine legita, finlegita, aŭ ellegita, – preĝejo ne finkonstruita, aŭ finkonstruita. Sed, laŭ la ekzemplo de s-ro Lapenna: “La preĝejo estis konstruita (en 1526, la 23an de Novembro, je la 11a horo matene)”, ĉar en tiu momento oni ĉesigis (kvankam ne finis!) la konstruadon. Eble li kontraŭdiros, ke la origina plano ne multe gravas. Eble ke ne, en la kazo konsiderata. Sed multaj laboroj estis ĉesigataj tiom antaŭfine, ke la rezultaĵo taŭgis fakte por nenio kaj certe ne por la intencita celo. Ĉu do ankaŭ tie s-ro Lapenna volus paroli pri konstru*ita* rilate al

la momento de la ĉesigo de la konstrulaboroj? La samo rilatas, kompreneble, al *skribado* (de leteroj). Iom alie estas koncerne la *legadon* (de libroj). Ja la teksto estas fakto, ne projekto aŭ intenco. Se mi diras, ke iu numero de iu gazeto estas de mi legita, tio nepre ne signifas ke mi ĉion legis en ĝi, sed nur, ke mi legis en ĝi tion kio (plej) interesis min kaj ke por la cetero mankas al mi tempo kaj/aŭ interesiĝo, tiel ke mi ne plu bezonas ĝin. Tamen se mi diras ke iu libro aŭ iu aparta artikolo estas de mi legita, kredeble mi tute legis ĝin. Se ne, mi devus precizigi, aldonante la vorton “parte” aŭ ion similan.

Konklude: Se mi parolas pri la *okazo* de io kaj uzas por tion esprimi pasivan participon, mi uzas la formon *-ata*. Se mi parolas pri la rezultinta *stato*, mi uzas la formon *-ita*.

Kvankam ne tute akceptante miajn argumentojn, ankaŭ s-ro Isbrücker, la prezidanto de la Akademio, okupas la saman starpunkton en ĉi tiu afero. Jam de longe li intencas antaŭmeti ĉi tiun temon al la Akademio. Espereble, do, post ne tro longa tempo ni havos verdikton de ĉi tiu instanco.

GENOCIDO – NOVA KATEGORIO DE INTERNACIA KRIMO

Prelego en Internacia Somera Universitato, Oslo 1952

Ne estas ĉi tie la loko por esplori pli profunde la esencon de la juro, nek por prezenti pli detale ĝiajn diversajn branĉojn. Estas, tamen, necese familiariĝi enkonduke kun kelkaj fundamentaj nocioj de unu el la plej gravaj juraj branĉoj, nome de la kriminala juro.

La kriminala juro pritraktas la krimon kaj la punon. Ĝi estas tiu branĉo de la juro, kiu difinas la krimon, fiksas la kondiĉojn de kriminala respondecado kaj organizas la sankciojn. La tuta jura sistemo konsistas el la aro da inter si kunligitaj ordonoj. Nur malgranda parto de tiuj ordonoj havas kriminale-juran karakteron. Temas ĝuste pri tiuj ordonoj, kiuj havas la celon protekti la ĉefajn, la fundamentajn valorojn de iu socio. Kompreneble, la menciitaj valoroj ne estas identaj en ĉiuj historiaj epokoj, nek en ĉiuj socioj de la sama epoko. Ili varias depende de la ĝenerala evoluo de la homaro, depende de la ekonomia kaj socia sistemo. Tial, en iu jura ordo difinita valoro estas protektata de la kriminala juro, dum en alia ĝi ne havas tiun protekton. En ĉiu okazo, kiam en iu socio iu valoro estas konsiderata kiel fundamenta por la plua ekzisto de la aktuala ekonomia kaj socia ordo, la ŝtata potenco, nome la socia grupo, kiu estas la fakta tenanto de la ŝtata potenco, donas al tiu valoro kriminale-juran protekton. Tio signifas, ke ĝi proklamas ĉiun agon aŭ neagon, direktitan al detruo de tiu valoro kiel kriman. Sekve, la krimo estas malpermesita ago aŭ neago, sankciita de puno. El tio sekvas du gravaj principoj. La unua estas, ke neniu ago aŭ neago povas esti konsiderata kiel krimo, se la ago ne estis malpermesita sub sankcio de puno, aŭ se, same tiel, la agado ne estis ordonita en difinitaj cirkonstancoj sub tia sankcio. La dua principo estas, ke al la ago, kiam ĝi estas malpermesita, aŭ al la neago, kiam la ago estas ordonita, oni povas apliki nur tiujn punojn, kiuj estas preskribitaj por la konkreta kazo de la jura ordo.

1. La koncepto de Internacia Kriminala Juro

Kiel oni vidas, ĉiu ŝtato havas sian propran kriminalan juran sistemon. Tamen, pro la ĉiam pli granda interdependeco de la diversaj mondopartoj, kiel ankaŭ pro la egaliĝo de la civilizoj, la samaj valoroj ĉiam pli kaj pli estas konsiderataj kiel komunaj por diversaj sociaj ordoj. Ĉar ĉiu ŝtato havas jurisdikcion nur sur sia propra

teritorio, montriĝis la bezono protekti kelkajn el tiuj fundamentaj valoroj ankaŭ en la internacia kadro. Tial en la internaj juraj ordoj ekzistis kaj ekzistas juraj normoj, kiuj reguligas la aplikadon de la kriminala juro en la spaco. Tiuj reguloj preskribas kiu el la kriminalaj leĝoj estas aplikenda al krimo farita sur difinita teritorio. Ĉio ĉi apartenas al la interna juro.

Sed, aliflanke, jam frue oni utiligis ankaŭ la internacian juron por persekuti la krimon. Tiele en multaj duflankaj aŭ kolektivaj internaciaj kontraktoj la kontraktintaj partioj interkonsentis pri ekstradicio de krimuloj aŭ pri punado de iuj krimoj. Inter tiuj lastaj estas aparte menciindaj la detruo aŭ difektado de la submaraj kabloj, la falsado de mono, la komerco per narkotikoj, la disdonado de pornografia literaturo k.a. Paralele kun tiuj kontraktoj, la konata *Ĝeneva konvencio* de la jaro 1906 kaj la *Haga konvencio* de la jaro 1907 devigis la militantajn ŝtatojn puni la personojn el la propraj armeoj, farintajn difinitajn krimojn.

La menciitaj konvencioj apartenas al la internacia publika juro. Kvankam ili pritraktas objektojn apartenantajn al la kriminala juro, tamen, ili ankoraŭ ne povas esti konsiderataj kiel parto de internacia kriminala juro. Ili apartenas al ĝenerala internacia publika juro kaj tial ĉiuj demandoj koncerne ilian validecon, interpretadon k.t.p. estas solvataj laŭ la principoj de tiu jura branĉo.

La internacia kriminala juro naskiĝis fakte kiel aparta, nova jura branĉo nur post la dua mondmilito. Ĝi ekestis en kunligo kun la demando pri paco kaj milito. Kiel konate, en la antikva epoko nek la milito mem estis konsiderata kiel krima, nek kia ajn konduto de la malamikaj partioj unu al la alia kiel kontraŭa al la kriminala juro. La milito estis konsiderata kiel esprimo de suvereneco kaj kiel unu el la fundamentaj rajtoj de la ŝtato. En la pli nova tempo, pro la ĉiam pli oftaj kaj ĉiam pli teruraj militoj, unuflanke, kaj pro la kreskanta konsciiĝo pri la komunaj interesoj kaj pri la nepre necesa solidareco de la homa speco, aliflanke, aŭdiĝis ĉiam pli fortaj voĉoj, postulantaj ne nur la reguligon de la militaj aktivecoj, sed ankaŭ la kriminalan respondecon en okazo de malatento al almenaŭ iuj el tiuj reguloj. Krome, ne nur en la teorio, sed ankaŭ en la mensoj de la amasoj ĉiam pli maturiĝis la ideo ke la agreso, nome la atakmilito, estas per si mem la plej granda krimo.

La evoluo de tiu ĉi penso estas pli detale prezentita en mia libro *Aktualaj Problemoj de la Nuntempa Internacia Vivo*. Ĉi tie estas nur akcentinde, ke post la unua mondmilito, la *Versaja kontrakto* antaŭvidis la juĝadon al la Germana eksimperiestro Vihelmo la Dua “pro la plej granda malobeo al internacia moralo”, sed ke tiu juĝado neniam okazis. Same tiel la *Versaja kontrakto* antaŭvidis, ke diversaj militkrimuloj estos juĝataj de milittribunaloj de la aliancanaj potencoj, sed ankaŭ tio ĉi restis nur morta litero.

Inter la du mondmilitoj – precipe post la fama *Pakto Briand-Kellogg* kiu proklamis la militon krimo – ĉiam pli aktualiĝis la demando kiamaniere efike protekti la pacon per rimedoj de kriminala internacia juro. Kvankam pri tiuj aferoj oni multe diskutis, tamen nenio estis farita sur tiu kampo.

Tiam eksplodis la dua mondmilito. La krimoj, faritaj dum la pasinta milito, transpasis ĉion, kion eĉ la plej riĉa fantazio povis imagi. Oni ne nur mortigis homojn. Oni mortigadis ilin sisteme, preskaŭ science. Veraj hombuĉejoj kreiĝis ĉie tra Eŭropo. Milioj da senkulpaj estuloj perdis sian vivon en plej teruraj suferoj. Ilia

sango ruĝigis la konsciencojn. Iliaj agonij vekrioj larmigis la okulojn. Iliaj oferoj postulis justecon! Ion, almenaŭ ion oni devis fari por puni la krimulojn.

Jam en la jaro 1943 oni komencis klare distingi du kategoriojn de militkrimuloj.

Al la unua kategorio apartenas tiuj militkrimuloj, kiuj en diversaj landoj, kiel anoj de la okupantaj armeoj, faris diversajn krimojn. La konata *Moskva Deklaracio* de Oktobro 1943 antaŭvidis, ke tiuj krimuloj estos transdonitaj al la landoj, en kiuj ili faris siajn krimojn, por ke ili estu juĝataj de la enlandaj ŝtataj tribunaloj.

La dua kategorio de militkrimuloj estas la t.n. “ĉefaj militkrimuloj”, nome tiuj personoj, kiuj mem, per siaj propraj manoj, ne pendumadis, ne sufokadis, ne turmentadis, sed kiuj, tamen, estas ĉefe respondecaj. Pri la krimuloj, apartenantaj al tiu dua kategorio, la *Konferenco de Potsdam*, okazinte en 1945, decidis, ke ili estos “kiel eble plej baldaŭ transdonitaj al justa juĝado”.

Fakte, jam la 8-an de Aŭgusto 1945, Britio, Usono, Sovetunio kaj Francio subskribis apartan Kontrakton pri la persekutado kaj punado de la ĉefaj militkrimuloj. Al la Kontrakto estis aldonita la *Statuto de la Internacia Milittribunalo*.

Laŭ la aktoj de la 8-a de Aŭgusto kaj laŭ la Statuto de la Internacia Tribunalo por la Malproksima Oriento, ekzistas tri kategorioj de internacia krimo.

Al la unua kategorio apartenas la *krimoj kontraŭ la paco*, nome, la planado, preparado aŭ instigado al agreso, aŭ al milito, per kiu oni rompas la internaciajn kontraktojn, interkonsentojn aŭ garantiojn. Estas konsiderata kiel krimo kontraŭ la paco ne nur la agreso mem, sed ankaŭ ĉiu ajn partoprenado en la komplotoj por ĝia realigo.

Al la dua kategorio apartenas la *krimoj kontraŭ la leĝoj kaj kutimoj de la milito*. Temas precipe pri agoj, kiujn malpermesas la *Kvara Haga Konvencio* de la jaro 1907 kaj ĝia Aldona Regularo. Kiel ekzemplojn ni mencias: mortigo, turmentado, aŭ sendado al devigaj laboroj de la civila loĝantaro en la okupaciitaj landoj; mortigo aŭ turmentado de la militkaptitoj; rabado de la privata aŭ publika havaĵo; superflua detruado de urboj, lokoj kaj vilaĝoj; ruinigoj, kiuj ne estas pravigeblaj per la bezonoj de la milito.

Al la tria kategorio apartenas la *krimoj kontraŭ la humaneco*. La krimoj de tiu kategorio estas tre multnombraj. La mortigo, la ekstermado, la sklavigo aŭ disloĝigo de la civila loĝantaro antaŭ aŭ dum la milito estas, ekzemple, krimo kontraŭ la homeco. Ankaŭ la persekutoj pro politikaj, religiaj aŭ rasaj kaŭzoj apartenas al tiu kategorio de internacia krimo, se tiuj agoj estas faritaj en kunligo kun kiu ajn alia internacia krimo.

Kiel oni vidas, la unuopaj internaciaj krimoj povas esti faritaj aŭ dum la milito, aŭ antaŭ ĝi, ekzemple la planado de la agreso, aŭ la persekutoj pro politikaj kaŭzoj. Tamen, ĉiu el tiuj agoj, por ke ĝi estu krima, devas esti iamaniere ligita al la milito. Tion mi aparte akcentas, ĉar ĝi estas grava manko, precipe kiam temas pri la krimoj kontraŭ la homeco. Ekzemple, laŭ la stato antaŭ la konvencio pri genocido, ekstermado de iu nacia, rasa aŭ religia grupo, se tiu ekstermado ne estis ligita al preparado de agreso, ne povis esti konsiderata kiel internacia krimo.

Estas ĝenerale konate, ke la ĉefaj militkrimuloj de la aksaj potencoj estis juĝataj en la grandaj procesoj de Nürnberg kaj Tokio. Ne nur la aktoj mem, surbaze

de kiuj okazis la juĝado, sed ankaŭ la procesoj prezentas riĉan juran materialon, kiu konsistigas la bazon de la nova branĉo: La internacia kriminala juro.

Unuavide estas facile rimarkebla la diferenco inter la diversaj konvencioj ekzemple kontraŭ la komerco per narkotikoj aŭ kontraŭ la pornografia literaturo, unuflanke, kaj la ĵus priskribitaj krimoj, aliflanke. En la unua okazo temas pri veraj internaciaj krimoj, ne antaŭviditaj en la kriminalaj leĝoj de la unuopaj landoj, sed antaŭviditaj de la internacia juro. la ordinaraj krimoj de komuna juro estas krimoj laŭ la internaj juraj ordoj. Ili estas persekutataj de internaj tribunaloj. La fakto, ke kelkfoje ankaŭ internaciaj konvencioj okupiĝas pri ili, ne forprenas de ili la karakteron de krimo apartenanta al interna jura ordo. Male, la internaciaj krimoj ne nur kutime ne estis antaŭviditaj de la interna jura ordo, sed, eĉ pli, la interna jura ordo permesadis tiujn krimojn, kiuj estis farataj de la ĉefoj mem en la koncernaj ŝtatoj. Ĝuste tial estis necese persekuti ilin per rimedoj de internacia juro kaj puni ilin per internaciaj organoj.

Laŭ la enhavo, la internacia krimo detruas la plej grandajn valorojn de la internacia komunaĵo. Tio antaŭ ĉio validas por la ĉefa internacia krimo, nome, por la agreso, sed tio validas ankaŭ por la du aliaj kategorioj, nome, por la militkrimo kaj por la krimo kontraŭ la homeco. Tial oni povas difini la internacian krimon *kiel agon aŭ neagon, antaŭviditajn en internacia akto, direktitajn al detruo de la fundamento de la internacia socio kaj sankciitajn de puno*. Siavice la internacia kriminala juro estas tiu branĉo de la internacia publika juro, kiu difinas la internacian krimon, fiksas la kondiĉojn de internacia kriminala respondeco kaj organizas la sankciojn.

2. Genocido

La rasismo ne nur provas teorie pruvi la superecon de unu raso aŭ nacio super ĉiuj aliaj, sed ĝi ankaŭ realigas en la praktiko tiun principon, kies lasta konsekvenco estas ekstermo de aliaj rasaj, naciaj aŭ religiaj grupoj. La nazioj mortigis nur en Osvjencin de la 1-a de majo 1940 ĝis la 1-a de decembro 1943 2,5 milionojn da hebreoj. Entute la nazioj murdis per plej teruraj metodoj ĉirkaŭ 6 milionojn da hebreoj. Krome, ili mortigis plurajn milionojn da personoj apartenantaj al aliaj, precipe slavaj nacioj. Ĉi tiuj krimegoj estis nur parte ligitaj al la menciitaj tri kategorioj de internacia krimo. Tial ili estis nur parte punitaj. Tia ekstermado de rasaj, naciaj aŭ religiaj grupoj ne povis esti konsiderata kiel krimo laŭ la aktoj de la 8-a de Aŭgusto, se ĝi ne estis ligita al la agreso. Tamen, la konscienco de la homaro konsideris kaj konsideras tiujn fiagojn kiel la plej grandajn krimojn. Temas pri detruado de tuta rasa, nacia aŭ religia grupo kaj tial oni nomis ĝin *genocido*, kio signifas gento-mortigon diference de *homicido*, kio signifas hommortigon.

Evidente, ankaŭ la genocido konsistas el mortigado de homoj, sed estus granda eraro pensi, ke genocido estas krimo kontraŭ la homa persono, kontraŭ individuo. Tute ne! Estas vero, ke genocido esprimiĝas en detruado de unuopaj homoj en amasaj kvantoj, sed la celo de genocido ne estas detrui unuopan personon. La genocido celas al detruo de tuta nacio, de tuta raso, aŭ de tuta religia grupo, precipe se la religio estas apartaĵo de la grupo, se ĝi konsistigas distingilon de la grupo. La detruado de la unuopaj personoj estas nur rimedo por atingo de la ĉefa

celo, nome, la detruo de la grupo. Inter la murdisto en la ordinara senco de la vorto kaj lia viktimo ĉiam ekzistas ia persona konflikto. Male, la faranto de genocido havas nenian personan kontakton kun siaj multnombraj, milionaj viktimoj. Por li ne estas grave kiuj estas liaj viktimoj: Infano aŭ maljunulo, virino aŭ viro, bonulo aŭ malbonulo. Lia celo estas plena murdo, detruo de ĉiuj personoj, apartenantaj al difinita rasa, nacia aŭ religia grupo. Tiu, kiu troviĝas ekster la kadroj de la grupo, povas libera vivi tute egale kiu kaj kia li estas; tiu kiu troviĝas en la kadroj de la grupo, devas morti eĉ se li estas la plej bona kaj la plej nobla persono.

La krimo de genocido povas esti farata laŭ diversaj manieroj. La plej simpla formo de genocido estas la rekta amasa mortigado de anoj de iu rasa, nacia aŭ religia grupo. En la teorio oni nomas ĝin *fizika genocido*, ĉar temas pri fizika ekstermado de la homoj.

La alia formo estas la t.n. *biologia genocido*. Ĝi estas farata tiamaniere, ke oni malebligas la naskiĝojn en la rasa, nacia aŭ religia grupo, kiu estas objekto de genocido. Tion oni atingas per steriligo (senfruktivigo) de la grupo-membroj, per la malpermeso de geedziĝoj, per la fakta disigo de la seksoj kaj per abortoj, se la koncipiĝo jam okazis.

Fine, en la teorio oni pritraktas ankoraŭ unu formon de genocido, nome la t.n. *kulturana genocido*. Ĝi konsistas el senigo de ĉiuj eblecoj por kultura evoluo de la koncerna grupo. Oni povas ĝin fari per malpermeso de la nacia lingvo, detruo de la literaturo kaj aliaj kulturaj valoroj de la koncerna grupo.

La Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj deklaris en sia Rezolucio de la 11-a de decembro 1946, ke la genocido estas “krimo de internacia juro, kiun kondamnas la civilizita mondo”. Ĝi difinis la genocidon jene: “Genocido estas neado de la ekzistorajto de tutaj homaj grupoj same kiel homicido estas neado de la vivorajto de individuaj homaj estuloj”. Surbaze de tiu rezolucio, post longaj diskutoj en diversaj komisionoj de Unuiĝintaj Nacioj, fine, la 9-an de Decembro 1948, la Ĝenerala Asembleo ĉiuvoĉe akceptis la projekton de ĝenerala konvencio pri genocido.

Laŭ la Konvencio, la genocido estas krimo de internacia juro. Ĝi povas esti farita en tempo de paco aŭ en tempo de milito. La kontraktantaj partioj, nome la ŝtatoj kiuj ratifis la Konvencion, devigas sin malhelpi tiun krimon, persekuti kaj puni la krimulojn (art. 1). La objekto de genocido estas nacia, “etna”, rasa aŭ religia grupo kiel tia (art. 2). Kiel oni vidas, ne ĉiu grupo estas protektata. Krom la menciitaj, ekzistas ankaŭ aliaj grupoj, ekzemple politikaj, ekonomiaj aŭ similaj. Tiuj grupoj ne estas protektataj. Granda diskuto estis precipe pri la politikaj grupoj. Kelkaj nepre deziris enmeti ankaŭ tiujn grupojn en la Konvencion. Tamen, fine oni decidis, ke tiuj grupoj ne povas esti protektataj per tiaspeca Konvencio, ĉar ili ne estas sufiĉe stabilaj, nek ili havas sufiĉe klarajn karakterizajn trajtojn. Fakte unu el la ĉefaj kaŭzoj, pro kiuj la Konvencio ne ampleksas ankaŭ la politikajn grupojn, estas, ke la reprezentantoj de iuj ŝtatoj deziris havi “liberajn manojn” koncerne tiajn grupojn. Aliflanke oni enmetis la vorton “etna”, kiu enhavas la ideon de ankoraŭ neformiĝinta nacio. Temas pri apartaj grupoj, kiuj havas elementojn de nacio, sed ĉe kiuj la nacia konscio ankoraŭ ne formiĝis.

Kiel genocido estas konsiderataj jenaj agoj: a. mortigo de la membroj de la grupo; b. kaŭzado de gravaj fizikaj aŭ mensaj kripligoj al la membroj de la grupo; c.

altrudado al la grupo de tiaj vivkondiĉoj, kiuj havas kiel konsekvencon ĝian plenan aŭ partan fizikan detruon; d. altrudado de aranĝoj kun la celo malebligi naskiĝojn en la grupo; e. perforta transigo de infanoj for de la grupo al alia grupo.

Tia difino de genocido ampleksas la fizikan genocidon kaj la biologian genocidon. Pri la kultura genocido oni multe diskutis en la komisiono, sed ĝi ne trovis sian lokon en la definitiva teksto. Nur 16 ŝtatoj voĉdonis por la enmeto de la kultura genocido en la Konvencion, dum 25 ŝtatoj esprimis sin kontraŭ tiu propono kaj 4 sin detenis. La ĉefa argumento kontraŭ la kriminale-jura protekto kontraŭ la kultura genocido estis, ke ekzistas tro granda diferenco inter fizika aŭ biologia ekstermado kaj la nura malebligo de kultura evoluo. Ankaŭ al ni ŝajnas, ke kriminale-juran protekton fakte bezonas nur la viktimoj de la fizika kaj biologia genocido, dum la t.n. kultura genocido apartenas al la sfero de ĝenerala jura protekto de naciaj malplimultoj.

Laŭ la art. 3 de la Konvencio, devas esti persekutata ne nur la genocido mem, sed ankaŭ la konspiro por fari tiun krimon, la rekta kaj publika incitado al genocido, ĉiu provo fari la krimon kaj ĉiu kompliececo.

Grandan signifon havas la art. 4 de la Konvencio, kiu preskribas, ke devas esti persekutataj ĉiuj personoj, kulpaj pro genocido, tute egale ĉu ili estas konstitucie respondecaj roluloj, publikaj oficistoj aŭ privataj personoj. Evidente tian krimegon neniam povas fari individuaj personoj sen la apogo aŭ almenaŭ sen la permeso de la personoj, kiuj efektive tenas la ŝtatan potencon en siaj manoj. Tiun krimon kutime povas fari nur la ŝtatgvidantoj, utiligante por tiu celo la ŝtatan aparaton. Tial, en la Konvencio estas preskribite, ke eĉ la plej altaj pozicioj en la ŝtata hierarĥio ne liberigas la farintojn de tiu krimo de la kriminala respondeco.

Konsiderante ĝuste tiun ĉi fakton – nome la fakton ke kutime la farintoj de genocido estas la gvidantoj de la ŝtatoj – oni povis prave atendi, ke la kompetenteco por juĝado de tiu krimo estos transdonita al iu internacia instanco. Fakte pri tiu ĉi punkto okazis grandega lukto en la UN. Pluraj ŝtatoj, inter kiuj precipe Sovetunio, plej energie kontraŭstaris la proponon pri la kompetenteco de internacia instanco. Ili pravigis sian starpunkton per la principo de suvereneco. Tiu ĉi starpunkto fine venkis kaj oni decidis, ke la kontraktantaj partioj devos leĝigi la regulojn de la Konvencio kaj antaŭvidi efikajn punojn por la personoj, kulpaj pro la krimo de genocido. Al tiuj personoj juĝos kompetenta tribunalo de la ŝtato, sur kies teritorio la krimo estis farita, aŭ internacia kriminala tribunalo, kiu povos havi jurisdikcion nur en rilato al tiuj el la ŝtatoj, kiuj estos akceptintaj ĝian jurisdikcion. Mallonge, la kompetenteco pri tiu gravega krimo troviĝas en la manoj de la internaj tribunaloj. Estas vero, ke oni antaŭvidas ankaŭ la eblecon de juĝado fare de internacia tribunalo, sed, unue, tia tribunalo ne ekzistas, kaj, due, se ĝi iam ekzistos, ĝia kompetenteco dependos de la libera volo de la ŝtatoj. Pro la fakto, ke la krimon de genocido, pro ĝia karaktero mem, faras antaŭ ĉio la ŝtatgvidantoj, estas klare, ke la nuna protekto estas terure manka. Vere, ne estas imagebla tribunalo, kapabla juĝi kaj puni siajn proprajn ĉefojn, kiuj kulpas pri genocido!

Tamen, dank' al la klopodoj precipe de la Brita kaj Belga delegitaroj, estas ebla almenaŭ malrekta internacia kontrolo. En okazo de malkonkordoj inter la

kontraktantaj partioj rilate la interpretadon, aplikadon aŭ korektan plenumadon de la Konvencio, la Internacia Kortumo en Hago estos kompetenta solvi la konflikton je postulo de kiu ajn el la partioj. Laŭ la art. 9 de la Konvencio, tiu postulo povas koncerni ankaŭ la respondecon de iu ŝtato pro genocido. Tiamaniere, tra tiu ĉi artikolo, tra la artikoloj 94 kaj 2/5 de la *Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj* kaj tra la artikolo 36 de la *Statuto de la Internacia Kortumo* en Hago, estas ebla internacia kontrolo kaj eĉ aplikado de juraj devigaj rimedoj kontraŭ la ŝtato, kiu ne obeas la Konvencion.

La genocido ne anstataŭas la tri kategoriojn de internacia krimo, difinitajn en la aktoj de la 8-a de aŭgusto 1945. Ĝi estas nova kategorio de internacia krimo, kiu, diference de la krimo kontraŭ la homeco, povas esti farita ankaŭ en tempo de paco kaj sen iu ajn kunligo kun la ceteraj, jam preparolitaj, internaciaj krimoj. La objekto de la internaciaj krimoj laŭ la aktoj de la 8-a de Aŭgusto estas la paco, kiun oni deziras protekti ankaŭ per rimedoj de internacia kriminala juro. La objekto de genocido estas alia valoro, nome la rasaj, naciaj kaj religiaj grupoj kiel tiaj. Tamen, en ambaŭ okazoj, la individuaj homaj vivoj estas la senperaj viktimoj. En ambaŭ okazoj temas pri fundamentaj valoroj de la internacia komunaĵo, de la tuta homaro.

Post la akcepto de la Konvencio fare de la Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj, pluraj opinioj estis esprimitaj. Ni citos nur du. Sinjoro Evatt, la tiama ĉefrepresentanto de Aŭstralio, deklaris, ke la Konvencio estos "epokfara evento!". Sir Hartley Shawcross, la konata reprezentanto de Britio diris, ke la Asembleo devus atenti ne seniluziigi la popolojn kredigante al ili, ke la akcepto de la Konvencio signifas ian grandan paŝon antaŭen, dum, en realeco, nenio estas ŝanĝita.

Ni opinias, ke la vero, kiel kutime, troviĝas inter tiuj du ekstretoj. Kvankam la difino de genocido, kiel ankaŭ de la aliaj kategorioj de internacia krimo, per si mem ne estas sufiĉa protekto kontraŭ rasaj, naciaj aŭ religiaj persekutoj, kontraŭ la milito kaj ĉiuj teruraĵoj, kiujn ĝi kunportas, tamen tiu difino signifas gravan kontribuadon al la paco kaj al la homa digno. Ankaŭ en la internacia juro – kiel, cetere, en ĉiuj juraj branĉoj – la timo pro la sankcioj estas la komenco de la sagaco kaj singardemo. Ĝi povas influi la ŝtatgvidantojn bone pripensi antaŭ ol efektiviigi novajn internaciajn krimojn, kiuj hodiaŭ estas malpermesitaj de la pozitiva internacia juro. Ĉar unu afero estas certa kaj ĝi sendube signifas seriozan progreson: La koncepto de ĉiuj kvar kategorioj de la internacia krimo estas hodiaŭ firme formita en la internacia juro kaj en la jura scienco. Personoj, kiuj, eluzante la ŝtatan potencon, volis detrui la liberecon, la justecon, la homecon estis jam kondamnitaj en la nomo de la libereco, justeco kaj homeco. Tiu ĉi fakto estas forta admono ankaŭ al ĉiuj aliaj politikaj respondeculoj. Morgaŭ oni povos juĝi iliajn agojn laŭ la samaj principoj, kiujn ili mem rekonis kiel jure validajn en la nuntempa interŝtata vivo. Pri tio ni ĉiuj devas esti profunde konsciaj. Estas nia devo, en la intereso de ni mem kaj en la intereso de la homaro kiel tuto, ekkoni bone ĉiun eĉ la plej etan progreseton faratan sur tiu kampo, subteni morale tiun evoluon, konscii, ke de nia forto, de nia apogo al tiuj tendencoj multe dependas la efektivigo en la praktiko de la solene proklamitaj kaj jure formulitaj principoj.

LA MARO EN LA INTERNACIA JURO

Prelego en Internacia Somera Universitato, Kopenhago 1956

Estis tempo, kiam la maroj kaj oceanoj – simile al larĝaj riveroj, profundaj praarbaroj, altegaj montoĉenoj, dezertaj teritorioj – disigadis la gentojn unujn de la aliaj. Kun la progresado de la tekniko kaj evoluado de la navigacio, la maraj kaj riveraj akvoj transformiĝis de faktoro de disigo al tiaj de kunligo. La unuaj grandaj civilizoj vere ekestis en la valoj de grandaj riveroj, kiel Nilo, Eŭfrato kaj Tigriso, aŭ ĉe la bordoj de naveblaj maroj, kiel ekzemple la Egea. Paralele kun la perfektigo de la navigacia tekniko, kiu ebligis atingi per mara vojo ĉiam pli malproksimajn lokojn, la centroj de civilizo kaj kulturo transportiĝadis al regionoj situantaj apud ĉiam pli larĝaj maroj. Tiele de la Egea maro la gravita centro transportiĝis en la Romia epoko al Mediteraneo, transpasis poste al Atlantiko kaj fine atingis Pacifikon.

Hodiaŭ la grandegaj marsurfacoj, kiuj kovras preskaŭ tri kvaronojn de la tuta terglobo, ne plu estas obstakloj al komunikado inter la popoloj, sed, male, prezentas la plej taŭgan, la plej malmultekostan kaj la plej larĝan vojon de reciproka rilatado. La maro ebligas ligojn inter ŝtatoj kaj kontinentoj. Krome, la loĝantaro de ĉemaraj landoj havas de la maro ankaŭ aliajn grandajn utilojn: havigo de marsalo, ekspluatado de la maraj faŭno kaj vegetaĵoj, kiel ankaŭ de la mara fundo kaj subfundo. Ne estas do surprize, ke la ŝtatoj ĉiam dediĉadis grandan atenton al la maro kaj klopodis realigi kiel eble plej multe da rajtoj sur ĝi.

Kvankam la maro prezentas fizike unu tuton, tamen el jura vidpunkto ĝi estas hodiaŭ dividita en pluraj partoj. Ĉiu el tiuj partoj havas specialan juran reĝimon.

1. Libera maro

En la malnova epoko ne ekzistis ia speciala koncepto pri la rajto al la maro. Pro la primitiveco de la navigaciaj rimedoj, la navigado estis limigita. Se iu ŝtato havis ian specialan intereson pri iu el la maroj, ĝi tute simple realigis tiun intereson per alproprigo de la koncerna maro kaj tenis ĝin kiel sian ĝis iu pli forta ŝtato forprenis de ĝi la regadon. La Fenicianoj kaj Kartagianoj tiamaniere monopoligis la navigacion sur la Mediteraneo ĝis ili venis en konflikton kun la Romianoj, kiuj konsideris tiun maron sia (*“Mare nostrum”* – nia maro). Kiam tiaspecaj konfliktoj akriĝis kaj kiam la partoj, estante proksimume same fortaj, ne povis riski militon, okazadis ankaŭ kontrakta reguligo de la navigacio, kiel tion pruvas la kontrakto inter Romio kaj Kartagio de la jaro 348 antaŭ nia erao. Ankaŭ la grekaj civitoj-ŝtatoj alproprigadis

al si diversajn rajtojn je la maro. Ekzemple, Ateno jam en la jaro 449 antaŭ nia erao malpermesadis al la persaj militaj ŝipoj la navigadon en Bosporo.

Tamen, jam en la Malnova Epoko komencis disvastiĝi la opinio, ke la maro ne povas aparteni al unu ŝtato. La grandaj juristoj de Romio, kiuj konstruis la fundamentojn de multaj juraj branĉoj, starigis ankaŭ la bazajn principojn pri la libereco de la maro. Ili konsideris la maron kiel *“res communis”*, nome kiel objekton komunan, kaj ne kiel *“res nullius”*, nome kiel nenies objekton, kiu povus esti, sekve, alproprigita de kiu ajn. La granda romia juristo Celsus skribis, ke “la maro estas en komuna uzo de ĉiuj homoj (*“maris communem usum omnibus hominibus”*). La saman opinion esprimas Marcianus, Pomponius, Ulpianus kaj aliaj grandaj nomoj de la romia jura scienco. “La uzado de la maro estas libera por ĉiuj. La maro estas objekto komuna, kiel la aero aŭ la pluvakvo”. Tio fariĝis la gvidprincipo de la jura scienco kaj ĝi transiris ankaŭ en la praktikon. Romio, fakte, nuligis ĉiujn antaŭajn regulojn, per kiuj estis limigitaj la navigacio kaj la fiŝkaptado. La sama principo eniris poste ankaŭ en la *“Institutiones”* de Justinianus (527–565) kaj dum pli ol 4 jarcentoj la libereco de la maro estis rekonita kiel principo.

En la mezepoko la cirkonstancoj konsiderinde ŝanĝiĝis. La pli fortaj maraj ŝtatoj alproprigadis al si ekskluzivan jurisdikcion aŭ eĉ proprietajn rajtojn sur pli aŭ malpli larĝaj zonoj de la alta maro. Jam en la X-a jarcento, dum la regado de la reĝo Edgardo (959–975), komenciĝis la anglaj pretendoj je partoj de la maro ĉirkaŭ la anglaj insuloj. En la sudo la araboj regis super granda parto de Mediteraneo, rabadis la ŝipojn kaj forkondukadis la maristojn kaj la pasaĝerojn en sklavecon. La pli fortaj ŝtatoj komencis donadi protekton al la komercaj ŝipoj, sed ili postulis kompanse la rekonon de supereco rilate la marojn tuŝantajn iliajn bordojn. Krome ili postulis monpagojn de la ŝipoj, kiuj navigadis sur tiuj maroj. Venecio pretendis regadon super Adriatiko. La respubliko de Ĝenovo starigis siajn rajtojn rilate la Liguran Maron, Portugalio rilate la Hindan Oceanon, Danlando kaj Svedlando, kune, rilate Baltikon, Hispanio rilate la Golfon de Meksikio, Britlando rilate la Manikon, la Nordan maron kaj la maron inter ĝi kaj Irlando.

Kvankam Anglio ĉiam pretendis, en ĉiu okazo minimume dum la 16-a jarcento kaj de tiu tempo ĝis la 19-a, la suverenecon super iuj maroj, tamen en 1580 la reĝino Elizabeto, respondante al plendo de la hispana ambasadoro en Londono kontraŭ la vojaĝo de Drake en pacifiko, deklaris, ke la utiligo de la maro kaj de la aero estas konuna por ĉiuj kaj ke neniu popolo kaj neniu persono povas havi iajn rajtojn sur la oceanon, ĉar ĝia naturo kaj la publika uzado malebligas kaj malpermesas ĝian posedon aŭ okupon. Laŭ la granda internaciisto Oppenheim, tiu ĉi starpunkto de Elizabeto fariĝis la ĝermo, el kiu poste elkreskis la moderna teorio pri la libereco de la maroj.

Post la malkovro de Ameriko, la Hispanoj kaj Portugaloj fondis multajn koloniojn kaj evoluigis grandan komercon. El la malkovritaj regionoj grandegaj riĉaĵoj fluis en la hispanajn kaj portugalajn havenojn. Ambaŭ ŝtatoj deziris monopoligi tiun treege riĉigan komercon kaj tial neadis la navigaciajn rajtojn ne nur de la triaj ŝtatoj, sed ankaŭ unu de la alia. En siaj reciprokaj konfliktoj ili turnis sin al diversaj papoj. Aleksandro la VI-a fine eldonis la buleon *“Inter Caetera”* de la 4-a de majo 1493, per kiu li arbitracie decidis, ke la linio inter la hispana kaj portugala sferoj troviĝos

je 100 mejloj de la Azoraj Insuloj. Tiu arbitracio fariĝis poste bazo de la kontrakto de 1494, per kiu la du landoj dividis inter si la marojn kaj eksigis el tiuj maroj ĉiujn aliajn. Krome, la Hispanoj kaj Portugaloj ĵaluze kaŝadis la sekretojn de siaj marvojoj, malpermesadis la dungon de fremdaj maristoj sur siaj ŝipoj kaj eĉ mortigadis la ŝipanojn de fremdaj ŝipoj, kiujn ili renkontis sur “siaj” maroj.

Tiuj postuloj pri absoluta suvereneco sur la maroj ne povis ne elvoki reagojn. La anglaj kaj nederlandaj maristoj, kiuj navigadis sur malproksimaj maroj, malkovradis novajn landojn kaj komercadis kun ili, kompreneble malagnoskis la pretenditajn ekskluzivajn rajtojn je la maro de la Hispanoj kaj Portugaloj. Ekestis multaj konfliktoj, kiuj ĉiam pli kaj pli akriĝis kaj en tiaj kondiĉoj la reĝino Elizabeto faris sian faman, jam menciitan deklaron.

La konflikto atingis sian kulminon, kiam la Portugaloj malpermesis al Nederlandanoj la komercon kun la hindaj regionoj. Tiu konflikto igis la grandan nederlandan juriston kaj fondinton de la moderna scienco pri Internacia Juro, Hugo Grotius, verki sian *Mare liberum* (Libera Maro), publikigitan en marto de la jaro 1609. En tiu verko, kiu prave estas konsiderata kiel fundamenta por la nuntempa teorio pri la maro, la fama juristo prezentis klaran juran argumentadon pri la libereco de la maroj. Grotius distingas la apertan maron, unuflanke, de la golfoj, markoloj kaj teritoria maro, aliflanke. Li asertas, ke la akvoj de la lastaj povas esti en proprieto de la marborda ŝtato.

La verko de Grotius elvokis fortan kontraŭstaron de tiuj ŝtatoj, kiuj deziris alproprigi al si ekskluzivajn rajtojn sur kelkaj maroj. Unu post la alia aperis diversaj verkoj, kiuj defendis tiujn kvazaŭajn rajtojn. El ili la plej grava estas tiu de John Selden, kiu laŭ la mendo de jakobo la I-a, klopodis pruvi surbaze de malnovaj ĉartoj kaj leĝoj, la rajton de Anglio je la maroj, kiujn ĝi deziris havi por si. Lia verko “*Mare clausum*” (Fermita Maro), publikigita en 1635 laŭ la ordono de la reĝo Karlo la I-a, akiris konsiderindan respekton. La postulojn de la Venecio je la Adriatiko defendis Fra Paulo Sarti. Tiujn de Hispanio sur la marojn, kiujn ĝi konsideris siaj, teorie pravigadis la fama juristo Gentilis.

La ideoj de Grotius, malgraŭ la kontraŭstaro, ĉiam pli kaj pli penetradis. Des pli facile, ke fakte neniu ŝtato estis kapabla per la potenco de sia ŝiparo efektive protekti kaj realigi siajn kvazaŭajn rajtojn. Iom post iom ĉesis la teoriaj diskutoj kaj la principo de la libereco de la maro fariĝis ĝenerale rekonita. Ĝi estas postulato por la tuta progreso de la homaro. La maro hodiaŭ kunligas eĉ la plej malproksimajn ŝtatojn kaj popolojn. La libera navigacio sur ĉiuj maroj estas antaŭkondiĉo por la interŝanĝo de varoj, kio, en la kondiĉoj de ĉiam pli granda interdependeco de ĉiuj mondopartoj, estas bazo de la ekzistado, progresado kaj bonstato de ĉiuj popoloj.

Kun la firmiĝo de la principo pri la libereco de la maro ekestis teoria demando pri la jura karaktero de tiu libereco. Unuj asertadis, ke la maro estas “*res nullius*”, kiu troviĝas sub nenies suvereneco. Aliaj opiniis, ke ĝi estas “*res communis*”, nome sub komuna suvereneco de la internacia komunumo. La itala verkisto Balladore-Pallieri prave atentigas, ke nek unu, nek la alia koncepto estas ĝusta. Se la maro estus “*res nullius*”, en la senco de la romia juro, ĝi povus esti okupita kiel tia de kiu ajn ŝtato. Kaj ĝuste tio estas hodiaŭ forte neata. La maro ankaŭ ne povas esti konsiderata – almenaŭ ne en la nuna momento, – kiel objekto de komuna suvereneco de la

internacia komunaĵo, ĉar tiu internacia komunaĵo estas nur bilda esprimo kaj ne iu reala forto, kiu povus posedi suverenecon. Sekve, la maron oni povas konsideri kiel “*res communis*” nur, se sub tiu esprimo oni komprenas ne komunan objekton de suvereneco, sed objekton ne alproprigitan, nek alproprigeblan, same kiel estas la aero, la sunvarmo, k.t.p., kiujn ĉiu ajn povas libere utiligi sen malutilo pro la aliaj.

2. Teritoria maro

Se de unu flanko, kiel ni vidis, oni fine devis rekonii la liberecon de la maro, aliflanke oni ne povis ne rimarki, ke la marbordaj ŝtatoj havas specialajn interesojn en tiuj partoj de la maro, kiuj tuŝas iliajn bordojn. Jam en la plej malnovaj tempoj diversaj ŝtatoj, krom siaj postuloj rilate kelkajn marojn ĝenerale, starigis specialajn postulojn koncerne tiujn marspacojn, kiuj etendiĝas laŭlonge de iliaj bordoj. Tiel ekzemple la bizanca imperiestro Leono (886–911) dekretis, ke la rajto fiŝkaptadi estas rezervita por la terposedantoj ĉe la bordo. Tamen nur poste evoluis juraj teorioj pri tiu zono de la maro, proksima al la tero. Juristoj de la 14-a jarcento esprimis la opinion, ke la maro apud la civito estas “*districtus*” de la koncerna ŝtato kaj ke tie ĝi havas plenan jurisdikcion. Ne estis tamen klare kiom granda povas esti tiu distrikto, nome ĝis kiu distanco de la tero ĝi povas etendiĝi. La juristo Bartolus, kiu vivis en la komenco de la 14-a jarcento, asertadis ke jam laŭ la romia juro la insuloj, troviĝantaj en “modesta distanco” de iu provinco, troviĝis sub jurisdikcio de tiu provinco. Li opiniis ke kiel “modesta distanco” devas esti konsiderata la distanco de 100 italaj mejloj, nome ĉ. 150 kilometroj. Bartolus entute rekonadis al la marborda ŝtato la rajton de jurisdikcio je 100 mejloj de la bordo, kaj tiu lia opinio estis ĝenerale akceptita en la teorio kaj en la paraktiko. Li estis apogata de italaj, francaj, hispanaj kaj aliaj verkistoj dum plenaj kvar jarcentoj.

En la nordo de Eŭropo la influo de la romia juro estis multe pli malforta ol en la regionoj de Mediteraneo. Tamen, ankaŭ tie la ekonomia vivo kaj la sociaj kondiĉoj produktis la saman koncepton. La loĝantaro de la Eŭropa nordo dependas grandparte de la fiŝkaptado kaj ĝenerale de la riĉaĵoj de la maro. Tiel ekestis pluraj reguloj, kiuj reguligis la rajton je fiŝkaptado, je la restaĵoj de la dronintaj ŝipoj, je la heredaĵoj de personoj mortintaj sur la maro. Laŭ la norvega, same kiel laŭ la angla mezepoka juro, oni konsideris ke la potenco de la ŝtatoj ĉe la maro etendiĝas ĝis la linio “de la mezo”, nome ĝis la linio, kiu troviĝas precize en la mezo inter du tiaj ŝtatoj. Tiu principo iom post iom forgesiĝis kaj ekregis alia regulo, precipe sur la bazo de skota juro, laŭ kiu la jurisdikcio de la ŝtato etendiĝas precize ĝis la linio, de kiu oni povas vidi la marbordon. La celo de tiu principo estis protekti la fiŝkaptadon en la marakvoj apud la bordo. La fremdaj fiŝkaptistoj povis tiamaniere sufiĉe certe scii ĉu ili troviĝas en la malpermesitaj akvoj: Se ili vidis la marbordon, ili estis en malpermesita regiono. Laŭ la projektoj de kontrakto pri unio inter Skotlando kaj Anglio de la jaro 1604, evidentiĝis ke tiu “vidatingo” signifis distancon de 14 mejloj. Ŝajnas ke ĝenerale tiu “viddistanco” estis akceptita kiel kutima naviga mezuro. La “viddistanco” estis akceptita ankaŭ en la sicilia juro ĉ. la jaro 1400. Eĉ en la 19-a jc. troviĝis kelkaj, kiuj opiniis ĝin la plej justa.

La ideo, ke la teritoria maro apartenas al la ĉemara ŝtato esprimiĝis tre frue ankaŭ en diversaj internaciaj kontraktoj, ekzemple en tiu inter Ruslando kaj Norvegio de la j. 1326, en kiu oni parolas pri la tero kaj maro de la norvega reĝo, kiuj, kune, formas la norvegan teritorion.

Kvankam, do, firmiĝis la starpunkto, ke la marborda ŝtato havas iajn specialajn rajtojn je la marzono etendiĝanta laŭlonge de la bordo, tamen ne ekzistis unuanimeco – kaj eĉ hodiaŭ ĝi ne ekzistas – rilate la larĝecon de tiu zono, nek rilate la karakteron kaj amplekson de tiuj rajtoj. La plej grandaj diskutoj turniĝis ĉirkaŭ la demando pri la larĝeco de la teritoria maro. En la 16-a jc. ekestis alia teorio, laŭ kiu la militŝipoj ne havas rajton haltigi kaj traserĉi komercan ŝipon en la spaco ĝis 100 mejloj de la marbordo, se la komerca ŝipo posedas traيران permeson de la marborda ŝtato. Male, se ĝi tian permeson ne havas, la ŝiparoj de la militantaj partioj havas la rajton aresti la ŝipon laŭlonge de la tuta marbordo. Tiu teorio donis ideon al la angla reĝo Jakobo la I-a proklami siajn famajn “*kings chambers*” (reĝaj ĉambroj) en 1604. En la proklamo estas fiksitaj larĝaj maraj surfacoj per linioj, irantaj de unu ĉefa terpinto al la alia (*headland*). Tiamaniere ekestis la grava teorio de terpintoj (*headland theory*), kiu ankaŭ hodiaŭ ludas konsiderindan rolon, precipe ĉe la fiksado de la linio de la teritoria maro antaŭ la golfoj. La akvoj interne de tiel fiksitaj linioj troviĝis sub speciala protekto de la reĝo.

Plua teorio pri la larĝeco de la teritoria maro estis tiu de atingopovo de marborda kanono. Ĝi estas menciita la unuan fojon en la j. 1610 en la deklario de la nederlanda delegacio, kiu traktadis en Londono la rajtojn de fiŝkaptado laŭlonge de la angla marbordo. Ĝin mencias ankaŭ Grotius, sed ne estas klare, ĉu li prenis ĝin de la holanda delegacio aŭ sugestis ĝin al la delegacio. Tiu teorio estis praktikata dum tre longa tempo. En la fino de la 17-a jc. Francio emfazis ke la potenco de la ŝtato etendiĝas nur sur tiujn du partojn de la apudaj maraj akvoj, kiujn efektive povas mastri la kanonaj baterioj sur la marbordo. En la 18-a jc. la atingopovo de kanono kiel mezuro por limigi la teritoriajn akvojn eniris ankaŭ en plurajn internaciajn kontraktojn (Britio-Alĝerio, 1762; Britio-Tunizio; k.t.p.).

Ĉar en tiu tempo la atingopovo de kanonoj estis proksimume la sama en ĉiuj partoj de la mondo, la fiksado de la limo sur tiu bazo estis relative simpla. Tamen, same kiel la vidatingo, ĝi ne estis preciza. Tial baldaŭ diversaj ŝtatoj komencis fiksi tiun linion per tute difinitaj mezuroj. La Dana-Norvega Reĝlando fiksitis en 1745 la larĝecon de sia teritoria maro je 4 mejloj, Hispanio en 1760 je 6 mejloj. En la fino de la 18-a jc. la itala verkisto kaj diplomato Fernando Galiani (1728–1787) proponis en sia verko pri la neŭtraleco de la ŝtatoj la distancon de tri mejloj kaj pravigis sian starpunkton per tio, ke ĝi estas la plej granda distanco, kiun povas flugi kuglo, elĵetita per forto de pulvo. Tiu larĝeco de tri mejloj fariĝis poste preskaŭ ĝenerale akceptita. Ĝi, tamen, ne estas deviga regulo de Internacia Juro. Ĝi validas nur por tiuj ŝtatoj, kiuj ĝin akceptis. Kaj multaj ŝtatoj ne akceptis ĝin, sed prenis aliajn distancojn. Ekzemple, Svedlando kaj Norvegio havas la larĝecon de 4 mejloj (unu mejlo 1853 m proksimume), Italio kaj Jugoslavio de 6 mejloj, Sovetunio de 12 mejloj, Honduraso 12 mejloj, Meksikio 9, k.t.p. La plej fidela adepto de la 3 mejloj estas Britio. Ĝi ĉiam protestis, kiam iu ŝtato larĝigis la limojn de siaj teritoriaj akvoj al pli ol 3 mejloj, sed tiuj protestoj ĝenerale restis sen praktikaj rezultoj. La starpunkto de Britio estas

diktata de la deziro ebligi al siaj fiŝkaptistoj ekspluatadon de la maraj riĉaĵoj en kiel eble plej granda proksimeco de la bordoj de aliaj ŝtatoj. Kiam en 1866 la nederlanda ambasadoro rimarkigis, ke Britio, pro la longeco de siaj bordoj, havus intereson larĝigi siajn teritoriajn akvojn, Lordo Salisbury respondis: “Jes, sed en tiu okazo ni ne plu povus kapti la fiŝojn en la proksimeco de via bordo, ĉar kiel ajn longa estas nia bordo, la fiŝoj tamen troviĝas ĉe la via kaj ne ĉe la nia.”

Ŝajnas ke hodiaŭ estas nekontestebla la rajto de la borda ŝtato fiksi la eksterajn limojn de sia teritoria maro. Tiu rajto tamen ne povas transiri iujn limojn, kiujn oni devas esplori de kazo al kazo, ĉar la Internacia Juro principe rekonas la eblecon de diversaj larĝecoj de la teritoria maro. Ankaŭ la Internacia Kortumo en Hago, en sia verdikto pri la fiŝkaptado en la konflikto inter Britio kaj Norvegio (1951), eksplicite deklaris, ke la akto de limigo estas nepre unuflanka akto “ĉar nur la marborda ŝtato estas rajtigita ĝin fari, kvankam la valideco de la limigo rilate la triajn ŝtatojn estas juĝata laŭ la Internacia Juro”.

Ni vidis, ke hodiaŭ la teritoriaj maroj havas diversajn larĝecojn en diversaj ŝtatoj. Nun ekestas la demando de kiu linio sur la firma tero oni kalkulas tiun larĝecon kaj laŭ kiu metodo.

Tiurilate ekzistas pluraj teorioj. En la tempo, kiam la atingopovo de kanono estis decida, oni prave prenis kiel elirpunkton la plej altan tajdon, ĉar oni konsideris, ke kanono ne povas esti fiksita sur loko, kiun kovras la maro ĉe alta tajdo. Hodiaŭ ĝenerale estas rekonita kiel elirpunkto la linio de la plej malalta tajdo. La peco de tero inter la plej malalta kaj plej alta tajdoj estas konsiderata kiel tera teritorio de la ŝtato.

Alia demando estas kiamaniere mezuri la larĝecon de la teritoria maro ek de la tiel fiksita elira linio. Laŭ la metodo de la “paralela linio” la ekstera limo de la teritoria maro plene respondas al la geografia aspekto de la marbordo, ĉar tiu linio iras absolute paralele kun ĉiuj golfetoj kaj havenoj, enfluejoj de riveroj kaj duoninsuloj. Tiun metodon akceptis la plimulto de teoriistoj. La alia metodo estas tiu, kiun proponis en la Haga konferenco de 1930 la usona espartizisto Boggs. Tiu metodo estas nomata metodo de cirklaĵoj, ĉar ĉirkaŭ ĉiuj punktoj laŭlonge de la tuta marbordo oni faras arkojn en la direkto de la alta maro. La duondiametro respondas al la preskribita larĝeco de la teritoria maro, nome tri, kvar, ses, dekdu, k.t.p. maraj mejloj. La linio kiu kunligas ĉiujn punktojn, kie la arkoj kruciĝas, formas la eksteran limon de la teritoria maro. Tio ebligas la evitadon de malgrandaj golfoj, enfluejoj de riveroj k.t.p. La tria metodo estas tiu de tiel nomataj “poligonaj linioj”. Laŭ tiu metodo oni tiras rektajn liniojn inter la elstaraj punktoj de la marbordo, inkluzive ĉiujn insulojn kaj insuletojn, kio kreas multajn angulojn. Tial la metodo nomiĝas plurangula. La ŝtatoj aplikis multe ankaŭ tiun metodon kaj ĝi estis principe rekonita de la Internacia Kortumo en la konflikto de Britio kaj Norvegio pro la fiŝkaptado. La Kortumo deklaris, ke Norvegio korekte prenis kiel eliran linion tiun, kiu estis fiksita esence laŭ tiu ĉi metodo.

Restas ankoraŭ la demando de larĝaj golfoj. Se la enirejo en la golfon ne estas pli larĝa ol la duoblo de la larĝeco fiksita por la teritoriaj akvoj, neniu problemo stariĝas. En tiu okazo la interna linio de la teritoriaj akvoj estas fiksita per la linio kiu kunligas la du punktojn de la golfa enirejo. Male, se la enirejo estas pli larĝa, ekestas

la demando kie vere troviĝas la interna linio de la teritoriaj akvoj. Kiel ĝenerala regulo estas akceptita la principo, ke, se la enirejo en la golfo estas 10 mejlojn aŭ malpli, kaj se ambaŭ bordoj de la golfo kaj de la enirejo apartenas al la sama ŝtato, tiu linio devas esti la rekta linio, kiu kunligas la du plej proksimajn punktojn de la golfa enirejo. Male, se la golfa enirejo estas pli larĝa, oni rekonas nur la teritoriajn akvojn en la enirejo kaj en la golfo mem. Escepton faras la t.n. historiaj golfoj, je kiuj la ŝtatoj havas longedaŭrajn historiajn rajtojn.

Pri la jura karaktero de la rajtoj de la marborda ŝtato sur la teritorian maron ekzistis kaj ekzistas multaj teorioj. Ŝajnas ke hodiaŭ, tamen, estas ĝenerale rekonite, ke la marborda ŝtato havas plenan suverenecon je la teritoria maro kaj la spacoj sub ĝi kaj super ĝi. La sola limigo estas la rajto de t.n. sendanĝera paso por ĉiuj ŝipoj de ĉiuj nacioj kun la escepto de la militŝipoj, kiuj devas havigi al si antaŭan permeson. Estas tre malfacile diri en kelkaj vortoj kion vere signifas “sendanĝera paso”. La danĝeroj, kiujn prezentas la navigacio de fremdaj ŝipoj en la teritoriaj akvoj estas diversaj. Ili povas rilati al sekureco de la marborda ŝtato, aŭ al ĝiaj financaj interesoj (dogano), aŭ al ĝiaj pure materiaj interesoj. En ĉiu okazo la marborda ŝtato havas plenan rajton reguligi per siaj leĝoj la sekurecon de la navigacio, la protekton de la akvoj kontraŭ la malpurigoj, kiujn faras la ŝipoj, precipe la modernaj kun naftomotoroj. Plue, la marborda ŝtato rajtas plene protekti la riĉaĵojn de sia teritoria maro kaj havi ekskluzivan rajton je fiŝkaptado kaj aliaj formoj de ekspluatado de la teritoria maro. Tiuj rajtoj estas treege ampleksaj kaj ili estas esprimo de la suvereneco de la ŝtato je la teritoria maro. Krome, la marborda ŝtato havas principe kriminalan kaj civilan jurisdikcion, sed tiu jurisdikcio estas kaj devas esti tre atente aplikata, nur en la plej gravaj kazoj, por ne ĝeni la principon de libera sendanĝera paso de ĉiuj ŝipoj, kiu rajto, kiel dirite, estas sendube rekonita kiel unu el la fundamentoj de la Internacia Mara Juro.

3. Internaj maroj

Interna maro aŭ nacia maro estas nomata tiu parto de la maro, sur kiu la marborda ŝtato havas plenan kaj per nenio limigitan potencon, dum la aliaj ŝtatoj ne havas sur ĝi iun ajn rajton krom en kazo de speciala kontrakto. Kiel internaj maroj estas konsiderataj antaŭ ĉio tiuj, kiuj ne havas kontakton kun la aliaj maroj. Ekzemple, la Arala Maro en Sovet-Unio, kies bordoj apartenas nur al tiu ŝtato, estas tipa ekzemplo de tia maro. Se la bordoj apartenas al pluraj ŝtatoj, la plimulto de aŭtoroj opinias ke en tiu okazo la maro estas interna kaj apartenas al koncernaj ŝtatoj. Tiel la Kaspia Maro, kies bordoj apartenas al Sovet-Unio kaj Irano, estas konsiderata kiel interna maro de Sovet-Unio kaj de Irano surbaze de specialaj kontraktaj interkonsentoj inter tiuj du ŝtatoj.

Sed ekzistas ankaŭ maroj, kiuj per pli aŭ malpli larĝaj pasejoj estas ligitaj kun la oceanoj de la mondo. Ĉi tie oni kutime distingas ĉu la enirejo en tian maron apartenas al la sama ŝtato, same kiel la marbordoj, aŭ al pluraj ŝtatoj. La Maro de Azov, kiu de ĉiuj flankoj estas ĉirkaŭita de soveta teritorio, kaj kies enirejon plene mastras Sovet-Unio, estas tial konsiderata kiel interna maro de tiu ŝtato. Male, la Nigra Maro, kies bordoj apartenas al pluraj ŝtatoj, devas esti konsiderata kiel aperta, alta maro, kvankam la sovetaj teoriistoj klopodis pravigi la starpunkton, ke ĝi estas fermita, interna maro, apartenanta nur al la marbordaj ŝtatoj.

Kiel internaj maroj devas esti konsiderataj ankaŭ la akvoj de la golfoj, kies enirejo ne transpasas la larĝecon de 10 mejloj, se la bordoj apartenas al la sama ŝtato. Pluraj aŭtoroj konsideras interna maro ankaŭ la marajn spacojn inter la insuloj kaj la firma tero, sed sub la kondiĉo, ke la distancoj inter la insuloj kaj la tero ne estu pli grandaj ol la fiksita larĝeco por la teritoria maro, kiel ankaŭ sub la kondiĉo, ke tiuj spacoj ne prezentu marvojojn, kiuj ligas du apartajn marojn. La leĝoj de Svedio, Norvegio kaj Jugoslavio fiksas tiamaniere la internan limon de siaj teritoriaj maroj, respektive la eksteran limon de la internaj maroj.

Fine estas utile mencii ke la t.n. historiaj golfoj estas ankaŭ konsiderataj kiel internaj maroj. En Eŭropo, ekzemple, Francio konsideras la Golfon Cancale kiel sian internan maron, kvankam la enirejo estas larĝa 17 mejlojn. Nederlando sukcese sekigis la golfon Zuiderzee; Norvegio konsideras la fjordon Varanger-Fjord kiel sian internan maron, kvankam la enirejo estas larĝa 32 mejlojn. Sovet-Unio konsideras kiel sian internan maron la Blankan maron kaj la Golfon de Riga. Usono, aliflanke, konsideras kiel siajn internajn marojn Long Island Sound kaj la golfojn Monterey, Delaware kaj Chesapeake, kvankam la enirejoj de tiuj golfoj multe transpasas 10 mejlojn. Kanado postulas por si la Golfon de Hudson, kiu estas longa 900 mejlojn, dum la enirejo estas larĝa proksimume 100 mejlojn.

La internaj maroj estas en plena suvereneco de la marbordaj ŝtatoj kaj, diference de la teritoriaj maroj, la marborda ŝtato rajtas malpermesi kian ajn navigacion tie. Ili ĉiuj, senkonsidere al sia geografia karaktero, estas regataj de la sama jura reĝimo.

4. Apuda zono

En la praktiko montriĝis, ke la koncepto de teritoria maro, speciale en la kazoj, kiam ĝia larĝeco estas relative malgranda, ne sufiĉas por protekti ĉiujn rajtojn de la marbordaj ŝtatoj, precipe kiam temas pri kontrabandado. En Usono jam antaŭ la Unua Mondmilito la kompetenteco de la doganaj aŭtoritatoj etendiĝis ĝis la linio 12 mejlojn de la marbordo. Ankaŭ en la teorio aŭdiĝis ĉiam pli da voĉoj por larĝigo de la rajtoj de la marbordaj ŝtatoj al zono ekster la teritoria maro, kiun oni nomis apuda zono (*zone contiguë*). Plej grandajn meritojn por la teoria ekspliko de tiu zono havas la granda franca internaciisto kaj sendube unu el la plej grandaj aŭtoritatoj en la teorio de la mara juro Gilbert Gidel. Tiu zono ne troviĝas sub la suverenco de la marborda ŝtato, sed ĝi apartenas al la libera maro. Gidel opinias, ke la marborda ŝtato havas certajn kontrolajn rajtojn en la apuda zono kun la celo malhelpi la malobeon al siaj doganaj aŭ sanecaj leĝoj, kiel ankaŭ por malebligi la endanĝerigon de la sekureco. Tiuj kontrolmezuroj povas aplikiĝi maksimume je la distanco de 12 mejloj de la marbordo, do inkluzive de la teritoriaj akvoj.

La Internacia Juro hodiaŭ principe rekonas tiujn rajtojn de la marbordaj ŝtatoj, sed la limo de 12 mejloj ne povas esti konsiderata kiel jure fiksita. Ĉio dependas de la cirkonstancoj, de la faktaj bezonoj de la ŝtato kaj ankaŭ de ĝia efektiva povo realigi tiujn rajtojn.

5. Kontinenta breto

En la plej lasta tempo ekestis nova grava koncepto en la Internacia Mara Juro. Temas pri la t.n. kontinenta breto (*continental shelf, plateau continental*).

Montriĝis, ke ĉ. la kontinentoj troviĝas sub la maro, en profundo de proksimume 200 metroj, speciala kontinenta zono, kiu poste subite perdiĝas en grandaj profundoj de la maro. Fakte, la demando kie precize troviĝas la limo de tiu kontinenta breto, estas ankoraŭ diskutata inter la geografoj. Unuj opinias, ke la limo de la kontinenta breto troviĝas sur la linio, kiu kunligas la profundojn de 200 metroj. Aliaj pruvas, ke la profundoj super la kontinenta breto estas diversaj kaj ke oni ne povas precize ilin fiksi je 200 metroj. Fine, oni klarigas, ke ĉe la ebenaj marbordoj la kontinenta breto etendiĝas tre larĝe, dum ĉe la deklivaj marbordoj kun altaj montoj ĝi estas tre mallarĝa kaj la kontinentoj tuj abrupte perdiĝas en la profundoj. En ĉiu okazo, la kontinenta breto ne havis ian ajn signifon el jura vidpunkto. Ĝi estis pure geografia nocio. Sed subite oni eltrovis, ke sub la marfundo troviĝas en diversaj partoj de la mondo grandegaj kvantoj da nafto. Kaj kompreneble tuj oni ekdeziris alproprigi al si la rajton ĉerpi la nafton. Tiel en 1942 Britio kaj Venezuelo per kontrakto dividis la Golfon Pario, kiu troviĝas inter Venezuelo kaj la insulo Trinidad. Per tiu kontrakto la du ŝtatoj dividis inter si la maran fundon, kiu troviĝas ekster la teritoriaj akvoj, kaj same tiel la spacojn sub la fundo, ĉio kun la celo ekspluati la subfundajn kuŝejojn de nafto. En septembro 1945 la prezidanto de Usono Truman proklamis, ke Usono efektivigos sian jurisdikcion kaj kontrolon rilate la naturajn riĉaĵojn, kiuj troviĝas sur la marfundo kaj sub la fundo de la maro en la t.n. kontinenta breto. En la klarigo estas dirite, ke la kontinenta breto devas esti konsiderata el jura vidpunkto kiel etendaĵo de la Usona teritorio. La kontinenta breto estas difinita kiel tero ĉe la kontinento, kovrita de maro en profundo de ne pli ol 152 metroj.

Post tiu proklamacio sekvis aliaj. La prezidanto de Meksikio faris similan en oktobro 1945 kaj difinis la kontinentan breton kiel spacon limigitan per linio, kiu kunligas la punktojn de sama profundo de 200 metroj. Argentino iris ankoraŭ pli malproksimen per sia deklaro de oktobro 1946. Dum Usono kaj Meksikio eksplicite deklaris, ke ili alproprigas al si nur la kontinentan breton, sed ke la maro super ĝi restas libera, la Argentina deklaro asertas ke la kontinenta breto kaj la ĉirkaŭkontinenta maro, troviĝanta super la breto, estas subigitaj al suvereneco de Argentino. Multaj aliaj ŝtatoj sekvis la saman ekzemplon. Tamen la landoj, kiuj ne posedas larĝan kontinentan breton, kiel ekzemple Ĉilio kaj Peruo, aplikis alian metodon kaj tute simple proklamis sian suverenecon je distanco de 200 mejloj de la marbordo. En la deklarioj estis akcentite, ke tio estas farita por kontrolo kaj protekto de la fiŝkaptado.

La situacio koncerne la kontinentan breton kaj la ĉirkaŭkontinentan maron ankoraŭ ne estas tute klara. Kelkaj ŝtatoj, ekzemple Sovet-Unio, energie neas ĉiujn ajn rajtojn je tiuj spacoj. La senduba fakto estas ke la libereco de navigacio estas en danĝero, kvankam la deklarioj emfazas, ke tiu libereco restas. La danĝero venas precipe de tio, ke estas neimagebla la ekspluatado de la submaraj spacoj sen konstruado de diversaj specialaj instrumentoj en al maro aŭ sur la mara surfaco. Tio per si mem malhelpas la liberan navigacion. Sed oni devas preni ankaŭ en konsideron,

ke tiaj surmaraj konstruaĵoj prezentas grandajn valorojn kaj ke la ekspluatantaj ŝtatoj evidente devos apliki specialajn rimedojn de kontrolo kaj protekto, kio siavice limigos la liberan navigacion.

6. Arkto kaj Antarkto

Oni ne povas ne tuŝi almenaŭ per kelkaj vortoj la situacion en Arkto. Per la dekreto de 1926 Sovet-Unio proklamis kiel sovetan teritorion ĉiujn insulojn kaj ĉiujn teritoriojn, kiuj troviĝas en la regiono de la Arkta Oceano. La soveta teorio unuanime asertas, ke ne nur la insuloj, sed ankaŭ la maro kaj la glacio en la triangulo, kies bazo estas la norda soveta bordo, kaj la du flankoj fiksitaj per la ekstremaj punktoj de la soveta teritorio kaj per la norda poluso, apartenas ekskluzive al Sovet-Unio kaj estas parto de la soveta teritorio. La solan escepton faras la Spicbergaj insuloj, kiuj situas inter la 32-a kaj 35-a gradoj de la orienta longitudo, kaj kiu estas rekonitaj kiel norvegaj posedaĵoj. Tiu soveta dekreto baziĝas sur la teorio de sektoroj.

Diference de Arkto, la reĝimo de Antarkto ankoraŭ ne estas reguligita. Tie la teorio de sektoroj ne estas aplikebla, ĉar fakte Antarkto estas ĉirkaŭita de oceanoj. Diversaj ŝtatoj deklaris siajn postulojn rilate Antarkton, precipe Usono, Britio, Francio, Norvegio, Aŭstralio, Argentino, Novzelando kaj Sovet-Unio.

Antarkto estas grava ne nur el strategia vidpunkto, sed ankaŭ el meteorologia kaj precipe ekonomia. Naŭdek procentoj de la ĉasado al balenoj efektiviĝas en la akvoj de Antarkto. Tiurilate estas bone memori, ke en 1946 estis farita internacia konvencio pri la kaptado de balenoj kun la partopreno ankaŭ de Sovet-Unio.

Kiel ĉiuj branĉoj de la Internacia Juro, ankaŭ la Mara Juro troviĝas en stadio de fortega evoluo. Tiun evoluon kaŭzas la rapide ŝanĝiĝantaj kaj ĉiam pli grandaj ebloj de la tekniko. La maro, kiu ludis tiel gravan rolon en la tuta historio de la homaro kaj kiu tiel multe kontribuis al nia hodiaŭa civilizo, povas fariĝi aŭ objekto de novaj konfliktoj kaj streĉoj pro la utiloj kiujn ĝi prezentas, aŭ instrumento de unuecigo de la mondo. Tute laste, en kunligo kun la tendencoj plifirmigi la rilatojn inter la popoloj kaj krei pli potencajn supernaciajn instituciojn, aŭdiĝis fortaj voĉoj por subigo de la maro al Unuiĝintaj Nacioj, kiuj, kompreneble, devus esti unue reorganizitaj kaj havi pli da potenco. Ĉio ĉi estas ankoraŭ nur idealoj, por kiuj batalas elitaj spiritoj de la homaro. Eble tamen la efektiva limigo de la suvereneco, la kreado de supernacia federacio aŭ almenaŭ konfederacio, komenciĝos ĝuste per subigo de la maro al suvereneco de iu monda institucio. Tio ĉi estos la plej granda kontribuo, kiun la maro povos doni al la homaro.

En: Paul Neergaard (red.): *Sciencaj Studoj bazitaj sur*

originalaj esploroj kaj observoj.

Kopenhago: ISAE 1958. 238 p., p. 83–93.

LA JURA KAREKTERO DE REKOMENDOJ

La organoj de Unuiĝintaj Nacioj (UN), same kiel tiuj de aliaj interŝtataj organizaĵoj, esprimas sian volon aŭ sian opinion pri aferoj apartenantaj al la kompetenteco de iu el ili, en diversaj formoj. Tiele, la akcepto de novaj membroj en UN estas farata per “decido” de la Asembleo je “rekomendo” de la konsilio de Sekureco (art. 4/II). La “decidoj” de la Asembleo pri la t.n. gravaj demandoj, inkluzive la “rekomendojn” koncerne la pacon kaj sekurecon, devas ricevi la plimulton de du trionoj, dum la aliaj “decidoj” estas farataj per simpla plimulto de la ĉeestantaj kaj voĉdonantaj membroj (art. 18/III).

Ankaŭ la aliaj organoj de UN faras “decidojn” aŭ “rekomendojn”. La Konsilo de Sekureco, ekzemple, “decidas” pri la proceduraj demandoj per jesa voĉdonado de kiuj ajn sep membroj, dum al aliaj demandoj estas aplikata la principo de unuanimeco de la konstantaj membroj (art. 27). La Konsilo de Sekureco povas fari “rekomendojn” laŭ la art. 4/2, 5/I, 6, 36, 37, 38, 39, 93, 94/2, 97 de la Ĉarto, por citi nur kelkajn el tiuj, en kiuj la vorto “rekomendo” estas eksplicite uzita. Aliflanke, la Konsilo de Sekureco povas, aŭ eĉ devas, “decidi” en diversaj kazoj, tute speciale en tiuj antaŭviditaj en la art. 39, 40, 41, 44, 48, 94, 109/III.

La Ekonomia kaj Socia Konsilo, la Kuratora Konsilo kaj eĉ la Internacia Kortumo havas la rajton “decidi”, sed la unuaj du organoj povas ankaŭ “rekomendi” (art. 62/I, 62/III, 63/II, 64, 67, 89, 94).

En la Ĉarto de UN estas troveblaj ankaŭ aliaj esprimoj (“apliki rimedojn”, “akcepti”, “eksigi”, “elekti” k.t.p.), sed ili fakte eniras en la kadron aŭ de veraj decidoj aŭ de rekomendoj, t.e. de decidoj en la plej larĝa senco de tiu ĉi vorto. La plej evidentan pruvon donas la art. 18, 17, 67, 89 kaj 94 de la Ĉarto. La unua parolas pri la “decidoj” de la Asembleo, sed laŭ tiu sama artikolo tiu ĉi esprimo rilatas al ĉiuj elektoj, akcepto de novaj membroj, eksigoj, budĝetaj kaj kuratoraj demandoj kaj entute al ĉiuj aferoj, pri kiuj la Asembleo estas kompetenta. La art. 27 rilatas al ĉiuj “decidoj” de la Konsilo de Sekureco. Sed la tria alineo de la sama artikolo preskribas, ke la partioj en iu konflikto devas sindeteni de voĉdonado “en la decidoj farataj laŭ la ĉapitro VI kaj laŭ la par. 3 de la art. 52”. La ĉapitro VI pritraktas la pacan reguligon de konfliktoj kaj la Konsilo de Sekureco povas nur “rekomendi” (art. 36–38) aŭ “inviti”, kio havas similan rekomendan karakteron. Kiel oni vidas, la Ĉarto ne estas preciza rilate tiujn esprimojn: en kelkaj kuntekstoj la vorto “decido” signifas veran decidon

en la mallarĝa senco de la vorto, dum en aliaj ĝi havas tre larĝan signifon kaj rilatas al ĉiuj esprimoj de volo, inkluzive la rekomendojn.

Pro la fakto, ke la Ĉarto ne distingas eksplicite la du sencojn, estas necese en ĉiu konkreta kazo, antaŭvidita en la Ĉarto, esplori kaj trovi la signifon de la vorto “decido” kaj de ĝia jura atingopovo. Tio estas tute speciale grava en kazo de rekomendoj, kiuj, kiel ni vidis, estas entenataj en la nocio de decidoj ĝenerale. Temas antaŭ ĉio pri la signifo de la rekomendoj en la sistemo de la Ĉarto kaj, sekve, de tiuj “decidoj”, kiuj el jura vidpunkto estas fakte nur rekomendoj. Ĉu ili estas veraj decidoj kun deviga forto aŭ nur simplaj deziresprimoj, kies plenumiĝo dependas plene de la bona volo de tiuj, al kiuj ili estas adresitaj, aŭ, fine, la rekomendoj havas sian propran juran naturon, distingante ilin de ĉiuj aliaj volodeklaroj, kun specifaj juraj konsekvencoj?

Por korekte respondi al la demando ŝajnas utile mencii unue la spertojn de la Ligo de Nacioj (LN).

La rekomendoj sub la reĝimo de la Pakto de la Ligo de Nacioj

En la Pakto de la LN ĉiuj volodeklaroj estis nomataj “decidoj”. Tiu esprimo rilatis ne nur al la veraj decidoj en la mallarĝa senco de la vorto (ekz. art. 6, 7, 4/I, 4/III), sed ankaŭ al aliaj formoj de konkludoj, tute speciale al “rekomendoj” (art. 15 kaj 16), proponoj (art. 13 kaj 17), juĝoj kaj verdiktoj (art. 12 kaj 13). La rajtoj de la Konsilo kaj de la Asembleo rilate la membrojn de la LN kaj, eventuale, rilate aliajn ŝtatojn (art. 17) estis, principe, limigitaj al nuraj rekomendoj. La Pakto uzis eksplicite la vorton “rekomendi” por difini la povojn de la Konsilo en la solvado de konfliktoj (art. 15/4), en la fiksado de militaj fortoj, kiujn la membroj devis kontribui al la komuna armeo (art. 16/2), sed el vidpunkto de jura forto temis pri rekomendoj ankaŭ en la kazoj, kiam aliaj esprimoj estis uzitaj por nomi kiun ajn volodeklaron de la Konsilo aŭ de la Asembleo en iliaj eksteraj aktivecoj. La Konsilo, ekzemple, havis la rajton *prepari* planojn por la reduktado de la armado (art. 8/3), *proponi* rimedojn por ekzekuciigi verdiktojn (art. 13/4), *konsili* k.s. Tiuj ĉi esprimoj havis, fakte, karakteron de simplaj rekomendoj kun forto pli aŭ malpli granda (Ray 1930). En la praktiko de la LN ili ĉiam estis komprenataj kiel tiaj, eĉ se ili, en konkretaj kazoj, estis nomataj “decidoj”.

Dum la funkciado de la LN plurfoje stariĝis la demando kian juran forton havas la diversaj decidoj de la Asembleo kaj de la Konsilo. En la Raporto de la 18-a de aŭgusto 1921 al la Dua Sesio de la Asembleo oni pritraktis la demandon jene:

“La Komisiono decidis, ke la regulo de unuanimeco devus esti konservita, principe, por la rezolucioj akceptitaj de la Konsilo aŭ de la Asembleo en ĉiuj kazoj, en kiuj tiuj ĉi rezolucioj havus formon de decidoj, kiel ankaŭ por ĉiuj rezolucioj de la Konsilo kia ajn estu ilia naturo: decidoj aŭ simplaj rekomendoj. Ĝi aliflanke rimarkigis, ke, sen bezono ŝanĝi la Pakton, la Asembleo povus plue voĉdonadi per plimulto la simplajn deziresprimojn, same kiel dum la Unua Sesio, ĉar tiuj ĉi deziresprimoj ne estas definitive devigaj por la Ŝtatoj-membroj de la Ligo.” (Société des Nations).

El tiu ĉi opinio de la Komisiono sekvas, ke la rekomendoj estis konsiderataj kiel simplaj deziresprimoj, kiujn la Ŝtatoj-membroj povis, sed ne devis plenumi.

En la teorio la rekomendoj estis konsiderataj kiel deziresprimoj, proponoj, konsiloj. J. Ray diras: “La vorto rekomendo elvokas la ideon de simpla konsilo”. Aliloke li akcentas, ke la rekomendo ne donas “devigan solvon de la konflikto”. J. L. Kunz (1932) komparas la rekomendojn kun la simplaj proponoj, kiuj, kompreneble, ne estas devigaj.

La diferenco inter decido stricto sensu kaj rekomendo, sub la reĝimo de la Pakto, estis tre nete substrekita en la fama Konsulta Opinio n-ro 12 koncerne la limon inter Turkio kaj Irako, tiam sub mandato de Granda Britio.

Laŭ la art. 3 de la Traktato de Lausanne de la 24-a de julio 1923, la limo inter Turkio kaj Irako estis fiksota per amika interkonsento inter Britio kaj Turkio en la tempolimo de naŭ monatoj. Se la du ŝtatoj ne estis atingontaj akordon en la tempolimo fiksita, ili devontigis sin transdoni la aferon al la Konsilo de la LN. La turka kaj brita registaroj eksplicite sin devigis, ke, atendante la decidon rilate la limojn, ili faros neniun ŝanĝon en la tiama stato de tiuj teritorioj, “*kies definitiva sorto dependos de tiu decido*” (kursivo de I. L.).

La du registaroj ne atingis interkonsenton kaj tiel la afero venis antaŭ la Konsilon. Per sia Rezolucio de la 19-a de septembro 1925 la Konsilo petis de la Konstanta Internacia Kortumo konsultan opinion pri pluraj demandoj, interalie pri la karaktero de la farota decido, ĉu, nome, tiu decido de la Konsilo estos arbitracia verdikto, rekomendo aŭ mediacio. Ekzamenante la atingopovon de la art. 15 de la Pakto, la Kortumo esprimis sian opinion, ke la rekomendoj ne estas devigaj por la partioj. “Se estas vero – estis dirite en la Opinio – ke la atribuoj de la Konsilo rilate la solvon de konfliktoj estas antaŭviditaj en la art. 15 de la Pakto kaj ke, laŭ tiu artikolo, la Konsilo povas nur fari rekomendojn, kiuj, eĉ se ili estas unuanime akceptitaj, ne donas devigan solvon de la konflikto, tamen tio konsistigas nur la *minimumon* de devigoj, kiujn tiu ĉi artikolo trudas al la ŝtatoj, kaj de respondaj povoj de la Konsilo”.

La Kortumo, do, deklaris, ke la rekomendoj faritaj laŭ la art. 15 de la Pakto ne havas devigan karakteron. Kvankam la Konsulta Opinio rilatis nur al konkreta kazo kaj pritraktis nur la rekomendojn laŭ art. 15, tamen ĝia starpunkto havis pli grandan signifon. La Opinio same tiel rilatis al la rekomendoj el la art. 16, kiel ankaŭ al ĉiuj aliaj rekomendoj. Ili ne povis esti konsiderataj kiel devigaj. Tamen, nenio malhelpis la partiojn transdoni al la Konsilo aŭ al la Asembleo pli ampleksajn povojn. La Kortumo formulis tiun ideon tre klare: “Nenio kontraŭstaras ke la Partioj akceptu devigojn kaj transdonu al la Konsilo povojn pli larĝajn ol estas tiuj, kiuj litere sekvas el la art. 15, kaj precipe ke ili, per devigo kontraktita anticipe, donu la povon fari decidon, kiu, pro la forto de ilia antaŭa konsento, solvos definitive la konflikton.”

Esplorinte la devigojn de la partioj en la konkreta afero de Mosul, la Kortumo esprimis la opinion, ke per la art. 3 de la Traktato de Lausanne ili transdonis al la Konsilo la rajton devige decidi.

Ankaŭ en aliaj kazoj la partioj akceptis la devigon plenumi la rekomendojn de la Konsilo. En la afero de Alta Silezio, ekzemple, la Potencoj reprezentitaj en la Supera Konsilo invitis la Konsilon de la LN (per la decido de la 12-a de aŭgusto 1931) konigi al ili la solvon, kiun ĝi rekomendas rilate la trakton de la fiksota linio, kaj solene

deklaris, ke ili akceptas “la solvon, kiun rekomendas la Konsilo de la Ligo” (Journal Officiel). La Konsilo de la LN fakte akceptis rekomendon, kiu estis transdonita al la Prezidanto de la Supera Konsilo kaj kiu estis deviga. Alia ekzemplo estas tiu de la venecia Protokolo de la 13-a de oktobro 1921, kiu rilatis la fikson de la limoj inter Hungario kaj Aŭstrio. Per tiu ĉi Protokolo Aŭstrio devigis sin “akcepti la decidon, kiu estos rekomendita de la Konsilo de la Ligo de Nacioj” (Receuil des Traités, XI).

Oni vidas el la menciitaj ekzemploj, ke estis eble doni al rekomendoj devigan karakteron. Tio dependis de la volo de la ŝtatoj. Ili povis deklari jam antaŭ ol la rekomendo estis farita, ke ili akceptos ĝin kiel devigan solvon. Komprenoble, la ŝtatoj povis fari tian deklaron ankaŭ post kiam ili eksciis la enhavon de la rekomendo. En ambaŭ kazoj la rekomendo transformiĝis en devigan decidon. Se malatento al simpla rekomendo ne povis esti konsiderata kiel malobeo al Internacia Juro, neplenumo de rekomendo, fariĝinta deviga per antaŭa aŭ posta akcepto fare de la partioj, signifas rompon de devigoj laŭ la Internacia Juro.

Ekestas nun demando kian sencon havis la rekomendoj ekster tiuj kazoj. Ĉu ili ĉiam estis nur simplaj deziresprimoj, aŭ, male, ĉu la fakto mem, ke iu rekomendo estis plenalvide farita, rezultigis kelkfoje iajn jurajn sekvojn?

Tiurilate estas necese distingi du specojn de rekomendoj. Al la unua kategorio apartenis tiuj rekomendoj, kies enhavo estis nedeviga kaj kiuj ne produktis ian ajn juran efikon per la fakto, ke ili estis faritaj. Tiaj, ekzemple, estis la rekomendoj rilate la reduktion de armado, la entreprenotajn paŝojn kontraŭ la privata fabrikado de armiloj, la kontribuo al la armitaj fortoj de la LN, la liberecon de komunikado, la internacian komercon, la malsanojn, kiel ankaŭ ĉiuj aliaj rekomendoj pri aferoj apartenintaj al la kompetenteco de la LN krom tiuj el la art. 15.

Al la dua kategorio apartenis tiuj rekomendoj, kiuj senkonsidere al la enhavo, rezultigis, per la fakto mem de sia ekzisto, iujn jurajn efikojn. Temas pri la rekomendoj, antaŭviditaj en la art. 15 de la Pakto. Laŭ la par. 4. de tiu artikolo, rekomendo de la Konsilo pri konflikto traktata antaŭ ĝi povis esti farita aŭ ĉiuvoĉe aŭ per plimulto de voĉoj. En ambaŭ kazoj, kvankam la enhavo de la rekomendo ne estis deviga por la partioj, la rekomendo mem, kiel tia, havis la efikon, ke la partioj ne rajtis ekmiliti dum tri monatoj ekde la momento kiam la raporto estis publikigita. Kvankam, do, la enhavo de la rekomendo ne estis deviga, tamen ĝi en ĉiu okazo produktis devigon ne ekmiliti dum tri monatoj, kaj malobeo al tiu devigo signifis rompon de internaciaj devoj kun la sekvoj, antaŭviditaj en la art. 16 de la Pakto, eĉ se la ekmilitinta ŝtato entreprenis tiun paŝon por plenumi la enhavon de la rekomendo.

Post la forpaso de la tri monatoj ekestadis nova situacio. Se la rekomendo estis akceptita unuanime (komprenoble senkonsidere al la voĉoj de la partioj), la membroj de la LN havis la devon ne militi kontraŭ tiun ŝtaton, kiu konformiĝis al la rekomendo. Male, se la raporto de la Konsilo estis akceptita per simpla plimulto, la membroj de la Ligo havis la rajton agi “kiel ili opinios necesa por konservo de juro kaj justeco”. Praktike tio signifis, ke ne nur la partioj, sed ankaŭ ĉiuj aliaj membroj de la LN, havis liberajn manojn. Post la forpaso de la tri monatoj la milito ne plu estis malpermesita. Ĝi fariĝis laŭleĝa, ĉar jure permesita.

Resume: sub la reĝimo de la Pakto la rekomendoj ne estis devigaj, sed ili povis fariĝi tiaj per antaŭa aŭ posta akcepto fare de tiuj, al kiuj ili estis direktitaj; en kelkaj kazoj la rekomendoj rezultigis jurajn efikojn senkonsidere al la enhavo.

La rekomendoj laŭ la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj

La rekomendoj eniris en la Ĉarton de UN kun tiu jura senco, kiun donis al ili la tradicioj kaj spertoj en la internaciaj rilatoj sub la reĝimo de la Pakto. Alian sencion ili estus povintaj ricevi nur eksplicite, sed tio ne estis farita.

La fakto, ke la Ĉarto utiligis la saman vorton – *decido* – jen por nomi la verajn decidojn kun deviga karaktero jen por signi ĉiujn esprimojn de volo, inkluzive la rekomendojn; ke, plue, oni kelkfoje forgesas la specialajn preskribojn, kiuj modifas la normalan juran atingopovon ĉu de la veraj decidoj ĉu de la rekomendoj, estas la kaŭzo de konfuzo, kiu kelkfoje regas en la teoria pritrakto de la jura karaktero de la rekomendoj.

R. Barraine, ekzemple, demandas, ĉu la rekomendoj estas “deziresprimoj aŭ veraj decidoj” kaj respondas: “Laŭ la formo temas nur pri deziresprimoj, pri invitoj faritaj al la koncernaj ŝtatoj solvi laŭ difinita maniero problemon, kiu priokupas ilin, aŭ situacion, kiu kontraŭstarigas unu la alian. Fakte, temas pri veraj decidoj ...” (Barraine 1946).

Barraine ne donis iun ajn pruvon por tiu ĉi aŭdaca tezo kaj verŝajne li ne pensis al la konsekvencoj. Se la rekomendoj estus egalaj al la veraj decidoj, kial, do, la Ĉarto distingas inter la du volodeklaroj; kial en iu kazo ĝi rajtigus fari rekomendon, en alia decidi kaj en tria lasus al la koncerna organo la rajton elekti inter decido kaj rekomendo? Vere, la opinio de Barraine ŝajnas al mi absolute senbaza.

Tamen, jam en la unua jaro de la funkciado de UN estis farita provo doni al rekomendo devigan karakteron en la praktiko. En la konata afero inter Britio kaj Albanio pro la incidentoj en la markolo de Korfu (Corfou), la Konsilo de Sekureco akceptis Rezolucion de la 9-a de aprilo 1946, per kiu ĝi “rekomendas al la Registaroj de Unuigita Reĝlando kaj de Albanio tuj submeti tiun ĉi konflikton al la Internacia Kortumo konforme al la preskriboj de la Statuto de la Kortumo”. Surbaze de tiu Rezolucio la Registaro de Britio faris unuflankan plendon kontraŭ Albanio al la Kortumo kaj en ĝi asertis, ke la rekomendo de la Konsilo de Sekureco estas deviga por la partioj kaj ke, sekve, la formo de unuflanka plendo, kaj ne tiu de kompromiso, estas jure korekta. La saman starpunkton defendis la reprezentantoj de Britio dum la proceso pri kompetenteco de la Kortumo. Male, la reprezentantoj de Albanio argumentis, ke la rekomendoj ne estas devigaj kaj ke tial nur pere de kompromiso oni povus ŝarĝi la Kortumon pri la afero. En sia verdikto de la 25-a de marto 1948 la Kortumo ne esprimis sin pri tiu ĉi punkto, sed ĝi deklaris sin kompetenta surbaze de letero, per kiu Albanio estis libervole akceptinta la kompetentecon. Cetere, la posta proceso inter la du ŝtatoj evoluis sur la bazo de speciala kompromiso, submetita al la Kortumo post kiam estis publikigita ĝia verdikto, sed farita kaj subskribita antaŭ tio. Estas grave menci, ke sep juĝistoj de la Kortumo kaj la juĝisto *ad hoc* rekonfirmis, en sia aparta opinio, ke la rekomendoj ne estas devigaj (Affaire du Detriot de Corfou) kaj

ke, sekve, la Konsilo de Sekureco ne povas devigi la Partiojn submeti sian konflikton al la Kortumo (Lapenna 1948 kaj 1952).

Ankaŭ en San Francisco, dum la fonda kunveno de UN, oni diskutis la karakteron de rekomendoj. En la Dua Komitato de la Tria Komisiono la delegito de Belgio demandis ĉu la vorto “rekomendi”, kiu troviĝis en la ĉapitro VIII, sekcio A/ de la Projekto, “alportas devigojn por la ŝtatoj, kiuj estas Partioj de iu konflikto, aŭ ĉu ĝi nur signifas, ke la Konsilo donas opinion, kiu povas esti aŭ ne esti akceptita”. La reprezentantoj de Usono kaj Britio certigis ankoraŭfoje, ke la sekcio A/ “ne antaŭvidas iun ajn rimedon de devigo aŭ de sankcio” kaj post tio la belga delegito retiris sian amendon per la vortoj: “Ĉar nun estas klare interkonsentite, ke rekomendo farita de la Konsilo laŭ la Sekcio A/ de la Ĉapitro VIII ne kaŭzas ian devigan efikon...” (Conférence des NU, Vol. XII).

La sama opinio pri la nedeviga karaktero de la rekomendoj estas esprimita en pluraj aliaj gravaj dokumentoj, ekzemple en la Raporto al la Prezidanto de Usono pri la Rezultoj de la Konferenco en San Francisco; en la protokolo pri la diskutoj koncerne tiun demandon en la Komitato pri Eksteraj Rilatoj de la Senato de Usono; en la Raporto de la Departemento pri Eksteraj Aferoj de la Registaro de Kanado.

Estu menciitaj, fine, du opinioj de juristoj, kiuj mem partoprenis en la laboroj de la Konferenco en San Francisco. Prof. Clyde Eagleton, unu el la membroj de la delegacio de Usono, parolante pri la rajtoj de la Konsilo de Sekureco, diris: “Tiu ĉi kompetenteco estas limigita al la rajto fari rekomendojn kaj la partioj estas neniel jure ligitaj akcepti tiujn ĉi rekomendojn, same kiel la Unuiĝintaj Nacioj ne havas laŭjuran rajton altrudi ilian aplikon...” (Eagleton 1946). Goodrich kaj Hambro en sia fama komentario pri la Ĉarto akcentas, ke “tiaj rekomendoj ne havas ligan forton”.

El ĉio ĉi sekvas, ke la rekomendoj konservis en la sistemo de la Ĉarto de UN principe la saman karakteron, kiun ili havis en la kadro de la Pakto de la LN. *Ili estas deziresprimoj kun nuanco de iom akcentita sugesto kaj morala premo, sed jure nedevigaj.* Superflue diri, ke ankaŭ hodiaŭ la rekomendoj fariĝas devigaj per antaŭa aŭ posta akcepto fare de la partioj.

Juraj efikoj de la rekomendoj

El vidpunkto de la juraj efikoj la rekomendoj estas divideblaj je du ĉefaj kategorioj: 1) tiuj, kiuj ĉiam restas en la kadroj de sia normala jura naturo kaj ne produktas ian ajn specialan juran sekvon; 2) tiuj, kiuj – kvankam principe nedevigaj – kaŭzas iujn jurajn rezultojn.

1) Al la unua kategorio apartenas:

Ĉiuj rekomendoj faritaj al la membroj (aŭ eĉ al la nembroj sub la kondiĉoj de la art. 35) de UN, speciale tiuj rekomendoj, kiuj rilatas al la rajtoj kaj funkcioj de kiu ajn organo (art. 10); al la ĝeneralaj principoj de kooperado por konservo de la paco kaj sekureco inkluzive la senarmigon kaj la reguligon de la armado (art. 11/II); al la paca solvado de konfliktoj (ĉapitro VI, art. 11/II, 12, 52/III, 40); al la demandoj ekonomiaj, sociaj, edukaj (art. 62/I, 62/II, 63/II); al plenumo de verdikto de la Internacia Kortumo aŭ de kiu ajn alia juĝa aŭ arbitracia verdikto.

Al la sama kategorio apartenas ankaŭ la rekomendoj de unu organo de UN al alia organo, kiam tiuj organoj estas egalaj aŭ kiam la rekomendanta organo estas subigita al tiu, al kiu la rekomendo estas farita. Tiaj estas ĉiuj rekomendoj de la Asembleo al la Konsilo de Sekureco koncerne la pacon kaj sekurecon (art. 10, 11, 12) kaj koncerne la jaran raporton de la Konsilo al la Asembleo; ĉiuj rekomendoj de la Ekonomia kaj Socia Konsilo al la Asembleo (ekz. art. 63/II); la rekomendoj de kiu ajn alia organo al la Asembleo aŭ al la Konsilo de Sekureco, kiel ankaŭ la rekomendoj de la Kuratora Konsilo al Ekonomia kaj Socia Konsilo (art. 91); fine, la saman karakteron havas la peto de la Konsilo de Sekureco al la Asembleo transpreni en iu konkreta kazo la funkcion, kiujn la Ĉarto atribuis al la Konsilo.

2) Al la dua kategorio apartenas:

La rekomendoj, kiujn faras organo supera al la organo plenumanta la rekomendon. La Ekonomia kaj Socia Konsilo, ekzemple, estas organo subigita al la Asembleo (art. 66) kaj devas helpi la Konsilon de Sekureco se tiu-ĉi tion petas. Sekve, la Ekonomia kaj Socia Konsilo devos plenumi la rekomendojn de la Asembleo. Tiuj rekomendoj estos por ĝi devigaj. En la sama situacio troviĝas la Kuratora Konsilo en rilato al la Asembleo kaj rilate la Konsilon de Sekureco (art. 83 kaj 85/II).

Al tiu ĉi grupo de rekomendoj apartenas speciala subgrupo. Temas pri la rekomendoj, kiuj laŭ la Ĉarto estas antaŭkondiĉo por la decido de la Asembleo. Nur laŭ la rekomendo de la Konsilo de Sekureco, la Asembleo povas akcepti novajn membrojn (art. 4/II); haltigi la rajtojn kaj privilegiojn de iu membro (art. 5); eksigi iun membron (art. 6); fiksi la kondiĉojn laŭ kiuj ŝtatoj-nemembroj de la organizaĵo povas fariĝi partioj de la Statuto de la Internacia Kortumo (art. 93/II); nomi la Ĝeneralan Sekretarion (art. 97).

En ĉiuj menciitaj kazoj la Asembleo ne povas fari ian ajn decidon sen antaŭa rekomendo de la Konsilo de Sekureco. La volo de la organizaĵo esprimiĝas per du voloj de du organoj: la Konsilo de Sekureco tion faras en formo de rekomendo, la Asembleo en formo de decido. Kvankam la Asembleo rajtas akcepti aŭ malakcepti tian rekomendon de la Konsilo de Sekureco, ĝi tamen ne povas ĝin ŝanĝi, nek entute decidi kion ajn pri la menciitaj demandoj sen antaŭa dinifita rekomendo de la Konsilo. La Asembleo, ekzemple, povas rifuzi la nomigon de persono, rekomendita de la Konsilo, al la posteno de Ĝenerala Sekretario, sed ĝi ne rajtas nomi alian personon, ne rekomenditan. La rekomendo de la Konsilo havas en tiuj ĉi kazoj forton almenaŭ egalan al la jura forto de la decido de la Asembleo. Per si mem nek la rekomendo de la Konsilo, nek la decido de la Asembleo rezultigas ian juran efikon. Nur la identaj voloj de la du organoj produktas la necesan juran sekvon.

La rekomendoj estas antaŭviditaj ankaŭ en la konstituciaj aktoj de diversaj aliaj interŝtataj organizaĵoj. Kompreneble, ili ĉiam havas la saman, pritraktitan karakteron. Depende de eventualaj apartaj preskriboj, la rekomendoj povas havi tian aŭ alian specialan juran efikon. Ekzemple la Konstitucia Akto de UNESKO preskribas, ke ĉiuj rekomendoj de tiu organizaĵo devas esti prezentitaj al la kompetentaj aŭtoritatoj de la ŝtatoj-membroj en la tempolimo de 1 jaro post la finiĝo de la sesio, dum kiu ili estis akceptitaj (art. IV/4), kaj ke la membroj devas de tempo al tempo raporti pri la eventualaj sekvoj donitaj al tiuj rekomendoj.

Konkludo

El ĉio dirita sekvas, ke la rekomendoj en la Internacia Juro havas sian propran juran naturon, kiu plene respondas al la kutima signifo de la vorto “rekomendo”. La rekomendoj indikas la deziratan solvon, sed ne estas devigaj por tiuj, al kiuj ili estas direktitaj. Tial neplenumo de simpla rekomendo ne povas esti konsiderata kiel malobeo al la principoj kaj reguloj de Internacia Juro.

La rekomendoj fariĝas devigaj per anticipa aŭ posta akcepto fare de la interesitaj partioj. La neplenumo de tia rekomendo signifas malobeon de internacie akceptitaj sindevigoj.

Senkonsidere al la eventuala akcepto fare de la partioj, la rekomendoj, kvankam nedevigaj, povas havi per si mem iajn jurajn efikojn. Tio dependas de la konkretaj preskriboj, antaŭviditaj en la internaciaj traktatoj, konvencioj kaj kontraktoj. Se ne ekzistas tia speciala preskribo, la rekomendo ne havas ian ajn juran sekvon.

El vidpunkto politika la rekomendoj prezentas juran formulon konforman al la karaktero de la internaciaj rilatoj en la nuntempo. Unuflanke la principo de suvereneco estas ankoraŭ reganta en la hodiaŭa mondo. Aliflanke, la grandega evoluo de la tekniko kaj de la materiaj fortoj ĝenerale ĉiam pli kaj pli kunligas la ŝtatojn, interdependigas diversajn mondpartojn kaj, rezulte, postulas formiĝon de supernaciaj organismoj, limigon de suvereneco kaj pacan solvodon de malkonsentoj, konfliktoj kaj ĉiaspecaj problemoj. Estas montrite, ke la rekomendoj estas deziresprimoj kun nuanco de premo. Kiel tiaj ili en si mem entenas la du flankojn de la fundamenta antagonismo de niaj tagoj. Unu flanko de la rekomendo – tiu, kiu diras: estas dezirinde konformiĝi al la rekomendo – respondas al la interesoj de la internacia komunaĵo, al la interesoj de paca solvado de ĉiuj internaciaj problemoj. La alia flanko de la nocio “rekomendo” – tiu, kiu diras: oni povas malobei ĝin, ĉar ĝi ne estas jure deviga – respondas al la tendenco konservi la plenan suverenecon de la ŝtatoj kaj, sekve, ilian liberecon de agado. Rigardataj el tiu vidpunkto, la rekomendoj estas nenio alia ol tre lerta jura formulo, esprimanta la realaĵon en la internaciaj rilatoj. La institucio de rekomendoj permesas kondamni, almenaŭ formale, la perforton en la internaciaj rilatoj, lasante tamen la pordon malfermita al la perforto! La rekomendoj malaperos tiam, kiam sub la premo de la plua evoluo de la materiaj fortoj, la ŝtata suvereneco estos ĉiam pli limigata kaj kiam, paralele, formiĝos supernaciaj organizaĵoj kun efektivaj povoj.

SUMMARY

The legal nature of recommendations

The term “decision” in the Charter of the United Nations has two meanings: in its broad sense it relates to all conclusions, including recommendations, of the different organs (for instance in art. 25); in its narrow sense it relates only to real, binding decisions. Therefore it is necessary in every case to examine the legal significance of the term “decision”, especially when it embraces recommendations.

The author examines the legal character of recommendations in the light first of the practice of the League of Nations and then of that of the United Nations. Accordingly the study shows that recommendations are not binding. They express only a wish, but include an element of insistence. Sometimes the mere fact that a recommendation is made produces certain legal effects. Exceptionally, a recommendation has the same legal force as a binding decision. The study deals with such cases.

BIBLIOGRAFIO

Verkoj

- Barraine, R., 1946: L'Organisation des Nations Unies.
Eagleton, C., 1946: The Jurisdiction of the Security Council. – American Journal of International Law 3: 513 kaj sekvantaj.
Goodrich, L. M. & Hambro, E., 1949: Charter of the United Nations, Commentary and Documents, precipe: 208–209, 263 kaj sekv.
Gugenheim, P., 1938: Conflits Juridiques et Politiques dans la Société des Nations. – La Crise Mondiale: 239–245.
Hoiyer, O., 1925: La Solution Pacifique des Litiges Internationaux, precipe: 437–448.
Kunz, L. J., 1932: L'article 11 du Pacte de la Société des Nations. – Recueil des Cours 1:758.
Lapenna, I., 1948: O jurisdikciji i kompetenciji međunarodnog suda. - Zbornik Pravnog fakulteta u Zagrebu.
Lapenna I., 1952: Aktualaj Problemoj de la Nuntempa Internacia Vivo: 131–139.
Ray, J., 1930: Commentaire du Pacte de la Société des Nations, precipe: 484 kaj 71 de la Supplément III.
Schucking, W., 1927: Le Développement du pacte de la Société des Nations. – Recueil des Cours 5: 431 kas sekv.

Dokumentoj

- Affaire du Detroit de Corfou*, Arrêt du 25 Mars 1948 – Recueil des Arrêts: 20 kaj sekvantaj; Exposés Oraux, Distr. 241, precipe: 18, 60, 64.
Avis Consultatif no. 12 (Frontière entre la Turquie et l'Irak, Affaire Mosul): 27.
Charter of the United Nations.
Convenant of the League of Nations.
Conférence des Nations Unies, precipe Vol. XI: 95, 388; Vol. XII: 69, 141.
Journal Officiel de la Société des Nations, II/9: 982; 10–12: 1221.
Recueil des Traités de la Société des Nations, Vol. XI: 204.
Société des Nations, Rapport à la Deuxième Assemblée sur l'oeuvre du Conseil et sur les mesures prises pour exécuter les décisions de la Première Assemblée, A. 9. 1921: 64.

LA LINGVA PROBLEMO EN LA INTERNACIAJ RILATOJ

Prelego en Internacia Somera Universitato, Kopenhago, 1962

I. Konciza historia trarigardo

Apenaŭ necesas memori la rakonton pri la Babela Turo, kiu atestas, ke jam en la malproksimaj tempoj de la antikvo oni komprenadis la lingvodiversecon kiel grandan malbonon, aŭ eĉ kiel punon. Efektive, dum la tuta historio de la homaro, ekde kiam du gentoj de malsamaj lingvoj ekkontaktis en kiu ajn senco unu kun la alia, la lingvaj malfacilaĵoj devis sentiĝi kiel obstaklo al la reciproka rilato.

Lasante flanke la primitivan formon de la interkompreniĝo per gestoj, kiun ankaŭ en nia kultura kaj alte civilizita epoko eĉ la plej kleraj homoj devas ofte uzi en fremdaj lingvaj medioj por komuniki siajn plej elementajn bezonojn de malsato kaj soifo ĝis dormemo, la problemo estis tra jarcentoj solvata ankaŭ alimaniere, almenaŭ parte. En diversaj historiaj epokoj, kondiĉite de la samtempaj politikaj kaj kulturaj eventoj, jen unu jen alia lingvo estis altrudita kiel komuna kaj uzata ofte dum longa tempo sur vastaj teritorioj kiel instrumento de komunikado super aliaj lingvoj, regionaj dialektoj kaj lokaj parolmanieroj¹.

Tian rolon, ekzemple, ludis dum jarcentoj kaj ĉiam pli ludas la ĉina literatura lingvo, kreita surbaze de la Pekina dialekto kaj hodiaŭ plue intense evoluigata. Sur la teritorio de tiu granda lando paralele ekzistis kaj ankaŭ nuntempe ekzistas multnombraj lingvoj-dialektoj, tre malsamaj inter si, kiuj diferencigas de la oficiala lingvo ne nur fonetike, sed ankaŭ leksike kaj parte eĉ el gramatika vidpunkto. La ĉina skribo, konata ekde la 15-a jarcento antaŭ nia erao, kaj transplantita poste en Japanion, Koreon kaj Vietnamon, estis siamtempe potenca peranto kaj transportanto de la ĉina kulturo, kaj rimedo de la komunikado super ĉiuj regionaj kaj lokaj lingvaj diferencoj.

Similan rolon havis la **greka “koinê”** lingvo, kiu formiĝis rezulte de la kunfandiĝo de la grekaj lingvoj, ĉefe surbaze de la atika miksita kun la ionia. Aleksandro la Granda transplantis tiun novan komunan lingvon en la landojn konkeritajn de lia armeo (334–324). Ĝi fariĝis la oficiala lingvo de nombro da regnoj de la Helenisma epoko, kaj ĝi estis uzata dum pluraj jarcentoj kiel komuna lingvo

¹) A. Meillet kaj M. Cohen prave emfazas, ke ne estas eble trovi konvenan kriterion por distingi lingvon disde dialekto kaj loka parolmaniero.

super multnombraj regionaj kaj lokaj lingvoj de Adriatiko ĝis la apudmaraj regionoj de la nuna Nigra Maro. Poste, la **mezepoka greka** lingvo estis dum pliaj jarcentoj la oficiala komuna lingvo de Bizanco.

Ankoraŭ pli elstaran pozicion akiris tiurilate la **latina**. Origine lingvo de Latio (**Latium**), aŭ, pli precize, de la patricioj en la urbo Romo mem, ĝi daŭre ĉerpis novajn riĉaĵojn el la fontoj de la venkitaj lingvoj. El Romo ĝi unue disvastiĝis al la apudaj teritorioj, poste ĝi superregis la aliajn lingvojn de Italio kaj fine la legioj de Romo altrudis ĝin al la plej granda parto de la tiam okcidenta mondo. Sennombraj lingvoj kaj dialektoj estis parolataj sur tiu vastega seninterrompa surfaco de la terglobo sub la suvereneco de la Urbo de la Mondo, sed super ili troviĝis la oficiala latina, kiu estis samtempe la lingvo de kulturo, de komerco kaj de intergentaj ligoj en la sino de la Imperio.

Kiam en la kvina jarcento la Okcidenta Regno falis sub la venkaj atakoj de la barbaroj, la latina lingvo finis sian vivon de reganta ŝtata lingvo, sed ĝi tamen ne malaperis. En formo de la **mezepoka latina** ĝi daŭrigis sian ekzistadon kiel lingvo de la privilegiitaj tavoloj. Dum pliaj jarcentoj ĝi estis la lingvo de la nobelaro, de la eklezio, de la scienco kaj ĝenerale de la kulturo.

Identan aŭ tre similan funkcion havis en tiu aŭ alia historia epoko ankaŭ aliaj lingvoj: la **araba** en la periodo de florado de la araba kulturo en la mezepoko kaj hodiaŭ, en formo de la literatura araba lingvo, kiel kunligilo kultura kaj politika de la popoloj parolantaj plurajn malsamajn arabajn lingvojn, la **turka**, kiu, sekvante la militajn venkojn de la Porto, penetris siatempe profunde en Eŭropon kaj lasis multajn postsignojn precipe en la lingvoj de la Balkana Duoninsulo; la **hispana, portugala, angla, franca** en la tempo de la koloniaj kaj aliaj konkeroj kun la rezulto, ke ili hodiaŭ estas la komunaj oficialaj lingvoj de nombro da sendependaj ŝtatoj; la **rusa** ne nur sub la caroj, sed ankaŭ en Soveta Unio kiel la komuna lingvo super ĉiuj aliaj naciaj lingvoj kaj dialektoj; la **germana, itala, nederlanda** kaj aliaj literaturaj lingvoj en aliaj regionoj.

En ĉiuj ĉi kazoj ĉiam temis kaj temas pri lingvoj malantaŭ kiuj troviĝis difinita politika forto, plej ofte bazita sur krude milita potenco, sed kutime ligita ankaŭ al la ekonomia dinamismo kaj kulutraj valoroj. La fakto, ke lingvoj de plej malsamaj familioj akiradis kaj perdadis dum la historio tian privilegian pozicion, montras klare, ke ilia interna strukturo per si mem havis nenian decidan signifon en tiu procezo. Principe ĉiu ajn lingvo povus ludi tian rolon aŭ esti relative rapide adaptita por ĝin plenumi, kiel, cetere, tion pruvas la nuna kreado de komunaj literaturaj lingvoj en la novaj ŝtatoj de Azio kaj Afriko. Ŝajnas utile atentigi, ke, ĝenerale parolante, la komunaj regnaj lingvoj estis kaj estas uzataj ĉefe interne de la respektivaj ŝtatoj kaj konsiderinde malpli, eĉ kiam temas pri la t.n. grandaj lingvoj, ekster tiuj limoj, unuavice en la sferoj de ilia ekonomia, kultura kaj politika influo. Tio ne signifas malgravigi ilian valoron. Tute male, el vidpunkto pure kultura kaj el tiu de interhomaj rilatoj, la signifo de komunaj lingvoj estis kaj restas elstare granda kaj fruktodona, sed tamen limigita al difinitaj mondopartoj. Oni povas eĉ diri, ke en la pasinteco, kiam la internaciaj rilatoj en monda skalo plene forestis aŭ kiam, pli poste, ili apenaŭ ekzistis, tiuj lingvoj kontentigis la tiamajn bezonojn de

la komunikado. Tute alie prezentiĝas la afero en la pli nova epoko post la malapero de la latina. Aparte grava fariĝas la lingva problemo en la historia epoko, kiun ni travivas.

El vidpunkto de interŝtataj rilatoj en Eŭropo specialan signifon havis siatempe la latina. Kiel prave atentigas Satow², ĝi estis la sola lingvo kiun oni sciis skribi, almenaŭ en la Centra kaj Okcidenta Eŭropo. La latina estis uzata por internaciaj rilatoj ne nur skribe, sed ankaŭ parole. Nur la reformacio kaj la formiĝo de grandaj naciaj ŝtatoj forpuŝis iom post iom la latinan el la interŝtataj rilatoj. Ĝin anstataŭis unuavice la franca kaj poste ankaŭ aliaj lingvoj. Estas interese, ke jam en la 15-a jarcento Henriko la Sesa de Anglio skribis al Karlo la Sepa de Francio en la franca lingvo kaj ke tiu ĉi lingvo estis kutime uzata skribe kaj parole en la rilatoj inter la du landoj, sed en la 16-a jarcento, je la insistado de Anglio, oni denove komencis uzi la latinan. Fine de la 16-a jarcento la franca reĝo uzis nur la francan lingvon en siaj eksteraj rilatoj, kun la escepto de la reĝo de Pollando, al kiu li plue skribis latine.

Komence de la 16-a jarcento ĉiuj interkonsentoj verkitaj en la angla, germana aŭ itala lingvoj havis efektive hejman karakteron. La germana estis uzata inter la germanaj princoj; la angla en la rilatoj inter Anglio kaj Skotlando; la itala inter la respublikoj de la duoninsulo. Por la internaciaj kontraktoj en la vera senco de la vorto nur du lingvoj estis ĝenerale uzataj: la latina kaj la franca. Ankoraŭ en la 17-a jarcento la latina havis elstaran pozicion, sed la konkurenco de la franca kaj poste de la angla kaj aliaj lingvoj sentiĝis ĉiam pli forte. Jen kelkaj ekzemploj:

La Traktato de Vestfalia (1648) estis farita en la latina, sed la Traktato inter Hispanio kaj la Unuiĝintaj Provincoj de la sama jaro, per kiu la Unuiĝintaj Provincoj sendependiĝis, estis en la franca kaj nederlanda lingvoj. La Angla-Dana Traktato de julio 1670 estis en la latina kaj same tiel en la latina estis la Traktato inter Anglio kaj Nederlando de la jaro 1674. La Traktato de la t.n. Granda Alianco de la 7-a de septembro 1701 estis en la latina.

En la jaro 1711 la reĝino Anna skribis al siaj aliancanoj en la latina lingvo kaj en la sama lingvo estis verkitaj la rajtigiloj de ŝiaj reprezentantoj en la kongreso de Utrecht, sed en 1712, ĉe la unua konferenco de la Kongreso, la anglaj postuloj estis en la franca. Ankaŭ Prusio kaj Savojo uzis tiuokaze la francan. La Komerca Traktato inter Anglio kaj Francio de la 11-a de aprilo 1713 estis verkita en la latina, sed iuj aldonoj estis skribitaj en la latina kaj franca. La ratifo de la reĝino estis latina, sed la dokumento pri la interŝanĝo de la ratifoj estis verkita france. La kontraktoj, kiujn Francio subskribis la saman tagon (la 11-an de aprilo) kun Portugalio, Prusio, la Duko de Savojo kaj la Ĝeneralaj Ŝtatoj (Nederlando) estis en la franca.

Komence de la 18-a jarcento Svedio uzis ankoraŭ la latinan, sed Petro la Granda utiligis la francan. Ruslando uzis la germanan en siaj traktatoj kun Brandenburgo, sed en la rilatoj kun Aŭstrio ĝi uzis, krom la germana, ankaŭ la francan kaj la latinan. Ekde la mezo de la 18-a jarcento, kun Anglio konstante ekde 1715, Ruslando ĝenerale utiligis por siaj internaciaj rilatoj la francan lingvon. Ruslando adoptis la francan ĝis tiu grado, ke eĉ la korespondado inter Sankta Petersburgo kaj la rusaj diplomaciaj agentoj eksterlande estis en la franca. Rusaj ambasadoroj, kiuj oficis sub Aleksandro

2) Satow, Guide, 1917, Vol. I, p. 58.

la Dua ne nur mem uzis la francan, sed ankaŭ postulis de la aliaj la observon de tiu ĝis privilegia pozicio. Grafo Osten Sacken, rusa ambasadoro en Berlino, ricevinte foje komuniko en la germana, respondis tutsimple ruse kaj Wilhelmstrasse tuj sendis al li la saman komunikon en la franca. “Oni komprenis tie” – li rakontis poste – “ke, se oni enkondukus tiun novan sistemon oni elmetus sin al la ricevo de notoj en la ĉina aŭ en la turka”.³

Paralele kun tiu penetrado de la franca, ankaŭ aliaj lingvoj estis sporade uzataj. Ferdinando kaj Isbella de Hispanio uzadis la hispanan por la rajtigiloj de siaj senditoj kaj ĝenerale klopodis enkonduki la hispanan en la diplomaciajn rilatojn. Interesa estas la lingva praktiko en la rilatoj kun Turkio. La projekto de la Pactraktato de Beograd (1739) estis, ekzemple, verkita en la franca kaj en la turka: la unuan subskribis la reprezentanto de la Imperio, la duan la Veziro. La franca ambasadoro, al kiu estis donitaj ambaŭ tekstoj, aldonis la francan garantion sur aparta papero en la franca lingvo kaj resendis la du kopiojn al la du plenrajtigitoj: al ĉiu en la lingvo de la alia, kune kun la akto de garantio en la franca. La fina teksto de tiu traktato estis en la latina kaj en la turka. La Traktato kun Ruslando en la sama okazo estis verkita en la itala kaj en la turka. Villeneuve en la nomo de Ruslando donis al la Granda Veziro la italan tekston, kaj siavice ricevis de li la turkan. La Traktato de Kuĉuk-Kajnardĝi inter Ruslando kaj Turkio (1774) estis en la rusa, turka kaj itala. La Pactraktato de Ŝištovo (1791) inter la Imperiestro de Aŭstrio kaj Turkio estis, same tiel, en du lingvoj: la francan subskribis la plenrajtigitoj de la Imperiestro, la turkan tiuj de la Porto. La du dokumentoj estis interesanĝitaj.

Kun la escepto de tiuj kaj aliaj sporadaj kazoj, la franca lingvo, kiel dirite, havis ĉiam pli privilegian pozicion. Ĝi estis tiel granda, ke la aliaj ŝtatoj opiniis necese fari rezervojn por protekti sin kontraŭ la eventualan transformiĝon de tiu praktiko en rajton por la franca lingvo. Tial jam en 1748, en la traktato de Aix-la-Chapelle estis enmetita aparta artikolo, laŭ kiu la uzo de la franca lingvo en la kontrakto devas ne esti konsiderata kiel malhelpo por la partioj ricevi subskribitajn kopiojn en aliaj lingvoj. Similan regulon enhavis la Pariza Traktato de 1763 inter Britio, Francio kaj Hispanio, kaj la Traktato de Versailles de 1783. La fina Akto de la Viena Kongreso de la 9-a de junio 1815, verkita en la franca, eksplicite emfazis en la artikolo 120, ke la uzo de la franca ne povas esti konsiderata kiel deviga precedenco, nome, ke ĉiuj ŝtatoj rezervis la rajton uzi en siaj diplomaciaj rilatoj tiun lingvon, kiun ili uzis ĝis tiam aŭ kiun ili dezirus uzi en la estonteco.

Tio ŝajnis necesa, ĉar jam pli frue Francio pretendis havigi al la franca lingvo ankaŭ jure rekonitan pozicion de oficiala lingvo de la interŝtataj rilatoj, sed renkontis reziston. Tre probable la unua incidento tiurilate okazis en la jaro 1753. En la traktadoj por ordigo de malkonsento koncerne prizon, la francaj komisiitoj resendis al la Britoj ilian memorandon, ĉar ĝi estis skribita en la angla lingvo, kaj postulis, ke la tuta negocado okazu en la franca. Ili asertis, ke la privilegia pozicio de la franca lingvo estas ankaŭ jure establita per longa uzado en la diplomacia praktiko. La Brita Registaro sendis al siaj reprezentantoj en Parizo instrukciojn, en kiuj ĝi deklaris, ke pro la ĝentileco ĝi ĉiam aldonis al la anglalingvaj memorandoj francan tradukon,

3) Frangulis, Vol. I. p. 1208.

sed ke la francaj komisiitoj trovis erarojn en la vortumo. Tial la anglaj komisiitoj ricevis la ordonon uzi estontece nur la anglan. Ĉar nun Francio postulas la uzon de la franca kiel rajton, la Brita Registaro opinias, ke akcepti tiun uzon en tiaj kondiĉoj signifus efektive krei precedencon kaj rekoni la uzon de la franca kiel rajton. En la dokumento estis dirite:

“Ĉiuj nacioj havas la rajton rilati reciproke en neŭtrala lingvo. Kiel tia, la franca estas uzata en la rilatoj kun la princoj de la Imperio kaj kun aliaj Potencoj; se la Kortego de Versailles opinias oportune trakti kun Lia Majesto en la latina, la Reĝo volonte konsentos ... La reĝo eksplicite ordonas ke vi ne akceptu en la estonteco iun ajn dokumenton de la francaj komisiitoj en ilia propra lingvo, krom se ili devigas sin ricevi la respondon en la angla”.⁴

La francaj komisiitoj tiam provis konservi la pozicion de sia lingvo per deklaro, ke la uzo de la franca ne estos konsiderata kiel precedenco, sed Britio restis firma. Estas menciinde, ke oni perdis preskaŭ la tutan jaron 1753 pro tiu lingva disputo.

En 1800 la Kortego de Sankta James enkondukis la praktikon rilati kun la diplomatoj akredititaj al ĝi, en la angla anstataŭ en la franca, kiu estis pli frue tiucele vaste uzata. Poste tiu praktiko ĉiam pli larĝiĝis kaj la Brita Registaro uzadis ĉiam pli abunde la anglan lingvon en siaj komunikoj al aliaj registaroj. En 1831 la brita reprezentanto en Pruslando ricevis instrukcion uzi nur la anglan. Okaze de alia lingva incidento, en 1851, lordo Palmerston instrukiis la britan reprezentanton uzi nur la anglan kaj deklaris, ke, laŭ la opinio de la Brita Registaro, ĉiu ŝtato rajtas uzi sian propran lingvon en la oficialaj komunikoj, ĉar oni povas pli bone esprimi la precizan sencion en sia lingvo. Li kontraŭstaris la praktikon aldoni tradukojn, ĉar tio kondukis al la traktado de la traduko kiel originalo, anstataŭ la angla versio.

Al la firmiĝado de la pozicio de la angla multe helpis la kreskanta forto de Usono. Ju pli ĝi fariĝadis mondpotenco, des pli grava estis ĝia apogo al la angla. Okaze de la kunveno de la Arbitracia Tribunalo en Parizo por prijuĝi la britan-usonon malkonsenton rilate kelkajn demandojn de jurisdikcio en la Maro de Behring, oni decidis, ke la tuta afero estu traktata en la angla. Ribot, la tiama franca Ministro de Eksterlandaj Aferoj, esprimis al usona ŝarĝito de la aferoj Wignaud sian surprizon pro tiu plano. La tiama Prezidanto de Usono Harrison, al kiu la usona reprezentanto raportis, energie postulis la uzon de la angla. Li nur konsentis, ke la du membroj de la Arbitracia Tribunalo – Italo kaj Svedo – povu doni sian decidon en siaj respektivaj lingvoj.

La batalo por havigi al sia lingvo kiel eble plej bonan pozicion en la internaciaj rilatoj komencis vastiĝi. Sub Bismarck la slogano estis **“Der deutsche Kaiser darf nur deutsch schreiben”** (La germana Kaiser rajtas skribi nur germane). Oni deziris agi laŭ la principo, ke la oficialaj rilatoj kun la diplomatoj akredititaj en Berlino devas esti kondukataj en la lingvo de la lando. Rezulte, la Ministro Bernstorff skribis al ĉiuj diplomatoj en la germana kaj post nelonge ricevis de ĉiuj la respondojn en iliaj respektivaj lingvoj: la rusa, sveda, hispana k.t.p. ... La afero tiam ne sukcesis. La kondiĉoj por tio ankoraŭ ne estis maturaj.

4) Satow 1932, p. 54.

Kiel oni vidas, ĝenerale parolante la franca lingvo konservis siajn poziciojn, kun kelkaj sporadaj esceptoj, ĝis la Unua Mondmilito. Post la finiĝo de la milito la angla ĉiam pli forte konkurencis al la franca. En Versailles (1919) oni uzis egale la anglan kaj la francan. La Pakto de la Ligo de Nacioj estis, do, skribita en tiuj du lingvoj. Tamen, oni evitis tiam uzi la vorton “oficiala”. Laŭ la Regularo (Reglement) de la 30-a de novembro 1919, la Ligo de Nacioj ne havis “oficialajn” lingvojn, sed ĝi uzis “la du kutimajn lingvojn”: la francan kaj la anglan. Cetere, la Regularo antaŭvidis, ke ĉiu ŝtato rajtos uzi sian propran lingvon, sub la kondiĉo, ke ĝi mem prizorgu la tradukon en unu el la du “kutimaj lingvoj”.

Per tio estis donita definitiva bato al la privilegia pozicio de la franca kiel pli malpli sola lingvo de la internaciaj rilatoj. Sed tio ankaŭ malfermis la pordon al la plua lukto por la oficialigo de aliaj lingvoj. Ĉiu pli grava ŝtato – kaj ankaŭ la malpli gravaj – komencis uzi sian lingvon en internaciaj rilatoj, kiam ajn prezentigis la okazo. Aŭdiĝis ĉiam pli laŭtaj postuloj por la oficialigo de pliaj lingvoj, sed same laŭtaj ankaŭ por la egaleco de la lingvoj. La politikaj avantaĝoj, kiujn donas la uzo de la propra lingvo en internaciaj rilatoj, estis ofte kovrataj per pretekstoj de pure lingvaj kvalitoj. Ankoraŭ en 1933 en la mondfama verko **Dictionnaire Diplomatique** estis dirite:

“La aparta karaktero de nia lingvo certigos al ĝi ĉiam la favoron de la diplomatoj, kaj ni ne estos la solaj, kiuj bedaŭros, ke ĝi ne plu havas tiun universalecon, kiun sciis doni al ĝi Louis la XIV kaj Voltaire. Unusola lingvo en la servo de la internacia politiko estis intelekta ligilo inter la nacioj. Ili tro tendencas izoliĝi, kaj devigi ilin helpi sin per interpretistoj por difini la sencon de siaj konversacioj, signifas prepari estontajn malkonsentojn inter ili”.⁵

Aliflanke la Rusoj, kompreneble, glorigas la kvalitojn de sia lingvo:

“Necesas emfazi – skribis Kojevnikov – ke la lingvo de la granda rusa popolo, kiel konate, ne nur ne postrestas en la riĉeco al aliaj lingvoj, sed superas multajn el ili, kiel tion prave rimarkigis jam M. V. Lomonosov. Nuntempe la rusa lingvo estas oficiale rekonita kiel lingvo internacia”.⁶

Multe pli objekte prezentis la aferon E. Satow en la unua eldono de sia verko el la jaro 1917:

“Estas klare, ke dum persono parolanta aŭ skribanta en sia propra lingvo povas diri kion ajn li deziras, aliflanke, kiam li uzas fremdan lingvon, li povas diri nur tion, kion permesas al li esprimi la hazarde posedata kono de tiu aparta lingvo”.⁷

Ĉu estas hazardo, ke la ĵus citita parteto, kiu troviĝis en la eldono de 1917, kiam la pozicio de la franca ŝajnis ankoraŭ treege firma kaj tiu de la angla ankoraŭ necerta, estis ellasita en la eldono de 1932, kiam la pozicio de la angla jam konsiderinde firmiĝis je la kostoj de la franca?

Mallonge, la ĝenerala situacio inter la du militoj povis esti karakterizita jene: superrego de la angla kaj franca en la interŝtataj rilatoj kaj precipe en la sino de la Ligo de Nacioj; kolektivaj multflankaj internaciaj kontraktoj en la du lingvoj;

5) Frangulis, p. 1209.

6) Kojevnikov, p. 226

7) Satow, 1917, Vol. I, p. 67.

duflankaj internaciaj kontraktoj en la lingvoj de la kontraktantaj partioj; firmiĝo kaj plia evoluo de la komunaj literaturaj naciaj lingvoj, el kiuj pluraj estas uzataj ankaŭ en internaciaj kadroj precipe en la sferoj de komerco kaj kulturo; akriĝo de la lukto por la havigo de privilegia pozicio en internaciaj rilatoj ankaŭ al aliaj lingvoj.

II. Nuna situacio

Kiel oni povis atendi, post la Dua Mondmilito aliaj grandaj ŝtatoj postulis la oficialigon de siaj respektivaj lingvoj. Rezulte, diference de la Ligo de Nacioj, kiu havis du oficialajn lingvojn sub la kaŝnomo de “kutimaj”, la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj estas verkita en kvin samvalidaj lingvoj: la ĉina, franca, rusa, angla kaj hispana. La art. 111 de la Ĉarto tekstas:

“Tiu ĉi Ĉarto, kies ĉina, franca, rusa, angla kaj hispana tekstoj estas egale aŭtentikaj, estos deponita en la arĥivoj de la Registaro de Unuiĝintaj Ŝtatoj de Ameriko”.

En ĉiuj organoj de Unuiĝintaj Nacioj, kun la escepto de la Internacia Kortumo en Hago, la menciitaj kvin lingvoj estas oficialaj.

En la Pariza Packonferenco de 1946 la oficialaj lingvoj estis la rusa, angla kaj franca. Do, unu plia lingvo estis aldonita kompare kun Versailles en 1919, kaj du pliaj lingvoj kompare kun la Viena Kongreso en 1815.

En aliaj internaciaj organizaĵoj apartenantaj al la familio de Unuiĝintaj Nacioj la nombro de oficialaj lingvoj varias. Ekzemple, la oficialaj lingvoj de la Internacia Kortumo en Hago, kiu estas organo de Unuiĝintaj nacioj, estas la angla kaj la franca. La partioj povas, laŭ sia bontrovo, uzi unu aŭ alian oficialan lingvon, aŭ ili povas interkonsenti uzi nur unu el la du oficialaj lingvoj por la tuta proceduro antaŭ la Kortumo. Konforme al la art. 39/III de la Statuto de la Kortumo, la Kortumo povas rajtigi la uzon de kiu ajn alia lingvo laŭ la postulo de kiu ajn partio, sed en tiu okazo la koncerna partio devas prizorgi la tradukon en unu el la oficialaj lingvoj. Kutime la lingvoj, kiuj estas akceptitaj kiel oficialaj, estas egalaj kaj la tekstoj same aŭtentikaj. Tamen, en la kazo de la juĝo de la Kortumo, pro la ekstrema delikateco de la afero kaj por eviti miskomprenojn rilate interpretadon, la Kortumo decidis, kiam ajn ĝia juĝo estas donita en la angla kaj en la franca, kiu el la du tekstoj estos konsiderata kiel la aŭtentika.

Alia organizaĵo, aparte grava el la vidpunkto de internacia kunlaborado en la sferoj de edukado, scienco kaj kulturo, UNESKO, havas du oficialajn lingvojn: la francan kaj la anglan. Tamen, laŭ la art. 54 de la Regularo pri Proceduro, la oficialaj lingvoj de la Ĝenerala Konferenco de tiu organizaĵo estas la araba, ĉina, angla, franca, hinda, itala, rusa kaj hispana. Krome, la Ĝenerala Konferenco povas rekoni ankaŭ kiun ajn alian lingvon kiel oficialan je postulo de kiu ajn Membro-Ŝtato de tiu organizaĵo, sed neniu ŝtato rajtas postuli la oficialigon de pli ol unu lingvo. Siajn publikaĵojn UNESKO eldonas en diversaj lingvoj. Ekzemple la revuo “UNESKO Kuriero” estas nuntempe eldonata en la angla, franca, hispana, rusa, germana, araba kaj japana lingvoj.

La organizaĵo de U.N. por Nutraĵo kaj Agrikulturo (FAO) havas tri oficialajn lingvojn: la anglan, francan kaj hispanan. En la Monda Organizaĵo de Sano la

oficialaj lingvoj estas la ĉina, angla, franca, rusa kaj hispana. La samaj kvin lingvoj estas oficialaj en la Internacia Telekomunikada Unio (ITU). En la Internacia Labor-Organizaĵo (ILO) oni uzas por diversaj publikaĵoj la anglan, francan, hispanan, araban, nederlandan, germanan, hindan, japanan, norvegan, urduan lingvojn.

La oficialaj lingvoj de diversaj organizaĵoj de la Eŭropa Komunaĵo estas la franca, germana, itala kaj nederlanda. Tiuj lingvoj, ekzemple, estas oficialaj en la Eŭropa Komunaĵo de Karbo kaj Ŝtalo, Eŭropa Ekonomia Komunaĵo, Eŭropa Kortumo. Aliaj lingvoj estas oficialaj en aliaj interŝtataj kaj internaciaj privataj organizaĵoj. Surbaze de la informoj, kiujn entenas la Jarlibro de Internaciaj Organizaĵoj en la eldono 1960/61, E. S. Tew faris statistikon pri la nombro de lingvoj uzataj en ĉiuj registaraj kaj neregistaraj internaciaj organizaĵoj. La statistiko, publikigita en **Associations Internationales**⁸, montras, ke el 1206 internaciaj registaraj kaj neregistaraj organizaĵoj nur 381 havas unu solan lingvon kiel oficialan, 346 havas du oficialajn lingvojn, 248 uzas tri oficialajn lingvojn, 147 havas kvar oficialajn lingvojn, 58 utiligas kvin oficialajn lingvojn, 15 oficialigis ses lingvojn kaj 11 organizaĵoj havas sep aŭ pli da oficialaj lingvoj. Inter la organizaĵoj, kiuj havas nur unu oficialan lingvon, menciindaj estas la 24 internaciaj organizaĵoj, en kiuj la sola oficiala lingvo estas la Internacia Lingvo Esperanto.

Alia statistiko, farita same tiel surbaze de la informoj en la menciita Jarlibro, donas bildon pri la lingvoj uzataj kiel oficialaj en diversaj organizaĵoj. En la familio de Unuiĝintaj Nacioj la angla estas oficiala en 18 organizaĵoj, la franca en 15, la hispana en 13, la rusa en 7, aliaj lingvoj en 4. En la organizaĵoj de la Eŭropa Komunaĵo la angla estas oficiala en neniuj organizaĵoj, dum la franca, germana, itala kaj nederlanda estas oficialaj en 7 organizaĵoj. Entute, nome en ĉiuj registaraj kaj neregistaraj organizaĵoj, la angla estas oficiala en 943, la franca en 920, la germana en 399, la hispana en 253, la itala en 110, la rusa en 41, la nederlanda en 43, la portugala en 42, aliaj lingvoj en 358 organizaĵoj. Tiuj aliaj lingvoj estas la araba, ĉina, dana, Esperanto, hebrea, japana, latina, hungara, norvega, pola, serba-kroata, slovena k.a.

Ambaŭ statistikoj, kvankam sendube tre interesaj, tamen ne malkovras la faktan gravecon de unuopaj lingvoj en la internacia uzo. Kvankam ekzemple, la rusa estas uzata kiel oficiala nur en 41 organizaĵoj kompare kun la 43 organizaĵoj, kiuj oficialigis ankaŭ la nederlandan, tamen sendube la rusa lingvo havas pli da graveco hodiaŭ en la internaciaj rilatoj ol havas la nederlanda. La samo validas ankaŭ por kelkaj aliaj lingvoj, ekzemple por la ĉina, kiu eĉ ne estas aparte menciita, sed klasigita inter “aliaj lingvoj”.

La donitaj informoj pli ol evidente montras, ke la nombro de uzataj lingvoj en internaciaj rilatoj, anstataŭ malkreski kiel neinformitaj personoj ofte pensas, multiĝas de jaro al jaro kaj kreas senfinajn komplikaĵojn. Speciale grava montriĝis la problemo en la plej grandaj interŝtataj organizaĵoj. La oficialigo de pluraj lingvoj kaŭzis tiom da malfacilaĵoj ĉiaspecaj, ke ili serioze endanĝerigis la disvolviĝon de la laboroj. Malgrandigi la nombron de oficialaj lingvoj ne estis eble, ĉar ĉiu ĵaluze gardis la akiritajn poziciojn. Do, oni trovis solvon – aŭ oni almenaŭ pensis, ke solvo estis trovita – per la enkonduko de malpli granda nombro de t.n. laboraj lingvoj.

8) Associations, 1960,n-ro 12, pp. 736–737.

Ekzemple, en la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj la angla, franca kaj hispana estas akceptitaj kiel “laboraj lingvoj” de la plenaj kunvenoj, de diversaj komisionoj kaj subkomisionoj. Ĉiu parolado povas esti farita en kiu ajn el la oficialaj lingvoj de U.N. kaj tiu parolado devas esti tradukita en la tri laborajn lingvojn. Parolado farita en unu el la laboraj lingvoj devas esti tradukita en la du aliajn.

La Ĝenerala Konferenco de UNESKO unue enkondukis nur la francan kaj la anglan kiel laborajn. Poste, sub la premo de la hispane parolantaj nacioj, devis esti akceptita ankaŭ la hispana kiel labora. Kiam Soveta Unio aliĝis al UNESKO, ĝi, tute nature, postulis, ke ankaŭ la rusa fariĝu labora lingvo. Rezulte, hodiaŭ UNESKO formale havas du oficialajn lingvojn, sed ĝia ĝenerala Konferenco oficialigis 8 lingvojn (kaj povas konsenti tiun pozicion al pliaj lingvoj), dum la laboraj lingvoj estas la angla, franca, rusa kaj hispana. Per tio, tamen la afero ne finiĝis. Se la Ĝenerala Konferenco okazas en lando, kies nacia lingvo ne estas unu el la laboraj lingvoj de la Konferenco, la Plenuma Komitato faros specialajn aranĝojn por la uzo de la lingvo de la koncerna lando dum tiu Konferenco. Praktike tio signifas, ke en tiu okazo estos 5 laboraj lingvoj.

Ne necesas daŭrigi. La enkonduko de “laboraj lingvoj” ne solvis la problemon. Iusence tiu enkonduko eĉ komplikis ĝin. La lingva batalo per tio ne nur ne ĉesis, sed eĉ vastiĝis. Ĝi restis forta sur la kampo de “oficialaj lingvoj” kaj ĝi etendiĝas ankaŭ al tiu de la “laboraj lingvoj”.

III. Diversaj aspektoj de la problemo

Tiu tuta lingva problemo en la nuntempaj internaciaj rilatoj estas tre kompleksa kaj ĝi kaŭzas multnombrajn komplikaĵojn. Ĝi havas plurajn aspektojn, el kiuj la plej gravaj estas la teknike-lingva, socia, psikologia, politika kaj ekonomia.

(1) **Teknike-lingva aspekto:** El pure teknike-lingva vidpunkto la problemo havas multajn facetojn, kiuj havas kiel komunan fonon la malfacilecon plene ekregi kiun ajn nacian lingvon. Antaŭ nelonge s-ro A. Woodburn sugestis la kreon de Komuna Eŭropa Lingvo, kies vortaro devus konsisti ĝis maksimumo el la jam internaciigintaj vortoj. Efektive, li proponis krei ion, kio esence jam ekzistas en la formo de la Internacia Lingvo Esperanto. La brita parlamentano formulis sian sugeston en formo de leĝpropono, por kiu li pledis antaŭ la Brita Parlamento la 28-an de februaro 1962. En sia parolado li mem akcentis la grandan malfacilecon de la angla. Parola angla – li diris – konsistas el 40 malsamaj sonoj, sed ekzistas pli ol 2.000 diversaj manieroj literumi ilin. Tio alproksimiĝas al la ĉina skribo, kiu konsistas el 50.000 signoj, sed nuntempe ĉ. 4.000 estas ĝenerale uzataj. Kaj kion diri pri la rusa kun la multnombraj kazoj kaj deklinacioj, aŭ pri la franca kun ĉiuj eblaj finaĵoj por la konjugacio de la verboj, aŭ pri kiu ajn alia nacia lingvo. La fakto, ke ĉie en la mondo oni studas siajn proprajn naciajn lingvojn dum multaj jaroj en la lernejoj montras tute klare ĝis kiu grado ili estas malfacilaj. Tio kaŭzas, ke relative tre malgranda nombro da personoj ekregas kontentige fremdajn naciajn lingvojn.

Kiam pluraj lingvoj estas oficialaj, pro la strukturaj malsamecoj de tiuj lingvoj ofte ekestas la demando kiel esprimi en la traduko precize la ideon de la originalo. Okazas tre ofte mistradukoj kaj miskomprenoj, kvankam la plej gravaj

organizaĵoj disponas pri unuarangaj tradukistoj kaj interpretistoj. Ne estas ĉi tie la loko por doni ekzemplojn. Sufiĉos eble menci, ke eĉ la nomo mem de la plej grava organizaĵo de la hodiaŭo ne estas la sama en la rusa kaj en la angla aŭ franca. En la angla kaj franca aŭtentikaj tekstoj ĝi nomiĝas “Unuiĝintaj Nacioj”, en la rusa same aŭtentika teksto ĝi estas “Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj”. Se tio okazis en la plej grava nuntempa dokumento de la mondo kaj en kondiĉoj, kiuj ebligis al la tradukistoj pripensi la tradukotan esprimon, oni povos facile imagi la erarojn kiam temas pri rapida tradukado aŭ interpretado de unu lingvo al alia dum internaciaj konferencoj. Se la tradukado estas konsekutiva (sinsekva) kaj se la interpretisto ricevas la tekston anticipe, la traduko kutime estas kontentiga. Tio, ekzemple, okazas plej ofte en la procesoj antaŭ la Internacia Kortumo. Male, se la interpretado estas simultana (samtempa), la eraroj pli ol abundas kaj kutime necesas korekti ilin poste en la skribaj dokumentoj. La problemo komplikiĝas, se la delegito ne scias sufiĉe bone la oficialan lingvon, en kiu li devas paroli. La aŭtoro de tiuj ĉi linioj, kiu havis la okazon persone partopreni en la laboroj de puraj internaciaj konferencoj, povis mem konstati aŭskultante rekte paroladon en unu lingvo kaj per la aŭskultilo en alia, ke la interpretistoj ofte troviĝas en granda embaraso pro la simpla kaŭzo, ke ne estas eble kompreni la koncernan oratoron, ĉar li ne scias la lingvon uzatan. Eĉ okazis, ke la interpretisto diris en la fini: “Tio ĉi estis la parolado de s-ro la delegito de ..., se la interpretisto lin bone komprenis”.

La fakto, ke ofte okazas teknikaj difektoj en la aparatoj, tiel ke la laboro devas halti ĝis oni sukcesas trovi la difekton kaj ripari ĝin, kaŭzas aliajn malfacilaĵojn. La groteska bildo de dignaj delegitoj kun la ĝenaj kaj dolorigaj aŭskultiloj sur la kapoj fariĝas preskaŭ tragika, kiam oni vidas iliajn kolerajn vizaĝojn, ĉar en la aŭskultilo premanta la orelojn ne aŭdiĝas la dezirata lingvo, sed iaj bruoj aŭ nenio.

Plia komplikaĵo estas trovi kompetentajn interpretistojn, precipe kiam temas pri fakaj, specialigitaj demandoj. Ju pli teknika estas la enhavo de parolado aŭ skribita teksto, des pli la interpretisto kaj tradukisto devas scii la du lingvojn por povi redoni en la traduko la penson de la aŭtoro precize kaj kompreneble. Ofte necesas apartaj studoj de la fako, se oni volas kontentige plenumi la taskon. Laŭ artikolo, publikigita antaŭ nelonge en nederlanda gazeto⁹, la interpretista sekcio de la eŭropaj organizaĵoj en Bruselo ne povas havigi tiom da interpretistoj por la nederlanda, kiom estus necese, kvankam la salajroj estas altaj (de 1800–2200 guldenoj monate). Tiun mankon verŝajne kaŭzas la tre altaj postuloj. Laŭ sinjorino Renée van Hoof, la ĉefino de la interpretista sekcio, bona interpretisto devas ne nur perfekte scii almenaŭ du lingvojn, sed ankaŭ esti fininta universitatajn studojn. La ideala, laŭ ŝi, estas miksaĵo de juro kaj ekonomio kun finstudoj aŭ en la Pariza Sorbonne, aŭ en la interpretista Altlernejo en Ĝenevo.

La dokumentoj, kiuj devas esti eldonitaj en la oficialaj lingvoj, kaŭzas aliajn malfacilaĵojn, eĉ pure teknikan konfuzon en la distribuo. Por eviti almenaŭ la lastan, oni nun proponas, ke oni uzu diversajn kolorojn por la unuopaj lingvoj. La propono estas, ke por la angla oni uzu ĉiam la ruĝan koloron, por la franca la bluan, por la hispana la flavan, por la rusa la sablokoloran, por la germana la grizan, por la itala

8) CED n-ro 1667.

la verdan, por la nederlanda oranĝan. La ĉina lingvo ne bezonas koloron, ĉar oni rekonas ĝin laŭ la skribo. Laŭ la propono, la blanka estus rezervita por la lingvoj, kiuj ne havas apartan koloron. Ĉiuj dokumentoj en difinita lingvo devus esti eldonitaj en la respektiva koloro kaj tiel ili fariĝus facile rekoneblaj. La samajn kolorojn devus porti kiel signojn la delegitoj kaj la interpretistoj, tiel ke oni tuj sciuj la lingvon, kiun ili parolas.¹⁰

(2) **Socia aspekto:** Ĝi konsistas en tio, ke la nombro de ĉiaspecaj internaciaj kontaktoj, oficialaj kaj neoficialaj, inter registaroj kaj inter privataj organizaĵoj aŭ individuoj, konsiderinde altiĝis. Efektive, en la nuna epoko la internacia rilatado ne estas plu monopolo de pugno da privilegiitoj, sed rajto de la amasoj. Antaŭ la jaro 1860 ekzistis entute unu interŝtata organizaĵo kaj sep neregistaraj. Hodiaŭ la nombro de funkciantaj interŝtataj organizaĵoj estas 154 kaj tiu de neregistaraj 1255, do entute 1409.¹¹ Paralele altiĝis la nombro de kongresoj kaj aliaj pli gravaj renkontiĝoj de internaciaj organizaĵoj. Pli ol 500 el ili okazigas ĉiujare siajn kongresojn; preskaŭ 300 kongresas ĉiun duan jaron; iom pli ol 200 ĉiun trian jaron; aliaj renkontiĝas en kongresoj ĉiun kvaran, kvaran aŭ sesan jarojn. Se oni komprenas la internaciajn rilatojn en la plej vasta senco de la vorto, oni devas aldoni al la nombro de personoj, kiuj partoprenas ĉiujn ĉi kongresojn kaj konferencojn, ankaŭ la milionojn, kiuj profesie aŭ kiel turistoj vojaĝas al aliaj landoj aŭ havas internaciajn kontaktojn. Neniam ĝis nun la amasoj en tia grado havis la eblecon partopreni en internaciaj rilatoj, kaj neniam ĝis nun ekzistis tiom da lingvaj obstakloj, kiuj baras la vojon al rekta, persona interŝanĝo de pensoj.

Sur la kampo de strikte oficialaj rilatoj la limigita nombro de oficialaj lingvoj kaŭzas plian malfacilaĵon. Nur la landoj kies lingvoj estas oficialaj, povas reprezentiĝi per la plej talentaj kaj plej kompetentaj personoj. La aliaj landoj devas por tiu celo elekti ne la plej bonajn, sed tiujn, kiuj scipovas, almenaŭ modeste, la koncernajn oficialajn lingvojn. Tio necese malaltigas la intelektan nivelon.

(3) **Psikologia aspekto: Ne ekzistas persono,** kiu ne sentus sin ĝenata paroli aŭ skribi en lingvo fremda. Ju pli klera li estas, des pli lingve konscia li fariĝas. Nur primitivuloj esprimas sin libere, ĉar ili tute ne konscias pri la eraroj, kiujn ili faras parolante en fremda lingvo. Kleruloj bone konscias, ke esprimante sin en alia lingvo ili daŭre riskas ne nur diri ion, kio ne respondas plene al ilia penso, sed eĉ fari fatalajn erarojn, kiuj, eĉ se la alia flanko rimarkas, ke temas nur pri eraro, povas facile ridindigi la ideon kaj tiel komplete detruji ĝin. Ĝuste pro tiu konscio ili kutime havas fortan senton de malpli valoro, kiu siavice potencigas la timon kaj rezultigas pliajn, plene superfluajn erarojn, kiuj forestus, se la komplekso ne premus la menson. Kiom da fojoj okazas en internaciaj kongresoj, ke tiu aŭ alia delegito volus ion diri, sed pro nesufiĉa scio de la lingvo prefere rezignas kaj silentas! Kiom da fojoj okazas, ke delegitoj, kies hejmaj lingvoj ne estas oficialaj, ŝvitante kaj kun tremanta voĉo rapide tralegas sian antaŭe preparitan tekston kaj post tiu streĉo trankvile sidas kaj ne plu intervenas? Sufiĉas observi la paroladojn dum kiu ajn internacia kongreso por konstati, ke kutime la paroladoj de la reprezentantoj, kies lingvoj estas oficialaj,

10) Associations, 1962, n-ro 2, p. 142.

11) Associations, 1960, n-ro 12, p. 732.

estas multe pli longaj kaj argumentitaj ol tiuj de la delegitoj, kies lingvoj ne estas oficialaj. Ankaŭ en la debatoj kutime multe pli ofte kaj efike intervenas tiuj, kies hejmaj lingvoj estas oficialaj ol la aliaj. Tiu fakto ne nur ankoraŭ pli malaltigas la intelektan nivelon, sed ankaŭ pli facile venkigas la ideojn kaj opiniojn de personoj, kiuj plene regas la oficialajn lingvojn.

(4) **Politika aspekto:** La tuta lukto ĉirkaŭ la lingvoj malkovras la politikan gravecon de la afero. Nacio, kies lingvo estas oficiala, akiras konsiderindajn avantaĝojn kompare al la nacioj, kies lingvoj ne estas oficialaj. Ĉiuj grandaj nacioj insistas pri la uzo de siaj respektivaj lingvoj. Kaj kiel montras la tuta evoluo en tiu ĉi sfero ekde la jaro 1753 ĝis hodiaŭ ĉiam pli granda nombro da lingvoj akiras oficialan rangon. Tiu ĉi procezo ne povas esti haltigita. La suverena egaleco de la ŝtatoj postulas ankaŭ egalecon de lingvoj. Ĝi povas esti atingita aŭ ke oni akceptu por ĉiuj internaciaj rilatoj unu solan neŭtralan lingvon, kiel al Brita Registaro jam meze de la 18-a jarcento sugestis.

En la kazo de la Internacia Kortumo en Hago la uzo de nur du oficialaj lingvoj kontraŭas al la principo de plena egaleco de la partioj, kiu troviĝas en la fundamentoj mem de internacia justico. Evidente, agento, konsilisto aŭ advokato, kiu pledas antaŭ la Kortumo en sia propra nacia lingvo, troviĝas en multe pli bona pozicio ol lia kolego, kiu devas pledi en fremda lingvo, eĉ se tiun lingvon li lernis dum multaj jaroj.

(5) **Ekonomiaj aspektoj:** Kiom kostas al la homaro la multlingveco, neniu fakte scias. La buĝetoj de internaciaj organizaĵoj ne estas tiurilate tute klaraj, kaj eĉ se ili estus, la informoj prezentus nur etan frakcion de ĉiuj kostoj. Laŭ unu dokumento de UNESKO¹², la nombro de paĝoj tradukitaj en 1954 kaj 1955 estis 79.582. Laŭ alia informo, kiun posedas la Centro de Esploro kaj Dokumentado¹³, la meza nombro de paĝoj tradukitaj ĉiujare en Unuiĝintaj Nacioj estas pli ol 270.000. Laŭ la sama informo, la Lingva Sekcio de U.N. inkluzivas 40 tradukistojn-oficistojn por la angla, 82 por la franca, 68 por la hispana, 49 por la rusa, 68 por la ĉina kaj 10 por la araba. Pro la nombro de la arabe parolantaj delegitoj, kelkaj gravaj dokumentoj – ne pli ol 4.000 paĝoj de la angla teksto jare – estas publikigataj ankaŭ en la araba. La nombro de interpretistoj estas 69 kaj kelkaj el ili laboras en pluraj lingvoj. Ili ne povas esti grupigitaj laŭ la sekcioj, kiel estas la tradukistoj.

Necesas atentigi, ke la nombro de tradukistoj aŭ interpretistoj kreskas en progresio laŭ la formulo $x = n \cdot (n-1)$ en kiu “n” estas la nombro de uzataj lingvoj. Tio signifas, ke por du lingvoj estas necesaj 2 interpretistoj, tiel ke ili povu interŝanĝiĝi kaj ĉiu el ili traduki en la lingvon, kiun li pli bone majstras; por 3 lingvoj estas bezonataj 6 interpretistoj, por 4 lingvoj 12 interpretistoj, por 5 lingvoj 20 k.t.p. Tio, kompreneble, faras, ke ankaŭ la kostoj kreskas en la sama progresio.

Ĉe UNESKO la kostoj de interpretado por 2 interpretistoj potage estis 50 dolaroj, por 6 interpretistoj 150 dolaroj k.t.p. Laŭ la sama dokumento el 1956, la kostoj de interna tradukado en 1954 kaj 1955 estis entute por la angla lingvo 196.196 dolaroj, por la franca 344.101 dolaroj, por la hispana 192.443 dolaroj, por la rusa 41.266 kaj por la araba 51.948 dolaroj, entute 825.954 dolaroj. Necesas atentigi, ke la

12) CED, n-ro 1059 A.

13) CED, n-ro 1559.

kostoj por la rusa estis tiam malaltaj, ĉar nur limigita nombro da paĝoj estis tradukita en tiun lingvon. Cetere, la dokumento prave atentigas, ke en la kostoj de multlingveco oni devus enkalkuli ankaŭ aliajn elspezojn, kiuj ne rilatas rekte al la tradukado aŭ interpretado. Ekzemple, la kostoj de la Sekcio de distribuo estus proksimume 25 % malpli altaj, se la sama nombro da ekzempleroj de dokumentoj kaj periodaĵoj estus distribuita, sed nur en unu lingvo. Laŭ la buĝetpropono de UNESKO por la jaro 1963/64, la kostoj de la Servo de Dokumentoj kaj Publikaĵoj devus altiĝi je 15 %, nome de 3,107.422 dolaroj en 1961/62 al 3,568.209 dolaroj. Kun rezervoj oni povas diri, ke tiuj elspezoj ĝenerale respondas al la elspezoj de tradukado, interpretado kaj kunligitaj kostoj. La uzo de la araba lingvo, kiu estas oficiala, sed ne labora, kostos al UNESKO 25.000 dolarojn.

En 1957 la Servo de Lingvoj kaj Kunvenoj de Unuiĝintaj Nacioj elspezis 4,250.300 dolarojn nur por personaj elspezoj. La materiaj kostoj por la publikigo de dokumentoj devas esti aldonitaj al tiuj elspezoj. Tiuj ciferoj ne inkluzivas la Eŭropan Oficejon en Ĝenevo, en kiu 9 interpretistoj, 54 tradukistoj kaj 107 sekretarioj kaj tajpistoj laboras en la lingvaj servoj. Ankaŭ aliaj oficejoj de U.N. posedas sekciojn por interpretado kaj tradukado.

Alia dokumento de U.N. el la jaro 1957 informas pri la kostoj de publikigo de la Jarlibro de la Homaj Rajtoj en la ĉina, rusa kaj hispana. Laŭ tiu dokumento¹⁴ la kostoj de tradukado, revizio kaj tajpado de tiu 500-paĝa libro estus 55.000 dolaroj kaj la kostoj de presigo 21.700 dolaroj, entute 76.700. Pro tiuj grandegaj kostoj oni decidis ne publikigi la Jarlibron en la menciitaj lingvoj.

En 1958 okazis en Londono Konferenco pri la Teknika Tradukado kaj ankaŭ ĝi pritraktis, inter alie, la demandon de la kostoj. En la kontribuo de F. Liebesny pri la ekonomia flanko de tradukado estas detale pritrakitaj la kostoj de teknikaj tradukoj¹⁵. En la konkluda parto li emfazis, ke pluraj miloj da milionoj da vortoj estas tradukataj ĉiujare en la mondo. Lia propra kompanio tradukis en unu jaro proksimume 200.000 vortojn. Se oni multobligas tiun nombron per 50 por la aliaj grandaj komercaj organizaĵoj, oni atingas proksimume 10 milionojn da vortoj nur por la komerco kaj nur en Britio. La kostoj de tiaspeca tradukado treege varias, sed oni povas kalkuli ke ili estas inter 3 kaj 6 pundoj por 1000 vortoj.

Tiuj ĉi kelkaj ciferoj donas nur la plej palan bildon pri la ekonomia ŝarĝo kiun kaŭzas la multlingveco. Se oni prenas en konsideron la nombron de internaciaj organizaĵoj, ĉiujn internaciajn kongresojn kaj konferencojn, la necesan longigon de ilia daŭro precipe en kazoj de konsekutiva tradukado, la kontaktojn en la industrio, komerco kaj turismo, la kostojn de lernado kaj ĉiujn aliajn elspezojn ligitajn rekte aŭ nerekte kun la multlingveco, oni ne troigas, se oni taksos la kostojn je centoj da milionoj da dolaroj ĉiujare.

IV. Solvo

Malgraŭ tiu armeo da tradukistoj kaj interpretistoj, malgraŭ la plibonigoj en la teknika aparataro kaj malgraŭ la grandegaj sumoj elspezataj ĉiujare por tradukado kaj interpretado, la problemo mem neniel estas solvita. Ĉiuj ĉi rimedoj estas sole

14) CED, n-ro 983.

15) ASLIB Proceedings, p. 115.

paliativoj, nur etfrakcie efikaj kaj provizoraj. Restas la fakto, ke eĉ ŝtatestroj en la gvidaj pozicioj ne povas senpere kontakti. Forestas personaj rilatoj en internaciaj kongresoj kaj konferencoj. Elstaraj intelektuloj kaj grandaj sciencistoj venas en embarase ridindajn situaciojn en fremdaj lingvaj medioj. Miskomprenoj abundas sur ĉiuj niveloj. La milionaj amasoj, kiuj vizitas aliajn landojn, restas plejparte mutaj kaj surdaj pro la lingvaj obstakloj. En plej bona kazo, kiel prave atentigis konata franca filozofo, la konversacio finiĝas precize tie, kie ĝi devus komenciĝi.

Ĉu ekzistas solvo por tiu bedaŭrinda situacio?

Akcepto de unu sola nacia lingvo, aŭ eĉ de du, kiel kelkaj proponas, estas neimagebla. La tuta historio de la du lastaj jarcentoj montras pli ol klare, ke la nacioj ne nur ne estas pretaj cedi la akiritajn poziciojn de siaj lingvoj, sed, eĉ pli, ke aliaj nacioj ĉiam pli postulas la saman pozicion por siaj respektivaj lingvoj.

Same tiel neimagebla estas la intensigo de la studo de fremdaj naciaj lingvoj en la lernejoj. La ĝisnunaj spertoj pruvas, ke eĉ la plej bonaj instrumentoj donas nur tre modestajn rezultojn. Milionoj da gejunuloj tra la tuta mondo lernas diversajn fremdajn naciajn lingvojn kaj la rezulto kutime estas, ke, post multjara lernado, ili apenaŭ kapablas esprimi la plej elementajn ideojn, se ilia akirita scio ne estas limigita al la diro en la "lernita" lingvo, ke ili ne parolas ĝin. Kaj, cetere, kiujn lingvojn oni devus lerni en la hodiaŭa mondo? Iam oni povis centriĝi al la lernado de la latina aŭ nur de la franca, sed hodiaŭ oni devus lerni tutan aron da aliaj lingvoj. La superŝarĝitaj lernejoj programoj, kiuj prave dediĉas ĉiam pli grandan atenton al la diversaj branĉoj de la scienco, tutsimple ne povas toleri plian ŝarĝon per intensigo de la instruado de fremdaj lingvoj, eĉ se tiu instruado povus doni ĝenerale kontentigajn rezultojn.

La espero, kiujn oni flegas rilate la elektronajn tradukmaŝinojn, ŝajnas sufiĉe fantaziaj. Sendube, la rezultoj ĝis nun atingitaj montras, ke estas eble utiligi la helpon de tradukmaŝinoj por tradukado de difinitaj tekstoj. Tamen, tiuj tekstoj devas esti taŭge redaktitaj por la maŝina tradukado kaj poste, same tiel, redaktitaj en la lingvo de la traduko. Estas absolute neimageble, ke iam la maŝinoj sukcesos fari tion, kion eĉ lertaj tradukistoj kaj interpretistoj ne povas fari. La maŝinoj povas havi nur tiom da "inteligento", kiom la homa inteligento metis en ilin. Krome, la kostoj de la tradukmaŝinoj estas kaj plue estos tiel grandegaj, ke ili superas la kostojn de centoj da interpretistoj kaj tradukistoj, kiuj sendube faras la tradukan laboron pli bone kaj pli efike ol la maŝinoj. Fine, eĉ se ne estus tiel, la apliko de tradukmaŝinoj signifus plian monopoligon de la internaciaj rilatoj, ĉar nur la plej riĉaj sociaj tavoloj kaj la ĉefaj gvidantoj de la ŝtatoj povus utiligi ilin.

Restas, do, kiel la sola racia solvo enkonduko de neŭtrala internacia lingvo en ĉiujn internaciajn rilatojn, pri kio revis Descartes, Leibnitz, Komensky kaj aliaj pensuloj.

El milo da projektoj, nur la Internacia Lingvo iniciatita de D-ro L. L. Zamenhof en 1887, kaj konata poste laŭ la pseŭdonimo de la aŭtoro ankaŭ sub la nomo "Esperanto", transformiĝis en vivantan lingvon de vivanta internacia kolektivo. En 75 jaroj de sia ekzistado ĝi evoluis ĝis tia grado, ke hodiaŭ ĝi plene taŭgas por ĉiuj internaciaj rilatoj. Ĝia literaturo de kelkmil da verkoj, riĉa ĝenerala vortprovizo, ĉ. 120 fakaj vortaroj kaj terminaroj, praktikaj aplikoj en ĉiuj sferoj de la internacia vivo,

inkluzive kongresojn, konferencojn, seminariojn kaj aliajn internaciajn renkontiĝojn, faras ĝin taŭga instrumento de internacia rilatado el teknike-lingva vidpunkto.

La aŭtoro de tiu ĉi raporto, kiu memparolas 3 el la 4 laboraj lingvoj de UNESKO kaj povas kompreni ankaŭ la hispanan, eksperimentis persone en pluraj okazoj la praktikan aplikeblon de la Internacia Lingvo. Kiam ajn difinita temo de la debato ne interesis lin, li tutsimple por li mem interpretadis la paroladojn faratajn en la angla, franca, rusa aŭ hispana. Tio okazis dum la Pariza Packonferenco en 1946, dum unu Sesio de la Ĝenerala Asembleo de U.N., du fojojn dum la sesioj de la Ĝeneralaj Konferencoj de UNESKO kaj en aliaj okazoj. Montriĝis, ke absolute neniaj malfacilaĵoj estis renkontitaj en la tradukado de tekstoj aŭ interpretado de paroladoj simultane en Esperanto. La diverseco de la temoj – politikaj, juraj, ekonomiaj, sociaj, edukaj – montris, ke tutcerte ne ekzistas ia ajn malhelpo por uzo de la Internacia Lingvo en tiuj sferoj.

Estas konata la fakto, ke kleraj personoj povas en tre mallonga tempo plene ekregi la Internacian Lingvon kaj esprimi sin en ĝi same facile kiel en sia propra gepatra. Tamen, eĉ personoj sen vasta edukiteco povas ellerni Esperanton konsiderinde pli facile ol iun ajn fremdan nacian lingvon, aŭ eĉ sian propran nacian literaturan lingvon. Eksperimentoj montris, ke personoj, kiuj finis nur elementan lernejon, post unujara lernado de Esperanto kutime skribas en ĝi pli korekte ol en sia propra nacia lingvo. Tiu ĉi fakto faras, ke oni sentas tiun lingvon kiel sian kaj ne havas la kutimajn kompleksojn de malplivaloro, aluditajn supre.

Pro sia struktura internacieco kaj pro la fakto, ke ĝi estas posedaĵo de neniu aparta nacio, la Internacia Lingvo prezentiĝas kiel politike neŭtrala solvo de la lingva problemo.

El ekonomia vidpunkto, la enkonduko de la Internacia Lingvo en ĉiujn internaciajn rilatojn signifus ŝparon de milionaj valoroj, kiuj povus esti utiligataj por helpo al ankoraŭ ne sufiĉe evoluintaj landoj kaj ĝenerale por progresigo de la edukado, scienco kaj kulturo en la mondo.

En la jaro 1952 la Ĝenerala Konferenco de UNESKO pritraktis Internacian Peticion favore al Esperanto, kiun subskribis 492 organizaĵoj kun entute 15.454.780 membroj kaj 895.432 individuaj personoj, inter kiuj mondfamaj politikistoj, sciencistoj, verkistoj, artistoj kaj aliaj publikaj agantoj. La Konferenco komisiis la Ĝeneralan Direktoron de tiu Organizaĵo komuniki la Peticion al la Ŝtatoj-Membroj kaj, konforme al iliaj respondoj, prepari Raporton por la oka Sesio de la Ĝenerala Konferenco. Efektive, post detala diskuto de la Raporto de la Ĝenerala Direktoro (8C/PRG/3), la Ĝenerala Konferenco de UNESKO akceptis la 10-an de decembro 1954 Rezolucion, en kiu ĝi notis “la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo”¹⁶. En la sama Rezolucio UNESKO rekonis, ke “tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de UNESKO”, notis ke pluraj Ŝtatoj-Membroj anoncis sian pretecon

16) UNESCO, Resolutions, p. 36, Rez. IV. 1. 4. 422.

“enkonduki aŭ vastigi la instruadon de Esperanto en siaj lernejoj aŭ superaj edukaj institucioj” kaj instrukiis la Ĝeneralan Direktoron “sekvi la kurantan evoluon en la uzado de Esperanto en scienco, edukado kaj kulturo, kaj tiucele kunlabori kun Universala Esperanto-Asocio en aferoj koncernantaj ambaŭ organizaĵoj”.

Tiamaniere, la enkonduko de la Internacia Lingvo solvus la lingvan problemon en ĉiuj ĝiaj aspektoj: teknike-lingva, socia, psikologia, politika kaj ekonomia.

Siatempe la Brita Registaro povis sukcese instrukcii siajn reprezentantojn uzi estontece nur la anglan, ĉar malantaŭ tiu instrukcio troviĝis la tuta potenco de la Brita Regno. Similan postulon povas fari Ĉinio, Soveta Unio, Francio, la hispane parolantaj landoj kaj aliaj ŝtatoj koncerne la proprajn naciajn lingvojn. Malantaŭ la Internacia Lingvo ne staras la forto de kiu ajn aparta ŝtato, sed en ĝi troviĝas la forto de internacieco kaj maksimuma perfekteco el pure lingva vidpunkto, kaj malantaŭ ĝi troviĝas la potenco de la racio, de justeco, de egaleco de ĉiuj lingvoj.

La baldaŭa estonteco montros ĉu la racio venkos super antaŭjuĝoj kaj superstiĉoj kaj ĉu la homaro tiamaniere solvos la lingvan problemon en la internaciaj rilatoj.

KELKAJ ASPEKTOJ DE LA LINGVA PROBLEMO EN INTERNACIA PUBLIKA JURO KAJ KOMPARA JURO

I. Internacia Juro

(1) **Lingvoj uzataj.** – La fondintoj de la moderna scienco de Internacia Juro uzis la latinan, kiu estis, kiel montrite aliloke¹, la lingvo de tiamaj interŝtataj rilatoj. La ĉefaj verkoj de tiu frua epoko **Relectiones de Indis Noviter Inventis** (1532) de la hispano Vitoria; **De Legationibus** (1588), **Commentationes de Jure Belli** (1589) kaj **De Jure Belli Libri Tres** (1598) de la italo Gentili, kiu vivis en Anglio kaj fariĝis profesoro en Oxford; **Mare Clausum** (1618) de la anglo Selden; **Mare Liberum** (1609), **De Jure Praede** (1605) kaj la mondfama **De Jure Belli ac Paccis Libri Tres** (1625) de la nederlandano H. Grotius, la plej granda el ĉiuj, kaj aliaj estis verkitaĵoj en la latina. Superflue emfazi la avantaĝojn, kiujn donis la uzo de unu sola komuna lingvo por scienca branĉo plej esence internacia. Paralele kun la malaperado de la latina en la internaciaj rilatoj, ĝi malaperis ankaŭ el la doktrino. Multnombraj, praktike ĉiuj naciaj literaturaj lingvoj de la mondo, anstataŭigis ĝin en la nuntempo.

(2) **Problemoj.** – Ĉu la multlingveco sur tiu ĉi kampo kaŭzas malfacilaĵojn kaj, se jes kiujn?

(i) **Terminologio:** Pro la universaleco de la Internacia Juro, la baza terminologia materialo estas unuforma. En kelkaj lingvoj la terminoj estas pli aŭ malpli internaciaj; en aliaj ili estas kreitaj surbaze de nacilingvaj vortoj; en nombro da lingvoj paralele ekzistas ambaŭ formoj por granda nombro da nacioj. Tamen, tio ne kaŭzas malfacilaĵojn. Ne multe gravas, ekzemple, ĉu oni nomas tiun juran branĉon Law of Nations, Droit des Gens, Völkerrecht, Mejdunarodnoje pravo, Mejdunarodno pravo ktp., aŭ International Law, Droit International, Diritto Internazionale, Derecho Internacional, Internacionalno pravo ktp., aŭ simile por aliaj nocioj. Grave estas, ke la terminoj por la diversaj nacioj estas ĝenerale firme establitaj en la diversaj lingvoj.

Tio koncernas ankaŭ la terminologion por la nocioj de regiona Internacia Juro, tutcerte en la lingvoj de la regiono, al kiu ĝi aplikiĝas, sed ĝenerale ankaŭ ekster ĝi. Oni eble povus diskuti pri la pli aŭ malpli granda taŭgeco de tiu aŭ alia esprimo

1) Vidu la studon pri „La Lingva Problemo en Internaciaj Rilatoj”.

en iu lingvo, sed tio ne ŝanĝas la fakton, ke en la sfero de Internacia Juro, eĉ se kelkfoje oni renkontas malfacilaĵojn, tamen ĝenerale ne ekzistas veraj terminologiaj problemoj en la strikta senco de la vorto.² Interalie, tio faciligas la tradukojn de internacijuraj traktadoj de unu lingvo al alia.

(ii) **Fontoj:** Alie prezentiĝas la afero rilate la alireblon de la fontoj. La internaciaj konvencioj – la plej grava fonto hodiaŭ – estas farataj en la lingvoj de ĉiuj ŝtatoj de la mondo. Eĉ la plej gravaj konvencioj, unuavice la multflankaj sur kiuj baziĝas la diversaj interŝtataj organizaĵoj, estas kelkfoje skribitaj en lingvoj, el kiuj neniu estas ĝenerale konata al specialistoj kaj interesitoj de aliaj landoj. Sufiĉas atentigi, ke, ekzemple, la Traktato de Romo de 1957 kaj diversaj interkonsentoj, protokoloj, instrukcioj kaj aliaj dokumentoj de la Eŭropa Ekonomia Komunado estas en la germana, franca, itala kaj nederlanda. Okaze de la diskuto pri aliĝo de Britio al la Komuna Merkato, politikistoj kaj la gazetaro plendis, ke pro tio la jura situacio ne estas klara kaj ke en tiaj kondiĉoj la parlamentanoj ne povas formi objektivan opinion. Urĝe estis farita angla traduko de la Traktato – ne tre sukcesa, cetere – sed la aliaj multnombraj dokumentoj restis plue nealireblaj por la grandega plimulto de la interesitoj. Kaj kion diri pri la centoj kaj miloj da aliaj internaciaj konvencioj, daŭre registrataj ĉe U.N. kaj publikigitaj en senfina vico da volumoj? Tiu tuta materialo restas amase perdita en la polvo de bibliotekoj kaj grandparte nealirebla por esploro.

Ankaŭ alia granda fonto – la ĝeneralaj juraj principoj, rekonitaj de la civilizitaj nacioj – estas praktike nekonata al la doktrino. Se la Internacia Kortumo pro sia internacia konsisto ĝis maksimumo posedas scion pri la ĉefaj juraj sistemoj de la mondo, tion certe oni ne povas diri pri la doktrino. En ĉiuj verkoj, en ĉiuj lernolibroj de Internacia Juro oni nun mencias la ĝeneralajn jurajn principojn kiel apartan fonton (kvankam iuj esprimas dubojn pri ilia signifo), sed oni nenion aŭ malmulton diras pri kiuj principoj vere temas, ĉar tutsimple la multnombro de lingvoj obstaklas la esploron. La samon oni povas diri pri la juĝoj de diversaj tribunaloj kaj pri la „instruo de la plej alte kvalifikitaj aŭtoroj de diversaj nacioj” kiel helpaj fontoj de Internacia Juro. Kiamaniere oni povas studi la doktrinojn de aliaj landoj, se oni ne scias la respektivajn lingvojn? Eĉ la soveta doktrino de Internacia Juro – do doktrino de unu el la plej potencaj ŝtatoj – estas preskaŭ komplete nekonata en la Okcidento kaj entute ekster la t.n. soveta bloko, por ne paroli pri la aliaj skoloj, en malpli gravaj landoj. En la Universitato de Zagreb, el centoj da studentoj de Internacia Juro nur kelkaj regis 1–2 fremdajn lingvojn. En du klasoj de Internacia Juro, kiujn mi instruis en 1961/1962 en L. S. E. de la Londona Universitato, el 28 studentoj neniu povis eĉ legi en kiu ajn alia lingvo krom en la angla aŭ, kompreneble, ankaŭ en la nacia de sia lando, se temis pri alilingvanoj.

Al ĉio ĉi aldoniĝas la malfacilaĵoj en internaciaj renkontiĝoj de specialistoj pri Internacia Juro, la samaj, kiujn frontas ĝenerale la internaciaj renkontiĝoj neuzantaj unu solan komunan lingvon.

2) La ĉefajn problemojn, kelkfoje gravajn, oni renkontas tie, kie estas necesa absoluta precizeco, ekzemple en tradukoj de internaciaj konvencioj aŭ okaze de interpretado de tekstoj en du aŭ pli da oficialaj lingvoj. Ekzemple, en la franca teksto de la art. 36 de la Statuto de la Internacia Kortumo oni uzas la vortojn **compétence** kaj **jurisdiction**, dum la angla teksto, pro la fakto ke la angla **competence** ne respondas al la franca **compétence** oni trovas en ĉiuj kazoj nur **jurisdiction** en la angla teksto.

La multlingveco, do, sendube prezentas gravan obstaklon al la establo kaj studo de ĉiuj principoj kaj reguloj de la nuntempa Internacia Juro surbaze de la rekonitaj ĉefaj kaj helpaj fontoj; por la plua evoluo de la scienco de Internacia Juro; por la senperaj kontaktoj de personoj esplorantaj, studentaj, instruantaj kaj kree produktantaj en tiu ĉi jura branĉo.

(3) **Taŭgeco de la Internacia Lingvo.** – Kvankam ankoraŭ ne ekzistas en Esperanto aparta terminaro por Internacia Juro, tamen oni ne renkontas specialajn terminologiajn problemojn. Pluraj verkoj, studoj, artikoloj rilatantaj al Internacia Juro jam aperis en Esperanto. La aŭtoro de tiu ĉi malgranda raporto mem publikigis unu verkon³, kelkajn studojn kaj artikolojn, faris plurajn prelegojn en I.S.U. kaj diversaj internaciaj seminarioj pri demandoj rilatantaj al Internacia Juro, sed neniam renkontis problemon nesolveblan. Multaj terminoj troviĝas en la Plena Vortaro, kaj en la du ekzistantaj juraj terminaroj. La principoj, kiujn mi aplikas estas: (a) uzi la ekzistantajn ĝeneralajn vortojn en faka senco, kiam ajn tio estas ebla, kaj apartajn fakajn terminojn, se ili jam estis kreitaj; (b) se ne ekzistas konvena termino, krei novan laŭ la principo de la Fundamento de Esperanto, ke ĉiu internacia radiko povas esti transformita en Esperantlingvan (pro la universaleco de Internacia Juro tio ne kaŭzis malfacilaĵojn); (c) konservi la latinajn esprimojn kaj maksimumojn, kiuj estas jam firme establitaj.

En la Aldono B) troviĝas, nur kiel malgranda ekzemplo, traduko de la unuaj 12 terminoj laŭ aboca ordo el la Glosaro de Schwarzenberger⁴ kaj de la fama Art. 38 de la Statuto de la Internacia Kortumo.

II. Kompara Juro

(1) **Terminologio.** – Diference de la Internacia Juro, la terminologiaj problemoj sur la kampo de Kompara Juro estas vere grandaj. Tio ŝuldiĝas parte al malesto en iu lingvo de fakaj terminoj por juraj nocioj el alia sistemo, sed ĉefe al malsameco de la signifoj de la fakaj terminoj en diversaj lingvoj. Okazas, ke kelkfoje tutsimple en iu lingvo entute ne troviĝas termino por jura nocio el alia sistemo. Lingvo ĉiam reflektas la bezonojn de pensado kaj komunikado de difinita socia medio. Sekve, se en la jura sistemo A tute ne ekzistas difinita jura koncepto, kiu troviĝas en sistemo B, tiam por tiu koncepto, kompreneble, ekzistas vorto en B, sed ne en A. La sola ebleco en tiaj kazoj estas prunti la vorton el la alia lingvo kaj uzi ĝin kiel fremdan aŭ naciigitan en la propra nacia lingvo, se la strukturo de la koncerna lingvo tion permesas, aŭ kiel internaciigitan en Esperanto. Tiaj vortoj, ekzemple, estas kolĥozo, sovĥozo, artelo k.s. surbaze de la rusaj **kolĥoz**, **sovĥoz**, **artel'**. Estas multe pli bone agi tiel ol diri „mastruma kolektivo”, „soveta mastrumunuo”, „libervola unuiĝo por produktado surbaze de ŝtatigitaj produktorimedoj” k.s. En ĉiu okazo necesas difini la terminojn. Tia termino, foje enkondukita en la lingvon, donas, almenaŭ en Esperanto, multajn eblecojn de derivado; kolĥoza proprieto, kolĥozano, kolĥozanino ktp.

3) Lapenna, Aktualaj Problemoj.

4) Schwarzenberger, Vol. II, p. 677.

Plej ofte, tamen, en la lingvoj de la komparataj sistemoj (aŭ en tria lingvo, se oni verkas en ĝi), troviĝas ĝeneralaj juraj terminoj por la traktataj konceptoj, sed la termino en unu lingvo ne kovras la saman nocion en alia. Ekzemple, eĉ la plej elementaj terminoj kiel **proprieto, posedo, civila juro, krimo, kriminala juro, kortumo, juĝisto, advokato** kaj centoj da aliaj troviĝas en la rusa, kroata, angla kaj franca por resti ĉe la lingvoj en kiuj mi laboras sur la kampo de kompara juro, sed la juraj konceptoj, kiujn ili kovras estas tre malsamaj en la soveta, jugoslavia, franca kaj angla juraj sistemoj. Sekve, nur per precizaj difinoj oni povas eviti konfuzon kaj miskomprenojn.

Necesas ankaŭ atingi – kaj tio estas ebla – ke en difinita lingvo oni uzu ĉiam la saman terminon por la sama nocio el alia jura sistemo, kaj ne, kiel nun okazas, ke, depende de la personaj preferoj de la aŭtoroj, oni uzas en la sama lingvo plej diversajn terminojn por difinita koncepto el alia jura sistemo. Tio precipe okazas en la angla kaj usona variantoj de la angla lingvo rilate la rusajn terminojn. Ekzemple, la rusa **obŝĉenarodnoje gosudarstvo** (tutpopola ŝtato) estas tradukata per **all-people's state** aŭ **state of the whole people** aŭ simile; la rusa **pravosposobnost'** (jura kapablo) per **juridic capacity, juridical capacity, legal capacity**; la rusa **deesposobnost'** (aga kapablo) per **capacity to act, legal capacity** (vidu la konfuzon kun jura kapablo), **capacity to enter into legal transaction** k.s.; la rusa **umysel** (dolo) per **intention, malice, premeditation** kaj alimaniere. Kaj tiel same pri multaj aliaj terminoj el Soveta Juro.

Malpli konfuza, sed tamen grava, estas la problemo de transskribado per latinaj literoj de tekstoj verkitaj en lingvoj, kiuj ne uzas la latinan alfabeton. Ekzemple, por la latinlitera transskribado de rusaj tekstoj oni alpikas en la angla almenaŭ 3 sistemojn: la internacian (plej malmulte), tiun de la Biblioteko de Washington, tiun de **Slavonic and East European Review** en Londono. Krome, pluraj aŭtoroj aplikas sian propran individuan sistemon.

En Hamburgo, okaze de la Sesa Internacia Kongreso de Kompara Juro (de la 30-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto 1962) aparta sekcio traktis la eblecon establi komunan juran lingvaĵon. La rezultoj ankoraŭ ne estas konataj. Tutcerte almenaŭ iio povus esti atingita en du stadioj:

(a) Unuecigi la terminaron en ĉiu unuopa lingvo por la juraj konceptoj de aliaj juraj sistemoj kaj akcepti internacian transliterumadon kiam ajn tio eblas. Tiun laboron devus entrepreni la institutoj de Kompara Juro aŭ similaj aŭtoritataj instancoj de diversaj landoj. La aŭtoroj devus observi la regulojn tiel formulitajn.

(e) Paralele, sed ĉefe post tio estus eble esplori ĝis kia grado oni povas unuecigi internacie la terminologion. La neŭtrala Esperanto povus doni ankaŭ en tiu laboro grandajn servojn kiel ponto-lingvo kaj lingvo por la bazaj difinoj.

(2) **Rolo de Esperanto.** – La spertoj de la aŭtoro en la sfero de soveta kaj orienteŭropa Kompara Juro rilatas al la uzo de Esperanto por rekta verkado en tiu lingvo kaj al ĝia utiligo kiel ponto-lingvo.

(i) **Rekta uzo:** Verkante originale en la Internacia Lingvo la aŭtoro ne renkontis iajn specialajn malfacilaĵojn. Kiam renkontitaj, la malfacilaĵoj estis konsiderinde malpli grandaj ol en la franca, angla aŭ itala. Tio certe ŝuldiĝas ankaŭ

al la fakto, ke li posedas la Internacian Lingvon proksimume egale kiel la hejman (kroatan) kaj multe pli bone ol la menciitajn aliajn lingvojn, sed la ĉefan meriton li trovas en la strukturo mem de Esperanto. La pozitivaj trajtoj de tiu lingvo estas: ĝia fleksebleco, kiu permesas esprimi en ĝi ĉiujn nuancojn de la penso kaj en kazo de citaĵoj, adapti ĝin ĝis maksimumo eĉ al la stilo de la originalo; ĝia aglutina karaktero, kiu prezentas praktike senfinajn eblecojn de derivado; la facileco, per kiu oni povas enkonduki en ĝin novajn necesajn fakaj esprimojn.

(ii) **Ponto-Lingvo:** La cirkonstancoj devigis min vastege utiligi Esperanton kiel ponto-lingvon en mia faka laboro. Kiam en 1951 mi ekloĝis en Londono, bedaŭrinde mi sciis eĉ ne unu vorton de la angla lingvo. Pro troa okupiteco mi ne havis la eblecon dediĉi min al serioza studado de la angla. Kiam venis la tempo, ke mi verku studojn en la sfero de Kompara Juro en la angla, mia scio de tiu lingvo apenaŭ transpasis la limojn de pasiva kono. En tiaj kondiĉoj mi petis amikon, s-ron William Auld el Skotlando, kiu estas instruisto de la angla lingvo kaj literaturo, kaj verkisto, sed ne juristo, helpi min per tradukoj el Esperanto en la anglan. Ni interkonsentis pri la metodo de laboro: mi verkos ĉion en Esperanto kaj li laŭvice tradukos en la anglan. Ni ankaŭ interkonsentis, ke rilate la fakajn terminojn mi ĉiam sugestos en krampoj (...) la anglan vorton aŭ plurajn vortojn por lia elekto, se mi mem scios ilin. Plue, same en krampoj, estis kelkfoje donitaj eksplikoj pri la signifo de la koncerna nocio en la soveta aŭ jugoslavia juraj sistemoj, kio estis la temo de la studoj. Necesas ankaŭ aldoni, ke s-ro Auld havas nenian scion pri la rusa, serba-kroata aŭ kiu ajn alia slava lingvo. Verkante originale en Esperanto mi renkontis, kiel jam menciite supre, tre malmultajn verajn malfacilaĵojn. Eĉ en la kazo de abundaj citaĵoj mi povis konstati, ke tre facile mi trovas adekvatajn esprimojn en Esperanto por la pensoj de aliaj aŭtoroj kaj, eĉ pli, ke mi povas en Esperanto reflekti ĝis maksimumo la originalan tekston. Ĝi estis plej ofte kvazaŭ ia spegulo de la originalo aŭ kvazaŭ iu vitro, tra kiu mia kunlaboranto povis iamaniere vidi kaj senti la originalon tra la traduko. Tekstoj de entute ĉ. 200.000 vortoj estis tiamaniere tradukitaj en la anglan. La rezultoj estis bonegaj. La fideleco al la originala penso, esprimita tamen perfekte en la spirito de la angla lingvo, estis maksimuma. Tio eble ne estas tiel surpriza, ĉar ni interkonsentis, ke li redonos en la angla kiel eble plej multe la ideojn esprimitajn en la originalo, kaj ne sklavece la tradukon de la vortoj kaj frazoj, kiam ajn temis pri miaj propraj tekstoj. Sed kiam temis pri citaĵoj el la rusa aŭ serba-kroata originaloj, mia traduko en Esperanton devis esti ĝis maksimumo fidela al la originalo kaj, same tiel, lia traduko nepre plej preciza, tiel ke la angla teksto kaj la teksto de la originalo estu ĝis maksimumo samaj. En tiuj kazoj la Internacia Lingvo ludis la rolon de ponto-lingvo kaj plenumis ĝin perfekte. Komparante la originalan rusan aŭ serba-kroatan tekstojn kun la anglaj tradukoj, kaj lasante plene flanke la tradukon en la ponto-lingvo, evidentiĝis grandega fideleco. Tiu deviga ampleksa eksperimento montris la taŭgecon de Esperanto kiel ponto-lingvo.

En la aldono sub C) troviĝas kelkaj specimenoj de tradukoj el Esperanta originalo en la anglan, kiel ankaŭ el la rusa aŭ franca originaloj tra Esperanto kiel ponto-lingvo en la anglan. Plia ekzemplo montras la tradukon el la angla en Esperanton, kiun mi mem faris, kaj la tradukon de s-ro Auld el Esperanto denove

en la anglan sen vido de la originala angla teksto. Komparante la originalan anglan tekston kun la angla retraduko el Esperanto oni povas facile vidi la gradon de fideleco.

Resume, oni povas diri ke la Internacia Lingvo estas ne nur matura por originala verkado en la sferoj de Internacia Juro kaj Kompara Juro, sed ke ĝi povas ankaŭ, se necese, efike plenumi la funkcion de ponto-lingvo.

Aldono A

BIBLIOGRAFIO

- Basdevant, J. (kaj aliaj), **Dictionnaire de la Terminologie du Droit International** (Vortaro de la Terminologio de Internacia Juro), Paris, 1960.
- Frangulis, M. A., **Dictionnaire Diplomatique** (Diplomatia Vortaro), Paris, 1936, Vol. I.
- Gromyko, A. A., **Diplomatiĉeskij Slovar'** (Diplomatia Vortaro), Moskva, 1960, Vol. I-II.
- Ioffe, O. S. (kaj aliaj), **Sorok Let Sovetskogo Prava** (Kvardek Jaroj de Soveta Juro), Leningrad, 1957, Vol. I.
- Koŝjenikov, F. I., **Sovetskoe Gosudarstvo i Meĵdunarodnoe Pravo** (Soveta ŝtato kaj Internacia Juro), Moskva, 1948.
- Lapenna, Ivo, **Retoriko**, Dua Eldono, Rotterdam, 1958, Unua Parto: Lingvo; **Aktualaj Problemoj de la Nuntempa Internacia Vivo**, Rotterdam, 1952; **Conceptions Soviétique de Droit International Public** (Sovetaj Konceptoj de Internacia Publika Juro), Paris, 1954; **La Internacia Lingvo - Faktoj pri Esperanto**, London, 1954.
- Lisovskij, V. I., **Meĵdunarodnoe Pravo** (Internacia Juro), Moskva, 1955. Meillet, A., Cohen, M. (redaktoroj), **Les Langues du Monde** (La Lingvoj de la Mondo), Paris, 1952.
- Oppenheim, L., **International Law** (Internacia Juro), Oka Eldono, red. de H. Lauterpacht, London-New York-Toronto, 1958, Vol. I.
- Satow, Sir Ernest, **A Guide to Diplomatic Practice** (Gvidilo al Diplomatia Praktiko), Unua Eldono, 1917; Tria Eldono, reviziita de H. Ritchie, London-New York-Toronto, 1932.
- Schwarzenberger, Georg, **Manual of International Law** (Manlibro de Internacia Juro), Kvara Eldono, London-New York, 1960, Vol. II.
- Strupp, Karl, **Wörterbuch des Völkerrechts und der Diplomatie** (Vortaro de Internacia Juro kaj Diplomatio), Berlin-Leipzig, 1925.
- Waringhien, Gaston, **Lingvo kaj Vivo**, La Laguna, 1959.

Annuaire des Organisations Internationales (Jarlibro de Internaciaj Organizacioj) 1960/1961, eldonita de la Unuo de Internaciaj Asocioj (UIA), Bruxelles.

ASLIB Proceedings (ASLING Presprotokoloj), London, Vol. 10, majo, 1958, N-ro 5.

Associations Internationales – International Associations (Internaciaj Asocioj), Monata revuo de internaciaj organizaĵoj kaj kunvenoj, Bruxelles, 1957–1962.

CED: Dokumentoj en la arĥivo de la Centro de Esploro kaj Dokumentado:

N-ro 982A Ass. Gèn. N. U., Res. 262 (III) pri la laboraj lingvoj en U.N.

N-ro 983 UN: E/CN.4/737/Add. 1 de la 27/II/1957 pri la Jarlibro de la Homaj Rajtoj.

N-ro 1059A Unesco: 44 EX/9 de la 22/VI/1956 pri la kostoj de la Lingva Servo.

N-ro 1059 Unesco: DPL. MEMO 56/153 de la 5/I/1956 pri la laboraj lingvoj kaj la kostoj de interpretado.

N-ro 1104 La lingvo problemo antaŭ la Kongreso de PEN-klubo

N-ro 1119 ASLIB: Konferenco pri scienca kaj teknika tradukado, 1958.

N-ro 1447 FAO: C 59/3 pri la laborprogramo kaj buĝeto 1960/61.

N-ro 1448 „Stadt Anzeiger”, Köln, art. pri 150 interpretistoj kaj funkciuloj en konf. de Unesko.

N-ro 1559 Eltiraĵo el studo de D-ro James Lieberman, Boston, Usono, pri interpretado en UN.

N-ro 1667 „Het Vrije Volk”, Rotterdam, 19/V/1962, pri ned. interpretistoj kaj salajroj.

Cour Internationale de Justice (Internacia Kortumo), **Serie D, Acts et**

Documents relatifs à l'Organisation de la Cour (Serio D, Aktoj kaj

Dokumentoj rilate la organizaĵon de la Kortumo), N-ro 1, Dua Eldono, 1947.

Esperanto – Internacia Revuo, monata oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio.

Jarlibro de Universala Esperanto-Asocio, 1962.

UNESCO: Conference Manual (Konferenca Manlibro), reviziita eldono publikigita post la 11-a Sesio de la Ĝenerala Konferenco, Paris, 1960.

Proposed Programme and Budget for 1963/1964 (Propono de Programo kaj Buĝeto por 1963/1964);

Records of the General Conference (Protokoloj de la Ĝenerala Konferenco), Oka Sesio, Montevideo, 1954, Rezolucioj.

Aldono B

Ekzemplo de fakaj terminoj laŭ Schwarzenberger II, p. 677.

Absolute Responsibility: as distinguished from the doctrine of culpability (q. v.), doctrine according to which State responsibility may arise even in the absence of guilt (intent or negligence) imputable to a subject of international law.

Absoluta Respondeco: distinge disde la doktrino de kulpeco (q. v.), doktrino laŭ kiu la ŝtato-respondeco povas ekesti eĉ se forestas kulpo (intenco aŭ neglekto) imputebla al subjekto de internacia juro.

Absolute Right: (1) Right which may be exercised against everyone. (2) Right which may be exercised irrespective of equitable considerations to the contrary. See also under Abuse of Rights, **Jus aequum**, **Jus in re**, **Jus strictum** and Relative Rights.

Absoluta Rajto: Rajto, kiu povas esti efektiva kontraŭ ĉiu ajn. (2) Rajto, kiu povas esti efektiva senkonsidere al kontraŭaj postuloj de justeco. Vidu ankaŭ sub Misuzo de Rajtoj, **Jus aequum**, **Jus in re**, **Jus strictum** kaj Relativaj Rajtoj.

Abuse of Rights: doctrine according to which an unmotivated or unreasonable exercise of right amounts to an illegal act (q. v.) ...

Misuzo de Rajtoj: doktrino laŭ kiu nemotivita aŭ maljusta efektiva de iu rajto egaligas al kontraŭleĝa ago (q. v.) ...

Accessio cedit principali: an accessory thing when annexed to a principal thing becomes part of the principal thing.

Accessio cedit principali: akcesora aĵo, se aneksita la ĉefa aĵo, fariĝas parto de la ĉefa aĵo.

Accession: (1) Acquisition of title to additional territory through natural causes. (2) Equivalent to adherence (q. v.).

Akceso: (1) Akiro de titolo al aldona teritorio rezulte de naturaj kaŭzoj. (2) Ekvivalento de aliĝo.

Acquisitive Prescription: title to territory based on uninterupte and uncontested occupation (q. v.) over a reasonably long period. See also under Historical Bays and Waters.

Akira Preskripto (:Uzukapo) Titolo al teritorio bazita sur seninterrompa kaj nekontestita okupado (q. v.) dum prudente longa periodo. Vidu ankaŭ sub Historiaj Golfoj kaj Akvoj.

Actio personalis moritur cum persona: a personal right of action dies with the person.

Actio personalis moritur cum persona: persona akuzrajto mortas kun la persono.

Ad hoc: for a particular purpose.

Ad hoc: por aparta celo.

Adherence: acceptance of a treaty by a third State with the consent of the original parties.

Aliĝo: akcepto de traktato fare de tria ŝtato kun la konsento de la originalaj partioj.

Administrative International Institutions: international institutions with executive jurisdiction.

Administraj Internaciaj Institucioj: internaciaj institucioj kun ekzekutivaj jurisdikcioj.

Adoption: doctrine according to which international law is incorporated into municipal law by custom or statute but does not become automatically part of municipal law. See also under Dualism and Monism.

Adopto: doktrino laŭ kiu internacia juro estas enkorpigata en la internan juron per kutimo aŭ leĝo, sed ne fariĝas aŭtomate parto de interna juro. Vidu ankaŭ sub Dualismo kaj Monismo.

Advisory Opinion: answer to a question put to the International Court of Justice by organs of the United Nations or Specialised Agencies (q. v.) authorised to make such a request.

Konsulta Opinio: respondo al demando farita al Internacia Kortumo fare de la organoj de Unuiĝintaj Nacioj aŭ Specialigitaj Organizaĵoj (q. v.) rajtigataj starigiti demandon.

ART. 38 de la STATUTO de la INTERNACIA

KORTUMO Angla originalo – Esp. traduko

1. The Court, whose function is to decide in accordance with international law such disputes as are submitted to it, shall apply:

1. La Kortumo, kies funkcio estas decidi konforme al internacia juro tiujn malkonsentojn kiuj estas submetitaj al ĝi, aplikos:

(a) international conventions, whether general or particular establishing rules expressly recognized by the contesting States;

(a) internaciajn konvenciojn, ĉu ĝeneralajn ĉu specialajn, establitajn regulojn eksplicite rekonitajn de la ŝtatoj en konflikto;

(b) international custom as evidence of a general practice accepted as law;

(b) internacian kutimon kiel pruvon de ĝenerala praktiko akceptita kiel juro;

(c) the general principles of law recognized by civilized nations;

(c) la ĝeneralajn jurajn principojn rekonitajn de civilizitaj nacioj;

(d) subject to the provisions of Art. 59, judicial decisions and the teaching of the most highly qualified publicists of the various nations, as subsidiary means for the determination of rules of law.

(d) sub rezervo de la kondiĉoj de la Art. 59, juĝdecidojn kaj instruon de la plej alte kvalifikitaj publicistoj de diversaj nacioj, kiel helpajn rimedojn por la determino de juraj reguloj.

2. This provision shall not prejudice the power of the Court to decide a case **ex aequo et bono**, if the parties agree thereto.

2. Tiu ĉi preskribo ne prejudicos la povon de la Kortumo decidi **ex aequo et bono**, se la partioj konsentas.

Aldono C

Ekzemplo 1. Esperanto-Angla

Esperanta originalo:

Por devige alkitimigi la popolon, precipe la kamparanan loĝantaron, al civila geedziĝo, la Familia Kodo 1918 (simile al Dekreto 1917) intence ne egaligis jure la faktan kunloĝadon kun la registrita geedziĝo. Fari tion estus implicinta la

rekonon, ke la eklezia geedziĝo estas egalvalida kiel la registrita. Kaj precize tion ĝi volis eviti. N. V. Rabinoviĉ diris tiurilate:

Angla Traduko:

In order forcibly to accustom the people, particularly the peasant population, to civil marriage, the Family Code 1918 (like the 1917 Decree) intentionally did not legally equate cohabitation **de facto** with registered marriage. To have done so would have been implicitly to recognize church marriage as being equally valid with registered marriage. And that was precisely what it was intended to avoid. N. V. Rabinoviĉ says on this head:

EKZEMPLO 2: Rusa-Esperanto-Angla

Rusa originalo:

Kodeks 1918 g. tak ĵe kak dekret 1917 g. soverŝenno ne kasalsja faktiĉeskih braĉnyh otnoŝenij. Pridavat' kakoe-lbo pravovoe znaĉenie otnoŝenijam, sloĵivŝimsja bez registracij braka v tot period bylo ne vozmojno. Eto moglo by privodit' k tomu, ĉto naselenie, vozderĵivajas' ot registracii braka, prodolĵalo by po tradicii venĉat' sja v cerkvi. (Ioffe, p. 282)

Esperanta traduko:

La Kodo de 1918, same kiel la Dekreto de 1917, tute ne koncernis la geedziĝajn rilatojn **de facto** (fakta kunvivado inter viro kaj virino kiel geedzoj). En tiu tempo estis maleble doni kiun ajn juran signifon al rilatoj establitaj sen la registriĝo de la geedziĝo. Tio estus povinta kaŭzi, ke la loĝantaro, abstinante registri la geedziĝon, daŭrigus geedziĝi en la eklezio konforme al la tradicio.

Angla traduko el Esperanto:

The Code of 1918, like the Decree of 1917, was not concerned at all with **de facto** marital relations. At that time it was impossible to give any legal significance whatever to relationships established without registration of marriage, which might have enabled people to continue marrying in church in accordance with tradition, whilst refraining from registering the marriage.

EKZEMPLO 3. Franca-Esperanto-

Angla Franca originalo:

Le caractère propre de notre langue lui assurera toujours la faveur des diplomates, mais nous ne serions pas seuls à regretter qu'elle n'eût plus cette universalité que Louis XIV et Voltaire avaient sû lui donner. Une langue unique au service de la politique internationale était un lieu intellectuel entre les nations. Elles ont trop de tendance à s'isoler, et c'est préparer entre elles de futurs malentendus que de les obliger à recourir à des interprètes pour déterminer le sens de leurs conversations. (Frangulis, I, p. 1209).

Esperanta traduko:

La aparta karaktero de nia lingvo certigos al ĝi ĉiam la favoron de la diploamtoj, kaj ni ne estos la solaj, kiuj bedaŭros, ke ĝi ne plu havas tiun universalecon, kiun sciis doni al ĝi Louis XIV kaj Voltaire. Unu sola lingvo en la servo de internacia politiko estis intelekta ligilo inter la nacioj. Ili havas tro tendencon izoliĝi, kaj devigi ilin helpi sin per interpretistoj por difini la sencon de siaj konversacioj, signifas prepari estontajn miskomprenojn inter ili. (Tradukis I.L.)

Angla traduko el Esperanto:

The special character of our language will always ensure for it the favour of the diplomats, and we will not be the only ones to regret that it no longer enjoys the universality which Louis XIV and Voltaire were able to give it. A single language in the service of international politics was an intellectual link between the nations. These have to great a tendency towards isolation, and to force them to make use of interpreters in order to define the sense of their conversations is to show the seeds of future misunderstandings among them. (Tradukis W. Auld)

EKZEMPLO 4: ANGLA-ESPERANTO-

ANGLA Angla originalo:

It is obvious that while a man speaking or writing in his own language is able to say whatever he wishes, on the other hand, when employing a foreign tongue, he can only say what he is enabled to express by the knowledge which he happens to possess of that particular language. (Satow, 1917, p. 67)

Esperanta traduko:

Estas evidente, ke dum homo parolanta aŭ skribanta en sia propra lingvo estas kapabla diri kion ajn li deziras, je la alia flanko, (kiam) uzante fremdan lingvon, li povas nur diri kion li estas kapabligita esprimi per la kono, kiun li hazarde posedas de tiu aparta lingvo. (Tradukis I.L.)

Retraduko en la anglan el Esperanto:

It is obvious that, while a man speaking or writing in his own tongue is able to say whatever he wants to, on the other hand, when using a foreign language he can only say what he is enabled to express by the knowledge he happens to have of that particular language. (Tradukis W. Auld).

Atentigo:

La originale skribita mallonga teksto de la Ekz. 1. kaj nur la Esperantaj tradukoj de la tekstoj en la Ekz. 2-4, sen ia ajn indiko pri la aŭtoroj, estis senditaj al S-ro W. Auld perpoŝte al Skotlando. En la ekzemploj 2-4 mi nur informis lin el kiu lingvo estis farita la traduko kaj, en la ekz. 4, ankaŭ ke temas pri verko publikigita en 1917.

LA HOMAJ RAJTOJ KAJ LINGVA DISKRIMINACIO

La principo pri egaleco de ĉiuj homoj fariĝis ĝenerale rekonita nur en la nuntempo. La antikvaj civiliacioj estis bazitaj sur sklaveco. Ĝi estis la fundamento, sur kiu kuŝis la tuta ekonomia, socia kaj politika strukturo.

Laŭ la Mosea Leĝo distingo estis farata inter sklavoj de hebrea origino, kiuj perdis sian liberecon pro ŝuldoj, kaj tiuj de aliaj gentoj. Temis pri diskriminacio rilate apartenantojn al aliaj rasoj aŭ gentoj eĉ en stato de sklaveco. Aristotelo defendis la sklavecon kaj opiniis, ke iuj homoj estas „sklavoj laŭ la naturo”. En antikva Romio la sklavoj estis konsiderataj kiel objektoj en plena proprieto de la mastro, sed en la imperia epoko ilia pozicio pliboniĝis.

Kristaneco ne multon ŝanĝis tiurilate. Nur la laŭgrada transiro al nova ekonomia sistemo, la feŭdismo, iom post iom forpuŝis la sklavecon el Eŭropo, sed kreis novan klason de neliberaj homoj: la servutuloj. Tiuj ĉi malaperis en iuj landoj pli frue, en aliaj poste, ĉefe kiel rezulto de la transformiĝo de la maniero de produktado en la kapitalismo.

Aliflanke, la malkovro de Ameriko kaŭzis novan formon de moderna sklaveco. Negroj estis ĉasataj kaj kaptataj en Afriko, transportataj al Ameriko kaj tie vendataj. La sklavkomerco fariĝis profitdona entrepreno, kiu havigis al la partoprenantoj en tiu hontinda laboro grandegajn riĉaĵojn. El multaj makuloj en la moderna historio ĝi eble estas la plej kulpplena.

La sklavkomerco, kiu ne estis limigita nur al Afriko-Ameriko, sed vaste praktikata ankaŭ en aliaj regionoj, baldaŭ elvokis reagojn. Ekzemple, en Britio, per la fama decido de Lordo Mansfield de la jaro 1772, estis establita la regulo, ke ĉiu sklavo alportita en Anglio fariĝas aŭtomate libera homo. En 1807 la komercado per sklavoj estis malpermesita per Akto de la Parlamento. Tamen nur en 1833 per la Akto pri Emancipiĝo la sklaveco kiel tia estis abolita en la tuta Brita Imperio ek de la 1-a de aŭgusto 1834.

Francujo entreprenis similan paŝon en 1843, Nederlando en 1863. La liberiĝo de la hispanaj kolonioj en Suda Ameriko kaj la kreiĝo tie de sendependaj ŝtatoj kaŭzis la abolon de sklaveco. Tamen, Brazilo nuligis ĝin nur en 1888. En Nepalo la sklaveco estis forigita en 1926, sed en pluraj aliaj landoj ĝi plue ekzistis. Eĉ hodiaŭ en kelkaj regionoj oni praktikas sklav-komercon.

Sur la internacia kampo la unua menciinda akto estas la Deklaracio de la Viena Kongreso en la jaro 1815, per kiu estis kondamnita la komercado per sklavo. En 1885 13 eŭropaj ŝtatoj kaj Usono devigis sin helpi al la forigo de sklaveco kaj tute speciale de la sklavkomerco. Malgraŭ tiuj aktoj kaj aliaj internaciaj interkonsentoj, la komercado per sklavoj ne estis detruiita. Tial, post la Unua Mondmilito, en la sino de la Ligo de Nacioj estis faritaj novaj klopodoj por forigi komplete tiun malhonorindan staton. Sufiĉas menci la Konvencion de 1919, subskribitan en St. Germain, per kiu la aliancoj kaj Germanio devigis sin „komplete aboli sklavecon en ĉiuj ĝiaj formoj kaj la sklavkomercon surtere kaj surmare”. Sub la premo de tiuj diversaj interŝtataj aktoj kaj eble ankoraŭ pli sub la premo de la monda publika opinio, la sklaveco ĉiam pli kaj pli malaperadis kaj hodiaŭ troviĝas nur tie kaj tie ĝiaj postrestaĵoj.

Bedaŭrinde, forigi sklavecon ankoraŭ ne signifas establi egalecon. Novaj aspektoj de maljusta kaj malegala traktado de la homoj manifestiĝis en pli aŭ malpli kruelaj formoj. Komenciĝis la epoko, kiun markas la lukto por pozitiva rekono de la fundamentaj homaj rajtoj kaj liberecoj.

Post la Dua Mondmilito tuta aro da gravaj internaciaj dokumentoj reflektas la progreson faritan en tiu ĉi sfero. La ĉefaj el ili estas la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj de junio 1945; la Kontrakto pri la Persekutado kaj Punado de la Ĉefaj Militkrimuloj de la Eŭropaj Aksaj Potencoj de 8 aŭgusto 1948, al kiu estis aldonita la Statuto de la Internacia Milittribunalo; la Konvencio pri Genocido de 9 decembro 1948, per kiu ĉiu ago, farita kun la celo plene aŭ parte detrui nacian, rasan aŭ religian grupon estas konsiderata kiel krimo; la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj de 10 decembro 1948; la Eŭropa Konvencio pri la Homaj Rajtoj de 4 novembro 1950; fine la Deklaracio de la Unuiĝintaj Nacioj pri la Forigo de ĉiuj Formoj de Rasa Diskriminacio de 20 novembro 1963.

La Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj estas bazita sur du fundamentaj principoj: la principo de suverena egaleco de ĉiuj ŝtatoj, grandaj kaj malgrandaj, kaj la principo de egaleco de ĉiuj homoj. La Ĉarto akcentas la egalecon de ĉiuj homoj el vidpunkto de kvar ĉefaj apartenoj: rasa, sekso, lingva aŭ religia.

La sama principo estas entenata en la Universala Deklaracio. La artikolo 2 diras tiurilate, ke ĉiuj rajtoj kaj liberecoj difinitaj en la Deklaracio validas same por ĉiuj homoj, sen kia ajn diferencigo el vidpunktoj rasa, haŭtkolora, sekso, lingva, religia, politika, nacia, socidevena, propieta.

La Deklaracio pri la Forigo de ĉiuj Formoj de Rasa Diskriminacio ne parolas pri lingva diskriminacio, ĉar ĝi rilatas al rasa, nacia kaj etna formoj de diskriminacio. Tamen, implicite, ĝi koncernas ankaŭ la lingvan diskriminacion, ĉar unu el la elementoj de nacieco, eĉ unu el la plej gravaj, sendube estas la lingvo¹.

El formale jura vidpunkto tiu ĉi Deklaracio, same kiel la Universala Deklaracio pri la Homaj rajtoj, havas karakteron de rekomendo kaj kiel tia ĝi ne estas jure deviga. Siatempe la subskribinto klopodis pruvi en la verko **Aktualaj**

1) La Deklaracio pri la Rasa Diskriminacio havas nur 11 artikolojn kompare kun 30 artikoloj de la Universala Deklaracio. El tiuj, la plej gravaj aperis en Esperanto-traduko en **Revuo Esperanto**, novembro 1964. (La redakcio aparte rekomendas artikolon „Rasa Diskriminacio kaj Biologo” de la eminenta japana biologo, d-ro Seiho Nishi, en tiu sama numero de **Revuo Esperanto** - red.)

Problemoj de la Nuntempa Internacia Vivo kaj ankaŭ en studo speciale verkita por Unesko, ke la Universala Deklaracio, kvankam formale-jure nedeviga, tamen laŭ sia enhavo estas deviga.

Hodiaŭ kaj en la praktiko de diverslandaj kortumoj kaj en la teorio de internacia juro ĉiam pli kaj pli firmiĝas la tezo, ke la Universala Deklaracio laŭ sia enhavo estas deviga. Esence samaj argumentoj pledas favore al la deviga karaktero de la enhavo de la Deklaracio pri Rasa Diskriminacio².

Rasismaj konceptoj povas esprimiĝi tute aparte en formo de politika doktrino aŭ kiel konsista parto de iu ideologio (nazismo, apartisma politiko en Suda Afriko, rasismo en la Sudo de Usono k.s.), aŭ ili estas latentaj kaj preskaŭ nerimarkeblaj. Tiu dua formo manifestiĝas diversmaniere, ekzemple per nedeziro havi kiel najbaron alikoloran homon, per malpermeso aŭ praktika malebligo allasi en hotelojn, restoraciojn, kafejojn, klubojn kaj aliajn publikajn lokojn personojn de iuj rasoj aŭ nacioj k.s. Atribuado, eĉ en ordinara konversacio, de difinitaj malbelaj aŭ malbonaj ecoj al tutaj etnaj, naciaj, rasaj aŭ religiaj grupoj („Li estas Judo”; „Li estas Negro” k.s.) estas formo de konscia aŭ kelkfoje eĉ nur senkonscia rasismo. Tiuj pli mildaj formoj, kvankam ne tiel danĝeraj kiel la unuaj, tamen estas kondamnindaj plej energie. Cetere, ofte ili estas la fekunda grundo sur kiu kreskas rasismaj ideologioj, politikoj kaj leĝoj.

Rilate al lingva diskriminacio, oni povas sin demandi ĉu efektive ĝi ekzistas kaj, se jes, en kio ĝi konsistas. La fakto mem, ke la Ĉarto de UN kaj la Universala Deklaracio mencias la egalecon de la homoj ankaŭ senkonsidere al la lingva aparteno, evidente inkluzivas la penson, ke lingva diskriminacio povas okazi.

La lingva diskriminacio esprimiĝas ĉefe en du formoj: objektiva kaj subjektiva.

Pro la multlingveco, kiu estas objektiva fakto, kelkaj lingvoj necese ĝuas privilegian pozicion, kiu donas al la koncernaj nacioj kaj al ĉiu unuopa apartenanto al tiuj nacioj apartajn avantaĝojn. En diversaj interŝtataj kaj internaciaj privataj organizaĵoj estis kaj plue estas maleble akcepti ĉiujn lingvojn de la membroj kiel oficialajn. Tial, post multaj luktoj, oni akceptis du, tri aŭ multe pli da lingvoj por la oficiala komunikado interne de tiuj organizaĵoj. Ekzemple en UN la angla, franca, hispana, rusa kaj ĉina estas oficialaj. La Internacia Kortumo en Hago havas nur du oficialajn lingvojn: la anglan kaj la francan. En Unesko la angla kaj la franca estas rekonitaj kiel egale aŭtoritataj por interpretado de la Statuto, sed ok lingvoj estas oficialaj en la Ĝenerala Konferenco, dum la angla, franca, rusa kaj hispana estas akceptitaj kiel laboraj lingvoj por tiu ĉefa organo.

Tiu stato objekte signifas diskriminacion rilate al ĉiuj lingvoj, kiuj ne havas tian privilegian pozicion.

2) Pri la jura signifo de la Universala Deklaracio vidu **Aktualaj Problemoj de la Nuntempa Internacia Vivo**, Rotterdam, 1952, p. 89–92.

Krome, ĝi signifas gravan diskriminacion rilate la personojn, kiuj ne apartenas al la komunaj kies lingvoj estas rekonitaj kiel oficialaj. Evidente, ekzemple, en la Internacia Kortumo povas pledi nur persono kiu scias – kaj tre bone scias – aŭ la francan aŭ la anglan. Principe, antaŭ la Kortumo oni povas pledi en alia lingvo, sed en tiu okazo la pledanto devas mem prizorgi la tradukon en unu el la oficialaj. En tia situacio juristoj, kies familia lingvo estas la angla aŭ franca, tute certe povas pli sukcese reprezenti siajn respektivajn partiojn, ol iliaj kolegoj, kiuj, eĉ se ili kontentige regas unu aŭ ambaŭ oficialajn lingvojn, tamen preskaŭ neniam majstras ilin. Plue, ankaŭ la juĝistoj de la Internacia Kortumo estas, pro la samaj kaŭzoj, en malegala pozicio. Simile prezentiĝas la afero en aliaj internaciaj organizaĵoj, en kongresoj kaj konferencoj, praktike en ĉiuj internaciaj rilatoj.

Ĉiam pli kaj pli okazas diversaj internaciaj kursoj, seminarioj aŭ similaj renkontiĝoj, kiuj estas subvenciataj de internaciaj instancoj. Denove oni postulas la scion de unu el la oficialaj lingvoj, kies nombro estas kutime tre limigita. Ekzemple – por mencii nur unu kazon el centoj – en julio 1965 okazos en Svislando „Somera Lernejo”, kiu pritraktos la ĝeneralan temon „Dudek Jaroj de UN”. La celo estas altiri precipe gestudentojn, interalie stipendiulojn de Unesko. La laborlingvoj estos la angla kaj franca, kaj „flua scio” de unu el ili estas „esenca antaŭkondiĉo por aliĝo al la Lernejo”.

Ĉu ĉio ĉi ne montras klare objektivan lingvan diskriminacion? Oni povus argumenti, ke rason aŭ sekson ne eblas ŝanĝi, sed ke la du lingvojn (aŭ tri aŭ pli, aŭ unu el ili depende de la kazoj) ĉiu povus ellerni. Sed kun la sama logiko oni, do, rajtus ankaŭ argumenti, ke religion eblas ŝanĝi. Plue, eĉ se tiu argumento validus, restas la fakto, ke en ĉiu okazo necesas perdi multe da tempo, dediĉi konsiderindan energion kaj elspezi sufiĉe da mono por ellerni kiun ajn fremdan lingvon, kio objektivite signifas privilegion por unuj kaj malavantagon por aliaj.

Lingva diskriminacio manifestiĝas ankaŭ en subjektivaj formoj. Kiom da fojoj mi aŭdis paroli aŭ legis pri „kulturaj” kaj „primitivaj” lingvoj! Eĉ la kulturaj valoroj kreitaj en lingvoj de nombre malgrandaj popoloj, estas kutime subtaksataj nur tial, ĉar ili estis esprimitaj en tiaj „sensignifaj”, „primitivaj” lingvoj.

Nu, ĉion ĉi oni devus akcepti, se efektive ne ekzistus solvo, kiu forigas ankaŭ tiun formon de diskriminacio. La Internacia Lingvo, pro sia neŭtraleco kaj egala alireblo por ĉiuj homoj, prezentas la solan eblan solvon por la problemo de lingva diskriminacio.

En la Jaro de Internacia Kunlaboro, kiu celas progresigi internacian kompreniĝon, forigi tensiojn kaj fortikigi la mondan pacon necesas vaste kaj forte emfazi, ke sen la solvo de la lingva problemo en internaciaj rilatoj ne estas imagebla amasa internacia kompreniĝo, nek forigo de tiu doloriga, sed bedaŭrinde ankoraŭ ne tre rimarkata formo de diskriminacio: la lingva.

LA PRINCIPO DE EGALRAJTECO DE SEKSOJ EN LA FAMILIA JURO DE SOVETUNIO KAJ JUGOSLAVIO

(Resumo)

Antaŭ la Oktobra Revolucio **en Ruslando** estis rekonita nur la eklezia geedziĝo. La dekretoj de la 18-a kaj 19-a de decembro 1917 enkondukis civilan geedziĝon. Post la kodo de 1918, kiu rekonis nur la registritan geedziĝon, la kodo de la 19-a de novembro 1926 egaligis la faktan kunvivadon, aŭ faktan geedziĝon, kun la registrita, sed en 1944 denove estis enkondukita la principo, ke nur registrita geedziĝo estas jure valida. La kodo de 1926, kune kun la postaj amendoj, precipe tiuj de julio 1944 kaj decembro 1965, estas ankaŭ nun valida sur la teritorio de la Rusa SFSR. Esence la samaj juraj principoj regas la familiajn kodojn de la aliaj sovetaj respublikoj. **En Jugoslavio** antaŭ la milito ekzistis 6 juraj teritorioj rilate geedziĝon. En kelkaj regionoj estis rekonita la civila geedziĝo, sed en la pli granda parto de la teritorio validis la kanona juro de la katolika eklezio, la Geedziĝa Regularo de la ortodoksa serba eklezio kaj la islama juro, kiu permesadis poligamion. Post la milito la Konstitucio de 1946 enkondukis la disiĝon de la ŝtato kaj eklezio, kaj rezulte la geedziĝo kaj familiaj rilatoj estis reguligitaj de la ŝtato. Tuj estis enkondukita civila geedziĝo sur la tuta teritorio de Jugoslavio. Dum en S.U. la familiaj rilatoj estas reguligitaj en la Familiaj Kodoj, en Jugoslavio la koncernaj preskriboj troviĝas en la Baza Leĝo pri Geedziĝo de aprilo 1946, Baza Leĝo pri la Rilatoj inter la Gepatroj kaj Infanoj de decembro 1947, Baza Leĝo pri Kuratoreco de la sama jaro kaj Baza Leĝo pri Adopto. La heredaj rajtoj en la kadro de la familio estas reguligitaj en S.U. en la novaj civilaj kodoj, dum en Jugoslavio ilin reguligas la Leĝo pri Heredado de 1955.

En ambaŭ landoj la egaleco de seksoj estas jure rekonita kaj garantiita, kvankam la grado de egaleco kaj el jura vidpunkto kaj en la praktiko ne estas tute sama en la du landoj. La principo de egaleco manifestiĝas en la sekvantaj punktoj:

1. **Kondiĉoj.** – La ĉefa kondiĉo estas la libera volo de la geedziĝontoj, kiuj devas esti plenaĝaj, nome minimume 18-jaraj. En kelkaj sovetaj respublikoj (Ukrainio, Azerbajdĵano, Gruzio, Armenio kaj Moldavio) la minimuma aĝo por virinoj estas 16 jaroj. En RSFSR la lokaj sovetoj povas malaltigi je maksimume unu jaro la preskribitan aĝon por virinoj. En Belorusio la preskribita aĝo povas esti malaltigita je 2 jaroj por ambaŭ seksoj. En Jugoslavio la kortumo rajtas malaltigi la aĝon, sen

limo, por ambaŭ seksoj ĉu antaŭ ĉu, en kelkaj kazoj, post la kontraktita geedziĝo. La konsento de la gepatroj estas necesa nek en S.U. nek en Jugoslavio. Rilate la ĉefajn impedimentojn, sanga rilato en rekta linio prezentas absolutan malpermeson. En Soveta Unio geedziĝo inter parencoj de la dua grado, inkluzive duongefratojn, estas malpermesita. En Jugoslavio la malpermeso iras ĝis la kvara grado inkluzive (gekuzoj), sed parencoj de la kvara grado povas esti liberigitaj per decido de la kortumo. En Jugoslavio relativaj impedimentoj estas ankaŭ boparenceco de unua grado kaj rilatoj kreitaj per adopto inter la adoptinto kaj adoptito. Pluaj absolutaj impedimentoj estas: ekzistanta antaŭa geedziĝo, mensa malsano aŭ malkapablo kompreni, ĉio por ambaŭ seksoj egale.

2. **Personaj rilatoj.** – Egaleco kompleta. La geedzoj rajtas preni kiel komunan nomon familian tiun de la edzo (en S.U. ankaŭ tiun de la edzino), sed ili rajtas konservi sian familian nomon. Se la nomo estas komuna, la infanoj havas la saman. Se ne, la gepatroj interkonsente donas la nomon al la infanoj; se ili ne konsentas, decidas la kuratora aŭtoritato. La geedzoj komune decidas pri la loko de loĝado. Nek la edzo nek la edzino estas jure devigitaj sekvi la alian partion en lia aŭ ŝia loĝloko. Ĉiu partio konservas sian ŝtatanecon en kazo de internacia geedziĝo.

3. **Proprietaj rilatoj.** – La geedzoj interkonsente decidas pri la familia mastrumado, sed ili estas sendependaj rilate la elekton de siaj respektivaj okupo aŭ profesio. Ĉiu el la geedzoj konservas la proprietajn rajtojn rilate la havaĵon akiritan antaŭ la geedziĝo. Tiun proprieton ĉiu el la partioj administras sendepende kaj pri ĝi libere disponas. Male, la proprieto akirita dum la geedzeco – kun la escepto de donacoj aŭ heredaĵoj faritaj eksplicite al unu el ili – estas ilia komuna proprieto. Ĉefe tio estas proprieto akirita per laboro. La hejma laboro estas konsiderata kiel enspeza laboro. Tio estas precipe grava en kazo de malkonsento, ĉar la kortumo devas preni en konsideron ankaŭ la hejman laboron de unu aŭ de ambaŭ partioj por fiksi la parton de la komuna proprieto apartenantan al ĉiu el ili. Ambaŭ geedzoj respondecas por la ŝuldoj faritaj de kiu ajn el ili koncerne la familian mastrumadon dum la geedzeco.

4. **Vivtenado de la familio.** – La geedzoj kontribuas al la vivtenado de la familio konforme al siaj kapabloj. Se unu el la geedzoj ne disponas pri propraj vivrimedoj kaj ne estas laborkapabla, la alia devas vivteni lin aŭ ŝin, kondiĉe ke ties rimedoj ebligas tion. Ĉiaspecaj kontraktoj inter edzo kaj edzino estas permesitaj, se ili ne kontraŭdiras la imperativajn preskribojn de la leĝo, nome tiujn, kiuj rilatas al la principo de egaleco, iliaj reciprokaj rajtoj kaj devoj, la libera elekto de okupo, la reguloj koncerne la komunan kaj apartan proprieton kaj la devon de vivtenado de la partio, kiu ne havas vivrimedojn kaj ne estas laborkapabla.

5. **Rilatoj inter gepatroj kaj infanoj.** – La gepatroj havas la samajn rajtojn kaj devojn koncerne la infanojn. La gepatroj devas vivteni la infanojn kaj zorgi pri ilia edukado konforme al la leĝo kaj la eblecoj de la familio. Tio koncernas la infanojn naskitajn dum la geedzeco, legitimitajn per posta geedziĝo kaj adoptitajn. En Jugoslavio tio koncernas ankaŭ la infanojn naskitajn ekster geedzeco. En S.U. tiurilate la principo de egaleco estas grave rompita. En S.U. nek la patrino, nek la infano, nek la kuratora aŭtoritato nek kiu ajn alia povas postuli ĉe kortumo aŭ ĉe

kiu ajn aŭtoritato la establaron de patreco. Sekve, la patro de ekstergeedza infano ne havas kiun ajn rajton aŭ devon rilate tiun infanon, sed pri ĝi zorgas nur la patrino, kiu tamen rajtas ricevi helpon de la ŝtato.

En kazo de nuligo de la geedziĝo aŭ divorco, la gepatraj rajtoj estas plenumataj de tiu el la gepatroj, ĉe kiu restas la infano laŭ la decido de la kortumo, sed la alia el la gepatroj povas en ĉiu momento peti decidon aŭ de la kortumo aŭ de la kuratora aŭtoritato, se li aŭ ŝi malkonsentas pri iuj agoj de la alia partio rilate la vivtenadon kaj edukadon de la infano.

6. Eksedziĝo. – Geedzeco ĉesas ekzisti aŭ per nuligo **ex nunc** aŭ per divorco pro kaŭzoj menciitaj en la leĝo, en S.U. implicite kaj en Jugoslavio eksplicite. La kaŭzoj estas la samaj por ambaŭ partioj. En kazo de nuligo de la geedzeco, la infanoj estas konsiderataj kiel laŭleĝaj. Kompreneble, la geedzeco finiĝas ankaŭ per la morto de unu el la partioj. Unu el la kaŭzoj de la divorco estas la neakordigebleco de karakteroj. La aliaj kaŭzoj varias, plej ofte: malfideleco, serioze diskrompitaj geedzaj rilatoj, nekuraĉebla mensa malsano, malespero de unu el la partioj por longa tempo, kondamno pro kelkaj gravaj krimoj, inkluzive t.n. politikajn krimojn k.a. Por divorco estas kompetentaj nur la kortumoj en ambaŭ landoj. La divorcita partio, kiu ne havas rimedojn por vivtenado kaj estas nekapabla labori, rajtas ricevi vivtenon de la alia partio. Por la infanoj ili ambaŭ devas kontribuo kaj, se unu ne havas rimedojn, la alia devas sola prizorgi la vivtenadon kaj edukadon.

7. Reciprokaj heredaj rajtoj. – En S.U. laŭleĝe heredas en egalaj partoj la postvivinta el la geedzoj, la infanoj kaj la gepatroj. Se neniu el tiu grupo vivas, tiam la gefratoj de la mortinto kaj liaj geavoj, same tiel en egalaj partoj. Infanoj, kiuj ne estas plenaĝaj aŭ kiuj estas labore malkapablaj, same kiel la labore malkapablaj postvivintoj el la geedzoj kaj la gepatroj devas en ĉiu okazo heredi almenaŭ du trionojn de tiu parto, kiun ili heredus laŭleĝe, se ne ekzistus testamento (deviga parto). En Jugoslavio al la unua grupo de laŭleĝaj heredantoj apartenas la infanoj kaj la postvivinta partio en egalaj partoj. Al la dua grupo apartenas la gepatroj de la mortinto, senkonsidere al ilia laborkapablo, kaj la postvivinta partio. En tiu ĉi kazo duono de la propio apartenas al la postvivinta el la geedzoj kaj duono al la gepatroj de la mortinto aŭ al iliaj posteuloj. Fine, se en la momento de la morto troviĝis nek gepatroj, nek gefratoj aŭ iliaj posteuloj, la tuta heredaĵo apartenas al la postvivinta partio. La t.n. deviga parto en Jugoslavio estas dono de la laŭleĝa. Ĝin rajtas ricevi la infanoj kaj la postvivinta partio.

8. Konkludo. – La fakta situacio ne tute respondas al la formalaj juraj preskriboj. Tio ĉefe ŝuldiĝas al la malpli alta edukiteco de virinoj en ambaŭ landoj, al tradicioj kaj regionaj kutimoj, al la profesioj kaj okupoj de la virinoj, al la virina laboro en la hejmo. Tamen, kompare kun la antaŭa situacio, la principo de egaleco de seksoj faris grandajn progresojn en ambaŭ landoj.

INTERNACI-JURAJ PROBLEMOJ DE SPACVETURADO

I

En 1957 estis lanĉita la unua soveta artefarita satelito. Post mallonga tempo sekvis la usona kaj pluraj aliaj. Tiu fakto signifis unuarangan plian venkon de la homo. Ĝi malfermis novajn perspektivojn kaj fariĝis decida mejloŝtono en la evoluo de la scienco kaj de la kulturo ĝenerale. Jam la unuaj artefaritaj satelitoj havigis pliajn valorajn informojn pri la terglobo, pri ĝia atmosfero, pri la kosmaj radioj kaj la Universo.

Kiel oni povis atendi, la rapida progresado sur tiu ĉi kampo rezultigis novajn spektaklajn atingojn. En majo 1965 soveta spacveturanto por la unua fojo en la historio de la homaro „promenis” en la spaco, kaj en junio de la sama jaro usonano sekvis lin. En aprilo 1965 Usono lanĉis la unuan sateliton por komunikado, dum tri monatojn poste usona spacŝipo sukcesis sendi fotojn de Marso al la Tero. Sekvis renkontiĝoj de usonaj spacŝipoj en decembro 1965 kaj la granda evento de la 3-a de februaro 1966, kiam soveta spacŝipo (Luna 9) sendifekte alluniĝis kaj sendis diversajn informojn al surteraj stacioj. Kelkan tempon poste ankaŭ Usono atingis la samon.

Ĉiuj ĉi atingoj kaŭzis aron da internacijuraj problemoj. Kelkaj el tiuj problemoj estas aktualaj jam hodiaŭ, aliaj fariĝos tiaj en la proksima estonteco. La teorio de internacia juro efektive troviĝis, kiel kutime, malantaŭ la teknikaj progresoj. Kvankam en pure akademiasaj studoj estis tuŝitaj pluraj demandoj ligitaj al la spacveturado, jam antaŭ ol la unuaj artefaritaj satelitoj komencis sian ĉirkaŭteran rondiradon, tamen nenio estis decide solvita. La menciitaj studoj servis nur kiel bazo por ellaborado de novaj principoj kaj reguloj, ĉefe en la sino de Unuiĝintaj Nacioj, de la plej moderna branĉo de internacia juro, nome la juro de la kosmaj spacoj, plej ofte nomata spacjuro.

Kompreneble, la celo de tiu ĉi mallonga prelego ne estas nek povas esti, prezenti kompletan bildon pri la multnombraj problemoj rilatantaj al spacveturado kaj ankoraŭ malpli sugesti taŭgajn solvojn. Ĝia celo estas nur atentigi pri la plej gravaj aspektoj, diri kelkajn vortojn pri la nun validaj principoj kaj reguloj de internacia juro rilate tiujn aspektojn kaj indiki la evolutendencojn.

II

En la nuntempa internacia juro estas ĝenerale rekonita la principo, ke la ŝtato havas plenan suverenecon sur sia teritorio. Estas ankaŭ ĝenerale rekonite, ke la nocio de teritorio en internacia juro ampleksas ne nur la firman teron, sed ankaŭ ĉiujn internajn akvojn kaj la t.n. teritorian maron, kies larĝeco varias de 3 ĝis 12 maraj mejloj, mezurita de la linio de la maksimuma malfluso aŭ, en specialaj kazoj, laŭ aliaj kriterioj, ekzemple laŭ la t.n. bazaj linioj, kiel en Norvegio. Kvankam la aliaj ŝtatoj havas iajn rajtojn en la teritoria maro, el kiuj la ĉefa estas la rajto de paca trapaso (innocent passage), tamen la marborda ŝtato efektivas sian suverenecon sur la teritoria maro. La teritoria suvereneco de la ŝtato ne estas limigita nur al la surfaco de la tero aŭ maro, sed ankaŭ al la interno, resp. ĉe la maro ankaŭ al la fundo kaj subfundo. Fine, estas ĝenerale rekonita la principo, ke la ŝtato ĝuas suverenecon je la tuta aerspaco super la teritorio inkluzive, kompreneble, la teritorian maron. Kaj precize tiu ĉi principo estas grava, en ligo kun la flugado – en tiu ĉi kunteksto la vorto estas uzata en multe pli larĝa senco – de la nuntempaj eksplodaj raketoj, gvidataj ĵetaĵoj kaj satelitoj. La demando estas, ĉu la „flugado” de tiaj objektoj signifas malobservon de la teritoria suvereneco de aliaj ŝtatoj, super kiuj ili moviĝas.

Por pritrakti korekte la demandon estas necese unue diri, ke la internaciaj leĝoj de la ŝtatoj kaj gravaj internaciaj konvencioj ja deklaras aŭ agnoskas la suverenecon de la ŝtato de la „aerspaco” super la teritorio, sed ne difinas la altecon de tiu aerspaco. La solan escepton faris Peruo, kiu en 1921 fiksas tiun altecon je 3 km kaj deklaris la flugadon super ĝi plene libera, sed ankaŭ tiu iom unika leĝo sur tiu ĉi kampo estis abolita en 1927, kaj ekde tiam ankaŭ Peruo akceptis la ĝeneralan difinon de aerspaco sen fikso de la alteco.

En tia situacio stariĝas la demando, kio efektive povas esti konsiderata kiel aerspaco. Laŭ la difino de la Pariza Konvencio pri Aera Navigacio de la jaro 1919, la aerspaco kiel koncepto de teritoria suvereneco estas tiu parto de la atmosfero, en kiu la denseco de la aero estas sufiĉa por flugado de aeroplanoj kaj aliaj aparatoj, t.e. aparatoj „kiuj povas sin teni en la aero dank’ al la kontraŭstaro de la lasta”. Por la jaro 1919 tia difino certe estis kontentiga kaj sufiĉa. Pro sia elasteco ĝi fariĝis taŭga ankaŭ por la postaj progresoj sur tiu ĉi kampo. Tute simple: ju pli alte povis flugi la aviadiloj, des pli alta fariĝadis la aerspaco, je kiu la sube kuŝanta ŝtato etendis sian suverenecon. Kiel konate, la hodiaŭaj plej modernaj reakciaviadiloj povas flugi je grandegaj altecoj, kaj estas sendube, ke la ŝtata suvereneco etendiĝas eĉ al tiuj altaj tavoloj de la atmosfero, kie hodiaŭ povas flugi aviadiloj. La sama difino de la aerspaco estas akceptita en art. 1 de la Konvencio pri Internacia Civila Aviado (Chicago, 1944), konata kiel Ĉikaga Konvencio, kiu rekonas, ke ĉiu ŝtato havas „kompletan kaj ekskluzivan suverenecon je la aerspaco super sia teritorio”.

Ne estas certe, ĉu la suvereneco etendiĝas eĉ al tiuj tavoloj de la atmosfero, kiuj estas tiel maldensaj, ke flugado en ili ne plu estas ebla, sed en kiuj tamen povas moviĝi raketoj kaj gvidataj ĵetaĵoj. Tamen, eĉ se oni akceptas la opinion, ke ĉiuj partoj de la atmosfero, eĉ la plej maldensaj en kiuj flugado hodiaŭ ne eblas, apartenas al la suvereneco de la sube troviĝanta ŝtato, restas tamen la kosma spaco ekster tiu limo.

En la plua pritrakto de la demando estas do necese distingi la aerspacon, je kiu la ŝtato sendube ĝuas plenan suverenecon, disde la supraj tavoloj de la atmosfero, kie flugado laŭ la difino de la Pariza Konvencio de 1919 kaj la Ĉikaga Konvencio de 1944 ne plu estas ebla, sed kie povas moviĝi raketoj aŭ gvidataj ĵetaĵoj, kiel ankaŭ disde la ekstera kosma spaco.

Kelkaj komparis tiujn tri zonojn al la tri juraj reĝimoj de la maro. Oni faris paralelon inter la aerspaco kaj teritoria maro; inter la supra atmosfero kaj la t.n. apuda zono en la mara juro; inter la libera maro kaj la kosma (ekstera) spaco. Kvankam tia paralelo unuavide ŝajnas alloga, tamen ĝi ne estas taŭga pro la esence malsama pozicio de la maro resp. de la supertera spaco en rilato al la firma tero: la unua troviĝas sur la sama nivelo kun la tero, la alia estas super ĝi. Kaj tio kaŭzas, ke al la surtera spaco ne povas esti blinde aplikataj la juraj principoj kaj reguloj rilatantaj al la maro.

III

Kiel dirite, estas sendube, ke laŭ la nuntempa internacia juro la ŝtato ĝuas plenan suverenecon je la aerspaco super sia teritorio. La dislimigo de tiu spaco en senco vertikala, nome inter du najbaraj ŝtatoj aŭ inter la ŝtata teritorio kaj la libera maro, estas relative simpla kaj facila. Ĝi estas difinita per imagitaj vertikalaj linioj, kiuj pasas tra ĉiuj punktoj de la limoj de la ŝtato, resp. de ĝia teritoria maro. La vera problemo estas, kiom alte etendiĝas la suvereneco. Tiurilate en la teorio aŭdiĝas pluraj proponoj, sed ankoraŭ nenio estas firme decidita.

Unuj, bazante siajn tezojn sur la preskriboj de la ekzistantaj konvencioj, diras, ke la suvereneco etendiĝas je la tuta aerspaco super la ŝtata teritorio kaj ke ekster tiu limo ne povas ekzisti suvereneco de kiu ajn ŝtato. Pri tio oni facile povus konsenti, sed tuj ekestas alia problemo, nome: kio devas esti komprenata kiel „aera” spaco. Tiurilate oni aplikas diversajn kriteriojn, el kiuj la plej grava estas la kriterio de la denseco de la aero, nome: tia denseco, kiu ankoraŭ havas la kapablon teni flugantan objekton. Tiu kriterio ne ŝajnas esti tre forta unue tial, ĉar la progresado de la tekniko ebligas preskaŭ ĉiutage atingon de pli altaj sferoj, kaj aliflanke ankaŭ tial, ĉar raketoj kaj gvidataj objektoj povas tutcerte moviĝi en altoj, kie flugado en la vera senco de la vorto, nome „subtenata de la aero”, ne estas ebla.

Alia kriterio, kiun kelkaj volis apliki, estas la fizika koncepto de aero. Tamen ankaŭ ĝi montriĝis ne taŭga, ĉar laŭ la hodiaŭa geofiziko oni ankoraŭ ne scias precize, kiom alte fakte etendiĝas la atmosfero. Kelkaj sciencistoj opinias, ke la atmosfero etendiĝas ĝis minimume 1.100 km, dum aliaj opinias, ke ĝi estas alta plurajn milojn da kilometroj. Laŭ ĉio ŝajnas, ke la alteco de la atmosfero troviĝas inter 300 kaj 38.000 km super la tersurfaco, do la diferenco estas tiel granda kaj la mezuro tiel nepreciza, ke ne estas eble identigi la natursciencan koncepton de atmosfero kun la jura, aŭ, pli precize, ne estas oportune apliki la natursciencan koncepton por la jura reguligo.

Laŭ la tria kriterio la alteco devas esti difinita konforme al la postuloj de sekureco de la ŝtato. Efektive, el historia kaj fakta vidpunktoj tiu kriterio ŝajnas esti

la plej realeca kaj la plej oportuna. Ankaŭ la difino de la teritoria maro kaj, poste, de la apuda mara zono havis origine sian kaŭzon en la klopodoj certigi la sekurecon de la ŝtato. Al tio aldoniĝis ankaŭ kaŭzoj de ekonomia karaktero. Kaj same kiel la unua ideo estis tiu de la libereco de la maro sen kiaj ajn limigoj, tiel same la unua ideo rilate la aeron estis tiu de libera flugado super la teritorio de kiu ajn ŝtato. Reago kontraŭ tiu koncepto venis tiam, kiam la aviado tiel evoluis, ke flugado super la teritorio de alia ŝtato fariĝis danĝera por ĝia sekureco. En 1906 la konata franca internaciisto Fauchille, kiu unue pledis por plena libereco de la aerspaco, starigis la limon de 1.500 metroj, sub kiu la ŝtato povas malpermesi la flugadon de fremdaj aviadiloj. Baldaŭ unu ŝtato post la alia deklaris, per internaj leĝoj, la suverenecon super sia teritorio. En Britio ĝi estis farita per la Aktoj de 1911 kaj 1913 pri aera navigacio; en Ruslando per la Leĝoj de 1912 ktp. Dum la Unua Mondmilito Nederlando protestis ĉe la germana registaro pro la flugado de germanaj aeroplanoj kaj direkteblaj balonoj (zepelinoj) super ĝia teritorio. Estas interese mencii pretere, ke ankaŭ komence de la Dua Mondmilito Germanio pretendis, ke ĝiaj aviadiloj rajtas flugi super la teritorioj de neŭtralaj ŝtatoj je la alteco de 3 mejloj aŭ pli, asertante, ke la 3 mejloj estas la internacie rekonita larĝeco de la teritoria maro kaj ke tiu larĝeco estas aplikenda al la alteco de la aerspaco. Sed Nederlando rifuzis tiujn pretendojn kaj deklaris, ke ĝia suvereneco etendiĝas al „ĉiu ajn alteco super la nederlanda teritorio. Ankaŭ la Pariza Konvencio de 1919 pri aera navigacio akceptis la principon de suvereneco je la aerspaco eksplicite pro kaŭzoj de sekureco. La sube troviĝanta ŝtato estis ankoraŭfoje rekonita kiel la sole kompetenta por reguligi la flugadon super sia teritorio, permesi aŭ malpermesi la flugadon de fremdaj aviadiloj, fiksi difinitajn flugvojojn ktp. Sur esence samaj principoj de sekureco baziĝas la Ĉikaga Konvencio de 1944.

Ŝajnas, ke la principo de sekureco povas efike aplikiĝi ankaŭ al eksplodaj raketoj kaj diversaj gvidataj ĵetaĵoj. La sube troviĝanta ŝtato povus per internaj leĝoj malpermesi la flugadon de tiaj objektoj, se ĝi opinias ilin danĝeraj por sia sekureco ĉu pro militaj kaŭzoj, ĉu pro politikaj, ekzemple pro la deziro konservi neŭtralecon. Estas tre verŝajne, ke la estonta reguligo iros precize tiun vojon, nome, ke la ŝtato reguligos per siaj leĝoj la flugadon ne nur de aviadiloj, sed ankaŭ de ĉiuj ajn aliaj objektoj super sia teritorio.

Signoj pri tio jam montriĝis. Ne nur en Aŭstrio en julio 1960, sed ankaŭ en decembro de 1957 (antaŭ la Supera Soveto) Ĥruŝĉov pretendis, ke Italio ne povas utiligi eksplodajn raketojn kontraŭ Sovetunion sen malobservo de la neŭtraleco kaj teritoria integreco de aliaj ŝtatoj. En Aŭstrio li eĉ akcentis, ke tiu lando devus malpermesi tian flugadon super sia teritorio, se ĝi deziras konservi sian neŭtralecon. La brita liberala gazeto „Guardian” rimarkigis tiuokaze, ke Ĥruŝĉov nenion diris pri tio, ke ankaŭ Sovetunio, same tiel, ne povus uzi siajn raketojn kontraŭ multajn celojn en la mondo sen malobservo de la suvereneco de pluraj ŝtatoj. Okaze de la fama incendio de la usona aviadilo U-2, franca aŭtoritatulo rimarkigis, ke la sovetaj satelitoj superflugas daŭre multajn landojn kaj oni tute ne scias ion ajn pri la diversaj aparatoj, kiuj troviĝas en ili kaj kiuj povas prezenti danĝeron por la sekureco de aliaj ŝtatoj. La samo rilatas al satelitoj de Usono.

Kaj tiel aŭdiĝas ĉiam pli kaj pli postuloj por altigo de la aera spaco pro kaŭzoj de sekureco. Efektive, se tiuj kaŭzoj forestus, apenaŭ estus imageblaj aliaj, pro kiuj estus necese limigi la liberecon de la supertera spaco en kiu ajn iom pli signifa alteco. La ekonomia faktoro, grava en la difino de la teritoria maro kaj apuda zono, havas signifon nur en la plej malaltaj tavoloj de la aera spaco, sed ne en la altaj, almenaŭ ne en la nuna momento. Restas do kiel esenca kriterio tiu de la ŝtata sekureco. Sed eĉ surbaze de tiu kriterio estas neimagebla la senfina altigo de la plafono de la supertera spaco. Pri tio, ŝajne, ĉiuj konsentas, ĉar tia senfina altigo estus ne nur sensenca, sed tute simple malebla. La argumento de kelkaj rusaj specialistoj pri internacia juro (ekzemple F. I. Kovalev kaj I. I. Ĉeprov), ke ekzistas altecoj, el kiuj nenia danĝero povas minaci kiun ajn ŝtaton – argumento evidente celanta pravigi la liberan moviĝon de sputnikoj – ne ŝajnas esti tre konvinka, ĉar hodiaŭ oni povas minaci la sekurecon de difinita ŝtato eĉ el la plej grandaj altecoj.

La ĉefa kaŭzo, pro kiu estas maleble altigi senfine la plafonon de la supertera spaco, certe ne estas la sendanĝereco de satelitoj super difinita alteco – kaj kiu, cetere? – sed la astraj kvalitoj de la Tero kaj ĝia pozicio en la Universo. Pro la turniĝo de la Tero ĉirkaŭ sia akso, pro ĝia turniĝo en la Suna Sistemo kaj pro la moviĝo de la tuta sistemo en la Universo, tia imagita konuso, kiu el la centro de la Tero, pasante laŭ la limoj de la ŝtatoj, etendiĝus al senfino, kaj je kiu la ŝtato havus suverenecon, enhavus efektive ĉiumomente aliajn spacojn de la universo. Tio signifus, ke en unu momento difinita spaco kune kun diversaj ĉielaj korpoj apartenus al la suvereneco de unu ŝtato kaj en alia momento al la suvereneco de la alia. Kaj tio evidente estus malebla kaj tro sensenca! Krom tio, spacŝipo, eĉ se ĝi estus lanĉita absolute vertikale, necese post mallonga tempo troviĝus en la spaco apartenanta al suvereneco de alia ŝtato. Ĉio ĉi kaŭzus tian ĥaoson, ke pli grandsn oni apenaŭ povas imagi. Tial vere neniu starigos – almenaŭ ne por la momento – tiajn fantaziajn postulojn, kaj oni konsentas, ke la limo por tiu plafono nepre devas ekzisti. Provante ĝin trovi, kelkaj aŭtoroj starigis la kriterion de efektiva kontrolo super sia teritorio. Se iu ŝtato disponas pri rimedoj – ili diris – por faligi aŭ detruiri tian objekton, tiam la suvereneco etendiĝas ĝis la alteco, en kiu la koncerna ŝtato kapablas tion fari. Tia solvo tamen, prezentus ne nur danĝeron por la plua esplorado de la universo, sed estus ankaŭ kontraŭa al la principo de egaleco de la ŝtatoj, ĉar ĝi signifus, ke pli potencaj ŝtatoj kun pli evoluinta tekniko havus pli altan superteran spacon en sia suvereneco ol ŝtatoj malpli potencaj, sen tiaj rimedoj. Sekve, ankaŭ tiu solvo ne kontentigas.

En la teorio oni ankaŭ ekzamenis la eblecon fiksi la supran limon surbaze de la gravito de la Tero. Konforme al la kriterio de gravito, la supra limo de la ŝtata suvereneco devus troviĝi ie en la zono, kie finiĝas la gravito de la Tero kaj kie tial malaperas la danĝero de damaĝoj, kiujn povus kaŭzi faloj de diversaj homfaritaj objektoj. Ĉar tiu zono troviĝas je la alteco de proksimume 250.000 kilometroj, oni trovis ĝin tro alta, kaj ankaŭ tiu ideo estis forĵetita. Estas interese mencii, ke kelkaj reiris al la ideo fiksi la altecon tutsimple en kilometroj, ne prenante multe en konsideron kiun ajn alian kriterion. Ekzemple la David Davies Instituto en Londono sugestis la altecon de 80.000 metroj super la surfaco de la Tero, mezurita ekde la marnivelo.

Ĉiam pli kaj pli ĝeneraliĝas la kriterio de perigeo de la satelitoj. Ekzemple, la plej proksima punkto (perigeo) al la Tero de la orbito de la unua soveta satelito estis 228 kilometrojn, dum la plej malproksima punkto (apogeo) estis 947 kilometrojn. La perigeo de la unua usona satelito estis 184 kilometrojn. Pro la fakto, ke nek Sovetunio nek Usono petis permeson de la aliaj ŝtatoj antaŭ la lanĉado de siaj respektivaj satelitoj kaj ke neniam kiu ajn ŝtato protestis post la lanĉado, ĉiam pli firmiĝas la konvinko, ke la suvereneco de la ŝtato ne etendiĝas al la spacoj ekster la perigeo de artefaritaj satelitoj. Ĉar la perigeoj ne estas je la sama distanco de la Tero, oni prenas kiel kriterion la perigeon de tiu orbito, kiu estas la plej proksima al la Tero. Tia estas la starpunkto ankaŭ de la Asocio de Internacia Juro, kiu denove diskutis la demandon dum la Konferenco en Helsinki en 1966.

IV

Alia problemo estas tiu de la nuna kaj estonta juraj pozicioj de la ĉielaj korpoj. Se, pro la kaŭzoj jam menciitaj, hodiaŭ oni ĝenerale konsentas, ke ne estas eble etendi la suverenecon de la ŝtato senfine al la supertera spaco, la sama starpunkto ne estis ĉiam aplikata rilate la ĉielajn korpojn. Multaj juristoj starigis la demandon, ĉu ne estus eble okupi la Lunon, la planedojn kaj aliajn korpojn de la Universo laŭ la samaj principoj, kiuj aplikigaŝas por la okupo de regionoj ne troviĝantaj sub suvereneco de kiu ajn ŝtato. Oni esploris ĉu por akiri, ekzemple, la Lunon, sufiĉas ke raketo de difinita ŝtataneco atingu ĝin, aŭ estus necese por ŝtato de tiu raketo efektiviĝi ankaŭ faktan kontrolon por povi pretendi posedon de la ĉiela korpo. Oni ankaŭ starigis la demandon, ĉu tiu fakta kontrolo povus esti farata desur la teritorio de la koncerna ŝtato, aŭ estus necese, ke tiu ŝtato elŝipigu militajn fortojn por ekposedi jure la koncernan ĉielan korpon. Tiuj kaj similaj problemoj estis kaj parte ankoraŭ estas sufiĉe vaste diskutataj en la teorio. La juristoj de la grandaj potencoj inklinis ne malofte al konceptoj, kiuj pravigadis la eblecon de ekposedo de iu ĉiela korpo kaj de ĝia subigo al la suvereneco de la koncerna ŝtato. Komprenoble, neniu el tiuj teoriaj tendencoj fariĝis juro.

Intertempe ankaŭ Unuiĝintaj Nacioj ekinteresiĝis pri la afero. En decembro 1959 la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj akceptis rezolucion, surbaze de kiu estis poste formita speciala Komitato por la Paca Utiligo de la Kosma Spaco. Aparta Jura Subkomitato de la Komitato de UN por la Paca Utiligo de la Kosma Spaco okupiĝis pri la juraj aspektoj. Rezulte de tiu multflanka agado en la sino de Unuiĝintaj Nacioj, la Ĝenerala Asembleo akceptis la 13-an de decembro 1963 gravan Deklaracion pri la Juraj Principoj Regantaj la Agadojn de Ŝtatoj en la Esplorado kaj Utiligado de la Kosma Spaco. La Deklaracio estis akceptita unuanime. Laŭ la Deklaracio, la esplorado kaj utiligado de la ekstera spaco devas esti farita en la intereso de la homaro. La spaco kaj la ĉielaj korpoj en ĝi povas esti libere esplorataj kaj utiligataj de ĉiuj ŝtatoj, sed neniu ĉiela korpo povas esti akirita per longa uzo aŭ okupacio aŭ en kiu ajn alia maniero. La Deklaracio akcentas, ke la agadoj de la ŝtatoj en la kosmo devas esti konformaj al la principoj de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj kaj al la ĝeneralaj principoj de internacia juro.

La utiligado de la kosma spaco devas celi la fortikigon de pacaj kaj amikaj rilatoj inter la popoloj, kaj ne esti direktita al militpropagando, rasa aŭ nacia malamo. La Deklaracio entenas koncizajn principojn ankaŭ rilate al aliaj aktualaj demandoj, ekzemple la ŝtataneco de la spacŝipoj, la rajtoj rilate al savado de spacŝipoj, la respondecoj pro damaĝoj kaŭzitaĵ de spacŝipoj kaj aliaj homfaritaj objektoj, la pozicio de astronautoj ktp.

Pro la fakto, ke la Deklaracio havas karakteron de rekomendo (same kiel ĉiuj tiaspecaj decidoj de la Ĝenerala Asembleo), ekestis la demando pri ĝia jura valoro, tute speciale pri ĝia deviga forto. Ne eblas nun diskuti la detalojn de tiu problemo. Sufiĉos nur mencii, ke la Deklaracio estis akceptita unuanime kaj ke la du grandaj spacpotencoj – Usono kaj Sovetunio – solene deklaris, ke en siaj agadoj en la spaco ili observos la principojn de la Deklaracio. Per tiuj du unuflankaj eksplicitaj deklaroj, la du ŝtatoj sendube akceptis difinitajn sindevigojn konforme al la Deklaracio. Sur la kampo de utiligo de la kosma spaco nur por pacaj celoj elstaran eventon markis la Moskva Traktato de la 5-a de aŭgusto 1962 pri la malpermeso de eksperimentoj per nukleaj armiloj ne nur en la atmosfero, sed ankaŭ ekster ĝiaj limoj, nome en la ekstera spaco. Fine, necesas mencii la plej lastan evoluon, nome la proponojn kaj de Sovetunio kaj de Usono rilate la malpermeson establi sur la ĉielaj korpoj militajn bazojn aŭ instalaĵojn de kiu ajn speco, kiuj estus kontraŭaj al la uzo de la ĉielaj korpoj nur por pacaj celoj.

V

Kiel oni vidas, en la lastaj jaroj oni trovis taŭgajn solvojn por almenaŭ kelkaj el multnombraj problemoj ligitaj al spacveturado kaj al la spaco ĝenerale. Tamen, tute ne subtaksante la ĝisnunajn atingojn – ekzemple rilate la registradon kaj markojn de la spacŝipoj, formojn de helpo al la astronautoj, rajtojn koncerne la helpon al spacŝipoj, aŭ ilian savadon – estas klare, ke ili apartenas al demandoj de dua rango, se oni komparas ilin kun la esenco de la problemo, nome la uzo de la kosma spaco por pacaj celoj, ĝia utiligo en la intereso de la tuta homaro.

Oni povus diri, ke tiurilate ne ekzistas realaj malfacilaĵoj, ĉar ĉiuj konsentas ke la ekstera spaco devus esti utiligata nur por pacaj celoj kaj ke la ŝtatoj devus esti gvidataj, en siaj agadoj en la kosmo, de la principoj de kunlaborado kaj reciproka helpado, difinitaj en la menciita Deklaracio. Malfeliĉe, kvankam ekzistas ĝenerala konsento rilate la vortojn, malofte oni konsentas pri ilia vera signifo: sur tiu ĉi kampo same malmulte, kiel sur multaj aliaj. Ĝi estas unu el la fontoj de antagonismoj, kiuj tuj manifestiĝas, kiam oni klopodas transformi ĝeneralajn deklaraĵajn principojn, formulitajn tre vaste, en ellaboritan sistemon de devigaj reguloj.

Eble la plej profundaj kaŭzoj de ĉiuj problemoj renkontataj dum la serĉado de adekvataj juraj solvoj ne nur en la ekstera spaco, sed ankaŭ en la internaciaj rilatoj sur la Tero, troviĝas en la fakto, ke koncerne la teknikan progreson kaj la atingojn de la scienco ni subite ekfrontis la duan duonon de la dudeka jarcento kaj povas facile antaŭsenti la dudekunuan, dum samtempe ni plue vivas en la kadroj de la malnoviĝintaj politikaj formoj de la deknaŭa jarcento. Laŭ mia opinio, tio estas la

fundamenta kontraŭaĵo, el kiu originas ĉiuj malfacilaĵoj de tiu ĉi historia periodo, sed tio estas, kompreneble, ekster la limoj de tiu ĉi modesta kaj tre konciza kontribuo al kompreno de la internacijuraj problemoj de spacveturado.

PLEJ ESENCA BIBLIOGRAFIO

C. W. Jenks, **Space Law**, London, 1965

Le Droit de l'Espace, Paris, 1960

Space Law, London, 1965

E. A. Korovin, **Kosmos i Meĵdunarodnoje Pravo**, Moskvo, 1962

Ivo Lapenna, **Some Soviet Views on Space Law**, publikigita en la verko **Space Law**, London, 1965 (por la Soveta doktrino).

Bibliografio

Ivo Lapenna, **Ujedinjene Nacije** (Unuiĝintaj Nacioj), Zagreb, 1964

Ivo Lapenna, **Historija Diplomacije** (Historio de Diplomatio) 2 vol., Zagreb, 1948/49

Ivo Lapenna, **Conceptions Soviétiques de Droit International Public** (Sovetaj Konceptoj de Internacia Publika Juro), Paris, 1954

Ivo Lapenna, **State and Law: Soviet and Yugoslav Theory** (Stato kaj Juro: Soveta kaj Jugoslavia Teorio), London-New Haven, 1964

Ivo Lapenna, **Aktualaj Problemoj de la Nuntempa Internacia Vivo** (popularscienca), Rotterdam, 1952

Ivo Lapenna, **Some Soviet View on Space Law** (Sovetaj Vidpunktoj pri Kosma Juro), en la verko **Space Law**, London, 1966

LA PROTEKTO DE AŬTORAJ RAJTOJ KUN APARTA KONSIDERO AL LA UNIVERSALA KONVENCIO DE UNESKO *

I. Enkonduko

Rezulte de la kreskanta interdependeco de la mondo kaj de la multiĝantaj kulturaj kontaktoj, ĉie intensiĝas la interesiĝo pri la problemoj ligitaj al aŭtoraj rajtoj, speciale pri ilia internacia protekto. La demando interesas ne nur la aŭtorojn kaj la personojn aŭ entreprenojn, kiuj estas rekte koncernataj en kiu ajn formo, sed ankaŭ la vastan publikon, la tutan socion. Apenaŭ necesas diri, ke la aŭtora juro rilatas same tiel al la intelektaj valoroj kreitaj aŭ reproduktitaj en la Internacia Lingvo. Laŭ mia scio, ĝis nun ne aperis en Esperanto kiu ajn monografio aŭ pli ampleksa studo pri la temo. Tio estas des pli surpriza, ĉar la aŭtoroj, tradukantoj, ĵurnalistoj, eldonistoj, reĝisoroj kaj aliaj agantoj sur la kultura kampo, uzantaj tiucele la Internacian Lingvon, sendube renkontas en sia ĉiutaga laboro problemojn ligitajn al rajtoj kaj devoj difinitaj en la aŭtora juro.

Evidente, estas absolute maleble prezenti en mallonga prelego eĉ parteton de ĉiuj aspektoj de la aŭtora juro en diversaj landoj kaj sur internacia nivelo. Plurvoluma verko apenaŭ sufiĉus por tio. La celo estas ekspliki plej koncize la koncepton mem de la aŭtora juro, ĝiajn ĉefajn trajtojn en la plej gravaj juraj sistemoj kaj la nunan situacion rilate la internacian protekton de la aŭtoraj rajtoj.

II. Difino

Unue, kio estas aŭtorrajta juro aŭ, mallonge, aŭtora juro?

La plimulto de juraj specialistoj en tiu ĉi fako difinas ĝin kiel juran branĉon aŭ subbranĉon, kiu reguligas la tuton de rajtoj – kaj la respektivajn devojn – de aŭtoro de literatura, arta aŭ scienca verko je lia intelekta kreaĵo. Ĝi celas protekti la intelektan kreadon senkonsidere al la kvalito kaj al la arta aŭ scienca valoro de la verko.

Necesas tuj diri, ke en ĉiu intelekta kreado oni distingas tri esencajn elementojn: la **ideon** mem, la **formon** de ĝia realigo kaj la **materialon** aŭ

* Prelego farita en la Internacia Somera Universitato, Budapeŝt, 1966.

materian objekton, per kiu ĝi konkretiĝas (libro, desegnopapero, pentrotolaĵa, gramofondisko ktp.). Nek la ideo, nek la materia objekto kiel tiaj ĝuas protekton. Nur ideo konkretiĝinte en difinita formo estas protektata de la aŭtora juro. La ideo mem povas eble eĉ ne esti originala, sed la formo nepre jes. Tiu konkreta originala formo povas esti esprimita per vortoj, bildoj (koloroj), sonoj (tonoj) aŭ kiu ajn alia rimedo, depende de la karaktero de la verko. Kompreneble, tiuj malsamecoj gravas el la vidpunkto de la konkreta jura protekto, sed ili ne ŝanĝas la fundamentan koncepton de „protektata verko” en la intereso de ĝia aŭtoro.

Aliflanke, ĉiu aŭtoro kreas en difinita socia kaj kultura klimato. Por sia intelekta kreado li utiligas la kulturalan heredaĵon de la pasinteco, kaj per sia verko li siavice kontribuas al plia riĉigo de la kulturo. Kulturo ne estas nur afero de la aŭtoroj, sed ankaŭ de la tuta socio. Tial la aŭtora juro enhavas nombron da reguloj, kiuj certgrade limigas la individuajn aŭtorajn rajtojn en la intereso de la socio. Ekzemple, scienca verko estas protektata de la aŭtora juro kaj neniu povas senrajte publikigi, multobligi, reprodukti aŭ ŝanĝi ĝin, sed la sciencaj ideoj mem, la malkovroj kaj teorioj ne ĝuas tian protekton, ĉar ili havas ĝeneralan kulturalan-socian signifon, kaj ĉiu povas libere utiligi ilin. Pro la samaj kaŭzoj la daŭro de la aŭtoraj rajtoj estas kutime limigita en la tempo. En la grandega plimulto de internaj juraj sistemoj la menciitaj rajtoj daŭras dum la vivo de la aŭtoro kaj kelkan tempon post lia morto.

Sekve, la aŭtora juro celas harmoniigi du kontraŭajn interesojn: la individuajn de la aŭtoro kaj la kolektivajn de la socio. La preskriboj de la aŭtora juro en ĉiuj landoj ja kreas la necesajn jurajn kondiĉojn por arta kaj scienca kreado, sed samtempe ebligas, ke la rezultoj de tiu kreado estu metitaj en la servon de la socio por la plua evoluigo de ĝia spirita kaj materia kulturo.

La aŭtora juro garantias al la kreinto de intelekta verko la eblecon ricevi materian kompenson por siaj mensa fortostreĉo, laboro kaj kontribuo al la kulturo de la socio, en kiu li vivas. Ĝuste tiu materia flanko de la aŭtoraj rajtoj igis multajn jurajn teoriistojn rigardi la tuton de tiuj rajtoj kiel proprieton de sia speco, nome kiel nematerian, senobjektan proprieton je kreita verko. Ankaŭ la leĝdonaj instancoj de diversaj landoj kutime sekvas tiun starpunkton. La franca leĝo de la 11-a de marto 1957 eĉ havas la titolon „Leĝo pri Literatura kaj Arta Proprieto”. La esprimo proprieto estas uzata en aliaj internaj leĝoj, ekzemple en la brita Kopirajta Akto de 1956, kaj en internaciaj konvencioj kiel Berna kaj la Unviersala de UNESKO.

Tamen, krom la pure materia flanko (kompenso al la aŭtoro por utiligo de lia verko), la aŭtoro kaj liaj juraj heredantoj ĝuas ankaŭ aron da personaj, neproprietaj rajtoj. Ekzemple, eĉ post la estingiĝo de diversaj rajtoj je materiaj avantaĝoj, la digno, honoro kaj personeco de la aŭtoro estas protektataj sen tempa limigo. Neniu rajtas kaŝi lian nomon, ŝanĝi, falsi aŭ en kiu ajn senco misuzi lian verkon. Krome, la proprieta rajto – tute egale ĉu temas pri privata, persona, ŝtata aŭ kolektiva – ĉiam estas absoluta, t.e. ĝi efikas kontraŭ ĉiujn kaj tempe ĝi ne estas limigita. Male, la materia flanko de la aŭtorrajto ne ĉiam estas absoluta kaj, kun 2–3 esceptoj, ĝi ĉiuokaze estas tempe limigita. Tial ne ŝajnas oportune identigi la aŭtorajn rajtojn kun la proprietaj. Se, malgraŭ tio ni trovas kaj en teoriaj verkoj kaj en leĝaj tekstoj la esprimon „proprieto” en ligo kun la aŭtorrajto, oni devas kompreni tiun esprimon kun rezervo kaj nepre ne identigi ĝin kun la proprieto de materiaj objektoj.

Konsiderante la fakton, ke la tuto de aŭtoraj rajtoj konsistas el persone-juraj kaj materie-juraj elementoj, plej bone estas rigardi tiun tuton kiel specialan grupon de rajtoj kaj devoj, reguligitan de aparta jura branĉo aŭ fako: la aŭtora juro. Per la preskriboj kun persone-juraj elementoj ĝi protektas la personajn kaj moralajn interesojn de la aŭtoro: lian honoron, reputacion kaj artan aŭ sciencajn prestiĝon en ligo kun la kreita verko; per la reguloj kun materia karaktero ĝi ebligas al la aŭtoro uzi aŭ utiligi la verkon en kiu ajn formo kaj havigi al si ekonomian profiton.

Sekve, la aŭtora juro povas esti plej taŭge difinita kiel tiu jura branĉo, kiu reguligas la proprietajn kaj personajn rajtojn kaj respektivajn devojn en ligo kun la kreado de literaturaj, artaj kaj sciencaj verkoj, kun la celo harmoniigi la interesojn de la aŭtoroj kaj tiujn de la socio por antaŭenigo de la kultura progreso.

III. Noto pri historia evoluo

Iaj „intelektaj rajtoj” aŭ rajtoj ligitaj al intelekta kreado ne estis konataj al la romia juro. La vera historio de la protekto de aŭtoraj rajtoj komenciĝis kun la invento de la presarto, kvankam, fakte kaj jure, en la komenco ne la aŭtoroj, sed la produktantoj de presitaj materialoj estis protektataj.

En Anglio, ekzemple, la libroproduktantoj deziris protekti sian reputacion kaj konservi por si la profitojn rilate la librojn, kiujn ili mem unue eldonis. En la 16-a jarcento en tiu lando evoluis sistemo de privata registrado de ĉiuj publikigitaj libroj sub la kontrolo de la unuiĝo de komercistoj pri presaĵoj kaj papero. Unu el la rezultoj estis, ke kreiĝis fakta **kopirajto**, nome rajto kopii unue publikigitan presaĵon, pro kio eĉ hodiaŭ la tuta sistemo de aŭtoraj rajtoj konservis la nomon „**copyright**”, kvankam nuntempe ĝi havas tute alian senco ol estis ĝia originala signifo en la 16-a jarcento. En tiu tempo la „kopirajto” estis rigardata kiel proprieta rajto kaj tial senlima en sia daŭro.

Aliflanke, la reĝa aŭtoritato, ĉefe pro politikaj kaŭzoj, ĉiam pli interesiĝis pri kio ajn presita kaj deziris siavice kontroli la agadon sur tiu kampo. Tion ĝi realigadis unue per dekretoj kaj poste per licencaj aktoj. Tiamaniere la protekto estis transportita el privataj manoj de unuiĝo en la manojn de la ŝtato, kvankam plue temis nur pri protekto de la produktantoj de presaĵoj kaj ne de la intelektaj kreantoj. La rezulto de tiu stato estis, ke la kopirajto fariĝis monopolo, konsentita de la ŝtata aŭtoritato tra la Krono, kaj tial ĝia daŭro estis strikte limigita, idente al ĉiuj aliaj monopoloj.

Tiamaniere, almenaŭ en Anglio, en la aŭtoran juron estis enkondukita la ideo de limigita tempodaŭro de la rajto.

Fine de la 17-a jarcento ĉesis la sistemo de la „licencaj aktoj” kaj tuj ekestis la demando en kio fakte konsistas la jura naturo de „kopirajto”, ĉu ĝi entute jure ekzistas laŭ la t.n. „**common law**” kaj, se jes, al kiu ĝi apartenas. Tiurilate estas interese mencii, ke nur en 1774 la demando pri la protekto de la aŭtorrajto laŭ la angla „**common law**” estis pozitive solvita en la decida kazo Donaldson v. Beckett. Unu el la demandoj faritaj al la Ĉambro de la Lordoj estis „ĉu konforme al la **common law** aŭtoro de kiu ajn libro aŭ literatura verko havas sola la rajton unue presigi kaj

publikigi ĝin por vendo, kaj la rajton de akuzo kontraŭ kiu ajn persono, kiu presigis, publikigis kaj vendis tiun verkon sen lia konsento”. Ok el dekonu juĝistoj respondis jese* kaj tiel, pro la strukturo de la angla juro, kreis devigan precedencon por ĉiuj postaj kazoj.

Paralele kun tiu evoluo la tuta demando komencis esti reguligata ankaŭ per leĝoj. La unua laŭvice estis la Kopirajta Akto (leĝo) de 1709. Poste sekvis tuta aro da aliaj, el kiuj la plej menciindaj estas tiuj de 1842 pri la literatura protekto (daŭro: dum la vivo de la aŭtoro kaj 7 jarojn post lia morto aŭ entute 42 jarojn, se tiu lasta estas pli longa); 3 kopirajtaj leĝoj pri gravuraĵoj kaj artpresaĵoj de 1734, 1736 kaj 1777 (daŭro: 28 jarojn post la publikigo); la kopirajta leĝo de 1814 pri skulptaĵoj kaj tiu de 1862 pri protekto de pentraĵoj kaj fotografiaĵoj (daŭro: dum la vivo de la aŭtoro kaj 7 jarojn post lia morto); alia leĝo pri prezentado de teatraĵoj (1833) kaj reproduktado de muzikaj verkoj (1842) kaj kelkaj aliaj. Nur en 1911 aperis la unua ĝenerala Kopirajta Akto, kiu rilatis al ĉiuj formoj de literatura kaj arta kreado. Ĝi restis valida ĝis la 1-a de junio 1957, kiam ekvalidis la nova Kopirajta Akto de 1956 kun la postaj aldonoj kaj precizigoj. Tiu ĉi leĝo, simile al la leĝoj en la plimulto en aliaj landoj, ne aplikigas al inventoj aŭ malkovroj, kiuj laŭ sia naturo povas esti patentitaj; nek ĝi aplikigas al industriaj aŭ komercaj markoj, kiuj ĝuas alispecan protekton. Tion oni devas bone memori kiam oni traktas la aŭtoran juron.

Kompreneble, ne ĉiuj landoj pasis la samajn aŭ similajn etapojn de evoluo. Pli modernaj ŝtatoj transsaltis la komencajn stadiojn, dum kiuj iom post iom formiĝis la koncepto de la aŭtorrajto. Hodiaŭ tiu tuta sfero estas reguligita unuavice per internaj leĝoj de diversaj landoj kaj, internacie, per duflankaj, plurflankaj aŭ ĝeneralaj konvencioj, el kiuj la Berna, la Tutamerika kaj la Universala de UNESKO estas sendube la plej gravaj.

IV. Objekto kaj Subjekto

Por scii precize kiu estas la subjekto de la aŭtorajto, nome al kiu ĝi apartenas, kaj kio estas la objekto de tiu rajto, t.e. kio fakte estas protektata kaj dum kiu periodo, oni devas ĉiam konsulti la leĝojn aŭ aliajn jurajn aktojn de la koncerna ŝtato, ĉar ekzistas malsamecoj, kelkfoje eĉ konsiderindaj, inter la internaj juroj de diversaj landoj. Tamen, ekzistas ankaŭ pluraj komunaj ĝeneralaj trajtoj, kaŭzitaĵoj de la fundamenta ideo: harmoniigi la personajn kaj materiajn interesojn de la aŭtoro kun tiuj de la socio.

Antaŭ ĉio kelkajn vortojn pri la objekto de la protekto.

La plej komuna formulo estas, ke la objekto de la protekto estas ĉiu originala literatura, arta kaj scienca verko, sed tiuj esprimoj devas esti komprenataj tre vaste, konforme al la leĝoj de la unuopaj landoj. Ekzemple, sub „literatura verko” oni kutime komprenas ne nur beletrajn kaj sciencajn tekstojn, sed ankaŭ mapojn, planojn, tabelojn, kompilaĵojn k.s. „Literatura”, krome, ne necese implicas, en tiu

* Laŭ J. P. Eddy, **The Law of Copyright** (La Kopirajta Juro), London, Butterworth Co. (Publishers) Ltd., 1957.

ĉi kunteksto, artan aŭ scienca valoron, sed nur tutsimple skribitan aŭ presitan tekston, kiu postulis certagradan lertecon de la aŭtoro. Aliflanke, ne ĉiu presita teksto estas protektata. Ekzemple, informoj en la ĉiutagaj gazetoj ne ĝuas la protekton de la aŭtoro juro, sed analizaj artikoloj aŭ artaj kritikoj certe jes. Plue, kompilaĵoj estas protektataj, sed kelkaj specoj, ekzemple horaroj, vortaroj, programoj k.s., ofte estas traktataj laŭ specialaj reguloj. En tiaj kazoj ne estas protektata kia ajn „literatura” valoro, sed nur la lerteco, laboro kaj originaleco de la aŭtoro por kolekti kaj ordigi la materialon, kaj por kompili la koncernen verkon. Tre ofte, sed ne ĉiam, ankaŭ kondensigo de literatura arta verko – kun la permeso de la subjekto de la aŭtorrajto, kompreneble – por populara uzo aŭ por lernejoj ĝuas protekton, same tiel estas protektataj kolektoj de literaturaj aŭ artaj verkoj, ekzemple antologioj kaj enciklopedioj, se ili prezentas rezulton de sendependa intelekta laboro. Superflue diri, ke tio estas aparta aŭtorrajto, kiu en neniu senco povas tuŝi la rajton de la aŭtoroj, kies verkoj aperas en tia kolekto. Ĝis kiu grado povas iri la protekto montras la kazo de eĉ simpla komerca letero. En kelkaj landoj la ricevinto de tia letero rajtas ĝin montri al aliaj, sed ne rajtas kopii aŭ reprodukti ĝin sen permeso de la sendinto, ĉar la sendinto havas la aŭtorrajton.

Similaj objektoj de protekto estas la artaj kaj sciencaj kreaĵoj esprimitaj en parola formo: paroladoj, lekcioj, prelegoj k.s. La limo de protekto dependas de la konkreta enhavo. Stenogramo de parole eldirita teksto povas ĝui per si mem protekton, kiu apartenas al la stenografiisto pro lia lerteco.

„Artaj verkoj” inkluzivas ne nur pentraĵojn, skulptaĵojn, desegnaĵojn kaj arkitekturajn verkojn, sed ankaŭ ĉiaspecajn gravuraĵojn, fotojn, filmojn kaj produktojn de arta metio. Krome, estas protektataj ĉiuj artaj formoj produktitaj per sonoj, nome ĉiuj muzikaj verkoj. Necesas denove akcenti, ke ne la ideoj mem de tiuj verkoj estas objektoj de protekto, sed nur la konkreta originala formo, en kiu ili realiĝis. Sekve, la sama temo de literatura verko povas esti libere pritraktata de aliaj aŭtoroj en novaj originalaj formoj. La sama modelo, eĉ en la sama pozo, povas esti pentrita de alia artisto. La sama pejzaĝo povas esti denove fotita de kiu ajn. Foto de pentraĵo ĝuas sian propran protekton kiel originala verko, sed tio ne malhelpas, ke alia fotu la saman pentraĵon, eĉ el identa pozicio. Malpermesitaj estas nur la plagiatoj kaj aliaj misuzoj de la originalo per kopiado aŭ reproduktado.

La objekto de protekto etendiĝas tre vaste. En kazo de literaturaj kaj muzikaj verkoj ĝi inkluzivas ankaŭ kiun ajn publikan prezenton, aŭ utiligon de la koncerna verko por produkto de filmo. Aliflanke, se estas donita la necesa permeso, tiam la enscenigo de teatraĵo kaj la konkreta originala formo de aktorado, se fiksitaj skribe aŭ alimaniere klare determinitaj, aŭ la produktita filmo, estas per si mem objektoj de protekto.

Se iu verko estas produktita mekanike, ekzemple per gramofondisko aŭ magnetofona bendo, tiam la protekto rilatas ne nur al vendo, sed al publika prezento, nome al ludigo de la disko aŭ bendo publike. Kion signifas „publike”, estas alia demando, ofte komplika, kiun ne eblas trakti ĉi tie. Tutcerte tio rilatas al ludigo en publikaj lokoj kiel koncertetoj, kafejoj, restoracioj, dancejoj k.s., aŭ per radio kaj televido, sed tio ne rilatas al ludigo en la propra hejmo, eĉ por multaj gastoj.

Menciinda estas la tendenco etendi la protekton al legado kaj pruntado de libroj en publikaj bibliotekoj, tiel ke por ĉiu legado oni devas pagi sumeton al la rajtigito de la aŭtorrajto. Ŝajnas, ke tiu tendenco ne trovis favoran eĥon.

La subjekto de la aŭtorrajto, kun kelkaj esceptoj, estas la kreinto de la koncerna verko. Por la celoj de la traktata temo, aŭtoro estas la persono, kies laboro, scio, lerteco, talento aŭ gusto rezultigis la verkon. Ekzemple, en kazo de libro aŭ artikolo, la aŭtoro estas tiu, kiu konstruas la frazojn, el kiuj konsistas la libro aŭ artikolo. Se li diktas ilin al alia persono, kiu samtempe aŭ poste tajpas, tamen li estas la aŭtoro kaj ne la persono, al kiu la teksto estis diktita. Sed se iu nur donas ian ĝeneralan ideon pri la verko, kaj alia persono skribas ĝin, tiam la lasta estas konsiderata kiel aŭtoro. Se la sugestita ideo estis sufiĉe detale ellaborita kaj la alia persono faris notojn, surbaze de kiuj la verko poste estis produktita, verŝajne temos pri kunaŭtoroj. Aŭ alia ekzemplo: la kreinto de desegnaĵo estas tiu, kiu faris ĝin. Se libro estas ilustrita per desegnaĵoj kaj la ideoj per ili estas prenitaj el la enhavo de la libro, tamen ne la kreinto de la teksto, sed la desegnisto estas rigardata kiel aŭtoro de la desegnaĵoj.

Se pluraj personoj kontribuas al la kreo de iu verko, ili estas kunaŭtoroj. Specialaj reguloj rilatas al tiaj kazoj. Se unu persono skribis plurajn tekstojn kaj alia aranĝis ilin en formo de libro, la du povas esti rigardataj kiel kunaŭtoroj, depende de la konkretaj cirkonstancoj. Povas tamen okazi, ke la verkinto havas sian propran aŭtorrajton kaj la aranĝinto la sian. Ĉiu dependas de la demando ĝis kiu grado la aranĝado en ĉiu konkreta kazo povas esti rigardata kiel memstara intelekta kreado. Povas eĉ okazi, ke sole la aranĝinto havas la aŭtorrajton, dum la verkintoj de la tekstoj ne havas ilin. Ekzemple, la subjekto de aŭtorrajto en kazo de kompilaĵo de la speco „Kiu Estas Kiu?” estas la kompilinto kaj ne tiuj, kiuj efektive skribis la tekstojn pri si mem laŭ la demandaro de la kompilinto. En Britio antaŭ nelonge okazis, ke eĉ kompilinto de tabelo kun la plano pri la estontaj futbalaj matĉoj en la nacia konkurso – en tiu ĉi kazo la futbala asocio – sukcese postulis aŭtorecon, kaj la vetludaj kompanioj devas nun pagi kompenson por la rajto utiligi tiujn tabelojn en la ĉiusemajnaj futbalaj vetoj dum la sezono.

Oni certe rimarkis, ke en tiu ĉi lasta kazo la subjekto ne estas la personoj, kiuj efektive kompilis la tabelojn, sed la futbala asocio. Estas multaj jure identaj kazoj. Se, nome, iu persono estas dungita por fari difinitan intelektan laboron kaj se tiurilate ne ekzistas aparta kontrakto inter la dunginto kaj la dungito, la subjekto de la aŭtorrajto ne estas la intelekta kreinto, sed la dunginto de lia laboro. Tiaj kazoj estas precipe oftaj sur la kampo de diversaj esplorkomunikaĵoj en sciencaj institutoj kaj institucioj, sed ekzistas ankaŭ multaj esceptoj.

Por traduki protektatan verkon kutime necesas la konsento de la aŭtoro aŭ de la persono, kiu disponas pri la aŭtorrajto. Tiu konsento ne estas necesa laŭ la soveta juro.

Traduko postulas apartajn sciojn, talenton kaj laboron. Tial tradukinto posedas la aŭtorrajton rilate la tradukon, sed, kompreneble, la aŭtoro de la verko plue konservas siajn rajtojn rilate la originalon. La sama principo aplikiĝas al transformado de noveloj aŭ romanoj en dramojn, aŭ inverse, kaj de ĉiuj ĉi en filmojn.

Rilate la tradukojn vere interesa kazo estis juĝita antaŭ la milito de angla kortumo. Temis pri tio, ke mediumo postulis aŭtorecon de traduko diktita al li, laŭ lia propra aserto, de spirito, kiu mortis antaŭ ĉ. 2.000 jaroj. La kortumo konstatis, ke la libro estis skribita en tre malnova angla lingvo, tute malsama de la tiutempa, kaj sekve decidis, ke la aŭtorrajto por la „traduko” apartenas al la mediumo. Tio neniel implicis, ke la kortumo rekonis la ekziston de spirito. La alia partio ne konsentis, ke la libro originas de spirito, sed nur konstatis la aŭtorecon. Ĉar laŭ la angla juro la juĝistoj juĝas nur surbaze de faktoj kaj postuloj prezentitaj de la partioj, kaj ne rajtas fari proprainiciate pliajn esplorojn pri faktoj por eltrovi la t.n. materian veron, kiel tio okazas en aliaj juraj sistemoj, la juĝisto en tiu ĉi kazo faris konforman decidon.

Subjekto de aŭtoraj rajtoj en kazo de prelegoj, lekcionoj, paroladoj kaj aliaj formoj de parolarto, estas la persono, kiu eldiris ilin.

Kiel aŭtoro de pentraĵoj, skulptaĵoj, fotoj, gravuraĵoj kaj desegnaĵoj estas konsiderata la persono, kies arta krea laboro produktis la koncernan verkon. En la kazo de fotografaĵoj la aŭtoro ne ĉiam estas la persono, kiu faris la foton, sed kutime tiu, kiu proprietas la negativon. Se verko de pentroarto kaj aliaj figuraj artbranĉoj, inkluzive fotadon, estas speciale kaj eksplicite mendita, tiam la aŭtorrajto kutime apartenas al la mendinto, kondiĉe ke ne ekzistu kontraŭa interkonsento inter la mendinto kaj la verkinto. Se la mendo ne estas specifa, sed ĝenerala, tiam la aŭtorrajto apartenas al la verkinto. Ekzemple, en kazo de mendo de difinitaj fotoj pri iu kongreso, kunveno, geedziĝo aŭ simile, la aŭtorrajto apartenas al la mendinto, sed se oni nur interkonsentis, ke la fotisto faru fotografaĵojn laŭ sia bontrovo kaj poste vendu ilin je sia risko, li estas la subjekto de la aŭtorrajto.

V. Rajtoj kaj Daŭro

La fundamentaj rajtoj de la aŭtoroj logike sekvas el la ligiteco inter la konceptoj de subjekto kaj objekto de la protekto. Ili estas divideblaj je du ĉefaj grupoj: personaj-moralaj kaj materiaj-ekonomiaj.

La personaj konsistas el la rajto je aŭtoreco kaj rajto je integreco de la intelekta produkto. Kutime, tiuj personaj rajtoj ne estas fordoneblaj.

La materiaj rajtoj konsistas el ekonomiaj avantaĝoj, kiuj apartenas al la aŭtoro aŭ al alia subjekto de la aŭtorrajto, kiun, en tiu ĉi kunteksto kaj kun rezervoj, oni povas nomi proprietulo de la aŭtorrajto. Tiuj ĉi materiaj rajtoj estas fordoneblaj kaj alproprigeblaj de aliaj ĉu per kompenso, ĉu sen kompenso, pri kio decidus la proprietulo de la rajto.

La distingo inter du grupoj estas grava ankaŭ rilate la daŭron. La daŭro de la personaj rajtoj ne estas limigita en la tempo. Kripligo de verko, kies materia protekto ĉesis jam delonge, tamen estas malpermesita. Male, kun la escepto de kelkaj kazoj de senlima daŭro (Nikaragvo, Gvatemalo, Portugalio), la diversaj ekonomiaj rajtoj estas tempe limigitaj. La daŭro varias de lando al lando kaj, en la sama lando, ankaŭ depende de la protektata objekto, sed kutime ĝi estas 50 jarojn post la morto de la aŭtoro ekde la publikigo de la verko.

Plua ĝenerale rekonita principo estas, ke nombro da agoj rilate la verkon sub protekto ne estas konsiderataj kiel malobservoj de la aŭtorrajto. Tiuj agoj povas esti mallonge resumitaj en regulo, ke ĉiu ajn lojala utiligo de iu verko por la celoj de privataj studo, esploro, kritiko, recenzo, gazetara resumo, persona amuziĝo k.s., estas permesitaj. Estas maleble abstrakte difini kion precize signifas „lojala utiligo”. La respondo al tiu demando kaj al tuta aro da detaloj, precipe koncerne la daŭron kaj formon de la protekto, donas la leĝoj kaj la kortuma praktiko de ĉiu unuopa lando.

Kiel oni vidas, ekzistas sur tiu ĉi kampo kelkaj bazaj juraj principoj, rekonitaj en la tuta civilizita mondo, sed ekzistas ankaŭ granda nombro da reguloj, kiuj malsamas de lando al lando. Komparante la internajn jurojn de diversaj ŝtatoj, oni tamen trovas, ke ankaŭ multaj detaloj de la aŭtora juro estas identaj aŭ similaj en grupoj da landoj, kaj en tiu senco oni povas paroli pri kelkaj sistemoj de aŭtorrajtoj. Tri el ili altiras apartan atenton: la kopirajta, evoluinta precipe en Britio kaj Usono, la Eŭropa kontinenta kaj la Soveta.

La **Brita kopirajta sistemo** estas grava ne nur pro sia historia evoluo kaj pro sia propra interna jura valoro, sed ankaŭ pro la fakto, ke ĝi multrilate servis kiel modelo por aliaj landoj, kiuj dum longa tempo estis sub la influo de la angla juro.

Kiel dirite, nuntempe en Britio la aŭtorrajto estas reguligita en la Kopirajta Akto de 1956 kun la postaj aldonoj. La nova leĝo rilatas al ĉiuj literaturaj, teatraj, muzikaj kaj artaj verkoj, al kinfilmoj, mekanikaj sonregistraĵoj, televido kaj radio.

La personoj kvalifikitaj je protekto estas ĉiuj britaj civitanoj aŭ la t.n. protektataj personoj, la civitanoj de la Irlanda Respubliko, ĉiuj personoj kun domicilo en Britio aŭ loĝantaj tie, iu alia persono, al kiu laŭ la leĝo aplikigas ĝiaj preskriboj.

La Kopirajto daŭras dum la vido de la aŭtoro kaj 50 jarojn ekde la finiĝo de la jaro, en kiu la aŭtoro mortis. En kazo de gravuraĵo, se ĝi ne estis publikigita dum la vivo de la aŭtoro, la daŭro estas 50 jarojn ekde la finiĝo de la jaro de la publikigo. Se temas pri fotografiaĵoj, la kopirajto en ĉiu okazo daŭras 50 jaroj ekde la finiĝo de la jaro, en kiu la koncerna fotoĵo estis publikigita. La leĝo donas klarajn difinojn de diversaj terminoj. Ekzemple, „gravuraĵo” signifas ankaŭ ĉiun ajn litografajon, artpresaĵon aŭ similan verkon, kiu ne estas fotografiaĵo; kiel aŭtoro de la fotografiaĵo estas konsiderata la proprietulo de la materialo, sur kiu ĝi estis farita en la momento de la fotado ktp.

La leĝo entute estas tre detala kaj preciza. Ĝi donas efikan protekton ne nur al la supre menciitaj „kvalifikitaj personoj”, sed ankaŭ al la civitanoj de ĉiuj aliaj landoj, apartenantaj al la Berna Konvencio aŭ partioj de la Universala Konvencio de UNESKO, ĉar Britio ratifis ambaŭ kaj adaptis sian kopirajtan juron al la postuloj de la du konvencioj.

En **Usono** la unua leĝo pri aŭtorrajto – tiu de 1790 – rilatis nur al libroj, planoj, mapoj kaj similaj presaĵoj. La leĝo de 1802 vastigis la protekton al gravuraĵoj, artpresaĵoj kaj desegnaĵoj, dum la leĝo de 1831 etendis ĝin ankaŭ al muzikaj verkoj. Sekvis la leĝoj de 1870 kaj 1897, kiuj enkondukis la registradon de la kopirajtaj verkoj, kaj tiucele estis fondita aparta Kopirajta Oficejo en la kadro de la Biblioteko de la Kongreso. Originale, laŭ la leĝo de 1831, la daŭro de la kopirajto estis 28 jarojn

kun la ebleco longigi ĝin al pliaj 14 jaroj, sed nur en kelkaj kazoj. En 1909 tiu dua periodo estis longigita de 14 al 28 jaroj en strikte limigitaj kazoj: postmortaj verkoj aŭ periodaĵoj aŭ kompilaĵoj; kopirajtoj de asocioj aŭ korporacioj; kopirajtoj de mendintoj, por kiuj la koncernaj verkoj estis faritaj por pago. La tuta materialo estis fine kodigita en la Kopirajta Akto de 1947.

Unu el la gravaj karakterizoj de tiu leĝo estas, ke la daŭro de la protekto estas relative mallonga. Krome, por akiri la aŭtoran rajton necesas la registriĝo en la Kopirajta Oficejo kaj la verko devas esti ellaborita en Usono. Tio kaŭzis malkontenton precipe en la samlingva Britio, ĉar ĉiu usona aŭtoro povis per la unua aŭ simultana – en la daŭro de maksimume 15 tagoj – publikigo de sia verko en Britio aŭ en kiu ajn lando de la Berna Unio akiri kopirajton por periodo multe pli longa ol en la propra lando mem. Tio signifis ke usonaj aŭtoroj ricevadis kompensojn en Britio por verkoj, kiuj jam delonge ĉesis ĝui aŭtorrajtan protekton en Usono mem.

Post la subskribo kaj ratifo de la Universala Konvencio de 1952, kiu por Usono ekvalidis la 16-an de septembro 1955, la Akto de 1947 estis amendita konforme al la postuloj de tiu Konvencio kaj de pluraj interkonsentoj inter Usono kaj aliaj ŝtatoj. Rezulte la postuloj rilate la presigon en Usono, registriĝon, deponon de ekzempleroj kaj aliajn formalizaĵojn ne plu validas por la verkoj protektataj de la Universala Konvencio aŭ de apartaj interkonsentoj, subskribitaj de Usono. La amendoj de 1954 konsiderinde vastigis la protekton de alilandaj aŭtoroj kaj iliaj verkoj en Usono.

Sur la eŭropa kontinento **Francio** certe estas la lulilo de la aŭtorrajta juro. Ankaŭ ĝi havis longan historian evoluon. Nuntempe validas la Leĝo pri Literatura kaj Arta Proprieto de la 11-a de marto 1957. La Leĝo rekonas al la aŭtoro, surbaze de la ago mem de lia intelekta kreado, la ekskluzivan kaj absolutan nematerian, senkorpan proprieton je la kreita verko. La senco de la leĝo estas, ke la personaj aŭ moralaj rajtoj ne estas fordoneblaj en kiu ajn senco, kio signifas ke ili ne povas esti akiritaj de aliaj personoj, sed tio ne signifas, ke la juraj heredantoj ne rajtas utiligi ilin por protekti la nomon, dignon kaj honoron de la aŭtoro post lia morto kaj la integrecon de lia verko. Estas eble proprieti nur la materian elementon de la rajto kaj pri tiu elemento la proprieto de la aŭtorrajto povas libere disponi.

Francio estas membro de la Berna Unio kaj partio de la Universala Konvencio de 1952. Ĝia nuna leĝo estas konforma al la preskriboj de ambaŭ aktoj kaj tial ankaŭ Francio donas vastan protekton al alilandaj aŭtoroj kaj al verkoj kreitaj en aliaj landoj, ĉio surbaze de la principoj de la du konvencioj.

En **Soveta Unio** la aŭtora juro estis pli frue entenata aŭ en specialaj leĝoj aŭ en la civilaj kodoj, depende de la respublikoj. Nuntempe la bazaj reguloj troviĝas en la t.n. Fundamenta Principaro de Civila Juro de USSR kaj de la Uniaj Respublikoj de decembro 1961, kiel ankaŭ en apartaj ĉapitroj de la respublikaj civilaj kodoj, konforme al la bazaj reguloj.

Laŭ tiuj leĝoj la protekto rilatas al verkoj de scienco, artoj kaj literaturo, publikigitaj aŭ ankoraŭ nepublikigitaj, sed jam konkretiĝintaj en rekonebla formo. La leĝo protektas la aŭtorojn de la verkoj publikigitaj la unuan fojon en Soveta Unio, aŭ troviĝantaj en iu objektiva (konkreta) formo sur la teritorio de Soveta Unio, senkonsidere al la ŝtataneco de la aŭtoro. Plue, laŭ la soveta juro, estas protektataj

ankaŭ la verkoj de sovetaj civitanoj, publikigitaj la unuan fojon en eksterlando aŭ troviĝantaj tie en iu objektiva formo, eĉ se ili ne estas publikigitaj. En ĉiuj aliaj kazoj la protekto efektiviga nur surbaze de internaciaj interkonsentoj, kutime kulturaj konvencioj.

Soveta Unio aliĝis nek al la Berna Konvencio, nek al la Universala Konvencio de UNESKO, kio signifas, ke eksterlandaj aŭtoroj kaj iliaj verkoj ne estas protektataj, se ili ne publikigas siajn verkojn unue en Soveta Unio, aŭ se tiuj verkoj ne troviĝas tie en iu konkreta formo. Plue, kiel jam menciite, traduko de iu verko ne estas malobservo de aŭtorrajto, senkonsidere al la demando ĉu la originalo estis unue publikigita en la lando aŭ eksterlande, ĉu la aŭtoro estas soveta civitano aŭ ne. Tio faras la neprotektitan kampon treege granda kaj tio speciale sentiĝas en la rilatoj de Soveta Unio kun la landoj havantaj similan soci-politikan strukturon. Tial, en la kadro de scienca kaj ĝenerale kultura kunlaborado inter Soveta Unio kaj la menciitaj landoj, estis subskribitaj pluraj konvencioj, kiuj enhavas ankaŭ regulojn pri reciproka protekto de la aŭtorrajtoj. En 1956 Soveta Unio subskribis tiaspecajn konvenciojn kun Albanio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Orienta Germanio, Hungario, Norda Koreo, Mongolio, Pollando, Rumanio, P.R. Ĉinio, Norda Vietnamio kaj Jugoslavio.

La ĉefaj rajtoj de la aŭtoro estas: (i) publikigi, reprodukti aŭ cirkuligi sian verkon sub sia nomo, sub pseŭdonimo aŭ anonime; (ii) ricevi kompencon por la utiligo de la verko fare de aliaj personoj; (iii) malpermesi kiun ajn ŝanĝon. Tio estas nur la ĝeneralaj principoj. En pluraj kazoj aliaj personoj povas utiligi la verkon sen la konsento de la aŭtoro, ĉu kun deviga pago de kompenso, ĉu senkompenso, sed en ĉiu okazo kun la deviga mencio de lia nomo.

Sen la konsento de la aŭtoro, sed kun pago de kompenso, oni rajtas, ekzemple, publike prezenti iun verkon; mekanike registri verkon kun la celo publike reprodukti ĝin en formo de filmo, gramofondisko, sonbendo k.s.; utiligi literaturajn tekstojn por komponi muzikaĵojn kun tekstoj.

Sen la konsento kaj sen pago de kompenso, sed kun mencio de la aŭtoreco, oni rajtas utiligi ies verkon por krei novan, krei sendependan verkon, kun la escepto de transformado de fikcia verko en dramon, aŭ inverse, k.s.; reprodukti en sciencaj kaj kritikaj verkoj en la limoj difinitaj de la leĝo; informadi en la gazetaro aŭ filmĵurnaloj, per radio aŭ televido pri la publikigitaj verkoj kun citaĵoj el ili, aŭ pri publikaj paroladoj kaj raportoj; reprodukti per kiu ajn metodo, kun la escepto de mekanika kontakta kopiado, verkojn de arto en publikaj lokoj. Tiu lasta permeso tamen ne koncernas artaĵojn en ekspozicioj, muzeoj aŭ galerioj.

Principe, la aŭtorrajto apartenas al la verkinto dum la daŭro de lia vivo, sed la respublikaj leĝoj povas mallongigi la daŭron en iuj kazoj. Post la morto de la aŭtoro, la rajto transpasas al la heredantoj aŭ aliaj personoj rajtigitaj de la leĝo por periodoj difinitaj en la kodoj, kutime 15 jarojn ekde la 1-a de januaro de la jaro, en kiu la aŭtoro forpasis. Se la aŭtorrajto apartenas al organizaĵo, la daŭro estas senlima, kaj se la organizaĵo estas likvidita, la aŭtorrajto pasas al la ŝtato senlime.

Fine, estas menciinde, ke en Soveta Unio la ŝtato rajtas devige elaceti la aŭtorrajton ĉu de la aŭtoro ĉu de liaj heredantoj, laŭ speciala proceduro. Krome, la ŝtato povas monopoligi la rajton traduki en la rusan lingvon verkojn publikigatajn

en aliaj lingvoj ĉu sur la teritorio de la RSFSR ĉu ekster ĝiaj limoj. Similaj preskriboj troviĝas en la kodoj de aliaj respublikoj.

Estas evidente, ke pro la ekonomia kaj soci-politika strukturo de Soveta Unio la monopolo de la ŝtato sentiĝas tre forte ankaŭ en la sfero de la aŭtorrajto.

VI. Internacia Protekto

Kiel vidiĝas el la tuta historia eveoluo de la aŭtora juro kaj el la leĝoj de diversaj landoj, ĉiu ŝtato unuavice protektis kaj protektas siajn proprajn civitanojn kaj la verkojn unue publikigitajn sur sia propra teritorio senkonsidere al la ŝtatanco de la aŭtoro. Tiun gravan malplenen, kiu kaŭzis, ke grandega nombro da aŭtoroj kaj amaso da verkoj estis sen protekto, oni komencis sufiĉe frue plenigadi per interŝtataj konvencioj, kiuj garantiis protekton surbaze de reciprokeco kaj tiel almenaŭ parte mildigadis la malbonon. Sentiĝis, tamen, ĉiam pli urĝe, ankaŭ la bezono reguligi la tutan aferon per kolektivaj interkonsentoj, al kiuj povas aliĝi ĉiuj aŭ almenaŭ kiel eble plej multaj ŝtatoj, tiel ke ĉiu aŭtoro, senkonsidere al sia ŝtataneco, kaj ĉiu verko, tute egale kie ĝi estis unue produktita, estu protektataj en aliaj landoj. Tiun celon grandparte atingis la t.n. Berna Konvencio, la Tutamerika Konvencio por la Okcidenta Hemisfero kaj la Universala Konvencio de UNESKO.

La **Berna Konvencio** pri aŭtorrajtoj estis subskribita en la jaro 1886. Entute partoprenis la Konferencon nur 9 ŝtatoj: Belgio, Francio, Germanio, Haitio, Italio, Hispanio, Svislando, Tunizio kaj Unuigita Reĝlando. Tiuj ŝtatoj, kunvenintaj en Bern, akceptis konvencion kaj decidis organiziĝi en aparta unio, konata kiel la Berna Unio. Poste la Konvencio estis plurfoje kompletigita kaj reviziita, ĉar necesis adapti ĝin al la novaj bezonoj de internaciaj kulturaj interŝanĝoj. La lasta revizio okazis en Bruselo la 26-an de junio 1948, pro kio la Konvencio estas ofte nomata ankaŭ „Brusela Konvencio”. Paralele, al ĝi aliĝadis aliaj ŝtatoj. Nuntempe al la Berna Unio entute apartenas ĉ. 30 ŝtatoj, sed nek Usono nek Soveta Unio troviĝas en ĝi. La Bruselan Konferencon partoprenis ankaŭ kelkaj ŝtatoj el orienta Eŭropo: Ĉeĥoslovakio, Hungario, Pollando kaj Jugoslavio.

La Berna Konvencio kiel fine reviziita en Bruselo prezentas altan nivelon de protekto de la aŭtoraj rajtoj en la landoj, apartenantaj al la Unio. Ĝi protektas ĉiujn rajtojn de aŭtoroj koncerne iliajn literaturajn kaj artajn verkojn, senkonsidere al la formo en kiu ili esprimiĝas. Sekve, estas protektataj literaturaj, sciencaj kaj artaj libroj, broŝuroj kaj skribaĵoj; lekcionoj, prelegoj, paroladoj kaj aliaj verkoj de la sama speco; teatraĵoj kun aŭ sen muziko; koreografiaj verkoj, enscenigoj kaj aktorado difinitaj skribe aŭ alimaniere; muzikaj komponaĵoj kun aŭ sen vortoj; kinofilmoj kaj verkoj produktitaj en maniero analoga; verkoj de pentroarto, arĥitekturo, desegnado, skulptoarto, gravurado kaj litografio; fotoverkoj kaj verkoj produktitaj analoge; ĉiuj verkoj de aplikitaj artoj; ilustraĵoj, geografiaj mapoj, planoj, skizoj aŭ plastikaj verkoj pri geografio, topografio, arĥitekturo aŭ scienco. Same tiel estas protektataj la tradukoj, adaptoj, rearanĝoj k.s., ĉio, kompreneble, post la konsento de la aŭtoro de la originala verko. La Konvencio protektas la personajn kaj materiajn rajtojn de la aŭtoroj. La daŭro estas etendita al la vivo de la aŭtoro kaj 50 jarojn post lia morto. La

membroj de la Unio konsentis protekti sen formalaĵoj ĉiujn nepublikigitajn verkojn de la civitanoj de aliaj ŝtatoj kaj ĉiujn verkojn unue publikigitajn en kiu ajn ŝtato de la Unio. La oficejo de la Internacia Unio por Protekto de Literaturaj kaj Artaj verkoj troviĝas en Svislando. Ĝia ĉefa celo estas prizorgi la observon de la Konvencio, kolekti ĉiaspecajn informojn en ligo kun la Konvencio kaj doni la necesajn sciigojn al la ŝtatoj-membroj. La oficiala lingvo de la oficejo estas la franca: unu el maloftaj kazoj de unusola oficiala lingvo. La membroj de la Unio proporcie kontribuas por la elspezoj de la oficejo. En la praktiko la Konvencio rigore aplikiĝas kaj donas tre kontentigajn rezultojn

La t.n. **Tutamerika Konvencio** estis subskribita en Buenos Aires en 1910. Al ĝi povas aliĝi nur la ŝtatoj de ambaŭ Amerikoj. La Konvencio preskribas, ke la aŭtoroj, civitanoj de kiu ajn el la kontraktintaj partioj, kiuj ĝuas aŭtorrajton en sia propra lando, havos en ĉiu alia Ŝtato-Membro de la Konvencio la samajn rajtojn, kiel la civitanoj de ĉiu alia ŝtato. Entute 17 ŝtatoj, inkluzive Usonon, aliĝis al tiu Konvencio.

Kvankam granda nombro da civilizitaj nacioj apartenas al la Berna Unio kaj sufiĉe granda nombro da ŝtatoj aliĝis al tiu de Buenos Aires, dum pluraj ŝtatoj aliĝintaj al la menciitaj du Konvencioj, aŭ ekster ili, havas apartajn interkonsentojn pri la reciproka protektado de la aŭtoraj rajtoj, tamen ne ekzistis la tutmonda konvencio, kiu difinus egalajn ĝeneralajn principojn, aplikeblajn ĉie. Tial jam en 1947 UNESKO iniciatis la ellaboron de precize tia Konvencio. En la Sekretariato mem de tiu Organizaĵo estis formita en 1948 aparta fako, kies celo estis kolekti la materialon por la necesaj preparlaboroj. Fine, konforme al la decidoj de la Ĝenerala Konferenco en Parizo en 1952 – la sama, kiu akceptis la Peticion favore al Esperanto kaj komisiis la sesion de Montevideo fintrakti ĝin – la Ĝenerala Direktoro de UNESKO kunvenigis en Ĝenevo, laŭ la invito de la svisa registaro, Konferencon kies tasko estis akcepti la tekston de Universala Aŭtorrajta Konvencio. Entute partoprenis 50 ŝtatoj, inter kiuj Britio, Francio, Usono kaj Jugoslavio el Orienta Eŭropo. Ne partoprenis Soveta Unio, P.R. Ĉinio kaj pluraj aliaj grandaj kaj malpli grandaj ŝtatoj.

Necesas tuj diri, ke la celo de la **Universala Konvencio** ne estis kaj ne estas forigi aŭ anstataŭigi la Bernan Konvencion aŭ aliajn interkonsentojn rilate la aŭtorrajton. Ĝia celo de la komenco estis krei tiel larĝan kadron de ĝeneralaj principoj kaj reguloj, kiuj povus esti akceptitaj de ĉiuj ŝtatoj, tute egale ĉu ili estas jam membroj de la Berna Unio, aŭ de la Tutamerika Konvencio aŭ de kiu ajn alia grupiĝo. Sekve, la Berna Konvencio restas valida por ĉiuj membroj de la Unio, sed la Universala Konvencio estas valida kaj por la membroj de la Berna Unio, kiuj ratifis la Universalan Konvencion, kaj por ĉiuj aliaj ratifintoj. La preskriboj de la Universala Konvencio estas pli ĝeneralaj ol tiuj de la Berna, kio ebligis al multaj ŝtatoj, unuavice al Usono, ratifi ĝin, kvankam ili ne estas membroj de la Berna Unio.

La Konvencio konsistas el 17 artikoloj. Al ĝi estas aldonita unu rezolucio kaj 3 protokoloj kun diversaj precizigoj. Ĝi jam delonge ekvalidis konforme al la art. 9. El lingva vidpunkto estas interese menci, ke la angla, franca kaj hispana tekstoj estas aŭtentikaj, sed ke la Sekretariato de UNESKO devis fari tekstojn en la germana, itala kaj portugala, kiuj estas konsiderataj kiel oficialaj (art. 16).

La esenca principo de la Konvencio estas, ke ĝi donas internacian protekton al aŭtorrajto en kiu ajn lando aliĝinte. Laŭ la art. 2 de la Konvencio distingo estas farita inter publikigitaj kaj nepublikigitaj verkoj. La publikigitaj verkoj de civitanoj de kiu ajn aliĝinta ŝtato ĝuas en ĉiu alia aliĝinta ŝtato la saman protekton, kiun ĝuas ĝiaj civitanoj. Plue, nepublikigitaj verkoj de civitanoj de ĉiu aliĝinta ŝtato ĝuas la saman protekton en kiu ajn alia aliĝinta ŝtato, kiel ĝiaj propraj civitanoj. Do, la civitanoj de ĉiuj aliaj ŝtatoj-partioj de la Konvencio estas egaligitaj rilate la aŭtorajn rajtojn al la propraj civitanoj. La daŭro de la aŭtorrajto etendiĝas al la vivo de la verkinto kaj minimume 25 jarojn post lia morto. Grava estas ankaŭ la art. 3 de la Konvencio, laŭ kiu la sola formalajo por ĝuo de la protekto estas, ke la verko havu la signon c en malgranda cirklo kun indiko de la proprietulo de la aŭtorrajto kaj la jaro de la unua publikigo montrita en tia maniero kaj sur tia loko, ke ne povu esti dubo pri la postulata aŭtorrajto. Por la celoj de la Konvencio, ĉiuj aliaj postuloj laŭ la internaj leĝoj de la aliĝintoj, ne validas. Krome, se la minimumaj preskriboj de la Konvencio estas kontraŭaj al internaciaj interkonsentoj, validaj estas la reguloj de la Konvencio.

Aparta Komitato en la sino de UNESKO havas la taskon studi ĉiujn problemojn en ligo kun la aplikado kaj funkciado de la Konvencio. Ĝi konsistas el la reprezentantoj de 12 ŝtatoj. La membroj estas nomataj por 6 jaroj, sed ĉiun duan jaron oni reelektas unu trionon.

Kvankam kvindeko da ŝtatoj aliĝis en tiu aŭ alia formo al la Universala Konvencio, tamen multaj ankoraŭ troviĝas ekster ĝi kaj tial ĝi ne estas deviga por ili. Tio signifas, ke, malgraŭ la longaj klopodoj ĝeneraligi la protekton de la aŭtoraj rajtoj, tamen en multaj mondopartoj tiun protekton ĝuas nur la civitanoj de la koncernaj ŝtatoj aŭ la verkoj unue publikigitaj en tiuj ŝtatoj, sed ne la aliaj aŭtoroj. La malutilo kaj por la aŭtoroj kaj el la vidpunkto de justeco en la kulturaj interŝanĝoj, estas evidenta kaj bedaŭrinda.

Aliflanke, oni devas ne forgesi, ke per la Universala Konvencio de UNESKO estas, malgraŭ ĉio, farita granda paŝo antaŭen. Nombro de ŝtatoj, kiuj pli frue apartenis al neniu kolektiva interkonsento, aliĝis al la Konvencio kaj tiamaniere ebligis la teritorian vastigon de la jura protekto de la aŭtorrajtoj, senkonsidere al la nacieco de la aŭtoro kaj al la loko de publikigo de lia verko. Ĉar la Konvencio estas malfermita por aliĝo de kiu ajn ŝtato, tute egale ĉu ĝi estis reprezentita en Ĝenevo aŭ ne, oni povas nur esperi, ke kun la tempo ankaŭ aliaj ŝtatoj aliĝos al ĝi, tiel ke ĝi prave portos la nomon „Universala” kaj protektos ĉie en la mondo la fundamentajn rajtojn de la aŭtoroj ne nur en ilia intereso, sed ankaŭ en tiu de la ĝenerala kultura progreso. Tio faciligos la kulturajn interŝanĝojn, helpos al evoluigo de la kulturaj rilatoj inter la popoloj, kontribuos al kulturo ĝenerale, kiu, certe ne estas afero nur de la aŭtoroj, nek posedaĵo ekskluzive de unuopaj nacioj, sed ankaŭ – en la mondo de hodiaŭ kaj ankoraŭ pli en tiu de morgaŭ – havaĵo de la tuta homaro.

KOMPARAJ INFORMOJ PRI LA POZICIO DE ADVOKATO EN SOVETA UNIO KAJ JUGOSLAVIO

1. Nocio

En Soveta Unio la privata advokateco estis abolita, kune kun la antaŭrevoluciaj kortumoj kaj la malnova prokurora institucio, per la Dekreto pri la Kortumoj N-ro 1. Dum kelka tempo ĉiu ajn negockapabla civitano povis esti ĉu akuzanto, ĉu defendanto antaŭ la kortumoj. Sed jam en marto 1918, per la Dekreto pri la Kortumoj N-ro 2 estis antaŭvidite, ke ĉe la sovetoj de deputitoj formiĝos specialaj kolegioj de personoj, sin dediĉantaj al jura reprezentado. Tiuj kolegioj de juraj reprezentantoj estis organizitaj kiel organoj de kolektiva akuzado kaj defendado. Tamen, plue restis la rajto de la plenaĝaj civitanoj, troviĝantaj eĉ hazarde en la kortuma salono, ekstari kiel akuzantoj aŭ defendantoj en la proceso. La kolegioj de juraj reprezentantoj konsistis grandparte el malnovaj advokatoj, kiuj ne povis „forĵeti la antaŭajn praktikon, kutimojn kaj metodojn de laboro de la malnova advokateco”, kiel diris Lenin. En 1920, per la Dekreto de la 21-a de oktobro la juraj reprezentantoj estis definitive abolitaj kaj la tasko de persekutado estis disigita de la tasko defendi. Laŭ tiu Dekreto la kortumoj havis la rajton alvoki kiel defendantojn nur tiujn personojn, kiuj havis fakan juran scion. Estis faritaj specialaj listoj de tiaj personoj. Efektive, ili ne okupiĝis profesie pri defendado, sed laboris kiel oficistoj en diversaj institucioj kaj entreprenoj. Kiam ili estis vokitaj defendi antaŭ kortumo, la ĉefoj de la oficejoj devis liberigi ilin de la laboro, por ke ili povu reprezenti la defendon antaŭ la kortumo. Ankaŭ la juraj konsultistoj de diversaj departementoj de justico en la sovetoj povis esti, se necese, vokitaj plenumi tiun funkcion. Same tiel oni permesadis al la reprezentantoj de la sindikatoj, al kiuj apartenis la kulpigito, kaj al liaj plej proksimaj parencoj, funkcii kiel defendantoj en tiu konkreta kazo.

En 1922, samtempe kun la reorganizo de la kortuma sistemo, estis fondita ankaŭ la soveta advokateco. La Regularo pri Advokateco de 1922 starigis la ĝeneralajn principojn pri la funkcioj de advokatoj kaj preskribis la kondiĉojn por fariĝi advokato. Interalie estis postulate: jura eduko aŭ minimume dujara praktikado pri juraj aferoj. La honorario devis esti pagita laŭ la financaj eblecoj de la kliento aŭ laŭ fiksita tarifo. La laboro efektiviĝadis aŭ en specialaj konsultaj oficejoj, kie la advokatoj laboris kolektive, aŭ individue en privata oficejo. Sed tiu ĉi dua formo estis konsiderata kiel nekonforma al la nova reĝimo, ĉar ĝi montris aron da „negativaj trajtoj”, inter kiuj

estis speciale akcentita „la malebleco de regula kaj ĉiutaga kontrolado de la laboro de la advokato” (V. Turin). Tial tiu ĉi „privata” formo de laboro estis baldaŭ detruita kaj la tuta aktiveco de la advokatoj estis devige centrigita en la „juraj kolektivoj”. La prezentitan staton firmigis la nova Regularo pri la Advokateco entenita en la Dekreto de la 16-a de aŭgusto 1939, surbaze de kiu la soveta advokateco estas organizita kaj funkcia ankaŭ hodiaŭ. Nun estas atendata nova Regularo, sed ĝi tre verŝajne ne alportos iajn esencajn ŝanĝojn.

En Jugoslavio la advokateco kiel institucio neniam estis formale abolita, kiel tio okazis tuj post la Rusa Revolucio. Post la milito, kvankam multaj malnovaj advokatoj estis senigitaj de la rajto praktiki, tamen la advokateco kiel tia ne estis abolita. En novembro 1944 la tiama registaro nomis po unu t.n. „delegiton” en ĉiu el la tiam ekzistantaj advokataj ĉambroj kaj komisiis ilin „purigi la profesion” de nedezirindaj elementoj. En decembro de 1946 estis publikigita la unua Leĝo pri Advokateco, kiu celis organizi la advokatecon en Jugoslavio, se ne tute, do almenaŭ grandparte laŭ la soveta modelo. Tio vidiĝas klare el la fundamenta koncepto pri la rolo de la advokato. Laŭ la soveta teorio, la advokateco estas difinita kiel „publika funkcio” aŭ kiel „funkcio de ŝtata reprezentado de la rajtoj kaj laŭleĝaj interesoj de la unuopaj civitanoj, kiuj rolas kiel kulpigitoj, akuzantoj kaj akuzitoj en la kriminala kaj civila procesoj”. En Jugoslavio, laŭ la ekspliko al la menciita leĝpropono, la advokateco estis difinita kiel „speciala socia funkcio” aŭ kiel „publika funkcio”, „kiel funkcio de helpo al la ŝtataj organoj”. Viŝinski asertis, ke la advokato devas posedi „altan komprenon de politika respondeco, altan politikan kvalifikon”. Laŭ li, la advokato devas prezenti sian starpunkton „ne en la intereso de la kliento, sed pro la intereso de la socialisma konstruo, pro la intereso de nia ŝtato”. Laŭ Hrnčević, tiama prezidanto de la Supera Kortumo de Jugoslavio, la advokatoj „devas konformiĝi al la ĝeneralaj etikaj principoj, al la etiko de la socialista homo kaj de la socialisma socio” kaj lia tasko estas „kontribui al la konsolidiĝo de la socialisma ordo”, nome de tiu reĝimo, kiu tiam ekzistis en Jugoslavio.

La leĝo de 1946 intencis proksimigi la jugoslavian advokaton al la soveta ankaŭ rilate la kolektivitan laboron. Estis antaŭvidite, ke la advokatoj povos praktiki aŭ individue en privataj oficejoj, aŭ komune en la t.n. „libervolaj advokataj kolektivoj”, do precize kiel laŭ la soveta Regularo de 1922. Tamen, la kolektiva laboro ne enkondukiĝis en la praktikon kaj la advokateco en Jugoslavio plue restis individua okupo en privataj advokataj oficejoj. La jugoslavaj advokatoj montris tian reziston al kolektivigo, ke eĉ en 1955 Hrnčević plendis, ke „nia advokateco estas ankoraŭ privata profesio de la malnova tipo, grandparte tia, kia ĝi estis en la malnova Jugoslavio”. Nuntempe la jugoslavia advokateco estas bazita sur la Leĝo pri la Advokatoj de aprilo 1957, kiu denove malproksimigis la profesion de la soveta advokateco.

En Jugoslavio, same kiel en Soveta Unio, la advokateco estas plue konsiderata kiel „publika servo”, kies tasko estas doni juran helpon al la civitanoj, institucioj, organizaĵoj kaj entreprenoj. La helpo konsistas en donado de konsiloj, reprezentado de la partioj antaŭ la kortumoj kaj aliaj ŝtataj organoj, kunmetado de petskriboj, plendoj, kontraktoj kaj aliaj dokumentoj. Ĝis tiu ĉi punkto la funkcio de advokato en la du landoj estas preskaŭ identa, sed ĉio alia estas nun malsama. La ĉefa diferenco

estas, ke en Soveta Unio la laboro de la advokatoj estas kolektiva, dum en Jugoslavio ĝi estas individua. En Soveta Unio la partioj ne turnas sin al individua advokato, sed al la „jura konsultejo” kaj la direktoro de tiu konsultejo disdividas la laboron inter la advokatoj laborantaj en ĝi, fiksas la honorarion de ĉiu advokato por la jura helpo kaj kontrolas la kvaliton de la laboro. En Jugoslavio la partio turnas sin por helpo al unuopa advokato, kiu povas akcepti aŭ rifuzi la reprezentadon de la koncerna partio.

2. Kvalifikoj

En ambaŭ landoj la leĝo preskribas kelkajn ĝeneralajn kondiĉojn por akiri la rajton fariĝi advokato. Tiaj kondiĉoj estas, ekzemple, ŝtataneco kaj nepuniteco pri difinitaj krimaj agoj. En ambaŭ landoj la advokatoj ne rajtas esti samtempe ŝtataj oficistoj aŭ oficistoj de institucioj, organizaĵoj kaj entreprenoj. Granda diferenco ekzistas inter la du landoj koncerne la fakajn kvalifikojn. En Soveta Unio la leĝo postulas nur aŭ superan (universitatan) juran edukon sen iu ajn praktiko, aŭ mezgrandan juran lernejon kaj unujaran praktikadon en kortumo aŭ en alia organo de justico, aŭ minimume trijaran laboron kiel juĝisto, prokuroro, esplorjuĝisto aŭ jura konsultisto, eĉ se la koncerna persono ne havas iajn ajn jurajn studojn. En Jugoslavio la faka kriterio estas multe pli severa. Povas fariĝi advokato nur persono, kiu diplomiĝis en jura fakultato; kiu krome havas praktikan laboron de minimume tri jaroj kaj kiu sukcese submetiĝis al speciala advokata aŭ juĝista ekzameno. El la trijara praktika laboro la kandidato devas pasigi minimume unu jaron ĉe advokato, minimume unu jaron ĉe kortumo, dum la trian jaron li povas pasigi ankaŭ en la oficejo de la publika aŭ milita prokuroro aŭ en diversaj aliaj institucioj en iliaj juraj departementoj. Profesoroj de juraj objektoj en juraj fakultatoj povas fariĝi advokatoj sen la trijara praktiko kaj sen la advokata aŭ juĝista ekzameno.

La rajto mem praktiki kiel advokato estas akirita en Soveta Unio per akcepto en la kolecion de advokatoj de la koncerna teritorio, kaj en Jugoslavio per enskribo en la liston de advokatoj en tiu advokata ĉambro, sur kies teritorio la advokato intencas malfermi sian oficejon. En Soveta Unio la malakceptita kandidato aŭ eksigita advokato rajtas apelacii. En Jugoslavio li ne havas tiun rajton, sed tie li povas iniciati administracian proceson, kiu ne estas konata en la soveta jura sistemo.

3. Rajtoj kaj devoj

En ĉiuj civilaj procesoj, nekontraŭdira procedo, administraj aferoj la partioj povas en ambaŭ landoj reprezenti mem siajn interesojn en ĉiuj instancoj. En Soveta Unio, en kelkaj kazoj la jura helpo devas esti senpaga, ekzemple en ĉiuj kazoj koncerne postulojn por vivtenado aŭ koncerne kompensojn pro damaĝoj suferitaj pro invalidiĝo en la produktado. Senpage devas esti donita jura helpo en kunmetado de kiu ajn dokumento por la soldatoj. En Jugoslavio la kortumo povas rekoni al la partio, sub difinitaj kondiĉoj, la rajton senpage reprezentiĝi per advokato, se la partio ne kapablas efike defendi siajn proprajn interesojn kaj se ĝi ne havas rimedojn por pagi la kostojn de la advokato kaj entute de la proceso. En Jugoslavio ekzistas ankaŭ

specialaj kazoj, kiam difinitaj partioj devas esti reprezentitaj de persono havanta la menciitan advokatan aŭ juristan ekzamenon. Ekzemple, antaŭ la duagradaj ekonomiaj kortumoj aŭ antaŭ la Supera Ekonomia Kortumo la reprezentanto de la partio devas havi tian kvalifikon. Sed tiu persono povas ankaŭ ne esti advokato.

En la kriminalaj kazoj la leĝoj de ambaŭ landoj antaŭvidas ke akuzitoj pro pli gravaj kategorioj de krimoj devas havi juran helpon de advokato. Se la akuzito ne povas pagi la kostojn, li ricevas senpagan reprezentanton. La advokato en Jugoslavio povas reprezenti la akuziton ankaŭ en la antaŭprocesa esplora proceduro. La granda reformo de la kriminala juro de decembo 1958 larĝigis tiurilate la rajtojn de la sovetaj advokatoj, kaj nun ili rajtas partopreni en la antaŭprocesaj laboroj ekde la momento, kiam finiĝis la antaŭesploro kaj kiam la akuzito estis informita pri la konkreta akuzo. En Soveta Unio kiel defendantoj estas allasataj ne nur advokatoj, sed ankaŭ la reprezentantoj de profesiaj organizaĵoj, sindikatoj kaj aliaj „sociaj organizaĵoj”. En Jugoslavio, kiam la defendo pere de advokato estas deviga, nur advokatoj povas funkcii kiel defendantoj. Sed ekster tiu kazo ĉiu ajn civitano – kun la escepto de konataj t.n. „pseŭdoskribistoj” – povas funkcii kiel rajtigitito de la partio en kiu ajn proceso.

4. Honorarioj

En Soveta Unio kaj en Jugoslavio ekzistas specialaj tarifoj, fiksitaj de la ŝtataj aŭtoritatoj. La diferenco estas, ke en Soveta Unio la partio pagas al la jura konsultejo, de kiu la advokato ricevas sian pagon surbaze de tre komplikita sistemo, prenante en konsideron diversajn faktorojn (kvalifikojn, longecon de la praktikado, komplikecon de la kazo ktp.), dum en Jugoslavio la partio pagas al la advokato rekte. La enspezoj de la advokatoj en Soveta Unio nun varias, laŭ la oficialaj informoj, inter proksimume 700 kaj 1.700 rubloj monate. En Jugoslavio la enspezoj treege varias kaj, ĝenerale parolante ebligas vivon sur relative alta nivelo.

5. Organizaĵoj

En Soveta Unio la advokatoj estas organizitaj en advokataj kolegioj laŭ la regionoj, teritorioj kaj respublikoj. En Jugoslavio, por ĉiu respubliko kaj por la Provinco Vojvodino ekzistas po unu advokata ĉambro kiel organizaĵo bazita sur la principo de la t.n. „socialisma memadministrado” de la advokatoj. La ĉambroj estas organizitaj en la Ligo de Advokataj Ĉambroj. En Soveta Unio la kolegioj de advokatoj kreas en diversaj lokoj la jam preparolitajn „jurajn konsultejojn”, en kiuj laboras pluraj advokatoj, administrataj de direktoro, kiun nomas la prezido de la koncerna kolegio.

6. Socia pozicio

Ĝi ankoraŭ estas tre malbona en Soveta Unio, kion montras ankaŭ la enspezoj de la advokatoj en tiu lando. En la lastaj jaroj en la sovetaj juraj revuoj

aŭdiĝis multaj voĉoj pledantaj por plibonigo de la kvalito de la advokatoj, por pli grandaj fakaj kvalifikoj, plilongigo de la deviga praktikado kaj ĝenerale por plialtigo de la socia pozicio. En Jugoslavio la socia pozicio de la advokatoj estas konsiderinde pli alta ol en Soveta Unio, sed kompreneble ankaŭ tie la reputacio de iu advokato dependas de lia persona kapablo, fakaj scioj, kuraĝo kaj honesteco.

ŜTATANECO LAŬ LA SOVETA KAJ JUGOSLAVIA JUROJ

I. Enkonduka rimarko

Tiu ĉi modesta kontribuo pri la ŝtataneco laŭ la soveta kaj jugoslavia juraj sistemoj necese havas karakteron de kelkaj elementaj informoj nur pri la bazaj juraj principoj. Pro la tre limigita tempo je dispono ne estas eble prezenti la historian evoluon de la principoj reguligintaj ŝtatanecon en Soveta Unio kaj Jugoslavio, nek klarigi ilin pli amplekse aŭ ilustru per ekzemploj el la praktiko. Tiu ĉi kontribuo, aldone al aliaj pri la temo, prezentiĝas do kiel konvena kruda materialo por ellaboro de kompara studo pri la ŝtataneco laŭ la juro de diversaj landoj.

II. Soveta Unio

La unua leĝo pri ŝtataneco estis tiu de la 29-a de Oktobro 1924. Nuntempe la ĉefaj juraj fontoj pri ŝtataneco estas la Konstitucio de 1936 (Art. 21.) kaj la Leĝo pri Ŝtataneco de la 19-a de Aŭgusto 1938, kiu konsistas el nuraj 8 artikoloj kaj estas multrilate tre manka. Ĝi eĉ ne havas regulojn pri akiro de ŝtataneco laŭ la deveno. Aliaj reguloj rilatantaj al la ŝtataneco de personoj en landoj kaj regionoj aligitaj al Soveta Unio post la leĝo de 1938.

Laŭ la Konstitucio ekzistas unueca, tutsoveta ŝtataneco. Tamen, ĉiu soveta civitano estas ne nur civitano de la Unio, sed ankaŭ de tiu Unia Respubliko, en kiu li vivas. Se en la kadroj de la koncerna Unia Respubliko troviĝas t.n. aŭtonomaj respublikoj, la personoj konstante vivantaj en unu el tiaj respublikoj, estas konsiderataj ankaŭ ĝiaj civitanoj. Sekve, en tiaj kazoj oni posedas trioblan ŝtatancon: tutunian, respublikan kaj aŭtonoman-respublikan.

1. **Akiro.** – Laŭ la nuna leĝo, sovetan civitancon havas unuavice ĉiuj personoj, kiuj posedis la ŝtatancon de la Rusa Imperio la 7-an de Novembro 1917, se, kompreneble, ili ne perdis ĝin poste konforme al la leĝo. Same tiel estas rekonitaj kiel civitanoj ĉiuj personoj, kiuj laŭleĝe akiris sovetan ŝtatancon inter la 7-a de Novembro 1917 kaj la ekvalidiĝo de la nova leĝo 1938. Necesas ĉi tie diri, ke laŭ la leĝo de 1924 ĉiu persono, kiu en tiu tempo vivis sur la teritorio de Soveta Unio estis konsiderata kiel civitano, se ne ekzistis pruvo, ke li estis civitano de alia ŝtato. Praktike tio signifis devigan aŭtomatan civitanigon de ĉiuj ŝtataneco al alia lando. En la postmilitaj revoluciaj jaroj tia pruvado estis ofte malfacila. Superflue diri, ke

la menciita principo de la leĝo de la jaro 1924 estis evidente kontraŭa al internacia juro. La nuna leĝo ne havas tian preskribon, sed tamen ĉiuj personoj, kiuj tiamaniere fariĝis ŝtatanoj laŭ la leĝo de 1924, restas ŝtatanoj de Soveta Unio.

Eksterlandaj civitanoj aŭ senŝtatanaj povas peti sovetan ŝtatanecon. Pri la peto decidis aŭ la Prezidio de la Supera Soveto de Soveta Unio, aŭ la Prezidio de tiu Unia Respubliko, sur kies teritorio la peranto regule vivas. Personoj vivantaj ekster la limoj de Soveta Unio povas sin turni kun petskribo por akiri ŝtatanecon al la Prezidio de la Supera Soveto. En ĉiuj ĉi kazoj la prezidioj, ĉu tutuniaj, ĉu respublikaj, decidis laŭ sia bontrovo, prenante en konsideron la cirkonstancojn de la konkreta kazo. La leĝo do preskribas kiajn ajn specialajn kondiĉojn, ekzemple meritojn, scion de la rusa lingvo aŭ de la lingvo de iu el la respublikoj, aŭ konstantan vivadon dum difinita tempo sur la teritorio de Soveta Unio. Geedziĝo per si mem neniel influas ŝtatanecon: ĉiu el la geedzoj konservas sian. Tamen, en okazo de tia internacia geedziĝo, la partio, kiu ne estas ŝtatanano de Soveta Unio, povas peti pri ŝtataneco kaj la geedzeco estas sendube grava elemento por decido favore al la postulo.

Reguloj pri infanoj naskitaj de sovetaj civitanoj troviĝas ne en la leĝo de 1938, sed en la Kodo de Leĝoj pri Familio de la 19-a de Novembro 1926, amendita poste en pluraj okazoj kaj valida ankaŭ hodiaŭ. Precipe grava estas la Art. 5 de tiu leĝo. Infanoj naskitaj de sovetaj civitanoj sur soveta teritorio aŭ en eksterlando estas konsiderataj kiel sovetaj civitanoj. Se la gepatroj estas de malsama ŝtataneco, sed unu el ili estas soveta civitano kaj almenaŭ unu – ĉu civitano, ĉu ne – vivas en Soveta Unio en la momento de la naskiĝo, la infano estas rigardata kiel soveta civitano. Fine, se unu el la gepatroj estas soveta civitano, dum la alia ne estas, kaj ambaŭ vivas en eksterlando, la gepatroj decidis interkonsente pri la ŝtataneco de la infano.

3. **Perdo.** – Oni perdas sovetan ŝtatanecon aŭ per ekziĝo aŭ per ekzigo.

Laŭleĝe ĉiu civitano povas peti ekzigon el ŝtataneco. Pri tio decidis la Prezidio de la Supera Soveto de USSR, plene laŭ sia bontvoro. Jure, do, ne ekzistas rajto je ekziĝo, sed nur ebleco por tio, se la tutunia Prezidio konsentas. Se la gepatroj ŝanĝas ŝtatanecon, kaj aŭ fariĝas sovetaj civitanoj aŭ ekziĝas el la soveta ŝtataneco, samtempe ŝanĝiĝas ankaŭ la ŝtataneco de iliaj infanoj, se ili ne estas pli aĝaj ol 14 jarojn. Por infanoj aĝaj inter 14–18 jaroj, necesas ilia eksplicita konsento. Geedziĝo ne havas influon je ŝtataneco.

Ĝis Decembro 1958 ekzigo el ŝtataneco estis ebla per juĝo de kortumo en kriminala kazo. Laŭ la kriminala leĝaro, valida ĝis la t.n. jura reformo de Decembro 1958, unu el la gravaj punoj estis ekzigo el ŝtataneco kaj forpelo desur la teritorio de Soveta Unio. Ŝajnas, ke multaj personoj, kondamnitaj je tiu puno, rigardis ĝin pli kiel privilegion ol kiel punon. Tial jam longe antaŭ Decembro 1958 tiu „puno” ne plu estis aplikata, sed anstataŭe la kortumoj abunde aplikis, precipe en la tempo de la teroro de Stalin, mortpunon aŭ ekzilon en malproksimaj koncentrejoj kun devigaj punlaboroj. Nuntempe la Prezidio de la Supera Soveto de Soveta Unio povas ekzigi iun el la ŝtataneco pro gravaj kaŭzoj. Ankaŭ en ĉi tiu kazo la leĝo nenion diras pri la kaŭzoj, tiel, ke la Prezidio agas plene laŭvole. Kompreneble ne ekzistas ebleco apliki.

3. **Reguloj pri familio.** – Ili sekvas el la principo, ke geedziĝo ne influas la ŝtatanecon de la geedzoj. Grandaj malfacilaĵoj okazas, se unu el la geedzoj estas

soveta civitano kaj volus sekvi la alian partion, eksterlandanon, kiu ne loĝas en Soveta Unio. Pli frue la soveta civitano praktike ne havis ian ajn eblecon ekloĝi kun la alia partio en eksterlando, kio kaŭzis multajn tragediojn kaj ankaŭ jurajn komplikajojn. Nuntempe la sovetaj aŭtoritatoj permesas en unuopaj kazoj, ke soveta civitanino, edziniĝinta al eksterlandano, sekvu sian edzon kaj ekloĝu en eksterlando. Multnombraj reguloj estas entenataj en la Kodo de Leĝoj pri Familio kaj – rilate heredadon – en la Civilaj Kodoj de la Uniaj Respublikoj.

4. **Duobla ŝtataneco.** – La soveta juro ne favoras ĝin. Soveta Unio subskribis kaj ratifis nombron de konvencioj, precipe kun orienteŭropaj landoj pri tiu demando. La ĝenerala principo de tiuj konvencioj estas, ke personoj, kiuj pri la internaj leĝoj de la respektivaj landoj devus havi duoblan ŝtatanecon, povas elekti unu el la du. Persono vivanta sur teritorio de ŝtato, kies ŝtatanecon li ne deziras, devas pri tio fari deklaron ĉe la kompetenta instanco de la ŝtato, kies ŝtatanecon li elektas.

5. **Eksterlandanoj.** – Principe la eksterlandanoj kaj la personoj sen ŝtataneco ĝuas la samajn rajtojn en Soveta Unio kiel la sovetaj civitanoj, kun la escepto de politikaj rajtoj el elekto kaj partopreno en ŝtataj organoj. La civilaj rajtoj de eksterlandanoj estas laŭleĝe respektataj sub la kondiĉo de reciprokeco. Tio estas nur la ĝenerala principo. Pritrakto de detaloj sur diversaj kampoj – ekzemple sur tiu de familiaj rilatoj, heredado, kontraktoj ktp. – postulas apartan ampleksan studon.

III. Jugoslavio

La unua leĝo pri ŝtataneco estis tiu de la jaro 1946, amendita poste plurfoje, precipe en 1947 kaj 1948. La ĉefa fonto nuntempe estas la Konstitucio de 1963, kaj la Leĝo pri Jugoslavia Ŝtataneco de la 17-a de Septembro 1964, kiu ekvalidis la 1-an de Januaro 1965. Diference de la soveta leĝo, la jugoslavia estas multe pli kompleta kaj en 28 artikoloj enhavas la fundamentajn preskribojn pri ŝtataneco. Ankaŭ el teknike-jura vidpunkto ĝi estas konsiderinde pli bona ol la soveta.

Ankaŭ en Jugoslavio ekzistas unueca jugoslavia ŝtataneco, sed ĉiu jugoslavia civitano povas havi ankaŭ ŝtatanecon de la respublika unuo. La perdo de jugoslavia aŭtomate perdigas la respublikan.

1. **Akiro.** – Konforme al la Art. 3. de la leĝo oni akiras jugoslavian ŝtatanecon per deveno, aŭ per naskiĝo sur la teritorio de Jugoslavio, aŭ per ŝtatanigo, aŭ surbaze de internaciaj kontraktoj.

Per deveno akiras la ŝtatanecon infanoj, kies ambaŭ gepatroj estas jugoslaviaj ŝtatanoj: aŭ kies unu el la gepatroj en la momento de naskiĝo estas jugoslavia ŝtatanino, kaj la infano estas naskita en Jugoslavio; aŭ kies unu el la gepatroj en la momento de la naskiĝo estas jugoslavia civitano, dum la alia estas senŝtatanino, kaj la infano naskiĝis en eksterlando.

Infano naskita aŭ trovita sur la teritorio de Jugoslavio, kies gepatroj estas nekonataj aŭ estas nekonata ilia ŝtataneco aŭ estas senŝtataninoj, akiras jugoslavian ŝtatanecon per naskiĝo. Tiu ŝtataneco tamen ĉesas, se oni konstatas antaŭ la plenumiĝo de la 14-a jaro de la infano, ke ĝiaj gepatroj estas eksterlandanoj.

La kondiĉoj por civitanigo estas: aĝo de minimume 18 jaroj, eksiĝo el antaŭa ŝtataneco, konstanta vivado sur la teritorio de Jugoslavio dum almenaŭ tri jaroj antaŭ la prezento de la petskribo por civitanigo, bona konduto. Se la lando de la ŝtataneco de la petanto ne permesas eksiĝon, aŭ por la eksiĝo faras neplenumebajn kondiĉojn, sufiĉas, ke la petanto deklaru, ke li aŭ ŝi rezignos pri la antaŭa ŝtataneco, se oni konsentos al li aŭ ŝi doni la jugoslavian. Pluraj faciligoj estas antaŭviditaj por jugoslaviaj elmigrintoj, kiuj deziras akiri ŝtatanecon laŭ tiu vojo. Same tiel eksterlandano, kies akcepto en jugoslavian ŝtatanecon prezentus apartan intereson por Jugoslavio, povas esti akceptita kiel ŝtatano sub la sola kondiĉo, ke li estas plenaĝa laŭ la jugoslavia leĝo (18 jaroj). Geedziĝo ne influas la ŝtatanecon. Tamen, eksterlanda persono, kiu konkludis geedziĝon kun persono havanta jugoslavian ŝtatanecon, povas akiri ŝtatanecon per civitanigo, kvankam ĝi ne plenumas la tri menciitajn unuajn kondiĉojn. La sola kondiĉo en tia kazo estas bona konduto, el kiu oni povas konkludi, ke la koncerna persono estos lojala civitano de Jugoslavio.

Se ambaŭ gepatroj akiris ŝtatanecon per civitanigo, ĝin akiras ankaŭ iliaj infanoj aĝaj malpli ol 18 jarojn. Se nur unu el la gepatroj akiris tiamaniere la ŝtatanecon, ĝin akiras ankaŭ la infanoj aĝaj malpli ol 18 jarojn, se la koncerna persono tion postulas, kaj se la infano vivas en Jugoslavio. Por akiro de ŝtataneco en kazo de infanoj pli aĝaj ol 14 jarojn, necesas ilia eksplicita konsento.

2. **Perdo.** – Jugoslavia ŝtataneco ĉesas per eksiĝo, rezigno, eksiĝo laŭ internaciaj kontraktoj.

La eksiĝo estas rajto kaj ne nur ebleco, kiel en Soveta Unio, tamen sub difinitaj kondiĉoj. Ili estas: la petanto devas esti plenaĝa, plenuminta aŭ reguliginta siajn devojn rilate la armeon, sen ŝuldoj rilate la impostojn kaj devojn al la sociaj-politikaj kaj laboraj organizaĵoj, reguliginta siajn devojn en rilatoj al socia asekuro kaj laboro, reguliginta la havaĵjurajn devojn en familiaj rilatoj. Krome, la koncerna persono devas pruvi, ke kontraŭ li ne estas iniciatita kriminala proceso pro krimo, kiu estas oficiale persekutata – ex officio – aŭ, se ĝi estis kondamnita je puno de karcero, ke ĝi tiun punon plenumis. Fine la koncerna persono devas pruvi, ke ĝi jam estas akceptita en alia ŝtataneco aŭ, ke ĝi akiras tiun ŝtatanecon. Pri la infanoj validas principe la samaj reguloj, kiel en kazo de akiro.

Plenaĝa jugoslavia civitano, kiu naskiĝis en eksterlando kaj vivas tie, kaj tiu krome havas eksterlandan ŝtatanecon, rajtas rezigni pri la jugoslavia ŝtataneco ĝis la plenumiĝo de sia 25-a jaro. Tiun rajton havas tia persono senkondiĉe. Ankaŭ personoj pli aĝaj ol 25 jarojn rajtas rezigni sub difinitaj kondiĉoj: foresto de kriminala proceso, reguligo de ĉiuj havaĵjuraj devoj fontantaj el familiaj rilatoj, pago de la ŝuldataj impostoj, kromimpostoj kaj aliaj ŝuldoj al la sociaj-politikaj kaj laboraj organizaĵoj. Pri la infanoj validas reguloj adekvataj al la jam menciitaj en kazo de eksiĝo.

Jugoslavia civitano, kiu forestas el Jugoslavio, povas esti eksigita el la ŝtataneco, se li per sia laboro malutilas al la interesoj de Jugoslavio. La leĝo eksplicite mencias apartenon al eksterlandaj organizaĵoj, kies laboro estas direktita kontraŭ la konstitucia ordo de Jugoslavio, aŭ konduton en eksterlando malutilan al la esencaj interesoj de Jugoslavio, kiel ekzemplon de laboro kontraŭŝtata, pro kiu iu persono

povas esti eksigita. Ĉio ĉi rilatas al personoj, kiuj provizore loĝas en eksterlando. Male, jugoslaviaj ŝtatanoj, kiuj havas ankaŭ eksterlandan ŝtatanecon kaj kiuj konstante vivas en eksterlando, povas esti eksigitaj el jugoslavia ŝtataneco nur, se ili ne akceptas la jurisdikcion de jugoslaviaj aŭtoritatoj, aŭ se ili eksplicite, aŭ per sia konduto rifuzas plenumi siajn devojn konforme al la Konstitucio kaj la leĝoj, aŭ se ili partoprenas en laboro de organizaĵoj, kies celoj estas kontraŭaj al la ĝeneralaj principoj de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj kaj la Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj.

Ĉiujn decidojn pri la akiro kaj perdo de jugoslavia ŝtataneco faras la Federacia Sekretariato pri Internaj Aferoj, kiu cetere estas ĝenerale kompetenta pri ĉiuj demandoj rilatantaj al ŝtataneco.

3. Reguloj pri Familio. – Ankaŭ en Jugosalvio ili sekvas el la principoj, ke geedziĝo per si mem ne influas la ŝtatanecon de la geedzoj. Tamen, diference de Soveta Unio, en Jugoslavio la aŭtoritatoj nuntempe ne faras malfacilaĵojn al jugoslaviaj civitanoj, kiuj deziras sekvi siajn respektivajn geedzajn partiojn-eksterlandanojn kaj ekloĝi en eksterlando. Tio ankaŭ sekvas el la principo, ke ekŝiĝo el ŝtataneco estas ne nur ebleco laŭ la pura bontrovo de la aŭtoritatoj, sed rajto laŭ la leĝo sub difinitaj kondiĉoj. Diversaj preskriboj koncerne familiajn rilatojn kaj laŭleĝan heredadon troviĝas en aliaj leĝoj.

4. Duobla ŝtataneco. – Ankaŭ la jugoslavia juro ne tre favoras ĝin, sed ankaŭ ne malpermesas ĝin. Eblecoj estas antaŭviditaj en la Leĝo pri Jugoslavia Ŝtataneco kaj en aliaj aktoj.

5. Eksterlandanoj. – Ankaŭ en Jugoslavio la eksterlandanoj kaj la personoj sen ŝtataneco ĝuas principe la samajn civilajn rajtojn, kiel la jugoslaviaj ŝtatanoj. La principo de reciprokeco estas aplikata.

UNIVERSALA DEKLARACIO DE HOMAJ RAJTOJ

I.

Du dokumentoj de unuaranga signifo el politika, etika kaj jura vidpunktoj markas la finon de la jaro 1948. La 9-an de decembro la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj, kunveninta por tiu sesio en Parizo, unuanime akceptis la Konvencion pri Genocido, kiu poste estis ratifita de konsiderinda nombro da ŝtatoj, kaj ekvalidis la 12-an de januaro 1951, kaj al kiu ĝis la nuna momento entute 70 ŝtatoj apartenas kiel partioj. La sekvintan tagon, la 10-an de decembro, la Ĝenerala Asembleo akceptis per 48 voĉoj kaj 8 sindetenoj, sen unusola voĉo kontraŭ, la Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj.

Se oni dezirus plej koncize karakterizi la du aktojn, oni povus diri, ke la unua havas ĉefe negativan karakteron kaj la dua estas unuavice pozitiva. Dum la Konvencio pri Genocido celas malebligi, ke ripetiĝu la monstraj krimoj faritaj kontraŭ tutaj homgrupoj sole pro iliaj rasaj, naciaj aŭ religiaj trajtoj, la Universala Deklaracio pozitive reasertas kaj firmigas la principon, ke la homoj estas denaske liberaj kaj egalaj, kaj kiel tiaj devas ĝui en la socio adekvatajn rajtojn, al kiuj respondas difinitaj devoj.

Ambaŭ momentoj – tiu de la 9-a kaj tiu de la 10-a de decembro 1948 – estis solenaj kaj emociaj. La sentojn sendube intensigis ankaŭ la fakto, ke tiuj dokumentoj estis fine formulitaj en tiu sama Parizo, kiu pli ol 150 jarojn antaŭe, en aŭgusto de 1789, proklamis la gloran francan Deklaracion pri la Rajtoj de la Homo kaj Civitano, kaj kiu tial jam delonge fariĝis por la tuta mondo iusence simbolo de libereco kaj homaj rajtoj. Mi havis la grandan privilegion persone ĉeesti la laborojn de la Pariza Sesio kaj enspiri la atmosferon de kontento, ĝojo kaj esperoj, kiujn la du eventoj pravigis.

Longa estis la vojo, kiu kondukis al la 10-a de decembro. La Franca Deklaracio estis ellaborita en tri tagoj. La preparlaboroj por la Universala Deklaracio daŭris preskaŭ tri jarojn.

II. KONCIZA ANALIZO

La Universala Deklaracio aperis en multaj lingvoj, inkluzive la Internacian en kvin eldonoj, kaj ĉiu havas la eblecon mem trastudi ĝian tekston. Ĉi tie, do, sufiĉas prezenti nur la esencajn trajtojn de ĝia strukturo por iom faciligi la komprenon.

La Deklaracio konsistas el Antaŭkonsideroj aŭ Solena Enkonduko kaj 30 Artikoloj.

La Enkonduko emfazas la fakton, ke la malrespekto kaj malestimo de la homaj rajtoj kaŭzis barbarajn agojn, kiuj indignigis la konsciencon de la homaro, kaj ke la agnosko de la homa digno, esence ligita al ĉiuj membroj de la homa familio, estas la fundamento de libereco, justeco kaj paco. La Enkonduko plue klarigas la kaŭzojn, pro kiu estis necese proklami la Universalan Deklaracion, kaj la celon, kiun Unuiĝintaj Nacioj deziras atingi per ĝi.

La teksto mem de la Deklaracio ne estas formale dividita en ĉapitroj, sed en ĝi estas tamen klare distingeblaj tri partoj.

La **unua parto** (art. 1–21) rilatas al la klasikaj rajtoj kaj liberecoj. En la tri komencaj artikoloj estas esprimitaj la tri grandaj ideoj de la filozofio de la 18-a jarcento: **libereco**, **egaleco** kaj **frateco** de ĉiuj homoj. La ideo pri egaleco estas pli detale difinita en art. 2, kiu emfazas, ke ĉiuj rajtoj kaj liberecoj validas same por ĉiuj homoj, sen kia ajn diferencigo ne nur laŭ raso, haŭtkoloro, sekto, religio, politika aŭ alia opinio, nacia aŭ socia deveno, posedaĵoj, naskiĝo aŭ alia stato, sed ankaŭ laŭ la lingva aparteno. La agnosko de la lingva egaleco estas aparte grava, ĉar ofte oni inklinas ĝin forgesi kaj abundas la kazoj de lingva diskriminacio kaj sur internacia kaj sur landa niveloj. En art. 3 estas aparte rekonita la rajto je vivo, libereco kaj persona sekureco.

Art. 4–15 pritraktas la logikajn sekvojn de la principoj proklamitaj en la unuaj tri artikoloj. Ili estas: malpermeso de sklaveco aŭ servuteco; malpermeso de torturo aŭ nehumanaj punoj; rajto je jura personeco; egaleco antaŭ la leĝo; rajto je protekto de la fundamentaj rajtoj, rekonitaj de la Konstitucio aŭ de la Leĝo, antaŭ la kompetentaj naciaj instancoj; malpermeso de arbitraj arestoj, malliberigoj aŭ ekziloj; egaleco antaŭ la tribunaloj kaj publikeco de la procesoj, sendependeco kaj senpartieco de la juĝistaro; supozo de senkulpeco antaŭ ol la krimo aŭ delikto estas pruvita; principo, ke ne ekzistas krimo, nek estas aplikebla kiu ajn puno, se ili ne estis antaŭe antaŭviditaj de la leĝo; malpermeso de arbitra enmiksiĝo en la privatajn aferojn, familion, hejmon aŭ korespondadon; libereco de cirkulado en sia propra lando kaj en eksterlando; rajto je azilo, krom en la kazo de la t.n. ordinaraj krimoj aŭ de krimoj faritaj kontraŭ la celoj kaj principoj de Unuiĝintaj Nacioj.

Sekvas ses artikoloj, pritraktantaj la rajtojn kaj liberecojn de la homo sur apartaj kampoj: rajto geedziĝi surbaze de libera konsento de edziĝmatura paro, liberecoj de pensado, konscienco, religio, opinio kaj esprimado, organiziĝo kaj kunvenado. La pure politikaj rajtoj estas difinitaj en art. 21, laŭ kiu ĉiu persono havas la rajton partopreni, ĉu rekte ĉu pere de libere elektitaj reprezentantoj, en la regado de sia lando. La voĉdona rajto devas esti universala kaj egala por ĉiuj, dum la elektoj devas okazi de tempo al tempo per sekreta baloto.

La **dua parto** (art. 22–28) difinas la novajn, ekonomiajn, sociajn kaj kulturajn rajtojn. Montriĝis jam delonge, ke la t.n. klasikaj rajtoj, formulitaj unuavice en la Franca Deklaracio, kvankam siatempe profunde progresemaj, kun la tempo postulis kaj novajn garantiojn por la realigo de tiuj rajtoj en la praktiko kaj aldonon de pliaj rajtoj. La pliparto de la akiritaj klasikaj liberecoj, kiuj kompare

kun la feŭda servutdevo signis grandan paŝon antaŭen, estis fakte ĝueblaj nur de relative malmultaj homoj, dum por la amasoj ili estis tute aŭ grandparte nur iluziaj. Kian sencon, ekzemple, povas havi la principo pri la libereco de penso, de parolo, de kunvenado, de organiziĝo, de preso, de cirkulado ktp., se forestas la materiaj rimedoj, necesaj por la efektiva realigo de tiuj liberecoj? Al kio povas servi la formala rajto partopreni en la regado de sia lando, se manko de la plej necesaj vivrimedoj, manko de kulturo kaj klareco fakte malebligas la realigon de tiu rajto? Tial aŭdiĝis ĉiam pli energiaj postuloj por la rekono de aliaj – ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj – rajtoj, kiel ankaŭ por la agnosko de efikaj materiaj garantioj por ilia realigo.

Tiuj modernaj rajtoj de la homo estas nun formulitaj en la dua parto de la Universala Deklaracio. Art. 22, kiu havas karakteron de ĝenerala enkonduko, proklamas la rajton je socia sekureco, kies sekvo devas esti la realigo de difinitaj ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj rajtoj, necesaj al la homa digno kaj al la libera evoluo de la homa personeco. Laŭ la deklario, ili estas: la rajtoj al laboro, al egala kompenso por egala laboro, al organiziĝo en laboristaj sindikatoj; rajto al ripozo; rajto al socia asekuro kaj al vivnivelo sufiĉa por certigi la bonfarton kaj sanon de la individuo kaj de liaj familianoj; rajto al senpaga elementa edukiĝo kaj al egala atingeblo de la supera edukiĝo; rajto al libera partopreno en la kultura vivo, al ĝuado de la artaj valoroj kaj al profitado de la atingoj de la scienco.

La **tria parto** konsistas el la tri lastaj artikoloj, nomataj ofte tegmento-artikoloj, ĉar ili iamaniere kovras la tutan Deklaracion, starigante kelkajn ĝeneralajn principojn pri ĝia signifo kaj interpretado. El la tri artikoloj aparte grava estas art. 29, ĉar ĝi akcentas, ke al la rajtoj respondas difinitaj devoj. Nur la plenumo de la devoj al la socio kaj al unuopuloj, konforme al la principo entenata en art. 1, laŭ kiu la homoj devas konduki unu al la alia en spirito de frateco, ebligas plenan disvolviĝon de la personeco.

La lasta artikolo proklamas la principon, ke en la interpretado de la Deklaracio nenio povas esti komprenita kiel donanta al kiu ajn ŝtato, grupo aŭ individua persono la rajton fari ion, kio detruus kiun ajn rajton aŭ liberecon difinitan en la Deklaracio.

III. JURA KARAKTERO KAJ ETIKA SIGNIFO

Kia estas la jura signifo kaj atingopovo de la Universala Deklaracio?

Jam dum la diskutoj en la Komisiono pri la Homaj Rajtoj aŭdiĝis opinioj, ke la Universala Deklaracio ne havos devigan karakteron. Komentante pri la projekto de la Deklaracio, la Nederlanda Registaro atentigis, ke la Deklaracio „havas nur moralan signifon”, dum la Pakto pri la Homaj Rajtoj, ellaborota poste, estos „jure deviga instrumento” por tiuj, kiuj estos ratifintaj aŭ alimaniere akceptintaj ĝin formale. Laŭ la Usona Registaro la Deklaracio devus servi al UN nur kiel rimedo por atingi internacian kunlaboradon kun la celo antaŭenigi la agnoskon kaj observadon de la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj; la Deklaracio, plue, devus inspiri individuojn kaj grupojn en iliaj klopodoj progresigi la respekton kaj observadon de la homaj rajtoj. Britio esprimis la opinion, ke la Deklaracio estos nenio alia, ol listo

de idealoj, kiujn la homaro devus klopodi atingi, kaj neniel entenos preskribojn, kiuj estus en kiu ajn senco devigaj. Dum la diskutoj en la Pariza Sesio de la Ĝenerala Asembleo mem, sinjorino Roosevelt (Usono) ripetis, ke la Deklaracio estos nek traktato, nek internacia akordo, kaj ke ĝi certe ne kreos kian ajn juran devon por la Ŝtatoj-Membroj. Ĝi estos nur deklaro de bazaj principoj pro la fundamentaj rajtoj, establonta komunan celon de atingo por ĉiuj popoloj. Similajn opiniojn havis ankaŭ la reprezentantoj de multaj aliaj ŝtatoj. Aliflanke, la reprezentanto de Francio – sinjoro René Cassin, la ĉefa verkinto de la projekto – forte akcentis, ke la Deklaracio, kvankam sen deviga jura forto, tamen havos tre realan valoron, ĉar ĝi povos esti rigardata kiel aŭtoritata interpretado de la Ĉarto koncerne ĉiujn ĝiajn regulojn rilatantajn al la homaj rajtoj.

La starpunkto, ke la Deklaracio estas nur „komuna celo de atingo por ĉiuj popoloj kaj ĉiuj nacioj”, eniris ankaŭ en la Enkondukon. Tamen, tuj estas aldonite, ke „ĉiu individuo kaj ĉiu organo de la socio, konstante atentante ĉi tiun Deklaracion, devas strebi al respektigo de tiuj ĉi rajtoj kaj liberecoj per instruado kaj edukado”.

Estas sendube, ke la Ĝenerala Asembleo akceptis la Deklaracion en la senco de la art. 13/1b de la Ĉarto, kiu antaŭvidas por tia kazo la formon de rekomendo. Tial, el formale-jura vidpunkto, la Universala Deklaracio kiel tia estas nur simpla rekomendo, do nedeviga deziresprimo.

Alie prezentiĝas la afero, se oni ekzamenas la Deklaracion el vidpunkto de ĝia enhavo en rilato al la Ĉarto de UN kaj en la lumo de kelkaj fundamentaj principoj de internacia juro.

Jam en 1949, do tuj post la akcepto de la Universala Deklaracio, kiam en la literaturo de internacia juro oni ĝenerale neis la devigan valoron de la Deklaracio, mi provis argumenti kaj en artikoloj kaj en prelegoj favore al la tezo, ke la Universala Deklaracio, kvankam formale nur rekomendo, tamen laŭ sia enhavo estas deviga.*

La ĉefaj argumentoj estis kaj restas:

1. Ke la Ĉarto de UN havas devigan karakteron, pri tio ne povas ekzisti kia ajn dubo. Tial, ĉiuj partoj de la Ĉarto, kiuj rilatas al la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj, estas ankaŭ devigaj. Ili formas parton de la nuntempa internacia juro. La Ĉarto mem ne precizigas la homajn rajtojn. Ĝi nek difinas ilin, nek listigas ilin. Tion faras la Universala Deklaracio, kiu estas logike kaj organike ligita al la Ĉarto. La Deklaracio nur pliprecizigas tion, kio – laŭ la Ĉarto – jam estas deviga parto de internacia juro. Se la Unuiĝintaj Nacioj, per la akcepto de la Ĉarto, devontigis sin progresigi la respekton kaj observadon de la homaj rajtoj, tiu devigo estas jure valida. Sed pri kiuj rajtoj do povas temi, se ne pri tiuj, kiujn entenas la Universala Deklaracio?

2. Unu el la ĉefaj fontoj de publika internacia juro estas la ĝeneralaj juraj principoj rekonitaj de ĉiuj civilizitaj popoloj. La Universala Deklaracio resumas la ĝeneralajn jurajn principojn, rekonitajn nuntempe de la civilizitaj nacioj, sur la kampo de homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj. Se, sen tiaspeca dokumento, povus ekesti duboj koncerne la demandon ĉu iu rajto aŭ libereco estas fakte rekonitaj de la

* En la Internacia Lingvo vidu pri tio Capitron VIII. de la libro Aktualaj Problemoj de la Nuntempa Internacia Vivo, Roterdamo, 1952, precipe pp. 89 k. s. kaj 131 k.s.

civilizitaj nacioj, nun, post la proklamo de la Deklaracio, tiaj duboj ne povas ekzisti. La Deklaracio estas evidenta pruvo, ke la civilizitaj nacioj rekonas la liberecojn kaj rajtojn, kiujn ĝi entenas, kiel ĝeneralajn jurajn principojn.

3. Fine, grava helprimedo por la konstato de la reguloj de internacia juro estas, interalie, la teoriaj verkoj de la plej gravaj fakuloj. Se, do, teoria verko de konata fakulo povas esti uzata kiel rimedo por konstati aŭ por korekte interpreti iun juran regulon, des pli povas esti utiligita tiel grava dokumento, kiel la Universala Deklaracio, verko ne de unu fakulo, sed de granda nombro da oficialaj ŝtataj reprezentantoj, kaj de fakuloj apartenantaj al ĉiuj juraj sistemoj de la terglobo.

Senkonsidere al la supraj argumentoj, ekde la komenco estis klare, ke la Universala Deklaracio havas grandegan, vere senprecedencan moralan kaj etikan valoron. Ĝi ankoraŭfoje rekonis la esencan egalecon de la homo kaj difinis liajn rajtojn en ĉiuj partoj de la terglobo, tute egale al kiu raso, nacio, religio, lingvo aŭ sekso ili apartenas. Ĝi fariĝis simbolo de la tuthomeco kaj de la universaleco de la mondo, kiu estas propraĵo de la Homo, super ĉiuj landlimoj, haŭtkoloroj, flagoj kaj konvinkoj.

La evoluo en la lastaj 20 jaroj montris, ke estis prava la starpunkto, laŭ kiu la Deklaracio havis ne nur etikan-moralan signifon, sed ankaŭ juran valoron. Unuopaj artikoloj de la Deklaracio komencis esti citataj kiel jure devigaj antaŭ la kortumoj de diversaj landoj. En internaciaj rilatoj, eĉ la ŝtatoj, kiuj komence esprimis dubojn koncerne la juran forton de la Deklaracio, ne hezitis citi ĝin aŭ akuzi aliajn ŝtatojn, ke ili malobservis siajn devojn konforme al la Deklaracio. En la praktiko de Unuiĝintaj Nacioj la Universala Deklaracio estis ĉiam pli ofte citata kiel jure deviga. En la konata kazo de rusaj edzinoj la Ĝenerala Asembleo de UN akceptis Rezolucion, en kiu ĝi deklaris, ke la paŝoj entreprenitaj de la sovetaj aŭtoritatoj por malebligi al rusaj virinoj, edziniĝintaj al eksterlandanoj, forlasi Sovetan Union por atingi siajn edzojn en eksterlando, „ne estis konformaj al la Ĉarto”. En la Rezolucio estis menciitaj art. 13 kaj 16 de la Deklaracio por subteni tiun konkludon. La Ĝenerala Asembleo citis la Deklaracion ankaŭ en pluraj aliaj rezolucioj por apogi sian starpunkton rilate la traktadon de personoj de hinda aŭ pakistana origino en Sudafriko, rilate la administracion de Sudafriko kaj la politikon de apartigo praktikatan de tiu lando. La Konsilo de Sekureco en Rezolucio de la 4-a de decembro 1963 alvokis la registaron de Sudafriko tuj ĉesigi siajn diskriminaciajn agadojn, kiuj estis rigardataj kiel „kontraŭaj al la principoj kaj celoj de la Ĉarto, kaj kiuj signifis malobservon de ĝiaj devoj kiel Membro de UN kaj de la reguloj de la Universala Deklaracio de Homaj rajtoj”.

Tiu praktiko montras, ke Unuiĝintaj Nacioj rigardis kaj rigardas la Universalan Deklaracion kiel jure devigan.

IV. INTERNACIAJ KONVENCIOJ

La laboro de Unuiĝintaj Nacioj ne finiĝis per la akcepto de la Universala Deklaracio. Lasante flanke en tiu ĉi kunteksto la agadojn de UN, de Unesko kaj de aliaj organizaĵoj por diskonigi la principojn kaj regulojn de la Universala Deklaracio,

kiel ankaŭ la laboron de tiuj organizaĵoj por progresigi la observadon de la homaj rajtoj en la mondo, necesas ĉi tie menci la ampleksan agadon jam plenumitan sur la kampo de interŝtataj konvencioj.

En la lastaj du jardekoj Unuiĝintaj Nacioj ellaboris 16 multflankajn konvenciojn en la sfero de homaj rajtoj, sendepende de la diversaj konvencioj akceptitaj de ILO kaj de la konvencioj de la Ruĝa Kruco en 1949. La menciitaj 16 konvencioj de UN estas divideblaj en du grupojn. Al la unua kategorio apartenas la konvencioj rilatantaj al apartaj rajtoj aŭ liberecoj, ekzemple la menciita Konvencio kontraŭ genocido de 1948, aŭ la konvencioj kontraŭ senŝtataneco de 1951 kaj 1954, kontraŭ sklaveco de 1956, kontraŭ deviga laboro de 1957, por la elimino de ĉiuj formoj de rasa diskriminacio de 1965; pluraj konvencioj rilate la familion, ekz. pri la ŝtataneco de edziniĝintaj virinoj (1957), pri konsento al geedziĝo kaj minimuma aĝo por geedziĝo (1962). Siavice Unesko akceptis en 1960 konvencion kontraŭ diskriminacio en edukado.

Nur parto de la 16 konvencioj estis ratifita aŭ akceptita alimaniere. Tial nur tre malmultaj jure ekvalidis. Ne estas eble trakti ĉi tie la kaŭzojn de tiu bedaŭrinda stato, sed estas interese menci, ke laŭ dokumento, eldonita de UN, unu el la kaŭzoj, kiuj malhelpas aŭ eĉ malebligas al la ŝtatoj akcepti tiujn konvenciojn, estas la lingva obstaklo. „Se la lingvo de la ŝtato ne apartenas al unu el la oficialaj lingvoj de Unuiĝintaj Nacioj” – estas eksplicite dirite en la dokumento – „la tekstoj de la konvencioj devas esti tradukitaj en la oficialan lingvon aŭ oficialajn lingvojn de tiu ŝtato; ĉio ĉi postulas maŝinaron kaj personaron, kiu havas la necesajn spertojn”**, kaj tiuj spertoj plej ofte mankas.

La dua grupo de konvencioj konsistas el tri eskterordinare gravaj traktatoj, kies celo estas ĝenerala. Temas unuavice pri du paktoj por la apliko de la Universala Deklaracio. Unu el ili koncernas la ekonomiajn, sociajn kaj kulturajn rajtojn; la alia rilatas al civitanaj kaj politikaj rajtoj. Ambaŭ estis akceptitaj de la Ĝenerala Asembleo la saman tagon, nome la 16-an de decembro 1966, kaj prezentas la rezulton de 18-jara intensa laboro. La tria grava akto estas la Fakultativa Protokolo al la Internacia Pakto pri Civitanaj kaj Politikaj Rajtoj.

La Internacia Pakto pri Civitanaj kaj Politikaj Rajtoj (53 artikoloj) rilatas ĉefe al la klasikaj rajtoj kaj liberecoj entenataj en la Universala Deklaracio. Parte ĝi ripetas la rajtojn kaj liberecojn laŭ la Deklaracio, parte ĝi pliprecizigas ilin. En pluraj artikoloj la Pakto – interalie – enhavas regulojn pri la lingva egaleco. Artikolo 2 preskribas, ke la Ŝtatoj-Partioj devigas sin certigi al ĉiuj individuoj sur siaj respektivaj teritorioj ĉiujn rajtojn rekonitajn en la Pakto senkonsidere al ilia lingva aparteno; art. 4 eksplicite malpermesas lingvan diskriminacion; art. 14 preskribas, ke akuzito devas tuj esti detale informita pri la akuzo en lingvo, kiun li komprenas, kaj li rajtas havi senpagan helpon de interpretisto, se li ne parolas la lingvon uzatan de la kortumo; art. 24 denove mencias ankaŭ la lingvan diskriminacion en ligo kun la rajtoj de neplenaĝuloj; art. 25 garantias al ĉiu la rajton partopreni en la publikaj aferoj de sia lando, senkonsidere al la lingva aparteno; art. 26 deklaras la egalecon

** United Nations, A (CONF. 32) 15, 1968, p. 7.

de ĉiuj antaŭ la leĝo kaj malpermesas kiun ajn formon de diskriminacio, inkluzive la lingvan; art. 27 eksplicite garantias la rajtojn de minoritatoj, precipe la rajton ĝuisian propran kulturon kaj uzi sian lingvon.

La Internacia Pakto pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj (31 artikoloj) rilatas ĉefe al la rajtoj kaj liberecoj entenataj en la dua parto de la Universala Deklaracio, analizita supre. Tiu ĉi Pakto havas plurajn preskribojn, kiuj estas preskaŭ identaj al la preskriboj de la Pakto pri Civitanaj kaj Politikaj Rajtoj, ekzemple koncerne la rajton de ĉiu popolo decidi mem pri sia sorto. En aliaj partoj la Pakto difinas la rajtojn je laboro, je organizo de sindikatoj, je striko, socia sekureco, protekto de la familio, adekvata vivnivelo, edukado, partoprenado en la kultura vivo kaj ĝuado de ĉiuj atingoj de la scienco. Ankaŭ tiu ĉi Pakto garantias lingvan egalecon en pluraj artikoloj, precipe en tiuj, kiuj rilatas al la kulturaj rajtoj. La lingva egaleco estas eksplicite menciita en art. 2/2 (ĝenerala rekono de egaleco koncerne ĉiujn rajtojn kaj liberecojn formulitajn en la Pakto), kaj implicite en aro da aliaj artikoloj, ekzemple en art. 13 koncerne edukadon kaj art. 15 rilate artan kaj sciencon kreadon, kaj ĝenerale kulturen vivon.

En la sino de Unuiĝintaj Nacioj okazis longaj diskutoj ĉu ellabori unu ĝeneralan pakton, kiu rilatus al ĉiuj rajtoj kaj liberecoj proklamitaj en la Universala Deklaracio, aŭ fari tion en la formo de du paktoj. La ĉefa argumento favore al du dokumentoj estis, ke pluraj ŝtatoj estis rigardataj kiel maturaj por ratifi aŭ alimaniere akcepti en formo de konvencio ĉu la klasikajn politikajn rajtojn, ĉu la modernajn ekonomiajn, sociajn kaj kulturajn rajtojn, sed ne ambaŭ. Tial, oni esperis, formulante la homajn rajtojn kaj liberecojn en du sendependaj aktoj, ke oni faciligos la subskribon kaj akcepton ĉu de unu, ĉu de alia, ĉu de ambaŭ. Malgraŭ tiuj esperoj, ĝis la nuna momento nur tre malmultaj ŝtatoj subskribis la du paktojn. Neniu el ili ratifis aŭ alimaniere akceptis ĉu unu, ĉu la alian. Sekve ili ankoraŭ ne ekvalidis.

Rilate la maŝinaron por devigi la Ŝtatojn-Partiojn plenumi siajn devojn, ekzistas sufiĉe granda diferenco inter du paktoj.

Laŭ la Pakto pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj, la Ŝtatoj-Partioj devigis sin regule raportadi al Ekonomia kaj Socia Konsilo de UN pri la paŝoj, kiujn ili entreprenis en siaj respektivaj landoj por progresigi la rajtojn entenatajn en la Pakto. La Ekonomia kaj Socia Konsilo povas transdoni tiujn raportojn por studado al la Komisiono pri la Homaj Rajtoj. La aliaj ŝtatoj rajtas komenti. Ankaŭ la Ĝenerala Asembleo povas, se necese, fari rekomendojn surbaze de la raportoj de la Ekonomia kaj Socia Konsilo (art. 16–21 de la Pakto).

La Pakto pri Civitanaj kaj Politikaj Rajtoj antaŭvidas pli efikan maŝinaron, nome 18-membran Komitaton pri Homaj Rajtoj, kiun elektos la Partioj. Tiu ĉi Komitato havos la rajton konsideri kaj fari ĝeneralajn komentojn pri la raportoj, kiujn la Partioj devos prezenti de tempo al tempo rilate la entreprenitajn paŝojn por realigi la rajtojn rekonitajn en la Pakto. Estas antaŭvidita speciala proceduro antaŭ la Komitato por pritrakti la plendojn de unuopaj ŝtatoj kontraŭ aliaj Ŝtatoj-Partioj pro la neplenumo de la devoj konforme al la Pakto. Tiu proceduro validos nur por tiuj Partioj, kiuj akceptos la kompetentecon de la Komitato. En tiaj kazoj la Komitato povas nomi specialan konciliacian (pacigan) komisionon, por ke ĝi provu trovi

amikan solvon. Se solvo ne estos trovita, la Komisiono devos raporti al la Komitato pri ĉiuj faktoj kaj esprimi sian opinion pri la ebleco de amika solvo. La Partioj tiam informos la Komitaton ĉu ili akceptas la enhavon de la raporto aŭ ne. La Komitato devas prezenti al la Ĝenerala Asembleo jaran raporton pri sia agado (art. 28–54 de la Pakto).

La tria grava dokumento estas la Fakultativa Protokolo al Internacia Pakto pri Civitanaj kaj Politikaj Rajtoj. Ĝi estas unu el la plej rimarkindaj dokumentoj en la historio de internacia juro, ĉar ĝi donas la eblecon al individuoj plendi al internacia instanco ne pere de sia ŝtato, sed rekte, se ili rigardas sin viktimoj de malobservo de kiu ajn rajto formulita en la Pakto pri Civitanaj kaj Politikaj Rajtoj. La internacia instanco, al kiu la individuoj povos plendi, estas la jam menciita Komitato pri Homaj Rajtoj, kiu estos formita, kiam la Pakto pri Civitanaj kaj Politikaj Rajtoj ekvalidos. La individuoj devos pruvi en sia plendo, ne nur, ke ili estis viktimoj de malobservo de rekonitaj rajtoj, sed ankaŭ la fakton, ke ili elĉerpis ĉiujn t.n. hejmajn jurajn rimedojn. La ŝtato, kontraŭ kiu la plendo estas direktita, rajtos kompreneble respondi. Post detala esploro de la afero la Komitato devas prezenti sian opinion al la koncerna ŝtato kaj al la individuo. La Komitato ankaŭ devas enmeti resumon pri sia agado laŭ tiu ĉi Protokolo en la jaran raporton al la Ĝenerala Asembleo.

Ĉiu Partio de la Pakto povas fariĝi ankaŭ Partio de la Protokolo. Ĝi ekvalidos tri monatojn post la momento, kiam la 10-a instrumento de ratifo aŭ aliĝo estos deponita ĉe la Sekretariato de Unuiĝintaj Nacioj. Ĝis la fino de 1967 nur 7 ŝtatoj subskribis la Protokolon, sed neniu ratifis ĝin aŭ aliĝis al ĝi. Sekve ankaŭ la Protokolo ankoraŭ ne ekvalidis.

V. KONKLUDO

En la sfero de la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj manifestiĝas la sama granda antagonismo, kiu karakterizas ĉiujn fenomenojn de la epoko, kiun ni travivas. Ĝi estas la antagonismo inter la grandega teknika progreso, la senprecedenca evoluo de ĉiuj rimedoj de komunikado kaj la kreskanta interdependeco de ĉiuj mondopartoj, unuflanke, kaj la malnoviĝintaj formoj de politika organizaĵo, aliflanke. Per unu piedo la homaro jam firme ekstaris en la 21-a jarcento, sed per la alia ĝi estas kateninta al la 19-a. Tio kaŭzas la bazan konflikton inter naciismo, ne malofte eĉ ŝovinismo, kaj internaciismo; inter la ŝtata suvereneco, kelkfoje eĉ absoluta, kaj la postulato kunekzisti kaj kunlabori internacie. En la sfero de homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj ĝi manifestiĝas en la proklamo de la Universala Deklaracio kaj en la akcepto de tuta aro da konvencioj kun la celo doni al la homaj rajtoj internacian protekton, unuflanke, kaj en la fakto, ke tiuj samaj ŝtatoj, kies reprezentantoj ellaboris tiujn gravajn dokumentojn, poste hezitas subskribi aŭ, eĉ se ili subskribas, rifuzas ratifi aŭ alimaniere akcepti ilin. La rezulto estas, ke ni havas nun grandan nombron da internaciaj instrumentoj por protekto de la homaj rajtoj, kun tre abundaj kaj detalaj reguloj, sed nur tre modestajn efikajn rezultojn.

La homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj estas afero, kiu interesas nin ĉiujn. En nia propra intereso ni devas, do, fari nian eblon por diskonigi ilin kiel eble plej

vaste kaj klopodi per ĉiuj permesitaj rimedoj atingi ilian kompletan realigon en la praktiko. Unu el la rimedoj sendube estas premi la registarojn de niaj propraj landoj, ke ili subskribu, ratifu kaj akceptu almenaŭ tiujn konvenciojn, por kiuj ili voĉdonis en la organoj de Unuiĝintaj Nacioj. La jura ekvalido de la 16 konvencioj ellaboritaj en Unuiĝintaj Nacioj, tute speciale de la du Paktoj kaj de la Fakultativa Protokolo, kiuj, kune kun la Universala Deklaracio, formas la modernan Ĉarton de Homaj Rajtoj kaj Liberecoj, signos grandan paŝon antaŭen. Ĝi estos la komenciĝo de efika kaj efektiva internacia protekto de la homaj rajtoj ĉie en la mondo, kaj tial prezentos larĝajn perspektivojn por la plua evoluo kaj prosperado de la homaro en spirito de frateco inter la unuopuloj kaj amikeco inter la popoloj.

Ĉu iluzio aŭ vizio?

En unu el siaj paroladoj, nur kelkajn tagojn antaŭ ol li estis murdita, Robert Kennedy diris: „Iuj homoj vidas la aferojn tiaj, kiaj ili estas, kaj demandas: kial? Mi revas pri aferoj, kiuj neniam estis, kaj demandas: kial ne?” Jes, vere, kial ne?

LA RAJTO DE KUNVENADO KAJ ORGANIZIĜO EN SOVETA UNIO KAJ JUGOSLAVIO

A) SOVETA UNIO I.

Enkondukaj Rimarkoj

La rajto formi t.n. sociajn organizaĵojn – inkluzive la rajton kunveni, organizadi stratdemonstracojn kaj publikajn mitingojn – estis garantiita de la unua Konstitucio de RSFSR de 1918 en art. 16., sed nur „por la laboristoj kaj la plej malriĉaj kamparanoj”. Sekvis aro da dekretoj kaj similaj leĝkarakteraj aktoj, kiuj rilatis al fondado de organizaĵoj. Menciindaj estas la sekvantaj: Rezolucio de la 12-a de julio 1922 pri la proceduro por la kunvokado de tutrusaj konferencoj kaj kongresoj de diversaj unuiĝoj kaj societoj, kaj pri la registriĝo de tiuj organizaĵoj; Rezolucio de la 3-a de aŭgusto 1922 pri la proceduro por aprobo kaj registriĝo de societoj kaj unuiĝoj sen profitaj celoj, kaj pri la kontrolado de tiuj organizaĵoj; Rezolucio de la 6-a de januaro pri la proceduro koncerne la fondadon kaj likvidadon de tut-uniaj societoj kaj unuiĝoj sen profitaj celoj, kaj pluraj aliaj. La analizo de tiuj aktoj montras, ke inter 1917 kaj proksimume la mezo de la tridekaj jaroj, la rajto de asociiĝo estis garantiita al la „laboranta popolo”, sed tiu garantio estis vaste limigita per preskriboj rilatantaj al la „klasa karaktero” de la membraro, registriĝo (fakte permeso de la aŭtoritatoj) kaj likvido (fakte disigo fare de la aŭtoritatoj).

II. Nuna pozicio

La nuna Konstitucio de 1936 deklaras en art. 126, ke la civitanoj de USSR havas la rajton unuiĝi en publikaj (sociaj) organizaĵoj „konforme al la interesoj de la laboranta popolo kaj por la evoluigo de organiza iniciatemo kaj politika aktiveco de la amasoj”. Laŭ tiu sama artikolo la ĉefaj organizaĵoj estas: laboristaj sindikatoj, kooperativoj, junularaj organizaĵoj, sportaj kaj defendaj (duonmilitaj) organizaĵoj; kulturaj, teknikaj kaj sciencaj societoj. Estas ankaŭ eksplicite dirite, ke „la plej aktivaj kaj politike konsciaj civitanoj el la vicoj de la laborista klaso, labora kamparanaro kaj labora intelektularo libervole unuiĝas en la Komunista Partio de Soveta Unio, kiu estas la avangardo de la laboranta popolo kaj ... la gvidanta kerno de ĉiuj organizaĵoj de la laboranta popolo”. Tiu konstitucia formulo klare difinas kaj limigas la rajton organiziĝi kaj kunveni. Pro la „gvida rolo” de la Komunista Partio neniu organizaĵo

povas efektive ekzisti sen rekta ligiteco al la Partio. Estas menciinde, ke nuntempe ne ekzistas aparta ĝenerala leĝo aŭ dekreto rilatanta al la rajto kunvenadi aŭ organiziĝi, sed ekzistas nur dekretoj, modelaj ĉartoj, instrukcioj k.s. rilatantaj al unuopaj specoj de organizaĵoj.

a) Rajto de kunveno

Tiu rajto ekzistas por la rekonitaj organizaĵoj. Publikaj kunvenoj sur placoj, en parkoj, stratoj aŭ similaj publikaj lokoj estas eblaj, se ili estas organizitaj de la ŝtataj-partiaj aŭtoritatoj, aŭ de aprobitaj organizaĵoj.

b) Rajto de organiziĝo

1. **Asocioj:** Ekzistas granda nombro da **fakaj organizaĵoj** establitaj de la ŝtataj-partiaj aŭtoritatoj, Al tiu grupo apartenas – ekzemple – diversaj unuiĝoj de artistoj, arkitektoj, ĵurnalistoj, komponistoj, verkistoj k.s. Ili agas laŭ la statutoj, akceptitaj de iliaj respektivaj kunvenoj laŭ la formuloj establitaj de la partiaj aŭtoritatoj. Apartan grupon formas la **religiaj organizaĵoj**. Por ili validas nombro da dekretoj, ekzemple tiu de la 20-a de januaro 1918 koncerne la disiĝon de la eklezio disde la ŝtato, kaj de la lernejo disde la eklezio; iu rezolucio de la 8-a de aprilo 1929 rilate religiajn societojn kaj alia rezolucio de la 10-a de januaro 1967 rilatanta al la rajtoj de religiaj societoj. Tiaj religiaj komunaĵoj fakte povas funkcii nur se ili estas oficialigitaj (registritaj) kaj kontrolataj de la ŝtataj aŭtoritatoj sur la regiona nivelo,. La malobservo de la striktaj reguloj rilate religiajn societojn estas krimo punebla per enkarcerigo por periodo ĝis 5 jaroj. La ĉefaj **ekonomiaj organizaĵoj** estas la kolĥozoj kaj kooperativoj, kies agado estas reguligita de detalaj t.n. modelaj ĉartoj, difinitaj de la ŝtataj aŭtoritatoj.

2. **Politikaj Partioj:** Nur la Komunista Partio de Soveta Unio estas rekonita. Ne ekzistas ebleco por formi aliajn partiojn, sed en tiu lando funkcias diversaj organizaĵoj ligitaj al la Partio, ekzemple la Ligo de Junaj Komunistoj (Komsomolo), kiu estas kontrolata de la KP, kaj la Soveta Organizaĵo de Pioniroj (Infanoj), kiu estas gvidata de la Komsomolo. En la soveta literaturo oni eksplikas, ke la tiea unupartia sistemo estas ŝuldata ne al ia „eksleĝigo” de la aliaj partioj, sed ĝi estas rezulto de la volo de la popolo, kiu ne deziras havi aliajn politikajn partiojn.

3. **Sindikatoj:** Ili estas formataj de la partiaj organizaĵoj konforme al la Laborkodo.

La samaj ŝtataj-partiaj aŭtoritatoj, kiuj decidas pri la fondo de diversaj organizaĵoj, decidas ankaŭ pri la malpermeso aŭ disigo de la organizaĵoj, kelkfoje per dekretoj aŭ amendoj al ekzistantaj leĝkarakteraj aktoj, kelkfoje per rekta interveno, sen aparta ordono aŭ dekreto.

Sendependaj Esperanto-organizaĵoj ne ekzistas nuntempe en Soveta Unio, sed multaj grupoj funkcias en la kadroj de diversaj institutoj, institucioj, sindikatoj k.s. En la Komitato por Kulturaj Rilatoj kun Eksterlando, kiu estas ŝtata-partia institucio, troviĝas aparta subkomitato, kiu reprezentas la Esperanto-Movadon. Ĝiaj membroj ne estas elektitaj, sed nomitaj de la ŝtataj-partiaj aŭtoritatoj.

Laŭ la sovetaj kriminalaj kodoj ne nur organizitaj agadoj celantaj fari krimojn, sed ankaŭ agadoj, kiuj povas esti kvalifikitaj kiel „kontraŭsoveta propagando”, aŭ partopreno en organizaĵoj kun tia celo, ests gravega krimo, por kiu eĉ la mortpuno povas esti aplikita.

B) JUGOSLAVIO

I. Enkondukaj Rimarkoj

La Konstitucio de 1946 (art. 27) kaj la Konstitucia Leĝo de 1953 (art. 5) garantiis al la civitanoj la rajton kunvenadi kaj organiziĝi. Tiuj rajtoj estis pli detale difinitaj en la Leĝo pri Asocioj, Kunvenoj kaj Aliaj Publikaj Renkontiĝoj de 1945, amendita en 1946 kaj 1947. Ĝi restis valida ĝis la novaj leĝoj de 1965.

II. Nuna pozicio

La rajto kunvenadi kaj asociiĝi estas nun formulita en la Enkonduko kaj en la art. 40 de la nun valida Konstitucio de 1963. Diference de Soveta Unio, en kiu ne ekzistas ia ĝenerala leĝo pri publikaj kunvenoj kaj pri asocioj, en Jugoslavio ekzistas du leĝoj reguligantaj tiujn rajtojn: la Baza Leĝo pri Unuiĝo de Civitanoj kaj la Baza Leĝo pri Publikaj Kunvenoj, ambaŭ de la 4-a de aprilo 1965.

a) Rajto de kunveno

Estas rekonita la rajto organizi publikajn kunvenojn kaj partopreni en ili. La kunvokantoj devas anonci kunvenon okazontan en publika loko (placo, parko, strato k.s.) minimume 48 horojn antaŭ la okazigo al la Departemento pri Internaj Aferoj de la Komunumo, sur kies teritorio la kunveno okazos. La kunvokantoj respondecas pri la ordo kaj devas tuj disigi la kunvenon, se okazas malordo, kiu minacas la sekurecon de personoj aŭ de havaĵo. Aliflanke, la koncerna organo pri internaj aferoj (polico) devas ebligi senĝenan disvolviĝon de publika kunveno regule kunvokita. Ne estas permesitaj kunvenoj, kies celo estas instigi al perforta renverso de la aktuala socipolitika reĝimo, aŭ al farado de krimaj agoj, aŭ al dissemado de nacia, rasa aŭ religia malamo aŭ maltoleremo. Kunvenoj povas esti malpermesitaj ankaŭ pro kelkaj aliaj kaŭzoj, ekzemple por protekti la publikan sanon aŭ publikan moralon. Grava punkto estas, ke oni povas malpermesi publikan kunvenon, se ĝia okazigo malhelpus la publikan trafikon. La malpermeso devas esti komunikita al la kunvokintoj minimume 24 horojn antaŭ la okazigo. La leĝo antaŭvidas monpunojn de 500 ĝis 10.000 novaj dinaroj, aŭ areston ĝis 30 tagoj, pro la malobservo de diversaj reguloj rilatantaj al publikaj kunvenoj.

b) Rajto de organiziĝo

1. **Asocioj:** Grupo de minimume 10 personoj rajtas formi organizaĵon. Aparta fondkunveno akceptas la statuton de la asocio aŭ societo. La statuto devas havi erojn rilate al jenaj punktoj: celo kaj rimedoj por atingi ĝin; rajtoj kaj devoj de la membroj; rajtoj kaj devoj de la organoj de la asocio; reguloj pri aliĝo, ekziĝo kaj ekzigo de la membroj; reprezentado de la asocio; materiaj fontoj; nomo kaj sidejo, kaj teritorio de agado; disiĝo de la asocio kaj disponado pri la havaĵo en tia kazo. La statuto povas, kompreneble, enhavi ankaŭ regulojn pri aliaj demandoj. La fondita organizaĵo devas esti registrita ĉe la organo de internaj aferoj, sur kies teritorio ĝi agas. Ekde la momento de registriĝo la organizaĵo akiras juran personecon. La organo de internaj aferoj devas registri organizaĵojn en tempodaŭro de 30 tagoj ekde

la prezento de la postulo, se ĝia statuto estas konforma al la leĝo. Se ne, la konerna organo devas resendi la statuton al la petintoj kun indiko de la ŝanĝoj postulataj de la leĝo; la petintoj povas repostuli la registrigon post la faritaj ŝanĝoj. Estas malpermesitaj organizaĵoj, kies agadoj estas direktitaj al perforta renverso de la konstitucie establita reĝimo; aŭ al dissemado de nacia, rasa aŭ religia malamo; aŭ al farado de krimaj agoj. Kontraŭ la decido, per kiu registrigo estas rifuzita aŭ per kiu ekzistanta organizaĵo estas disigita, estas ebla apelacio.

Esperanto-organizaĵoj ekzistas en multaj lokoj de Jugoslavio kaj same tiel regule funkcias tutlanda Esperanto-Ligo.

2. **Politikaj partioj:** Ankaŭ en Jugoslavio ekzistas nur unu politika partio – la Ligo de Komunistoj – sed pluraj politikaj organizaĵoj ligitaj al ĝi. Teorie – laŭ la Konstitucio kaj laŭ la leĝo – ekzistus jura ebleco fondi aliajn politikajn partiojn, sed en la realo tio ĝis nun ne okazis.

3. **Sindikatoj:** Ili estas organizitaj konforme al la Laborjuro kaj troviĝas sub kontrolo de la Partio. Tamen en Jugoslavio ili ĝuas pli da fakta sendependeco ol en Soveta Unio. Necesas atentigi, ke ankaŭ en Jugoslavio funkcias multaj ekonomiaj organizaĵoj, precipe kooperativoj, kaj ke la jugoslavia ekonomia sistemo estas bazita sur la principo de t.n. socia proprieto kaj memadministrado de la ekonomio fare de la laboristaro. Tiom nur por orientiĝo. Eĉ plej konciza priskribo de tiu sistemo postulus ampleksan studon, kiu certe vaste transirus la kadrojn de tiu ĉi skiza prezento.

En: *Internacia Jura Revuo* 4. 1969: 2 (10), p. 2–7.

GENOCIDO

I. HISTORIA TRARIGARDO

La ideo pri kriminala respondeco pro kontraŭjuraj agoj faritaj dum milito estas relative nova.

En la antikva epoko nek la milito mem estis konsiderata kiel krima, nek kia ajn konduto de la malamikaj partioj unu al la alia kiel kontraŭa al kriminala juro. Ekzistis diversaj reguloj koncerne la formon de proklamado de milito aŭ koncerne kontraktadon de paco; ekzistis reguloj pri diplomaciaj senditoj, pri traktadoj, ankaŭ pri milittraktadoj. Sed ĉiuj ĉi reguloj apartenis al ĝenerala internacia juro kaj ne havis karakteron de kriminala juro. Al ili mankis kriminala sankcio. La personoj, kiuj malobservis regulojn, ne povis esti konsiderataj kiel kriminale respondecaj.

En la pli nova tempo – parte pro la ĉiam pli oftaj kaj pli teruraj militoj, parte pro la kreskanta konsciiĝo pri komunaj interesoj kaj pri la nepre necesa solidareco de la homa specio – aŭdiĝas ĉiam pli fortaj voĉoj, postulantaj ne nur reguligon de militaj agadoj, sed ankaŭ abolon de la milito kiel tia kaj kriminalan respondecon en okazo de agreso aŭ de malatento al internacie establitaj reguloj pri la kondukado de la militaj agadoj.

Iom post iom tiuj postuloj eliris el la fermitaj rondoj de teoriistoj. Pli larĝaj popoltavoloj ekinteresiĝis pri la demadno. Ankaŭ la politikistoj, precipe se iliaj ŝtatoj estis la venkintoj, komencis akcentadi la kriman karakteron de kelkaj agoj de la malamiko. Farante tion, ili kompreneble samtempe kondamnas sin mem pro la samaj aŭ similaj agoj, kiujn ili faris aŭ faros en la estonteco.

Tiamaniere la ideo pri kriminala respondeco en la internacia vivo, traboradis al si la vojon por fariĝi hodiaŭ unu el la plej gravaj aspektoj de la internacia juro.

La unuajn ĝermojn de tiu penso en la moderna senco oni trovas komence de la 19-a jarcento. Kiam Napoleono, post la famaj „cent tagoj”, oficiale rezignis pri la krono, oni proponadis, ke li estu juĝata de Angla Tribunalo. La Viena Kongreso deklaris, ke Napoleono, pro sia fuĝo desur la insulo Elba, „metis sin ekster la civitanajn kaj sociajn rilatojn”. Tamen, la proponita juĝado ne okazis. En aŭgusto 1815 estis decidite, ke Napoleono estu konsiderata kiel militkaptito de Britio, Ruslando, Aŭstrio kaj Pruslando. Kiel tia, li estis sendita al la insulo de Sankta Helena.

Post la Unua Mondmilito la aliancaj potencoj okupiĝis ankaŭ pri la demando de la militkrimuloj. En la Pactraktato de Versailles estis dirite, ke Vilhelmo la Dua devas esti metita antaŭ tribunalon, kiu juĝos lin „pro la plej granda malobeco al internacia moralo”. Estis antaŭvidite, ke la tribunalano konsistos el reprezentantoj de

Francio, Britio, Usono, Italio kaj Japanio. Kiel konate, Vilhelmo ne estis tiam en la manoj de la Aliancanoj. Jam la 10-an de novembro 1918 li transiris la nederlandan limon kaj ekde tiu tempo troviĝis tie. La aliancaj potencoj petis la nederlandan registaron, ke ĝi transdonu al ili la germanan eksimperiestron, sed Nederlando rifuzis tion. En sia respondo la nederlanda registaro pravigis sian nean starpunkton en tiu afero per la nederlanda konstitucio kaj per siaj „jarcentaj tradicioj”, laŭ kiuj Nederlando „ĉiam estis rifuĝejo de la viktimoj de internaciaj konfliktoj”.

Koncerne la aliajn militkrimulojn la Traktato de Versailles antaŭvidis en art. 228, ke ili estos juĝataj de milittribunaloj de la Aliancanoj. Subskribante la Traktaton de Versailles, Germanio rekonis tiun rajton al la Aliancanoj. Tamen, ankaŭ ĉi tio restis nur morta litero. Longe oni nenion faris. Fine la Aliancanoj postulis de Germanio, ke ĝi mem juĝu kaj punu la oficirojn, kiuj estas respondecaj pro militkrimoj, nome pro agoj kontraŭaj al la leĝoj de milito, ĉar en tiu tempo la milito mem, kvankam agresa laŭ sia karaktero, ne estis malpermesita. Fakte, en Germanio okazis kelkaj procesoj, sed ĉiuj akuzitoj estis aŭ liberigitaj aŭ punitaj tute sensignife.

Inter la du mondmilitoj – precipe post la fama Pakto Briand-Kellog, kiu proklamis la militon krimo – ĉiam pli aktualiĝis la demando, kiamaniere kontribui al protekto de la paco per rimedoj de kriminala internacia juro. Precipe grava estis la problemo pri kreo de Tribunalo por juĝado kaj punado de militkrimuloj. Kvankam oni multe diskutadis pri tiuj aferoj, tamen nenio estis fine decidita.

Tiam eksplodis la Dua Mondmilito. La krimoj, faritaj dum la pasinta granda milito aŭ en ligo kun ĝi, transpasis ĉion, kion eĉ la plej riĉa fantazio povis imagi. Oni ne nur mortigis homojn. Oni mortigadis ilin sisteme, preskaŭ science. Veraj hombuĉejoj kreiĝis ĉie tra Eŭropo kaj ankaŭ aliloke. Milionoj da senkulpaj estuloj perdis sian vivon en plej teruraj suferoj. Eĉ konsciencoj ĝis tiam dormintaj subite vekigis. Ion oni devis fari.

La Aliancanoj plurfoje deklaris – kaj en unuopaj diplomatiaj notoj kaj en solenaj komunaj dokumentoj – ke ĉiuj militkrimuloj estos juste punitaj post la milito.

Jam en la jaro 1943 oni komencis klare distingi du kategoriojn de militkrimuloj.

Al la unua kategorio apartenas tiuj militkrimuloj, kiuj en diversaj landoj, kiel apartenantoj de la okupantaj armeoj, faris diversajn krimojn. En la Deklaracio pri la Respondeco de la Militkrimuloj, akceptita dum la Moskva Konferenco en oktobro 1943, estis dirite, ke tiuj germanaj oficiroj kaj soldatoj, kaj tiuj membroj de la nazi partio, kiuj estas respondecaj pro la sennombraj krimoj, faritaj en la okupitaj teritorioj, estos transdonitaj al la landoj, en kiuj ili agis.

La dua kategorio de militkrimuloj konsistas el la t.n. „ĉefaj militkrimuloj”. Montriĝis, ke krom la personoj, kiuj rekte krimis en la okupitaj teritorioj, ekzistis ankaŭ aliaj personoj, kiuj mem, per siaj propraj manoj, ne pendumadis, ne sufokadis per gaso, ne torturadis, sed kiuj, tamen estas ĉefe respondecaj.

Pri la krimuloj, apartenantaj al tiu dua kategorio, la konferenco de Potsdam, okazinta en 1945, decidis, ke ili estos „kiel eble plej baldaŭ transdonitaj al justa juĝado”.

Kelkajn tagojn post tiu decido, la 8-an de aŭgusto 1945, la reprezentantoj de Britio, Usono, Soveta Unio kaj de la Provizora Registaro de Francio, subskribis apartan *Kontrakton pri la Persekutado kaj Punado* de la Ĉefaj Militkrimuloj de la Eŭropaj Aksaj Potencoj. Al la Kontrakto estis aldonita la *Statuto de la Internacia Milittribunalo*.

La aktoj de la 8-a de aŭgusto markas novan etapon en la evoluo de la internacia juro. Grava branĉo – tiu de internacia kriminala juro – komencis tiun tagon sian efektivan vivon.

Laŭ la aktoj de la 8-a de aŭgusto ekzistas tri kategorioj de militkrimoj: (a) *krimoj kontraŭ la paco*, (b) *krimoj kontraŭ la leĝoj kaj kutimoj de la milito*, (c) *krimoj kontraŭ la domo*.

Al la grupo de krimoj kontraŭ la paco apartenas diversaj krimaj agadoj, ekzemple planado, preparado aŭ instigado de atakmilito, aŭ al milito, per kiu oni malobservas internaciajn kontraktojn, interkonsentojn aŭ garantiojn. Estas konsiderata kiel krimo kontraŭ la paco ne nur la agreso mem, sed ankaŭ ĉiu ajn partoprenado en komplotoj por realigi ĝin. Kiel oni vidas, ne ĉiu milito estas konsiderata kiel krimo. Nur atakmilito estas jure krima, nur ĝi estas malpermesita de la internacia juro laŭ la aktoj de la 8-a de aŭgusto, kaj la malobeo de tiu malpermeso estas kriminale sankciita. Tio estas klara per si mem: justa, defenda milito, nome milito farita por sin defendi kontraŭ la agreso, eĉ se pro la minacanta agresdangero kiam oni ekpafas la unuan kuglon, ne povas esti konsiderata kiel krima. Ĝi ne nur estas malpermesita, sed, tute kontraŭe, ĝi estas rimedo por kontraŭstari al agreso. Same kiel sindefendo en interna kriminala juro senigas la agon de ĝia kontraŭjura karaktero, tiel same sindefenda milito ne estas kontraŭjura laŭ la publika internacia juro.

Egale ĉu temas pri krima milito (agreso) aŭ pri permesita, la milito devas esti kondukata laŭ difinitaj principoj kaj reguloj. Malobservo de la plej gravaj el tiuj reguloj, eĉ se temas pri permesita milito, estas hodiaŭ konsiderata kiel aparta krimo. Tiu krimo, kutime nomata „militkrimo” en la mallarĝa senco de la vorto, rilatas al *ĉiuj agoj faritaj kontraŭ la leĝoj kaj kutimoj* de milito. Temas precipe pri agoj, kiujn malpermesis la Kvara Haga Konvencio de 1907 kaj ĝia Aldona Regularo. – La Statuto de la Milittribunalo mencias, kiel ekzemplojn, nur kelkajn el ili: mortigo, torturado aŭ sendado al devigaj laboroj de la civila loĝantaro en la okupitaj landoj; mortigo aŭ torturado de la militkaptitoj; rabado de privata aŭ publika havaĵo; superflua detruado de urboj, lokoj kaj vilaĝoj, ruinigoj, kiuj ne estas pravigeblaj per la bezonoj de la milito.

Al la tria kategorio de internacia krimo apartenas la *krimoj kontraŭ la domo*. La unuopaj krimoj de tiu kategorio estas tre multnombraj. Mortigo, ekstermado, sklavigado aŭ disloĝigado de la civila loĝantaro antaŭ aŭ dum la milito estas, ekz., krimo kontraŭ la domo. Ankaŭ persekutoj pro politikaj, religiaj aŭ rasaj kaŭzoj apartenas al tiu kategorio de internacia krimo, se tiuj agoj estas faritaj en ligo kun kiu ajn alia internacia krimo.

Kvankam la unuopaj internaciaj krimoj povas esti faritaj ankaŭ antaŭ la milito aŭ ekster ĝi (ekzemple planado de agreso, aŭ persekutoj pro politikaj kaŭzoj),

tamen ĉiu el tiuj agoj, por ke ĝi estu krima laŭ la aktoj de la 8-a de aŭgusto, devas esti iamaniere ligita al milito. Tio estas grava manko, precipe en la kazo de krimoj kontraŭ la homeco. Tial, tuj post la formiĝo de Unuiĝintaj Nacioj, oni entreprenis paŝojn por protekti la homan personon per rimedoj de internacia juro ankaŭ ekster la kadroj de la ĵus prezentita internacia krimo.

Unuavice necesas menci, ke la Ĉarto mem de Unuiĝintaj Nacioj en la Solena Enkonduko rekonas la fidon je la fundamentaj rajtoj de la homo, je la digno kaj valoro de la homa personeco, je la egaleco de ĉiuj viroj kaj virinoj, de ĉiuj nacioj: grandaj kaj malgrandaj. La Ĉarto mencias la homajn rajtojn plurfoje ankaŭ en la teksto mem. Poste, la 10-an de decembro 1948, la Ĝenerala Asembleo de UN akceptis en Parizo la konatan Universalan Deklaracion pri la Homaj Rajtoj, kaj antaŭ nelonge estis, fine, ellaboritaj ankaŭ projektoj de konvencioj por protekto de la homaj rajtoj. La Packontraktoj de la 10-a de februaro 1947 devigis 5 ŝtatojn rekoni kaj observi kelkajn bazajn homajn rajtojn. Krome, konforme al la aktoj de la 8-a de aŭgusto 1945, la ĉefaj militkrimuloj estis juĝataj kaj punitaj de internaciaj tribunaloj.

El vidpunkto de la Homaj Rajtoj apartan gravecon havas la krimo kontraŭ la homeco. En la Statuto de la Internacia Tribunalo de la 8-a de aŭgusto 1945 tiu krimo estas difinita kiel mortigo, ekstermo, sklavigo, dislokigo kaj aliaj nehumanaj agoj, faritaj kontraŭ la civila loĝantaro antaŭ aŭ dum la milito, kiel ankaŭ persekutoj pro politikaj, religiaj aŭ rasaj kaŭzoj, faritaj en ligo kun la plenumo de kiu ajn alia internacia krimo, apartenanta al kompetenco de la Tribunalo. El la difino estas klare videble, ke multaj krimoj kontraŭ la homeco restis nepunitaj, ĉar ili ne estis ampleksitaj per la difino. Ĝi, kiel ni vidas, postulas, ke tiuj krimoj estu faritaj en ligo kun kiu ajn alia internacia krimo, do en ligo kun la krimo kontraŭ la paco aŭ kun la krimo kontraŭ la leĝoj kaj kutimoj de la milito. Tiu manko kaŭzis fortajn kritikojn. Oni prave postulis, ke ankaŭ tiuj agoj kontraŭ la homeco, kiujn ne antaŭvidis la aktoj de la 8-a de aŭgusto, estu difinitaj kiel krimoj kaj ĝuu la protekton de internacia kriminala juro. Tiu postulo estis realigita, almenaŭ parte, per la *Konvencio pri genocido de la 9-a de decembro 1948*.

II. PREPARLABOROJ

Same kiel la procesoj de Nürnberg kaj Tokio kontraŭ la militkrimuloj elvokis vastan diskuton, en kiu juraj kaj pseŭdojuraj argumentoj intermiksiĝis kun politikaj starpunktoj kaj aspiroj, tiel same la ideo mem difini genocidon kiel krimon de internacia juro kaŭzis kontraŭstarojn en kelkaj medioj. Ilia ĉefa argumento estis tiu jam kaduka tezo – tamen plu alloga por multaj, kiuj ne povas vidi la progreson aŭ konscie obstaklas ĝin – ke genocido ĉiam ekzistis kaj ke sekve nenio estas farebla sur tiu kampo.

Estas vero, ke agoj, hodiaŭ rigardataj kiel krimoj kontraŭ la homeco, estas verŝajne tiel malnovaj, kiel la homaro, sed ĉu tio per si mem devas signifi, ke ili estu rezignacie rigardataj kiel io neforigebla el la homa socio? La fakto, ke jam antaŭ jarmiloj oni kutimis, laŭ la tiamaj moralaj kaj juraj konceptoj, bruligi vilaĝojn kaj urbojn, prirabi havaĵojn, sklavigi plenkreskulojn kaj infanojn, aŭ eĉ dezertigi tutajn

teritoriojn, neniel signifas, ke oni rajtas senpune fari la samon en epoko kun tute aliaj konceptoj de internaciaj juro kaj moralo. Masakro sub Herodo aŭ deportado de Judoj al Babilono, aŭ persekutoj kontraŭ Kristanoj sub Nerono, aŭ kiu ajn alia samkaraktera evento de la pasinteco, evidente ne povas pravigi similajn, aŭ eĉ pli terurajn agojn en la nuntempo.

Tio, kompreneble, ne signifas, ke tiaj agoj ne okazis en la moderna epoko. Ne nur, ke ili okazis, sed, eĉ pli, ili formis parton de konscie ellaborita politiko. Necesas nur rememorigi, ke komence de 1941 Himmler prezentis la oficialan nazian politikon por ekstermado de Judoj kaj Slavoj, „kies nombro devas esti reduktita per 30 milionoj”. Laŭ Jakob Leĉinski, membro de la Instituto pri Judaj Problemoj, en 6 jaroj, nome inter 1939 kaj 1945, pli ol unu triono de la juda loĝantaro estis ekstermita: en Nederlando 60 % de ĉiuj Judoj estis mortigitaj, en Aŭstrio 66 %, en Greklando 80 %, en Germanio 81 %, en Ĉeĥoslovakio 82 %, en Pollando 85 %, en Letonio 89,5 %, en Litovio 90 %. Sole en Varsovio, el 352.599 Judoj restis malpli ol 6.000, dum en Leipzig restis entute nur 15 el 11.564 Judoj. La ekstermado de pli ol 8 milionoj da propraj kaj alilandaj civitanoj fare de la nazia Germanio, kaj similaj praktikoj de aliaj ŝtatoj, kune kun la multnombraj internaciaj krimoj de aliaj kategorioj, faritaj dum la milito aŭ en ligo kun ĝi, estis potenca superpezo kontraŭ la pseŭdosciencaj argumentoj de rondoj, kiuj obstaklis la difinon de genocido kiel krimo de internacia juro.

Tuj post la proceso en Nürnberg la tiama Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj, Trygve Lie, sugestis la enkorpigon de la principoj de Nürnberg en internacian kriminalan juron. Kubo, Hindio kaj Panamo proponis studon por esplori la eblecon deklari genocidon „krimo de internacia juro”. En tiu propono genocido estis kvalifikita kiel neado de la ekzistorajto de homgrupoj, same kiel homicido (hommortigo) signifas neadon de ekzistorajto de individuo. La propono estis sendita al la Sesa Komisiono (pri Juraj Demandoj) de la Ĝenerala Asembleo, kie ĝi estis atente pristudita. La Komisiono faris raporton al la Ĝenerala Asembleo, en kiu ĝi rekomendis, ke la Ĝenerala Asembleo rekonu, ke „genocido estas krimo de internacia juro, kondamnita de la civilizita mondo, kies ĉefaj aŭtoroj kaj iliaj komplicoj – ĉu personoj privataj, ĉu funkciuloj aŭ oficialaj reprezentantoj de iu ŝtato

– devas esti punitaj tute egale ĉu ili agis pro motivoj rasismaj, religiaj, politikaj aŭ aliaj”. La Komisiono plue rekomendis, ke la Ĝenerala Asembleo invitu la Ŝtatojn-Membrojn „entrepreni la necesajn paŝojn por preventi kaj subpremi tiun ĉi krimon”, kaj komisiu al la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro la taskon fari „la necesajn studojn kun la celo redakti projekton de Konvencio pri Genocido”.

La Ĝenerala Asembleo akceptis ĉiujn ĉi proponojn per la Rezolucio 96/I. de la 11-a de decembro 1946. Rezulte, la Sekretariato ellaboris antaŭprojekton de konvencio kun helpo de la t.n. grupo de ekspertoj, en kiu troviĝis profesoroj Donnadiu de Vabres, Pella kaj Lemkin. La antaŭprojekto estis pritraktita de aparta „Speciala Komitato pri Genocido”, kiu, post ricevo de pluraj komentoj de la Ŝtatoj-Membroj, ellaboris la definitivan projekton.

Tiu definitiva projekto estis unue prezentita al la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro kaj poste al la Tria Sesio de la Ĝenerala Asembleo, okazinta en Parizo,

en Palais de Chaillot, en aŭtuno de 1948. En Parizo la projekton pritraktis la Sesa Komisiono de la Ĝenerala Asembleo.

Fine, la 9-an de decembro 1948, do unu tagon antaŭ la akcepto de la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj, la Ĝenerala Asembleo unuanime, nome per ĉiuj voĉoj de la tiamaj 55 membroj de UN, akceptis la Konvencion en definitiva formo. La Konvencio ekvalidis la 12-an de januaro 1951, 90 tagojn post la depono de la 20-a instrumento pri ratifo, konforme al la art. 13.

III. DIFINO KAJ ANALIZO

La Konvencio pri Prevento kaj Punado de la Krime de Genocido de la 9-a de decembro 1948 konsistas el Enkonduko kaj 14 artikoloj.

La Enkonduko unuavice mencias la Rezolucion de la Ĝenerala Asembleo de la 11-a de decembro 1946, kiu deklaris genocidon krimo de internacia juro, „*kontraŭa al la spirito kaj celoj de UN kaj kondamnita de la civilizata mondo*”. La dua alineo de la Enkonduko rekonas, „*ke en ĉiuj periodoj de la historio genocido kaŭzis grandajn perdojn al la homaro*”. La projekto de la Konvencio enhavis parton rilatantan al la krimoj de la nazia reĝimo, sed en la fina teksto oni ellasis ĝin, ĉar oni deziris doni al la koncepto de genocido pli vastan sencon. La lasta alineo esprimas la konvinkon, ke estas necesa internacia kunlaborado, se oni volas „*liberigi la homaron de tiu abomena skurĝo*”. Sekve, la celo de la tuta Konvencio estas preventi aŭ subpremi genocidon kiel internacian krimon per internaciaj rimedoj. Kiel vidiĝos en la analizo de la Konvencio, la preskriboj entenataj en la teksto mem nur parte respondas al la ĉefa celo, solene proklamita en la Enkonduko.

En art. 1 la kontraktantaj partioj konfirmas, ke genocido, tute egale ĉu farita en tempo de paco aŭ en tiu de milito, estas krimo de internacia juro, kiun ili decidis preventi kaj puni.

Art. 2 de la Konvencio difinis genocidon kiel krimon direktitan kontraŭ tutaj homgrupoj. *Genocido signifas*, kiun ajn el la sekvantaj agoj, faritaj kun la celo detrui, plene aŭ parte, nacian, etnikan, rasan aŭ religian grupon kiel tian: (a) *mortigado de la membroj de la grupo*; (b) *kaŭzado de grava korpa aŭ mensa damaĝo al la membroj de la grupo*; (c) *intencita altrudo al la grupo de vivkondiĉoj planitaj kaŭzi ĝian fizikan detruon plene aŭ parte*; (ĉ) *altrudo de cirkonstancoj, kies celo estas preventi naskiĝojn ene de la grupo*; (d) *perforta transigo de infanoj de la grupo al alia grupo*.

Ĉiu ajn el la menciitaj agoj estas per si mem krimo de genocido, se tiu ago estas farita kun la celo detrui plene aŭ parte la grupojn kiel tiajn. La projekto antaŭvidis plian elementon, nome, ke la agoj formantaj la krimon de genocido estu faritaj dole (*dolus*). Tio, kompreneble, limigus kaj mallarĝigus la koncepton de genocido. Oni, do, ellasis en la fina redakto la postulon pri dolo kaj anstataŭe kontentiĝis pri la formulo „*agoj, faritaj kun la celo...*”.

La projekto parolis ne nur pri nacia, rasa aŭ religia grupo, sed ankaŭ pri „politika”. Tiu „politika genocido” kaŭzis grandegan diskuton, ĉar pluraj ŝtatoj, unuavice Soveta Unio, ofte kontraŭstaris ĝin. Oni argumentis, ke per enmeto de la

„politika genocido” en la Konvencion oni senigus la koncepton de ĝia vera senco, ĉar genocido ja estas unuavice direktita al detruo de homgrupo pro ĝia nacia aŭ rasa karaktero. Aliflanke, oni kontraŭargumentis, ke detruado de rasa aŭ nacia grupo ne estas pli abomeninda ol detruado de homgrupo pro la politikaj konvinkoj de ĝiaj membroj. Fine, por savi la universalecon de la Konvencio, tiam atendatan, oni rezignis pri la „politika genocido” kaj ĝi ne troviĝas en la Konvencio.

Aliflanke, en la unua projekto ellaborita de la Sekretariato, kiel ankaŭ en la projekto farita de la jam menciita „Speciala Komitato pri Genocido”, troviĝas ankaŭ la t.n. „kultura genocido”. En tiuj projektoj ĝi estis difinita kiel krimo farita „per diversaj agoj, kiaj estas malpermeso utiligi la lingvon de la grupo en la ĉiutagaj rilatoj aŭ en la lernejoj, aŭ presigi aŭ disvastigi publikaĵojn en la lingvo de la grupo”, plue ankaŭ „detruado de bibliotekoj, muzeoj, lernejoj, historiaj monumentoj, lokoj de kulto kaj aliaj institucioj kaj kulturaj objektoj de la grupo, aŭ malpermeso utiligi ilin”.

La pledantoj por enmeto de la kultura genocido en la Konvencion argumentis, ke ekzistas du manieroj por detruo homan grupon. La unua estas „fizika ekstermo de ĝiaj membroj”, dum la dua konsistas en „detruo de la specifaj trajtoj de difinita grupo” sen fizika ekstermado de la unuopaj individuoj, el kiuj konsistas la grupo. Ili insistis, ke la Konvencio ne respondos al sia celo, se ĝi ignoros tiun duan formon, kiu, ili asertis, „estas nedisigebla de la unua”.

La kultura genocido elvokis ne mapli grandajn diskutojn ol la politika. Por ĝi precipe pledis la landoj, kiuj ĝin spertis sub la nazia okupado: Soveta Unio, Pollando kaj kelkaj aliaj. Ĉe la alia flanko troviĝis la ŝtatoj, kiuj ne deziris, ke la kultura genocido eniru la Konvencion. Ili reprezentantoj asertis, ke en la historio ne malofte okazis, ke unu nacio aŭ gento kulture englutis alian, kaj ke, se oni akceptus la koncepton de kultura genocido, oni devus hodiaŭ kulpigi multajn naciojn pro ĝi. Fakte, ne tre forta pozicio, ĉar la samon oni povus diri pri kiu ajn alia formo de genocido. La plej forta argumento de tiu grupo estis la malfacilaĵoj, kiujn kaŭzus la provoj difini la limojn de kultura genocido, kiu – ili asertis – intermiksiĝas kun la malobservo de la homaj rajtoj kaj la rajtoj de minoritatoj. Per efika protekto de tiuj rajtoj – ili asertis

– oni devus malebligi en la estonteco la agojn, kiujn la alia flanko volus enmeti en la nocion de genocido. Pretere estu dirite, ke la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj de la 10-a de decembro mencias la lingvon en pluraj kunteksto. Ankaŭ la novaj projektoj de konvencioj pri la ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj rajtoj, kaj pri la civilaj kaj politikaj rajtoj, akceptitaj la 16-an de decembro 1968, eksplicite protektas „la kulturan, religian kaj lingvan heredaĵon de la minoritatoj”, sed tiuj internaciaj aktoj ankoraŭ ne ekvalidis.

La kultura genocido estis forĵetita per 25 voĉoj kontraŭ 16 favoraj. Tiamaniere, nek la politika, nek la kultura genocido eniris en la Konvencion. Anstataŭe oni aldonis al la difino la koncepton de „etnika grupo”.

Laŭ art. 3 de la Konvencio, punendaj estas ne nur genocido, sed ankaŭ konspirado, publika incitado, provo kaj komplikeco rilate genocidon.

La personoj, kiuj kulpas pro genocido aŭ pri kiu ajn alia ago menciita en art. 3, devus esti punitaj, tute egale ĉu ili estis konstitucie respondecaj funkciuloj de la ŝtato, publikaj oficistoj aŭ privataj individuoj (art. 4).

Art. 5–8 entenas diversajn preskribojn, kiuj difinas la devojn de la kontraktantaj partioj rilate genocidon kaj la kunligaj agoj el la art. 3. Interalie ili devas enkonduki leĝojn por establi efikajn punojn por personoj kulpaj pro genocidaj agoj. Tiuj personoj devas esti juĝataj de kompetentaj tribunaloj de la ŝtatoj, sur kies teritorioj la krimoj estis faritaj. Tre grava estas la principa preskribo de art. 6, kiu antaŭvidas establون de internacia kriminala tribunalo kun kompetenteco rilate al tiuj partioj de la Konvencio, „*kiuj estos akceptintaj ĝian jurisdikcion*”. Bedaŭrinde, ĝis la nuna momento, nek la Tribunalo estas formita, nek kiu ajn ŝtato deklaris sin preta submetiĝi al la kompetenteco de tia instanco, se ĝi iam estos fondita. Ĉar multaj ŝtatoj malpermesas ekstradicion pro la t.n. politikaj krimoj, la Konvencio eksplicite deklaras, ke genocido ne estas tia krimo kaj la partioj devigas sin ekstradicii akuzitojn pro genocido „*konforme al siaj leĝoj kaj validaj traktatoj*”. Menciinda estas la regulo, ke ĉiu partio de la Konvencio povas inviti la organizaĵon de UN, ke ĝi pere de siaj organoj entreprenu tiajn paŝojn konforme al la Ĉarto, kiuj estos konsiderataj kiel konvenaj por preventi aŭ subpremi agojn de genocido aŭ kiu ajn alian agon en ligo kun genocido laŭ la difino el art. 3.

Art. 9 de la Konvencio rilatas al malkonsentoj koncerne interpretadon, aplikadon kaj plenumadon de la Konvencio, inkluzive la respondecon de iu ŝtato pro genocido aŭ pro kiu ajn el aliaj agoj menciitaj en art. 3. Ĝi preskribas, ke tiuj malkonsentoj estos prezentitaj por prijuĝo al la Internacia Kortumo en Hago je postulo de kiu ajn partio de la malkonsento.

Art. 10 ĝis 14 rilatas al aŭtentikaj tekstoj de la Konvencio (angla, franca, rusa, hispana kaj ĉina); al reguloj pri subskribado, ratifado kaj aliĝado al la Konvencio; al vastigo de ĝia valideco al teritorioj, pri kies eksteraj rilatoj respondecas iu el la partioj; al momento de validiĝo kaj al periodo de valideco de la Konvencio.

Krom la art. 2 kaj 3., kiuj difinas la koncepton de genocido kaj la krimajn agojn ligitajn al tiu koncepto, la plej gravan signifon havas art. 9 de la Konvencio, kiu preskribas la devigan kompetentecan de la Internacia Kortumo por ĉiuj malkonsentoj inter la partioj de la Konvencio. Ĝi estas gravega ĝuste tial, ĉar ĝi donas almenaŭ parte internacian kontrolon pri la plenumado de la principoj kaj preskriboj de la Konvencio. Bedaŭrinde, kelkaj ŝtatoj akceptis la Konvencion, sed faris rezervojn precize pri la art. 9. En internacia juro „*rezervo*” signifas, ke ŝtato faranta ĝin, ne akceptas la koncernan preskribon, kvankam ĝi akceptas la nerezervitajn artikolojn de la interkonsento.

Okaze de sia aliĝo al la Konvencio la 12-an de julio 1950 Bulgario eksplicite faris rezervon rilate art. 9. Ĝi deklaris, ke tiu art. ne validos por Bulgario, ĉar laŭ ĝia opinio, la eventualaj malkonsentoj povas esti submetitaj por prijuĝo de la internacia Kortumo ne surbaze de unuflanka plendo de unu el la partioj laŭ tiu artikolo, sed nur surbaze de aparta interkonsento de la partioj en ĉiu individua kazo. Identajn rezervojn faris jam okaze de la subskribado de la Konvencio Soveta Unio, Belorusio, Ukrainio (la 16-an de decembro 1949) kaj Ĉeĥoslovakio (la 28-an de decembro 1949). Ankaŭ kelkaj aliaj ŝtatoj, ekzemple Pollando, Rumanio, Hungario, Filipinoj, faris diversajn rezervojn rilate tiun kaj aliajn artikolojn. La multnombraj rezervoj, precipe tiuj rilatantaj al art. 9, devigis la Ĝeneralan Asembleon de UN peti de la Internacia Kortumo konsultan opinion pri la akordiĝeblo de la rezervoj kun la Konvencio.

En sia fama decido de 1951, akceptita per la voĉoj de 7 juĝistoj kontraŭ 5, la Internacia Kortumo malproksimiĝis de la antaŭa praktiko, laŭ kiu ĉiuj partioj de iu multflanka internacia traktato devas konsenti pri la rezervoj, por ke la rezervanta ŝtato povu esti konsiderata kiel partio. La Kortumo efektive esprimis la opinion, ke ŝtato, kiu faris rezervon, povas esti konsiderata kiel partio de multflanka konvencio, kvankam pluraj ŝtatoj kontraŭstaris la rezervon, sed aliaj ne, se la rezervo estas en akordo kun la ĉefa celo de la Konvencio. Tamen, se iu ŝtato malakceptas la rezervon kiel neakordigeblan kun la ĉefa celo, ĝi rajtas konsideri, ke la rezervanta ŝtato ne estas partio de la Konvencio. Aliflanke, se iu ŝtato akceptas la rezervon kaj opinias ĝin en akordo kun la ĉefa konvencia celo, tiu ŝtato rajtas rigardi la rezervantan ŝtaton kiel partion de la Konvencio.

Kiel menciite pli frue, la ĉefa celo de la Konvencio, eksplicite menciite en la Enkonduko, estas preventi aŭ subpremi genocidon kiel internacian krimon, kiel apartan krimon kontraŭ la homeco, ne per naciaj, sed per internaciaj rimedoj. Se tiu ĉefa celo ne povas esti atingita almenaŭ parte – kaj art. 9 donas precize almenaŭ minimuman internacian garantion – tiam la tuta Konvencio fakte perdas sian sencon. Ne estas malfacile, do, kompreni, ke en kazo de Konvencio de tiu ĉi speco la deviga jurisdikcio de la Internacia Kortumo estas esenca elemento por la plenumo de la ĉefa celo de la konvencio. Tial rezervo povas prave esti konsiderata kiel neakordigebla kun la ĉefa celo.

IV. KONKLUDO

Genocido ne anstataŭigas la tri kategoriojn de internacia krimo, difinitajn en la aktoj de la 8-a de aŭgusto 1945. Ĝi estas nova kategorio de internacia krimo, kiu, diference de la krimo kontraŭ la homeco laŭ la aktoj de la 8-a de aŭgusto, povas esti farita ankaŭ en tempo de paco kaj sen kiu ajn ligo kun la ceteraj internaciaj krimoj. Tiamaniere estas plenigita grava jura vakuo. Tio per si mem signifas konsiderindan paŝon antaŭen.

La Konvencio pri genocido havas la taskon protekti la ekzistorajton de homgrupoj. Milionoj da homoj estis viktimoj de tiu krimo en la proksima pasinteco kaj ankaŭ hodiaŭ tiu krima agado ne plene ĉesis. Ili estis mortigataj, torturataj, dislokigitaj nur tial, ĉar ili apartenis al difintiaj rasoj, nacioj aŭ religioj. Ĉio ĉi estis farata de la ŝtata potenco rekte aŭ kun ĝia helpo, surbaze de internaj leĝoj, kiuj permesadis tiun monstran krimon. Per la Konvencio la ŝtatoj devigas sin preventi genocidon, persekutadi kaj punadi la krimulojn. Efektive, multaj ŝtatoj enkondukis en siajn resp. kriminalajn kodojn la novan krimon konforme al la difino de la Konvencio, kaj preskribis severajn punojn por la krimintoj. Ankaŭ tio estas reala progreso, ĉar estas ja grandega diferenco inter jura permesado de genocido kaj oficiala instigado plenumi ĝin, unuflanke, kaj la jura difino de genocido kiel krimo, aliflanke.

Estas, sendube, tre bedaŭrinde, ke la subpremo de genocido estas lasita en la manoj de la unuopaj ŝtatoj. En la pasinteco la ĉefaj kulpuloj pri tiu krimego ja ne estis la amasoj, sed la politikaj gvidantoj de la ŝtatoj, kiuj pro tiu celo utiligis la tutan

aparaton de la ŝtata potenco. Multe pli fortaj garantioj estus donitaj, se la preventado kaj subpremado de genocido troviĝus plene en la manoj de internaciaj organismoj, precipe de iu internacia tribunalo. Tamen, la fakto mem, ke la krimo estas difinita, ke la membroj de Unuiĝintaj Nacioj akceptis tiun difinon, signifas plian pozitivan aspekton de la Konvencio. Neniu krimulo povos sin defendi dirante, ke la interna juro de ia lando ne malpermesis al li fari agojn, kiuj estas difinitaj kiel genocido. Li ne povos sin defendi per la principo *nullum crimen sine lege* aŭ per tio, ke la superuloj ordonis al li kontraŭ difinitaj homgrupoj. Genocido estas difinita unufojon por ĉiam kiel krimo de internacia juro. Sekve, la internaj juraj sistemoj devas konformiĝi al tiu stato. Ili ne povas permesi ion, kion la internacia juro malpermesas. Se la juro de iu ŝtato malharmonias kun la principoj aŭ reguloj de internacia kriminala juro, tiu interna sistemo estas kontraŭjura kaj la civitanoj rajtas malobei ĝiajn jurajn ordonojn, kiuj kontraŭas al la internacia juro. Krome, la personoj respondecaj pri la kontraŭleĝeco de la koncerna jura sistemo, devas esti konsiderataj kiel rompantoj de la internacia juro. Sur la kampo de subpremado de ĉiuj kategorioj de internacia krimo, ili devas esti konsiderataj kiel krimuloj, kontraŭ kiuj la plej severaj punoj estas aplikendaj. Povas okazi, ke pro la politika situacio en la mondo tiuj krimuloj ne estos juĝataj dum longa tempo aŭ eĉ ke ili sukcesos eviti kiun ajn punon. Tio tamen ne senigas iliajn agojn de krima karaktero kaj tio ankaŭ ne signifas, ke ili tute certe dum sia vivodaŭro sukcesos eviti la merititan punon. En ĉiu okazo la Konvencio estas serioza admono por ĉiuj, kiuj krimas aŭ inklinas krimi pri genocido.

Iuj internaciistoj asertis, ke la Konvencio havas pli moralan ol juran valoron. Mi opinias, ke ili eraras en tiu ĉi rilato same tiel, kiel ili eraris rilate la atingopovon de la Unversala Deklaracio. Estas tute certe, ke la Konvencio havas en ĉiu okazo grandan moralan signifon, sed estas nepardonebla eraro limigi ĝin al nura morala kategorio. Certe, el jura vidpunkto la Konvencio havas mankojn, pri kiuj mi koncize atentigis. Certe, ĝi ne donas tian internacian juran protekton, kian la plej progresemaj juristoj deziris kaj plue postulas. Tamen, eĉ kun mankoj ĝi havas rimarkindan juran valoron kaj signas mejloŝtonon en la progresiva evoluo de internacia juro.

TESTAMENTOJ LAŬ SOVETA JURO

Enkonduka rimarko

La soveta hereda juro estas nuntempe entenata en la Fundamentoj de Civila Leĝaro de USSR kaj de Uniaj Respublikoj de decembro 1961, ekvalidintaj la 1-an de majo 1962, kaj en apartaj sekcioj de civilaj kodoj de unuopaj respublikoj de Soveta Unio. En tiu ĉi konciza rezumo estas prenitaj en konsideron nur la tutuniaj preskriboj kaj la esencaj reguloj de la Civila Kodo de RSFSR (Sekcio 7) de junio 1964, ekvalidintaj la 1-an de oktobro 1964.

1. Foro de testamentoj

Nur skriba formo estas rekonita. La testamento devas esti skribita aŭ mane aŭ tajpmaŝine, kun indiko de la loko kaj de tempo de la kunmeto, subskribita persone de la testamentanto kaj legalizita de notario. Se pro iu ajn kaŭzo la testamentanto ne povas skribi, alia civitano povas subskribi en lia nomo kaj laŭ lia peto, en la ĉeesto de la notario, sed en la notaria akto devas esti indikitaj la kaŭzoj, pro kiuj la testamentinto ne povis mem subskribi. En esceptaj kazoj notarian legalizon anstataŭas tiu de komandantoj de armeaj unuoj en kazo de armeanoj; ŝipkapitanoj por la ŝipanoj dum la navigado; ĉefkuracistoj por malsanuloj sub ilia kontrolo en malsanulejoj; ĉefoj de arktikaj kaj similaj ekspedicioj en malproksimaj regionoj por la membroj de tiuj ekspedicioj. En la kodoj de kelkaj respublikoj estas menciitaj ankaŭ aliaj kazoj, ekzemple direktoroj de malliberejoj por la malliberigitoj.

2. Enhavo de testamentoj

Principe, ĉiu plenaĝa civitano povas libere disponi pri sia havaĵo, nomi anstataŭanton de la heredonto (se tiu mortos antaŭ la testamentanto), difini legacojn, fari testamentajn ordonojn (*modus*), nomi heredaĵplenumanton, senigi la laŭleĝajn heredantojn de heredaĵ rajtoj. La testamentanto rajtas postlasi sian havaĵon al unu aŭ pluraj heredantoj en egalaj aŭ malegalaj partoj, aŭ testamenti al ili unuopajn objektojn – ĉio ĉi tute egale, ĉu ili estas aŭ ne estas laŭleĝaj heredantoj. Se per la testamento ili ne disponis pri sia tuta havaĵo, la restanta parto apartenas al la laŭleĝaj heredantoj laŭ la preskriboj pri laŭleĝa heredado. Ankaŭ personoj, kiuj heredis difinitan havaĵan objekton (do ne la tutan havaĵon aŭ ĝian parton), estas

rigardataj kiel heredantoj. La testamentanto povas postuli de kiu ajn testamenta heredanto la plenumon de kiu ajn devontigo (legaco) favore al unu aŭ pluraj personoj (legacitoj) ĉu troviĝantaj en la kadro de laŭleĝaj heredantoj, ĉu ekster tiu kadro. Estas menciinde, ke la legacitoj akiras obligacian postulrajton ne kontraŭ la heredaĵon, sed kontraŭ la ŝanĝitan heredanton.

Alia afero estas „testamenta ordono” (*modus*) , nome devontigo de la heredanto fari ion ne favore al iu difinita persono, sed por celoj ĝenerale utilaj (ekzemple, ĉiujara premio por la plej bona studento). Se tiuj faroj estas havaĵkarakteraj, aplikiĝas la reguloj pri legacoj, sed la „kreditoroj”, t.e. rajtigitoj postuli plenumon, ne estas unuopaj personoj, sed la ŝtataj aŭ sociaj organizaĵoj interesitaj en la koncerna sfero.

Apenaŭ necesas diri, ke kiel heredantoj kaj legacitoj povas esti nomitaj ankaŭ la ŝtato, ŝtataj entreprenoj kaj institucioj, kooperativoj kaj t.n. sociaj organizaĵoj, se ili posedas juran personecon. Religiaj komunajoj ne povas heredi, ĉar ili ne estas rigardataj kiel „sociaj organizaĵoj”, nek ili havas juran personecon, kvankam ili posedas iajn tre limigitajn proprietajn rajtojn. Same tiel, testamenta ordono favore al religiaj celoj estas senvalida, ĉar tiuj celoj ne estas konsiderataj kiel „ĝenerale utilaj”.

La heredantoj mem estas heredaĵplenumantoj, sed la testamentanto povas nomi alian personon por plenumi tiun funkcion. En tiu kazo la heredaĵplenumanto devas esti nomita en la testamento mem, kaj la plenumanto devas konsenti per deklaro aŭ en la testamento aŭ en dokumento aldonita al testamento.

3. Limigoj

Ekzistas unusola limigo de la libera kaj laŭplaĉa testamenta disponado pri havaĵo. La neplenaĝaj aŭ labore malkapablaj infanoj (inkluzive adoptitojn), kiel ankaŭ la labore malkapablaj postvivintaj edzo aŭ edzino, gepatroj (inkluzive adoptintojn) kaj vivtenitoj de la mortinto (minimуме dum unu jaro antaŭ la morto), heredas, sendepende de la testamento, du trionojn de tiu parto, kiu apartenus al ili laŭ la preskriboj pri laŭleĝa heredado. Ĉar la menciita unua vico de personoj heredas en egalaj partoj en kazo de laŭleĝa heredado, tio signifas, ke la deviga parto dependas de tio, kiom da laŭleĝaj heredantoj en tiu grupo estas neplenaĝaj aŭ labore malkapablaj. Ekzemple, se postvivis la mortinton nur laborkapabla edzino kaj du infanoj, el kiuj unu estas neplenaĝa, kaj se la mortinto testamente postlasis ĉion al iu tria persono, la neplenaĝa infano rajtas ricevi du trionojn de unu triono de la tuta havaĵo, t.e. du naŭonojn.

4. Similaj deklaroj

Heredaj kontraktoj ne estas rekonitaj kiel jure validaj, dum kondicilo en la kutima jura senco ne estas konata. Ĉiu esprimo de la lasta volo farita en preskribita formo estas nomita testamento. Ne ekzistas kia ajn simila deklaro. La sola escepto estas la rajto de ĉiu civitano, havanta mondeponaĵon en la Ŝtata Banko aŭ en la Ŝtata

Ŝparbanko de USSR, doni instrukcion al la Banko, ke ĝi pagu la deponaĵon al iu difinita persono aŭ al la ŝtato post la morto de instruĉiinto. Por tiu instrukcio ne validas la formalajoj de testamento, nek la mondeponaĵo formas parton de la hereda maso. Se instrukcio ne estas donita, la deponaĵo transiras al la heredantoj laŭ la preskriboj de la hereda juro.

5. Aliaj aferoj

Utilas aldoni, ke la nunvalida hereda juro donas multe pli grandan liberecon de dispono pri havaĵo okaze de morto, ol tion faris la antaŭa.

ATINGOJ KAJ MALSUKCESOJ DE UNUIGINTAJ NACIOJ

Okaze de la 30-jara datreveno de la fondiĝo

I. Enkonduko

En la lastaj ses jardekoj okazis radikalaj ŝanĝoj ankaŭ en la politika kaj jura strukturo de la mondo. En la mezo de tiu ĉi eventoplana periodo troviĝas la fondiĝo de la nova monda organizaĵo de ŝtatoj. Antaŭ 30 jaroj, la 26-an de junio 1945, dum la ferma kunsido de la Konferenco en San Francisko estis solene subskribita la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj. Kelkajn monatojn poste, la 24-an de oktobro de la sama jaro, ĝi ekvalidis, ĉar tiun tagon estis atingitaj la ratifoj de 29 Membroj-Fondintoj inkluzive la kvin grandajn potencojn, kiel preskribis art. 110 de la Ĉarto mem. La 10-an de januaro 1946, je la 4-a horo posttagmeze, en la Centra Halo de la fama Westminster-Palaco en Londono komenciĝis la Unua Sesio de la Ĝenerala Asembleo en la ĉeesto de la reprezentantoj de la 51 Ŝtatoj-Membroj, kaj Unuiĝintaj Nacioj eklaboris.

Nun la Organizaĵo funkcias 30 jarojn. En la vivo de la homaro tio verŝajne estas malpli ol unu sekundo en la meza vivo de unuopa homo. Sed same kiel tiu unu sekundo, aŭ eĉ ĝia frakcio, povas esti fatala por la ekzisto de individuo, tiel same 30 jaroj, aŭ eĉ multe malpli, povas esti decidaj por la homaro.

Fariĝis jam vasta kutimo memori diversajn datrevenojn.

Se iu el ili meritas ĝeneralan atenton, do certe la datreveno de la naskiĝo de UN. Ne por celebri aŭ jubili, sed ĉefe por vekti la konsciencojn per objektivaj analizoj kaj realecaj praktikoj de la perspektivoj.

Ni do ekzamenu almenaŭ plej koncize la ĉefajn atingojn kaj malsukcesojn en tiu ĉi unua periodo de ekzistado de UN. Tamen, antaŭ ol tion fari, ŝajnas utile ĵeti rapidan rigardon al la etapoj, kiuj rezultigis la fondon de la Organizaĵo. Tio sendube helpas al pli bona kompreno de la rolo, kiun ĝi ludis ĝis nun, kaj de ĝiaj eblecoj por la estonteco.

II. Etapoj

La baza problemo de la homaro estis dum jarcentoj, kaj bedaŭrinde ankoraŭ restas, tiu de paco kaj milito. Ju pli progresis la sciencoj kaj tekniko, des pli kreskis la detrua povo de ĉiam pli perfektaj armiloj, kaj des pli grandaj fariĝis la danĝeroj ĝis oni atingis la hodiaŭan staton, kiam la probemo transformiĝis en demandon ĉu kunekzisti aŭ ne plu ekzisti.

Antaŭ la Unua Mondmilito Eŭropo ankoraŭ estis la centro de la mondo, sed samtempe ankaŭ la ĉefa fonto de konfliktoj kaj militoj. La antagonismaj interesoj de la grandaj potencoj; la kreskantaj malfacilaĵoj inter la Eŭropaj Metropoloj kaj iliaj koloniaj posedaĵoj; la malkontento de la subpremitaj nacioj precipe en Aŭstrio-Hungario kaj en Cara Ruslando; diversaj revoluciaj movadoj celantaj pliboniĝon de la vivnivelo de la amasoj aŭ eĉ renverson de la tuta ekonomia-socia sistemo – ĉio ĉi prezentis daŭran minacon al la establita ordo kaj paco.

La sistemo de rimedoj por konservi la pacon konsistis el kelkaj ĝenerale akceptitaj principoj de internacia juro, laŭ kiu, tamen, eĉ agresa milito ne estis malpermesita, kaj el pluraj interkonsentoj pri disdivido de sferoj de influo kaj ekvilibro inter la grandpotencoj. Reto da diplomaciaj kanaloj servis por solvado de malkonsentoj unuavice per la tro klasikaj rimedoj: traktado, mediacio kaj konciliado. La provoj kodiĝi parton de internacia juro donis minimumajn rezultojn. En 1899 estis fondita la t.n. Konstanta Arbitracia Kortumo, kies nomo, tamen, neniel respondis al la enhavo, ĉar ĝi estis nek kortumo, nek konstanta: „konstanta” estis nur la listo de arbitraciaj juĝistoj, el kiu la ŝtatoj, se ili tion deziris, povis elekti la juĝontojn de iliaj disputoj. Nur kelkaj interŝtataj organizaĵoj estis fonditaj kaj funkciis. Menciindaj estas la Ĝenerala Poŝta Unio, fondita en 1847, kaj la Internacia Telegrafa Unio, establita en 1865.

Tiu tuta sistemo kolapsis la 24-an de junio 1914, kiam la kugloj elpafitaj en Sarajevo mortigis la arkidukon de Aŭstrio Francisko Ferdinando, kaj ekruligis la Unuan Mondmiliton. Post kvar jaroj da sangado la politika mapo de la mondo ŝanĝiĝis. Du grandaj imperioj malaperis, aliaj skuiĝis, ĉiuj ŝtatoj malfortiĝis. El la ruinoj de Aŭstrio-Hungario formiĝis novaj ŝtatoj, dum la Oktobra Revolucio iniciatis kaj poste firmigis reĝimon neniam antaŭe spertitan, kaj la Soveta Ŝtato baldaŭ fariĝis unu el la ĉefaj faktoroj en internaciaj rilatoj.

En tiaj kondiĉoj estis fondita Ligo de Nacioj. Formale, ĝia baza koncepto estis konservo de la monda paco; fakte, ĝi celis eternigi la novajn potencrilatojn, kiujn rezultigis la milito. Sistemo de kolektiva reago je agreso devis garanti la sekurecon de ĉiu ĝia membro. Paŝo antaŭen estis farita per la kreo de la Internacia Kortumo de Justico, tamen kun limigita kompetenteco, nome nur por solvado de difinitaj kategorioj de interŝtataj disputoj kaj kondiĉe, ke la partioj libervole submetiĝu al ĝia juĝo. La sistemo de mandatoj, kvankam ne perfekta, iniciatis la postan liberiĝon kaj sendependiĝon de koloniaj popoloj. Samtempe la Pactraktatoj rekonis certgrade la principon de memdeterminiĝo en Eŭropo kaj garantiis difinitajn rajtojn al naciaj kaj etnaj minoritatoj en kelkaj ŝtatoj, sed ne en ĉiuj.

En dudek jaroj de sia ekzisto – de 1920 ĝis 1939 – la Ligo ne plenumis la esperojn. Ĝi havis multajn organizaajn kaj aliajn mankojn, kiuj nur reflektis la tiaman politikan realaĵon en la mondo. Unu el ili, certe ne la malplej grava, estis la foresto de pluraj ŝtatoj. Usono revenis al politiko de izolismo kaj neniam aliĝis, kvankam Wilson, ĝia prezidento, estis la iniciatinto de la Organizaĵo. Germanio estis akceptita nur en 1926, sed ĝi ekŝiĝis en oktobro de 1933. Soveta Unio aliĝis en 1934, kiam nek Germanio, nek Japanio estis plu membroj. La Ligo, do, neniam estis universala monda organizaĵo.

Proksimume ekde 1933 ĉiam pli klare evidentiĝis du ĉefaj evolulinioj de la monda politiko. Unuflanke troviĝis la ŝtatoj grupiĝintaj en la Ligo. Kvankam iliaj interesoj ofte konfliktis, tamen ili havis almenaŭ unu komunan aspiron: la konservon de la paco. El iom fora distanco kun ili simpatiis Usono. Aliflanke estis la „malkontentaj” potencoj: Germanio de Hitler, Italio de Mussolini kaj Japanio.

La venko de Hitlerismo en Germanio en 1933 signifis, interalie, la komenciĝon de aperte agresiva politiko de tiu ŝtato kaj de ĝiaj du postaj aliancanoj en la triopo. Eluzante la malforton de la Ligo kaj la malkonkordon de siaj kontraŭuloj, Germanio de Hitler ne nur malobservis ĉiujn siajn devojn laŭ la internacia juro, sed ankaŭ piedpremis siajn proprajn solenajn deklarojn en la realigado de sia agresiva politiko.

La eventoj viciĝis fulmorapide. En 1933 Germanio ekŝiĝis el la Ligo; en 1935 Hitler forĵetis ĉiujn klaŭzojn de la Versaja Traktato, kiuj rilatis al malpermeso de ĝenerala deviga soldatservo kaj de milita aerforto; en 1938 li alproprigis Aŭstrion kaj en la sama jaro li dismembrigis Ĉeĥoslovakion; en marto 1939, li faris novan krimon kontraŭ tiu lando kaj forprenis de ĝi la restaĵojn de sendependeco. Paralele, Italio agrese akiris Abisenion kaj Albanion, dum la armeoj de Japanio konkeradis ĉiam pli vastajn teritoriojn de Azio.

La 22-an de majo 1939 Germanio kaj Italio subskribis en Berlino la Traktaton pri Milita-Politika Alianco. La internacia streĉiteco kreskis de tago al tago. Hitler bone sciis, ke li riskos multon. Li ankaŭ sciis, ke ne estis eble por Germanio militi sur du frontoj, sed la malkonkordo de liaj kontraŭuloj helpis liajn planojn. Tute neatendite, vere sensacie por la tiamamondo, Moskvo kaj Berlino subskribis la faman traktaton pri reciproka neatakado. Tio, eble, donis iom da tempo al Soveta Unio, sed tio ankaŭ malligis la manojn de Hitler.

La 1-an de septembro 1939 Hitler atakis Pollandon kaj per tiu ago faris novan krimon kontraŭ internacia juro, ĉar la Pakto Briand-Kellog (1928) deklaris la militon eksterleĝa. La Poloj heroece rezistis dum kelkaj tagoj, sed ne povis elteni la premon de la nazia militmaŝino, al kiu aldoniĝis la sovetaj armeoj, kiuj invadis Pollandon el Oriento. Britio kaj Francio reagis je la agreso. Ekplodis la Dua Mondmilito – la plej sanga kaj la plej terura, kiun iam spertis la homaro. La sistemo de kolektiva sekureco de la Ligo plenkolapsis.

La Dua Mondmilito havis por ĉiuj nacioj, kiujn minacis la nazi-faŝisma agresemo, defendan aŭ liberigan karakteron. Ne temis nur, kiel en la antaŭaj militoj, pri korektado de tiu aŭ alia limo, pri kontentigado de tiu aŭ alia nacia aspiro, pri konkerado aŭ perdo de ekonomiaj pozicioj. En la Dua Mondmilito temis pri fakta regado de la mondo fare de la agresintoj kaj, sekve, pri esto aŭ neesto por ĉiuj aliaj popoloj. En septembro, 1940, la akso Berlino-Romo estis longigita ĝis Tokio, kiam estis subskribita la fama Triopa Pakto inter la tri agresaj reĝimoj. En ĝi estis dirite: „Japanio konsideras kaj rekonas la gvidadon de Germanio kaj de Italio en la konstruado de la nova ordo en Eŭropo. Germanio kaj Italio konsideras kaj rekonas la gvidadon de Japanio en la konstruado de la nova ordo sur la granda orientazia spaco”. Tio estis la esenca punkto de la Triopa Pakto. Ne nur la senhonte proklamitaj celoj de la Akso, sed ankaŭ la praktiko en la okupitaj landoj klare montris, ke la

venkitaj popoloj estos sklavigitaj aŭ ekstermitaj kaj ke la liberaj nacioj perdos sian sendependecon. Tial, el vidpunkto de la atakitaj landoj, la milito estis liberiga: per sia defendo la atakitaj popoloj celis konservi aŭ reakiri siajn liberecon kaj sendependecon.

Ĝuste tiu karaktero de la milito, kaŭzita de la finaj celoj de la Akso, diktis la formiĝon de komuna politika bazo, sur kiu iom post iom konstruiĝis la Unuiĝintaj Nacioj.

La milito havis du fazojn. La unuan, de septembro 1939 ĝis la fino de 1942, markis spektaklaj venkoj de la Akso; en la dua, de 1943 ĝis 1945, la Aliancanoj ne nur reakiris la perditajn teritoriojn, sed ankaŭ sukcesis transporti la militajn operaciojn en la landojn de la agresintoj kaj fine devigi ilin al senkondiĉa kapitulaco. Italio subskribis la kondiĉojn de kapitulaco la 3-an de septembro 1943, sed la kapitulaco mem okazis nur la 11-an de septembro; Germanio kapitulacis la 7-an de majo kaj Japanio deklaris sian kapitulacon la 14-an de aŭgusto 1945, sed la aktoj mem estis subskribitaj la 2-an de septembro sur la militŝipo „Missouri” en la golfo de Tokio kaj la 9-an de septembro por la ĉina militscenejo.

Paralele kun la pliboniĝado de la milita situacio sur la frontoj, la ideo pri kreo de nova tutmonda organizaĵo por konservo de la paco ricevadis ĉiam pli konkretajn formojn.

Sur la vojo al tiu celo estas sufiĉe klare distingeblaj kvar etapoj: la unuan karakterizas la harmoniigo de la vidpunktoj inter la Aliancanoj, kaj ĝi finiĝas per la akcepto de la Deklaracio de 26 ŝtatoj la 1-an de januaro 1942; la dua finiĝas per la plifortiĝo de la Alianco dum la gravaj konferencoj de Moskvo, Teherano kaj Kairo fine de la j. 1943; la trian etapon signas la ellaboro de la bazaj principoj de la nova organizaĵo en Dumbarton Oaks en aŭgusto-septembro 1944; la kvara finiĝas per akcepto de la Ĉarto fine de junio 1945 en San Francisko.

(i) La plej grava dokumento en la unua periodo estas la Atlantika Ĉarto, kiun ellaboris kaj proklamis la 14-an de aŭgusto 1941 Roosevelt kaj Churchill. Al ĝi poste aliĝis ankaŭ la ceteraj membroj de la kontraŭhitlera koalicio. Soveta Unio deklaris sian aprobon de la Ĉarto en septembro 1941.

En la Ĉarto Usono kaj Britio deklaris, ke ili ne postulas teritoriajn pligrandigojn, sed ke ili ankaŭ ne akceptos kiun ajn teritorian ŝanĝon, kiu ne estus farita kun la aproboj de la koncernaj popoloj. La du grandaj potencoj promesis respekti la rajton de ĉiu popolo „elekti la formon de regado, en kiu ĝi deziras vivi”. La aliaj principoj estis: ekonomia kunlaborado de ĉiuj nacioj kun la celo atingi ekonomian progreson kaj socian sekurecon; partopreno de ĉiuj ŝtatoj en la mondkomerco kaj en la utiligo de la fontoj de krudmaterialoj; libera navigado sur ĉiuj maroj; restarigo de tia paco, kiu certigos al la nacioj sufiĉajn rimedojn por trankvila vivo interne de iliaj limoj; senarmigon de la agresaj nacioj. La agprogramo de la brita-usona-soveta koalicio celis la nuligon de rasa ekskluziveco, la restarigon de egaleco inter la nacioj, la liberigon de la subjugitaj popoloj kaj la restarigon de iliaj suverenaj rajtoj, la restarigon aŭ establon de demokrataj liberecoj kaj la detruon de la nazia aŭ faŝisma reĝimoj.

La programo estis sufiĉe larĝa kaj sufiĉe kuraĝiga. Ĝin akceptis ne nur ĉiuj ŝtatoj de la kontraŭaksa koalicio, sed ĉirkaŭ ĝi ankaŭ kolektiĝis milionaj amasoj tra la tuta mondo.

La akcepto de la Atlantika Ĉarto fare de ĉiuj ŝtatoj-viktimoj de la agreso, prezentis la necesan politikan bazon por firmigo de la kontraŭhitlera koalicio per novaj sindevigoj. La 1-an de januaro 1942 la reprezentantoj de 26 ŝtatoj subskribis en Vaŝingtono gravan dokumenton, konatan laŭ la nomo Deklaracio de Unuiĝintaj Nacioj. En ĝi ili deklaris, ke plena venko estas nepre necesa por protekto de la vivo, libereco, sendependeco, homaj rajtoj kaj justeco. La 26 Unuiĝintaj Nacioj devigis sin ne konkludi apartan armisticon aŭ pacon kun kiu ajn el la malamikaj ŝtatoj.

La ŝtatoj, kiuj subskribis tiun Deklaracion aŭ kiuj poste aliĝis al ĝi, estis kutime nomataj „Unuiĝintaj Nacioj”. De tie originas la nomo de la nuna monda organizaĵo.

Kelkajn tagojn post la subskribo, la 6-an de januaro 1942, Roosevelt diris interalie: „Ni hodiaŭ batalas por la sekureco, por la progreso, por la paco, ne nur por ni mem, sed por ĉiuj homoj; ne nur por unu generacio, sed por ĉiuj generacioj”.

(ii) En 1943 la agresintoj suferis grandajn militajn malsukcesojn. En tiaj cirkonstancoj okazis fine de 1943 la grandaj konferencoj en Moskvo, Teherano kaj Kairo.

Por la formiĝo de Unuiĝintaj Nacioj apartan gravecon havas la Moskva Konferenco, kiu daŭris de la 9-a ĝis la 30-a de oktobro. Ĝin partoprenis la ministroj pri eksterlandaj aferoj de Soveta Unio, Usono kaj Britio. La tri ŝtatoj, interalie, akceptis la Deklaracion pri ĝenerala sekureco. Por la unua fojo oni klare parolis pri la fundamento, sur kiu devos baziĝi la estonta internacia organizaĵo. Ĝi estis la principo de suverena egaleco de ĉiuj pacemaj ŝtatoj. Oni do ne rekonis egalajn rajtojn al ĉiuj ŝtatoj, sed nur al tiuj, de kiuj oni povis atendi paceman politikon. Aliflanke estis rekonita plena jura egaleco de la suverenaj ŝtatoj, kio signifas ke la suvereneco de unu ŝtato estas limigita de same tia suvereneco de kiu ajn alia ŝtato.

(iii) La plua favora evoluo sur la batalkampoj kaj la principa akordiĝo pri la neceso fondi novan internacian organizaĵon ebligis la kunvokon de aparta konferenco por ellabori la projekton de statuto por tiu organizaĵo. La Konferenco okazis en Dumbarton Oaks en aŭgusto kaj septembro 1944. Ĝi estis konferenco ne de politikistoj, sed de fakuloj. La rezulto de ĝia plursemajna laboro estis projekto entenanta la bazajn principojn kaj regulojn, sur kiu devus esti konstruita la nova organizaĵo.

La projekto antaŭ ĉio emfazis, ke la ĉefa celo de la organizaĵo devas esti „la konservo de internaciaj paco kaj sekureco, kaj la tiucela stablo de efikaj kolektivaj rimedoj”. Estis, do, akceptita la principo de kolektiva sekureco. El la aliaj principoj, aparte menciindaj estas la suverena egaleco de ĉiuj pacemaj ŝtatoj; la rezigno pri perforto kiel rimedo por solvado de internaciaj malkonsentoj; la observo de internacia juro kaj bonfida plenumado de la akceptitaj sindevigoj. Estis ellaboritaj ankaŭ sufiĉe detalaj reguloj rilate la organojn de la nova organizaĵo kaj iliajn funkciojn.

Pri unu punkto ne estis eble atingi interkonsenton. La membroj de la Konferenco havis malsamajn vidpunktojn koncerne voĉdonadon en la estonta Konsilo de Sekureco Tiu demando estis solvita nur poste, dum la Konferenco de

Jalta, en februaro 1945. Tie Roosevelt, Churchill kaj Stalin interkonsentis pri la principo de unanimeco de la kvin konstantaj membroj de tiu organo, nome Usono, Soveta Unio, Britio, Francio kaj Ĉinio.

(iv) La projekto de Dumbarton Oaks servis kiel bazo por la diskutoj de la granda Konferenco de Unuiĝintaj Nacioj, kiu ellaboris kaj akceptis la definitivan tekston de la Ĉarto. Ĝi okazis en la lastaj tagoj de la milito, inter la 26-a de aprilo kaj 26-a de junio 1945 en San Francisko.

Por doni ideon pri la grandeco kaj la laboro de la Konferenco, sufiĉas mencii, ke ĝin partoprenis la reprezentantoj de 50 ŝtatoj. Entute ĉeestis 282 delegitoj kaj 1444 fakuloj aŭ konsilantoj. Dum du monatoj entute okazis 335 kunsidoj de la pleno, apartaj komisionoj kaj diversaj komitatoj.

La Ĉarto de UN havas 19 ĉapitrojn kun entute 111 artikoloj. Al la Ĉarto estas aldonita la Statuto de la Internacia Kortumo, kiu havas pliajn 5 ĉapitrojn kun 70 artikoloj. (La Esperanta traduko de la Ĉarto, kiel amendita en 1963 kaj 1965, kiel ankaŭ de la Statuto aperis en 1970 sub aŭspicio de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj. Ĝi estas havigebla ĉe la libroservo de UEA).

La milito finiĝis. La lukto por la paco komenciĝis.

III. Idealoj kaj Realo

La celoj de kiu ajn milito ne povas ne reflektiĝi, almenaŭ ĝis certa grado, en la organizo de la paco. Aliflanke, necesas ĉiam preni en konsideron ankaŭ la novajn fortorilatojn. Tiuj du faktoroj esprimiĝis ankaŭ en la strukturo de UN.

En la Solena Enkonduko de la Ĉarto eĥas la idealoj proklamitaj dum la milito: savi la estontajn generaciojn de tiu plago, kiu dufoje en la daŭro de unu homa vivo trudis al la homaro neeldireblajn suferojn; rekonfirmi la kredon je la fundamentaj homaj rajtoj, je la digno kaj valoro de la homa persono, je egalaj rajtoj de viroj kaj virinoj kaj de nacioj grandaj kaj malgrandaj; respektigi la devojn resultantajn el traktatoj kaj aliaj fontoj de internacia juro; antaŭenigi socian progreson kaj atingi pli altan vivnivelon en pli granda libereco. La idealoj estas precizigitaj en art. 1 de la Ĉarto, kiu formulas la celojn de la Organizaĵo, kaj en art. 2, rilatanta al ĝiaj bazaj principoj.

Inter la celoj la unuan lokon okupas la internacia paco kaj sekureco. Por realigi ĝin la Ĉarto kreis duoblan maŝinaron: unuflanke troviĝas aro da rimedoj por paca solvado de internaciaj disputoj, inkluzive la juĝojn de la Internacia Kortumo (ĉap. VI); aliflanke – en kazoj de minaco al paco, rompoj de la paco aŭ agoj de agreso – la Ĉarto antaŭvidis kolektivajn agadojn, inkluzive eventualan uzon de militfortoj kontraŭ la agresinto, ĉio laŭ la decido de la Konsilo de Sekureco (ĉap. VII), al kiu la Ŝtatoj-Membroj transdonis la ĉefan respondecon sur tiu kampo (art. 24). Estis tute klare en 1945, same kiel estas klare hodiaŭ, ke paco kaj sekureco dependas de la kvin grandaj potencoj, hodiaŭ eble eĉ nur de la du superpotencoj. Tiu politika realaĵo trovis adekvatan esprimon en la fama regulo, ke por ĉiuj decidoj de la Konsilo de Sekureco, kun la escepto de tiuj koncerne procedurajn demandojn, necesas plimulto de 7 membroj el 11 (nun 9 el 15), inkluzive ĉiujn 5 konstantajn membrojn. Nur kiam

la Konsilo faras decidojn pri paca solvado de konfliktoj, la partio en disputo devas sin deteni voĉdoni, eĉ se temas pri unu el la konstantaj membroj. Sed en tiuj kazoj la decidoj estas fakte rekomendoj, kiuj ne estas devigaj.

La sama politika realaĵo kaŭzis la aŭtomatan reprezentiĝon de la 5 grandpotencoj en la Kuratoreca Konsilo (art. 86) kaj, fakte, ankaŭ en aliaj organoj, sed sen la apartaj privilegioj, kiujn ili havas en la Konsilo de Sekureco.

La baza principo de suverena egaleco manifestiĝis unuavice en la Ĝenerala Asembleo. En ĝi ĉiu Ŝtato-Membro havas unu voĉon kaj ĉiuj voĉoj estas same valoraj. Tamen, la granda plimulto de la decidoj de tiu organo, senkonsidere al la formo en kiu ili estas akceptitaj, havas karakteron de rekomendoj kaj ili ne estas jure devigaj. Tio ne signifas ke ili estas neglekteblaj. Se akceptitaj unuanime aŭ per grandega plimulto de voĉdonoj, ili sendube havas konsiderindan moralan pezon kaj efikas pozitive.

Evidente, la Ĉarto malpermesas ĉian ajn agon de agreso aŭ alispecan rompon de la paco. Post la Pakto Briand-Kellog, post la procesoj de Nürnberg kaj Tokio kontraŭ la militkrimuloj, ne povas esti alimaniere. Tamen eĉ hodiaŭ, post jaroj da laboro kaj centoj da kunsidoj de aparta komisiono, agreso ankoraŭ ne estas difinita, kaj ĉiu interpretas ĝin laŭ siaj politikaj celoj.

Diference de la antaŭmilita Konstanta Kortumo de Internacia Justico, kiu ne estis organo de la Ligo, la nuna Internacia Kortumo estas organo de UN. Malgraŭ la atendoj, ke ĝi havos pli grandan kompetentecon, devigan almenaŭ por kelkaj kategorioj de disputoj, ĝiaj povoj restis esence la samaj, kiel tiuj de la antaŭa: la partioj mem decidas ĉu ili submetos iun kazon al la Kortumo aŭ ne.

Tiu ĉi sistemo de kolektiva sekureco montriĝis ĝis nun nekapabla limigi sinarmadon, precipe ne per nukleaj armiloj. Malgraŭ la fakto, ke jam pli ol dudek jarojn disvolviĝas la traktatoj pri senarmigo, malgraŭ la diskutoj en la sino de la Komitato pri Senarmigo en Ĝenevo (Konferenco de Dudekses Nacioj), la konkurado en sinarmado plu daŭras kaj la militbuĝetoj estas pli altaj ol iam antaŭe. La sola modesta rezulto estis la Traktato pri la malpermeso de difinitaj nukleaj testoj.

Siavice, ankaŭ la defendbuĝetoj de malgrandaj kaj mezgrandaj ŝtatoj vaste transprenas iliajn eblecojn. Tiuj elspezoj estas ofertataj je la kostoj de ekonomia evoluo, edukado kaj aliaj utilaj celoj. Ĝi estas unu el la kaŭzoj de la nuntempaj ekonomiaj perturboj ĉie en la mondo.

Militoj, kiujn oni eŭfemisme nomas „armitaj konfliktoj”, plu okazas en diversaj mondopartoj. Pluraj nesolvitaj aŭ duonsolvitaj internaciaj ĉefdisputoj minacas ĉiumomente eksplodigi aliajn aŭ vastigi la ekzistantajn. En la lastaj 30 jaroj la homaro kelkfoje estis ĉe la rando de abismo. Sufiĉas memori pri la krizoj de Berlino, Kubo, Koreo, Proksima Oriento, Vjetnamio k.a. Kvankam la Organizaĵo montriĝis senpova, ĉefe pro la kontraŭaj interesoj de la grandpotencoj, tamen la ekzisto mem de UN verŝajne helpis, almenaŭ parte, ke la regionaj militoj ne universaliĝu. La premo de la negrandaj ŝtatoj en la Ĝenerala Asembleo ne ĉiam povis esti tute malatentata kvankam, tro ofte, ĝi estis troigita kaj kelkfoje kaŭzis pli da malbono ol da bono. Krome, ne sole la oficialaj kunvenoj, sed ankaŭ la koridoroj,

restoracioj kaj bufedoj de la Sekretariato prezentiĝis kiel taŭgaj renkontiĝejoj de diplomatoj, kiuj en krizaj cirkonstancoj hezitus kontaktiĝi aliloke. Ĝuste tiuj diskutoj kaj kontaktoj plurfoje generis, almenaŭ provizorajn aŭ duonajn solvojn.

Estas neeble diri, ĉu la ekzisto de UN malebligis la eksplodon de la Tria Mondmilito, sed la ĝenerala opinio estas, ke sen UN la homaro kredeble estus pli proksima al sia detruigo en tiu fina katastrofo. Komprenoble, tio estas ege malmulte en la lumo de la origina celo, sed tamen pli multe ol nenio.

La dua granda celo estas ebligi al la popoloj decidi mem pri sia sorto. La Deklaracio pri Neaŭtonomaj Teritorioj (ĉap. 11 de la Ĉarto) entenas detalojn por la realigo de la tasko. UN abolis la mandatojn de la Ligo kaj enkondukis internacian kuratorecan reĝimon kun aparta organo por prizorgi justan administradon de teritorioj sub kuratoreco kaj emancipiĝon de iliaj popoloj ĝis plena sendependiĝo. Sur tiu ĉi kampo UN atingis rimarkindajn rezultojn. En 1945 ĉ. 45 % de la homaro vivis sub la kolonia reĝimo; en 1970 nur 3 % estis en tiu stato; hodiaŭ koloniismo estas preskaŭ komplete abolita. Novaj ŝtatoj ekestis en la regionoj de la iamaj kolonioj aŭ sur aliaj dependaj teritorioj, kaj aliĝis al UN. Por multaj el ili UN estas preskaŭ la sola loko, en kiu ili povas havi diplomaciajn kontaktojn kun la cetera mondo. Restas nur kelkaj nesolvitaj koloniaj problemoj, inter kiuj la demando de Sudokcidenta Afriko (Namibio) estas la plej doloriga. Restas ankaŭ la problemo de nacia memdeterminiĝo en la kadro de unuopaj ŝtatoj, sed tiun tiklan demandon UN ne kuraĝas tuŝi.

La nombro de Ŝtatoj-Membroj de UN kreskis de 51 fondintoj en 1945 al preskaŭ trioblo (142) en 1975. UN estas pli ampleksa ol iam estis la Ligo. Ĝia universaleco estas per si mem pozitiva atingo.

La tria baza celo estas kunlaboro por solvadi problemojn de ekonomia, socia, kultura kaj humaneca karaktero, kaj por progresigi la respekton al Homaj Rajtoj kaj fundamentaj liberecoj. Pri tiuj demandoj ĉefe okupiĝas la Ekonomia kaj Socia Konsilo, kaj dudeko da specialigitaj institucioj ligitaj al UN. Inter ili troviĝas Unesko, Internacia Organizaĵo de Laboro (ILO), Organizaĵo por Nutrado kaj Agrikulturo, Monda Organizaĵo pri Sano, Monda Poŝta Unio k.a. La laboro de UN kaj de la multnombraj institucioj en la t.n. familio de UN por helpi ekonomie la evoluantajn landojn, por elimini analfabetecon, maltoleremon kaj malobservadon de homaj rajtoj ne estas neglektebla, sed ankaŭ sur tiu ĉi kampo la egoismaj interesoj de unuopaj ŝtatoj, la kreskanta burokratiĝo de la internaciaj sekretariatoj kaj la ofta miopeco de iliaj funkciuloj – eĉ de bonintencaj kaj kompetentaj – bremsas la realigon de rezultoj pli adekvataj al la fortostreĉoj kaj al investitaj kapitaloj. Al tio aldoniĝas la ignorado de la aspiroj de la amasoj kaj la malatentado de seriozaj atentigoj aŭ proponoj, el kiuj unu el la plej gravaj kaj certe la plej amasa estis ĉiu por radikala solvo de la lingva problemo kiel unu el esencaj obstakloj al vastigo de internacia kunlaboro, kiun en oktobro, 1966, transdonis UEA kiel reprezentanto de unu miliono da individuaj subskribintoj kaj pluraj aliaj milionoj kiel membroj de pli ol 4.000 organizaĵoj. Ne eblas apelaciadi al apogo de la amasoj, kiel faras la Sekretariato, kaj samtempe krude neglekti la aspirojn de la amasoj. Ne estas korekte alvokadi ĉiujn al observado de la homaj rajtoj, inkluzive la kulturajn, kaj samtempe praktikadi lingvan diskriminacion en la sino mem de UN.

Iomo estas farita por la progresigo de la homaj rajtoj. La Universala Deklaracio de 1948 akiris pli da aŭtoritato ol la voĉdonintoj intencis doni al ĝi. Same tiel la Deklaracio pri Sendependigo de Koloniaj Landoj kaj Popoloj, kiel ankaŭ la Deklaracio pri Elimino de Rasa Diskriminacio havis pli da efiko ol la foresto de sankcioj povus krediti. Aliflanke, la du paktoj pri la homaj rajtoj, kvankam unuanime akceptitaj de la Ĝenerala Asembleo en 1966, kaj la fakultativa protokolo ligita al unu el ili, ankoraŭ ne ekvalidis, ĉar la ŝtatoj prokrastas la ratifojn. (Analizon de la Universala Deklaracio kaj de la menciitaj faktoj v. en la artikolo „Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj”, publikigita en *Internacia Jura Revuo*, n-ro 3 (8)/1968). Ankoraŭ ne ekzistas internacia aparato por efike protekti la homajn rajtojn kaj, kiel konate, multaj el ili esta plu malobservataj.

Fine, plia menciinda atingo estas la kodigo de parto de internacia juro. La internaciaj konvencioj pri la marjuro, pri la diplomaciaj kaj konsulaj rilatoj, pri la juro de traktatoj, pri la fundamentaj principoj de spacjuro kaj kelkaj aliaj signas paŝon antaŭen en la progresigo de internacia juro, kvankam denove la samaj antagonismaj interesoj malebligis la kodigon de kelkaj pli progresemaj principoj.

IV. Konkludo

Se oni komparas la rezultojn kun la celoj kaj idealoj difinitaj en 1945, oni facile konstatas, ke en la unuaj 30 jaroj UN havas multe pli da malsukcesoj ol da pozitivaj atingoj. El organiza vidpunkto UN kaj la specialigitaj institucioj pli ŝveliĝis kaj evoluis. Aldone al la originaj organoj estis ja kreitaj centoj da komisionoj kaj subkomisionoj, komitatoj kaj subkomitatoj, specialaj, konstantaj aŭ provizoraj laborgrupoj kun diversaj nomoj, sed tio ne helpis la Organizaĵon plenumi la funkcion, kiun oni atendis de ĝi, precipe ne koncerne la konservon de universalaj paco kaj sekureco. En la plej krizaj situacioj oni trovis solvojn, almenaŭ provizorajn kaj paliativajn, ne en UN kaj konforme al ĝia Ĉarto, sed ekster la kadroj de la Organizaĵo. Tiurilate la ekvilibro de teroro bedaŭrinde ludis multe pli gravan rolon ol la ekzisto de UN.

Eĉ kiam la Ŝtatoj-Membroj agis konkorde por atingi ian konkretan celon, kio ne ofte okazis, la manko de sufiĉaj financaj rimedoj kaj la lingvaj malfacilaĵoj obstaklis aŭ eĉ paralizis la laboron. (La nuna uzo de 6 oficialaj kaj laboraj lingvoj en diversaj organoj de UN kostas milionojn da dolaroj jare, kio siavice kontribuas al la financa krizo de la Organizaĵo. Pri la lingva situacio en UN v. la artikolon „La Situation Jurisdique des Langues sous le Réfime des Nations Unies” en *La Monda Lingvo Problemo* 1969, n-ro 2).

Nenio indikas, ke la nuna bedaŭrinda stato povus pliboniĝi en la estonteco, se oni ne frontas energie la radikon mem de la problemo.

Multaj opinias, ke la ĉefa kaŭzo de malsukcesoj ŝuldiĝas al la principo de unuanimeco de la grandpotencoj. Estas fakto, ke la rajto vetoi estas abunde uzata kaj tro ofte misuzata, sed estas ankaŭ vero, ke neniu amendo de la Ĉarto, inkluzive la forigon de la principo de unuanimeco, povas ŝanĝi la politikan realaĵon. Kun tiu principo aŭ sen ĝi, nur konkordo de la grandpotencoj surbaze de iliaj harmoniigitaj

intereso kaj konforme al la Ĉarto, povas efike garantii pacon kaj sekurecon en la mondo. Trygve Lie, la unua Ĝenerala Sekretario de UN, prave skribis: „Koncerne la vetoon ni memoru, ke paca solvado de grandaj politikaj demandoj postulas liberan aprobon kaj konsenton de ĉiuj interesitaj partioj, senkonsidere al la spaco de voĉdona proceduro aplikata en la Konsilo de Sekureco aŭ en la Ĝenerala Asembleo” (Trygve Lie, *In the Cause of Peace*, The Macmillan Company, New York, 1954, p. 424).

Kio, do, pri la estonteco?

La antaŭa Ĝenerala Sekretario, U Thant, kiu verŝajne pli ol kiu ajn alia konis la faktan situacion, antaŭvidis katastrofon, se la Ŝtatoj-Membroj ne konsciigos pri siaj devoj al si mem kaj al la homaro. En sia parolado de la 9-a de majo 1969 li apelaciis al la Ŝtatoj-Membroj subigi siajn malnovajn kverelojn al komuna kunlaborado por limigi la sinarmigan konkuradon, por plibonigi kaj sanigi la homan ĉirkaŭaĵon, por kontroli la minacantan tromultigon de la homaro kaj por akceli la ekonomian evoluon de la mondo. „Se tia monda asociiĝinta kunagado ne estos forĝita en la sekvanta jardeko”, li diris, „mi timas, ke la problemoj, kiujn mi menciis, estos atingintaj tiajn konsternajn proporciojn, ke ili troviĝos ekster nia kapablo kontroli ilin”. Efektive, ĝis certa punkto la politikistoj povas gvidi la eventojn, sed post ĝi la eventoj gvidas ilin. La situacio antaŭ la du grandaj militoj kaj la fiasko de la Ligo instruu nin kaj helpu nin ĉiujn kompreni la danĝerojn, kiuj minacas nin.

Ne temas, do, pri tiu aŭ alia amendo al la Ĉarto, kvankam kelkaj pliaj ŝanĝoj estus dezirindaj. Temas multe pli pri realigo de tiu spirito de kunlaboro, kiu estas antaŭkondiĉo por la apliko de ĉiuj ĝiaj principoj kaj reguloj. Eĉ multe pli perfekta Ĉarto estus nur paperĉifono, se forestas bonfido kaj profunda kompreno, ke la paco hodiaŭ estas nedisigebla kaj en la intereso de ĉiuj. Necesas urĝe renovigi tiun fidon, kiu estis ligita al la naskiĝo de UN antaŭ 30 jaroj, kaj atingi faktan, sinceran sindediĉon kaj de la popoloj kaj de iliaj registaroj al honesta kaj efektiva kunlaborado.

MARKSISMA KONCEPTO PRI ŜTATO KAJ JURO

I. Enonduko

La marksistoj rigardas marksismon kiel kompletan sciencon pri la leĝoj regantaj la naturon kaj socion. Oni pretendas, ke marksismo, se ĝi estas profunde komprenita kaj korekte aplikata, donas ĝustajn klarigojn pri ĉiuj naturaj kaj sociaj fenomenoj, kaj pri ĉiu el ili prenita aparte.

La ĉefa instrumento de marksismo estas la dialektika metodo, kiun Karl Marx prenis de la idealisma filozofio de Hegel. Por Hegel la mondo estas reala nur kiel reflektiĝo de ideoj. Evoluo estas nenio alia ol senfina vojo de internaj kontraŭdiroj, tiel ke negacio de pozitivo kondukas al sintezo sur pli alta ŝtupo, kiu siavice prezentiĝas kiel nova pozitivo kontraŭdirita de sia propra negacio, kaj sekvata de plua sintezo de la du, kaj tiel plu. Marx nur anstataŭigis la Hegelan mondon de ideoj, lian „Absolutan Ideon” kiel la primaran bazon de ĉio Ekzistanta, per materio sur la kampo de la naturo kaj per ekonomia neceso sur tiu de la socio. Lenin iam skribis, ke Marx kaj Engels, „direktante sian rigardon al la vivo, vidis, ke ne la evoluo de la spirito eksplikas la evoluon de la naturo, sed, male, ke la Spirito devas esti eksplikata el la naturo, el la materio”.

La marksisman dialektikan metodon karakterizas kvar fundamentaj principoj.

Antaŭ ĉio ĝi rigardas la naturon kiel tuton, en kiu objektoj kaj fenomenoj estas reciproke kunligitaj kaj kondiĉitaj unu de la alia. Due, ĉio en la naturo moviĝas kaj ŝanĝiĝas: io peras kaj konstante evoluas, dum samtempe io formortas kaj malaperas. Trie, la evoluo de la naturo estas procezo en kiu, rezulte de malgrandaj, nerimarkeblaj kaj laŭgradaj ŝanĝiĝoj, subite okazas evidenta salto en novan kvaliton (kvalita salto). Fine, la evoluon kaŭzas internaj kontraŭdiroj esence propraj, t.e. necese entenataj en ĉiuj objektoj kaj fenomenoj de la naturo: ĉio posedas siajn pozitivon kaj negativon, sian malaperantan kaj evoluantan aspektojn, kaj la interna lukto inter tiuj kontraŭdiraj aspektoj estas la substanco mem de evoluo, kiu kaŭzas la transformiĝon de kvanto en kvaliton sur pli alta nivelo. La evoluprocezo ne turniĝas en cirklo, sed en formo de spiralo senĉese kondukanta supren.

La samaj principoj aplikiĝas al la homa socio.

Ĉiu socia-ekonomia formacio (sklaveca sistemo, feŭdismo, kapitalismo, socialismo) estas unueca tuto, en kiu la unuopaj partoj kaj fenomenoj – la maniero

de produktado, la politika organizo, la mondo de ideoj – estas konektitaj per ligoj de reciproka influo kaj dependeco. Sociaj ideoj, moralo, politikaj institucioj kaj similaj fenomenoj („Superstrukturo”) havas siajn plej profundajn radikojn en la ekonomia strukturo („bazo”) de la socio, sed ili siavice influas la bazon. Same kiel en la naturo, tiel same en la socio, ĉio moviĝas kaj ŝanĝiĝas. La anstataŭigo de unu socia-ekonomia formacio per alia (ekzemple, de feŭdismo per kapitalismo, aŭ de kapitalismo per socialismo), estas revolucia transiro de unu kvalita stato en alian kvalitan staton rezulte de akumuliĝo de kvantaj ŝanĝoj.

La batalo inter antagonismaj klasoj („ekspluatantoj” kaj „ekspluatatoj”), kiuj estas produktoj de la ekonomiaj fortoj en ĉiu formacio kaj esprimas la kontraŭdirojn en la maniero de produktado, nome kontraŭdirojn inter la produktfortoj kaj produktorilatoj, estas la substanco mem de la evoluprocezo en ĉiuj klasaj socioj. Kapitalismo ne povas ekzisti, nek ĝi povas evoluigi siajn fortojn, sen laborista klaso dependanta sole de siaj salajroj kiel rimedoj de ekzisto. Tiu ĉi proletaro, kontraŭstaranta la kapitalistojn kaj ĉiam pli amase laboranta en fabrikoj kaj minejoj por produkti riĉaĵojn por la proprietuloj de la produktorimedoj, fariĝas ĉiam pli potenca kaj konscia pri siaj klasaj interesoj. Sur difinita evoluŝtupo – kiam la produktorilatoj (klasaj rilatoj) ne plu respondas al la produktfortoj – la organizita proletaro renversas la kapitalisman sistemon kaj establas socialismon, kiu necese kondukas al komunisma senklasa socio. Laŭ la marksismo, nur la plej evoluintaj kapitalismaj landoj – kun alte sociiĝinta laboro, unuflanke, kaj ekstreme koncentrita kapitalo, aliflanke – estas maturaj por transiro al socialismo.

Al ĉiu socia-ekonomia formacio respondas difinita tipo de ŝtato kaj juro: ŝtato bazita sur propio de sklavoj, feŭda ŝtato, burĝa kapitalisma ŝtato kaj socialisma ŝtato.

II. Ŝtato

Laŭ marksismo, ŝtato kaj juro apartenas al la t.n. fenomenoj de superstrukturo. Engels, la plej intima amiko kaj sekvanto de Marx, skribis en sia fama verko *Anti – Dühring* (1878), ke „... la ekonomia strukturo de la socio ĉiam formas la realan bazon, kiu, en la lasta linio, eksplikas la tutan superstrukturon de juraj kaj politikaj institucioj, kiel ankaŭ de religiaj, filozofiaj kaj aliaj konceptoj de ĉiu historia periodo”. Marx kaj Engels opiniis, ke la ekonomia strukturo de la socio estas la materia bazo de tiaj sociaj fenomenoj.

En sia verko *Kritiko de Politika Ekonomio*, publikigita en 1859, Marx asertis, ke la tuta sumo de la produktorilatoj „formas la ekonomian strukturon de la socio, la realan fundamenton sur kiu leviĝas la jura kaj politika superstrukturo, kaj al kiu respondas difinitaj formoj de socia konscio”. Kaj li daŭrigis: „La maniero de produktado de la materia vivo kondiĉas la socian, politikan kaj ĝenerale intelektan procezon”.

La ĉefa kaŭzo de la ekesto de ŝtato estas la dividiĝo de la primitiva, senklasa socio en malamikajn, antagonismajn klasojn. La bezono sin defendi kontraŭ atakojn el ekstere, se ĝi fakte ekzistis, povis nur rapidigi tiun ĉi procezon, sed ĝi ne estis

esenca por la naskiĝo de la ŝtato. Esenca estas la dividiĝo de la scio en klasojn. La genta organizo „diskrevis pro la divido de laboro kaj ĝia rezulto, la dividiĝo de la socio en klasojn”, kaj „ĝian lokon prenis la ŝtato” (Engels).

Lenin esprimis plurfoje la saman opinion, interalie ankaŭ en la prelego farita en julio de 1919 en la Universitato Sverdlov. Li diris: „Kaj tiel, kontemplantе la ŝtaton, vi vidas – kiel mi diris – ke la ŝtato tutsimple ne ekzistis antaŭ la dividiĝo de la socio en klasojn, sed ke, ekde la momento kiam tiu ĉi dividiĝo ekestas kaj firmiĝas, ekestas kaj firmiĝas la ŝtato”.

Ĉiu ŝtato estas instrumento de regado de unu klaso, „maŝinaro de subpremo”, uzata kontraŭ la alia klaso. Ĝia celo estas konservi, fortikigi kaj evoluigi tiun ekonomian kaj socian sistemon, kiu plej bone respondas al la interesoj de la reganta klaso, kiel determinite de la maniero de produktado.

Laŭ la marksismo, la kapitalisma socio – simile al ĉiuj aliaj ekonomiaj-sociaj formacioj, kiuj antaŭis ĝin en la historio kaj kiuj estis bazitaj sur privata proprieto de la rimedoj de produktado – estas dividita en antagonismaj klasoj, konsistantaj el proprietoj kaj el tiuj, kiuj estas senigitaj de la produktorimedoj, la ekspluatantoj kaj la ekspluatatoj. La burĝa ŝtato – kia ajn ĝia konkreta politika formo – estas la plej potenca instrumento por subpremi la proletaron kaj por progresigi la interesojn de la reganta klaso, sed ĝi estas kondamnita je morto pro ĝiaj internaj antagonismaj kontraŭdiroj. Kiam la menciitaj kontraŭdiroj atingas sian pinton, la subpremitaj amasoj abolas la burĝan ŝtaton per socia revolucio, forbalaas la lastan ekspluatantan klason kaj formas socialisman ŝtaton kun la proletaro kiel reganta klaso.

Inter kapitalismo kaj socialismo troviĝas periodo de revolucia transformiĝo de la socio, aŭ revolucia transiro de la kapitalisma sistemo en komunisman senklasan socion. Ĝi estas la periodo, dum kiu ĉiuj institucioj, kiuj ekestis en la klasa socia organizo surbaze de privata proprieto, devas esti detruitaj. Simultane estas kreataj novaj institucioj, kiuj kondukas al la realigo de senklasa socio, en kiu, interalie, ŝtato kaj juro ne plu ekzistas.

Laŭ la marksisma koncepto, la proletaro kiel reganta klaso tutcerte bezonas la ŝtaton, ĉar senklasa kaj senŝtato socio ne povas esti establita tuj post la revolucio. „La proletaro – estas dirite en la Komunista Manifesto (1848) – utiligos sian politikan superecon por elŝiri iom post iom la tutan kapitalon fare de la burĝaro, por centriĝi ĉiujn rimedojn de produktado en la manoj de la ŝtato, t.e. de la proletaro organizita kiel reganta klaso”. Nur, distinge de ĉiuj aliaj tipoj de ŝtato, kies celo estas gardi kaj antaŭenigi la interesojn de malgranda grupo de ekspluatantoj kontraŭ la grandegan plimulton de la popolo, la proleta ŝtato de la transira periodo estas instrumento de milito kontraŭ la restaĵoj de la klasa socio kaj rimedo por konstruado de la senklasa socio.

La „socialisman ŝtaton” de la transira periodo karakterizas la diktaturo de la proletaro. En sia verko *Kritiko de la Gotha Programo* (skribita en 1875, publikigita en 1891) Marx skribis: „Al ĝi respondas ankaŭ politika transira periodo, dum kiu la ŝtato povas esti nenio alia ol revolucia diktaturo de la proletaro”.

Kion fakte signifas „diktaturo de la proletaro”? Kiel Marx imagis ŝtaton sub diktaturo de la proletaro?

Ne enirante en diskuton pri la valoro de tiu ĉi marksisma tezo, estas necese diri, ke, laŭ Marx kaj Engels, diktaturo de la proletaro neniel signifas diktatorecon de unusola homo, nek de malgranda grupo da personoj, nek ĝi entute havas la sencon, kiun oni kutime donas al tiu esprimo. En la teorio de Marx kaj Engels „diktaturo de la proletaro” ne estas la kontraŭo de „demokratio”, sed la kontraŭo de „diktaturo de la burĝaro”. La tezo kaj antitezo estas, tial, proletaro-burĝaro, kaj ne diktaturo-demokratio. Tio fariĝas eĉ pli klara, se oni memorigas, ke, konforme al marksismo, ĉiu kapitalisma ŝtato – eĉ tiu kun la plej demokrataj politikaj institucioj – estas ŝtato de diktaturo de la burĝaro. Ĝi estas tia, ĉar la burĝaro proprietas la rimedojn de produktado kaj, en tia pozicio, utiligas la ŝtaton por siaj klasaj interesoj eĉ tiam, kiam, pro la stabileco de la socia-ekonomia ordo en difinita periodo, politika demokratio povas funkcii en tia ŝtato. Tiu ĉi „burĝa diktaturo” estas forigita de la proleta revolucio kaj anstataŭigita per la „diktaturo de la proletaro”, do necese de la granda plimulto de la popolo.

En sia *Kritiko de la Proponita Programo de Erfurt* (1891) Engels eksplicite diris, ke „la specifa formo de la diktaturo de la proletaro” estas demokrata respubliko laŭ la tipo kreita de la Franca Revolucio.

La ŝtato de la transira periodo komencas formortadi en la momento mem de sia naskiĝo, kaj malaperas komplete kaj por ĉiam, kiam la klasoj kaj iliaj restaĵoj estas detruitaj. Tiam sekvas nova epoko de memorganiziĝo de la socio surbaze de libera asociiĝo de la rektaj produktantoj. „La regado super personoj estas anstataŭigita per administrado de aferoj kaj per direktado de la procezoj de produktado” (*Anti-Dühring*). Engels finis tiun parton de sia konata verko per la fama diro: „La ŝtato ne estas *abolita*, ĝi formortas”.

III. Juro

Marksismo asertas, ke juro, idente al ŝtato, havas klasan karakteron kaj apartenas al fenomenoj de superstrukturo. Juro ekestis samtempe kun la ŝtato kaj estas nedisigeble ligita al klasa socio.

La enhavo kaj formo de juro dependas de la materiaj vivkondiĉoj kaj de la maniero de produktado. En la *Kritiko de la Programo de Gotha* Marx emfazis, ke la ekonomiaj rilatoj en estas reguligataj de juraj konceptoj, sed ke, male, „la juraj rilatoj formiĝas surbaze de la ekonomiaj”. Aliflanke, Engels skribis en *Ludwig Feuerbach kaj la Fino de Germana Klasika Filozofio* (1886): „Se la ŝtato kaj publika juro estas determinitaj de la ekonomiaj rilatoj, tiel same, kompreneble, estas privata juro, kiu, efektive, esence nur sankcias la ekzistantajn ekonomiajn rilatojn inter individuoj, normalajn en difinitaj cirkonstancoj”. En alia okazo – en sia letero al C. Schmidt – Engels klarigadis, ke en moderna ŝtato „juro devas ne nur respondi al la ĝeneralaj ekonomiaj kondiĉoj kaj esti ilia esprimo, sed ankaŭ devas esti *interne kohera* esprimo, kiu ne reduktas sin mem al nenio pro internaj kontraŭdiroj”.

Kio, do, estas juro? Ĉu ĝi estas determinita de la „ekonomiaj rilatoj” kaj tial devas respondi al la „ĝeneralaj ekonomiaj kondiĉoj”, aŭ ĝi esprimas la volon de la reganta klaso?

Al ĉiu stadio en la evoluo de la produktofortoj respondas difinitaj rilatoj de produktado. Sekve, la maniero de produktado en ĉiu historia epoko determinas, en la lasta analizo, la karakteron de la klasa divido de la socio (sklavproprietuloj kaj sklavoj, feŭda nobelaro kaj servutuloj, burĝaro kaj proletaro). Ĉar la evolustadio de la produktofortoj ne dependas de la homa volo kaj, sekve, ne povas esti arbitre ŝanĝita, la rilatoj de produktado, t.e. la klasaj rilatoj, ne povas esti modifitaj dum ili respondas al la fortoj de produktado. Plena harmonio regas inter la du. Tamen, kiam la fortoj de produktado, kiuj estas daŭre evoluantaj (kvantaj ŝanĝoj), tion progresis kaj tiom superis la malnoviĝintajn, sed ankoraŭ ekzistantajn produktorilatojn, ke ili ne plu respondas al ili, dialektita kontraŭdiro (antagonismo) ekestas inter la novaj fortoj de produktado kaj la rilatoj de produktado, ne plu adekvataj. Tiun ĉi dialektikan antagonismon solvas socia revolucio, kiu ŝanĝas la rilatojn de produktado kaj la tutan superstrukturon (kvalita ŝanĝo). Nova ekonomia-socia organizo ekestas, kaj ĝi denove respondas al la produktofortoj, sed ĉi-foje al la novaj fortoj, kaj la dialektika ekvilibro estas reestablita (nova pozitivo), ĝis la momento kiam la plua evoluo de la fortoj de produktado postulos plian revolucion ŝanĝon de la rilatoj de produktado. En tiu ĉi senco juro estas determinita. Sed en la ĝenerala kadro determinita de la maniero de produktado, juro estas esprimo de volo de la reganta klaso. Kompreneble, tio ĉi ne signifas, ke la reganta klaso povas laŭplaĉe kaj tute arbitre kreadi juron. Ĝi nur signifas, ke la reganta klaso produktas tian juran sistemon, kiu respondas al la ekzistantaj kondiĉoj de produktado en difinita historia epoko, kaj ke, pro la ekspluatanta pozicio de tiu ĉi klaso, juro antaŭ ĉio kontentigas ĝiajn interesojn. Tamen, samtempe ĝi respondas al la maniero de produktado en la periodoj de ekvilibro inter la produktofortoj kaj produktorilatoj, kiujn ĝi fortikigas. Nur en tiuj ĉi limoj juro respondas al „la ĝeneralaj ekonomiaj kondiĉoj” kaj tial kontentigas ankaŭ la „ĝeneralajn interesojn kaj bezonojn de la socio”.

Kiam la ŝvelintaj fortoj de produktado postulas novajn rilatojn de produktado, la reganta klaso klopodas, per ĉiam pli drastaj rimedoj, konservi la ekzistantan ekonomian-socian sistemon, kun la celo pluteni sian privilegian pozicion. En tiaj periodoj, markitaj de antagonismo inter la produktofortoj kaj produktorilatoj, juro ne plu reflektas la ĝeneralajn bezonojn de la socio, sed esprimas ekskluzive la interesojn de la reganta klaso, kiuj nun estas kontraŭaj al la ĝeneralaj interesoj de la socio. Kune kun la rilatoj de produktado (klasaj rilatoj), kiujn juro klopodas konservi, sed kiuj ne plu konformas al la produktofortoj, ĝi fariĝas obstaklo por la progreso. la socia revolucio, ŝanĝante la rilatojn, kreas ankaŭ novan juran sistemon, kiu siavice esprimas la volon de la nova reganta klaso, sed samtempe respondas al la novaj „bezonoj kaj interesoj de la socio”.

En la t.n. „socialisma ŝtato de la transira periodo” juro plu ekzistas, sed, paralele kun la ŝtato, ĝi formortadas kaj komplete malaperas en plena komunismo. La marksistoj atendas, ke en komunisma socio, pro la esperata foresto de antagonismaj klasoj kaj tial pro la identeco de la esencaj interesoj de individuoj kaj interesoj de la socio, juro kiel tuto de devigaj reguloj de konduto, sankciita de la ŝtata potenco, estos anstataŭigitaj per reguloj de komunisma moralo, alta memdisciplino kaj, se necese, rekta devigo fare de la socio.

IV. Konkludo

Apenaŭ necesas diri, ke en mallonga prelego ne eblas prezenti detalojn de la marksisma koncepto pri ŝtato kaj juro. Tial estas tuŝitaj nur la plej esencaj tezoj, kio, espereble, tamen donas imagon pri tiu ĉi grava koncepto. Tute egale ĉu oni akceptas ĝin aŭ ne, kaj senkonsidere al ĝia filozofia valoro kaj signifo por la ĝenerala jura teorio, la fakto estas, ke marksismo entute, inkluzive la koncepton pri ŝtato kaj juro, inspiris revoluciajn movadojn kaj estas rigardata kiel ideologia fono de multaj ŝtatoj en la nuntempa mondo. Tial, kiel ankaŭ pro la tendencoj revivigi la originalan marksismon purigante ĝin de falsajoj kaj misinterpretadoj, la marksisma teorio pri ŝtato kaj juro meritas atenton.

KOMPENSO PRO DAMAĜOJ KAŬZITAJ PER AKCIDENTOJ LAŬ LA JURO DE SOVETA UNIO

Enkonduka rimarko

En Soveta Unio la kompetenteco rilate civilan leĝdonadon estas dividita inter la Unia kaj Respublikaj leĝdonaj organoj (Superaj Sovetoj). La demando pri kompenso pro damaĝoj estas nun reguligita en la Fundamentoj de Civila Leĝaro de la Unio de Sovetaj Socialismaj Respublikoj, aŭ mallonge Fundamentoj (ekvalidis la 1-an de majo 1962), unuavice per la art. 88–95, kaj per la pli detalaj preskriboj de la civilaj kodoj de unuopaj respublikoj, ekzemple per art. 444–472 de la Civila Kodo de RSFSR (CKR) de la 11-a de junio 1964, kiu ekvalidis la 1-an de oktobro de la sama jaro. Apartajn regulojn entenas diversaj aliaj leĝoj, dekretoj, regularoj, instrukcioj k.s. Ĉi tie estos plej koncize prezentitaj nur la bazaj principoj.

I. Ĝeneralajoj

A. Ĉefa principo – La novaj Fundamentoj vastigis la respondecon pro damaĝo kaŭzita al organizaĵoj aŭ individuoj. Art. 88 de la Fundamentoj preskribas, ke damaĝo kaŭzita al organizaĵo aŭ individua persono devas esti plene kompensita de la persono, kiu kaŭzis la damaĝon. Tamen, la kaŭzinto devas esti liberigita de kompenso, se li sukcesas pruvi, ke la damaĝo okazis sen lia kulpo, nome sen dolo aŭ neglekto. La leĝo do supozigas la kulpon de la kaŭzinto kaj la suferinto ne devas ĝin pruvi; male, estas tasko de la kaŭzinto pruvi, ke li ne kulpis. La baza principo do estas kulpa respondeco.

Organizaĵo estas respondeca pro la damaĝoj kaŭzitaj de ĝiaj funkciuloj dum la plenumado de iliaj oficialaj (laboraj) devoj, krom, kompreneble, se forestas kulpo.

Damaĝo kaŭzita pro jure permesitaj agoj devas esti kompensita nur, se la leĝo esplicite preskribas tion.

B. Esceptoj. – La plej gravaj estas:

a) Damaĝo kaŭzita en stato de necesa defendo ne rezultigas devon kompensi. Damaĝo kaŭzita en stato de neceso principe devas esti kompensita, sed ekzistas pluraj esceptoj, tiel ke la kompenso povas esti dividita inter la kaŭzinto, la suferinto aŭ eĉ triaj personoj, depende de la konkretaj cirkonstancoj.

b) Pro damaĝoj kaŭzitaj de infanoj, ankoraŭ ne atingintaj la 15-an jaron, respondecas iliaj gepatroj aŭ kuratoroj aŭ institucioj – depende de tio kiu el ili

laŭleĝe prizorgas la kaŭzinton – krom se ili pruvas, ke la damaĝo okazis sen ilia kulpo. La sama regulo validas en kazoj de plenaĝaj personoj, sed juĝe deklaritaj kiel agnekapablaj pro mensaj difektoj, kiuj malebligas al ili kompreni la signifon de siaj agoj aŭ kontroli ilin. Neplenaĝaj personoj inter 15 kaj 18 jaroj respondecas same kiel la plenaĝuloj, sed la gepatroj aŭ kuratoroj devas pagi la kompenson, se la havaĵo de la farinto ne sufiĉas.

c) Personoj, kiuj kaŭzis damaĝon en tia mensa stato, ke ili ne povis kompreni la signifon de siaj agoj aŭ kontroli ilin, ne respondecas. Sed se ili mem metis sin en tian staton per prenado de alkoholaĵoj, narkotikaĵoj aŭ alimaniere, ili estas respondecaj.

d) La plej grava escepto koncernas la posedantojn de t.n. „fontoj de pli granda danĝero”. Kiel „posedanto” estas rigardata tiu organizaĵo aŭ unuopulo, kiu disponas pri la koncernaj rimedoj aŭ instrumentoj de pli granda danĝero. Organizaĵoj kaj unuopuloj, kies agado estas ligita al pli granda danĝero por la ĉirkaŭaĵo pro la utiligo de la menciitaj „fontoj” – ekzemple transportaj aŭ industriaj entreprenoj, posedantoj de aŭtomobiloj k.s. – devas kompensi la kaŭzitan damaĝon senkonsidere al la kulpo, krom se ili pruvas, ke la damaĝo okazis pro supera forto (*vis major*) aŭ pro dolo (malbonintenco) de la suferinto mem. Ĉi tie temas pri respondeco bazita sur risko, aŭ, distinge de la kulpita respondeco, pri senkulpa aŭ riska respondeco. La soveta teorio pravigas la riskan respondecon per jenaj ĉefaj motivoj: la koncernaj objektoj de danĝero estas vaste utiligataj de la ŝtato kaj ĝiaj entreprenoj en la intereso de la tuta popolo, kaj tial la ŝtato kaj la ŝtataj entreprenoj prenas sur sin la riskon kaj devigas sin kompensi la damaĝojn kvankam forestas kulpo; kiam ŝtata entreprenado kaŭzas damaĝon, la perdo estas socie distribuata, ĉar la kompenso estas farata el tiuj deprenoj el la tuto de la socia produkto, kiuj, laŭ Marx, okazas antaŭ ol la fondaĵo de la socia enspezo estas dividata laŭ la laboro; la principo stimulas evoluigon de protektaj teknikoj.

D. Asekuro. – Apud la socia asekuro, en Soveta Unio ekzistas du aliaj bazaj specoj: deviga kaj nedeviga. La tuta sistemo estas sufiĉe komplikita, precipe en la sfero de kompenso pro damaĝoj, ĉar pluraj formoj povas konkuri en la sama kazo.

II. Detaloj

En ĉiuj kazoj de aŭtomobilaj, fervojaj kaj aviadilaj akcidentoj validas la principo de riska aŭ senkulpa respondeco. Estas menciinde, ke deviga persona asekuro aplikiĝas al ĉiuj pasaĝeroj de fervoja, perakva, aŭtomobila kaj aera transportado. La premioj (asekurkotizoj) estas inkluzivitaj en la prezo de la veturbileto. Rilate havaĵon la leĝo preskribas aŭ devigan aŭ libervolan asekuron. Ekzemple, deviga estas la asekuro de havaĵo en la uzo de individuaj personoj aŭ organizaĵoj, dum libervola asekuro rilatas al transportiloj apartenantaj al ŝtataj organizaĵoj; al varoj transportataj interne de la lando per transportiloj de la menciitaj organizaĵoj; al varoj transportataj permare kaj al marŝipoj. La foresto de deviga asekuro ne estas tiel grava, kiel unuavide povus ŝajni, ĉar ĉiuj entreprenoj troviĝas en la manoj de la

ŝtato kaj ili havas sufiĉe da materiaj rimedoj por kompensi la damaĝojn. Krom tio, la sistemo de socia asekuro intervenas en ĉiuj kazoj de damaĝoj kaŭzitaĵ al personoj, por kiuj la koncernaj entreprenoj pagas kontribuojn. Apartaĵon prezentas nur aŭtomobilaj akcidentoj kaj laborakcidentoj.

A. Aŭtomobilaj akcidentoj. – Validas la ĝeneralaj principoj de riska respondeco. Tio signifas, ke la posedanto (en la supre difinita senco) estas respondeca kaj devas pagi la kompencon. Se la posedanto estas ŝtata entrepreno, kio estas la kutima kazo, ĝi havas sufiĉe da rimedoj por pagi ĝin. Se la viktimo troviĝas en laborrilato kun la entrepreno, intervenas la sistemo de socia asekuro. Sed se temas pri privata aŭtomobilisto, la kompenso povas esti endanĝerigita. Kompreneble, ankaŭ en tiu ĉi kazo la posedanto (proprietulo) respondecas, sed laŭ la soveta juro li ne nur ne devas, sed eĉ ne rajtas esti asekurita, ĉar la leĝo tion malpermesas. La celo sendube estis atingi maksimumajn singardon kaj atentemon kaj de la posedanto kaj de la kondukanto, sed la rezulto estas, ke la aŭtomobilisto povas esti kriminale punita (ĝis 10 jaroj de malliberiĝo laŭ art. 211 de la Kriminala Kodo de RSFSR, sed la viktimo ricevos nenion, se la kaŭzinto de la damaĝo ne havas rimedojn por pagi.

B. Laborakcidentoj. – La maŝinaro en industriaj entreprenoj ne estas rigardata kiel „fonto de pli granda danĝero” por la laboristoj, kiuj laboras en la koncerna entrepreno. Tiu starpunkto estas pravigata per la aserto, ke ili ricevis la necesan fakan edukon, mem devas kontribui al evoluigo de protektaj teknikoj kaj, sekve, la motoroj, maŝinoj kaj aliaj instrumentoj ne prezentas por ili fonton de ia pli granda danĝero. Se okazas akcidento, la kompenso estos pagita konforme al la skemo de socia asekuro. Nur se la entrepreno estas riproĉinda pro neglekto de la preskriboj rilate sekurecon, la institucioj de socia asekuro rajtas postuli de ĝi repagon de la kompenso.

C. Aliaj aferoj. – Necesas diri kelkajn vortojn pri la karaktero kaj alteco de la kompenso. Se temas pri damaĝo al propio, la kompenso inluzivas ankaŭ la suferitan malgajnon (*lucrum cessans*), sed kun la limigo, kompreneble, rilate profitojn, kiuj estas malpermesitaj en Soveta Unio. Se temas pri damaĝoj kaŭzitaĵ al la sano de persono, la kaŭzinto de la damaĝo devas kompensi la malgajnon de la enspezoj, kiujn suferis laborhomo pro la perdo aŭ malgrandiĝo de la laborkapablo, kaj la elspezojn de kuracado. Ne ekzistas kompenso pro la suferitaj doloroj, nek pro la mallongigo de la normale atendata aĝo, nek pro la malgajno de la atendataj altigoj de enspezoj. La kalkulado estas tre simpla. Kuracista komisiono establas la proporcion de ĝenerala kaj profesia laborkapablo, kiun la viktimo perdis. Surbaze de liaj antaŭaj laborenspezoj kaj la mezaj salajroj por neprofesia laboro oni facile elkalkulas la kompencon. Se, ekzemple, profesia laboristo perlaboradis 200 rublojn monate kaj li perdis centprocente sian profesion laborkapablon, sed konservis 50 % de sia ĝenerala laborkapablo, kaj se la meza salajro por neprofesia laboro estas 50 rubloj monate, tiam li ricevos entute kompencon de 175 rubloj monate, nome 200 pro la komplete perdita profesia laborkapablo, minus 25, ĉar li konservas 50 % de sia ĝenerala laborkapablo.

III. Tendencoj pri ŝanĝoj

Ne estas rimarkeblaj tendencoj pri reformoj. Verŝajne, pro la kreskanta nombro de motorveturiloj en persona posedo de unuopuloj, oni povas atendi ŝanĝojn de la leĝo rilate asekuron de aŭtomobilistoj.

PERSPEKTIVA AGADPROGRAMO DE LA EŬROPA KLUBO POR LA SOLVO DE LA LINGVA PROBLEMO EN EŬROPO

1. ENKONDUKO: EŬROPO HODIAŬ

1.1. Tradicia Eŭropo

1.11 Uzante la terminon „Eŭropo” oni ofte malatentas, ke Eŭropo etendiĝas de Uralo ĝis Atlantiko. Ĝi ne estas nur geografia nocio, sed ankaŭ potenca morala-intelekta koncepto, laŭ kiu ekzistas komunaj eŭropaj kulturo kaj civilizo en formo de bunta mozaiko, al kiu ĉiu eŭropa popolo alportis multajn, kelkajn, aŭ eĉ nur 2–3 ŝtonetojn, sen kiuj, tamen, la mozaiko ne estus kompleta. Tiu kultura kaj civiliza komuneco ŝuldiĝas al la komuna heredaĵo postlasita de la greka-romia genio kaj renaskiĝinta, post miljara obskuro, en la renesanco kaj humanismo de la 14-a ĝis 16-a jarcentoj per peniko kaj koloroj en pentroarto, per martelo kaj ĉizilo en skulptoarto, per desegnoj kaj ŝtonoj en arkitekturo kaj, oni ne forgesu, per la komuna latina lingvo en filozofio, sciencoj, religio kaj literaturo.

1.12. Tio estas unu Eŭropo: la tradicia kaj klasika Eŭropo de multfaceta komuna kulturo elkreskinta el la samaj radikoj. Spitante la uraganojn de fratmortigaj militoj, la monstraĵojn de koncentrejoj, la malsamecojn de ekonomiaj-sociaj-politikaj sistemoj, Eŭropo manifestas admirindan vivkapablon kaj enhavas potencialojn por sia dua renesanco, ĉi-foje en la vasta kadro de la multflanka monda kulturo, al kiu ĝi tiel abunde kontribuis kaj daŭrigas kontribui.

1.13. El lingva vidpunkto ĝi estas Eŭropo de sesdeko ĝis sepdeko da kulturaj lingvoj, depende de la kriterioj, laŭ kiuj oni distingas lingvon disde dialekto kun literaturaj tradicioj; lingvoj, ekestintaj kaj evoluintaj paralele kun la formiĝo de la modernaj nacioj kaj la samtempa malaperado de la mezepoka latina.

1.14. Jam la Unua Mondmilito, kiu fakte estis ĉefe eŭropa, donis fortan baton al tradicia Eŭropo, sed la Dua Mondmilito minacis detrui ĝin complete. Tiuj tragikaj eventoj tamen havis almenaŭ unu pozitivan flankon: oni komencis komprenadi, ke eŭropan unuecon oni povas realigi ne per konkeraj militoj aŭ per ekonomiaj, kulturaj kaj alispecaj subigoj, sed nur per libervola unuiĝo surbaze de plena egalrajteco de ĉiuj nacioj kun respekto por iliaj individuecoj.

1.15. Krome, la Dua Mondmilito plian fojon pruvis la kadukiĝon de absoluta ŝtata suvereneco kaj memsufiĉo. La fakta ekonomia interdependeco de la ŝtatoj, unuflanke, kaj la legitima rajto de nacioj konservi siajn respektivajn identecojn, aliflanke, diktas kaj ĉiam pli forte diktos la politikan strukturon de la mondo, unuavice de Eŭropo, dum la ideo de plena sendependeco, utopia en la nunaj kondiĉoj, plu perdados sian originan sencon ĝis kompleta malapero. La principo de internacia kunlaborado kaj paco en libereco surbaze de egaleco inter la ŝtatoj, nacioj kaj unuopuloj troviĝas en la fundamentoj de UN, sed en granda parto de Eŭropo ĝi konkretiĝas per la konstruado de la eŭropaj institucioj.

1.2. „Eŭropoj” en Eŭropo

1.21. En Eŭropo hodiaŭ ekzistas 34 ŝtatoj. Pluraj el ili estas federacie organizitaj ĉu pro la nacia konsisto de la loĝantaro, ĉu pro ekonomiaj kaj aliaj kaŭzoj. Preskaŭ en ĉiuj troviĝas pli aŭ malpli grandaj etnaj minoritatoj kun propraj lingvoj kaj kulturaj tradicioj. En kelkaj kazoj manifestiĝas fortaj seperatistaj tendencoj, minacantaj eĉ la ekziston mem de la ŝtato. Tio ofte kaŭzas grandajn internajn problemojn kaj postulas multe da politika saĝo por trovi kompromisajn solvojn, kiuj kontentigas la naciajn-etnajn rajtojn kaj samtempe konservas la ŝtatan integrecon.

1.22. Aliflanke, tuj post la milito renaskiĝis la ideo de eŭropa unuiĝo, ekfloris la eŭropa movado kaj formiĝis multnombraj neregistaraj aŭ duonoficialaj organizaĵoj de diversaj nuancoj. Traktatoj kaj alispecaj interkonsentoj sur registara nivelo rezultigis aron da interŝtataj organizaĵoj, el kiuj kelkaj ricevis eĉ supernacian karakteron. La unua laŭvice kaj la plej ampleksa laŭ la nombro de la Ŝtatoj-Membroj estas la Eŭropa Konsilantaro, fondita en 1949, kaj konata ankaŭ kiel Eŭropo de Dek Ok. Ĝia ĉefa atingo estas la Eŭropa Konvencio pri Homaj Rajtoj kun la establo de la Komisiono kaj Kortumo de Homaj Rajtoj. La plej grava kaj la plej integriĝinta el ĉiuj estas la Eŭropa Ekonomia Komunajo (EEK), posedanta supernaciajn povojn en la sfero de siaj celoj. Tio estas la t.n. Eŭropo de Naŭ, kiu verŝajne baldaŭ grandiĝos per aliĝo de pliaj ŝtatoj. La dogana unio kaj la antaŭvidita rekta elekto de la Eŭropa Parlamento eĉ pli fortikigos la unuecon de EEK survoje al vera Eŭropa Unio, kiu verŝajne realiĝos iam en la estonteco. La jaro 1978 estos decida tiurilate. La nuna Eŭropo de Naŭ havas 6 oficialajn lingvojn, dum la antaŭa Eŭropo de Ses havis kvar. La verŝajna aliĝo de pliaj ŝtatoj aŭtomate grandigos la nombron de oficialaj lingvoj, ĉiuj egalaj kaj laboraj.

1.23. La du kontraŭaj tendencoj – tiu celanta aŭtonomion ĝis sendependiĝo kaj tiu direktita al pli forta integriĝo – ne estas tiel antagonismaj, kiel unuavide povus ŝajni: dum multaj timas, ke plia integriĝo komplete neniigos la nacian sendependecon, same multaj fidas, ke en demokrata Eŭropa Unio, bazita sur strikta respekto de la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj kiel formulite en la Eŭropa Konvencio, ĉiuj nacioj kaj etnaj minoritatoj povos pli bone ol en la aktualaj kadroj protekti kaj evoluigi siajn respektivajn identecojn. Evidente, sole pri tia unuiĝo povas temi. Alie minacus disfalo ekde la komenco, eble eĉ novaj interfrataj militoj. Unueco ne eblas sen kaj jura kaj fakta sekurigo de libereco, samrajteco, alta reciproka

estimo kaj interkompreniĝo inter la civitanoj de ĉiuj unuiĝontaj nacioj, kies esenca karakterizo daŭre konsistos el la respektiva nacia lingvo kaj el la specifaj kulturaj valoroj esprimitaj en ĝi aŭ pere de ĝi. Eŭropo restos riĉa kaj fariĝos forta – tiel ankaŭ alloga modelo por aliaj kaj faktoro de paco en la mondo – nur se ĝi trovos sian unuecon gardante tamen la lingvan kaj, do, kulturan plurecon.

1.24. En orienta parto de la tradicia Eŭropo formiĝis aliaj ligoj. La ĉefa estas la Konsilantaro pri Ekonomia Reciproka Asistado (KERA), fondita en 1949. Kvankam al la Organizaĵo apartenas ankaŭ Mongolio kaj Kubo, ĝi estas esence eŭropa pro la partopreno de Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Germana DR, Hungario, Pollando, Rumanio kaj Soveta Unio (pli frue ankaŭ Albanio). La lingvoj de ĉiuj membroj, t.e. minimume 7 eŭropaj lingvoj estas oficialaj, sed la rusa estas la sola labora lingvo. Tio ĉi estas plia „Eŭropo”.

1.25. Jugoslavio kun siaj 4 ĉefaj naciaj lingvoj kaj pluraj minoritataj kunlaboras kun KERA ekde 1964 en aferoj de komuna intereso, kaj havas rilatojn ankaŭ kun EEK kaj kun aliaj eŭropaj instancoj. La ceteraj eŭropaj ŝtatoj troviĝas ekster la menciitaj komunajoj, sed partoprenas en diversaj aliaj eŭropaj organizaĵoj, asocioj kaj unuiĝoj kun ekonomiaj, profesiaj, kulturaj kaj alispecaj celoj.

1.26. Lasante flanke la militajn defendajn aliancojn, la tradicia Eŭropo estas, do, dividita en pluraj ekonomiaj kaj politikaj grupoj. Tiuj diversaj „eŭropoj” en la tradicia Eŭropo tamen ne estas izolitaj unuj de la aliaj. Unue tial, ĉar iliaj membroj apartenas ne nur al UN, sed ankaŭ al multaj organizaĵoj en la t.n. familio de UN kaj ekster ĝi; due tial, ĉar densa reto de duflankaj kaj plurflankaj internaciaj traktatoj kaj konvencioj pri politikaj, ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj demandoj kunligas la eŭropajn ŝtatojn kaj ebligas kunlaboradon ankaŭ inter la nacioj apartenantaj al malsamaj kungrupiĝoj; trie tial, ĉar ĉiuj eŭropaj ŝtatoj (kun la escepto de Albanio) estas partioj de la Fina Akto de la Konferenco de Helsinki pri Sekureco kaj Kunlaborado en Eŭropo.

1.27. En la skizita situacio la lingvodiverseco prezentiĝas kiel unu el la plej gravaj obstakloj al efika funkciado de la eŭropaj institucioj, al kunlaborado sur ĉiuj niveloj laŭ la rekomendoj de la Fina Akto de Helsinki aŭ senkonsidere al ĝi, kaj al simpla interkompreniĝo en la vastaj kadroj de la amasaj kaj daŭre kreskantaj internaciaj kontaktoj de ordinaraj civitanoj de Eŭropo.

2. LINGVA PROBLEMO

2.1. Diversaj Aspektoj

2.11. La lingva problemo en Eŭropo estas parto de la ĝenerala problemo de lingva komunikado en internaciaj rilatoj de la mondo, sed sur neniu kontinento ĝi estas pli akuta ol en Eŭropo, ĉar ĉi tie dense unu apud la alia kunvivas multnombraj nacioj kun siaj alte evoluintaj naciaj lingvoj, propraj kulturaj tradicioj kaj specifaj esprimiĝoj en la kadro de la komuna eŭropa kulturo. Neniu el ili povas rezigni pri sia lingvo, nek subiĝi al kultura superrego de la aliaj, sen perdi sian identecon. Kaj tian kulturan suicidon neniu eŭropa nacio pretas fari, eĉ ne en intereso de pli intensa

kunlaborado ĝis integriĝo de diversaj fortogradoj, al kio pelas ilin la kreskanta ekonomia interdependeco, kion faciligas la teknologia progreso kaj favoras la komuna eŭropa kultura fono. En tio konsistas la kvintesenco de la lingva problemo en Eŭropo.

2.12. Ĝuste tial la eŭropaj organizaĵoj kaj institucioj ne povis apliki la formulojn de San Francisko (distingo inter laboraj, oficialaj kaj ĉiuj aliaj lingvoj)

– kiuj intertempe fiaskis ankaŭ en Unuiĝintaj Nacioj – sed devis rekoni, ke ĉiuj lingvoj de la Ŝtatoj-Membroj estas egale oficialaj. Tio kaŭzas ĉiaspecajn pure lingvo-teknikajn, administrajn, jurajn, politikajn, sociajn, psikologiajn kaj aliajn grandajn malfacilaĵojn, aldone al la enormaj ekonomiaj ŝarĝoj, kiujn postulas la tradukaj-interpretaj servoj. Superflue diri, ke eĉ la plej bonaj lingvaj servoj kun alte kvalifikitaj tradukistoj kaj interpretistoj neniel povas anstataŭigi rektan lingvan interkomunikadon. Krome daŭre okazas ĝenaj miskomprenoj, incidentoj, protestoj, korektoj, rekorektoj kaj prokrastoj, kiujn la plurlingveco necese kaŭzas. Ĝuste tio malrapidigas la laborojn kaj konsiderinde malaltigas la efikecon.

2.13. Se tiajn obstaklojn spertas la eŭropaj institucioj malgraŭ la unuarangaj lingvaj servoj, facile estas imageblaj la senfinaj malfacilaĵoj, en kelkaj kazoj eĉ tragikaj, kiujn senĉese alfrontas la milionaj masoj de Eŭropo – precipe de Eŭropo – sur ĉiuj niveloj kaj en plej diversaj cirkonstancoj. Gastlaboristoj kaj enmigrintoj ne sukcesas socie integriĝi en la novaj medioj pro la malebleco komuniki kun la ĉirkaŭaĵo; gestudentoj en alilandaj universitatoj ne povas kontentige interkompreniĝi kun siaj profesoroj pro la nesufiĉaj konoj de la instrulingvoj; eviteblaj trafikaj katastrofoj daŭre okazas pro lingvaj miskomprenoj; en industrio kaj komerco, en aŭtomobilismo kaj turismo, surstrate kaj en publikaj oficejoj, eĉ en telefonaj ĉeloj, la lingva obstaklo malhelpas aŭ malebligas komunikadon kaj interkompreniĝon. En la sfero de sciencoj kaj ĝenerale sur kultura kampo la stato ne estas multe pli bona, sed des pli ĝena ĝuste tial, ĉar temas pri nekultura aspekto de la nuntempa kulturo entute kaj de la eŭropa kulturo speciale.

2.2. *Eblaj Solvoj*

2.21. Abstrakte, t.e. senkonsidere al la konkreta realaĵo en Eŭropo, pluraj solvoj estus eblaj. Multaj rekomendas la vastigon kaj intensigon de fremdlingva instruado (tion, interalie, kuraĝigas la Fina Akto de Helsinki kaj stimulas pluraj kulturaj konvencioj inter eŭropaj ŝtatoj), sed pretervidas la nombron da eŭropaj lingvoj kaj malatentas la fakton, ke ĉia ajn plia vastigo kaj intensigo povus okazi nur je la kostoj de aliaj objektoj, esence gravaj kaj necesaj en la moderna socio. Oni ankaŭ inklinas forgesi, ke oni ja instruas multajn fremdajn naciajn lingvojn en la lernejoj de Eŭropo kaj tiucele oferas milionojn da laborhoroj jare, sed ke la rezultoj, kun tre malmultaj esceptoj, estas nulaj aŭ preskaŭ nulaj. Aliaj, inverse, proponas limigon al nuraj du aŭ tri t.n. „grandaj” lingvoj, sed kutime lasas malfermita la demandon kiom da lingvoj kaj kiuj precize. La malsukceso de la siatempa kampanjo por angla-franca dulingvismo ĉe la Eŭropa Konsilantaro, kaj la posta evoluo de la lingva demando en tiu institucio, indikas la reziston kaj, sekve, la nevenkeblajn barojn, kiujn renkontus

la realigado de tiu ideo. Influj grupoj komprenas, ke la solvo ne troviĝas en la lernado de kelkaj naciaj lingvoj, eĉ ne de la samaj en ĉiuj landoj, sed en elekto de unusola lingvo por internacia komunikado, kaj tiucele sugestas iun nacian lingvon. Tiu ideo renkontas eĉ pli da rezisto ol la dulingvismo aŭ trilingvismo. Por personoj iom informitaj pri la multnombraj aspektoj de la lingva problemo, kaj iom konsciaj pri la signifo, kiun havas ĉiu nacia lingvo por la koncerna nacio, estas tute klare, ke neniam la nacioj de Eŭropo akceptos kiun ajn nacian lingvon, kun la escepto de la sia, kiel komunan por Eŭropo.

2.22. Pro la konkreta nacia kaj lingva realaĵo en Eŭropo ĉiam pli maturiĝas la ideo solvi la problemon ne per iu nacia lingvo aŭ kombino de tiaj lingvoj, sed per lingvo, kiu pro sia supernacia karaktero ne minacas la pravajn interesojn de kiu ajn eŭropa nacio. El ĉiuj teorie eblaj solvoj en tiu direkto, la ĝeneraligo de la uzo de la Internacia Lingvo (Esperanto) prezentigias en la nunaj kondiĉoj la plej realeca pro jenaj kaŭzoj: (1) maksimume internacia laŭ sia interna strukturo, la Internacia Lingvo estas akceptebla de ĉiuj nacioj kiel neŭtrale homa instrumento de lingva komunikado en internaciaj rilatoj; (2) diference de diversaj lingvoprojektoj, ĝi estas firme socie enradikiĝinta kiel vivanta lingvo de monde internacia lingva komunuaĵo, kio samtempe estas plia elemento de ĝia aŭtentika internacieco; (3) alte evoluinta kaj plu unuece evoluanta dank' al abunda originala kaj traduka literaturo, gazetaro, pluraj sciencaj kaj fakaj periodaĵoj, internaciaj fakterminaroj, internaciaj kongresoj, fakaj konferencoj kaj aliaj aspektoj de kulturo, ĝi sukcese funkcias kiel vehiklo de internaciaj kulturaj interŝanĝoj, kion rekonis ankaŭ la Rezolucio de Unesko de la 10-a de decembro 1954; (4) ĝi estas vaste utiligata ankaŭ por komercaj, turismaj, profesiaj kaj ĉiaspecaj aliaj praktikaj celoj en ĉiuj sferoj de la ĉiutaga vivo; (5) la Internacia Lingvo estas pluroble pli facile lernebla por ĉiuj ol kiu ajn alia lingvo, eĉ la propra literatura, kiel pruvas multjaraj spertoj kaj konfirmis sendependaj sciencaj esploroj kuplitaj kun lernejoj kaj eksterlernejoj praktikaj eksperimentoj; (6) tiu lingvo jam estas sukcese instruata en kelkcento da lernejoj fare de kvalifikitaj instruistoj, kio montras ke el eduka vidpunkto nenio malhelpas vastigon de la instruado, sed ĝi estas facile akirebla ankaŭ alimaniere, inkluzive memlernadon, pro la ekstrema simpleco de la gramatiko kaj pro la ekzisto de lernolibroj, vortaroj kaj aliaj instrumaterialoj en sesdeko da naciaj lingvoj; (7) fonetike ĝi estas klara, kio per si mem estas pozitiva kvalito, sed kio estas aparte grava por lingva komunikado per mekanikaj instrumentoj; (8) ĝi montriĝis pli taŭga ol iu ajn alia lingvo por kibernetikaj celoj kaj komputeraj analizoj. Aldone al la menciitaj karakterizoj, kiuj, prenitaj kune, estas decidaj por la rolo de internacia lingva komunikilo, la Internacia Lingvo posedas senlimajn eblecojn de plua evoluo kaj rapida adaptiĝo al la rapide ampleksiĝantaj bezonoj de internacia komunikado.

2.3. *Starpunkto de Eŭropa Klubo (EK)*

2.31. Kiel sendependa kaj partopolitike neŭtrala organizaĵo, Eŭropa Klubo (EK) nek favoras, nek malfavoras plian politikan integriĝon aŭ malintetriĝon en Eŭropo aŭ partoj de Eŭropo. Ĝi limigas sian agadon al la solvo de la kompleksa

lingva problemo en la aktualaj eŭropaj organizaĵoj, en ĉiuj oficialaj, duonoficialaj kaj privataj internaciaj rilatoj en Eŭropo. EK tamen konscias, ke paralele kun la praktika solvado de tiu grava kultura demando amase multiĝados la rektaj internaciaj kontaktoj en ĉiuj sferoj, kio necese fortikiĝos la „eŭropan spiriton” kaj tial kontribuos al eŭropa unueco en diverseco, almenaŭ el kultura vidpunto.

2.32. Bazante sin ekskluzive sur objektivaj analizoj de la eŭropa realaĵo, kaj neniel neglektante la monde internacian karakteron de la Internacia Lingvo, EK laboras por la solvo de la problemo laŭ la baza principo: NACIA LINGVO POR INTERKOMUNIKADO EN NACIAJ KADROJ, LA INTERNACIA LINGVO POR ĈIUJ INTERNACIAJ RILATOJ EN EŬROPO. Tia modernan formulon de dulingvismo EK rigardas plej adekvata, ĉar ĝi pacigas la bezonojn de internacia komunikado en Eŭropo kun la lingvaj-kulturaj kaj aliaj interesoj de ĉiuj eŭropaj nacioj, grandaj kaj malgrandaj. Sed EK volonte konsideros kaj pritraktos kiun ajn alian seriozan proponon direktitan al la sama celo. Ĝi pretas diskuti la demandon ankaŭ kun la reprezentantoj de la eŭropaj institucioj kaj kun kompetentaj ŝtataj aŭtoritatoj, se ili fine decidiĝos ekagi sur tiu kampo.

2.33. EK celas kontribui al la solvo de la lingva problemo en la tuta tradicia Eŭropo, sed provizore ĝi devas limigi siajn aktivadojn nur al tiuj partoj de Eŭropo, en kiuj ĝi povas libere agadi por realigi la celon. En tiuj limoj, tamen tre vastaj, EK dediĉos apartan atenton al la landoj apartenantaj al la Eŭropa Konsilantaro kaj al EEK, kiel ankaŭ al tiuj institucioj mem, precipe al Eŭropa Komunaĵo, kiu pleje spertas la lingvan obstaklon. Sed EK deklaras sian pretecon kunlabori kun samcelaj organizaĵoj en la alia parto de la tradicia Eŭropo, se tiaj formiĝos.

2.34. EK plene konscias, ke la atingo de tia grandioza celo ne estas afero de kelkaj monatoj, sed de multaj jaroj, depende multrilate ankaŭ de la plua politika evoluo en la mondo kaj speciale en Eŭropo, kaj ke la realigado povos okazi nur laŭgrade kaj en etapoj konforme al zorge pripensita plano. Tial EK agados en jenaj kvin kunordigitaj direktoj: (1) sciencaj esploroj kaj informado, (2) praktikaj servoj kaj simpativarbado, (3) faka interkompreniĝo trans la lingvaj limoj, (4) klerigo kaj edukado, (5) eŭropa kulturpolitiko.

3. AKTIVADOJ EN KVIN DIREKTOJ

3.1. Sciencaj Esploroj kaj Informado

3.11. Utiligante la ekzistantajn abundajn dokumentajn materialojn kaj la rezultojn de la ĝisnunaj sciencaj esploroj, EK detale prilaboros la tezojn entenatajn en Sekcioj 1 kaj 2 de tiu ĉi Programo, kaj entreprenos – ĉu rekte, ĉu pere de kompetentaj kunlaborantoj – pliajn esplorojn pri la lingvistikaj, politikaj, ekonomiaj, sociaj, juraj, terminologiaj, edukaj, psikologiaj kaj aliaj aspektoj de la lingva problemo en Eŭropo, kiel ankaŭ pri la nuna kaj potenciala roloj de la Internacia Lingvo (en plua teksto IL) en la respektivaj sferoj. Tiucele EK konsideros ankaŭ la komputerajn prilingvajn analizojn de la Universitato de Saarbrücken kaj de aliaj komputeraj centroj, precipe rilate lingvolernadon kaj maŝinan tradukadon. EK plu kunlaboros kun la Instituto

pri Kibernetika Pedagogio en Paderborn kaj klopodos establi kontaktojn kun similaj institutoj en aliaj landoj.

3.12. La rezultojn de tiuj esploroj EK regule publikigados aŭ kuraĝigos publikigadon en formo de artikoloj, studoj, monografioj aŭ alispecaj verkoj, raportoj al sciencaj konferencoj, komunikoj kaj memorandoj al eŭropaj institucioj, al registaroj de eŭropaj ŝtatoj kaj al aliaj kompetentaj instancoj. Ĝi diskonigos siajn laborojn ankaŭ per ĉiuj rimedoj de publika informado.

3.2. *Praktikaj Servoj kaj Simpativarbado*

3.21. En tiu ĉi agadbranĉo la klopodoj estos direktitaj al maksimuma apliko de dulingveco en la supre difinita senco (nacia lingvo aŭ, se necese, naciaj lingvoj plus IL) en ĉiutagaj praktikaj servoj, ekzemple: instrukcioj en telefonĉeloj (laŭ modelo de Nederlando), oficialaj informoj pri la landa valuto (laŭ modelo de Danlando), menukartoj (laŭ modelo de la Cook restoracivagonoj, hoteloj kaj restoracioj en diversaj landoj), kalendaroj (laŭ modelo de EK, Paderborn), turismaj prospektoj kaj informoj (laŭ modelo de multaj landoj), k.a. EK kuraĝigos la ĝeneraligon de tia utila dulingveco almenaŭ por la plej esencaj klarigoj, instrukcioj kaj similaj informoj en tiuj publikaj servoj, kiuj estas amase utiligataj ankaŭ de fremdlingvanoj, tute speciale en internacia surtera, surmara kaj aera trafiko, aŭtomobilismo (tre urĝe: trafikaj instrukcioj sur la ŝoseoj), PTT, doganoj, hoteloj kaj restoracioj, bankoj kaj monŝanĝejoj, grandaj magazenoj, turismo ĝenerale. Samcele EK organizos aŭ instigos organizadon de rapidaj kaj intensaj kursoj de IL por la personaro de la menciitaj servoj. Ĝi klopodos atingi, ke en la ejoj de publikaj servoj, en kiuj oficas almenaŭ unu persono parolanta IL, troviĝu bone videbla indiko pri tio.

3.22. La diskonigo de la ekzistantaj dulingvaj servoj kaj la funkciigo de aliaj evidentigo la praktikan utilecon de dulingveco, kaj favorigos la publikan opinionon. Siavice, la subteno de la publiko al dulingveco faciligos ĝian plian vastigon ĝis la fina ĝeneraliĝo por ĉiuj praktikaj celoj.

3.3. *Faka Interkompreniĝo Trans la Lingvaj Limoj*

3.31. Kiel en la aliaj agadbranĉoj, EK utiligos kaj diskonigos la ĝisnunajn atingiĝojn, inter kiuj apartan lokon okupas la originala kaj traduka scienca literaturo en IL, ĉ. 140 plurlingvaj aŭ nur internacilingvaj fakterminaroj por kvindekda sciencaj kaj fakaj branĉoj, internacilingvaj resumoj de nacilingvaj verkoj kaj de artikoloj en nacilingvaj periodaĵoj.

3.32. Daŭrigante siajn proprajn iniciatojn, EK publikigos pliajn verkojn en la dulingva Eŭropa Serio SENNACIIGITA SCIENCO (la unua libro aperis en 1976); okazigos pliajn sesiojn de la plurlingva Someraj Internaciaj Universitataj Semajnoj (SIUS) kaj publikigos la prelegojn; en kunlaboro kun la Instituto por Kibernetika Pedagogio en Paderborn ĉiujare organizos dulingvajn konferencojn pri lingvosciencaj

demandoj en Paderborn aŭ aliloke, kaj publikigos la konferencajn materialojn; plu subtenos internacilingvajn resumojn en la resumaro HOMO KAJ INFORMO per invitoj al periodaĵoj pri sociaj sciencoj kunlabori kaj per varbado de abonantoj. Surbaze de siaj propraj kaj antaŭaj spertoj, EK instigos aliajn sciencajn kaj fakajn organizaĵojn apliki la principon de dulingvismo al siaj internaciaj konferencoj kaj publikaĵoj; kuraĝigos internacilingvajn resumojn de nacilingvaj verkoj kaj artikoloj; donos helpon rilate tradukojn.

3.33. EK publikigos aŭ kuraĝigos publikigon de plurlingvaj fakvortaroj por diversaj sciencaj branĉoj kun difinoj de la terminoj en IL kaj almenaŭ en unu el la naciaj lingvoj aŭ, se pli oportune, sen difinoj.

3.4. *Klerigo kaj Edukado*

3.41. EK daŭrigos la instruadon de IL en la lernejoj fare de kvalifikitaj geinstruistoj laŭ la principo de lingvoorientiĝo kaj aplikante tiucele ankaŭ la aŭdovidan instrumaŝinon ROBBINATO, sed ĝi apogos ĉiujn formojn kaj metodojn de lerneja kaj eksterlerneja instruado, kiuj rapide kapabligas la gelernantojn ekregi la lingvon skribe kaj parole.

3.42. EK laboros por laŭgrada enkonduko de IL kiel studobjekto en ĉiujn lernejojn kaj universitatojn de Eŭropo, kaj subtenos la samdirektajn agadojn de aliaj organizaĵoj, grupoj kaj unuopuloj, sed ĝi subtenos ankaŭ eksterlernejan instruadon. EK dediĉos specialan atenton al la fakaj lernejoj kaj eksterlernejaj kursoj kun la celo atingi ĉe la gelernantoj bazan konversacian kapablon kaj bonan scion de la respektivaj fakterminaroj en IL. EK opinias, ke en la nuna agadstadio la ĝemeliĝintaj eŭropaj urboj prezentiĝas kiel aparte taŭga medio por vastigo de la instruado.

3.43. La lernado kaj scio de IL – per si mem kleriga – helpas la studadon de pluraj aliaj objektoj (ekz. geografio kaj historio), faciligas la lernadon de aliaj lingvoj, kontribuas al pli bona kompreno de la propra nacia kaj, en eŭropaj kadroj, edukas al eŭropaj interkompreniĝo kaj kunlaborado. En sia agado EK emfazos, prilaboros kaj antaŭenigos tiujn klerigajn kaj edukajn flankojn de dulingveco.

3.5. *Eŭropa Kulturpolitiko*

3.51. Bazante sin sur la antaŭaj spertoj (ekz. la amasa apogo al IL de pli ol 800 eŭropaj urbestroj ĉe la Eŭropa Knsilantaro), EK daŭrigos sian aktivadon por influi la eŭropan kulturpolitikon por dulingveco per okazigo de publikaj diskutoj kun reprezentantoj de ĉiuj politikaj partioj kaj rektaj sinturnoj al unuopaj partioj, per agadoj en la parlamentoj, intervenoj ĉe la eŭropaj institucioj kaj ĉe diversaj eŭropaj neregistaraj organizaĵoj.

3.52. Samcele EK klopodos ricevi ankaŭ la personan apogon de pliaj elstaraj politikaj gvidantoj, scienculoj kaj kulturaj agantoj.

3.53. EK deklaras sian pretecon firme kunlabori kun ĉiuj grupoj kaj organizaĵoj, kiuj agas sur la sama kampo.

4. ORGANIZAJ KAJ FINANCAJ DEMANDOJ

4.1. Organizo

4.11. La Estraro kun la oficejo de EK en Paderborn funkcios kiel plenuma kaj kunordiga centro por la realigado de la Programo. Ĝi harmoniigos la agadojn ankaŭ de tiuj organizaĵoj kaj grupoj, kiuj ekster EK laboras en unu aŭ pluraj el la 5 ĉefaj branĉoj (direktoj) laŭ la Programo, kaj kiuj deziras tion.

4.12. Pri ĉiu agadbranĉo respondecos kompetenta persono, laŭ ebleco membro de la Estraro de EK (branĉa respondeculo), kies tasko estas organizi reton da kompetentaj kunlaborantoj en la eŭropaj landoj kaj efektivigadi la koncernan parton de la Programo paralele kun la efektivigado de la taskoj en la ceteraj branĉoj. Estus dezirinde, ke ĉiu respondeculo, interkonsente kun siaj kunlaborantoj, ellaboru koncizan planon por agado en la respektiva branĉo konforme al tiu ĉi Programo.

4.13. La konsilantaro de EK helpas la Estraron per konsiloj kaj sugestoj en ĉiuj sciencaj demandoj. Ĝi konsistos el ĉiuj branĉaj respondeculoj kaj el nedefinita nombro da aliaj membroj. Tiujn lastajn elektos la jara ĉefkunveno de EK el inter eŭropaj sciencistoj, membroj aŭ nemembroj de EK, atentante ke estu reprezentitaj kiel eble plej multaj eŭropaj nacioj kaj sciencaj branĉoj en la agadsfero de la Programo.

4.14. La Estraro regule raportos pri la realigado de la Programo al la jara ĉefkunveno de EK kaj respondecos al ĝi. La Estraro sendos la jaran raporton ankaŭ al ĉiuj donacintoj, subvenciantoj, membroj de la konsilantaro, kunlaborantoj kaj kunlaborantaj organizaĵoj, kiuj ne estas membroj de EK.

4.2. Financaj Rimedoj

4.21. EK atendas, ke la diskonigo kaj popularigo de tiu ĉi Programo ne nur havigos al EK la simpatiojn de vastaj popoltavoloj en Eŭropo kaj la apogon de multaj kulturaj, politikaj, financaj kaj aliaj decidaj faktoroj, sed ankaŭ konsiderinde altigos la nombron de ĝiaj membroj. Tio donos almenaŭ la minimuman bazon de la necesaj financaj rimedoj.

4.22. Evidente, nuraj kotizoj, eĉ de pluraj miloj da membroj, neniel sufiĉas por realigi tiun ĉi ampleksan kaj multifacetan Programon. Tial EK, paralele kun la varbado de novaj membroj, turnos sin al eŭropaj institucioj kaj registaroj, industriaj kaj komercaj entreprenoj, diversaj fondaĵoj kaj unuopaj mecenatoj kun la peto kontribui al la realigo de la Programo per financa helpo en formo de unufojaj donacoj aŭ de regulaj jaraj subvencioj. La Estraro kun la helpo de aparta Komisiono de Financaj Ekspertoj de EK prizorgos tiun demandon, esence gravan por la realigo de la Programo.

5. KONKLUDO

5.1. Sukcesa etapa solvado de la lingva problemo laŭ la baza principo de dulingvismo eĉ nur en unu parto de la tradicia Eŭropo, ekzemple kaj unuavice en

EEK, sendube servus kiel imitinda modelo en aliaj partoj kaj verŝajne ĝeneraliĝus. La sama principo povus baldaŭ etendiĝi al la tuta mondo, kio, kvankam tre utila kaj por Eŭropo kaj por la mondo, tamen transiras la konkretajn celojn de EK.

5.2. La fina solvo de la lingva problemo en Eŭropo estos la plej grava evento en la kultura historio de Eŭropo kun senlimaj pozitivaj flankefikoj en ĉiuj sencoj kaj direktoj, aktualaj kaj perspektivaj. Ĝi estos avantaĝa por ĉiuj eŭropaj nacioj kaj iliaj nacianoj, por Eŭropo kiel tia kaj la eŭropaj civitanoj, sen malavantaĝoj por kiu ajn, escepte de tiuj, kiuj pretendas por sia propra nacio la neekzistantan rajton kulture – kaj sekve ankaŭ ekonomie kaj politike – superregi la aliajn aŭ, alivorte, fari kulturalan genocidon.

5.3. Eŭropa Klubo estas konvinkita, ke per bona volo, adekvataj financaj rimedoj kaj multe da sindona laboro tiu ĉi Agadprogramo estas realigebla en relative mallonga tempo. EK plene fidus je plureca Eŭropo, kulture unueca en diverseco, kaj deziras, ke tia Eŭropo konserviĝu kaj prosperu. EK kaj ĝia Agadprogramo ne parolas nur pri Eŭropo, sed ankaŭ eŭrope.

Antaŭ la Konferenco en Beograd**JURA VALORO
DE LA FINA AKTO DE HELSINKI****1. Antaŭpreparoj**

La 1-an de aŭgusto 1975 la reprezentantoj de 33 eŭropaj ŝtatoj, de Kanado kaj Usono, subskribis en Helsinki la Finan Akton de la Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaborado en Eŭropo, konata mallonge kiel la Fina Akto de Helsinki. El la eŭropaj ŝtatoj nur Albanio malakceptis la inviton partopreni kaj ne sentis sin en kiu ajn senco ligita al la Akto.

La Fina Akto estas rezulto de longaj traktadoj inter Soveta Unio kaj la blokaj landoj sub ĝia influo, unuflanke, kaj la okcidentaj demokratioj aŭ duondemokratioj, aliflanke. La iniciato venis de Soveta Unio en la kadro de ĝia politiko de t.n. „paca kunekzistado” kaj la kunligita koncepto de „socialisma internacia juro” (1), fakte kun la celo sekurigi siajn poziciojn en Eŭropo pro la danĝeraj streĉitecoj sur la limoj kun Ĉinio en Azio.

La unua propono pri okazigo de tia konferenco estis farita jam en marto 1969 dum renkontiĝo de la ŝtatoj apartenantaj al la Varsovia Pakto. Tamen, nur meze de 1972, post kiam estis ratifitaj la traktatoj inter FR Germanio kun Pollando respektive kun Soveta Unio, kaj post kiam la landoj de la Varsovia Pakto akceptis la proponon de la ŝtatoj apartenantaj al la Nordatlantika Pakto, ke, samtempe kun la Eŭropa Konferenco, komenciĝu la traktadoj inter la du blokoj pri malgrandigo de la armitaj fortoj kaj de armado en Centra Eŭropo, estis kreitaj la antaŭkondiĉoj por la realigo de tiu ideo.

La Konferenco estis unue malfermita en Helsinki la 3-an de julio 1973. Post tio la laboroj estis daŭrigitaj en Ĝenevo de la 18-a de septembro 1973 ĝis la 21-a de julio 1975. Do, dum preskaŭ du jaroj oni klopodis harmoniigi la starpunktojn pri tri grupoj de demandoj: sekureco (senarmigo), ekonomia kunlaboro, homaj rajtoj kaj kulturaj interŝanĝoj. Rilate la lastan grupon la starpunktoj plej grave diverĝis kaj kaŭzis longajn diskutojn. Dum la Okcidento insistis je libera fluo de ideoj kaj personoj, la soveta flanko same firme insistis pri ŝtatpartia kontrolo de ĉiuj interŝanĝoj sur

(1) Pri la soveta koncepto de „paca kunekzistado”, respektive de „socialisma internacia juro” v. la artikolojn de la aŭtoro „The Legal Aspects and Political Significance of the Soviet Concept of Co-existence” (12 *The International and Comparative Law Quarterly*. 1963, p-oj 737-777) kaj „The Soviet Concept of ‘Socialist’ International Law” (*The Year Book of World Affairs*, 1975, p-oj 242–265).

kultura kampo. Fine, post kiam oni iel, almenaŭ formale, harmoniigis la poziciojn, la Konferenco denove translokiĝis en Helsinki, kie ĝi estis fermita per la akcepto de la Fina Akto. Samtempe estis decidite, ke en 1977 okazos plia konferenco en Beograd por ekzameni la rezultojn de la Fina Akto, kaj ke prepara kunveno por organizi tiun konferencon okazos en Beograd la 15-an de junio 1977. Estas do taŭga momento por diri kelkajn vortojn pri la jura valoro de la Fina Akto. Tamen, por pli bone komprenigi la diskutatan temon, necesas unue koncize prezenti la enhavon de la Akto.

2. Enhavo

La Fina Akto konsistas el preamblo*, kvar partoj kaj konkludo, do entute el 6 partoj.

La preamblo en solena formo, kiel kutime en tiaj dokumentoj, proklamas la motivojn kaj celojn: „kontribui en Eŭropo al paco, sekureco, justeco kaj kunlaborado” por atingi proksimiĝon inter la ŝtatoj de Eŭropo en la intereso de iliaj popoloj, kiel ankaŭ proksimiĝon al aliaj ŝtatoj de la mondo. La ŝtatoj reprezentitaj en la Konferenco tial decidiĝis efektiviĝi ĝiajn rezultojn kaj tiamaniere „vastigadi, profundigadi kaj fari la procezon de malstreĉiĝo (*détente*) kontinua kaj daŭra”. Jam tiu formulo, laŭvorte tradukita el unu el la aŭtentikaj lingvoj, indikas, ke ne temas pri la firma jura sindevigo, sed multe pli pri deklaro de politiko.

La tuta longa teksto de la Akto mem estas dividebla je 4 partoj.

La unua parto, kun la titolo „Demandoj Rilataj al Sekureco en Eŭropo”, konsistas el aparta Enkonduko kaj du „dokumentoj”. Dokumento numero 1 konsistas el „Deklaro pri Principoj Gvidantaj la Rilatojn Inter la Partoprenantaj Ŝtatoj” kaj „Aferoj Rilataj al Efektivigo de Iuj el la Supraj Principoj”. La dua dokumento havas la titolon „Dokumento pri Konfido-Konstruaj Rimedoj kaj pri la Aspektoj de Sekureco kaj Senarmigo”. Ĝi konsistas el 3 punktoj: antaŭinformo pri pli grandaj militmanovroj, demandoj rilataj al senarmigo, ĝeneralaj konsideroj.

La dua parto rilatas al „Kunlaborado sur la Kampoj de Ekonomio, Scienco kaj Teknologio, kaj Homa Medio”. Ĝi konsistas el 6 sekcioj, ĉiu kun pluraj subsekcioj: komercaj interŝanĝoj, industria kunlaborado kaj projektoj de komuna intereso, reguloj koncerne komercan kaj industriaran kunlaboradon, scienco kaj teknologio, homa medio, kunlaborado en aliaj sferoj.

La tria parto havas la titolon „Demandoj Rilataj al Sekureco kaj Kunlaborado en Mediteraneo”. Ĝi ne havas subdividojn kaj la ĝenerala celo estas progresigi sekurecon kaj stabilecon en la regiono de Mediteraneo.

La kvara parto estas titolita „Kunlaborado sur la Humaneca kaj sur Aliaj Kampoj”. Ĝi estas precize la parto, kiu elvokis kaj plu elvokas kreskantan interesiĝon en la vastaj tavoloj de la popoloj de Eŭropo – kaj ankaŭ ekster Eŭropo. Tial ĝi estos pritraktita sube iom pli detale.

* *Preamblo* (angle *preamble*, france *préambule*) estas iom solena enkonduko, en kiu estas prezentitaj la ĉefaj celoj kaj motivoj de jura akto, kaj ankaŭ de jure nedeviga dokumento, precipe sur la kampo de internacia juro kaj, pli vaste, ĝenerale de interŝtataj rilatoj. La aŭtoro opinias, ke estas utile enkonduki tiun neologismon kiel fakan juran terminon.

La konkluda parto („Sekvoj de la Konferenco”) enhavas kelkajn principojn kun deklara karaktero por la realigo de la Fina Akto kaj anoncas pliajn konferencojn, el kiuj la unua, kiel menciite, okazos en Beograd en 1977.

3. Juraj Aspektoj

3.1. *Ĝeneralaj konsideroj.* – Diference de tio, kion oni vaste kredas sub la influo de informoj kaj artikoloj en la ĉiutaga gazetaro, la Fina Akto kiel tia ne estas jure deviga. La tri ĉefaj fontoj de internacia publika juro estas la internaciaj konvencioj, la kutimjuro kaj la ĝeneralaj juraj principoj rekonitaj de la civilizaj nacioj

(2). En la nuntempa mondo la plej grava jura fonto estas la internaciaj (interŝtataj) konvencioj, ĉu ĝeneralaj, ĉu specialaj, t.e. diversspecaj interŝtataj interkonsentoj kreantaj jurajn regulojn eksplicite rekonitajn de la partioj,, tute egale ĉu la konkreta akto nomiĝas konvencio aŭ alimaniere (traktato, pakto, kontrakto, interkonsento, protokolo, fina akto, ĉarto, statuto, konstitucio, k.s.). Eĉ la rezolucioj de la ĝenerala Asembleo de UN, kiuj havas karakteron de nuraj rekomendoj, do ne estas jure devigaj

(3), fariĝas devigaj en la reciproka rilatoj de tiuj ŝtatoj, kiuj eksplicite akceptis ilin kiel jure devigajn. Ne gravas la nomo donita al iu dokumento. Gravas ĉiam la intenco de la partioj. Tial, depende de la intenco, ĉu eksplicite esprimita, ĉu konstatebla el la enhavo mem de la dokumento, ankaŭ internacijura teksto titolita „fina akto” povas esti aŭ deviga (ekzemple la Fina Akto de la Viena Kongreso de 1815) aŭ nedevida.

En la kazo de la Fina Akto de Helsinki la subskribintaj ŝtatoj ne volis doni al ĝi la forton de jure deviga interkonsento. Tio sekvas el la eksplicita klaŭzo en la konkluda parto, laŭ kiu la registaro de Finnlando estis komisiita sendi la Akton al la Ĝenerala Sekretario de UN ne por registri ĝin konforme al art. 102 de la Ĉarto, sed kun la sola celo cirkuligi ĝin al la Ŝtatoj-Membroj de UN. La menciita art. 102 preskribas, ke ĉiu traktato aŭ alia interŝtata interkonsento devas esti registrita ĉe la Sekretario, kaj ke „neniu partio de traktato aŭ interŝtata interkonsento povas alvoki tiun traktaton aŭ interkonsenton antaŭ kiu ajn organo de UN”, se la traktato aŭ interkonsento ne estas registrita. Estas, do, evidente, ke la eksplicite esprimita intenco de la partioj estis ne doni al la akto karakteron de jure deviga interŝtata interkonsento.

La jure nedevidan karakteron konfirmas ankaŭ aliaj klaŭzoj de la akto. Ekzemple, en la konkluda parto estas ankaŭ dirite, ke la ŝtatoj-partoprenantoj deklaras sin „rezolutaj” entrepreni agojn aŭ unuflanke en la kazoj, en kiuj tiaj agoj eblas, aŭ duflanke per traktadoj kun aliaj ŝtatoj-subskribintoj, aŭ plurflanke per kunvenoj de ekspertoj kaj en la kadro de la ekzistantaj internaciaj organizaĵoj, ĉio-ĉi

(2) Art. 38 de la Statuto de la Internacia Kortumo. La Ĉarto de Unuiĝintaj Nacion kaj Statuto de la Internacia Kortumo aperis en Esperanto-traduko en 1970 sub aŭspicio de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj. Konciza prezento de la fontoj de internacia juro troviĝas, interalie, en la esperantlingva verko de la aŭtoro *Aktualaj Problemoj de la Nuntempa Internacia Juro*, p-oj 31–34.

(3) La literaturo pri la jura valoro de rekomendoj ne estas abunda. La aŭtoro de tiuj ĉi linioj pritraktis tiun demandon en pluraj el siaj nacilingvaj verkoj, kaj lia esperantlingva studo „La Jura Karaktero de Rekomendoj” aperis en P. Neergaard, *Sciencaj Studoj*, 1958, p-oj 83–96.

cele al la realigado de la Akto. Tamen, eĉ sen la Akto la ŝtatoj ĉiam rajtis kaj plu rajtas entrepreni tiajn paŝojn, se ili tion deziras kaj, plue, la Akto neniel devigas ilin fakte fari tion.

Tiom pri la jure nedeviga karaktero de la Fina Akto kiel tia, per si mem. Iom alie prezentigas la afero, se oni analizas ĝiajn unuopajn punktojn, erojn kaj klaŭzojn.

3.2. *Jura analizo de la enhavo.* – Analizo de la enhavo el jura vidpunkto montras, ke la Fina Akto konsistas el du grupoj da eroj, klare distingendaj: (i) la principoj kaj reguloj kiuj pro la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj estas devigaj, kaj (ii) la tekstoj kun pure deklara aŭ rekomenda karaktero, do jure nedevigaj.

Al la unua grupo apartenas ĉiuj dek bazaj principoj, kiujn entenas la menciita Deklari pri Principoj en la unua parto de la Akto, kaj kiuj devus regi la rilatojn inter la partoprenantaj ŝtatoj. Ili estas: 1. suverena egaleco kaj respekto de la rajtoj esence propraj al suvereneco; 2. rezigno pri minaco aŭ uzo de perforto; 3. netuŝebla de la landlimoj; 4. teritoria integreco de la ŝtatoj; 5. paca solvado de malkonsentoj; 6. neinterveno en la internajn aferojn de aliaj ŝtatoj; 7. respekto por la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj, inkluzive la liberecon de pensado, konscienco, religio aŭ kredo; 8. egalaj rajtoj kaj memdecido de la popoloj; 9. kunlaborado inter la ŝtatoj laŭ la celoj kaj principoj de Unuiĝintaj Nacioj; 10. plenumado bonafide de obligacioj sub internacia juro. Tiuj principoj kaj la multnombraj reguloj ligitaj al ili, jam delonge estas parto de la nuntempa publika internacia juro. La Akto eĉ eksplicite mencias formulojn kiel „en la kadro de internacia juro”, aŭ „konforme al la internacia juro”, aŭ simile. Ekzemple, en la sekcio pritraktanta la principon de suverena egaleco estas dirite, ke „ĉiuj partoprenantaj ŝtatoj havas egalajn rajtojn kaj devojn en la kadro de internacia juro”; en la sama sekcio estas rekonita la jam ekzistanta rajto de ĉiu ŝtato „difini kaj konduki laŭ sia deziro la rilatojn kun aliaj ŝtatoj konforme al internacia juro”; en la sekcio pri la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj la partoprenantaj ŝtatoj deklaris, ke ili „agos konforme al la celoj kaj principoj de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj kaj al la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj”, ktp.

Komprenoble, la menciitaj kaj aliaj identkarakteraj principoj kaj reguloj estas jure devigaj ne pro la Akto, sed tial, ĉar ili estas konsista parto de la ekzistanta juro. La fakto mem, ke ili estas ankoraŭfoje rekonitaj en la Akto, certe ne donas al ili pli da jura forto, sed nur indikas, ke la subskribintaj ŝtatoj, aŭ almenaŭ kelkaj el ili, malobservis siajn internacijurajn devojn kaj implicite deklaras, ke estontece ili atentos al siaj internacijuraj obligacioj.

Al la alia grupo apartenas diversaj deklaroj pri intencoj aŭ pri dezirindeco de difinita politiko sur la kampoj de sekureco, ekonomiko, scienco, teknologio, homa ĉirkaŭaĵo, kulturo kaj aliaj sferoj. Tiaj eroj kun karaktero de rekomendoj abundas ĉie en la Akto. Jen nur kelkaj ekzemploj por ilustri la formon, en kiu ili estas esprimitaj:

En la parto pri kunlaborado sur la ekonomika kampo estas dirite, ke la partoprenantaj ŝtatoj „estas rezolutaj progresigi ... sian reciprokan komercon” kaj ke ili „rekonas la gravecon de duflankaj kaj multflankaj interŝtataj kaj aliaj interkonsentoj por la longperioda evoluigo de komerco”. Ili ankaŭ „kuraĝigos organizaĵojn, entreprenojn kaj firmaojn, okupiĝantajn pri eksterlanda komerco, entrepreni paŝojn por rapidigi la kondukadon de prinegocaj traktadoj”; aŭ

„antaŭenigos la publikigadon kaj diskonigadon de ekonomikaj kaj komercaj informoj je regulaj intervaloj...”; aŭ „rekomendas, kie konvene, al organizaĵoj, entreprenoj kaj firmaoj en siaj landoj inkluzivi arbitraciajn klaŭzojn en komercajn kontraktojn pri industria kunlaborado, aŭ en specialajn interkonsentojn”. En la sekcio pri turismo la partoprenantaj ŝtatoj, „rekonante la reciprokan rilaton inter la evoluigo de turismo kaj la rimedoj entreprenataj en aliaj sferoj de ekonomika aktivado, esprimas sian intencon kuraĝigi pli intensan turismon kaj de individuoj kaj de grupoj...”.

Similaj formuloj pri intenco, kuraĝigoj, rekomendoj ktp. estas uzataj ĉie en la Akto. Pri kelkaj la subskribintoj mem verŝajne konsciis, ke ili ne estos realigitaj. Tio tute speciale rilatas al la sekcio „Fremdaj Lingvoj kaj Civilizacioj” en la kvara parto de la Akto. La partoprenantaj ŝtatoj „esprimis sian intencon ... kuraĝigi la studadon de fremdaj lingvoj kaj civilizacioj kiel gravan rimedon cele al vastigo de komunikado inter la popoloj, por ke ili pli bone konatiĝu kun la kulturo de ĉiu lando, kiel ankaŭ por la fortikigo de internacia kunlaborado”. Sekvas tuta aro da rekomendoj pri plua plibonigo de la lingvoinstruado, variigo de elekto de la lingvoj instruataj sur diversaj niveloj, atendado al la instruado de „malpli disvastiĝintaj aŭ studataj lingvoj”, kaj pri la metodoj aplikotaj por atingi tion. Ĉio estas tre belaj vortoj, aŭditaj jam multfoje kaj entenataj eĉ en pluraj duflankaj konvencioj, sed praktike sen kia ajn valoro. Ĉiu serioza studento de internaciaj rilatoj bone scias, ke la lingvodiverseco estas unu el la plej grandaj obstakloj barantaj la vojon al reciproka konatiĝo de la popoloj, kaj tial ankaŭ al „fortikigo de internacia kunlaborado”. Pri tio ne povas esti dubo. Sed ĉiu ankaŭ scias, ke, pro la multnombreco kaj malfacileco de la eŭropaj kaj de ĉiuj aliaj naciaj lingvoj, la rekomendoj de Helsinki ne estus realigeblaj, eĉ se la intencoj de la subskribintoj estis sinceraj. La fakto estas, ke, malgraŭ la plej modernaj lingvoinstruaj metodoj, la scio de fremdaj lingvoj estas minimuma, grandparte eĉ nula, kompare kun la fortostreĉoj kaj la centoj da milionoj da laborhoroj dediĉitaj ĉiujare al tiu celo. Eĉ personoj kun altgrada edukiteco – por ne paroli pri la vastaj amasoj de la popoloj

– sentas sin surdaj kaj mutaj en fremdaj lingvaj medioj. Nur deviga instruado de la Internacia Lingvo (Esperanto) kiel simpla, facila kaj nacipolitike neŭtrala instrumento de komunikado, povas radikale solvi la problemon kaj efike kontribui al interkompreniĝo ne nur en Eŭropo, sed en la mondo. Pri tio la Fina Akto silentas. Cetere, laŭ nia scio, ĝis nun neniu eŭropa ŝtato ŝanĝis siajn instruprogramojn por konformiĝi al la rekomendoj de la Fina Akto.

La rekomendoj, tre oftaj en la nuntempaj interŝtataj aktoj, kvankam jure nedevigaj, ne estas enigataj de ĉia ajn valoro. Ili indikas la sekvotan politikon por plibonigi difinitajn situaciojn, kaj instigas, kun pli aŭ malpli alta morala premo, la ŝtatojn agi konforme.

4. Homaj Rajtoj kaj Fundamentaj Liberecoj

4.1. Jure devigaj dokumentoj. – Jam en la unua parto – Demandoj Rilatantaj al Sekureco en Eŭropo – la partoprenantaj ŝtatoj eksplicite rekonis „la universalan signifon de la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj ... sen diferencigo laŭ raso, sekso, lingvo aŭ religio”, kaj emfazis, ke „la respekto de tiuj rajtoj estas esenca faktoro

de la paco, justeco kaj bonfarto, necesaj por certigi la evoluon de amikaj rilatoj inter ili mem, kiel ankaŭ inter ĉiuj ŝtatoj”. Ili eksplicite deklaris, ke „ili daŭre respektos tiujn rajtojn kaj liberecojn en siaj reciprokaj rilatoj, kaj klopodos, ĉu kune, ĉu ĉiu el ili aparte, inkluzive en kunlaboro kun Unuiĝintaj Nacioj, progresigi universalan kaj efektivan respekton por ili”.

Kiel oni vidas, la Fina Akto prave ligas la demandojn de paco kaj sekureco kun la respekto de la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj. Tiurilate la baza koncepto de la Akto estas esence identa al tiu de la Ĉarto de UN, laŭ kiu „la popoloj de Unuiĝintaj Nacioj” rekonfirmis sian „kredon je la fundamentaj homaj rajtoj, je la digno kaj valoro de la homa personeco, je la egalaj rajtoj de viroj kaj virinoj kaj de nacioj grandaj kaj malgrandaj kiel unu el la esencaj kondiĉoj por „savi estontajn generaciojn de la plago de milito...”. Efektive, ĉiuj seriozaj analizoj de internaciaj rilatoj montras, kaj multaj bedaŭrindaj spertoj konfirmas, ke sen observado de la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj daŭraj paco kaj sekureco ne povas realiĝi. Paco kaj libereco estas nedisigeblaj. Nur paco en libereco ricevas sian plenan sencon kiel la plej granda valoro de la homaro.

Aparte atentinda estas la deklaro, entenata en la sama unua parto, ke la partoprenantaj ŝtatoj agos konforme al la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj kaj plenumos la obligaciojn, kiuj sekvas el multnombraj internaciaj interkonsentoj sur la kampo de homaj rajtoj, el kiuj la plej gravaj estas la Internaciaj Paktoj pri la Homaj Rajtoj, devigaj por tiuj ŝtatoj, kiuj subskribis kaj ratifikis ilin. Plian fojon tio estas nenio alia ol rekonfirmo de la obligacioj de la ŝtatoj laŭ la jura stato, kiu parte ekzistis jam en la momento de la subskribo de la Fina Akto, kaj aliparte estis kompletigita post la subskribo.

Kia, do, estas la jura situacio?

La Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj, akceptita kaj proklamita de la Ĝenerala Asembleo de UN la 10-an de decembro 1948, en la komenco sendube havis karakteron de rekomendo el formale-jura vidpunkto. Tia estis la ĝenerala opinio de la internacijura doktrino. Tamen, jam en 1949 troviĝis kelkaj aŭtoroj, inter kiuj la verkinto de tiuj ĉi linioj, kiuj argumentis, ke la Universala Deklaracio, kvankam rekomendo laŭ sia formo, tamen laŭ la enhavo estas jure deviga por ĉiuj Ŝtatoj-Membroj de Unuiĝintaj Nacioj. La ĉefa argumento estis, ke la Ĉarto de UN, do sendiskute jure deviga traktato, ne nur laŭ la preamblo, sed ankaŭ laŭ pluraj artikoloj (ekzemple 1/3, 13/1b, 62/2) fakte devontigas la Ŝtatojn-Membrojn observi la homajn rajtojn kaj fundamentajn liberecojn por ĉiuj, kaj ke tiuj rajtoj kaj liberecoj estas formulitaj kiel universalaj nur en la Universala Deklaracio (5). Poste la Universala Deklaracio estis tiel ofte citata kaj en rezolucioj de UN kaj antaŭ kortumoj de unuopaj ŝtatoj, ke nuntempe ĝia enhavo estas ĝenerale rekonita kiel parto de internacia kutimjuro.

(4) Preamblo de la Ĉarto.

(5) Vidu, interalie, en la verko citita en piednoto 3, p-oj 73-93.

Aliflanke, multnombraj internaciaj konvencioj pri diversaj aspektoj de homaj rajtoj, inkluzive la konvenciojn de la Internacia Labor-Organizaĵo (ILO), ekvalidis jam longe antaŭ la subskribo de la Fina Akto. La du Internaciaj Paktoj pri la Homaj Rajtoj, eksplicite menciitaj en la Fina Akto, estas la Internacia Pakto pri la Civitanaj kaj Politikaj Rajtoj (en la plua teksto: Unua Pakto) kaj la nacia Pakto pri la Ekonomikaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj (en la plua teksto: Dua Pakto), ambaŭ akceptitaj unuanime de la Ĝenerala Asembleo de UN la 16-an de decembro 1966.

La du paktoj kompletigas la Universalan Deklaracion. La Dua Pakto ekvalidis la 3-an de januaro 1976, la Unua Pakto la 23-an de marto 1976, t.e. en ambaŭ kazoj tri monatojn post la depono de la tridek kvina instrumento (dokumento) de ratifiko aŭ instrumento de aliĝo ĉe la Sekretariato de UN konforme al art. 49 de la Unua Pakto kaj art. 27 de la Dua Pakto (6).

Sekve, la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj en ĉiu okazo kiel parto de la nuntempa internacia kutimjuro, kaj la du paktoj por tiuj ŝtatoj, kiuj ratifikis ilin aŭ aliĝis al ili, estas jure devigaj tute senkonsidere al la Fina Akto kaj al ĝia rekomenda karaktero.

Aldone utilas diri, ke la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj, entenataj en la Universala Deklaracio kaj en la du paktoj – kune vera Universala Ĉarto de Homaj rajtoj – estas pli multnombraj kaj pli precize formulitaj, ol la tiurilataj rekomendoj kaj intencdeklaroj de la Fina Akto. Tion facile evidentigas konciza komparo.

4.2. Kelkaj komparoj. – La kvara parto de la Akto estas titolita „Kunlaborado sur Humaneca kaj Aliaj Kampoj”. La preamblo plian fojon emfazas la deziron kontribui al fortikigo de paco kaj kompreniĝo inter la popoloj, kiel ankaŭ al la spirita riĉiĝo de la homa personeco sen diferencigo laŭ raso, sekso, lingvo aŭ religio”. La cetera teksto konsistas el jenaj kvar sekcioj: 1. Homaj Kontaktoj (familiaj ligoj, reunuiĝo de familioj, internaciaj geedziĝoj, personaj kaj profesiaj vojaĝoj, turismo, renkontiĝoj de gejunuloj, kontaktoj inter registaraj kaj neregistaraj organizaĵoj);

2. informado (cirkulado, alireblo kaj interŝanĝado de informoj: parolaj kaj presitaj informoj, filmoj kaj radio-televido, plibonigo de la laborkondiĉoj de ĵurnalistoj, k.s.);

3. Kunlaborado kaj interŝanĝoj sur la Kampo de Kulturo (tre multnombraj eroj pri dezirindeco de kunlaboro en la sferoj de ekspozicioj de libroj, bibliotekoj, teatro, muziko, baletoj, kino-filmoj, plastikaj kaj grafikaj artoj, folkloro ktp.); 4. Kunlaborado kaj Interŝanĝoj sur la Kampo de Edukado (universitatoj, informoj pri edukado, aktiva kunlaborado sur scienca kampo, studado de fremdaj lingvoj kaj civilizacioj, ktp.).

Se oni komparas la unuopajn rekomendojn en tiu ĉi parto de la Fina Akto kun la Universala Deklaracio aŭ kun la du paktoj, la diferencoj estas frapaj. Ekzemple, en la sekcio pri homaj kontaktoj estas dirite, ke la partoprenantaj ŝtatoj „favore konsideros petskribojn por vojaĝoj kun la celo permesi al personoj eniri aŭ eliri iliajn

(6) Soveta Unio subskribis ambaŭ paktojn la 18-an de marto 1968, kaj la Prezidio de la Supera Soveto de USSR ratifikis ilin la 18-an de septembro 1973. Tial, ekde la ekvalido de la du paktoj, iliaj preskriboj devus esti rekte aplikataj sur la tuta teritorio de USSR. Se iuj el la preskriboj kontraŭas la ekzistantan sovetan juron, la preskriboj de la paktoj estas pli fortaj kaj devas esti aplikataj konforme al la ĝenerala regulo de art. 569 de la Civila Kodo de RSFSR, de la reguloj de la civilaj kodoj de la ceteraj 14 sovetaj respublikoj, identaj al la tutunia Fundamenta Principaro de Civila Juro de USSR kaj de la Uniaj Respublikoj.

teritoriojn provizore, kaj regule se dezirate, por viziti membrojn de siaj familioj”. Laŭ art. 13/2 de la Universala Deklaracio, la rajto „eliri el kiu ajn lando, inkluzive la propran, kaj reveni en sian landon”, estas absoluta, ne kondiĉita de la deziro viziti familianojn, aŭ de kiu ajn alia motivo aŭ celo. Art. 12 de la Unua Pakto preskribas, ke ĉiu persono, laŭleĝe troviĝanta sur teritorio de iu ŝtato rajtas libere moviĝi ene de ĝiaj limoj kaj elekti sian rezidejon; plue, ke ĉiu havas la rajton forlasi sian aŭ kiun ajn alian landon, kaj ke neniu povas esti arbitre senigita de sia rajto reveni en sian propran landon. La ŝtatoj povas nur per leĝo limigi tiun rajton je libera moviĝo, sole pro motivoj de nacia sekureco, publika ordo (*ordre public*), publika sano aŭ moralo, aŭ por protekti la rajtojn kaj liberecojn de aliaj civitanoj.

En la sekcio pri reunuiĝo de familioj estas dirite, ke la partoprenantaj ŝtatoj traktos favore, „en pozitiva kaj humaneca spirito”, la petskribojn de personoj dezirantaj esti reunuigitaj kun siaj familioj, precipe se la petanto estas malsana aŭ maljuna. Surbaze de similaj „humanecaj konsideroj” estos traktataj la petoj pri eliraj aŭ eniraj vizoj faritaj de personoj, kiuj deziras geedziĝi al civitanoj de alia partoprenanta ŝtato. Nu, la Universala Deklaracio kaj la paktoj donas tion kiel rajton, sen kiaj ajn „humanecaj konsideroj” aŭ „humaneca spirito”. Rilate geedziĝon la Universala Deklaracio eksplicite preskribas, ke plenaĝaj viroj kaj virinoj rajtas geedziĝi kaj formi familion „sen kia ajn limigo pro raso, nacieco (ŝtataneco) aŭ religio” (art. 16); la Unua Pakto konfirmas tion en art. 23; la Dua Akto esence ripetas la samon en art. 10. Tio, en ligo kun la jure rekonita rajto libere forlasi sian landon kaj reveni en ĝin, estas multe pli ol promesas la Fina Akto pro „humanecaj konsideroj”, kvankam fakte plenumo de la promeso, eĉ nur pro humanecaj motivoj, certe valoras pli ol rekonita, sed krude malobservata rajto.

La samon oni povas diri pri la aliaj eroj de tiu ĉi sekcio. Temas, interalie, pri la promesoj de la partoprenantaj ŝtatoj faciligi vojaĝojn por personaj aŭ profesiaj celoj per simpligo de la proceduroj rilate eligajn kaj enirajn vizojn; aŭ progresigi turismon „sur individua kaj kolektiva bazo” per „simpligo kaj rapidigo de la necesaj formalajtoj”; aŭ „plu evoluigi kontaktojn inter registaraj institucioj kaj neregistaraj organizaĵoj” per faciligo de internaciaj kunvenoj kaj vojaĝoj de delegacioj, grupoj kaj individuoj dezirantaj partopreni tiajn kunvenojn. Tiuj kaj similaj promesoj estas abunde kovritaj per la jam menciita rajto libere moviĝi enlande kaj eksterlande, kiel ankaŭ per art. 20 de la Universala Deklaracio („ĉiu havas la rajton je libereco de pacema kunvenado kaj asociiĝo”), kaj per art. 21 kaj 22 de la Unua Pakto (rajto de kunvenado kaj rajto de asociiĝo).

La sekcio pri informado, same tiel entenas multajn promesojn por „faciligi pli liberan kaj pli vastan diskonigon de ĉiaspecaj” informoj tra la gazetaro, radio, televido, kino, presagentejoj kaj ĵurnalistoj laborantaj sur tiuj kampoj, ĉio ĉi kun la celo atingi pli bonan konon kaj komprenon pri la diversaj vivaspektoj de la partoprenantaj ŝtatoj. Diference de tiaj promesoj, multilate kondiĉitaj, la Universala Deklaracio senkondiĉe kaj klare rekonas, ke „ĉiu, ... havas la rajton peti, ricevi kaj havigi informojn kaj ideojn per kiu ajn rimedo kaj sen konsidero pri la landlimoj” (art. 19). Art. 19 de la Unua Pakto estas eĉ pli vasta kaj eksplicita, ĉar ĝi preskribas, ke ĉiu havas la rajton ne nur peti kaj ricevi, sed ankaŭ „doni informojn kaj ideojn de

ĉiuj specoj, senkonsidere al la landlimoj, ĉu parole, skribe aŭ prese, ĉu en formo de arto, aŭ per kiu ajn alia rimedo laŭ sia elekto”.

Estus facile vicigi pliajn ekzemplojn. Tamen la kelkaj koncize analizitaj komparoj montras, ke tio, kion la Fina Akto promesis doni kiel ian grandaniman gracon pro „humanecaj” kaj aliaj motivoj aŭ por difinitaj celoj, la homoj devus ricevi kiel siajn senkondiĉajn rajtojn.

5. Konkludo

Kvankam per si mem jure nedeviga, la Fina Akto tamen havas rimarkindan moralan forton kaj grandan signifon almenaŭ el jenaj kvar vidpunktoj:

(i) Ĝi prezentiĝas kiel tre taŭga kriterio por testi la deklaritan pretecon de la partoprenantaj ŝtatoj plenumi bonafide siajn ekzistantajn internacijurajn obligaciojn, rekonfirmitajn eksplicite en la Akto, kaj kiel mezurilo por establi la gradon de ilia sincereco en la realigado de la partoj kun politikdeklara aŭ rekomena karaktero.

(ii) Diference de aliaj interŝtataj aktoj, inkluzive jure devigajn, kies praktikaj realigoj tute ne povas, aŭ apenaŭ povas esti publike diskutataj (aŭ eĉ disputataj) en internacia kunveno, speciale organizita tiucele, la atingoj aŭ foresto de atingoj, kiel ankaŭ la sinteno de unuopaj registaroj en la periodo post Helsinki, estos ĉiuflanke priparolataj kaj ekzamenataj en la Konferenco de Beograd, en ĉeesto de centoj da ŝtataj reprezentantoj, ekspertoj, sekretarioj, aliaj funkciuloj kaj multnombraj eksteraj raportistoj. La nura „minaco” de tia publika aerumado kun anticipa scio pri al la eblaj reciprokaj riproĉoj, premas la registarojn iom atenti al siaj agoj kaj igas ilin eviti almenaŭ la plej krudajn malobservojn de la propraj promesoj.

(iii) La Fina Akto jam nun elvokas pli da interesiĝo de la gazetaro kaj de la aliaj rimedoj de publika informado, ol la Universala Deklaracio, la du paktoj kaj multaj aliaj interŝtataj konvencioj aŭ alispecaj jure devigaj interkonsentoj. Dum la Konferenco en Beograd la Akto certe troviĝos en la fokuso de publika atento. Sur la nuna evoluŝtupo de internacia juro, praktike sen sankcioj en kazo de malobservo al ĝiaj preskriboj, la kontrolo kaj premo fare de la publika opinio en demokratioj ricevas tute apartan dimension de siaspeca, eksterjura sankcio. Tial, la vasta apogo de la publika opinio al la Fina Akto faras ĝin fakte pli forta, tiusence eĉ konsiderinde pli forta, ol estas tre multaj interŝtataj aktoj, ja jure devigaj, eĉ kun jure antaŭviditaj sankcioj, sed sen efikaj rimedoj devigi la ŝtatojn observi la koncernajn obligaciojn.

(iv) En tiaj kondiĉoj la Fina Akto fariĝis potenca batalilo en la manoj de ĉiuj unuopuloj kaj premgrupoj, kiuj luktas per pacaj rimedoj, sen uzo de perforto, por la realigo de la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj ne nur kiel indaj per si mem, sed ankaŭ kiel esenca faktoro de interpopola kompreniĝo kaj kiel kondiĉo de paco en libereco. Ĝuste tio donas al la Akto altan moralan-etikan valoron.

En: *Internacia Jura Revuo* 7. 1977: 2 (16), p. 11–17;

ankaŭ en: *Eŭropa Dokumentaro* 1979: 22, p. 3–6.

KELKAJ JURAJ ASPEKTOJ DE LA MULTLINGVECO EN *EEK*.

1. La Lingva Obstaklo

En neniu mondoparto la lingva problemo sentiĝas tiel akute, kiel en Eŭropo, ĉar ĉi tie dense unu apud la alia kunvivas multnombraj nacioj kun siaj propraj naciaj lingvoj, en kiuj estas kreitaj imponaj kulturaj valoroj, kiujn ili rigardas kiel esceptajn partojn de siaj specifaj kulturaj esprimoj, kiujn ili deziras protekti kiel la ĉefajn elementojn de siaj naciaj identecoj.

Ĝuste tial la eŭropaj organizaĵoj kaj institucioj ne povis apliki la lingvajn formulojn de San Francisko – kiuj intertempe fiaskis ankaŭ en UN – sed devis rekoni, ke ĉiuj lingvoj de la Ŝtatoj-Membroj estas egale oficialaj. Tio kaŭzas ĉiaspecajn pure lingvoteknikajn, jurajn, politikajn, sociajn, psikologiajn kaj aliajn grandajn malfacilaĵojn, aldone al la enormaj ekonomiaj ŝarĝoj, kiujn postulas la tradukado kaj interpretado en pluraj aŭ eĉ multaj lingvoj, depende de la institucio kaj de la konkretaj cirkonstancoj. Oni ne forgesu, ke temas pri centmiloj da paĝoj de diversaj traktatoj, konvencioj, aldonaj dokumentoj, protokoloj kaj aliaj aktoj, kaj ke eĉ la menuoj por bankedoj devas esti skribitaj en ĉiuj respektivaj lingvoj.

Ne surprize, ke en la Eŭropa Ekonomia Komunaĵo (EEK) la tradukistoj kaj interpretistoj ludas tre gravan rolon. Pli ol 500, do ĉ. 10 % de la tuta oficistaro, laboris nur en la Komisiono de la Komunaĵo jam antaŭ ol la angla kaj dana estis aldonitaj al la kvar oficialaj lingvoj la 9-an de oktobro 1972, anticipante la larĝigon de EEK la 1-an de januaro 1973. Post tiu dato ilia nombro konsiderinde altiĝis. Nuntempe, la tradukaj servoj okupas ĉ. 40 %-ojn de la tuta oficistaro. Ĉ. 1.500 interpretistoj kaj tradukistoj laboras en diversaj instancoj kaj oficejoj de EEK. Laŭ la londona *Times* de la 7-a de decembro 1976, la kostoj estis pli ol 12 milionoj da pundoj nur en 1975. Kaj tiuj kostoj daŭre altiĝas.

La lingva situacio en EEK kaŭzas apartajn malfacilaĵojn, ĉar EEK estas supernacia laŭ sia karaktero, daŭre kreas sian propran, eŭropan juron, kiu grandparte estas rekte aplikata en la Ŝtatoj-Membroj, do sur teritorioj kun siaj apartaj juraj sistemoj, kun apartaj juraj terminologioj kaj juraj tradicioj.

2. Tradukaj Problemoj

Por iom komprenigi la situacion, unue kelkajn vortojn pro la tradukaj problemoj ĝenerale. Estas konata la itala *traduttore – traditore* (tradukanto –

perfidanto), kiu rilatas al kiu ajn traduko. En la sfero de kompara juro la problemo estas eĉ multe pli komplika pro la principa postulato de maksimuma precizeco, unuflanke, kaj pro la fakta malebleco trovi absolute adekvatajn esprimojn en la lingvo aŭ lingvoj de la traduko, aliflanke. Lingvo ĉiam spegulas difinitan socialan realaĵon. Sekve, ĉiu jura-teknika termino kovras nur difinitan juran nocion en difinita jura sistemo. Ekzemple, la anglaj terminoj *solicitor*, *barrister* kaj multaj aliaj ne estas tradukeblaj en la francan aŭ germanan, aŭ kiun ajn eŭropan lingvon, ĉar tutsimple en ili ne troviĝas identaj vortoj pro la foresto de tiuj nocioj mem en la juraj sistemoj de la koncernaj ŝtatoj. Tamen, eĉ se la sama jura nocio troviĝas en du aŭ pluraj naciaj juraj sistemoj, kaj tial ekzistas ankaŭ terminoj por tiuj nocioj en la respektivaj naciaj lingvoj, tamen ege malofte la nocioj identas, kaj tial la terminoj en la koncernaj lingvoj ne havas kaj ne povas havi identan sencon. Eĉ tiaj ordinaraĵaj juraj terminoj kiel proprieto, posedo, juĝisto, advokato, krim, k.s., troviĝantaj en ĉiuj lingvoj de la Komunaĵo, havas unu signifon en unu nacia jura sistemo, kaj ofte tre malsaman en alia.

Okaze de aliĝo de Britio al EEK necesis traduki la traktatojn kaj amason da aliaj juraj tekstoj el la franca en la anglan. Tiam ankoraŭfoje montriĝis, ke la kvazaŭe „korespondaj” terminoj en la du lingvoj preskaŭ neniam precize korespondis. Interalie, tion atestas ankaŭ D. F. Hall en sia *Translating the Treaties* (Tradukado de la Traktatoj), publikigita en la printempa numero de *European Review*, 1972. Se la anglaj tradukistoj estus prenintaj en konsideron ankaŭ la same aŭtentikajn germanan, italan kaj nederlandan tekstojn, kiel ili estus devintaj fari, ili estus renkontintaj eĉ pli da malfacilaĵoj, ĉar ankaŭ tiuj tekstoj en la kvar originalaj lingvoj de la Komunaĵo ofte diverĝas inter si. En tiaj kazoj necesas traduki laŭ la maksimume komuna senco de ĉiuj aŭtentikaj tekstoj, adekvate aplikante la malnovan latinan maksimumon ke *scire leges non hoc est verba earum tenere, sed vim ac potestatem*.

Jen 2–3 el centoj da ekzemploj nur por ilusti kelkajn malfacilaĵojn en la tradukado de la Traktato de Romo (1957) el la franca en la anglan pro la malsameco de signifoj en la du lingvoj: la franca *mission* estas tradukita per *task* en Art. 2, sed per *objective* en Art. 5; la franca *dispositions legislatives* estas tradukitaj per *law*, *dispositions règlementaires* per *regulations*, *dispositions administratives* per *administrative actions*, ĉiuj troviĝantaj en Art. 48; la franca *domicile* ne estas tradukita per la alisenca angla *domicile*, sed per *home*, dum la franca *résidence* ja estas tradukita per *residence*, ambaŭ en Art. 125; ktp. Tiuj ekzemploj estas prenitaj el unu el la sukcesaj versioj, tiu de H.M.S.O.; la aliaj, ekzemple tiu de P. Minte, estas malpli sukcesaj.

Malgraŭ la elstara kompetenteco de tradukistoj, tamen la tekstoj ne malofte malsamas. La Pariza Traktato de 1951 ne kaŭzas tiurilate malfacilaĵojn, ĉar la sola aŭtentika teksto estas la franca. Sed la Traktatoj de Romo (1957) kun aŭtentikaj versioj en 4 lingvoj kaj tiu de Bruselo (1972) kun aŭtentikaj versioj en 8 lingvoj, kiel ankaŭ amaso da aliaj juraj aktoj verkitaj en 4 aŭ, post la 9-a de oktobro 1972, en 6 oficialaj lingvoj ja kaŭzas multajn problemojn en kazoj de diverĝoj. Tiuj problemoj estas solvataj laŭ la reguloj pri jura interpretado, jam bone establitaj en internacia juro.

3. Pri Jura Interpretado

La fakto, ke ĉiuj plurlingvaj oficialaj tekstoj estas egale aŭtentikaj signifas, ke kiu ajn el ili povas esti citita kiel entenanta la ĝustan juran regulon, kaj ke, sekve, neniu havas pli da forto ol kiu ajn alia. Se la aŭtentikaj tekstoj de iu jura akto malsamas – kaj pro la malsameco de la senco de terminoj pri juraj konceptoj en diversaj lingvoj ili ofte ja malsamas – la baza jura supozo estas, ke la interpreto devas ne kontraŭi kiun ajn el la egale aŭtentikaj tekstoj. Necesas, do, unuavice establi la sencon de ĉiu teksto en la respektiva lingvo laŭ la reguloj de jura interpretado en la koncerna nacia jura sistemo, duavice, necesas trovi tian sencon, kiu ne kontraŭas kiun ajn el la aŭtentikaj tekstoj. Se temas pri du aŭtentikaj tekstoj, el kiuj unu havas pli vastan sencon ol la alia, la afero estas relative simpla: la malpli vasta senco estas decida, ĉar ĝi estas implicita en la pli vasta. Tiu fundamenta principo de restriкта interpretado en internacia juro estis konfirmita de la Internacia Kortumo en Hago jam en 1927 en la fama kazo de la koncesioj Mavromatis. Ĝi estis aplikata ankaŭ en la jura interpretado de la Komunaĵo.

Unusola ekzemplo sufiĉos por klarigi la principon. Art. 48/2 de la Traktato de EEK preskribas la abolon de kiu ajn diskriminacio inter la „laboristoj de la Membro-Ŝtatoj” surbaze de ilia ŝtataneco koncerne dungon, salajron kaj aliajn laborkondiĉojn. Ekzistis duboj rilate la demandon al kiu fakte rilatas tiu regulo: ĉu al ĉiuj laboristoj rezidantoj (konstante loĝantaj) en la Ŝtatoj-Membroj, kiel implicas *Arbeitnehmer der Mitgliedstaaten* en la germana aŭtentika teksto, aŭ nur al la ŝtatanoj de tiuj landoj konforme al *Travailleurs des Etats Membres* laŭ la same aŭtentika franca teksto. Oni aplikis la principon de restriкта interpretado kaj la Konsilo eksplicite limigis tiun rajton nur al la ŝtatanoj (Reglamento 1612/68). Aliflanke, la rifuĝintoj kaj senŝtatanoj, rezidantaj en kiu ajn el la Ŝtatoj-Membroj, estis eksplicite metitaj en la saman pozicion kiel la ŝtatanoj rilate socian sekurecon (Reglamento 1408/71, pli frue Reg. 3). En la komenco eĉ ne estis klare ĉu la vorto *laboristo* en Art. 48 rilatas ne nur al manlaboristoj, sed ankaŭ al oficistoj, eĉ tiuj en gvidaj pozicioj, konforme al la senco de *Arbeiter* en la germana juro, aŭ ĝi havas malpli vastan sencon, sed la nun valida Regleto precizigis la sencon per la termino „salajrogajna okupo” (angle *wage earning occupation*), do rilatas al ĉiuj salajrataj gelaboruloj.

4. Lingvaj Reguloj de la Kortumo

Specialaj, tre komplikaj prilingvaj reguloj estas aplikataj en la Kortumo de la Komunaĵo. Jen la ĉefaj:

Ĉiuj 6 lingvoj de la Komunaĵo estas samtempe oficialaj lingvoj de la Kortumo, sed nur unu el ili povas esti uzata kiel procedura lingvo. La enkonduko de la koncepto de procedura lingvo estis necesa ne nur por ebligi glatan disvolviĝon de la procesoj antaŭ la Kortumo, sed ankaŭ por forigi la problemojn ligitajn al interpretado de plurlingvaj juraj tekstoj, en tiu ĉi kazo de ĝiaj juĝoj. La proceduran lingvon elektas la plendanto laŭ sia bontrovo, se la plendo ne estas direktita kontraŭ iun Ŝtaton-Membron, aŭ personon (fizikan aŭ juran) apartenantan al iu el la Ŝtatoj-

Membroj. Male, se la plendo estas direktita kontraŭ Ŝtaton-Membron aŭ personon apartenantan al ĝi, la procedura lingvo estas la oficiala lingvo de la plendito (defendanto). Se pro kiu ajn kaŭzo pluraj oficialaj lingvoj estas implicitaj (ekzemple 2 en kazo de Belgio, aŭ en kazo de plendo kontraŭ plurajn defendantojn kun malsamaj lingvoj), la plendanto povas elekti kiujn ajn el ili. Plue, surbaze de komuna peto de la partioj la Kortumo povas decidi, ke iu alia el la oficialaj lingvoj estu la procedura. La Kortumo povas rajtigi la uzon de iu alia oficiala lingvo kiel procedura ankaŭ je la peto de nur unu el la partioj, sed tion ĝi povas fari nur escepte, post plej atenta konsidero de la argumentoj prezentitaj fare de ĉiuj interesitaj partioj.

La procedura lingvo estas uzata por ĉiuj plendoj kaj kontraŭplendoj, skribaj kaj parolaj atestoj de kiu ajn speco, pledoj kaj aliaj proceduraj agoj antaŭ la Kortumo. Dokumentoj en kiu ajn alia lingvo devas esti prezentitaj kun la tradukoj en la procedura. Atestantoj kaj ekspertoj rajtas uzi aŭ la proceduran aŭ iun alian oficialan lingvon, sed la Kortumo permesos al ili uzi neoficialan lingvon, se ili ne kapablas esprimi sin en iu el la oficialaj. Eksperto aŭ atestanto, eĉ se li parolas la proceduran lingvon, rajtas adresi sin al juĝisto en sia propra lingvo, se li tion deziras. Tamen, ĉio ajn dirita en kiu ajn neprocedura lingvo devas esti tradukita en la proceduran kaj protokolita en ĝi. Aliflanke, la prezidanto de la Kortumo, la prezidantoj de la Ĉambroj, la juĝisto-raportisto, la juĝistoj kaj ĝeneralaj advokatoj rajtas uzi en siaj respektivaj proceduraj funkcioj (direktado de la proceso, raportado, ekzamenado de atestantoj kaj ekspertoj, ktp.), kiun ajn oficialan lingvon anstataŭ la procedura. Kompreneble, ankaŭ en tiaj kazoj ĉio devas esti tradukita en la proceduran lingvon kaj protokolita en ĝi. Fine, juĝisto aŭ ĝenerala advokato aŭ partio rajtas postuli, ke ĉio dirita kaj protokolita en la procedura lingvo estu tradukita en oficialajn lingvojn laŭ la elekto de la petanto.

La debatoj de la Kortumo antaŭ la proklamo de la juĝo estas sekretaj, sen partopreno de interpretistoj. Antaŭ la aliĝo de la tri pliaj ŝtatoj, la franca estis ĝenerale uzata kiel debatlingvo je malavantaĝo de tiuj juĝistoj, kiuj ne scias ĝin aŭ ne regas ĝin kontentige. Tial unuopaj juĝistoj kutimis kaj plu kutimas esprimi sian opinion en sia nacia lingvo kaj poste en la akceptita debata lingvo. La juĝo mem estas verkita en la procedura lingvo kaj tio estas la sola aŭtentika teksto.

Aldone al la prezentitaj ĉefaj prilingvaj reguloj, ekzistas tuta aro da aliaj, kiujn aplikas la Kortumo, sed kiujn ne eblas eĉ tuŝi ĉi tie. Por fronti sian apartan lingvan problemon la Kortumo havas je dispono propran lingvodepartementon, en kiu laboras konsiderinda nombro da ekspertoj kun kombinitaj scioj de pluraj oficialaj lingvoj kaj juraj kompetentecoj.

5. Konkludo

Tia, plej koncize, estas la lingva situacio en EEK. Apenaŭ necesas diri, ke, krom la multflankaj ĉiaspecaj problemoj, el kiuj nur kelkaj povis esti pritraktitaj, ĝi kaŭzas ankaŭ tre grandan ekonomian ŝarĝon. La kostojn, finfine, devas pagi la civitanoj kaj loĝantoj de la Ŝtatoj-Membroj. Estas evidente, ke ĉiujn problemojn de tradukado, interpretado de plurlingvaj juraj tekstoj, procesoj antaŭ la Kortumo kaj

procedoj en aliaj instancoj de la Eŭropa Komunaĵo povas efike solvi nur la akcepto de unusola lingvo kiel oficiala, kaj ke tiu lingvo neniel povas esti kiu ajn el la naciaj. Por supernacia juro estas bezonata supernacia lingvo kun propra karaktero kaj propra terminologio, t.e. kun precizaj difinoj de juraj konceptoj aplikataj en la komunaĵo: difinoj senigitaj de nacilingvaj kaj nacijuraj influoj. Tio ankaŭ kontrubuas al formiĝo de nova generacio de juristoj, edukitaj en spirito de la eŭropa juro de la Komunaĵo, kio siavice estas unu el la esence gravaj elementoj por ĝia bona funkciado kaj plua evoluo.

La Internacia Lingvo (Esperanto) jam posedas sufiĉe riĉan juran terminologion. Post la necesaj kompletigoj, ĝi povus esti facile utiligita por difini ĉiujn jurajn konceptojn de la Komunaĵo en la daŭro de nuraj kelkaj jaroj. Ne estus malfacile trovi sufiĉe grandan nombron da kompetentaj ekspertoj, kiuj povus plenumi tiun taskon. Necesus nur trovi la financajn rimedojn, kio siavice certe ne prezentigis kiel nesolvebla problemo, se la aŭtoritatoj de la Komunaĵo kaj precipe la Ŝtatoj-Membroj donus sian apogon al tiu racia solvo. Ĝi ebligis la transiron de la nuna multlingveco al unulingveco. Tamen, ĝi estas afero de la estonteco. Nuntempe la lingva problemo en la eŭropaj institucioj, precipe en EEK, ekzistas kaj ĉiam pli komplikiĝas.

LA POLITIKA KAJ LINGVA MAPO DE EŬROPO

1. Enkonduko

En prelego farita dum la pasintjara Konferenco de NEM estis pritraktita la lingva problemo en la nuntempo kun aparta konsidero al la bezonoj de Eŭropo. Surbaze de tiu kaj aliaj prelegoj, kiel ankaŭ de ideoj esprimitaj en la diskutoj pri la temo, estis ellaborita projekto de Memorando kaj Perspektiva Agadprogramo de la Eŭropa Klubo por la Solvo de la Lingva Problemo en Eŭropo. Ĝi konsistas el kvin mallongaj ĉapitroj, titolitaj Eŭropo Hodiaŭ, La Lingva Problemo, Aktivadoj en Kvin Direktoj, Organizaj kaj Financaj Demandoj, Konkludo.

La projekto estis unue publikigita en *Horizonto* n-ro 6/77¹. En novembro 1977 ĝi estis multobligita kaj distribuita al la membroj de Eŭropa Klubo en la originala lingvo kaj en germana traduko. Bedaŭrinde, la novembra jarkunveno de la Klubo ne havis sufiĉe da tempo por atente pridiskuti la tutan ampleksan dokumenton kaj tial ĝi akceptis la projekton kiel provizoran Agadprogramon ĝis la sekvanta jarkunveno, kiu devus decidi pri la definitiva teksto.

La tezoj, kiuj konsistigas la unuopajn ĉapitrojn de la menciita dokumento, estas rezulto de historiaj esploroj kaj atentaj studoj de la nuntempo. Preskaŭ pri ĉiu el ili oni povus fari plurajn pliajn prelegojn, skribi pliajn longajn artikolojn kaj pri kelkaj el ili eĉ verki tutajn monografiojn. En la hodiaŭa prelego estos prilaboritaj iom pli detale nur la tezoj rilatantaj al la politika kaj lingva situacio en Eŭropo, precipe tiuj entenataj en la sekcioj 1.11, 1.13 kaj 1.2 de la Agadprogramo, kiel ankaŭ al la nuna kaj potenciala roloj de la Internacia Lingvo (Esperanto) en tia situacio. Tiusence la nuna ĉeftemo estas nenio alia ol plivastigo kaj pliprofundigo de la pasintjara.

La aktuala politika kaj lingva mapo de Eŭropo estas nedisigeble ligita al ekesto kaj evoluo de la modernaj nacioj en etna senco de la vorto kaj al la paralela formiĝo de iliaj komunaj naciaj lingvoj. Ambaŭ estis rezulto de la materiaj fortoj ekĝermintaj jam en la sino de la eŭropa tipo de feŭdismo, kies lingva esprimo estis la mezepoka latina. Tial, por bone kompreni la preparolatan demandon, necesas unue diri kelkajn vortojn pri la esencaj karakterizoj de la feŭdismo en Eŭropo kaj pri la rolo de la latina kiel kuntena lingvo de tiu sistemo.

1) *Horizonto*, n-ro 12/77, p-oj 122–127. En la titolo estas ellasita la vorto "memorando", sed laŭenhave ĝi estas Memorando kaj Perspektiva Agadprogramo.

2. Feŭdismo kaj Naskiĝo de Nacioj

En feŭdismo la ĉefa formo de proprieto, decida por la karaktero de la tuta sistemo en sia evoluinta formo, estis la feŭdo, t.e. bieno kun ĉiuj instalaĵoj sur ĝi, inkluzive la laborforton, donita de suzereno (feŭda mastro) al vasalo (feŭda subulo), kiu kompanse devontigis sin al fideleco kaj diversaj servoj, unuavice militservo, kaj kontribuaĵoj.

La feŭda bieno produktis praktike ĉion, kio estis necesa por kontentigi la bezonojn: ne nur nutraĵojn - panon, viandon, trinkaĵojn, ktp. – sed ankaŭ ĉiaspeciajn metiaĵojn, de vestaĵoj kaj loĝobjektoj ĝis armiloj. La divido de la laboro estis minimuma. La interŝanĝoj okazadis ĉefe en la formo de produkto por produkto kaj tre malmulte pere de mono. Grandaj merkatoj ne ekzistis. Ĉiu feŭda bieno estis aparta ekonomia unuo, disigita de la aliaj per muroj de ekonomia memsufiĉo.

En la mezepokaj urboj, kvankam ili havis apartajn socian rolon kaj juran pozicion, la situacio ne multe diferencis tiurilate. La civitanoj – burĝoj – posedadis tie ne nur siajn metiejojn, sed ankaŭ siajn proprajn domojn, siajn ĝardenojn, kortobirdojn ktp. Ilia mastrumado sufiĉis por kontentigi la hejmajn bezonojn. La metiistoj estis organizitaj en gildoj kun ege striktaj reguloj. La metia produktado estis farata ne tiom por la merkato, do por la nekonata aĉetonto, sed surbaze de mendoj. Do, ankaŭ la urbaj mastrumoj estis fakte fermitaj ekonomiaj tutoj.

La organizo de la socia vivo fidele spegulis la ekonomian realaĵon. La grandega plimulto de la popolo - la servutuloj estis ligita al la tero. Latine oni tion diradis *glebae adscripti*. Ili ne rajtis forlasi la feŭdan bienon. Se la bieno transiris de unu posedanto al alia, ankaŭ la servutuloj ricevis novan mastron. Ili estis konsiderataj kiel parto de inventario. La amasoj – krom en kazoj de spontanaj ribeloj – havis preskaŭ neniajn reciprokajn kontaktojn. Nur la eklezio, la nobelaro kaj la tiama sciencularo kontaktis sur vastaj teritorioj. Tia stato de la socia vivo havis gravajn sekvojn ankaŭ sur la lingva kampo. La popolaj amasoj parolis sennombrajn dialektojn en diversaj lokaj lingvoformoj, dum la ekonomie regantaj rondoj, ligitaj per komunaj interesoj tra la tuta Eŭropo, utiligis la latinan kiel komunan klasan lingvon. Tio, siavice, plifirmigis la solidarecon en la suproj de la feŭda socio, sed, aliflanke, kontribuis al ankoraŭ pli granda diserigo de la bazo.

La ekonomia disrompiteco troviĝas en la radikoj mem de feŭdismo. Tamen, ne povis tuj speguliĝi ankaŭ je la politika organizo de la socio. La fondintoj de la t.n. barbaraj ŝtatoj, post la faligo de la Okcidenta Romia Imperio en la kvina jarcento, disdonadis la terojn de la subigitaj teritorioj al siaj parencoj, generaloj, kunlaborantoj kaj al la eklezio. Sin rigardante proprietoj de la tuta tero en la okupitaj landoj sukcesis centriĝi en siaj manoj grandegan potencon kaj krei larĝajn politikajn unuiĝojn. Tio povis okazi nur en la frua feŭdismo, kiam la nova ekonomia kaj socia ordo ne estis ankoraŭ sufiĉe fortika kaj kiam la personaj ligoj de dankemo, sindono kaj ĵurita fideleco al la reĝo fare de la nova nobelaro estis ankoraŭ tro freŝdataj kaj tro signifaj por esti facilanime neglektataj.

Por tiu ĉi unua periodo, ne same longa en ĉiuj feŭdaj ŝtatoj de Eŭropo, oni fakte povas diri, ke la ŝtata konstruaĵo similis al piramido. Sur la pinto troviĝis la reĝo,

la bazon formis la servutulaj amasoj, dum la intertavoloj konsistis el multnombraj malpli kaj pli grandaj nobelaj sinjoroj, ligitaj al siaj suzerenoj per vasala fideleco, ĵure konfirmita. Sed tiu piramido, en kiu la politika ordo ne respondis al la evolutendenco kondiĉita de la ekonomia strukturo, estis renversita kaj kuŝis aŭ, pli bone, balanciĝis sur sia pinto.

La plifirmiĝo de la feŭda ekonomia sistemo, akompanata de la samtempa malfortiĝo de la personaj ligoj en la feŭdula hierarkio, baldaŭ disrompis la kunligajn fadenojn kaj tiu piramida palaco falis pro la premo de sia propra pezo kaj diseriĝis. La sama sorto trafis ĉiujn grandajn mezepokajn ŝtatojn. Ĝi trafis eĉ tiel grandajn potencojn, kiaj estis la ŝtato de Karlo la Granda (9-a jc.) kaj la Kieva Ŝtato de la Rjurik-oj (10-a jc.). En la epoko de triumfo de la naturala ekonomio, en kiu oni interŝanĝis rekte produkton por produkto kaj kiu tial, laŭ sia esenco, mem, disrompis la socion en sennombrajn malgrandajn unuojn, ĉiu fortostreĉo krei grandajn politikajn unuiĝojn devis malsukcesi. La “centrifugaj fortoj en la ekonomia bazo ne povas esti venkitaj de la centripetaj fortoj en la politiko.

Tiele, baldaŭ ankaŭ la politika strukturo respondis al la ekonomia kazo. Formale, la reĝo estis plu konsiderata ne nur kiel tenanto de la supera politika potenco, sed ankaŭ kiel privata proprietulo de la tuta lando. Fakte, tamen, la tero fariĝis hereda posedaĵo de la nobelaro, de la eklezio kaj, parte, de la liberaj urboj kaj iliaj civitanoj. De la efektiva ekonomia kaj milita fortoj de ĉiu feŭdulo dependis lia persona povo ne nur en la kadro de la bieno, sed ankaŭ ekster ĝi. Tial ofte okazadis, ke unuopa granda nobelo fariĝadis eĉ pli grava kaj pli potenca ol la reĝo mem.

Oni klare vidas, ke en feŭdismo ne povis ekesti nacioj, nek formiĝi la koncepto mem pri nacio en la nuntempa senco de la vorto. La tuta strukturo de feŭdismo kontraŭstaris tion. La solaj du vastaj ideoj, kiujn ĝi naskis, estis la ideo de Kristanismo, konkretiĝinta en la Papismo, kaj la ideo de la t.n. Sankta Romia Imperio, lanĉita kaj subtenata de la Imperiestro. La unua bazis siajn pretendojn kaj pravigis sian politikan aktivadon per la religia universaleco de Kristanismo, dum la dua akcentadis la neceson renovigi la iaman grandecon de la antikva Romia Imperio. Tiuj du universalismaj ideoj, tamen, ne eliradis el la kadroj de la tiama politika penso. Ili estis nur plua sekvo de tiu ordo funkcianta pere de personaj rilatoj de supereco kaj subeco. Ju pli firmiĝadis la feŭdaj ekonomiaj rilatoj, des malpli grandaj estis la ŝancoj realigi universalan efektivan politikan potencon. Tial ankaŭ la du ideoj fakte malsukcesis. La novaj, grandaj sociaj kaj politikaj unuiĝoj, kiuj ekestis en la sekvinta historia periodo, dankas sian estiĝon kaj sian vivkapablon al aliaj faktoroj kaj ne al la universalismo de Kristanismo aŭ de la Imperio.

La decida faktoro, al kiu estis ligitaj ĉiuj aliaj, estis la evoluo de la produktorimedoj en la eŭropaj urboj. Kvankam la gravitpunkto de la ekonomia kaj socia vivo ankoraŭ longe restis la feŭda bieno, tamen, en la urboj, meze de la naturala ekonomio, la perfektigado de la produktoilaro ebligis la transiradon al novaj formoj de produktado, kaj la proprietuloj de tiuj potencaj produktorimedoj - la burĝaro - fortikigis sian pozicion kaj formiĝis kiel nova socia klaso, samtempe portanto de progresemaĵoj. Transirinte al la maŝina, manufaktura kaj poste industria produktado, do al produktado por la nekonata aĉetonto, por la merkato, la portantoj

de la novaj ekonomiaj fortoj estis interesitaj je kreo de ampleksaj ekonomiaj unuoj, en kies limoj ili senĝene, t.e. sen internaj doganaj kaj aliaj obstakloj, povos vendadi siajn varojn kaj kie ili samtempe estos protektataj kontraŭ la ekstera konkurenco.

Enkadre de tiu evoluo de la ekonomiaj fortoj la laboro ĉiam pli estis dividata. La mono ludis ĉiam pli gravan rolon kaj, kiel logika sekvo, la homoj ĉiam pli kaj pli venadis en staton de interdependeco sur multe pli vastaj teritorioj, ol estis la feŭdaj bienoj. Siavice tio kaŭzis evoluon de la komerco kaj necesigis la formiĝon de bankoj. Jam en la 12-a jc. preskaŭ la tuta komerco de Eŭropo estis en la manoj de la italaj urboj kaj precize en ili estis kreitaj la unuaj bankoj. La Banko de Venecio estis fondita jam en 1171 kaj funkciis ĝis la falo de la respubliko en 1797; la 76 bankistoj de Florenco en nuraj tri jaroj inter 1430 kaj 1433 – donis pruntojn de ĉ. kvin milionoj da oraj florenoj; similajn monnegocojn faradis la Banko de San Giorgio en Ĝenovo. la Banko de Amsterdam, fondita en 1609, kaj aliaj bankoj en la ekonomie florantaj eŭropaj urboj.

Ĉio-ĉi reflektiĝis en la socia vivo kaj en la renaskiĝo de la multfaceta eŭropa kulturo kiel daŭrigo, post miljara obskuro, de la greka-romia kultura heredaĵo. Oni komencis sentadi la apartenon ne plu sole al urbo aŭ bieno, sed al granda komunaĵo, la naskiĝanta nacio. Similiĝis multaj vivkutimoj, reviviĝis la realaj aŭ imagitaj komunaj tradicioj, kelkfoje eĉ fantaziaĵoj pri komuna deveno, ekĝermis ideoj pri egaleco de la homoj kaj amasiĝis la postuloj nuligi ĉiujn feŭdismajn privilegiojn. Tio fakte okazis: en iuj landoj pli frue, en aliaj pli poste. Tipa kaj la plej sanga ekzemplo estas la granda franca revolucio de 1789.

Necesas memori ke la monarkio, precipe en la komenco de tiu periodo, havis la plej bonajn aliancantojn en la burĝaro kiel klaso kaj en la urboj kiel politikaj unuoj. Ĝiaj klopodoj plilarĝigi kaj plifirmigi sian potencon super la feŭdaj grandaj nobeloj trovis apogon ĉe la t.n. tria klaso. Sed tiujn tendencojn krei grandajn unuecajn ŝtatojn helpis ankaŭ la malalta nobelaro, kiu atendis ke la monarkio protektos ĝin kontraŭ la grandnobeloj, kaj parte al la eklezio, kiu preferis ordon en forta monarkio, ol anarkian malordon en malforta. Rezulte kreiĝis la grandaj centralizitaj absolutismaj monarkioj kaj poste la grandaj unuecaj naciaj ŝtatoj.

Fine, la transpaso de feŭdismo al la nova ekonomia kaj socia ordo havis gravajn sekvojn, ankaŭ koncerne la lingvon. Rapide malaperadis la latina, kies socia portanto estis la feŭda klaso, paralele kun la formortado de tiu socia tavolo kiel reganta klaso. Tiun sorton de la latina klare antaŭvidis unu el la plej grandaj humanistoj de sia tempo, la hispano J. L. Vives (1492–1540), en sia libro *De Disciplinis* (1532), en kiu li skribis: "Estus feliĉo, se ekzistus unusola lingvo, kiun povus uzi ĉiuj popoloj...

Pereos la latina kaj tiam venos granda konfuzo en ĉiuj sciencoj, grava fremdiĝo inter la homa gento". Efektive, iom pli ol 100 jarojn poste, dum la Westfalia Kongreso (1648) la reprezentantoj de la eŭropaj ŝtatoj devis uzi siajn lingvojn, ĉar ili apenaŭ povis interkompreniĝis per la latina, kvankam ĝi plu estis skribe uzata por la diplomaciaj rilatoj.

Kiel malaperadis la latina, tiel formiĝadis la grandaj komunaj naciaj literaturaj lingvoj, kies celo estis servi kiel lingvaj komunikiloj de la formiĝantaj nacioj. Siavice ili fariĝis plia grava elemento en la fortikiĝo de la nacio kaj de la naciaj sentoj².

Kiel oni vidas, multaj faktoroj kontribuis al la kreiĝo de tio, kion ni hodiaŭ nomas nacio. Ĝi estas socia-politika kategorio, ekestinta sur difinita ŝtupo de ekonomia kaj ideologia evoluo, kaj verŝajne malaperonta en la estonteco pro esence novaj materiaj kondiĉoj. Nuntempe ĝi estas realaĵo, rekonita eĉ en internacia juro. Nacio estas socia komunaĵo, kutime ligita per komunaj interesoj sur pli aŭ malpli vasta teritorio, aŭ almenaŭ kun teritoria bazo, komuna norma lingvo, tradicioj, historio, vivmaniero, kelkfoje religio, politikaj aspiroj. Ĉiuj ĉi faktoroj aŭ nur kelkaj el ili, influante unu la alian, kune kontribuas al tiu psika stato, kiun karakterizas la sento pri aparteno al difinita nacio. Unufoje ekestinta, tiu koncepto povas esti transplantita ankaŭ en mediojn, kiuj ne posedas ĉiujn kondiĉojn por formiĝo de nacio, kaj tio fakte okazas.

La nova socia fakto trovis sian ideologian esprimon en naciismo. Ĝi rigardas la nacion kiel la fundamentan formon de ekonomia, socia, politika kaj kultura kunvivado de la homoj. Sekve, naciismo postulas, ke la nacio konserviĝu kiel suverena ŝtato, aŭ ke ĝi fariĝu tia, se ĝi ankoraŭ ne atingis ŝtatan organizformon. En kelkaj kazoj naciismo transformiĝis en imperialismon de la grandaj kontraŭ la ekzistarojn de la malgrandaj. Tio, interalie, kaŭzis kaj plu minacas kaŭzi konkermilitojn, unuflanke, kaj defendajn militojn, aliflanke.

La nuntempa politika kaj lingva situacio en Eŭropo ŝuldiĝas al la skizita, historia evoluo³ kaj al novaj ekonomiaj fortoj, precipe al spektakla evoluo de teknologio, kiuj necesigas kaj novajn formojn de politika organiziĝo kaj racian solvon de la lingva problemo.

3. *Lingva kaj Politika Strukturo*

Geografie Eŭropo etendiĝas de Uralo ĝis Atlantiko. Tio estas la tradicia kaj klasika Eŭropo de multfaceta komuna kulturo elkreskinta el la samaj radikoj de la greka-romia heredaĵo, kiun la renesanco kaj humanismo de la 14-a ĝis la 16-a jarcentoj riĉigis per novaj enhavo kaj formo. El lingva vidpunkto, rezulte de la prezentita evoluprocezo, ĝi estas Eŭropo de sesdeko ĝis sepdeko da kulturaj naciaj aŭ etnaj lingvoj kaj multnombraj dialektoj.

Por eviti konfuzon, estu tuj dirite, ke nacia lingvo estas komuna norma lingvo de plene formiĝinta nacio. La esprimo "etna lingvo" estas uzata en tiu ĉi kunteksto por indiki lingvon de relative malgranda aŭtonoma lingva kaj kultura komunaĵo sen propra nacia ŝtato kaj kutime ne pretendanta akiri plenan politikan sendependiĝon

2) La formiĝo de kelkaj komunaj lingvoj, inkluzive Esperanton, estas sufiĉe detale, pritraktita en ĉap. V kaj VI de *Retoriko*, tria eldono, Roterdamo, 1971, p-oj 91-116,

3) En la verko de la preleganto *Aktualaj Problemoj de la Nuntempa Internacia Vivo*, Roterdamo, 1952, troviĝas pliaj analizoj kaj eksplikoj pri la formiĝo de nacioj kaj naciaj ŝtatoj, federalismo kaj pluraj konektitaj demandoj.

kaj kreon de tia ŝtato, sed nur kulturalan aŭtonomion en la kadro de la nacie fremda ŝtato, ekzemple la kimra lingvo en Britio. Por lingva kaj kultura komunaj apartenanta laŭ ŝtataneco al nacie fremda ŝtato, sed laŭ nacieco, inkluzive lingvon, al samnacia alia ŝtato, estas preferinde uzi la terminojn "nacia minoritato", "minoritata nacia lingvo", k.s., ekzemple la hungara lingvo en Jugoslavio, aŭ la slovena en Aŭstrio, ktp.

La normaj naciaj kaj etnaj lingvoj estas fakte komunaj lingvoj super la multnombraj respektivaj dialektoj, slangoj, lokaj kaj alispecaj parolformoj. Ne ekzistas konvenaj firmaj kriterioj por distingi lingvon disde dialekto kaj loka parolformo⁴. Unu el la diferencoj, vere grava almenaŭ el politika vidpunkto, estas, ke la naciaj kaj etnaj lingvoj troviĝas unu apud la alia sur horizontala ebenaĵo, por tiel diri, dum la naciaj kaj etnaj lingvoj en rilato al la dialektoj kaj lokaj parolformoj troviĝas vertikale unuj super la aliaj. En marĝenaj kazoj eĉ tiu kriterio povas kelkfoje montriĝi nefidinda kaj havi gravajn politikajn konsekvencojn. Unu el la tipaj nuntempaj ekzemploj estas Makedonio kaj la makedona lingvo. Dum en Jugoslavio la makedona nacio kaj makedona lingvo estas rekonitaj eĉ konstitucie, la nuntempa oficiala bulgara politiko pretendas, ke ne ekzistas makedona nacio kaj ke la makedona lingvo estas nenio alia ol dialekto de la bulgara lingvo. El tiu ekzemplo klare vidiĝas, ke la distingo inter lingvo kaj dialekto ne estas nura lingvistika akademia demando, sed tre grava el politika vidpunkto.

La menciitaj 60–70 naciaj kaj etnaj normaj lingvoj - unu aŭtoro⁵ listigas kaj koncize prezentas precize 67 - estas parolataj en la sekvantaj 34 aŭ, se oni inkluzivas Andoron, 35 eŭropaj ŝtatoj:

Albanio, Andoro, Aŭstrio, Belgio, Bulgario, Cipro, Ĉeĥoslovakio, Danlando, Finnlando, Francio, Germana DR, Germana FR, Granda Britio kaj Norda Irlando, Grekio, Hispanio, Hungario, Irlando, Islando, Italio, Jugoslavio, Liĥtenŝtejno, Luksemburgio, Malto, Monako, Nederlando, Norvegio, Pollando, Portugalio, Rumanio, San Marino, Svedio, Svislando, Turkio, Unio de Sovetaj Socialismaj Respublikoj kaj Vatikano. Du el la menciitaj ŝtatoj - Turkio kaj USSR - troviĝas nur parte en Eŭropo.

Lasante flanke por la momento la ekonomiajn-sociajn sistemojn kaj la politikajn reĝimojn en la eŭropaj ŝtatoj, la fundamenta kaj decida kaŭzo de ilia ekesto kaj ekzisto en la nuna formo en la grandega plimulto de kazoj estas la nacia principo, t.e. principo kiu nuntempe eĉ jure rekonas al ĉiu nacio la rajton konstituiĝi kiel sendependa ŝtato kun la propra nacia lingvo kiel la sola oficiala ŝtata lingvo. Pro la fakto, ke en Eŭropo ne ekzistas nete tranĉitaj teritoriaj limoj inter unu nacio kaj alia, sed en multaj regionoj miksite kunvivas apartenantoj de diversaj nacioj kaj etnoj, la nacia aŭ nacieca principo ne povis kaj neniam povos esti plene kaj strikte realigita. Tio kaŭzis kaj plu kaŭzos ĉiaspecajn politikajn tensiojn kaj aliajn problemojn, kiuj en

4) V. pri tio en *Retoriko*, precipe p-oj 24–25, 76–77, 94–96, 104–105, 107, 109 kaj en la verkoj cititaj en la respektivaj piednotoj.

5) Harald Haarman, *Soziologie und Politik der Sprachen Eŭropas* (Sociologio kaj Politiko de la Lingvoj de Eŭropo), München, 1975. Pluraj informoj pri la lingva strukturo de unuopaj eŭropaj ŝtatoj estas prenitaj el tiu ĉi verko, tiurilate tre bona kaj fidinda, siavice bazitaj sur la verko de S. I. Bruk kaj V. S. Apenĉenko, *Atlas Narodov Mira* (Atlaso pri la Popoloj de la Mondo), Moskvo, 1964.

la lastaj jaroj eĉ pli komplikiĝis pro la kultura kaj politika konsciigo kaj emancipiĝo de pliaj etnaj grupoj postulantaj aŭ aŭtonomion de diversaj gradoj en la koncernaj nacie fremdaj ŝtatoj, aŭ kompletan sendependiĝon, kiel ankaŭ pro la kreskanta migrado inter la eŭropaj ŝtatoj, precipe la okcidenteŭropaj.

La formiĝo kaj nuna ekzisto de kelkaj aliaj eŭropaj ŝtatoj - fakte nur la tute malgrandaj Andoro, Liĥtenŝtejno, Monako, San Marino kaj la iom pli granda Luksemburgo - ŝuldiĝas ne tiom al nacieca principo, kiom al aliaj faktoroj, ĉefe historiaj kaj ekonomiaj, dum Vatikano estas ŝtateto de tute speciala karaktero, ekestinta surbaze de religiaj, historiaj kaj politikaj konsideroj. Ankaŭ la kvarlingva Svislando (Helvetia Konfederacio), fondita jam en 1291 per federiĝo de la svisaj kantonoj, estas iom aparta kazo, en kiu gravan rolon ludas ĝia geopolitika situo aldone al nacieca elemento kaj historiaj, ekonomiaj, religiaj kaj aliaj faktoroj.

La eŭropaj unuecaj ŝtatoj kun tre homogena loĝantaro laŭ nacieco kaj gepatra lingvo estas tre malmultaj, fakte nur Irlando, Islando, Portugalio, Malto, Luksemburgo kaj la tre malgrandaj Andoro, Liĥtenŝtejno, San Marino kaj Vatikano.

Naciaj ŝtatoj – ĉu unuecaj, ĉu enhavantaj aŭtonomajn regionojn, ĉu federacie organizitaj – kun unu ĉefnacio kaj unu ĉeflingvo, sed kun naciaj aŭ etnaj minoritatoj kaj minoritataj lingvoj (kelkaj indikitaj parenteze) de proksimume ĝis 10 procentoj kompare kun la tuta loĝantaro, estas Albanio (greka, makedona, serba, rumana), Aŭstrio (slovena, kroata, ĉeĥa, hungara, k.a.), Danlando (germana, feroa, grenlanda), Germana DR (precipe luzica serba), Germana FR (dana, friza, k.a.), Finnlando (sveda, lapona, rusa, k.a.), Grekio (turka, albana, makedona, serba, hispana), Britio (kimra, skota-gaela, franca kaj aliaj, inkluzive tre multaj de la enmigrintoj en la lasta jardeko), Italio (germana, franca, slovena, kroata, greka, albana, kataluna), Nederlando (ĉefe friza), Norvegio (lapona), Pollando (ukrajna, rusa, belorusa, slovaka, ĉeĥa, k.a.), Svedio (finna, lapona), Hungario (slovaka, serba, kroata, rumana, germana).

En pluraj eŭropaj unuecaj ŝtatoj kun unu ĉefnacio kaj unu oficiala nacia lingvo la nombro de apartenantoj al naciaj aŭ etnaj minoritatoj superas 10 %-tojn de la tuta loĝantaro. Ekzemple, en Bulgario la ĉefaj minoritataj lingvoj estas la makedona (kiel dirite, rigardata de la bulgaraj aŭtoritatoj nur kiel dialekto de la bulgara), la turka, rumana, greka kaj tatarea; en Francio la okcitana, bretona, germana, itala, kataluna, vaska, nederlanda kaj flandra; en Hispanio la kataluna, galega-kelta kaj vaska; en Rumanio la hungara, germana, serba, rusa, ĉeĥa, slovaka, greka, turka kaj tatarea. Belgio nuntempe estas unika kazo de unueca monarkio dividita en tri lingvoteritorioj - la franca, flandra kaj germana - kaj la dulingva granda Bruselo kun egalrajteco de la franca kaj flandra.

La nacieca principo, kombinita kun la postulatoj de aŭtentikaj ekonomiaj bezonoj, historiaj aspiroj kaj sinceraj politikaj konsideroj, aŭ sole kiel necesa formala koncedo fare de la reganta nacio (la t.n. "pli aĝa frato"), esprimiĝis en la federacia strukturo de la plurnaciaj-plurlingvaj eŭropaj federitaj ŝtatoj. La Svisa Konfederacio kaj, nuntempe, la Jugoslavia Federacio estas la du landoj, en kiuj ne nur la ĉefaj naciaj lingvoj, sed ankaŭ la lingvoj de la naciaj kaj etnaj minoritatoj estas konstitucie garantiitaj kaj respektataj en la praktiko. En Svislando la oficialaj lingvoj estas la germana-svisa, la franca-svisa, la itala-svisa kaj la retoromanĉa. En Jugoslavio la

oficialaj lingvoj de la federacio kaj de la 6 konstituaj respublikoj estas la slovena, kroata, serba, makedona, kaj en la aŭtonomaj provincoj Vojvodino kaj Kosovo en la kadro de Serbio egalrajtecon ĝuas la hungara kaj albana. Ankaŭ la multnombraj lingvoj de la naciaj minoritatoj kaj etnaj grupoj - la itala, germana, slovaka, ĉeĥa, bulgara, rumana, turka, cigana, k.a. - ĝuas juran kaj faktan protekton. En Ĉeĥoslovakio, nun formale organizita kiel federacio, la du ĉefaj lingvoj estas la ĉeĥa kaj slovaka, dum la plej gravaj minoritataj lingvoj estas la hungara kaj la germana.

USSR estas tute aparta kazo de formala koncedado al la nacia-nacieca principo kun samtempa fakta superregado de la rusa nacio, kutime nomata "la pli aĝa frato", kaj de la rusa lingvo, ofte laŭdata kiel "la lingvo de la granda rusa popolo" kaj "la lingvo de socialismo", k.s. En 1917, antaŭ la Oktobra Revolucio, sur la teritorio de Imperia Ruslando troviĝis ĉ. 200 nacioj kaj etnoj kun siaj propraj lingvoj. Dank' al la procezo de kunfandiĝo, en kiu la pli fortaj nacioj kaj lingvoj englutis la malpli fortajn, kaj al la konscia politiko de rusigo, la nombro de nacioj, "naciecoj" (malpli grandaj nacioj) kaj etnaj grupoj malgrandiĝis al ĉ. 100 nuntempe. La federa organizo de Soveta Unio nur parte reflektas tiun laŭnaciecan strukturon, ĉar ne ĉiuj naciecoj kaj etnaj grupoj ricevis aŭtonomion.

USSR nun konsistas el 15 uniaj respublikoj, konstitucie rekonitaj kiel suverenaj ŝtatoj de la 15 ĉefaj nacioj, kiuj, krome, havas limojn kun aliaj ŝtatoj aŭ kun la maro pro la formale rekonita rajto ekŝiĝi el la Unio⁶. Siavice, RSFSR estas federacie organizita en la kadro de la Unio. Kvin el la uniaj respublikoj (Estonio, Litovio, Letonio, Moldavio kaj Armenio) estas rigardataj kiel ununaciaj, sen konsiderindaj naciaj minoritatoj. En la ceteraj dek, aldone al la ĉefnacioj, troviĝas "naciecoj", naciaj kaj etnaj grupoj, kiuj, depende de la grandeco, graveco kaj aliaj faktoroj, havas siajn aŭtonomajn respublikojn, aŭtonomajn regionojn aŭ aŭtonomajn distriktojn kun la rajto uzi siajn proprajn lingvojn kaj kun difinitaj aliaj kulturaj rajtoj. Nur en RSFSR troviĝas 16 aŭtonomaj respublikoj, 5 aŭtonomaj regionoj kaj 10 aŭtonomaj distriktoj.

Ĉiuj multnombraj naciaj lingvoj de la uniaj respublikoj kaj de la diversgradaj aŭtonomaj unuoj en la kadroj de la uniaj respublikoj estas oficiale rekonitaj. En la eŭropa parto de Soveta Unio la ĉefaj el ili estas la rusa, ukraina, belorusa, estona, litova, letona, moldavia. Necesas aldoni, ke en tiu eŭropa parto vivas ankaŭ apartenantoj de pluraj aliaj nacioj, ne troviĝantaj en la prezentita strukturo: poloj, bulgaroj, grekoj, hungaroj, rumanoj, finnoj, turkoj, ĉeĉenoj, slovakoj k.a., ĉiuj kun siaj propraj lingvoj.

Super la lingvoj de ĉiuj nacioj, "naciecoj", etnaj grupoj kaj naciaj minoritatoj troviĝas la rusa lingvo, devige instruata en ĉiuj lernejoj kaj vaste uzata kiel la sola lingvo de komunikado sur la tuta teritorio de Soveta Unio.

6) La suvereneco de la uniaj respublikoj kaj ilia rajto ekŝiĝi el la Unio estas pure formalaj, ĉar la tutunia kriminala leĝo kaj la kriminalaj kodoj de la uniaj respublikoj difinas ĉiun agadon direktitan al la realigo de tiuj konstitucie garantiitaj rajtoj kiel krimon de perfido, por kiu estas preskribitaj la plej severaj punoj, inkluzive la mortpunon. Similaj kontraŭdiroj inter la Konstitucio, la leĝo kaj la realaĵo estas troveblaj ĉie en la soveta jura sistemo.

Ĉio ĝis nun dirita rilatas nur al la naciaj kaj etnaj lingvoj kiel gepatraj aŭ familiaj en la diversaj eŭropaj ŝtatoj. Ne eblas prezenti detalojn, sed utilas almenaŭ menciigi, ke en multaj regionoj la loĝantaro estas denaske dulingva, nome akiras ekde la infanaĝo kaj la propran nacian aŭ etnan lingvon kaj la oficialan nacian lingvon de la ŝtato. Troveblas ankaŭ kazoj de trilingvismo (ekz. en AP Kosovo ofte la turka, albana kaj serba). Krome, en ĉiuj eŭropaj ŝtatoj nombro da personoj - relative ege malgranda kompare kun la tuta loĝantaro kaj kun la enormaj fortostreĉoj - pli aŭ malpli bone scias unu, du aŭ eĉ kelkajn fremdajn naciajn lingvojn.

La tuta komplikita kaj plu komplikiĝanta lingva situacio en Eŭropo, fidele reflektanta la dezirojn kaj rajtojn de ĉiu nacio aŭ etno konservi sian identecon, speguliĝas, interalie, en la eŭropaj interŝtataj organizaĵoj kaj instancoj. Ĉar tiu demando estas analizita en la pasintjara prelego, poste publikigita en *Internacia Jura Revuo*⁷, ĉi tie estu menciitaj nur laŭnome la vere plej gravaj el ili kaj iliaj respektivaj oficialaj lingvoj.

En Okcidenta Eŭropo funkcias granda nombro da interŝtataj organizaĵoj, inter kiuj elstaras la jenaj tri:

Eŭropa Konsilantaro (EK) kun sidejo en Strasburgo, fondita en 1949, nun konsistanta el 20 Ŝtatoj-Membroj. Ĝiaj oficialaj lingvoj estas la franca kaj angla, sed ĉiuj aliaj lingvoj de la membroj estas permesitaj sub la kondiĉo, ke la koncernaj delegacioj mem prizorgu la tradukon en unu el la oficialaj. Fakte, precipe la germana kaj itala estas multe uzataj.

Eŭropaj Ekonomiaj Komunizaĵoj (EEK) kun sidejoj en Bruselo kaj Luksemburgo, kunfandiĝintaj en 1965, nun konsistantaj el 9 Ŝtatoj-Membroj. La 6 lingvoj de la membroj, t.e. la angla, dana, franca, itala kaj nederlanda estas oficialaj kaj egalrajtaj; aldone la irlanda estas oficiala por la plej gravaj dokumentoj.

Organizaĵo de la Nordatlantika Traktato (ONAT) kun sidejo en Bruselo, fondita en 1949, konsistanta el 15 Ŝtatoj-Membroj, el kiuj 13 en Eŭropo plus Usono kaj Kanado. La oficialaj lingvoj estas la angla kaj franca.

En Orienta Eŭropo funkcias precize 30 interŝtataj organizaĵoj de la soveta bloko. La du plej gravaj estas:

Konsilantaro por Ekonomia Reciproka Asisto (KERA) kun sidejo en Moskvo, fondita en 1949, konsistanta el 10 Ŝtatoj-Membroj kun Albanio, Kubo, Mongolio kaj Vjetnamo (ekde junio 1978), sed Albanio ne partoprenas ekde 1961. Malgraŭ la membreco de Kubo, Mongolio kaj nun ankaŭ Vjetnamo, ĝi estas esence eŭropa organizaĵo. Formale, ĉiuj lingvoj de la membroj, t.e. 7 eŭropaj, estas oficialaj, sed fakte la rusa estas la sola kaj oficiala kaj labora lingvo.

Organizaĵo de la Varsovia Traktato (OVT-o) kun sidejo en Moskvo, fondita en 1955, konsistanta el 8 Ŝtatoj-Membroj de la soveta bloko en Eŭropo, sed en 1968 Albanio formale ekŝiĝis. Ankaŭ en tiu organizaĵo la rusa estas fakte la sola oficiala kaj labora lingvo.

7) I. Lapenna, "Kelkaj Juraj Aspektoj de la Multlingveco en EEK", *Internacia Jura Revuo*, n-ro 2/77, p-oj 11-17.

Laste estu menciita la Fina Akto de la Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaborado en Eŭropo de la 1-a de aŭgusto 1975, pli konata kiel la Fina Akto de Helsinki. Kvankam ĝi ne estas jure deviga traktato, tamen ĝi estas unuaranga politika dokumento, kiun subskribis ĉiuj supre menciitaj eŭropaj ŝtatoj kun la escepto de Albanio (rifuzinta la inviton) kaj Andoro (ne invitita) plus Usono kaj Kanado, do entute 35 ŝtatoj⁸. La Fina Akto estas verkita en la angla, franca, germana, hispana, itala kaj rusa, ĉiuj tekstoj egale aŭtentikaj.

Tiel prezentiĝas la politika kaj lingva mapo de Eŭropo. La lingvodiverseco estas unu el la plej gravaj obstakloj al efika funkciado de ĉiuj eŭropaj organizaĵoj kaj institucioj, al kunlaborado sur ĉiuj niveloj, al simpla interkompreniĝo en la kadro de la daŭre kreskantaj amasaj kontaktoj de la ordinaraĵoj eŭropanoj.

4. Esperanto kaj ĝia Ebla Rolo

La lingva problemo en Eŭropo estas parto de la ĝenerala problemo de lingva komunikado en la mondo, sed ĝi sentiĝas aparte akute ĝuste sur nia kontinento. En Eŭropo - kaj aliloke - ĝia kvintesenco konsistas en la konflikto inter du kontraŭaj tendencoj: tiu direktita al konservo de la propra nacia etna identeco kaj tial celanta aŭtonomion aŭ eĉ sendependiĝon, unuflanke, kaj tiu puŝanta al integriĝo de diversaj fortogradaj pro la spektakla teknologia progreso, kaŭzanta amasan produktadon, plian ekonomian interdependecon kaj dividon de la laboro, aliflanke. La problemo estas kompleksa kaj manifestiĝas en diversaj sociologiaj, politikaj, juraj, psikologiaj, teknike lingvaj kaj aliaj aspektoj, ne laste la ekonomia⁹. Ĉio ĉi estas abunde pritraktita en la dokumentoj de CED antaŭ 1974 kaj resumita en la enkonduke menciita Memorando kaj Agadprogramo. Ankaŭ la pledo por la solvo de la lingva problemo per la neŭtrale homa Internacia Lingvo kiel sintezo inter la du ĵus menciitaj kontraŭaj tendencoj, estas same abunde dokumentita kaj argumentita.

Restas ekzameni mallonge la ŝancojn de Esperanto en la nuna eŭropa realaĵo. La elirpunkton formas du fundamentaj tezoj. La unua baziĝas sur la fakto, jam pritraktita, ke la tuta problemaro kaŭzita de la lingvodiverseco en Eŭropo urĝe postulas radikalan solvon por kontentigi la kreskantajn bezonojn de internacia komunikado sur ĉiuj niveloj. La dua baziĝas sur la fakto, nekontestebla por ĉiuj sciintoj de Esperanto, ke la Internacia Lingvo estas tiel evoluinta, ke ĝi jam nun kontentigas la bezonojn de la parolantoj kaj ke, pro sia interna strukturo, ĝi posedas senlimajn potencialojn por plua leksika riĉiĝo kun samtempa strikta observado de la Fundamento por konstante adaptiĝadi al la daŭre aperantaj novaj bezonoj, precipe

8) V. pri tio en I. Lapenna, "Jura Valoro de la Fina Akto de Helsinki", *Internacia Jura Revuo*, n-ro 1/77, p-oj 19-30.

9) En 1975 nur en EEK laboris 1450 interpretistoj kaj tradukistoj. Laŭ la londona *The Times* de 07.12.76, la tradukaj servoj okupis 38 % de la tuta oficistaro kaj en 1976 la kostoj estis 12.500.000 anglaj pundoj. Laŭ Roy Jenkins, la nuna prezidanto de la Komisiono de EEK, la nombro de geoficistoj nur en la Komisiono superis 10.500 en 1977, el kio 30 % estis tradukistoj kaj interpretistoj (European Community, Marto 1978, p. 5). Similajn elspezojn pro multlingveco havas la aliaj organizaĵoj. Se oni aldonas la kostojn de multlingveco en komerco, turismo, por lernado de fremdaj lingvoj ktp., la financa ŝarĝo de multlingveco atingas miliardajn ciferojn en pundoj. Kaj tion devas finfine pagi ni mem, la eŭropaj civitanoj.

en la sfero de ĉiuj sciencaj branĉoj. El la diversaj teoriaj eblecoj, ofte pure abstraktaj kaj neglektantaj ĉiujn aŭ kelkajn el la decide gravaj aspektoj de la problemaro, kiel ankaŭ la postulojn por efika kaj ĉiuflanka lingva komunikilo, la ĝenerala adopto de Esperanto tial prezentiĝas kiel la sola racia kaj praktika solvo.

Necesas, do, kunligi la bezonojn kun la rimedo kontentiganta ilin. Tio signifas, ke nepras intensigi la laboron por disponigi Esperanton kiel socie enradikiĝintan kaj plene funkciantan lingvon kun ĉiuj kulturaj valoroj kreitaj en ĝi aŭ pere de ĝi, kaj ne perdadi la tempon kaj fortojn por sterilaj diskutoj kun mortnaskitaj lingvoprojektoj, kio, krome, nur kreas konfuzon, bremsas la progreson kaj eĉ povas por ĉiam haltigi la solvon. Tia pozitiva agado, firme kaj konscie praktikata en UEA, dum pli ol kvaronjarcento senpere antaŭ la eventoj de Hamburgo en 1974, implicas paralelan forigon de ĉio sekteca kaj sufokon de primitivaĵoj, kiuj en diversaj periodoj en la historio de la Esperanto-Movado, inkluzive la posthamburgan periodon en UEA, kaŭzis kulturen kompromitiĝon de la esperantismo kaj tial obstaklis kaj plu obstaklas la progreson en la direkto al la solvo. Oni devas fine kompreni, ke nur kulture prestiĝa kaj respektata Esperanto-Movado povas sukcese progresigadi la Internacian Lingvon kiel elementon de la nuntempa kulturo kaj konsistan parton de la estonta. Male, primitivaĵoj kaj sektaĵoj retrofalas ne nur sur la kapojn de la fuŝuloj kaj sur la organizaĵojn, en kies nomoj ili parolas, sed bedaŭrinde makulas la tutan Esperanto-Movadon kaj eĉ la lingvon mem. Oni memoru unufoje por ĉiam, ke ne eblas agadi por kultura afero per nekulturaj metodoj.

La konkretaj taskoj, konformaj al tiuj pensoj en la kadro de la du fundamentaj tezoj, estas formulitaj en kvin kunligitaj punktoj, ĉiu kun pluraj eroj, de la Memorando kaj Agadprogramo: sciencaj esploroj kaj informado, praktikaj servoj kaj simpativarbado, faka interkompreniĝo trans la lingvaj limoj, klerigo kaj edukado, eŭropa kulturpolitiko. Pro siaj strukturo kaj konsisto, Eŭropa Klubo, eventuale kun la aktiva helpo aŭ almenaŭ apogo de kompetentaj Esperantaj kaj aliaj instancoj en la eŭropaj landoj, estas nuntempe la plej taŭga organizaĵo por realigi la programon. Se ĝi paralele aktivos en la kvin direktoj kaj se, aldone, ĝi studos la historion de Esperantogadoj en Eŭropo ekde la fruaj kvindekaj jaroj ĝis 1974 kaj konsideros la nunan staton¹⁰ por adekvate utiligi la pozitivajn spertojn kaj eviti la negativajn, oni povas atendi kun granda verŝajno, ke ĝi sukcesos iom post iom enkonduki en Eŭropo realecan dulingvismon: nacia lingvo por komunikado interne de la nacio, Esperanto kiel la lingvo de internacia komunikado.

Kompreneble, en la nuntempa Eŭropo, politike dividita, la agado de la Klubo provizore devos esti limigita al Okcidenta Eŭropo, unuavice al EEK, sed nenio malhelpas formi similan organizaĵon kun similaj celoj en Orienta Eŭropo.

10) Pri la multnombraj agadoj en Eŭropo ekde 1954 ĝis 1974 v. la koncernajn partojn en la Estraraj Raportoj, publikigitaj ĉiujare en la *Jarlibro, Dua Parto*, 1954–1974. Pri la nuna stato, laŭ informoj de UEA, v. la Raporton de la Estraro en *Esperanto*, n-ro 6/78, p. 115, el kiu tamen ne vidiĝas kio fakte estas farita kaj kun kiaj rezultoj.

5. Konkludo

Estas absolute malĝusta la opinio, enradikiĝinta en difinitaj Esperanto-medioj, ke la t.n. "eksteraj cirkonstancoj malfavoras pli grandskalan disvastigadon de Esperanto, aŭ kaŭzas stagnon, aŭ eĉ regreson. Tion kutime asertas pasivuloj aŭ personoj, kiuj al aliaj kaj al si mem tiamaniere pravigas siajn proprajn malsukcesojn, fakte kaŭzitajn de la propraj eraroj kaj misagoj. Same malĝusta estas la negativa opinio ekster la Esperanto-Movado, ŝuldata almenaŭ parte al la samaj eraroj kaj misagoj, ke "Esperanto ne taŭgas". La vero estas, ke neniam antaŭe la objektivaj kondiĉoj estis pli maturaj, ol ili estas ĝuste nun, precipe sur nia dense loĝata kontinento kun sepdeko da kulturaj lingvoj, sennombraj dialektoj kaj 35 ŝtatoj. Tio precipe validas por Okcidenta Eŭropo pro la aktuala procezo de integriĝado en egalrajteco kaj pro la perspektivoj de eĉ pli amasaj liberaj fluoj de ideoj kaj personoj, inkluzive migradojn, en la proksima estonteco. Fine, neniam forgesante, ke Esperanto ne estas nur eŭropa, sed monde internacia kaj neŭtrale homa lingvo, la vero tamen estas, ke en neniu mondoparto la Internacia Lingvo estas tiel disvastiĝinta kaj tiel forte socie enradikiĝinta, kiel en Eŭropo. Tio siavice konsiderinde faciligas la agadon kaj la plenumon de la tasko ĝuste en Eŭropo. Sukcesa etapa solvado de la lingva problemo laŭ la baza principo de dulingvismo eĉ nur en unu parto de la tradicia Eŭropo, ekzemple kaj unuavice en EEK, sendube servus kiel imitinda modelo en la aliaj partoj kaj povus baldaŭ etendiĝi al la tuta mondo. Sed ni bone konsciu, ke la eŭropa socio rapidege evoluas. La tempo flugas. Necesas agi tuj, laŭplane kaj celtrafe. Alie tiuj ĉi unike favoraj kondiĉoj ne estos ekspluatitaj kaj la bonega ŝanco kaj por Eŭropo kaj por Esperanto kaj por la mondo estos perdita. Eble por ĉiam, ĉar la historio ne kutimas ripetiĝi.

En: *Internacia Jura Revuo* 8. 1978: 1 (17), p. 18–28.

J. S. BELOV. PLIA KAZO DE KONTRAŬLEĜECO KAJ PSIKIATRIA MISUZO

I. Enkonduka Rimarko

Multaj nacilingvaj gazetoj informis pri la kazo de Jurij Sergejeviĉ Belov, unu el la viktimoj de kontraŭleĝeco kaj de psikiatra misuzo en Soveta Unio. La Tria Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado, okazinta en julio pasintjare, pritraktis la kazon kaj sendis protestan telegramon al s-ro L. Breĵnjev, ĝenerala sekretario de la KP de USSR kaj nun ankaŭ Prezidanto de la Prezidio de la Supera Soveto de USSR. En ĝi la Konferenco donis sian plenan apogon al la klopodoj de Amnestio Internacia (*Amnesty International*) liberigi Belov el mensa hospitalo, kie li estis kontraŭleĝe tenata. La Konferenco sendis longajn telegramojn ankaŭ al la UK de Esperanto en Reykjavik kaj al la SAT-Kongreso en Augsburg kun propono pri simila apogo. SAT ekagis konforme kaj pri tio aperis informoj en ĝia organo *Sennaciulo*, sed ne estas konate, ĉu UEA entreprenis kion ajn en tiu ĉi afero.

Siatempe la Konferenco esprimis perletere sian dankon al la Internacia Sekretariato de AI pro ĝia agado cele al liberigo de J. S. Belov. Poste, la subskribinto persone kontaktis la Internacian Sekretariaton de AI en Londono kaj ricevis ampleksajn detalojn pri la kazo. Amnestio Internacia alte aprezas la subtenon donitan de la Neŭtrala Esperanto-Movado kaj de SAT en tiu ĉi afero. Per sia letero de 07.02.1978 la Sekretariato de AI aparte dankis ankaŭ „pro la tre instiga Manifesto 77 de la Neŭtrala Esperanto-Movado” kaj „speciale aprezis la kuraĝigajn vortojn apoge al la laboro de Amnestio Internacia”.

Pri ĉio ĉi aperis pluraj informoj en la Revuo *Horizonto* n-roj 5/77 kaj 2/78. Do, en tiu ĉi artikolo estos pritraktitaj la juraj aspektoj surbaze de la faktoj entenataj en la letero de la Sekretariato de AI de la 30.09.77 al la subskribinto kaj en la dokumentaro EUR 46/17/77, Distr. CO/AD de la Internacia Sekretariato.

2. La Faktoj

Plej koncize, la esencaj faktoj prezentiĝas jene:

J. S. Belov naskiĝis en 1942. Li studis filologion en la Leningrada Universitato, el kiu li estis eksigita en 1960 pro aparteno al „kontraŭsoveta grupo”. Laŭ atesto de unu el liaj estintaj prizonkunuloj, Belov estis unue arestita kaj kondamnita al

malliberejo en 1961, kiam lia „disvastigado de Esperanto kaj korespondado kun eksterlandaj esperantistoj estis kvalifikita kiel kontraŭsoveta propagando”. En 1962, post kiam li estis forpelita el Leningrad kiel „kontraŭsoveta elemento”, li daŭrigis siajn filologiajn studojn, inkluzive lernadon de Esperanto, en Kaliningrad. Laŭ alia raporto – kiu, tamen, laŭ AI ne estas plene fidinda – li estis denove kondamnita en 1964 pro partopreno en 1963 en iu Esperanto-Konferenco en Pollando kaj poste en Munkeno, kie li kritike parolis pri la soveta politika gvidantaro. AI komentas, ke tio ne estas tre kredebla, ĉar la sovetaj aŭtoritatoj verŝajne ne donus al li elirpermeson en 1963, se li fakte havis malfacilaĵojn jam en 1961. Tamen, tio ne estas tute malebla. Ekzemple, la neforgesebla esperantisto Nikolaj Rytjkov, bedaŭrinde forpasinta tro frue, ne nur ne ricevis pasporton por veturi al la UK de Esperanto en Hago en 1964, sed eĉ estis perforte metita en mensan hospitalon, ĉar li rifuzis la kondiĉon de KGB (sekreta polico) „amikiĝi” kun iu en la tiama Estraro de UEA kaj iuj ekster ĝi, kaj spioni pri ili. Nur en 1965, kiam Rytjkov formale konsentis je la kondiĉo, li ricevis pasporton por partopreni en la Eŭropa Esperanto-Kongreso en Vieno, ja amikiĝis kun la ĉefkoncernato, sed nek spionis (pri kio, cetere?), nek – revenis en Sovetan Union.

Sed ni lasu tion. En 1964, post sia reveno el eksterlando, Belov estis arestita kaj kondamnita je tri-jara senigo de libereco pro „kontraŭsoveta propagando kaj agitado” laŭ art. 70 de la Kriminala Kodo de RSFSR. En 1967, post kiam li estis plenuminta tiun punon kaj troviĝis en interna ekzilo, li estis denove arestita kaj ŝarĝita laŭ art. 70/II de la Kriminala Kodo, kiu rilatas al recidivuloj, t.e. personoj denove farintaj samspecan krimon. La „krimo” (plej verŝajne) estis la publikigo *samizdat* (subteraj publikaĵoj sekrete cirkulantaj de mano al mano) de lia „Raporto el Mallumo” (*Raportaj iz Mraka*), en kiu li prezentis siajn spertojn dum la plenumado de la antaŭa trijara puno, kaj kiun li klopodis sendi eksterlanden. Ĉi-foje li estis kondamnita al 10-jara malliberigo en punkampo de strikta laborreĝimo (1967), sed la apelacia kortumo malaltigis la punon al 5 jaroj (1968). Li estis deportita en la punkampon n-ro 10 en Moldavia SSR, konata pro la multnombraj punkampoj kun alta procento de politikaj malliberuloj. En 1970 li estis transportita en la misfaman Vladimir-prizonon proksime de Moskvo, same konata pro sia ekstreme severa reĝimo, en kiun oni sendas precipe politikajn kondamnitojn, se ili kaŭzas „ĝenojn” en la punkampoj. Lige kun la Tago de Soveta Konstitucio kaj la Tago de Homaj Rajtoj, li protestis kaj estis unu el la 27 malliberuloj kiuj malsatstrikis de la 5-a ĝis la 10-a de decembro postulante plibonigon de la kondiĉoj en la prizono, inkluzive la parton, en kiu estas tenataj la virinoj. En aŭtuno de 1971, dum Belov plu estis en Vladimir, oni denove ekproceduris kontraŭ lin, plian fojon laŭ art. 70/II, pro „agitado interne de la prizono”. Evidente, la proceso ne okazis, ĉar en decembro 1971 li estis transportita en la Serbskij Instituto pri Jurmedicina Psikiatrio en Moskvo, unu al la monde plej hontindaj institucioj de jura psikiatrio, vaste misuzata por partipolitikaj celoj. Tie oni ekzamenis lin ĝis februaro 1972 kaj fine deklaris lin „mense malsana”. Rezulte, en majo 1972 li estis transportita el la Vladimir-prizono en specialan psikiatrian hospitalon en Siĉjovka en la regiono de Smolensk. Komence de 1976 li estis transigita de tie en malpli severan hospitalon en Smolensk, poste en Krasnojarsk en Siberio.

Necesas atentigi, ke tiuj „specialaj (prizonaj) psikiatria hospitaloj” estas ofte misuzataj por lokigi politikajn disidentojn, precipe se la publikeco de proceso kaj kondamno povus embarasi la sovetajn aŭtoritatojn, kiel ankaŭ por izoligi la „ĝenulojn”, disde iliaj prizonkunuloj. La „enhospitaligitoj” estas traktataj krude, ofte kruele. Ili estas tenataj en izoliteco kaj „kuracataj” per fortegaj deprimaj drogoj cele al detruo de ilia rezistopovo. Belov estis perforte kuracata per haloperidolo kaj triftanino, kvankam plej fidinda atestanto, Aleksander Podrabinek, kiu vizitis lin en Krasnojarsk komence de 1977, kaj tuta aro da iamaj prizonkunuloj de Belov, firme deklaris, ke Belov estas mense perfekte sana kaj tute ne bezonis kian ajn psikiatrian kuracadon. Laŭ tiuj atestoj, la ĉefkuracisto de la hospitalo en Siĉjovka, d-ro Ljamkin, diris al Belov, ke li estos „kuracata” ĝis li ŝanĝos siajn opiniojn. En la hospitalo de Krasnojarsk la kuracisto traktanta Belov, d-ro V. V. Mjasnikov, diris al A. Podrabinek, ke Belov ne estas „socie danĝera”, ke li tute ne bezonis „devigan internigon” kaj estos baldaŭ liberigita. Anstataŭe, nur kelkajn tagojn post la vizito de Podrabinek, Belov estis denove izolita kaj punsubmetita al perforta kuracado per haloperidolo kaj triftanino. A. Podrabinek mem, kiel oni povas legi ankaŭ en la taggazetaro (ekzemple en la londona *The Observer* de 21.05.78) estas nun en esplorarestejo kaj atendas proceson.

En 1973 AI, atente ekzameninte la kazon de J. S. Belov kaj trovinte ĝin fideinde dokumentita, adoptis lin kiel plian „malliberulon de konscienco” kaj komencis sian agadon por liberigi lin. Laŭ informo el la pariza *Le Monde* de 22. 12. 1977, J. S. Belov fine estis liberigita, sed la Sekretariato de AI en Londono ankoraŭ ne povas kun certeco konfirmi la novaĵon.

3. La Juro kaj ĝia Misuzo

Art. 70 de la Kriminala Kodo de RSFSR (kaj artikoloj kun identa enhavo en la kriminalaj kodoj de la aliaj uniaj respublikoj), laŭ kiu J. S. Belov kaj centoj da aliaj civitanoj estis kondamnitaj, troviĝas en la Unua Ĉapitro de la Speciala Parto de la Kriminala Kodo (en la plua teksto KK). Tiu ĉapitro havas la titolon „Speciale Danĝeraj Krimoj Kontraŭ la Ŝtato”. En ĝi estas listigitaj tiaj krimoj, kiel perfido, spionado, sabotado k.a. inkluzive kontraŭsovetan agitado kaj propagandon. Art. 70 tekstas:

„*Kontraŭsoveta Agitado kaj Propagando.* – Agitado aŭ propagando efektivigata kun la celo subversi (subfosi) aŭ malfortigi la sovetan reĝimon (ruse *vlast'*) aŭ kun la celo fari apartajn, speciale danĝerajn krimojn kontraŭ la ŝtato; aŭ cirkuligo, kun la sama celo, de falsajoj kalumniantaj la sovetan ŝtaton kaj socian sistemon; aŭ cirkuligo aŭ preparado aŭ tenado, kun la sama celo, de literaturo kun tia enhavo, estos punita per senigo de libereco por la daŭro de 6 monatoj ĝis 7 jaroj, kun aŭ sen aldona ekzilo en la daŭro de 2 ĝis 5 jaroj, aŭ per ekzilo en la daŭro de 2 ĝis 5 jaroj”.

La dua paragrafo de la sama art. 70 preskribas, ke recidivulo, t.e. persono kiu estis antaŭe kondamnita pro kiu ajn el la „speciale danĝeraj krimoj kontraŭ la ŝtato”, aŭ faris kiun ajn el la agoj de agitado aŭ propagando en milittempo, estos

punita per senigo de libereco en la daŭro de 3 ĝis 10 jaroj, kun aŭ sen aldona puno de ekzilo en la daŭro de 2 ĝis 5 jaroj.

Laŭ la oficialaj sovetaj komentarioj, „agitado” konsistas el diskonigo de kontraŭsovetaj materialoj al „malgranda grupo” da personoj (en la abunda sovetaj praktiko eĉ nur 1–2), dum „propagando” konsistas el diskonigo de tiaj materialoj al „pli granda grupo” da personoj. Tiu distingo ne tre gravas el kriminaljura vidpunkto, ĉar ambaŭ formoj, kiel indikas la „aŭ”, estas egale puneblaj. Multe pli gravas la fakto, ke, laŭ la difino de art. 70, tiu ĉi krimo povas esti farita nur per rekta dolo rilatanta al ĉiuj konsistaj elementoj (ruse *sostav*), inkluzive la plej esencan, nome ke kiu ajn el la menciitaj agoj devas esti farita kun la speciala celo subversi aŭ malfortigi la sovetan reĝimon, aŭ cele al farado de apartaj, speciale gravaj krimoj kontraŭ la ŝtato. Alivorte, en kazo de cirkuligo de io ĉu parole, ĉu bilde aŭ desegne, ĉu en alia komunikformo, la akuzo devus pruvi, ke tiu io (1) estis malvera (falsaĵo), (2) kalumnia (ne ĉiu malvero estas kalumnio), (3) la farinto sciis, ke ĝi estas malvera kaj kalumnia, (4) fakte cirkuligita, (5) kun la celo de la farinto aŭ subversi aŭ malfortigila sovetan reĝimon, aŭ cele al farado de speciale gravaj krimoj kontraŭ la ŝtato. Adekvate, en la kazoj de cirkuligo aŭ preparado aŭ tenado de literaturo kun sama enhavo. Foresto de unusola el tiuj konsistaj elementoj en la ago de la farinto signifas, ke tiu ago ne estas krima laŭ art. 70. Depende de la konkretaj cirkonstancoj de iu kazo, la akuzito povus sin defendi kontraŭpruvante, ke la cirkuligita aserto estis vera, aŭ ke li pravigeble kredis ĝin vera, aŭ ke ĝi ne estas kalumnia, aŭ ke ĝi celis fortigi la sovetan reĝimon konforme al la sovetaj Konstitucio, aŭ ke, eĉ se ĝi estis malvera kaj kalumnia, la celo ne estis „subversi aŭ malfortigi la sovetan reĝimon...”, sed, ekzemple, amuzi fermitan rondon de geamikoj per bona politika ŝerco aŭ anekdoto. Se la akuzito sukcesus pruvi kiun ajn el la menciitaj aŭ aliaj pravigaj faktoj depende de la konkretaj cirkonstancoj, li devus esti liberigita de la akuzo. Almenaŭ tiel devus esti en ĉiuj ŝtatoj kun sendependaj kortumoj, en kiuj leĝeco estas observata.

Kun la escepto de la plej ĝeneralaj atakoj kontraŭ Belov, formulitaj tute abstrakte kiel „kontraŭsovetaj agitado kaj propagando”, aŭ la publikigo en *samizdat* de lia „Raporto el Mallumo” kaj lia provo „kontraŭbandi” ĝin en eksterlandon, ne estas konate kion precize la akuzo imputis al li. Tio ne estas io eksterordinara, ĉar en la tre multnombraj kazoj de politikaj kondamnitaj sole laŭ art. 70 de la KK – en tiu ĉi kunteksto estu tute flankenlasitaj la politikaj kondamnitaj laŭ art. 190-1 kaj aliaj de la sovetaj kriminalaj kodoj – la akuzo, same tiel, limigis sin al tiaj kaj similaj pure abstraktaj imputoj.

Nur por doni ideon pri la karaktero de la imputoj, jen kelkaj ekzemploj prenitaj el parteto de pli konataj kazoj (V. Bukovskij, V. Ĉornovil, G. Davydov, M. Hejfec, D-ro S. Kovaljov kaj, la tute lasta, D-ro J. Orlov): aserto komunikita al eksterlandaj ĵurnalistoj, ke „en Soveta Unio sanaj personoj estas tenataj en mensaj hospitaloj”: „intenco organizi subteran presejon kun la celo cirkuligi *samizdat* materialojn; publikigo kaj cirkuligo de *samizdat* ĵurnalo *Ukrajna Heroldo*, kiu „enhavis materialojn kalumniantajn la sovetan naciecpolitikon”, „letero al la Komisiono de UN pri Homaj Rajtoj kun kalumniaj asertoj pri Soveta Unio”; surbendigo de poemo „Pri Sendependa Ukraino”; „preparado, distribuado kaj tenado hejme de

samizat literaturo, inkluzive la periodaĵojn *Kroniko de Aktualaj Eventoj*, *La Lumo de Libereco*, *La Demokrato*, *La Libera Penso*, kiu presigis du ĉapitrojn de la libro de R. Conquest *La Granda Teroro*, fotokopiado de partoj de la verko de A. Solĵenicin *Gulag Arkipelago* kun la celo distribui ilin”; organizo de grupoj kun la celo monitori (observi kaj kontroli) la plenumadon aŭ neplenumadon de la Fina Akto de Helsinki rilate la homajn rajtojn fare de USSR kiel unu el la subskribintoj de la Akto, k.s. En la kazo de Belov eĉ lia sendependa disvastigado de Esperanto, t.e. disvastigado ekster la permesita kadreto de la ekskluziva partia monopolo, kaj lia persona korespondado kun eksterlandaj esperantistoj ekster la strikte polica cenzuro, estis kvalifikitaj kiel „kontraŭsoveta propagando” kaj markas la komenciĝon de liaj suferoj. Tio estas nenio alia ol daŭrigo de la politiko de persekutoj laŭ la sekretaj ordonoj kaj instrukcioj el la stalinisma epoko de la „grandaj purigoj”, kies viktimoj estis ankaŭ la esperantistoj, kiel dokumentite en ĉap. 21.4 de *Esperanto en Perspektivo* (precipe p-oj 730–732) kaj en *Hamburgo en Retrospektivo*, precipe en ĉap. 2.

El tiuj kelkaj tipaj ekzemploj sekvas, ke kia ajn objektiva prezento de iu negativa, obskura aŭ malagrabla aspekto de la soveta realaĵo, aŭ kia ajn kritiko de misagoj de la aŭtoritatoj, povas esti kvalifikita kiel „kontraŭsoveta agitado kaj propagando”. Tio, kio en ŝtatoj respektantaj la rajton de la civitanoj libere esprimi opiniojn kaj kritike rilati al misagoj de la aŭtoritatoj estas normala, ĉiutaga kaj prave rigardata kiel utila elemento por fortigo de la socio kaj ŝtato, tio sama en Soveta Unio estas kvalifikita kiel granda krimo, punebla per malliberigo ĝis 7 jaroj kaj per aldona puno de ekzilo ĝis pliaj 5 jaroj, entute ĝis 12 jaroj.

Tia „krimo” ne troveblas en kiu ajn kriminaljura sistemo de kiu ajn demokrata ŝtato. La krimo de „kontraŭsoveta agitado kaj propagando”, kiel difinita en art. 70 de la KK de RSFSR kaj en identaj artikoloj de la kodoj de la aliaj uniaj respublikoj, estas kontraŭa eĉ al la Soveta Konstitucio de 1936 (kaj ankaŭ al tiu de 1974), ĉar la Konstitucio formale garantias al la civitanoj la klasikajn politikajn liberecojn de parolo, opinio kaj opiniesprimado, konscienco, preso, kunvenado, stratprocesioj kaj demonstracioj (art. 125 de la Konstitucio de 1936 kaj art. 50 de la Konstitucio de 1974). Estas vero, ke tiuj rajtoj povas esti efektivigataj nur „konforme al la interesoj de la laboranta popolo kaj cele al fortigo de la socialisma sistemo” (Konst. de 1936) aŭ „konforme al la interesoj de la popolo kaj fortigo kaj evoluigo de la socialisma sistemo” (Konst. de 1974), kio spegulas la ŝanĝojn de la doktrino pri ŝtato kaj juro. Sed ĉu, do, ne devus esti la „laboranta popolo” aŭ „la popolo” mem, kiu devus decidi tra libera publika diskutado kio estas en ĝia intereso, kio „fortigas kaj evoluigas” la socialisman sistemon? Kaj ĉu tia libera diskutado ne signifus per si mem fortigon de socialismo, se tiu vorto ankoraŭ konservas eĉ nur ereton de sia origina demokrata karaktero? Fine, en kazo de akuzo, ĉu sendependaj kortumoj ne devus decidadi pri la kulpo aŭ senkulpeco de la akuzito post detala ekzameno de la kazo en publika proceso laŭ la preskriboj de la respektiva kriminala procedura kodo?

Ĉio ĉi okazas en Soveta Unio. Ne la popolo, sed la partia supro decidas kio estas en la intereso de la (laboranta) popolo, kaj kio estas krima laŭ art. 70. Ne estas konata unusola kazo de proceso laŭ art. 70, en kiu la persekuto estus pruvinta la konsistajn elementojn, precipe la celon „subversi aŭ malfortigi la sovetan reĝimon...”

kiel eksplikite supre, nek kazo, en kiu la kortumo estus permesinta al la akuzito pruvi la veron de siaj asertoj kaj entute pruvi sian defendon, nek kazo de liberiga juĝo. Senescepte la akuzitoj estis kondamnitaj, kio klare indikas, ke, jam antaŭ la komenciĝo de la proceso, ilia sorto estis decidita ne de sendependa kortumo, sed de eksteraj politikaj faktoroj.

Aldoniĝas kruda malobservado ankaŭ de aliaj reguloj entenataj en la sovetaj kriminalaj proceduraj kodoj, ekzemple la regulo pri la publikeco de la procesoj. En politikaj kazoj oni ĉiam pakas la juĝejon per policaĵ agentoj, membroj de la t.n. „junularaj brigadoj” kaj similaj elementoj, kiuj kontraŭleĝe aplaŭdas la akuzon, primokas per ridoj kaj krioj la defendon de la akuzitoj, kaj laŭte aprobas la kondamnajn juĝojn. Tiele la principo de „publikeco” estas kvazaŭ observata, sed fakte nek la parencoj (kun la escepto, kelkfoje, de la plej intimaj), nek la geamikoj de la akuzitoj, nek la eksterlandaj raportistoj rajtas eniri, ĉar „ne plu estas loko”. Do, plia kontraŭleĝeco, vera mokaĵo de justico, kiu, se cirkuligita de soveta civitano, povas esti kvalifikita kiel „kontraŭsoveta agitado kaj propagando” laŭ art. 70.

Fine, la kontraŭkonstitucia art. 70 kaj ĝia kontraŭleĝa aplikado, nete malobservas artikolon 19 de la Internacia Pakto pri Civitanaj kaj Politikaj Rajtoj, ratifikita de USSR en 1973 kaj, sekve, deviga por ĝi kaj internacie kaj interne. Laŭ tiu artikolo, ĉiu havas la rajton havi opiniojn kaj la „liberecon de esprimado, kiu inkluzivas la rajton peti, ricevi kaj doni informojn kaj ideojn de ĉiuj specoj, senkonsidere al la landlimoj, ĉu parole, skribe aŭ prese, ĉu en formo de arto, aŭ per kiu ajn rimedo laŭ sia elekto”. Tiuj rajtoj povas esti leĝe iom limigitaj „nur se tio estas necesa por la respektigo de la rajtoj kaj reputacio de aliuloj, aŭ por protekto de la ŝtata sekureco aŭ publika ordo (*ordre public*) aŭ de publikaj sano kaj moralo” (art. 19/3 de la Pakto). Tia necesa-minimuma restriktio de la rekonitaj rajtoj neniel povus pravigi la kompletan neniigon de tiuj rajtoj per art. 70 de la KK, eĉ se tiu artikolo estus aplikata de sendependaj kortumoj strikte laŭ sia enhavo kaj konforme al la eksplicitaj preskriboj de la kriminala procedura kodo, kio tute ne okazas. Cetere, se tio iam okazos, ĝi povas okazi nur en la kadro de la ĝenerala demokratiĝo de la sistemo, do de la ĝenerala respekto de la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj, kaj tio signifus, ke art. 70, art. 190-1 kaj kelkaj aliaj tute ne troviĝus en la sovetaj kriminalaj kodoj.

4. Misuzo de Psikiatrio

Laŭ la soveta kriminala juro, same kiel laŭ aliaj kriminalajuraj sistemoj, nur mense sanaj personoj de difinita aĝo povas esti kriminale respondecaj. Persono, kiu pro kia ajn mensa malsano ne kapablas kompreni la signifon de siaj agoj aŭ regi ilin, ne povas esti kriminale respondeca. Se tia persono faras agon, kiu estas difinita en la kriminala leĝo kiel krimo, li/ŝi povas esti nur devige kuracata en adekvata mensa hospitalo depende de la karaktero de la malsano kaj de la grado de socia danĝero de la farinto, sed ne juĝata. Tio estas laŭleĝa kaj humana.

Tute alia afero estas deklari sanan personon mense malsana, malliberigi lin aŭ ŝin en psikiatria hospitalo kaj perforte kuraci la koncernan personon per diversaj

fortaj drogoj. Tian malfeliĉan sorton travivis ne nur J. S. Belov, sed ankaŭ multaj aliaj disidentoj. Kelkaj el ili kapitulacis post kelka tempo, „ŝanĝis sian opinion” kaj estis ellasitaj kiel „kuracitaj”. Aliaj kuraĝe eltenis la torturojn kaj, fine, la aŭtoritatoj devis ilin liberigi, ĉefe sub la premo de la monda publika opinio kaj amasaj protestoj de psikiatroj, juristoj, sciencistoj kaj aliaj profesiuloj. Iuj el la psikiatrie torturitaj personoj estis elpelitaj el Soveta Unio, aŭ ricevis pasporton por eliri, sed estis senigitaj de soveta ŝtataneco dum sia restado en eksterlando. Unu el la plej konataj lastatempaj kazoj estas tiu de la antaŭa soveta generalo kaj antaŭa multjara membro de la KP, A. Grigorenko, kiu luktis precipe por la fundamentaj rajtoj de la terure persekutataj Krimeaaj Tataroj. Ankaŭ Grigorenko, same kiel la malpli konata Belov, estis kondamnita al maliberejo kiel sana persono kaj devige internita en mensa hospitalo por perforta kuracado kiel mense malsana. Kiu ajn renkontis lin persone aŭ aŭskultis lian intervjuon en la brita televido en majo 1978, povis facile mem konstati, ke Grigorenko estas mense perfekte sana.

Kiel montrite, Belov estis kondamnita kiel mense sana. Poste, pro sia „kontraŭsoveta agitado” en la Vladimir prizono, li estis deklarita mense malsana kaj perforte kuracata, kvankam mense sana, sen ebleco apelacii. Komprenoble, tiaj kontraŭleĝaj agoj postulas komplikecon de difinita tipo de psikiatroj, unuavice de iuj laborantaj en la *Serbskij Instituto* de Moskvo. Kaj tio estas ne nur plia senleĝeco, sed ankaŭ perfido de la medicina etiko, formulita antaŭ dumil kvincent jaroj de la „patro de medicino”, Hipokrato, dum jarcentoj rigardata kiel idealo de la kuracista profesio kaj plu observata de ĉiuj civilizitaj popoloj. En tiaj kazoj la fama hipokrata juro transformiĝis en hipokritan malobservon de la ĵuro.

Sur tiu ĉi kampo de politikaj „krimoj” laŭ art. 70 kaj laŭ kelkaj aliaj artikoloj de la sovetaj kriminalaj kodoj, en Soveta Unio evidente regas la principo de nekontestebla supozo, nome de supozo, kies malĝustecon ne estas permesite pruvi (*praesumptio juris in de jure*); kiu ajn kritikis ion aŭ iun en la soveta ŝtato ekster la strikte difinita partia linio en iu periodo, estas aŭ respondeca krimulo aŭ senrespondeca frenezulo, aŭ, se necese, jen mense sana, jen mense malsana.

En la lastaj dek jaroj Amnestio Internacia adoptis ĉ. 200 sovetajn civitanojn, kondamnitajn kaj enprizonitajn pro „kontraŭsoveta agitado kaj propagando” laŭ art. 70, aŭ senditajn en mensajn hospitalojn, kvankam ili estis mense sanaj. Ĉar ĝi daŭre ricevas novajn informojn pri piaj kazoj, Amnestio Internacia opinias, ke ilia nombro estas konsiderinde pli alta. Ni prezentis kaj jure analizis ĝuste la kazon de J. S. Belov ne nur tial, ĉar li suferis kaj verŝajne plu suveras interalie pro sia esperantisteco, sed ankaŭ tial, ĉar lia kazo ne estas tiel mondfama, kiel la kazoj de pluraj aliaj viktimoj, por kies liberigo agas diversaj fortaj premgrupoj.

LA INTERNACIA LINGVO KIEL JURSCIENCA KOMUNIKILO¹

1. Enkonduko

La malfacilaĵoj, kiujn frontas la jurscienca internacia komunikado pro la lingvaj obstakloj estas similaj, certe ne identaj, al la malfacilaĵoj renkontataj en ĉiuj aliaj fakoj de naturaj kaj sociaj sciencoj. Siavice ili troviĝas en la vasta kadro de la ĝenerala problemo de lingva komunikado en la nuntempa mondo. Diversaj aspektoj – lingvistikaj, sociologiaj, psikologiaj, politikaj, ekonomiaj kaj juraj – de tiu grava demando en internaciaj rilatoj estas jam abunde pritraktitaj de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED), kiu funkciis en sia origina formo kiel scienca institucio de Universala Esperanto-Asocio, kaj kun siaj originaj celoj, ekde la komenco de 1952 ĝis la fino de 1974. En 23 jaroj de sia ekzistado ĝi publikigis pli ol 300 dokumentojn pri la lingva problemo en internaciaj rilatoj kaj pri la rolo de la Internacia Lingvo. La dokumentoj aperis en Esperanto kaj pluraj el ili ankaŭ en la angla, franca, hispana kaj aliaj naciaj lingvoj. CED eldonis kelkajn librojn, el kiuj la plej grava estas la 876-paĝa volumo *Esperanto en Perspektivo: Faktoj kaj Analizoj pri la Internacia Lingvo* (1974). La prestiĝa periodaĵo *La monda Lingvo-Problemo*, sub aŭspicio de CED, siavice pritraktis en studoj kaj artikoloj la saman temaron. Aparte grava estas la broŝuro *La Problemo de Lingva Komunikado en la Moderna Mondo* (1971), kiu enhavas la raportojn prezentitajn al speciala konferenco okazinta dum la 56-a Universala Kongreso de Esperanto en Londono.

Necesis atentigi pri la menciitaj materialoj, ĉar ili rilatas al la ĝenerala lingva problemo, kies nura parto estas kelkaj el ĝiaj specifaj formoj ekzamenataj en tiu ĉi artikolo.

Ĉi tie, do, mi limigos min al pritrakto de la esencaj aspektoj de la lingva problemo en internacia juro kaj kompara juro, unuflanke, kaj al la rolo de la Internacia Lingvo kiel jurscienca komunikilo, aliflanke.

¹ Ĝisdatigita kaj koncizigita versio de prelego farita fine de novembro 1976 dum konferenco okazinta en la Instituto pri Kibernetika Pedagogio en Paderborn (FR Germanio). La prelego estis bazita sur la siatempa dokumento de CED A/II2 „Kelkaj Aspektoj de la Lingva Problemo en Internacia Publika Juro kaj Kompara Juro”.

2. Internacia Juro

2.1. Lingvoj uzataj. – La fondintoj de la moderna scienco de internacia juro uzis la latinan, kiu estis la sola lingvo de la tiamaj interŝtataj rilatoj. La ĉefaj verkoj de tiu frua epoko *Relectiones de Indis Noviter Inventis* (1532) de la hispano Vitoria; *De Legationibus* (1588), *Commentationes de Jure Belli* (1589) kaj *De Jure Belli Libri Tres* (1598) de la italo Gentili, kiu vivis en Anglio kaj fariĝis profesoro en Oxford; *Mare Clausum* (1618) de la anglo Selden; *Mare Liberum* (1609), *De Jure Praede* (1605) kaj la mondfama *De Jure Belli ac Pacis Libri Tres* (1625) de la nederlandano H. Grotius, la plej granda el ĉiuj, kaj aliaj estis verkitaj en la latina. Superflue emfazi la avantaĝojn, kiujn donis la uzo de unusola komuna lingvo por scienca branĉo plej esence internacia. La samaj verkoj povis esti legataj kaj studataj ĉie en Eŭropo; en la sama lingvo oni povis prelegi en kiu ajn eŭropa universitato; la kontaktoj estis rektaj, sen la helpo de tradukistoj kaj interpretistoj.

Paralele kun la malaperado de la latina kiel diplomacia lingvo, proksimume ekde la mezo de la 17-a jarcento, ĝi malaperis ankaŭ el la doktrino. Praktike ĉiuj naciaj lingvoj anstataŭis ĝin en la nuntempo.

2.2. Problemoj. – Ĉu la multlingveco sur tiu ĉi kampo kaŭzas malfacilaĵojn kaj, se jes, kiujn?

2.21. Doktrino: Pro la universaleco de internacia juro, la baza terminologia materialo estas unuforma. En kelkaj lingvoj la terminoj estas pli aŭ malpli internaciaj; en aliaj ili estas kreitaj surbaze de nacilingvaj vortoj; en nombro da lingvoj paralele ekzistas ambaŭ formoj por granda nombro da nocioj. Tamen, tio ne kaŭzas apartajn malfacilaĵojn. Ne multe gravas, ĉu oni nomas tiun juran branĉon *Law of Nations*, *Droit des Gens*, *Völkerrecht*, *Mejdunarodnoje Pravo*, *Međunarodno pravo*, ktp., aŭ *International Law*, *Droit International*, *Diritto Internazionale*, *Derecho Internacional*, *Internacionalno pravo*, ktp., aŭ simile por aliaj konceptoj. Grave estas, ke la terminoj por diversaj nocioj estas ĝenerale firme establitaj en la diversaj lingvoj. Tio koncernas ankaŭ la terminologion por la apartaj nocioj de regiona internacia juro, tute certe en la lingvoj de la regiono, al kiu ĝi aplikiĝas, sed ĝenerale ankaŭ ekster ĝi. Oni eble povus diskuti pri la pli aŭ malpli granda taŭgeco de tiu aŭ alia esprimo en tiu lingvo, sed tio ne ŝanĝas la fakton, ke en la sfero de la doktrino de internacia juro, eĉ se kelkfoje oni renkontas malfacilaĵojn, tamen ĝenerale ne ekzistas veraj terminologiaj problemoj en la strikta senco de la vorto. Interalie, tio faciligas la tradukojn de internacijuraj traktaĵoj de unu nacia lingvo al alia.

Tute alie prezentiĝas la afero en internacia juro mem, nome rilate la fontojn kaj la alireblon de la fontoj por la doktrino.

2.22. Fontoj: Laŭ art. 38 de la Statuto de la Internacia Kortumo en Hago, la tri ĉefaj formalaj fontoj de internacia juro estas: (i) internaciaj konvencioj, ĉu ĝeneralaj, ĉu specialaj, entenantaj regulojn eksplicite rekonitajn de la ŝtato kiel devigajn; (ii) internacia kutimo kiel pruvo de ĝenerala praktiko akceptita kiel juro;

(iii) la ĝeneralaj juraj principoj rekonitaj de la civilizitaj nacioj. La juĝdecidoj de internaciaj kaj naciaj kortumoj kaj similaj juĝinstancoj, kiel ankaŭ la instruoj de la plej alte kvalifikitaj publicistoj de diversaj landoj estas rigardataj kiel helpaj rimedoj por establo de la juraj reguloj entenataj en la tri ĉefaj fontoj.

El ĉiuj menciitaj fontoj, hodiaŭ la plej grava estas la internaciaj konvencioj en larĝa senco de la vorto, nome ĉiuj eksplicitaj interŝtataj interkonsentoj, kreantaj reciprokajn rajtojn kaj devojn, tute egale ĉu la konkreta akto, depende de la enhavo, nomiĝas konvencio (en strikta senco), aŭ traktato, protokolo, interŝanĝo de notoj, interkonsento, deklaro, ĉarto, konstitucio, statuto ktp.

Diference de la tempoj, kiam sole la latina estis aplikata en interŝtataj rilatoj kaj, poste, la franca estis ĝenerale uzata kiel lingvo de diplomatio, hodiaŭ la internaciaj konvencioj estas farataj en la lingvoj de ĉiuj ŝtatoj de la mondo. La duflankaj konvencioj estas kutime verkitaj en la oficialaj lingvoj de la du partioj; la plurflankaj estas ofte skribitaj en la lingvoj de ĉiuj ŝtatoj-partioj; por la multflankaj konvencioj – inter ili la plej gravaj, sur kiuj baziĝas la diversaj nuntempaj interŝtataj organizaĵoj – oni uzas kelkajn t.n. oficialajn lingvojn. Ekzemple, la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacio estas verkita en la angla, ĉina, franca, hispana kaj rusa, kaj ĝia art. 111 preskribas, ke la tekstoj en la kvin lingvoj estas egale aŭtentikaj. Tiurilate tre interesa kaj instrua estas la evoluo en la Eŭropa Komunaĵo. Dum la Pariza Traktato de 1951 pri la fondo de la Eŭropa Komunaĵo pri Ŝtalo kaj Karbo estis redaktita en la franca kiel la sola aŭtentika lingvo, la Roma Traktato de 1957, per kiu estis fondita EEK, estas verkita en kvar lingvoj, nome la franca, germana, itala kaj nederlanda, kies tekstoj estas egale aŭtentikaj. La solaj tri artikoloj de la Brusela Traktato de la 22-a de januaro 1972, per kiu Britio, Danlando, Irlando kaj Norvegio aliĝis al la tri kunfandiĝintaj Eŭropaj Komunaĵoj, estas farita en la 8 oficialaj lingvoj de la partioj: la angla, dana, franca, germana, irlandia, itala, nederlanda kaj norvega, kaj ĉiuj tekstoj estas egale validaj. Do, de unu aŭtentika teksto en 1951 al ok aŭtentikaj tekstoj en 1972! Ĉar Norvegio, pro la negativa rezulto de la konata referendumo, ne povis ratifiki la Traktaton kaj, sekve, fine tamen ne aliĝis, dum Irlando uzas la anglan, la nuna Eŭropo de Naŭ havas 6 oficialajn lingvojn, du pli ol Eŭropo de Ses. El jura kaj ĉiuj aliaj vidpunktoj ili estas egalrajtaj.

Se iu internacia konvencio estas verkita en unusola aŭtentika lingvo, la eltrovo de la vera senco de ĝiaj reguloj en kazo de konfliktaj starpunktoj kutime ne kaŭzas pli da malfacilaĵoj, ol la interpretado de leĝoj kaj aliaj normdonaj aktoj en interna juro de unuopaj ŝtatoj. Al ĝi povas aplikiĝi la jam firme establataj reguloj de gramatika kaj teleologia interpretado de juraj artikoloj.

Tamen, eĉ se en kazoj de unulingvaj internaciaj konvencioj povas ekesti problemoj, ŝuldataj ĉefe al semantikaj malsamecoj de juraj terminoj en diversaj juraj sistemoj, simile al problemoj renkontataj en la sfero de kompara juro, pri kio iom poste.

Tipa ekzemplo estas art. 25 de la Varsovia Konvencio pri Unuecigo de Certaj Reguloj Rilatantaj al Internacia Aertransporto, plu valida ĉu en origina teksto, ĉu en la formo amendita per la Haga Protokolo de 28.09.1955 por la ŝtatoj ratifikintaj ĝin. Laŭ tiu Konvencio la kompenso pro damaĝoj kaŭzitaj de aerakcidentoj baziĝas

sur senkulpa aŭ objektiva respondeco de la transportisto, kaj estas limigita al difinitaj sumoj en oraj frankoj aparte por ĉiu persono, por pakajoj kaj varoj. Sed art. 25 preskribas, ke la respondeco de la transportisto estas senlima, se, laŭ la franca originalo, „*le dommage provient de son dol ou d'une faute qui, d'après la loi du tribunal saisi est considérée comme équivalente au dol*” (se la damaĝo estas rezulto de lia dolo aŭ de kulpo kiu, laŭ la juro de la kortumo ŝarĝita pri la afero, estas ekvivalento de dolo). Tiu maltaŭga formulo estis akceptita post longaj diskutoj, en kiuj la termino *faute lourde* (ekstrema neglekto) estis proponita, sed malakceptita, ĉar la brita reprezentanto asertis, ke la franca koncepto de *faute lourde* ne ekzistas en la angla juro kaj tial, se tradukita per la sole ebla *gross negligence*, havus nenian juran sencon. Aliflanke, la koncepto de *dol* en la franca juro estas eĉ pli malfacile tradukebla en la anglan kaj tial, fine, oni akceptis la supran formulon de *dol ou d'une faute ... équivalente au dol*. Tiuj ĉi terminoj estis neprecize tradukitaj en la angla Akto (leĝo) pri Aera Transporto de 1932 kaj en la oficiala usona traduko per *wilful misconduct or ... default ... equivalent thereto*. Verŝajne neniuj regulo de konvencia internacia juro kaŭzis pli da teoriaj diskutoj, juraj argumentadoj kaj procesoj, ol la obskuraj kaj neadekvate tradukitaj preskriboj de art. 25 pri la senlima respondeco de la transportisto.

Se temas pri konvencioj redaktitaj en du aŭ pluraj lingvoj, kaj se ĉiuj tekstoj estas egale validaj, la tuta afero konsiderinde komplikiĝas pro la oftaj malsamecoj inter unu versio kaj la alia aŭ aliaj. Eĉ la nomo mem de la hodiaŭa monda organizaĵo de ŝtatoj ne estas identa en la kvin oficialaj lingvoj. En la angla, franca kaj hispana aŭtentikaj tekstoj ĝi estas *Unuiĝintaj Nacioj (UN)*, sed en la rusa same aŭtentika teksto ĝi aperas kiel *Organizacio de Unuiĝintaj Nacioj (OUN)*. En la teksto mem troviĝas tre multaj malsamecoj. Dum la tradukado de la Ĉarto en la Internacian Lingvon necesis preni en konsideron la aŭtentikajn tekstojn en la angla, franca, hispana kaj rusa (pro la nescio de la ĉina ne estis eble konsulti la tekston en tiu lingvo) por doni kiel eble plej fidelan tradukon de la senco. Kelkfoje la tri tradukintoj

– Ambasadoro Ralph Harry, Eskil Svane kaj mi mem – kombinis tiucele la 4 tekstojn por eltrovi la ĝustan sencon; en aliaj kazoj, precipe en la dubaj, ni prenis tiun aŭtentikan tekston, kiu estis pli klara aŭ pli preciza.

Diference de la Ĉarto de UN, verkita en 5 oficialaj lingvoj, la Statuto de la Internacia Kortumo en Hago, kvankam unu el la ĉeforganoj de UN, estas redaktita en la angla kaj franca. Nur la tekstoj en tiuj du lingvoj estas aŭtentikaj kaj sekve, egalvaloraj. Tamen, en pluraj lokoj ili diverĝas, kio kelkfoje obstaklas la eltrovon de la ĝusta senco. Tio estas des pli ĝena, ĉar la Statuto entenas la bazajn organizajn principojn de la Kortumo kaj la fundamentajn regulojn de proceduro kiuj, interalie, aplikiĝas al interŝtataj disputoj submetitaj al la Kortumo por prijuĝo. Ekzemple, en la franca teksto de art. 36 troviĝas la vortoj *compétence* kaj *jurisdiction*, dum la angla teksto, pro la fakto ke la angla *competence* ne respondas al la franca *compétence*, uzas por ambaŭ terminoj nur *jurisdiction*. En la unua proceso inter Britio kaj Albanio pro la incidentoj en la Markolo de Korfujo (objeto de Albanio), en kiu mi funkciis kiel konsilisto-advokato de Albanio, la demando stariĝis ĉu la Kortumo havis kompetentecon por juĝi la konkretan kazon, kvankam ĝia ĝenerala jurisdikcio ne estis

neata. La demando estis tute konforma al la franca aŭtentika teksto. Sed laŭ la angla teksto, same aŭtentika, tio estis sensencaĵo, ĉar ĝi ne distingas inter kompetenteco kaj jurisdikcio kaj, sekve, ne eblas diri, ke la Kortumo samtempe havas kaj malhavas jurisdikcion. La internacilingva traduko de art. 36 de la Statuto konservas per la terminoj *kompetenteco* kaj *jurisdikcio* la sencon de la franca aŭtentika teksto.

Ne estus tre malfacile skribi tutan libron, eĉ plurvoluman, por prezenti similajn kazojn de malsamecoj en oficialaj tekstoj, kiuj kaŭzas malfacilaĵojn, ofte eĉ tre seriozajn problemojn. La kelkaj supraj ekzemploj estas prezentitaj nur por iom ilustri la situacion en la ĝenerala internacia juro.

En la Eŭropa Ekonomia Komunaĵo la malfacilaĵoj multrilate estas eĉ pli grandaj, ĉar EEK estas supernacia laŭ sia karaktero, daŭre kreas sian propran, novan eŭropan juron, kiu grandparte rekte aplikiĝas en la Ŝtatoj-Membroj, do sur teritorioj kun siaj apartaj juraj sistemoj, kun apartaj juraj terminologiaj kaj juraj tradicioj.²

En ligo kun la pritraktata demando de jurscienca komunikado utilas mencii, ke laŭ art. 102 de la Ĉarto de UN ĉiu traktato kaj ĉiu alia interŝtata interkonsento kontraktita de kiu ajn membro de UN devas esti registrita ĉe la Sekretariato de UN kaj publikigita de ĝi. Efektive, la Sekretariato publikigas ĉiujn internaciajn konvenciojn en ampleksaj volumoj, kiuj per si mem jam formas tutan bibliotekon. Tiu grandega internacijura materialo, daŭre publikigata en ĉiuj lingvoj de la mondo, restas amase perdita en la polvo de bibliotekoj kaj grandparte nealirebla por esploro pro la malebleco koni, almenaŭ lege, eĉ parton de la lingvoj uzataj.

Ankaŭ alia granda fonto – la ĝeneralaj juraj principoj, rekonitaj de la civilizitaj nacioj – celas malmulte konata al la doktrino. Se la Internacia Kortumo pro sia internacia konsisto posedas maksimuman scion pri la ĉefaj juraj sistemoj de la mondo, tion certe oni ne povas diri pri la unuopaj specialistoj de internacia juro. En ĉiuj verkoj, en ĉiuj lernolibroj de internacia juro oni mencias la ĝeneralajn jurajn principojn kiel apartan fonton (kvankam iuj esprimas fortajn dubojn pri iliaj signifo kaj valoro), sed oni nenion diras pri kiuj principoj fakte temas, ĉar tutsimple la multnombreco de lingvoj obstaklas la esploron. La samon oni povas diri pri la juĝoj de diversaj tribunaloj kaj, almenaŭ parte, pri la „instruo de la plej alte kvalifikitaj aŭtoroj de diversaj nacioj” kiel helpaj fontoj de internacia juro. Kiamaniere oni povas studi la doktrinojn de aliaj landoj, se oni ne scias la respektivajn lingvojn? Eĉ la soveta doktrino de internacia juro – do doktrino de unu el la plej potencaj ŝtatoj – estas tre malmulte konata en la Okcidento kaj entute ekster la t.n. soveta bloko, por ne paroli pri la aliaj skoloj en malpli gravaj landoj.

Al ĉio ĉi aldoniĝas la malfacilaĵoj en internaciaj renkontiĝoj de specialistoj pri internacia juro: la samaj, kiujn frontas ĝenerale la internaciaj renkontiĝoj ne uzantaj unusolan komunan lingvon.

La multlingveco, do, sendube kaŭzas seriozajn problemojn en la internacia juro mem kaj prezentas gravan obstaklon al la establo kaj studo de ĉiuj principoj kaj reguloj de tiu jura branĉo surbaze de la rekonitaj ĉefaj kaj helpaj rimedoj, obstaklon

2) Pri la situacio en la Eŭropa Ekonomia Komunaĵo v. la artikolon „Kelkaj Juraj Aspektoj de la Multlingveco en EEK” en IJR n-ro 2/1977, p-oj 11–17.

por la plua evoluo de la scienco de internacia juro kaj por la senperaj kontaktoj de personoj esplorantaj, studentaj, instruantaj kaj kree produktantaj sur tiu ĉi kampo.

2.3. Taŭgeco de la Internacia Lingvo. – Kvankam ankoraŭ ne ekzistas en Esperanto aparta terminaro por internacia juro, tamen oni ne renkontas specialajn terminologiajn problemojn. Pluraj verkoj, studoj kaj artikoloj rilatantaj al internacia juro jam aperis en la Internacia Lingvo. Mi mem publikigis en Esperanto la popularsciencan verkon *Aktualaj Problemoj en la Nuntempa Internacia Vivo*, kelkajn studojn kaj artikolojn, ofte prelegis en Internacia Somera Universitato kaj en diversaj internaciaj seminarioj aŭ konferencoj pri demandoj rilatantaj al internacia juro, sed neniam renkontis nesolveblan problemon. Multaj internacijuraj terminoj troviĝas en la granda *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto*, verkita de Prof. G. Waringhien, kaj en la du ekzistantaj juraj terminaroj. La aplikataj principoj estas: (i) uzi la ekzistantajn ĝeneralajn vortojn en faka senco, kiam ajn tio eblas, kaj apartajn fakajn terminoj, se ili jam estas kreitaj; (ii) se ne ekzistas konvena termino, krei novan laŭ la principo de la *Fundamento de Esperanto*, ke ĉiu internacia vortradiko povas esti transformita en esperantlingvan (pro la universaleco de la bazaj konceptoj de internacia juro kaj pro la internacieco de la Internacia Lingvo tio ne estas malfacila); (iii) konservi la latinajn esprimojn kaj maksimumojn, kiuj estas jam firme internacie establitaj en la doktrino de internacia juro.

En la Aldono A/ troviĝas, nur kiel malgranda ekzemplo, traduko de la unuaj 12 terminoj laŭ aboca ordo en la Glosaro de Prof. G. Schwarzenberger kaj la jam citita art. 38 de la Statuto de la Internacia Kortumo.

3. Kompara Juro

3.1. Terminologio. – Diference de la internacijura doktrino, la terminologiaj problemoj sur la kampo de kompara juro estas vere grandaj. Tio ŝuldiĝas parte al malesto en iu lingvo de fakaj terminoj por juraj nocioj en alia jura sistemo, sed ĉefe al la malsameco de la signifoj de la fakaj juraj terminoj en diversaj lingvoj. Lingvo ĉiam spegulas difinitan socian realaĵon, kiu determinas la bezonojn de pensado kaj komunikado en la koncerna socia medio. Sekve, se en unu jura sistemo tute ne ekzistas difinita jura koncepto, kiu troviĝas en alia sistemo, tiam por tiu koncepto, kompreneble, ekzistas vorto en la alia sistemo, sed ne en la unua. Ekzemple, la anglaj terminoj *solicitor*, *barrister* kaj multaj aliaj ne estas tradukeblaj en la francan aŭ germanan aŭ kiun ajn alian eŭropan lingvon, ĉar tutsimple en ili ne troviĝas identaj vortoj pro la foresto de tiuj nocioj mem en la juraj sistemoj de la koncernaj ŝtatoj. La sola ebleco en tiaj kazoj estas prunti la vorton el la alia lingvo kaj uzi ĝin kiel fremdan aŭ naciigitan en la propra nacia lingvo, se la strukturo de la koncerna lingvo permesas, aŭ kiel internaciigitan en Esperanto. Ekzemple, estas multe pli bone diri *kolĥozo*, *sovĥozo*, *artelo* k.s. surbaze de la rusaj *kolĥoz*, *sovĥoz*, *artel'* k.s., ol traduki per „mastruma kolektivo”, „soveta matrumunuo”, „libervola unuiĝo por produktado agrikultura” aŭ simile. En ĉiu okazo necesas difini la terminojn konforme al la preciza signifo, kiun ili havas en la lingvo, el kiu ili estas

prenitaj. Tia termino, foje enkondukita en la lingvon, donas, almenaŭ en Esperanto, multajn eblecojn de derivado: *kolĥoza proprieto, kolĥozano, kolĥozanino* ktp.

Plej ofte en la lingvoj de la komparataj sistemoj (aŭ en tria lingvo, se oni verkas en ĝi) troviĝas ĝeneralaj juraj terminoj por la traktataj konceptoj, sed la termino en unu lingvo ne kovras la saman nocion en alia. Ekzemple, eĉ la plej elementaj terminoj kiel *proprieto, posedo, civila juro, krimo, kortumo, juĝisto, advokato, notario* kaj centoj da aliaj troviĝas en la kroata, rusa, angla, franca, hispana kaj multaj aliaj lingvoj, sed la juraj konceptoj, kiujn ili kovras, estas tre malsamaj en la respektivaj juraj sistemoj. Sekve, nur per precizaj difinoj oni povas eviti konfuzon kaj miskomprenojn.

Necesus ankaŭ atingi – kaj tio estas ebla – ke en difinita lingvo oni uzu ĉiam la saman terminon por la sama nocio el alia jura sistemo, kaj ne, kiel nun okazas, ke, depende de la personaj preferoj de la aŭtoroj, oni uzas en la sama lingvo plej diversajn terminojn por difinita koncepto el alia jura sistemo. Tio precipe okazas en la angla kaj usona variantoj de la angla lingvo rilate la rusajn terminojn. Ekzemple, la rusa *obščënarodnoje gosudarstvo* (tutpopola ŝtato) estas tradukata per *all-people's state* aŭ *state of the entire people* aŭ simile; la rusa *pravosposobnost'* (jura kapablo) per *juridic capacity, juridical capacity, legal capacity* (vidu la konfuzon kun jura kapablo), *capacity to enter into legal transaction*, k.s.; la rusa *umysel* (dolo) per *intent, intention, premeditation* kaj alimaniere. Kaj same tiel pri multaj aliaj terminoj el soveta juro.

Malpli konfuza, sed tamen ĝena, estas la demando de transskribado per latinaj literoj ĉe tekstoj verkitaĵoj en lingvoj, kiuj ne uzas la latinan alfabeton. Ekzemple, por la latinlitera transskribado de rusaj tekstoj oni aplikas en la angla almenaŭ tri sistemojn: la internacian (plej malmulte), tiun de la Biblioteko de Washington, tiun de *Slavonic and East European Review*. Krome, pluraj aŭtoroj aplikas sian propran individuan sistemon. Ankaŭ tiu aspekto estas relative simpla en la Internacia Lingvo pro ĝia fonetika ortografio.

Diversaj provoj estis faritaj por unuecigi la juran terminaron. Ankaŭ en la sino de la Eŭropa Konsilantaro okazis konferencoj, kiuj pritraktis tiun demandon. La rezultoj ne povis kaj ne povas esti kontentigaj pro la kaŭzoj ĵus skizitaj, sed tute certe almenaŭ io povus esti atingita en du stadioj:

(i) Unuecigi la terminaron en ĉiu unuopa lingvo por la juraj konceptoj de aliaj juraj sistemoj kaj akcepti internacian transliterumadon, kiam tio eblas. Tiun laboron devus entrepreni la institutoj de kompara juro aŭ similaj kompetentaj instancoj de diversaj landoj. La aŭtoroj devus observadi la regulojn tiel formulitajn.

(ii) Paralele, sed ĉefe post tio, estus eble esplori ĝis kiu grado oni povas internacie unuecigi la terminologion. La neŭtrala Esperanto povus doni ankaŭ en tiu laboro grandajn servojn kiel ponto-lingvo kaj kiel lingvo por la bazaj difinoj.

3.2. Uzo de Esperanto. – La multjaraj spertoj en la sferoj de internacia juro kaj kompara juro montras, ke la Internacia Lingvo plene taŭgas ne nur por rekta verkado en ĝi, sed ankaŭ por ĝia utiligo kiel pontolingvo.

3.2.1. Rekta Uzo: La originala literaturo en Esperanto sur la kampo de kompara juro estas ankoraŭ tre modesta. Artikoloj kaj mallongaj studoj aperis en diversaj periodaĵoj. En la lastaj du jardekoj la ĉefa centro estis kaj plu estas la Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj kaj ĝia organo *Internacia Jura Revuo*. En ĝi aperis konsiderinda nombro da artikoloj kaj raportoj rilatantaj al aktualaj demandoj de kompara juro. Interalie, pluraj aŭtoroj pritraktis la kompenson pro damaĝoj kaŭzigitaj per akcidentoj, la laborprotektion, la proprietajn rilatojn inter geedzoj, la juran pozicion de virinoj, la testamentojn kaj heredajn rajtojn kaj multajn similajn demandojn laŭ la internaj juroj de diversaj landoj, aplikante komparjurajn metodojn por tiu celo. Komprenoble, ankaŭ verkante en la Internacia Lingvo la aŭtoroj renkontis malfacilaĵojn, kiujn, pro la objektiva malsameco de signifoj, neniu lingvo povas plene solvi. Tamen, la malfacilaĵoj estas konsiderinde malpli grandaj ol en la naciaj lingvoj. Tio ŝuldiĝas ĉefe al la strukturo mem de Esperanto. La pozitivaj trajtoj de tiu lingvo estas: ĝia fleksebleco, kiu permesas esprimi en ĝi ĉiujn nuancojn de la penso kaj, en kazo de citaĵoj, adapti ĝin ĝis maksimumo eĉ al la stilo de la originalo; ĝia aglutina karaktero, kiu preentas praktike senfinajn eblecojn de derivado; la facileco, per kiu oni povas enkonduki novajn necesajn fakajn esprimojn en ĝin.

3.2.2. Ponto-lingvo: Pro la daŭra multiĝado de ĉiaspecaj internaciaj rilatoj, multiĝas ankaŭ la juraj problemoj kaj individuaj kazoj, kiuj postulas konon de konkretaj juraj preskriboj kaj solvoj en unu, kelkfoje eĉ en kelkaj alilandaj juraj sistemoj. Plej ofte, pro la nekonado de la koncernaj fremdaj lingvoj, oni sentas sin senpova kaj devas peti helpon de kolegoj en la respektivaj landoj. La Internacia Lingvo estas utiligata ankaŭ por tiu celo. La reciproka faka helpado inter la membroj de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj kaj inter la aliaj juristoj kun scio de la Internacia Lingvo, kvankam certe ne spektakla, tamen ne estas neglektebla. Ĝi montras la eblecojn de Esperanto kiel ponto-lingvo. Mi mem ofte donis fakan helpon kaj kelkfoje ankaŭ ricevis ĝin.

Ekzemple, por povi doni petitan juran opinion en kazo antaŭ angla kortumo, mi nepre bezonis la bulgaran Markodon, kiun mi ne povis trovi en kiu ajn el la bibliotekoj de Londono, eĉ ne en la mondfama de mia kolegio. Mi turnis min al kolego en Bulgario. Post nuraj 3–4 semajnoj mi ricevis kaj la Kodon en la bulgara kaj tre adekvatan Esperanto-tradukon, plene utiligeblan por la celo. En divorca kazo en Italio necesis havigi kelkajn precizajn tekstojn de unuopaj reguloj de la hungara familia juro. Esperanto-traduko sendita de hungara juristo ebligis solvi la kazon.

Superflue diri, ke, por atingi absolutan precizecon, senkondiĉe necesan en tiaj delikataj kazoj, kaj la petanto kaj la helpanto devas ne nur esti juristoj, se eble specialistoj en la koncerna jura branĉo, sed ankaŭ bonaj sciantoj de la Internacia Lingvo.

Por testi la gradon de precizeco de Esperanto kiel ponto-lingvo de juraj tekstoj, antaŭ kelkaj jaroj mi faris malgrandan eksperimenton kun la helpo de s-ro W. Auld en Skotlando. En la aldono B troviĝas kelkaj specimenoj de tradukoj el Esperanta originalo en la anglan, kiel ankaŭ el la rusa aŭ franca originaloj tra Esperanto kiel ponto-lingvo en la anglan. Plia ekzemplo montras la tradukon el

la angla en Esperanton, kiun mi faris, kaj la retradukon de s-ro Auld el Esperanto denove en la anglan sen vido de la originala angla teksto.

Komparante la originalajn tekstojn kun la tradukoj kaj retradukoj, precipe la originalan anglan tekston kun la angla retraduko el Esperanto, oni povas facile konstati tre altan gradon de fideleco. La rezulto estas des pli trafa, se oni konsideras, ke s-ro Auld ne estas juristo.

4. Konkludo

Kiel montrite, sufiĉe granda nombro da juristoj jam utiligis kaj plu utiligas la Internacian Lingvon por originala verkado, por fakaj prelegoj, por diskutoj dum fakaj-juraj konferencoj, por reciproka interhelpo, kaj personaj kontaktoj. Tio principe sufiĉas por evidenti ĝiajn eblecojn. La ĝisnuna utiligo de Esperanto kiel jurscienca komunikilo klare indikas la grandegajn potencialojn de tiu lingvo. Ĝi montriĝis ne nur matura por originala verkado kaj parola komunikado en la sferoj de internacia juro kaj kompara juro, sed, se necese, ĝi povas ankaŭ efike plenumi la funkcion de ponto-lingvo.

La ĝeneraligo de la uzo de Esperanto sur ĉiuj niveloj de internaciaj rilatoj ekde la daŭre kreskantaj privataj kontaktoj de ordinaraĵoj homoj ĝis la suproj de sciencaj interŝanĝoj kaj monda diplomatio donus multflankajn avantaĝojn al ĉiuj, sen malavantaĝoj por kiu ajn, eĉ ne por tiuj, kies naciaj lingvoj estas hodiaŭ parte uzataj por internacia komunikado. En tiu vasta kadro la uzo de Esperanto kiel jurscienca komunikilo venkus la plejparton de teknikaj kaj aliaj malfacilaĵoj de multlingveco, faciligus la solvodon de la resto, ebligus senperajn kontaktojn de la agantoj en tiuj sferoj, kaj ĉio-ĉi rezultigus senprecedencan ekfloron de la jura scienco. Tio, siavice, ne povus ne efiki pozitive je intensigo de kunlaborado inter la popoloj en amikeco kaj je paco de la mondo en libereco.

Aldono A

Ekzemplo de Internacijuraj Fakterminoj kaj iliaj Difinoj

(Laŭ la *Glosaro* en Schwarzenberger II, p. 677., v. en *Bibliografio*)

Absolute Responsibility: as distinguished from the doctrine of culpability (q.v.), doctrine according to which State responsibility may arise even in the absence of guilt (intent or negligence) imputable to a subject of international law.

Absoluta Respondeco: distinge disde la doktrino de kulpeco (q.v.), doktrino laŭ kiu la ŝtato-respondeco povas ekesti eĉ se forestas kulpo (intenco aŭ neglekto) imputebla al subjekto de internacia juro.

Absolute Right: (1) Right which may be exercised against everyone. (2) Right which may be exercised irrespective of equitable considerations to the contrary.

See also under Abuse of Rights, *Jus aequum*, *Jus in re*, *Jus strictum* and Relative Rights.

Absoluta Rajto: (1) Rajto, kiu povas esti efektiva kontraŭ ĉiu ajn. (2) Rajto, kiu povas esti efektiva senkonsidere al kontraŭaj postuloj de justeco. Vidu ankaŭ sub Misuzo de Rajtoj, **Jus aequum**, **Jus in re**, **Jus strictum** kaj Relativaj Rajtoj.

Abuse of Rights: doctrine according to which an unmotivated or unreasonable exercise of right amounts to an illegal act (q. v.) ...

Misuzo de Rajtoj: doktrino laŭ kiu nemotivita aŭ maljusta efektiva de iu rajto egaligas al kontraŭleĝa ago (q.v.) ...

Accessio cedit principali: an accessory thing when annexed to a principal thing becomes part of the principal thing.

Accessio cedit principali: akcesora aĵo, se aneksita al ĉefa aĵo, fariĝas parto de la ĉefa aĵo.

Accession: (1) Acquisition of title to additional territory through natural causes. (2) Equivalent to adherence (q.v.).

Akceso: (1) Akiro de titolo al aldona teritorio rezulte de naturaj kaŭzoj. (2) Ekvivalento de aliĝo.

Acquisitive Prescription: Title to territory based on uninterupte and uncontested occupation (q.v.) over a reasonably long period. See also under Historical Bays and Waters.

Akira Preskripto /:Uzukapo/ Titolo al teritorio bazita sur seninterrompa kaj nekontestita okupado (q.v.) dum prudente longa periodo. Vidu ankaŭ sub Historiaj Golfoj kaj Akvoj.

Actio personalis moritur cum persona: a personal right of action dies with the person.

Actio personalis moritur cum persona: persona akuzrajto mortas kun la persono.

Ad hoc: for a particular purpose.

Ad hoc: por aparta celo.

Adherence: acceptance of a treaty by a third State with the consent of the original parties.

Aliĝo: akcepto de traktato fare de tria ŝtato kun la konsento de la originalaj partioj.

Administrative International Institutions: international institutions with executive jurisdiction.

Administraj Internaciaj Institucioj: internaciaj institucioj kun ekzekutiva jurisdikcio.

Adoption: doctrine according to which international law is incorporated into municipal law by custom or statute but does not become automatically part of municipal law. See also under Dualism and Monism.

Adopto: doktrino laŭ kiu internacia juro estas enkorpigata en la internan juron per kutimo aŭ leĝo, sed ne fariĝas aŭtomate parto de interna juro. Vidu ankaŭ sub Dualismo kaj Monismo.

Advisory Opinion: answer to a question put to the International Court of Justice by organs of the United Nations or Specialised Agencies (q.v.) authorised to make such a request.

Konsulta Opinio: respondo al demando farita al Internacia Kortumo fare de la organoj de Unuiĝintaj Nacioj aŭ Specialigitaj Organizaĵoj (q.v.) rajtigitaj starigiti demandon.

ART. 38 de la STATUTO de la INTERNACIA KORTUMO

Angla originalo – Esp. traduko

1. The Court, whose function is to decide in accordance with international law such disputes as are submitted to it, shall apply:

1. La Kortumo, kies funkcio estas decidi konforme al internacia juro tiujn malkonsentojn kiuj estas submetitaj al ĝi, aplikos:

(a) international conventions, whether general or particular establishing rules expressly recognized by the contesting States;

(a) internaciajn konvenciojn, ĉu ĝeneralajn ĉu specialajn, establitajn regulojn eksplicite rekonitajn de la ŝtatoj en konflikto;

(b) international custom, as evidence of a general practice accepted as law;

(b) internacian kutimon kiel pruvon de ĝenerala praktiko akceptita kiel juro;

(c) the general principles of law recognized by civilized nations;

(c) la ĝeneralajn jurajn principojn rekonitajn de civilizitaj nacioj;

(d) subject to the provisions of Art. 59, judicial decisions and the teaching of the most highly qualified publicists of the various nations, as subsidiary means for the determination of rules of law.

(d) sub rezervo de la kondiĉoj de la Art. 59, juĝdecidojn kaj instruon de la plej alte kvalifikitaj publicistoj de diversaj nacioj, kiel helpajn rimedojn por la determino de juraj reguloj.

2. This provision shall not prejudice the power of the Court to decide a case *ex aequo et bono*, if the parties agree thereto.

2. Tiu ĉi preskribo ne prejudicos la povon de la Kortumo decidi **ex aequo et bono**, se la partioj konsentas.

Aldono B

Esperanto kiel Ponto-lingvo

(Kelkaj ekzemploj de tradukoj kaj retradukoj)

Esperanta originalo:

Por devige alkitimigi la popolon, precipe la kamparanan loĝantaron, al civila geedziĝo, la Familia Kodo 1918 (simile al Dekreto 1917) intence ne egaligis jure la faktan kunloĝadon kun la registrita geedziĝo. Fari tion estus implicinta la rekonon, ke la eklezia geedziĝo estas egalvalida kiel la registrita. Kaj precize tion ĝi volis eviti. N. V. Rabinoviĉ diras tiurilate:

Angla Traduko:

In order forcibly to accustom the people, particularly the peasant population, to civil marriage, the Family Code 1918 (like the 1917 Decree) intentionally did not legally equate cohabitation *de facto* with registered marriage. To have done so would have been implicitly to recognize church marriage as being equally valid with registered marriage. And that was precisely what it was intended to avoid. N. B. Rabinovič says on this head:

EKZEMPLO 2: Rusa-Esperanto-Angla

Rusa originalo:

Kodeks 1918 g., tak ĵe kak dekret 1917 g., soverŝenno ne kasalsja faktičeskijh braĉnyh otnoŝenij. Pridavat kakoelibo pravovoje znaĉenije otnoŝenijam, sloĵivŝimsja bez registracii braka v tot period bylo ne vozmojno. Eto moglo by privodit' k tomu, ĉto naselenije, vozderĵivajas' ot registracii braka, prodolĵalo by po tradicii venĉat' sja v cerkvi. (Ioffe, p. 282)

Esperanta traduko:

La Kodo de 1918, same kiel la Dekreto de 1917, tute ne koncernis la geedziĝajn rilatojn *de facto* /:fakta kunvivado inter viro kaj virino kiel geedzoj/. En tiu tempo estis maleble doni kiun ajn juran signifon al rilatoj establitaj sen la registriĝo de la geedziĝo. Tio estus povinta kaŭzi, ke la loĝantaro, abstinante registri la geedziĝon, daŭrigus geedziĝi en la eklezio konforme al la tradicio.

Angla traduko el Esperanto:

The Code of 1918, like the Decree of 1917, was not concerned at all with *de facto* marital relations. At that time it was impossible to give any legal significance whatever to relationships established without registration of marriage, which might have enabled people to continue marrying in church in accordance with tradition, whilst refraining from registering the marriage.

EKZEMPLO 3. Franca-Esperano-

Angla Franca originalo:

Le caractère propre de notre langue lui assurera toujours la faveur des diplomates, mais nous ne serions pas seuls à regretter qu'elle n'eût plus cette universalité que Louis XIV et Voltaire avaient sù lui donner. Une langue unique au service de la politique internationale était un lieu intellectuel entre les nations. Elles ont trop de tendance à s'isoler, et c'est préparer entre elles de futurs malentendus que de les obliger à recourir à des interprètes pour déterminer le sens de leurs conversations. (Frangulis, I, o. 1209).

Esperanta traduko:

La aparta karaktero de nia lingvo certigos al ĝi ĉiam la favoron de la diplomatoj, kaj ni ne estos la solaj, kiuj bedaŭros, ke ĝi ne plu havas tiun universalecon, kiun sciis

doni al ĝi Louis XIV kaj Voltaire. Unu sola lingvo en la servo de internacia politiko estis intelekta ligilo inter la nacioj. Ili havas tro tendencon izoliĝi, kaj devigi ilin helpi sin per interpretistoj por difini la sencon de siaj konversacioj, signifas prepari estontajn miskomprenojn inter ili. (Tradukis I.L.)

Angla traduko el Esperanto:

The special character of our language will always ensure for it the favour of the diplomats, and we will not be the only ones to regret that it no longer enjoys the universality which Louis XIV and Voltaire were able to give it. A single language in the service of international politics was an intellectual link between the nations. These have to great a tendency towards isolation, and to force them to make use of interpreters in order to define the sense of their conversations is to show the seeds of future misunderstandings among them. (Tradukis W. Auld)

EKZEMPLO 4: ANGLA-ESPERANTO-ANGLA

Angla originalo:

It is obvious that while a man speaking or writing in his own language is able to say whatever he wishes, on the other hand, when employing a foreign tongue, he can only say what he is enabled to express by the knowledge which he happens to possess of that particular language. (Satow, 1917, p. 67)

Esperanta traduko:

Estas evidente, ke dum homo parolanta aŭ skribanta en sia propra lingvo estas kapabla diri kion ajn li deziras, je la alia flanko, /kiam/ uzante fremdan lingvon, li povas nur diri kion li estas kapablighita esprimi per la kono, kiun li hazarde posedas de tiu aparta lingvo. (Tradukis I.L.)

Retraduko en la anglan el Esperanto:

It is obvious that, while a man speaking or writing in his own tongue is able to say whatever he wants to, on the other hand, when using a foreign language he can only say what he is enabled to express by the knowledge he happens to have of that particular language. (Tradukis W. Auld).

Atentigo:

La originale skribita mallonga teksto de la ekz. 1 kaj nur la Esperantaj tradukoj de la tekstoj en la ekz. 2-4, sen ia ajn indiko pri la aŭtoroj, estis senditaj al S-ro W. Auld perpoŝte al Skotlando. En la ekzemploj 2-4 mi nur informis lin el kiu lingvo estis farita la traduko kaj, en la ekz. 4, ankaŭ ke temas pri verko publikigita en 1917.

Bibliografio de Utiligitaj Verkoj

- Basdevant, J. (kaj aliaj), *Dictionnaire de la Terminologie du Droit International* (Vortaro de la Terminologio de Internacia Juro), Paris, 1960.
- Frangulis, M. A., *Dictionnaire Diplomatique* (Diplomatia Vortaro), Paris, 1936, Vol. I.
- Grimyko, A. A., *Diplomatičeskij Slovar'* (Diplomatia Vortaro), Moskva, 1960, Vol. I-II.
- Ioffe, O. S. (kaj aliaj), *Sorok Let Sovetskogo Prava* (Kvardek Jaroj de Soveta Juro), Leningrad, 1957, Vol. I.
- Kojevnikov, F. I., *Sovetskoe Gosudarstvo i Meždunarodnoe Pravo* (Soveta ŝtato kaj Internacia Juro), Moskva, 1948.
- Lapenna, Ivo, *Retoriko*, Dua Eldono, Rotterdam, 1971, Unua Parto: Lingvo;
- Lapenna, Ivo, *Aktualaj Problemoj de la Nuntempa Internacia Vivo*, Rotterdam, 1952;
- Lapenna, Ivo, *Conceptions Soviétique de Droit International Public* (Sovetaj Konceptoj de Internacia Publika Juro), Paris, 1954;
- Lapenna, Ivo, *Esperanto en Perspektivo - Faktoj kaj Analizoj pri la Internacia Lingvo*, London-Rotterdam, 1974.
- Lisovskij, V. I., *Meždunarodnoe Pravo* (Internacia Juro), Moskva, 1955.
- Meillet, A., Cohen, M. (redaktoroj), *Les Langues du Monde* (La Lingvoj de la Mondo), Paris, 1952.
- Oppenheim, L., *International Law* (Internacia Juro), Oka Eldono, red. de H. Lauterpacht, London-New York-Toronto, 1958, Vol. I.
- Ostrower, Alexander, *Language, Law and Diplomacy* (Lingvo, Juro kaj Diplomatia), London – Oxford, 1965, Vol. I-II.
- Satow, Sir Ernst, *A Guide to Diplomatic Practice* (Gvidilo al Diplomatia Praktiko), Unua Eldono, 1917; Tria Eldono, reviziita de H. Ritchie, London-New York-Toronto, 1932.
- Schwarzenberger, Georg, *Manual of International Law* (Manlibro de Internacia Juro), Kvara Eldono, London-New York, 1960, Vol. II.
- Strupp, Karl, *Wörterbuch des Völkerrechts und der Diplomatie* (Vortaro de Internacia Juro kaj Diplomatia), Berlin-Leipzig, 1925.

LA KONCEPTO DE NEŬTRALECO EN INTERNACIAJ RILATOJ KAJ INTERNACIA JURO*

1. Enkonduka Rimarko

Kvankam oni multe skribas kaj parolas pri neŭtraleco, neŭtralismo kaj kunligitaj nocioj, tamen ankoraŭ regas sufiĉe da konfuzo kaj miskomprenoj, ŝuldataj parte al manko de tiurilataj scioj, parte al necese nekompletaj difinoj en vortaroj, kaj en Esperanto iomgrade al la influo de la respektivaj naciaj lingvoj ĉe kelkaj unuopuloj.

Kio, do, ekstas la ĝenerala signifo de la radikoj *neŭtr*-a aŭ *neŭtral*-a?

Etimologie ambaŭ radikoj devenas de la latina *neuter*, *-tra*, *-trum*, kiu en tiu lingvo signifas „neniu el la du”. En Esperanto, same kiel en kelkaj aliaj lingvoj, troviĝas du radikoj derivitaj el la sola latina por signi la du ĉefajn grupojn de nocioj kun malsamaj signifoj: *neŭtr*-a kaj *neŭtral*-a kun iliaj respektivaj derivaĵoj. Laŭ Plena Ilustrita Vortaro, *neŭtr*-a signifas „esti tia, ke ĝi apartenas nek al unu, nek al alia el du kategorioj”: en gramatiko „nek virseksa, nek insekse” (ekz. „ĝi” estas neŭtra pronomo; neŭtra genro en kelkaj lingvoj); en kemio ĝi signifas „nek acida, nek baza” (neŭtra solvaĵo); en elektro „nek pozitiva, nek negativa” (ekz. korpo ne montranta kian ajn elektran fenomenon); en botaniko (kaj ĝenerale en biologio) ĝia senco estas „senseksa”, aŭ „nehavanta difinitan sekson” (ekz. ĉe abeloj, formikoj k.a.). Aliflanke, *neŭtral*-a havas en PIV du ĉefajn signifojn: (i) ne partoprenanta, nek volonta partopreni en diskuto, batalo, milito (neŭtrala lando, teritorio, ktp.), kaj (ii) foresto de kontrasto inter du fonemoj en iu fonetika ĉirkaŭo. La unua signifo implicas ankaŭ la sencon de „senpartia” kaj povas implici tiujn de „indiferenta” aŭ „nedifinita” depende de la kunteksto.

En tiuj naciaj lingvoj, kiuj posedas vortojn derivitajn el la latina *neuter*, *-tra*, *-trum*, oni trovas aŭ ambaŭ vortojn, kiel en Esperanto, aŭ nur unu el ili. Ekzemple, en la itala ekzistas kaj *neutro* kaj *neutrale* kun proksimume la samaj signifoj kiel en Esperanto. Ankaŭ en la angla estas du vortoj – *neuter* kaj *neutral* –, sed la signifoj ne tute respondas al la esperantlingvaj (ekz., en kemio la angla *neutral*, kaj ne *neuter*, estas uzata por indiki „nek acida, nek baza”). La franca havas nur la adjektivon

* Mallongigita teksto de prelego farita dum la 3-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado en Jaca (Hispanio) en julio 1978.

neutre, kiu ĝenerale respondas al ambaŭ Esperantaj vortoj, sed ĝi havas ankaŭ la substantivojn *neutralité* kaj *neutraliste*. Male, la rusa posedas nur la adjektivon *nejtralnyj* kaj la kroata aŭ serba sole *neutralan*, kiuj respondas kaj al *neŭtra* kaj al *neŭtrala* al Esperanto. Simile estas en aliaj naciaj lingvoj.

Tiom pri la ĝenerala signifo de la radiko *neŭtral* -a kaj ĝiaj derivaĵoj en la Internacia Lingvo. Kiel politika principo en la nuntempaj internaciaj rilatoj aŭ kiel institucio de internacia juro ĝi havas ankaŭ aldonajn, apartajn signifojn. La celo de tiu ĉi prelego estas koncize prezenti ilin kaj doni la plej esencajn klarigojn.

2. Resuma Historia Trarigardo

Necesas distingi inter politiko de neŭtraleco en internaciaj rilatoj kaj neŭtraleco aŭ neŭtraliĝo kiel institucio de internacia publika juro. La unua certe estis konata jam en la plej malproksima pasinteco, en la tempo de formiĝado de la unuaj ŝtatoj kaj, tre kredeble, eĉ en la antaŭa periodo de la tria organizo de la socio. La dua ekestis paralele kun la komenciĝoj kaj evoluo de la moderna internacia juro, kvankam ĝia origino sendube troviĝas en la diplomaciaj rilatoj de la antikvaj ŝtatoj. Unu el la esencaj trajtoj de la moderna internacia juro, aĝa proksimume nur kvar jarcentojn, estas ĝia karaktero de juro reguliganta la rilatojn inter suverenaj kaj principe egalrajtaj ŝtatoj, bazita sur ilia eksplicita aŭ implicita komuna konsento. Ĉar tia koncepto de internacia juro, nome juro bazita sur la rekono de suverena egaleco, ne ekzistis en la antikveco, ankaŭ la nocio de neŭtraleco kiel jura institucio ne povis ekzisti. Eĉ kiel eksterjura kategorio neŭtraleco ne estis rekonita. En kazo de milito inter du ŝtatoj, la triaj ŝtatoj devis elekti inter la militantaj flankoj kaj fariĝi aŭ amikoj aŭ malamikoj de unu partio aŭ de la alia. Tio povis okazi per fakta ekmilito je unu flanko kontraŭ la alian, aŭ en malpli radikalaj formoj, ekzemple per materia helpo. Tiu ĝenerale negativa starpunkto rilate neŭtralecon klare speguliĝis en la antikva mitologio, laŭ kiu eĉ la dioj ne estis neŭtralaj, sed partoprenis militojn helpante siajn fidelulojn de la du flankoj kun la celo venkigi ilin.

En la historio ja estas konataj kelkaj kazoj, en kiuj unuopaj ŝtatoj de la antikva epoko klopodis realigi politikon de neŭtraleco, sed la militantaj partioj neniam rekonadis tion.

En la mezepoko la situacio ne multe ŝanĝiĝis, sed en la lasta periodo de tiu epoko la militantaj partioj ne plu rekte devigadis la triajn ŝtatojn elekti inter la du flankoj. Tamen, plu forestis klare formulitaj kaj jure rekonitaj rajtoj kaj devoj en ligo kun la neŭtraleco. Ŝtato povis insisti, ke ĝi ne partoprenadis iun militon, kvankam ĝi helpadis unu flankon per mono, armiloj, trupoj kaj alimaniere kontraŭ la intereso de la alia. Por eviti tion, ĉiam pli vastiĝadis la kutimo konkludi internaciajn traktatojn, kiuj malpermesadis al la partioj de la traktato en kiu ajn formo helpi la malamikojn de la alia partio en kazo de milito kun triaj ŝtatoj.

Meze de la 14-a jc. aperis en Barcelono (Hispanio) la fama privata kolekto de kutimoj kaj reguloj de marjuro, konata kiel *Consolato del Mare*, kiu interalie entenis la principon, ke en milittempo malamikaj varoj en neŭtralaj ŝipoj povas esti konfiskitaj, sed ke varoj apartenantaj al neŭtraluloj en malamikaj ŝipoj devas esti redonitaj al la proprietuloj (Britio aplikis tiun regulon ĝis la Krimea Milito de 1854).

Sub la influo de la menciitaj traktatoj pri neŭtraleco oni komencis ĉiam pli klare distingadi en la jura teorio inter vera kaj falsa senpartiecoj de triaj ŝtatoj en kazo de milito. Tiamaniere la koncepto de neŭtraleco laŭgrade evoluis en la 16-a jc. kaj komence de la 17-a jc., kiam Hugo Grotius publikigis sian faman *De Jure Belli ac Pacis* (en 1625), ĝi jam estis rekonita kiel institucio de internacia juro. Necesis longa plia internacijura praktiko kaj teoria prilaborado antaŭ ol ĝi ricevis la multifacetan nuntempan signifon.

La plua evoluo de la reguloj pri neŭtraleco en la 19-a jc. ŝuldiĝas al tri ĉefaj faktoroj: la starpunkto de Usono rilate neŭtralecon inter 1793 kaj 1818; la konstanta neŭtrality de Svislando kaj Belgio; kaj la t.n. Deklaro de Parizo de 1856, kiu entenis la principon „libera ŝipo – libera varo”, la regulon ke neŭtralaj varoj en malamikaj ŝipoj devas ne esti alproprigitaj, kaj la regulon ke marblokado devas esti efektiva por esti jure rekonita. Tiu evoluo kondukis al du internaciaj konvencioj, kiujn akceptis la Dua Konferenco pri Internacia Juro, okazinta en Hago (Nederlando) en 1907. Unu estis la Konvencio V pri la Rajtoj kaj Devoj de Neŭtralaj Potencoj (Ŝtatoj) kaj Personoj en Surtera Milito; la alia estis la Konvencio XIII pri la Rajtoj kaj Devoj de Neŭtralaj Potencoj en Marmilito. Bedaŭrinde pluraj ŝtatoj, inter kiuj ankaŭ Britio, ne ratifikis la du konvenciojn.

Same kiel multaj aliaj principoj kaj reguloj de internacia juro, ankaŭ la neŭtraleco kiel jura institucio tiom suferis pro krudaj malobservoj dum la Unua kaj Dua Mondmilitoj fare de la agresintoj, ke fine ĝi estis libervole kaj preskaŭ universale forlasita kaj anstataŭigita per kolektiva fortostreĉo defendi sian nacian ekziston kaj individuan liberecon. Tiuj eventoj kaŭzis ŝanĝojn en la konceptado de neŭtraleco kaj necesigis juran reformligon de la principo.

Kiel oni vidas, neŭtraleco kiel internacijura institucio ekzestis kaj evoluis preskaŭ ekskluzive en Eŭropo aŭ lige kun eŭropaj ŝtatoj. Tipaj ekzemploj estas tiuj de Svislando, Belgio, Luksemburgo kaj Aŭstrio.

3. Tipaj Ekzemploj

La Svisa Konfederacio, rekonita en 1648 per la Vestfaliaj Traktatoj, ekde tiam strikte aplikis sian tradician politikon de neŭtraleco. Tio, tamen, ne malhelpis Francion interveni kaj altrudi al Svislando en 1798 novan Konstitucion, laŭ kiu Svislando ĉesis esti konfederacio kaj fariĝis unueca ŝtato sub la nomo Helvetia Respubliko. Krome, Francio ligis ĝin al si per traktato de alianco. Nur en 1814 Svislando denove fariĝis konfederacio kaj la 20-an de marto 1815, dum la Kongreso de Vieno, Britio, Aŭstrio, Francio, Portugalio, Ruslando, Hispanio, Svedio kaj Pruslando subskribis Deklaracion, per kiu la konstanta neŭtraleco de Svislando estis rekonita kaj kolektive garantiita. La 27-an de marto 1815 Svislando aliĝis al la Deklaracio, kaj la Fina Akto de la Kongreso de Vieno (1815) en art. 84 konfirmis tiun juran situacion. Per aparta Akto de la 20-a de novembro 1815, post la definitiva malvenko de Napoleono, la tiamaj grandaj potencoj rekonfirmis ĝin. Tiamaniere la svislanda politiko de neŭtraleco ricevis ankaŭ internacijuran rekonon kaj garantiojn: Svislando fariĝis neŭtrality ŝtato. En internacia juro tio signifas, ke la sendependeco kaj integreco de tia ŝtato estas garantiitaj por la tuta estonteco per internacijura

dokumento, dum, aliflanke, la koncerna ŝtato devontigas sin neniam ekmiliti kontraŭ kiun ajn alian ŝtaton krom en kazo de sindefendo, kaj neniam akcepti tiajn internaciajn obligaciojn (sindevontigojn), kiuj povus nerekte impliki ĝin en milito. Svislando konstruis fortikaĵojn kaj kreis fortan armeon, fakte tutpopolan armeon por defendi sian neŭtralecon. Ekde 1815 ĝi ne nur strikte observis, sed ankaŭ sukcesis observigi sian konstantan neŭtralecon, internacie garantiitan. Dum la milito inter Francio kaj Pruslando ĝi senarmigis en 1871 tutan francan armeon de 80.000 soldatoj, kiuj rifuĝe eniris ĝian teritorion, kaj gardis ilin ĝis la finiĝo de la milito. Dum la du grandaj mondmilitoj Svislando, same tiel, sukcesis resti neŭtrala.

Belgio fariĝis konstante neŭtraligita en la momento de sia estiĝo kiel sendependa ŝtato en 1831. Ĝian neŭtralecon garantiis la kvin grandaj potencoj – Aŭstrio, Britio, Francio, Pruslando kaj Ruslando – per la Londona Traktato de la 15-a de novembro 1831. Aldone, Nederlando rekonis kaj garantiis ĝian neŭtralecon per la Traktato de Londono de la 19-a de aprilo 1839. Kiel konate, en 1914 Germanio, malobservis la neŭtralecon de Belgio kaj invadis ĝian teritorion por ataki Francion. Post tiuj spertoj Belgio postulis ekŝigon el stato de neŭtraligita ŝtato dum la Konferenco de Versailles, kaj la grandaj potencoj konsentis. Per la aliĝo de Belgio al la Pakto de Lokarno (1925) ĝi en ĉiu okazo ĉesis esti neŭtraligita. Sed kiam la ŝanĝita politika situacio en Eŭropo klare indikis, ke la nazia Germanio planas agreson, interalie ankaŭ per la denonco (ekŝiga averto) de la Traktato de Lokarno, ankaŭ Belgio petis esti liberigita de siaj devoj laŭ tiu traktato kaj samtempe donis restriktan interpreton de siaj devoj kiel membro de la Ligo de Nacioj, ĉio-ĉi kun la celo eviti implikiĝon en kazo de milito. Tio estis komprenita kiel reveno de Belgio al konstanta neŭtraleco. Tamen, plian fojon tio ne helpis kaj la naziaj armeoj invadis ĝian teritorion.

Nuntempe Belgio estas unu el la fondintaj membroj de Unuiĝintaj Nacioj kaj ĝi ankaŭ apartenas al la Nordatlantika Alianco, tiel ke ĝi ne plu povas esti rigardata kiel konstante neŭtrala aŭ neŭtraligita.

Similan sorton havis Luksemburgo, kiu estis neŭtraligita per la Traktato de Londono de 1867. Aŭstrio, Britio, Francio, Nederlando kaj Luksemburgo, Italio, Pruslando kaj Ruslando estis la garantiantoj, dum Belgio, pro sia stato de neŭtraligo, ne subskribis la garantion. Same kiel en la kazo de Belgio, en 1914 Germanio invadis Luksemburgon kaj tiel malobservis ĝian neŭtralecon kaj siajn proprajn garantiojn.

La sola grava kazo de neŭtraligo post la Dua Mondmilito estas tiu de Aŭstrio. Rezulte de la Traktato de la 15-a de Majo 1955 Aŭstrio denove fariĝis sendependa ŝtato, kiu devontigis sin entrepreni la necesajn paŝojn, por ke ĝia neŭtraleco estu internacie rekonita. La Konstitucia Leĝo efektive proklamis la konstantan neŭtralecon de Aŭstrio kaj ne nur la grandaj potencoj, sed ankaŭ aliaj ŝtatoj rekonis tion. Tiamaniere Aŭstrio fariĝis neŭtraligita ŝtato.

4. Politikaj kaj Juraj Signifoj

Nun necesas doni kelkajn klarigojn pri la esencaj signifoj de la esprimoj ”politiko de neŭtraleco”, ”neengaĝiĝo”, ”konstanta neŭtraleco”, ”neŭtraligo” kaj ”neŭtralismo” kiel fakaj terminoj en internacia politiko kaj internacia juro.

Politiko de neŭtraleco estas jure nedeviga, fakta aŭ deklarita, senpartieca sinteno de ŝtato rilate ian internacian situacion, malkonsenton aŭ konflikton, inkluzive militon. Ĉar la koncerna ŝtato ne estas jure ligita, ĝi povas ĉiumomente libere ŝanĝi sian politikon kaj preni pozicion neneŭtralan, nome politike apogi iun el la flankoj aŭ subteni difinitan solvon por konflikta situacio. Estas vero, ke en la nuntempaj internaciaj rilatoj funkcias ankaŭ politikaj normoj de interŝtata konduto, bazitaj sur reciprokaj politikaj koncedoj – kaj tiuj normoj povas kelkfoje aplikiĝi al politiko de neŭtraleco – sed la politikaj normoj ne estas normoj de internacia juro. Tial unuflanka ŝanĝo de la politiko de neŭtraleco ne estas malobservo de internacia juro.

Kvankam jure nedeviga, tamen la politiko de neŭtraleco en kazo de milito devas esti respektata de la militantaj partioj kaj kauzas internacijurajn sekvojn dum la koncerna ŝtato mem observas tian politikon. Svedio sukcesis respektigi sian politikon de neŭtraleco dum la Dua Mondmilito, sed Norvegio, Danlando, Nederlando, Belgio k.a. ŝtatoj, kiuj tuj komence de la milito, en septembro 1939, deklaris sian neŭtralecon kaj oficiale komunikis la deklaron al la militantaj ŝtatoj, ne sukcesis. Alia afero estas la demando, ĉu la politiko de neŭtraleco estas etike pravigebla kaj prudenta en kazo de preskaŭ universala milito, en kiu la agresa flanko, se sukcesa, komplete detruos la ekziston mem de la alia flanko kaj facile englutos ankaŭ ĉiujn neŭtralulojn.

Post la Dua Mondmilito formiĝis aparta tipo de politiko de neŭtraleco, konata nur kiel „*neengaĝiĝo*”. Ĝia ĉefa iniciatinto kaj nuna apoganto estas la Prezidento de SFR Jugoslavio, J. Broz-Tito, kiu sukcesis arigi ĉ. tiu koncepto konsiderindan nombron da ŝtatoj. La neengaĝiĝo rilatas nur al la du grandaj politikaj-militaj blokoj gvidataj de la du superpotencoj: tiu de la Nordatlantika Traktato ĉepinte kun Usono, kaj tiu de la Varsovia Pakto sub la rego de Soveta Unio. Pro la heterogeneco de tiu grupo de ŝtatoj, ilia fakta politiko koncerne multajn demandojn de la monda politiko, eĉ rekte tuŝantajn la neengaĝiĝon, ofte diverĝas kaj kaŭzas problemojn. Ekzemple, Kubo apartenas al tiu grupo, sed ĝia fakta milita interveno en Afriko estas klare kontraŭa al la eksplicite deklaritaj principoj de neengaĝiĝo. Ankaŭ neengaĝiĝo, kiel aparta formo de iaspeca neŭtraleco, en multaj kazoj fakte malneŭtrala neŭtraleco, estas jure nedeviga, kaj en kiu ajn momento neengaĝita ŝtato povas forlasi la grupon kaj aŭ aliĝi al unu el la blokoj aŭ konduki sian propran, sendependan politikon de neŭtraleco.

Neŭtralismo estas nova termino, enkondukita antaŭ nelonge, per kiu kelkaj politikistoj kaj politiksciencaj specialistoj nomas pli nuancitan neengaĝiĝon. Ĝi indikas pli longdaŭran politikon de iu ŝtato neimplikiĝi en kiun ajn konflikton aŭ defendan aliancon.

La politiko de neŭtraleco povas konduki al formala unuflanka jura akto, per kiu ŝtato oficiale deklaras sian konstantan neŭtralecon. Plej taŭge tio estas farata per regulo en la konstitucio. Aŭstrio, kiel menciite, per Konstitucia Akto deklaris sian konstantan neŭtralecon. Alia postmilita kazo estas tiu de Laoso, kiu per unuflanka Akto pri Neŭtraleco de la 9-a de julio de 1962 deklaris sin konstante neŭtrala kaj devontigis sin ne permesi al kiu ajn lando la uzon de la teritorio de Laoso por interveni

en la hejmajn aferojn de aliaj landoj. Nur poste, per la Dektri-Potenca Deklaracio de Ĝenevo de la 23-a de julio 1962, la 13 ŝtatoj (inter kiuj P.R. Ĉinio, Usono, Soveta Unio, Hindio, Britio kaj Francio) deklaris, ke la suvereneco, sendependeco, neŭtraleco, unueco kaj teritoria integreco de Laoso estas garantiitaj kaj estos respektataj. Per tiu Deklaracio Laoso fariĝis neŭtraligita ŝtato same kiel Aŭstrio en 1955.

Troviĝas specialistoj pri internacia juro, kiuj opinias, ke unuflanka deklaro pri konstanta neŭtraleco, distinge de neŭtraligo, ne havas per si mem efikon laŭ internacia juro. Tiu opinio ne ŝajnas ĝusta. Deklaro pri konstanta neŭtraleco, se ĝi estas entenata en konstitucia akto aŭ alia jura dokumento, en ĉiu okazo estas jure valida laŭ la interna juro de la koncerna ŝtato. Tia deklaro neniel kontraŭas kiun ajn principon aŭ normon de internacia juro. Eĉ pli, ĝi estas konforma al suvereneco kiel unu el la fundamentaj principoj de la nuntempa internacia juro. Ĝi estas ankaŭ konforma al la sistemo de kolektiva sekureco jure difinita en la Ĉarto de UN. Se unu el la ĉefaj celoj de UN estas „konservi la internaciajn pacon kaj sekurecon” kaj tiucele apliki efikajn kolektivajn rimedojn por preventi kaj forigi minacojn kontraŭ pacon, subpremi ĉiun ajn agon de agreso kaj ĝustigi aŭ solvi internaciajn disputojn aŭ situaciojn, kiuj povus konduki al rompo de paco, tiam, evidente, ŝtato povas kaj en sia intereso kaj samtempe en la intereso de paco deklari sian konstantan neŭtralecon. En tiaj kondiĉoj la deklaro pri konstanta neŭtraleco devas esti rigardata kiel jure deviga ne sole laŭ la interna juro de la ŝtato, sed ankaŭ laŭ internacia juro. Tiun interpreton apogas ankaŭ la fakto, ke tia ŝtato, eĉ pli forte ol ŝtato kondukanta nur politikon de neŭtraleco, havas ĉiujn rajtojn kaj devojn de neŭtrala ŝtato laŭ internacia juro en kazo de milito.

Komprenible, el vidpunkto de internacia juro eĉ pli forta estas *neŭtraligo*, t.e. konstanta neŭtraleco garantiita de la grandaj potencoj kaj de aliaj ŝtatoj. Ĝi sendube estas institucio de internacia juro. Tial, kia ajn malrespekto de la reguloj pri neŭtraligo ĉu fare de neŭtraligita ŝtato, ĉu fare de la garantiantoj kaj, tre verŝajne, ankaŭ fare de aliaj ŝtatoj, signifas malobservon de la koncernaj reguloj de internacia juro aldone al eventuala malobservo de pliaj principoj kaj normoj de tiu jura branĉo.

5. Konkludo

El ĉio dirita almenaŭ la jenaj tri gravaj konkludoj povas esti faritaj:

(1) Neŭtraleco kaj neŭtraligo en la klarigitaj sencoj plu estas rekonitaj en la nuntempaj interŝtataj rilatoj kaj ankoraŭ kaŭzas difinitajn internacijurajn sekvojn, kvankam la aktuala valoro de tiuj institucioj konsiderinde ŝanĝiĝis kompare kun la signifo, kiun ili havis en la 19-a jarcento. Dum en la pasintaj jarcentoj kaj komence de la 20-a ĝis 1914 oni fidis, ke neŭtraleco kaj neŭtraligo estos respektataj, la spertoj de la du lastaj mondmilitoj montris, ke ili ne donas efikan protekton kontraŭ agreson, se la malobservo helpas la militajn celojn de la agresanto. Eĉ pli krudajn kaj pli ĝeneralajn malobservojn oni povas atendi fare de la agresita flanko en kazo de plia universala, totaleca milito.

(2) El vidpunkto de la mondaj paco kaj sekureco, la neŭtralecon kaj neŭtraligon oni neniel povas juĝi abstrakte, sed nur konkrete, prenante en konsideron la faktan

politikan situacion. Ekzemple, la konstanta neŭtraleco kaj neŭtraligo de Svislando montriĝis utila eĉ dum la du grandaj mondmilitoj ankaŭ tial, ĉar ĝuste la fakta kaj internacijura pozicio de tiu ŝtato ebligis kontaktojn inter la militantaj partioj. Same pozitiva, almenaŭ en tempo de paco, estas la kreo de neŭtraligitaj bufroŝtatoj inter la grandpotencaj blokoj, kiel en la kazo de Aŭstrio. Aliflanke, politiko de neŭtraleco aŭ deklaro de konstanta neŭtraleco en situacio evidente kondukanta al universala milito estas fakte nur kuraĝigaj por la agresaj fortoj, do negativaj el vidpunkto de la mondaj paco kaj sekureco. Se neŭtraligita ŝtato pro siaj juraj obligacioj ne rajtas ŝanĝi sian pozicion dum ĝi mem estas neatakita, la neŭtralaj aŭ neengaĝitaj landoj povus kaj devus decidiĝi, ankaŭ en sia propra intereso, favore al la potencialaj aŭ eĉ aktualaj viktimoj de agreso. Tio povus savi la pacon aŭ, se ĝi jam estas rompita, kontribui al pli rapida ĉesigo de la milito. En ĉiu okazo, neŭtraleco estas neniel pravigebla en serioze minacaj konfliktaĵoj inter la agresantoj kaj iliaj viktimoj, inter la atakantoj kaj la sindefendantoj, inter la progresaj fortoj de demokratio kaj la sklavigaj de totalismo. Tio, cetere, estas tute konforma ne nur al la Ĉarto de UN, sed ankaŭ al la respektivaj normoj de la nuntempa internacia juro kaj al la bazaj principoj de internacia moralo, kiuj devas aplikiĝi, se la sekureca sistemo de UN kolapsas.

(3) Se ŝtato deziras konduki politikon de neŭtraleco, ĝi mem decidas pri la sfero, amplekso, grado kaj formo de sia neŭtraleco. Tia ŝtato, same kiel neŭtraligita ŝtato, rajtas kaj devas utiligi ĉiujn permesitajn rimedojn, inkluzive kiel eble plej fortan armeon, por protekti sian neŭtralecon en tempo de paco kaj por sin defendi en kazo de milito. Neŭtraleco ne signifas, nek iam signifis, rezignacian pasivecon rilate la proprajn interesojn, ankoraŭ malpli rezignon pri sindefendo.

La supraj instruaj konkludoj estas adekvate aplikeblaj al neregistaraj organizaĵoj bazitaj sur la principo de partipolitika neŭtraleco.

SOVETIAJ KONSTITUCIOJ 1918–1977 EN LA LUMO DE KONFLIKTO INTER MARKSISMA IDEOLOGIO KAJ RUSLANDA/SOVETIA REALAĴO

1. Precizigo pri terminoj

Granda konfuzo regas en la uzo aŭ misuzo de terminoj koncerne marksismon ĝenerale kaj unuopajn marksismajn konceptojn kiel socialismo, komunismo, „diktaturo de la proletaro”, „socialisma internaciismo” kaj multaj aliaj. USSR kaj la landoj kun la vorto „socialisma” en la respektivaj oficialaj nomoj, aŭ eĉ sen tiu kvalifika atributo, sed rigardataj kiel socialismaj, estas identigitaj kun marksismo kaj akceptataj kiel realigoj de la marksisma imago de socialismo.

La okcidenta gazetaro, radio kaj televido ofte sendistinge uzas la esprimojn „marksistaj geriloj”, „marksistaj revoluciuloj” k.s. por armitaj grupoj da ribeluloj aŭ eĉ por bandoj da armitaj teroristoj, kiuj kutime havas nenion komunan kun marksismo kaj kies membroj, ofte duonanalfabetoj, plej verŝajne neniam legis Marx kaj Engels. Similaj terminologiaj eraroj estas kelkfoje farataj ankaŭ sur akademia nivelo. Eĉ la esprimo „komunismaj ŝtatoj” estas trovebla en alie erudicie skribitaj verkoj kaj artikoloj pri USSR, kvankam el marksisma vidpunkto ĝi estas evidenta termina kontraŭdiro: aŭ ŝtato ekzistas – kaj en tiu kazo ĝi ne povas esti „komunisma”, ĉar ŝtato estas klasa kategorio – aŭ ekzistas ia senklasa komunisma socio, kaj en tiu kazo ĝi ne povas esti organizita kiel ŝtato.

La erara apliko de marksisma terminologio en multaj kazoj reflektas aŭ kompletan ignoradon aŭ almenaŭ foreston de pli profundaj scioj, sed en multaj kazoj, speciale en tiuj de la soveta kaj orienteŭropaj oficialaj doktrinoj pri ŝtato kaj juro, tio estas farata intence kaj estas ligita al krudaj distordoj de diversaj aspektoj de marksismo celantaj pravigi la ekziston de tiuj ŝtatoj kiel kvazaŭe „socialismaj” en la marksisma senco de la vorto kaj kaŝantaj la totalecan karakteron de la respektivaj reĝimoj.

Tiele, se oni esceptas la kreskantan nombron da seriozaj klopodoj reekzameni la originalan koncepton de Marx kaj Engels pri la socio, marksismo, speciale ĝia doktrino pri ŝtato kaj juro, transformiĝis en falsajon, utiligatan de ambaŭ ekstremaj flankoj en la nuntempaj politikaj luktoj.

Dum la apogantoj de sovetismo¹ laŭdas tiun ĉi „marksismon”, kiu estas tre malproksima de la originala marksismo, kiel ideologian inspiron por la aktualaj ekonomiaj, sociaj kaj politikaj strukturoj de siaj ŝtatoj kaj por ĉiuj iliaj atingoj, kelkaj el ili realaj, la oponantoj de sovetismo kulpigas la saman neekzistantan „marksismon” por la ekonomiaj malsukcesoj, malaltaj vivniveloj, foresto de demokratiaj liberecoj, kontraŭleĝecoj kaj ĉiuj aliaj malbonoj en tiuj t.n. „socialismaj” ŝtatoj, kiel ankaŭ por multaj agoj de ordinara banditismo kaj terorismo en aliaj landoj.

Ne estas la celo de tiu ĉi artikolo pridiskuti tiujn terminologiajn demandojn kaj aliajn diskuteblajn aspektojn de marksismo. Ankaŭ ne estas la celo kritiki aŭ defendi marksismon kiel tian aŭ ĝiajn unuopajn konceptojn kaj tezojn. Tamen, ĉar la identigo de marksismo kaj „socialismo”, t.e. sovetismo, kreis ĥaosan konfuzon de ideoj kaj ombrigis sciencajn diskutojn pri multaj demandoj, estas utile emfazi tuj en la komenco, ke en tiu ĉi artikolo, same kiel en ĉiuj aliaj libroj kaj studoj de la aŭtoro, *marksismo signifas la originalan koncepton pri la socio kiel entenata en la verkoj de Marx kaj Engels*.

Estas vero, ke troveblas malakordoj inter Marx kaj Engels rilate unuopajn konkretajn demandojn, kiel ankaŭ iuj malsamecoj, eĉ kontraŭdiroj, en nombro da asertoj faritaj de ĉiu el ili aparte en diferencaj periodoj de ilia aktivado kaj en malsamaj cirkonstancoj. Tiuj diferencoj estas sendube tre gravaj por profunda studo kaj plena kompreno de marksismo, sed ili ne tuŝas tiujn fundamentajn marksismajn konceptojn, kiuj estas esencaj por la diskutata temo, nome por analizo de la malakordoj inter la originala marksisma ideologio sur la kampo de ŝtato kaj juro kaj la ruslanda, poste sovetia, realaĵo kiel reflektitaj en la konstitucioj 1918–1977.

2. Fundamentaj marksismaj tezoj pri ŝtato kaj juro

Antaŭ ol ekzameni la demandon ĉu Ruslando de 1917 estis matura por socialisma revolucio en la marksisma senco de la vorto, necesas koncize pritrakti la fundamentajn marksismajn tezojn pri ŝtato kaj juro, inkluzive konstitucian juron. Ili povas esti mallonge resumitaj – kun ĉiuj rezervoj necese implicitaj en tiaj resumoj² – en la sekvantaj 10 punktoj:

(i) Ŝtato kaj juro apartenas al t.n. fenomenoj de superstrukturo, kies reala bazo estas la ekonomia strukturo de la socio (infrastrukturo).

(ii) Ŝtato kaj juro estas klasaj kategorioj. Ili samtempe formiĝis rezulte de la unuaj, plej primitivaj, laboriloj kaj ilia alproprigo fare de la pli fortaj. Rezulte okazis divido de la socio en malamikajn, antagonismajn klasojn de tiuj, kiuj proprietas, kaj de tiuj, kiuj estas senigitaj de la rimedoj de produktado: la ekspluatantoj kaj ekspluatatoj.

1. Nuntempe, kiam eĉ multaj komunistaj partioj aperte kontraŭas la sovetan regadsistemon, la termino „sovetismo” ŝajnas al mi pli adekvata ol „socialismo” aŭ „komunismo”. Tiun terminon mi enkondukis jam antaŭ pluraj jaroj en miajn verkojn kaj studojn pri la sovetaj ŝtato kaj juro.

2. Pri la soveta kaj jugoslavia teoriaj interpretadoj de la marksisma koncepto pri ŝtato kaj juro v. I. Lapenna, *State and Law: Soviet and Yugoslav Theory* (London: the Athlone Press, 1964; kaj New York: Yale University Press, 1964). Por la soveta koncepto de internacia juro v. I. Lapenna, *Conceptions Sovietiques de Droit International Public* (Paris: Editions A. Pedone, 1954).

(iii) La maniero de produktado en ĉiu ajn historia epoko determinas *en la lasta analizo*, la karakteron de la klasa divido de la socio: sklavproprietuloj kaj sklavoj, feŭda nobelaro kaj servutuloj, kapitalistoj kaj laboristoj. Ĝi ankaŭ determinas ĉiujn fenomenojn de la superstrukturo, kiuj siavice, kune kun aliaj faktoroj (kiel geografia pozicio, historio kaj kutimoj, restaĵoj de antaŭaj superstrukturoj en la konscio), influas la ekonomian bazon. Temas pri konstanta reciproka interagado, sed plej laste la ekonomia strukturo estas decida³.

(iv) Al ĉiu stadio en la evoluo de la produktofortoj respondas difinitaj produktorilatoj. Ĉar la evoluo de la produktorimedoj (laboriloj, maŝinoj, energio, ktp.) ne dependas de la homa volo kaj tial ne povas esti laŭplaĉe ŝanĝitaj, ankaŭ la produktorilatoj, t.e. la klasrilatoj, ne povas esti radikale modifitaj dum ili respondas al tiuj produktofortoj, kvankam en la kadro de tiu ĝenerala determiniteco ekzistas elektoeblecoj. La du troviĝas en ekvilibro, sed ekvilibro entenanta kontraŭdirojn pro la klasa karaktero de la socio.

Kiam la produktofortoj, pro novaj inventoj, plupasas la malnoviĝintajn, sed ankoraŭ ekzistantajn, produktorilatojn, la baza dialektika kontraŭdiro atingas sian kulminon. La antagonismo solviĝas per socia revolucio – ne necese perforta – kaj nova ekonomia-socia formacio naskiĝas. Reestabliĝas la dialektika ekvilibro inter la produktofortoj kaj produktorilatoj ĝis la tempo, kiam la plua evoluo de la produktofortoj necesigos novan revolucionan ŝanĝon de la produktorilatoj.

Jen kion Marx skribis pri tiu ĉi afero, esence grava por la pritraktata temo: „Neniu socia ordo kiam ajn pereas antaŭ ol evoluis *ĉiuj produktofortoj*, por kiuj ankoraŭ estas spaco en ĝi; kaj novaj, pli altnivelaj produktorilatoj *neniam aperas antaŭ ol la materiaj kondiĉoj por ilia ekzisto maturiĝis en la utero de la malnova socio mem*. Tial la homaro ĉiam starigas antaŭ sin nur tiajn taskojn, kiujn ĝi povas solvi; pro tio, se oni rigardas al la afero de pli proksime, oni ĉiam trovos, ke la tasko mem ekestas nur kiam la materiaj kondiĉoj por ĝia solvo jam ekzistas aŭ troviĝas en procezo de formiĝo”⁴ (nia emfazo).

La supra citaĵo enhavas la kvintesencon de la historia materialismo kaj resumas la marksisman komprenon pri la antaŭnecesaĵoj kaj kondiĉoj por revolucia transformiĝo de difinita socio en novan sur pli alta nivelo.

(v) Ekzistas tri tipoj de ŝtato kaj juro, reflektantaj la tri fundamentajn sociajn-ekonomiajn formaciojn bazitajn sur privata proprieto de la produktorimedoj: la sklavproprieta tipo, la feŭda kaj la burĝa-kapitalista, ĉiu el ili markanta progresan epokon en la ekonomia evoluo de la socio. Ĉiu ŝtato estas potencinstrumento en la manoj de la reganta klaso, dum juro, nedisigeble ligita al la ŝtato, estas la tuto de kompulsaj (devigaj) reguloj, sankciitaj de la ŝtato kaj esprimantaj la volon de la reganta klaso kiel determinita de la maniero de produktado. Tio signifas, ke la reganta klaso ne povas krei juron tute arbitre, laŭ sia plaĉo. Juro unuavice respondas al la interesoj de la reganta klaso, sed samtempe ĝi respondas al la maniero de produktado *en la periodoj de ekvilibro inter la produktofortoj kaj la produktorilatoj*

3. V. la leteron de F. Engels de la 25-a de januaro 1894 al W. Borgius en K. Marx kaj F. Engels, *Selected Works in One Volume* (London: Lawrence and Wishart, 1973), p. 694.

4. *Op. cit.* noto 3, p. 182.

(*klasaj rilatoj*), *kiujn ĝi mem siavice fortikigas*. En tiu ĉi senco juro respondas „al la ĝeneralaj ekonomiaj kondiĉoj”, kiel Engels skribis en sia letero de la 22-a de oktobro 1890 al C. Schmidt, kaj tial ankaŭ al la ĝeneralaj interesoj de la socio.

(vi) Unu el la bazaj antagonismoj en matura kapitalismo estas la grandega centriĝo de ĉiuj rimedoj de produktado en la manoj de la kapitalistoj kaj la egale grandega, daŭre kreskanta centriĝo de la laboristaj amasoj en gigantaj fabrikoj kaj entreprenoj. Tiu ĉi kontraŭdiro inter la socia karaktero de produktado kaj la privata alproprigo de la fruktoj de la laboro fare de la proprietuloj de la produktorimedoj konstituas la fundamentan aspekton de la kontraŭdiro inter la novaj, alte evoluintaj produktorimedoj, unuflanke, kaj la malnoviĝintaj klasrilatoj en kapitalismo aliflanke, kaj postulas sociigon de la produktorimedoj. En *La Kapitalo* Marx konkludis:

„Centriĝo de la produktorimedoj kaj sociigo de laboro fine atingas punkton, kie ili fariĝas neakordigeblaj kun sia kapitalisma tegumento. Tiu tegumento estas krevigita. La mortsonoro de la kapitalista privata propio sonas. La ekspropriigintoj estas ekspropriigataj”⁵.

(vii) Al la internacia klasa solidareco de la burĝaro devas esti kontraŭstarigita la internacia klasa solidareco de la proletaro. La „proleta internaciismo” estas unu el la plej esencaj elementoj de la marksisma koncepto pri socialismo kaj komunismo. La finaj vortoj de la *Komunista Manifesto*, „Laborantaj homoj de ĉiuj landoj, unuigu!” ne estas ia malplena slogano formulita por iu provizora politika celo, sed reflektas fundamentan ideon de marksismo, sen kiu la malapero de ŝtato-juro kaj la formiĝo de senklasa monda socio ne estas kompreneblaj.⁶

(viii) Kiam ĉiuj menciitaj kondiĉoj ekzistas, la situacio estas matura por socialisma revolucio, kiu detruas la burĝajn ŝtatan aparaton kaj juron, sociigas ĉiujn produktorimedojn unuavice tra laŭgrada naciigo, kaj formas la socialismajn ŝtaton kaj juron de la t.n. transira periodo (socialismo aŭ unua stadio de komunismo) kondukanta tra la formortado de ŝtato kaj juro en plenan komunismon, en kiu ŝtaton kaj juron anstataŭigos „la administrado de aferoj kaj la direktado de la produktoprocezoj”⁷.

(ix) La ŝtato de la transira periodo „povas esti nenio alia ol la *revolucia diktaturo de la proletaro*”⁸, t.e. „diktaturo” efektivigata de la laboristaj amasoj. Laŭ la originala marksismo, „diktaturo de la proletaro” ne estas la malo de politika demokratio, sed la malo de diktaturo de la burĝaro en kapitalisma ŝtato, kiu „estas nenio alia ol maŝino de subpremado de unu klaso fare de la alia, en demokrata respubliko ne malpli, ol en monarkio”⁹. Ĝi estas tiel, ĉar la burĝaro proprietas la produktorimedojn kaj utiligas la ŝtaton kaj juron por siaj klasaj interesoj eĉ kiam

5. K. Marx, *Capital* vol. i (Moscow: Foreign Languages Publishing House, 1959, publikigita en Britio de Lawrence and Wishart), p. 763.

6. Iom pli detale pri la marksisma „prolet internaciismo” distinge de la nuntempa soveta „socialisma internaciismo”, precipe en rilato al la nuntempa Esperanto-Movado, v. I. Lapenna, *Hamburgo en Retrospektivo*, p-oj 26–29 kaj aliloke.

7. F. Engels, *Anti Dühring* (London: Lawrence and Wishart, 1943), p. 309.

8. *Kritiko de la Programo de Gotha* en K. Marx kaj F. Engels, *Selected Works in Two Volumes*, vol. ii (Moscow, 1951), p. 3.

9. Enkonduko, K. Marx, *The Civil War in France* (Peking: Foreign Languages Press, 1966), p. 17.

– pro la stabileco de la ekonomia-socia ordo en difinita periodo (v. punkton (v) supre) – politika demokratio estas ebla. Tiu ĉi „burĝa diktaturo” de la minoritato estas anstataŭigita per la „proleta diktaturo” de la majoritato, necese grandega en alte evoluinta industria socio, kaj tial „venkas la batalon de demokratio”¹⁰. Estas klare, ke por Marx kaj Engels la esprimo „diktaturo de la proletaro” havas nenion komunan kun la kutima senco de la vorto „diktaturo”, ankoraŭ malpli kun la totaleca stalinisma regado de unu homo aŭ grupeto da homoj super la amasoj.

(x) Diference de ĉiuj aliaj tipoj de ŝtato, kies celo estas konservi kaj akceli la interesojn de la ekspluatantoj kontraŭ la ekspluatataj amasoj, la socialisma ŝtato estas batalilo kontraŭ la restaĵojn de la klasa socio kaj rimedo por prepari la kondiĉojn de transiro en senklasan komunismon. Tial la ŝtato de la transira periodo kaj ĝia juro komencas formortadi tuj post la naskiĝo kaj malaperas por ĉiam samtempe kun la likvido de ĉiuj klasrestaĵoj:

„La intervenado de la ŝtata aŭtoritato en sociajn rilatojn fariĝas superflua en unu sfero post la alia, kaj fine ĉesas per si mem ---. La ŝtato ne estas abolita, ĝi formortas.”¹¹

Ne enirante en la diskuton pri la scienca valoro de la marksisma materialisma doktrino pri ŝtato kaj juro, bazita grandparte – almenaŭ rilate la estontan socion – sur tro optimisma ideologio de la homa naturo, ĝi devas esti prenita en konsideron kiel decida ideologia faktoro en la evoluo de la sovetia konstitucio kaj de la sovetia juro ĝenerale.

3. Ruslando de 1917

Marx kaj Engles atendis, ke socialisma revolucio eksplodos en landoj maturaj por tia revolucio, t.e. en unu el la alte evoluintaj industriaj landoj, plej verŝajne en Anglio, aŭ en pluraj el ili samtempe surbaze de „proleta internaciismo”, kaj ke ĝi rapide disvastiĝos tra la mondo en ĉiuj civilizitaj landoj. Marx tute ne ekskludis la eblecon de paca revolucio en tiaj alte evoluintaj landoj kiel Usono, Anglio kaj Nederlando. Tio ne okazis. La Oktobra Revolucio gvidata de Lenin kaj la bolŝevistoj sub la ruĝa standardo de marksisma socialismo okazis en lando, pri kiu Engels plej firme skribis en sia konata respondo al P. N. Ťaĉev, ke ĉiu ajn, kiu kredas je tiu ebleco, devus lerni la abocon de socialismo¹².

Kial Engels neis la eblecon de revolucio en Ruslando? Ĉar en tiu tempo Ruslando estis postrestinta duonfeŭda agrikultura lando, plejparte analfabeta, nur ĉe la komenciĝo de industria evoluo, kaj tial kun tre malforta industria proletaro kaj eĉ pli malforta kapitalista klaso, kiu, aldone, ĉefe dependis de eksterlanda kapitalo. Eĉ post la Reformo de 1861, kiu liberigis ĉ. 20 milionojn da servutuloj, Ruslando restis ĝis la fino de 1917 lando kun primitiva agrikulturo kaj neevoluinta industrio. El la tuta

10. *Ibid.*

11. *Op. cit.* en noto 7, p. 309.

12. P. W. Blackstock & B. F. Haselitz (eds.), Karl Marx and Friedrich Engels: *The Russian Menace to Europe* (Glencoe, Illinois: The Free Press, 1952), p. 205.

loĝantaro de iom pli ol 174 milionoj en 1913, 86,8 %, t.e. pli ol 151 milionoj, vivis en kamparaj regionoj kaj 74,6 % de tiuj ĉi, t.e. pli ol 112 milionoj, estis engaĝitaj en pure agrikulturaj aktivadoj, dum nur 9,6 % laboris en industrio, 3,8 % en komerco, 1,6 % en transporto, 1,4 % en ŝtata servo kaj 4,6 % „private”, kio (kune kun la mankantaj 4,4 %) verŝajne inkluzivis diversajn profesiojn kaj okupojn.¹³

Kvankam la rusa genio produktis multajn elstarajn sciencistojn, poetojn, verkistojn, komponistojn, muzikistojn kaj artistojn, la ĝenerala kultura nivelo de la amasoj restis tre malalta malgraŭ la ioma progreso farita en kelkaj jardekoj antaŭ la Oktobra Revolucio. Laŭ statistiko de 1897, 64,2 % de viroj kaj 87,6 % de virinoj estis analfabetoj eĉ en la eŭropa parto de Ruslando, por ne paroli pri la ceteraj. Tio certe ne estis homa materialo, el kiu povus esti kreitaj specialistoj kaj kvalifikitaj laboristoj, necesaj por rapida industria evoluo. Samtempe la mortokvanto – tiu nedisigebla akompananto de mizero kaj analfabeteco – estis tre alta: 29,4 % je 1.000 loĝantoj, kompare kun 24,1 en Aŭstrio-Hungario, 21,8 en Italio, 20,4 en Usono, 19,8 en Germanio, 19,6 en Francio kaj 16,0 en Britio. Tamen, same kiel en aliaj subevoluintaj landoj – tiamaj, kaj nunaj – malgraŭ tiu alta mortokvanto, la loĝantaro plu kreskis nombre. Grava estis ankaŭ la multnacia konsisto de la Rusa Imperio: ĉ. 200 nacioj kaj etnoj, tre malsamaj laŭ grandeco, kultura nivelo, lingvo, religio, kutimoj kaj vivmaniero.¹⁴

Evidente, Rusio de 1917 ne estis lando, en kiu „ĉiuj produktfortoj de kapitalismo, por kiuj ankoraŭ estas spaco por ĝi”, evoluis ĝis tiu grado, ke ĝi devis pereji (v. punkton (v) en la antaŭa sekcio). Ĉu, do, ĝi estis matura por socialisma revolucio en la marksisma senco de la vorto? Certe ne. Lenin mem implicate rekonis tion, kiam la realaĵo devigis lin falsi la fundamentan marksisman koncepton pri la materiaj kondiĉoj kaj antaŭnecesajoj por socialisma revolucio. La koncerna parto de lia parolado de la 7-a de marto 1918 dum la Sepa Partia Kongreso tekstas:

„La burĝa revolucio frontis nur unu taskon: forbalai, forĵeti, detruji ĉiujn katenojn de la antaŭa socia ordo. Plenuminte tiun taskon, ĉiu burĝa revolucio plenumas ĉion, kio estas postulata de ĝi: ĝi rapidigas la kreskon de kapitalismo. *La socialisma revolucio estas entute malsama pozicio. Ju pli postrestinta estas la lando, kiu, dank’ al la zigzagoj de la historio, kiel la unua komencis la socialisman revolucion, des pli malfacile estas por tiu lando pasi de la malnovaj kapitalismaj rilatoj al socialismaj rilatoj*”¹⁵ (nia emfazo).

La Oktobra Revolucio estis sukcesa ne tial, ĉar „socialismaj rilatoj”, kiuj apenaŭ ekzistis, postulis novan, socialisman, ekonomian, politikan kaj juran sistemon por liberigi la ekonomian ekspansion el la „ĉenoj” de kapitalismo, sed tial, ĉar escepte gravaj militkondiĉoj kaŭzis la kolapson de la malnova despoteca

13. *The Russian Year Book for 1915* (ed. by N. Peacock) kiel citita en M. Miller, *The Economic Development of Russia 1905–1914* (London: Frank Cass & Co.L td., 1967), p. 30.

14. Laŭ la soveta *Komsomolskaja Pravda* de la 6-a de januaro 1971, en 1926 ekzistis 196 nacioj kaj etnoj en USSR. Tiu nombro iom post iom malgrandiĝis – laŭ oficialaj eksplikoj ĉefe pro „kunfandiĝoj” de malpli grandaj naciaj grupoj kun nacioj rilatantaj al ili per teritorio, lingvo kaj kulturo – kaj en 1969 ekzistis entute nur 109 nacioj, etnoj kaj etnaj grupoj (110 konforme al la statistiko de 1959).

15. V. I. Lenin, *Selected Works in Three Volumes*, vol. ii (Moscow: Progress Publishers, 1975), p. 528.

kaj koruptita ŝtata aparato kaj tiel ebligis al Lenin kaj al lia relative malgranda (ĉ. 80.000 membroj), sed bone organizita kaj disciplinita, Bolŝevista Partio ekkaperi la potencon.

Fakte, kvankam la sloganoj estis kaj plu estas marksismaj, tre baldaŭ la revolucio generis ne socialismon, sed novan formon de ŝtata kapitalismo, formale maskita kiel marksisma socialismo. Tiu baza kontraŭdiro speguliĝis en ĉiuj sovetiaj konstitucioj.

4. Konstitucio de RSFSR de 1918

La Konstitucio (Fundamenta Leĝo) de la Rusa Socialisma Federacia Soveta Respubliko (RSFSR) estis akceptita de la Kvina Tutrusa Kongreso de Sovetoj la 10-an de julio 1918 kaj ekvalidis la saman tagon.

Neniu el la sovetiaj konstitucioj estis tiel forte influita de la marksisma ideologio, jam grave reviziita de Lenin, kiel tiu de 1918. Ĝiaj bazaj principoj estis: „diktaturo de la proletaro”, esprimita tra la sovetoj kiel leninisma versio de la Pariza Komunumo de 1871; unueco de la ŝtata povo distinge de la „burĝa” apartigo de la povoj (leĝdona, ekzekutiva kaj juĝa); ŝtata propio de la produktorimedoj; federacia organizo de la ŝtato kun la rajto de secesio, kaj regiona aŭtonomio; „demokrata centralismo”; internacia solidareco de la laboristaro („proleta internaciismo”).

Kompreneble, la Komunista Partio (b) estis la „gvidanta forto” kaj la politika polico (tiutempe ĈEKA, poste GPU, ktp., nun KGB), ne menciita en la Konstitucio, ĝia ĉefa instrumento de teroro. Formale, kun la escepto de la „diktaturo de la proletaro”, la samaj principoj restis bazaj en ĉiuj postaj konstitucioj, sed ilia apliko en la ŝtata-partia praktiko, sklavece sekvata per teoriaj eksplikoj kaj pravigoj de la doktrino, konstante ŝanĝiĝadis kaj ricevadis novajn sencojn.

La nova sistemo de povo estis bazita sur la misgvida principo de „demokrata centralismo”, firme ligita al la principo de „duobla subordigo” t.e. subordigo kaj respondecado de ĉiu pli malalta ekzekutiva instanco kaj al la soveto, kiu elektis ĝin, kaj al la pli alta ekzekutiva instanco en la hierarkia piramido de povo ekde la lokaj sovetoj (vilaĝaj kaj urbaj) kaj iliaj ekzekutivaj komitatoj ĝis la Kongreso de Sovetoj, ĝia Centra Ekzekutiva Komitato (CEK), la Prezidio de CEK, kaj la Soveto de Popolaj Komisaroj, konsistanta el 18 komisaroj kun Lenin kiel prezidanto (funkcio ne antaŭvidita en la Konstitucio).

Ĉar la Kongreso de Sovetoj, kontraŭe al art. 26 de la Konstitucio preskribanta almenaŭ 2 sesiojn jare, kunvenadis nur unu fojon jare, dum la CEK entute ne kunvenis inter julio 1918 kaj februaro 1920, estas klare ke eĉ en tiu tre frua stadio de la sovetia ŝtato la Soveto de Popolaj Komisaroj, praktike identa al la supro de la KP, ambaŭ ĉepinte kun Lenin, estis la sola vera kaj reala tenanto de povo. En la praktiko la „duobla subordigo” perdis tre baldaŭ sian horizontalan elementon kaj fariĝis unusola vertikala subordigo al la ŝtata-partia supro. Aliflanke, la „demokrata centralismo” estis tuj en la komenco transformita en absolutan kaj maldemokratitan regadon de la politika centro tra la burokrata kaj hierarkie subordigita ŝtata administracio, la partia maŝinaro, la politika polico kaj la prokurora aparato, kiu, ekde la reestablo en

1922, ĉiam estis eksplicite, laŭleĝe, organizita surbaze de strikta unusola subordigo al la centro.

La fundamenta ideo de la Konstitucio de 1918 – klasrego, du blokoj en la mondo kaj la internacia solidareco de la laboristaro – meritas specialan atenton, ĉar ĝi klare reflektas la konflikton inter ideologio kaj realaĵo.

Ĉar la rusa industria proletaro estis malforta, la marksisma koncepto pri klasregado en la transira periodo devis esti forlasita. Ĝi estis reformulita en art. 9 kiel „diktaturo de la urba kaj kampara proletaro kaj de la plej malriĉaj kamparanoj” en la formo de „la potenca tutrusa soveta aŭtoritato” kun la celo „frakasi la burĝaron, detruu la ekspluatadon de homo fare de homo kaj establu de socialismo, en kiu nek klasdivido, nek ŝtata povo ekzistos” (formortado de la ŝtato kaj juro). Tiu ĉi leninisma versio de la „diktaturo de la proletaro” kredigis, ke la menciitaj tri grupoj estis rigardataj kiel unusola klaso de „proletoj” kun absolute egalaj politikaj rajtoj. Fakte, la Konstitucio diskriminaciis kontraŭ la „kampara proletaro” kaj la „plej malriĉaj kamparanoj” en multaj rilatoj, plej klare en la reguloj rilatantaj al la elektorajtoj. Kun la escepto de la vilaĝaj kaj urbaj sovetoj, ĉiuj pli altaj sovetoj estis elektataj laŭ diskriminacia formulo 5 : 1 kontraŭ la kampara loĝantaro. Ekzemple, la Tutrusa Kongreso de Sovetoj konsistis el reprezentantoj de urbaj sovetoj surbaze de unu delegito je 25.000 elektorajtigitoj, kaj de kamparaj kongresoj de sovetoj surbaze de 1 delegito je 125.000 civitanoj (art. 25). La sama diskriminacia principo de 5 : 1 estis aplikata en la elektoj de la sovetoj sur la aliaj niveloj inter la plej malaltaj lokaj kaj la supera.

La ideo de „proleta internaciismo” eĥis tra la Konstitucio. Art. 3 eksplicite menciis ne nur la „abolon de ekspluatado” kaj la kompletan eliminon de klasdivido, sed ankaŭ „la venkon de socialismo en ĉiuj landoj”. Ĝi asertis, ke la soveta dekreto (leĝo) pri la nuligo de ĉiuj eksterlandaj ŝuldoj estis „la unua bato kontraŭ la internacian bankan kaj financan kapitalon” kaj ke la soveta aŭtoritato daŭrigos sur tiu vojo „ĝis la fina venko de la internacia leviĝo de la laboruloj kontraŭ la jugon de la kapitalo”. Art. 20 donis ĉiujn politikajn kaj aliajn rajtojn al ĉiuj eksterlandaj laboristoj rezidantaj en RSFSR.

La eksterlanda politiko de RSFSR estis grandparte konforma al la sama principo de „proleta internaciismo”. Tiurilate estas menciindaj la Dekreto pri Paco de la 8-a de novembro 1917; la denonco kaj nuligo de la sekretaj traktatoj de la carisma reĝimo en decembro 1917; la rekono de la sendependeco de la Ukrajna Respubliko, Finnlando, Turka Armenio, Gruzio, baltaj ŝtatoj inter 1917 kaj 1920, kaj aliaj similaj aktoj kaj agoj en tiu frua periodo.

La mizeroj kaŭzitaj de la milito kaj la ekzemplo de la Oktobra Revolucio kondukis al revoluciaj moviĝoj en nombro da eŭropaj ŝtatoj, precipe en Germanio (1918) kaj Hungario (1919), kiuj rezultigis la mallongdaŭrajn Bavaran Sovetan Respublikon kaj Hungaran Sovetan Respublikon. RSFSR tuj deklaris plenan apogon kaj la soveta aŭtoritato dekretis sendon de nutraĵoj al la revoluciuloj.

La „internacia karaktero de la klasbatalo” manifestiĝis en du formoj: negative, per la kontraŭrevolucia milita interveno de la kapitalismaj ŝtatoj dum la civila milito; pozitive, per apogaj strikoj, rifuzoj ŝarĝi kargojn de militmaterialoj por

la intervenistaj trupoj, eksterlandaj volontuloj en la Ruĝa Armeo, premoj favore al rekono de la soveta registaro, kaj similaj reagoj de laboristoj kaj multaj elstaraj intelektuloj en diversaj landoj.

Tiuj faktoroj kontribuis al klimato de sincera internaciismo kaj apogis la kredon de multaj marksistoj, ke la „internacia solidareco de la laborista klaso” komencas realiĝi. Tio estis la klimato, en kiu floris la soveta jurisprudenco de la unua periodo (1917–1930) bazita sur la ideo de „formortado de ŝtato kaj juro”¹⁶, kaj en kiu estis ellaborita la unua soveta teorio pri „socialisma internacia juro”, speciale en la verkoj de Profesoro Je. A. Korovin¹⁷. Fine, tio estis la klimato, en kiu ankaŭ Esperanto kiel neŭtrala instrumento de internacia komunikado kaj lingva esprimo de internaciismo ege prosperis kaj eĉ ĝuis apogon de la aŭtoritatoj.

Ĉio-ĉi radikale ŝanĝiĝis en la sekvanta historia periodo, markita de teroro sub la absoluta regado de Stalin.

5. Konstitucio de USSR de 1924

La venko ce la Ruĝa Armeo en la civila milito rezultigis la establon de bolŝevisma-soveta povo en ĉiuj tiamaj sendependaj sovetaj respublikoj (rusa, ukraina, belorusa kaj transkaŭkaza¹⁸), kiuj de la 30-a de decembro 1922 formis la Union surbaze de Deklaracio pri la Formiĝo de la Unio de Sovetaj Socialismaj Respublikoj (USSR) kaj la interŝtata Traktato pri la Formiĝo de USSR. La Konstitucio de 1924, akceptita de la Dua Kongreso de Sovetoj la 31-an de januaro de tiu jaro, entenis ambaŭ dokumentojn kiel sankciitajn de la Dua Sesio de la Centra Ekzekutiva Komitato (CEK) la 6-an de julio 1923.

Ĝi emfazis la ideon de la du „diametre kontraŭstarantaj tendaroj” (socialismo kaj kapitalismo) eĉ pli ol la Konstitucio de RSFSR de 1918 kaj la similaj konstitucioj de la aliaj sovetaj respublikoj. La Unua Sekcio, kiu entenis la menciitan Deklaron pri la Formiĝo de USSR, asertis en la unua fazo, ke ekde la formiĝo de la sovetaj respublikoj „la ŝtatoj de la mondo estas dividitaj en du tendaroj: la tendaro de kapitalismo kaj la tendaro de socialismo”.

USSR, kiel „libervola unio de egalrajtaj popoloj” kun la „rajto de ĉiu respubliko libere secesii” prezentigis ne nur kiel la „krono de la fundamento de paca kunekzistado kaj frata kunlaborado de la popoloj” – fundamento konstruita kiel „fortikaĵo kontraŭ la mondan kapitalismon” – sed ankaŭ kiel „nova kaj decida paŝo antaŭen sur la vojo de unuigo de laboristoj de ĉiuj landoj en la Monda Socialisma Soveta Respubliko”¹⁹.

16. *Op. cit.* en noto 2, p-oj 20–32.

17. Detalojn vidu en Lapenna, „The Soviet Concept of 'Socialist' International Law”, *The Year Book of World Affairs*, vol. 29 (1975), p-oj 242–264.

18. La 13-an de decembro 1922 la Unio de SSR de Transkaŭkazio estis reorganizita kaj fariĝis Transkaŭkaza Soveta Federacia Socialisma Respubliko (TSFSR); ĝi ĉesis ekzisti en 1936, kiam la Azerbajĝana SSR, Gruzia SSR kaj Armena SSR aliĝis al USSR kiel apartaj uniaj respublikoj.

19. La termino „paca kunekzistado” el la cititaj tekstoj havas nenion komunan kun la senco donita al „paca kunekzistado” en la nuntempa soveta doktrino de publika internacia juro.

La detaloj pri la ŝtataj formoj de la Unio estis entenataj en la Dua Sekcio de la Konstitucio, kiu formale rekonis la suverenecon de la uniaj respublikoj kaj ilian rajton de secesio, sed samtempe asertis, ek USSR, sendube suverena ŝtato, protektas la suverenecon de la respublikoj (art. 3 kaj 4). Tiu duobla teritoria suvereneco kaŭzis seriozajn teoriajn problemojn, kiuj fine estis solvitaj per la koncepto de politika suvereneco distinge de jura suvereneco. Kiel absoluta politika suvereneco la „laborula popolo” donas kaj al la Unio kaj al la uniaj respublikoj juran suverenecon kaj limigas iliajn respektivajn jurisdikciojn. Tio estis reflektita en la konsisto de la superaj organoj de la ŝtata aŭtoritato.

Art. 8 preskribis, ke la Centra Ekzekutiva Komitato de USSR havas du ĉambrojn: la Soveton (Konsilantaron) de la Unio kaj la Soveton (Konsilantaron) de Nacioj. Teorie, la unua reprezentis la laborulan popolon senkonsidere de la nacieco; la dua la specifajn interesojn de la unuopaj nacioj kaj malpli grandaj etnoj. La Soveto de la Unio konsistis el 414 membroj kaj estis elektata proporcie al la loĝantaro de ĉiu unia respubliko fare de la Kongreso de Sovetoj, siavice plu elektata laŭ la diskriminacia formulo de 5 : 1 kontraŭ la kampara loĝantaro (art. 9). La Soveto de Nacioj konsistis el 5 reprezentantoj el ĉiu unia respubliko kaj unu reprezentanto el ĉiu aŭtonoma respubliko.

CEK estis la supera organo de la ŝtata aŭtoritato en la periodoj inter la sesioj de la Kongreso de Sovetoj. Konsento de ambaŭ ĉambroj estis necesa por ĉiuj leĝdonaj aktoj de CEK. CEK siavice elektadis la Prezidion de CEK (en la komenco 21 membroj) kaj la Soveton de Popolaj Komisaroj de USSR, konsistantan el Tutuniaj kaj Unuigitaj (pli poste Uniaj-Respublikaj) Popolaj Komisariatoj por tiuj branĉoj de la ŝtata administracio, kiuj tute aŭ parte apartenis al la jurisdikcio de la Unio. Inter la sesioj de CEK la Prezidio estis la supera leĝdona kaj ekzekutiva organo, dum la Soveto de Popolaj Komisaroj estis la ekzekutiva kaj administracia organo, respondeca kaj al la Prezidio kaj al CEK.

La jurisdikcio de la Unio estis tre vasta. Ĝi inkluzivis eksterlandajn aferojn, eksterlandan komercon, transporton, poŝtan kaj telegrafan komunikadon, ŝtatan defendon kaj armeon, budĝeton, monan-krediton sistemon, organizon de la kortumoj, bazajn leĝojn pri terjuro, kriminala, civila kaj laborjuro. Nur agrikulturo, edukado, certagrade justico, socia asekuro kaj publika sano troviĝis en la jurisdikcio de la uniaj respublikoj.

Ĉap. Sep de la Konstitucio enhavis regulojn pri la Supera Kortumo kaj Prokuroro de USSR, dum Ĉap. Dek altigis la politikan policon, nun sub la nomo de Unuigita Politika Ŝtata Direktorato (OGPU) al la nivelo de konstitucia institucio. Eĉ pli, unu reprezentanto de OGPU estis laŭofice membro de la Supera Kortumo same kiel la kvar prezidantoj de la superaj kortumoj de la kvar uniaj respublikoj kaj ses aliaj membroj, kiujn elektis la Prezidio de USSR (art. 45).

Tio estis la ekstera federacia fasado de la Unio, kreita de la bolŝevistoj, esence plu valida. Se oni konsideras la formale rekonitan rajton de secesio, la Unio devus estis rigardata pli kiel konfederacio, ol kiel federacio. Tamen, tiu rajto kaj la koneksitaj konstituciaj reguloj estis tiam – kaj restas hodiaŭ – nenio alia ol formala ideologia koncedo, nerealigebla en la praktiko. En Soveta Unio ĉiu agado direktita al secesio estas ŝtata perfido, kiun la kriminala juro punas per la plej severaj punoj.

Aliflanke, se oni konsideras la tre vastajn povojn de la superaj organoj de la Unio, inkluzive diversajn kontrolrajtojn super la uniaj respublikoj eĉ en ilia propra jurisdikcia sfero (art. 30–35, 43, 47), kiel ankaŭ la rolon de la politika polico (art. 61–63), la Unio prezentiĝis, eĉ el tiu pure formala vidpunkto, pli kiel unueca, alte centrigita ŝtato, ol kiel federacio. Plue, ekde la formiĝo de la soveta ŝtato, unusola, strikte hierarkie organizita partio ĉiam estis kaj restas la decida forto malantaŭ la ŝtata fasado.

6. Ideologiaj koncedoj kaj falsaĵoj

La Konstitucio de 1924 ne entenis preskribojn pri la ekonomia bazo de la Unio. Formale, la reguligo de tiu demando estis lasita en la manoj de la uniaj respublikoj, kiuj laŭ art. 5 devis amendi siajn konstituciojn por konformigi ilin al tiu de USSR. Art. 15 de la Konstitucio de RSFSR – kaj la rilataj reguloj de la aliaj respublikaj-uniaj konstitucioj²⁰ – nur ĝenerale preskribis, ke „ĉiuj teroj, arbaroj, mineralaj riĉaĵoj, akvoj, same kiel fabrikoj, minejoj, perakva kaj peraera transporto, rimedoj de komunikado estas proprieto de la laborista-kamparana ŝtato sur bazoj difinitaj en specialaj leĝoj de USSR kaj de la plej superaj organoj de RSFSR”. La formulo „sur bazoj difinitaj en specialaj leĝoj---” fakte signifis, ke la centra registaro estis rajtigita reguligi la proprietajn rilatojn – demando esence grava por kiu ajn tipo de ŝtato – tute libere, sen kia ajn konstitucia limigo.

La Nova Ekonomia Politiko (NEP), iniciatita de Lenin en 1921, tute ne estis menciita en la Konstitucio, kvankam NEP en tiu tempo estis floranta. NEP estis plia ideologia koncedo al la realaĵo, aŭ „retiriĝo” desur la ideologiaj pozicioj, kiel Lenin estis devigita eksplicite rekonii. En sia Raporto de la 15-a de marto 1921 al la Deka Kongreso de la Rusa KP (b) Lenin diris, ke la monda revolucio estis „prokrastita” kaj aperte rekonis, ke – pro la sekvoj de la milito, „postrestinteco” de la lando, malamikeco de la kamparanoj, manko de industria maŝinaro kaj pro aliaj kaŭzoj – fariĝis nepre necese reenkonduki „liberajn interŝanĝojn” bazitajn sur privata proprieto (privata kapitalismo) paralele kun „ŝtata kapitalismo” por eviti tujan katastrofon kaj kolapson de la reĝimo²¹.

Post la relative mallonga periodo de NEP, en 1929 USSR komencis la eraon de kvinjaraj planoj kun perforta kolektivigo de la tero kaj industriigo je la kosto de la plej terura kaj senprecedenca ekspluatado ne de „homo fare de homo”, sed de milionoj da kamparanoj kaj laboristoj fare de la „propra” ŝtato de „laboristoj kaj kamparanoj”. Milionoj estis kondamnitaj al deviga sklavlaboro ĉu tra „administrataj frapoj”, ĉu „kun la helpo de kortumoj”, kiel A. Ja. Viŝinsky aperte rekonis, kaj minimume 23 milionoj, laŭ la plej malaltaj statistikoj, estis ekzekutitaj aŭ mortigitaj alimaniere inter 1929

20. La Uzbeka SSR kaj Turkmena SSR eniris USSR en 1925, la Taĝika SSR en 1929, kio altigis al 7 la nombron de uniaj respublikoj. Poste, pro la malapero de TSFSR (v. noton 18) kaj aneksoj, inkluzive la baltajn ŝtatojn, kies sendependecon la soveta aŭtoritato garantiis post la Oktobra Revolucio, la nombro de uniaj respublikoj altiĝis al la nunaj 15.

21. *Op. cit.* en noto 15, vol. iii, p-oj 507–519.

kaj 1953. Inter ili troviĝis ankaŭ la plej bonaj cerboj de la soveta doktrino pri ŝtato kaj juro el la unua periodo, unuavice Je. Paŝukanis, kaj preskaŭ ĉiuj gvidantoj de la soveta Esperanto-Movado.

En la nova situacio, kiun markas stalinisma teroro, eĉ tiuj konstituciaj reguloj, kiuj rilatis al la plej superaj organoj de la ŝtata aŭtoritato kaj kiuj komence estis observataj almenaŭ parte kaj formale, fariĝis ĉiam pli malproksimaj de la realaĵo kaj fine perdis kian ajn sencon. En la malfruaj dudekaj jaroj La Tutunia Kongreso de Sovetoj kunvenis nur du fojojn en mallongaj sesioj, kaj inter 1931 kaj 1935 ĝi tute ne kunvenis. La nombro de kunvenoj de la Centra Ekzekutiva Komitato estis fine reduktita al unusola jare kaj la sesioj daŭris nur kelkajn tagojn, precize tiom longe, kiom estis necese por aplaŭdi dum multaj minutoj al longaj paroladoj kaj por aprobi, ĉiam unuanime, ĉiujn decidojn faritajn de la Prezidio kaj de la registaro, ambaŭ sub la ŝtala mano de Stalin. Esence, la sama sistemo de unuanima aprobo restis neŝanĝita ĝis nun.

La marksisma ideologio, same tiel, estis eĉ pli radikale ŝanĝita por adapti ĝin al la bezonoj de la novaj regantoj. La tezo pri la „formortado de ŝtato kaj juro”, plu formale entenata en la uniaj-respublikaj konstitucioj, estis transformita en stalinisman imperativon, postulantantan la „maksimuman fortikigon de la soveta ŝtato ... kun la celo prepari la kondiĉojn por la malapero de la ŝtato”. Ĉar, laŭ Stalin, tio estis la sola korekta „marksisma formulo”, kiu „komplete reflektis marksisman dialektikon”²², la soveta doktrino de la unua periodo, bazita sur la ideo de formortado de ŝtato kaj juro, estis forĵetita. Inter 1930 kaj 1938 tre multaj juraj scienculoj estis „likviditaj” morale, intelekto aŭ eĉ fizike.

Samtempe la marksisma „proleta internaciismo” transformiĝis en instrumenton de grandrusa imperialisma politiko. Sub la regado de Stalin internaciismo en la ordinara senco de la vorto estis nomata „burĝa kosmopolitismo” kaj rigardata kiel serioza devojiĝo kun plej gravaj konsekvencoj. Male, jam en 1927 Stalin difinis la solan „korektan” internaciismon jene:

„Internaciisto estas tiu, kiu senrezerve, senhezite, senkondiĉe, estas preta protekti USSR, ĉar USSR estas la bazo de la monda revolucia movado, kaj protekti, progresigi tiun revolucion movadon ne estas eble sen protekti USSR. Ĉar tiu, kiu pensas, ke li protektas la mondan revolucion movadon aparte de USSR kaj kontraŭ ĝi, iras kontraŭ la revolucion kaj necese glitas en la tendaron de la malamikoj de la revolucio”²³.

La stalinisma koncepto de „proleta internaciismo” baldaŭ fariĝis la ideologia bazo de la t.n. „monolita komunista bloko”, t.e. la absoluta subordigo de ĉiuj komunistaj partioj kaj, pli poste, de ĉiuj t.n. „komunismaj landoj” al Moskvo. Interne ĝi kondukis al la teorio de la „pli aĝa frato”, kiu oficiale rekonis la superregon de la rusa nacio super ĉiuj aliaj, kaj incitis grandrusan naciismon ĝis tia ridinda grado, ke la rusa lingvo estis nomata „la lingvo de la Granda Rusa Popolo”, aŭ „la internacia lingvo de socialismo”, distinge de la angla kiel „la lingvo de imperialismo”, la franca

22. J. V. Stalin, *Leninismo*, vol. i (London: George Allen & Unwin Ltd., 1933), p. 223.

23. V. ankaŭ *op. cit.* en noto 2, p-oj 32-42.

de „kapitalismo” kaj la latina de „feŭdismo”, dum la sola vera internacia Esperanto estis rigardata „lingvo de cionistoj kaj kosmopolitoj” kaj malpermesita. Evidente, ĉiam troviĝas iu, kiu estas pli egala ol la aliaj, malgraŭ la konstituciaj preskriboj.

Nur en 1949–50, kiam la jugoslavia komunista gvidantaro kritike atakis la sovetan „diktaturon de la proletaro” kiel „kontraŭrevolucion diktaturon de Stalin” kaj kiel „obskuran burokratan despotismon”, la „komunista monolita bloko” komencis rompiĝi kaj malintegriĝi. Edvard Kardelj, unu el la plej elstaraj komunistaj gvidantoj de Jugoslavio, aperte deklaris, ke la stalinisma „proleta internaciismo” estis tutsimple instrumento de la „imperialismaj aspiroj de la soveta reganta klaso, sklaveco obea al Stalin”, kaj ke la „Stalina Konstitucio” (1936) estis „la krono de la soveta burokrata sistemo”²⁴.

Tiu evoluo okazis komence de la kvindekaj, sed jam antaŭ la akcepto de la Konstitucio de 1936, USSR formiĝis kiel totaleca ŝtato, bazita sur ŝtata kapitalismo kaj karakterizita de troigita naciismo de la ĉefa nacio, agresemo, ekspansiismo kaj ekspluatado de individuoj kaj de tutaj nacioj.

7. Konstitucio de 1936

La Konstitucio de 1936, akceptita de la Eksterordinara Kongreso de Sovetoj la 5-an de decembro 1936 – la lasta en la historio de USSR – enhavis kelkajn novajn trajtojn kaj registris ĉiujn formalajn ŝanĝojn antaŭe enkondukitajn, sed kaŝis la totalecan karakteron de la ŝtato sub la masko de falsitaj marksismaj kaj „demokrataj” sloganoj. Inter la Konstitucio de 1936 kaj tiu de 1977 estis akceptitaj diversaj amendoj, rilatantaj ĉefe al la administra-teritoria divido de la Unio kaj la strukturo de la Soveto (Konsilantaro) de Popolaj Komisaroj (poste Soveto de Ministroj), sed ili ne tuŝis la bazajn konstituciajn principojn kaj regulojn.

La Konstitucio deklaris ke USSR estas „Socialisma Ŝtato de laboristoj kaj kamparanoj” (art. 1) kaj ke la „Sovetoj de Deputitoj de la Laboranta Popolo”, kiuj fariĝis fortaj „rezulte de la faligo de la grandbienula kaj kapitalista povo, kaj la venko de la diktaturo de la proletaro” konstituis la politikan fundamenton de la Unio (art. 2).

Sekvante la modelon de la antaŭaj konstitucioj, ankaŭ tiu de 1936 klasigis la naciojn, naciecojn kaj etnajn grupojn en kvar kategoriojn depende de iliaj grandeco, geografia situacio kaj aliaj faktoroj. La plej gravaj nacioj, kiuj, krome, havis limojn aŭ kun aliaj ŝtatoj aŭ kun la maro (por ke ili povu realigi sian rajton je secesio!) konservis sian pozicion de uniaj respublikoj. Ilia suvereneco, „limigita nur” per la tre vastaj povoj donitaj al la Unio, kaj ilia rajto je secesio, estis rekonfirmitaj (art. 15 kaj 17). Du

24. Por kelkaj detaloj de la jugoslavia kritiko post la interrompo kun Stalin v. *op. cit.* en noto 2. La „diktaturo de la proletaro” fariĝis tiel kompromitita kaj identigita kun la stalinisma-soveta tipo de diktaturo, ke pluraj komunistaj partioj antaŭ nelonge decidis elasi ĝin el siaj respektivaj statutoj. La stalinisma „proleta” aŭ poste „socialisma internaciismo”, kiu nuntempe inkluzivas la doktrinion de Breĵnev pri limigita suvereneco, estas forĵetita kiel politike kaj jure malakceptebla de nombro da landoj regataj de komunistaj partioj, precipe de Jugoslavio, Ĉinio, Albanio kaj aliaj ekster la strikta soveta bloko. Fakte, eĉ Rumanio kaŝe malakceptas ĝin.

konstituciaj amendoj de la 1-a de februaro 1944 rajtigis la uniajn respublikojn establi rektajn diplomatajn kaj aliajn rilatojn kun fremdaj ŝtatoj, kaj havi siajn proprajn armeojn (art. 18a kaj 18b). Kompreneble, tiuj ŝanĝoj neniel transformis la Union, fakte unuecan ŝtaton, en konfederacion, nek ili donis realan valoron al la iluzia rajto de la uniaj respublikoj „libere secesii disde USSR”, sed ili ja ebligis al Moskvo havigi membrecon en Unuiĝintaj Nacioj kaj en aliaj internaciaj organizaĵoj ne nur por la Unio, sed ankaŭ por du uniaj respublikoj (la Belorusa kaj Ukrajna SSR-oj), kaj tial ankaŭ du pliajn voĉojn en tiuj organizaĵoj.

La Kongreso de Sovetoj estis abolita, dum la Centra Ekzekutiva Komitato estis anstataŭigita per la Supera Soveto de USSR kiel la plej alta instanco de la ŝtata aŭtoritato „kun ekskluziva leĝdona povo”. Ĝi konsistis el du ĉambroj – la Soveto (Ĉambro) de la Unio kaj la Soveto (Ĉambro) de Naciecoj – kun la sama politika kaj konstitucia rolo, kiel la du ĉambroj laŭ la antaŭa Konstitucio (v. supre)²⁵.

La antaŭa elektosistemo kun siaj diskriminaciaj reguloj estis anstataŭigita en Ĉap. XI per kvazaŭe demokrata sistemo surbaze de ĝenerala, egala kaj rekta voĉdona rajto per sekreta balotado (art. 134–142), poste prilaborita en elektoleĝoj. La praktikaj sekvoj de tiu ĉi nova, „demokrata” sistemo estas bone konataj: elektoj plene kontrolataj de la Partio; partopreno en la elektoj de minimume 95 % (ekde 1946 kaj inkluzive la lastajn elektojn de 1979 ne malpli ol 99 %) de ĉiuj elektorajtigitoj; unu kandidato de la sola „partia kaj nepartia bloko” por ĉiu elektodistrikto; kaj la sola kandidato ĉiam „elektita” per plimulto de 99 % aŭ eĉ pli.

La Supera Soveto, same kiel ĝia antaŭulo laŭ la Konstitucio de 1924, kunvenis malofte en sesioj de nuraj kelkaj tagoj. Ĝi elektis la Prezidion de la Supera Soveto, kiu konsistis el prezidanto de la Prezidio, 11 vicprezidantoj (pli poste 15, unu el ĉiu unia respubliko), sekretario kaj 24 (pli poste 20) membroj (art. 98). Ĝi ankaŭ nomis la registaron, elektis la juĝistojn de la Supera Kortumo de USSR por 5 jaroj, kaj nomis la Prokuroron (Ĝeneralan Prokuroron ekde la 19-a de marto 1946) de USSR por 7 jaroj (art. 56, 105 kaj 106). Kiel pli frue, la Prezidio plenumis praktike ĉiujn povojn de la Supera Soveto dum la longaj intervaloj inter ĝiaj sesioj, sed formale ĝi estis respondeca al la Supera Soveto. Siavice la registaro estis respondeca kaj al la Supera Soveto kaj al la Prezidio.

Fakte, same kiel sub la Konstitucio de 1924, ĉiuj ŝtataj instancoj plu estis kontrolataj de la Partio, pli precize de la partia gvidantaro. Sub la regado de Stalin, kaj poste kiam Ĥruŝĉov estis Prezidanto de la Soveto (Konsilantaro) de Ministroj²⁶, la registaro estis pli grava ol la Prezidio, sed nuntempe la Prezidio sub la prezidanteco

25. La Soveto de la Unio estis elektata surbaze de unu deputito je 300.000 loĝantoj, entute ĉ. 750, dum la Soveto de Nacioj estis elektata surbaze de 25 (pli poste 32) deputitoj el ĉiu el la uniaj respublikoj, 11 el ĉiu aŭtonoma respubliko, 5 el ĉiu aŭtonoma regiono, kaj 1 el ĉiu nacia distrikto, entute precize 750. Laŭ la nova Konstitucio de 1977 la Soveto de la Unio estas elektata en elektodistriktoj kun egalnombra loĝantaro tiamaniere, ke la nombro de ĝiaj deputitoj estu egala al tiu de la Soveto de la Naciecoj, t.e. nuntempe 750 en ĉiu el la du. Tiu grandega organo de 1.500 deputitoj, eĉ se ĝi estus en konstanta sesio, apenaŭ povus plenumi la funkcion de la plej alta instanco de ŝtata aŭtoritato kiel difinite en la antaŭa kaj nuna konstitucioj.

26. Konstitucia amendo de la 15-a de marto 1946 transformis la popolajn komisarojn en „burĝajn-kapitalistajn” ministrojn.

de Breĵnev estas sendube pli grava. En ĉiu okazo, malgraŭ la koncernaj konstituciaj reguloj, kaj la Prezidio kaj la Registaro ĉiam estis kaj plu estas konsiderinde pli gravaj ol la Supera Soveto, kiu fakte servas kiel kaŭĉuka stampilo por iliaj decidoj.

La Konstitucio donis leĝdonan povon al ĉiuj tri plej altaj organoj de la ŝtata aŭtoritato. Ĝi enhavis ne precizajn regulojn pri la hierarkio de iliaj normkarakteraj aktoj, sed aliflanke donis al la centraj aŭtoritatoj vastajn kontrolajn povojn super la respublikaj kaj malpli altaj organoj, inkluzive la rajton nuligi iliajn decidojn (art. 14d, 20, 48, 49d, 66, 73). Aliflanke, nek la Konstitucio de 1936, nek kiu ajn alia soveta konstitucio, kiam ajn donis kiun ajn garantion al la malpli altaj organoj de la ŝtata aŭtoritato por protekti iliajn formale rekonitajn rajtojn kontraŭ la arbitrajn agojn kaj misuzojn de la pli altaj aŭtoritatoj.

Kontraŭe al la realaĵo, la Konstitucio deklaris ke „la socialisma sistemo de ekonomio kaj socialisma proprieto de la instrumentoj kaj rimedoj de produktado”, konekse kun la abolo de la privata proprieto kaj „la neniigo de la ekspluatado de homo fare de homo”, konstituis la ekonomian fundamenton de USSR (art. 4). Fakte, la „socialisma proprieto” ekde longe estis preninta la formon de ŝtata proprieto kiel la sola decida formo, el kiu la du aliaj formoj – kooperativa kaj kolĥoza proprietoj – estis derivitaj. En la praktiko ekzistis plia formo de derivita „socialisma” proprieto, nome la proprieto apartenanta al diversaj t.n. „sociaj” organizaĵoj, ekzemple al la Komunista Partio, sindikatoj kaj similaj organizaĵoj, sed tio ne estis menciita en art. 5 rilatanta al la formoj de proprieto²⁷.

Estis permesita ankaŭ etskala privata ekonomio „bazita sur persona laboro” (art. 9) kaj proprieto de objektoj por „persona uzo kaj oportuneco” (art. 10) kiel pliaj formoj de proprieto derivita el la ŝtata proprieto²⁸. Ĉar la ŝtato estas sub la kontrolo de la Partio, ĝia gvidantaro estas fakte ne nur la portanto de nedividita politika povo (suvereneco), sed ankaŭ, en la lasta analizo, la fakta subjekto de ĉiuj proprietaj rajtoj de la ŝtato, kio faras tiun gvidantaron la plej potenca aŭtoritato en la historio de la homaro²⁹.

Samlinie kun tiuj ŝanĝoj la reguloj de la antaŭaj konstitucioj rilatantaj al la „rajto de laboruloj kaj kamparanoj” („la plej malriĉaj kamparanoj” en tiu de 1918) – kiuj praktike ne ekzistis – estis anstataŭigita per abundaj, sed same iluziaj fundamentaj rajtoj kaj per neiluziaj devoj de civitanoj kiel formulite en Ĉap. X. La Konstitucio ripetis la malnovan, tedan formulon, ke en Soveta Unio la homaj rajtoj („rajtoj de laboruloj kaj plej malriĉaj kamparanoj” en 1918) estas ne nur rekonitaj,

27. Nur la Fundamentoj de la Civila Leĝaro de 1961 kaj la postaj uniaj-respublikaj civilaj kodoj formale enkondukis la „propieton apartenantan al sociaj organizaĵoj” kiel apartan formon de derivita proprieto, nun menciita en art. 10 de la Konstitucio de 1977. La kooperativa kaj kolĥoza proprieto estas nun traktata kiel unusola formo de „kolĥoza-kooperativa” proprieto.

28. Ĉar la esprimo „privata proprieto” estis rigardata kiel implicanta „ekspluatadon de homo fare de homo”, la posta leĝaro kaj la nuna Konstitucio uzas la terminon „persona proprieto”.

29. En *Deset Godina Narodne Revolucije* (Dek Jaroj de Popola Revolucio), Beograd, 1951, la nun forpasinta jugoslavia gvidanto E. Kardelj diris pri la soveta ŝtato: „Tiamaniere la ŝtato, aŭ la Partia aparato – kiuj estas unusola kaj la sama afero – fariĝis komplete sendependa potenco super la popolo ... Ĝi fariĝis koŝmaro subpremanta la konscion de ĉiu individuo kaj de la tuta socio. En la tuta historio de la homaro neniam ekzistis ŝtato, kiu estis ĝis tia grado centrigita, kaj kiu estis tia aroganta faktoro en la vivo de la popolo, kiel estas tiu ĉi ŝtato” (p. 63).

sed ankaŭ garantiitaj aŭ „certigitaj” per: „socialisma organizo de la ekonomio” aŭ „ĝenerala deviga 8-jara edukado”, aŭ „havigado de presmaŝinoj, papero, publikaj konstruaĵoj („hejtitaĵoj” laŭ la Konstitucio de 1918), stratoj (kaj „placoj” laŭ la Konstitucio de 1977), kaj aliaj materiaj kondiĉoj por la ĝuado de tiuj rajtoj”, ktp. al la laboranta popolo kaj ĝiaj organizaĵoj.

Tamen, la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj estis kaj plu estas rekonitaj kun ĉiuj menciitaj „faciligoj” kaj garantioj nur „konforme al la interesoj de la laboranta popolo kaj kun la celo fortikigi la socialisman sistemon” (art. 125). Kompreneble la Partio kiel la „gvidkerno” de la socio decidas kio estas „en la intereso de la laboranta popolo” (de „la popolo” laŭ la Konstitucio de 1977) kaj kio „fortikigas la socialisman sistemon”, kvankam „disidentoj” kaj aliaj veraj luktantoj por la homaj rajtoj sukcese argumentas, ke sole strikta leĝeco kaj libera ĝuado de ĉiuj homaj rajtoj konforme al la Universala Deklaracio kaj la du Paktoj pri la Homaj Rajtoj (kiujn ratifikis USSR) estas konforma al la veraj interesoj de la popolo.

El ideologia vidpunkto valoras menci, ke la rolo de la Partio estis origine difinita en 1936 kiel „avangardo de la laboranta popolo en ĝia lukto por fortikigi kaj evoluigi la socialisman sistemon, kaj kiel gvidkerno de ĉiuj sociaj kaj ŝtataj organizaĵoj de la laboranta popolo” (art. 126). Sub la influo de Ĥruŝĉov kaj de lia promeso pri „Komunista socio” en tre proksima estonteco, la Konstitucio en la versio de 1956 anstataŭigis la vortojn „en ĝia lukto por fortikigi kaj evoluigi la socialisman sistemon” per „en ĝia lukto por konstrui komunisman socion”. Eble la nova formulo ankaŭ anstataŭigis la deklarojn pri la formortado de la ŝtato kaj juro kaj pri senŝtata socio en komunismo, entenatajn en la antaŭaj konstitucioj de la sovetaj respublikoj ekde 1918: „... en kiu nek klasdivido, nek ŝtata povo ekzistas” (art. 9 de la Konstitucio de RSFSR de 1918 kaj la respondaj artikoloj de la aliaj sovetaj konstitucioj).

8. Partia Programo de 1961

Kelkan tempon post la morto de Stalin en 1953 komenciĝis vasta kampanjo favore al la t.n. „socialisma leĝeco”. Interalie, la Prokuratorato – la organo, kiu mem faris sennombrajn kontraŭleĝaĵojn – ricevis instrukciojn pli atenti al la observo de la juro fare de ĉiuj ŝtataj instancoj. Konsiderinde pli gravaj ŝanĝoj rezultis el la Raporto de Ĥruŝĉov de la 14-a de februaro 1956 al la Dudeka Partia Kongreso, kiel ankaŭ el lia „sekreta” parolado de la 25-a de februaro en fermita kunsido de tiu Kongreso. La dekretoj koncerne „terorismajn agojn” kaj resumaj proceduroj, akceptitaj en 1934 kaj 1937, estis revokitaj la 19-an de aprilo 1956, dum la aktoj el 1940 kaj postaj jaroj, kiuj devigadis la laboristojn resti en siaj laborlokoj kaj preskribis kriminalan respondecon por malasidueco, estis abolitaj la 25-an de aprilo 1956.

En kriminala juro la t.n. materia difino de krimo („krimo estas socie danĝera ago”), valida ekde la Revolucio, estis reformulita en la Kriminala Leĝaro de la 25-a de decembro 1958 per la aldono de la formala elemento „kiel determinita de la leĝo”. En multaj aliaj juraj branĉoj estis akceptitaj novaj leĝoj, kaj malcentriĝo okazis ne nur en la kortuma sistemo, sed ankaŭ rilate la leĝdonajn povojn kaj la ŝtatan

administracion, inkluzive la ekonomion kaj la reorganizon de ministerioj³⁰. Rezulte de tiuj leĝdonaj aktoj la Konstitucio de 1936 estis daŭre amendata, praktike dum preskaŭ ĉiu sesio de la Supera Soveto, sed tio ne tuŝis ĝiajn bazajn principojn.

El ideologia vidpunkto la plej grava evento en la historio de la soveta ŝtato – kaj, ja, de la monda komunisma movado – estis la nova Partia Programo. Kiel oni povis atendi, la fina teksto, akceptita ĉiuvoĉe (kompreneble) de la 22-a Kongreso de la Komunista Partio de Soveta Unio (KPSU) la 31-an de oktobro 1961, spegulis kaj formulis la ideojn de Ĥruŝĉov pri „la transformiĝo de la socialisma ŝtato en komunisman memadministradon”³¹.

La Enkonduko parolas pri „la lukto inter la du kontraŭstarantaj sociaj sistemoj”, epoko de „transiro de kapitalismo al socialismo”, kaj pri „la fina triumfo de socialismo kaj komunismo en la tuta mondo”. Tiu fundamenta kredo je la venko de „komunismo”, t.e. de la soveta regadsistemo kaj ŝtata propio de la produktrimedoj en mondaj dimensioj, estas poste prilaborita en ok ĉapitroj de la Unua Parto. La „socialisma tendaro” (inkluzive tiutempe Ĉinion kaj Albanion!) estas regata de la principo de „socialisma internaciismo”, kiun la Programo³² karakterizas kiel „kompletan egalecon, reciprokan respekton por la sendependeco kaj suvereneco, kaj fratan reciprokan helpon kaj kunlaboradon”. La „imperialisma tendaro”, ĉepinte nuntempe kun Usono, estas „disŝirita de profundradikaj kaj akutaj kontraŭdiroj” (detale listigitaj!), kiuj fine devas esti venkitaj de la „kreskantaj fortoj de socialismo”, t.e. per la establo de la soveta regadsistemo en la tuta mondo. Precize pro tiu „historia neceso” militoj ne plu estas necesaj por atingi la finan celon.

La menciita linio de rezonado – tre malproksima de la realaĵo – kondukas al ĉapitro pri „paca kunekzistado”, kiu formas la konkludon de la Unua Parto kaj prezentiĝas kiel enkonduko al la Dua Parto pri „La Taskoj de la KPSU en la Konstruado de Komunisma Socio”. Ne estas eble analizi ĉi tie la nuntempan sovetan koncepton de paca kunekzistado, oficiale lanĉita de Ĥruŝĉov dum la Dudeka Partia Kongreso (1956) kaj poste prilaborita de la soveta doktrino kiel la fundamenta principo de ĝenerala internacia juro³³. Fakte, la soveta „paca kunekzistado” estas duvizaĝa kaj prezentas samtempe amikecon kaj malamikecon, kunlaboradon kaj atakadon, pacon kaj militon. Ĉiu el la du partoj konsistas el pluraj elementoj, kiuj estas utiligataj de la potenca soveta propagandmaŝino konforme al la konkretaj interesoj de la soveta eksterlanda politiko en difinitaj situacioj. Aliflanke, la stalinisma „socialisma internaciismo” kun la aldonita „limigita suvereneco” de Breĵnev estas rigardata de la soveta doktrino kiel fundamenta principo de „socialisma internacia juro”, kiu inkluzivas kaj pravigas „reciprokan fratan helpon” en formo de interveno en la hejmajn aferojn kaj eksterlandan politikon de la landoj en la soveta bloko, kulminante en la armita interveno en Hungario (1956) kaj Ĉeĥoslovakio (1968)³⁴.

30. Detalojn v. en *op. cit.* en noto 2, p-oj 51–55.

31. *Kommunist*, n-ro 3/1961, p. 7.

32. Bonega anglalingva analizo de la Programo (kun Apendico entenanta la oficialajn anglajn tekstojn de la Partiaj Programoj de 1961 kaj 1919) troviĝas en L. Shapiro (red.), *The USSR and the Future* (Munich Institute for the Study of the USSR, 1962).

33. Detalojn v. en I. Lapenna, „The Legal Aspects and Political Significance of the Soviet Concept of Co-existence”, *The International and Comparative Law Quarterly*, 12 (1963), p-oj 737–777.

34. V. *op. cit.* en noto 17.

9. Pretendoj al „senklasa ŝtato”

La „gravaj demandoj” ligitaj al transformiĝo de la t.n. „socialisma ŝtato” en komunisman memadministradon estas traktataj en la ĉapitro pri „La Taskoj de la Partio en la Sferoj de Ŝtata Evoluo kaj la Plua Evoluigo de Socialisma Demokrateco”.

Unue oni trovas tie la novan oficialan tezon, ke „la diktaturo de la laborula klaso”, plenuminte sian taskon, finiĝis „en la nuntempa stadio”, t.e. en la fazo de povo de Ĥruŝĉov. Lasante flanke la fakton, ke la „diktaturo de la proletaro” en la marksisma senco de la vorto neniam ekzistis – kaj ne povis ekzisti – en Soveta Unio malgraŭ la formalaj konstituciaj preskriboj, la nova tezo signifas fakte aserton, ke en USSR formiĝis senklasa socio ekde la akcepto de la Programo.

La plua ekzistado de la „du amikaj klasoj” (laboristoj kaj kamparanoj) kaj de la „aparta socia tavolo” (intelektularo) tute ne tuŝas la aferon, ĉar, laŭ marksismo, *antagonismaj klasoj* („ekspluatantoj” kaj „ekspluatatoj”) estas esencaj por la ekzisto de ŝtato kaj juro. Plian fojon (Stalin faris la samon en 1936) la „antagonismaj klasoj” estas oficiale „abolitaj” ne nur en la Programo, sed ankaŭ en la Partia Statuto, kiu deklaras ke „la Komunista Partio, la Partio de la laborula klaso, fariĝis nun la Partio de la tuta soveta popolo” aŭ „la avangardo de la tuta popolo”. Tio estas duoble absurda. El marksisma vidpunkto ĝi estas sensecaĵo, ĉar partio estas nenio alia ol la plej valora, la organizita *parto de klaso*, protektanta la interesojn de la koncerna klaso en la politika lukto³⁵. Sed ankaŭ senkonsidere al marksismo „partio de la tuta popolo” estas sensecaĵo, ĉar ĝi kontraŭdiras la sencon mem de la vorto „partio”.

Due, tie troviĝas la tezo pri la malapero de la „diktaturo de laborula klaso” antaŭ la „formortado de la ŝtato”, eksplicite de la nuntempa soveta ŝtato kiel „tutpopola ŝtato”, t.e. senklasa ŝtato. Laŭ marksismo tio, same tiel, estas sensecaĵo, ĉar ne povas ekzisti ŝtato sen antagonismaj klasoj sen ŝtato, aŭ, kiel Lenin diris tute klare:

„La ŝtato estas produkto kaj manifestiĝo de la *nepacigeblo* de klasaj antagonismoj. Kiam, kie kaj ĝis kiu grado la ŝtato kreiĝas dependas de kiam, kie kaj ĝis kiu grado la klasaj antagonismoj de difinita socio objektivite *ne povas* esti pacigitaj. Kaj inverse, la ekzisto de la ŝtato pruvas, ke la klasaj antagonismoj *estas nepacigeblaj*” (kursivo en la originalo)³⁶.

Ĉu, do, ne estas vero, ke la ekzisto de la soveta ŝtato estas leninisma pruvo pri la ekzisto de antagonismaj klasoj kun nepacigeblaj klasaj interesoj en la soveta socio?

Estu kiel ajn, la Programo asertas, ke la „laborula klaso” kiel „la plej antaŭa kaj plej bone organizita forto de la soveta socio”, reprezentita, kompreneble, de la Partio (kiu estas la Partio de la tuta popolo), daŭrigos „plenumadi sian gvidan rolon en la periodo de ĉiufanka konstruado de komunismo”.

35. Identan difinon de politika partio (kun citaĵoj el la verkoj de Lenin) donas ankaŭ *Malaja Sovetskaja Enciklopedija*, vi., p. 1222.

36. *Op. cit.* en noto 15, vol. ii, p. 241.

Koncerne la formortadon de ŝtato kaj juro en socialismo kaj ilian kompletan malaperon en komunismo, la Programo ripetas la malnovan stalinisman tezon, ke tio povos okazi nur en evoluita komunisma socio post la venko de socialismo sur la monda areno³⁷.

Intertempe, „la KPSU rigardas la defendon de la socialisma Patrolando, la fortikigon de la defendo de USSR, de la potenco de la Sovetaj Armitaj Fortoj kiel sanktan devon de la Partio kaj de la tuta soveta popolo, kaj kiel la plej gravan funkcion de la socialisma ŝtato” (majuskloj en la originalo).

10. Konstitucio de 1977

En 1962, kelkajn monatojn post la akcepto de la Partia Programo, estis formita Konstitucia Komisiono sub la prezidanteco de Ĥruŝĉov. Ĝia tasko estis prepari projekton de nova konstitucio. Longa silento en USSR (kaj spekulativaj divenadoj en la Okcidento) sekvis la falon de Ĥruŝĉov en la Partio kaj lian tujan forigon el la ofico de Prezidanto de la Soveto de Ministroj (registro). Nur en 1976 Breĵnev, tiutempe jam Prezidanto de la Konstitucia Komisiono, oficiale anoncis, ke la laboro de la Komisiono estas daŭrigata.

La nova Konstitucio (Fundamenta Leĝo) de USSR estis akceptita la 7-an de oktobro 1977, sesdek jarojn post la Oktobra Revolucio. Ĝi ne enkondukis kiajn ajn esencajn ŝanĝojn en la ekonomian, socian kaj politikan strukturon de la lando. La realaj kaj radikalaj ŝanĝoj rilatas al la ideologio. Tiurilate la Konstitucio fidele spegulas la dogmajn tezojn de la Partia Programo de oktobro 1961. Kontraŭe al la Konstitucio de 1936, kiu deklaris ke „USSR estas socialisma ŝtato de laboristoj kaj kamparanoj”, la nova art. 1 preskribas, ke ĝi estas „socialisma ŝtato de la tuta popolo, esprimanta la volon kaj interesojn de la laboristoj, kamparanoj kaj intelektularo, de la laborula popolo de ĉiuj nacioj kaj naciecoj (etnoj) de la lando”.

Kvankam la Komunista Partio kiel „la avangardo de la laborula popolo” kaj „la gvidkerno de ĉiuj organizaĵoj” estis menciita en la Konstitucio de 1936 (art. 126), ĝia rolo estas eĉ pli emfazita en la nova. En konformeco kun la Programo, art. 6 difinas la Partion kiel „la gvidan forton de la soveta socio kaj kiel nukleon de ĝia politika sistemo, de ĉiuj ŝtataj kaj sociaj organizaĵoj”. Ĉar la partio estas nun „la Partio de la tuta popolo” (Programo), art. 6 ankaŭ deklaras, ke „la KPSU ekzistas por la popolo kaj servas la popolon”.

Laŭ la sama artikolo la Partio nun difinas la ĝeneralajn perspektivojn de la evoluo de la socio sur ĉiuj kampoj, kiel ankaŭ la linion de la eksterlanda politiko, kiu estas bazita sur la koncepto de „paca kunekzistado” en la rilatoj kun ŝtatoj havantaj diferencajn sociajn sistemojn (art. 28), kaj sur „socialisma internaciismo” en la rilatoj kun aliaj „socialismaj landoj” (art. 30). Art. 6 kontraŭdiras la principon entenatan en art. 2 kaj aliaj, laŭ kiuj la tuta povo apartenas al la popolo kaj estas realigata tra

37. La projekto parolis pri „la lasta finkalkulo de la kontraŭdiroj inter kapitalismo kaj komunismo sur la monda areno favore al komunismo”. Tiu formulo poste ŝajnis tro agresa el vidpunkto de la sovetaj internaciaj rilatoj en tiu tempo, kaj tial en la fina teksto aperas pli mildaj vortoj, kiuj estas pli konformaj al la ĉap. pri „paca kunekzistado”.

la sovetoj, de la vilaĝaj kaj lokaj sovetoj ĝis la Supera Soveto de USSR. Kio el la „tuta povo” do restas al la popolo krom konfirmadi tra la sovetoj la decidojn de la partio konforme al art. 6 aŭ, kiel antaŭe, sen tiu eksplicite konstitucia regulo?

La duĉambra Supera Soveto de USSR plu estas la plej alta organo de la ŝtata aŭtoritato, kiu pritraktas ĉiujn aferojn troviĝantajn en la kadro de la tre vasta jurisdikcio de la Unio (art. 73), inkluzive amendojn de la Konstitucio, ŝtatajn planojn, buĝeton, ŝtatan sekurecon, tutunian leĝaron en diversaj juraj branĉoj (ne plu eksplicite listigitaj) elekton de la Prezidio, formadon de la Soveto de Ministroj, elekton de la juĝistoj de la Supera Kortumo de USSR, nomigon de la Ĝenerala Prokuroro, kaj „aliajn aferojn de tutunia graveco” – lasante tiel al la centraj aŭtoritatoj la konstitucian rajton decidi kiuj estas tiuj aferoj de „tutunia graveco”.

Tamen, kiel pli frue, la Supera Soveto havos siajn sesiojn nur du fojojn jare dum kelkaj tagoj, kaj la deputitoj plenumos siajn rolojn de deputitoj sen rezigni pri sia laboro en siaj regulaj oficoj kaj okupoj (art. 112 kaj 104). Tio signifas, ke, same kiel laŭ la Konstitucio de 1936, la fakta funkcio de la Supera Soveto de USSR (kaj de ĉiuj aliaj sovetoj) estas reduktita al ĉiuvoĉa konfirmado de la decidoj de la Partio. Unu el la novaĵoj estas la funkcio de la unua vicprezidanto de la Prezidio (plus la antaŭaj 15 vicprezidantoj, unu el ĉiu unia respubliko) kaj la aldono de plia membro, tiel ke la Prezidio, kune kun la prezidanto kaj sekretario, nun havas entute 39 membrojn (art. 120). Formale, la Prezidio plu estas la kolektiva ĉefo de la soveta ŝtato kun iom da pliaj povoj laŭ la nuna Konstitucio. La prezidanto estas formale nur „la unua inter egaluloj” kaj konstitucie ne havas pli da rajtoj ol la aliaj membroj de la Prezidio. Sed la fakto, ke L. Breĵnev, la ĝenerala sekretario de la Partio, fariĝis ankaŭ prezidanto de la Prezidio, donas al la funkcio de la prezidanto eksterordinaran gravecon.

Kelkaj ŝanĝoj rilatas al la difino de la kvazaŭaj suverenaj rajtoj de la uniaj respublikoj, inkluzive la rajton de secesio (art. 72) kaj la rajton establi rilatojn kun aliaj ŝtatoj (art. 80). Dum laŭ art. 15 de la Konstitucio de 1936 la suvereneco de la uniaj respublikoj estis formale limigita nur per la eksplicite listigitaj aferoj, kiuj tiam estis konstitucie rezervitaj por la jurisdikcio de la Unio, la nuna Konstitucio preskribas, ke „ekster la aferoj listigitaj en art. 73” (kiu, kiel jam menciite, inkluzivas „ĉiujn aferojn de tutunia graveco”), ĉiu unia respubliko „plenumas sendependan aŭtoritaton” (art. 76), kaj ke la rajtoj de la uniaj respublikoj „estas protektataj de USSR” (art. 75 kaj 81). La nova formulo indikas politikon de plua rusigo de etnaj minoritatoj cele al kreo de nova „soveta popolo” – esprimo ripete uzata en la Konstitucio (Preamblo, art. 6, 11, 14, 23, 31, ktp.) kaj reflektante la nunan linion de la Partio rilate la „kunfandiĝon de nacioj kaj naciecoj” (etnoj).

La tri formoj de „socialisma proprieto” – ŝtata, kolĥoza-kooperativa kaj proprieto apartenanta al la sociaj organizaĵoj – kaj la sola formo de persona proprieto estas la samaj kiel laŭ la antaŭa Konstitucio. Tamen, sekvante la tezojn de la Programo pri estonta kunfandiĝo de kolĥozoj (kolektivaj farmbieno) kaj sovĥozoj (ŝtataj farmbieno), art. 12 plian fojon certigas la kolĥozojn, ke la grundo estas donita al ili por ilia „libera uzo por ĉiam”, sed en la tuj sekvanta alineo la sama artikolo preskribas, ke la ŝtato progresigas la „alproksimiĝon” de la kolĥoza-kooperativa proprieto al la ŝtata proprieto.

Pro la nova konstituciigita rolo de la Partio la civitanaj rajtoj estas nun formale eĉ pli limigitaj ol ili estis sub la Konstitucio de 1936. Ili povas esti plenumataj nur „en konformeco kun la celoj de konstruado de komunismo” (art. 51), aŭ „en konformeco kun la interesoj de la popolo kaj kun la celo fortikigi kaj evoluigi la socialisman sistemon”, kiel determinitan de la Partio.

En la Konstitucio troviĝas pluraj aliaj novaj trajtoj kaj kelkaj juraj-teknikaj plibonigoj, sed ili tuŝas nek la ĝeneralan karakteron de la Konstitucio kiel la ĉefa jura dokumento pri la celoj kaj organizo de la ŝtata maŝinaro, nek la Programon kaj Statuton de la KPSU, kiel la ĉefajn dokumentojn pri la celoj kaj organizo de la Partia aparato, ambaŭ senkondiĉe subigitaj al la sama Partia-Ŝtata gvidantaro.

11. Konkludo

Se la unua soveta Konstitucio de 1918 estis la plej proksima al la originala marksismo, kvankam tre malproksima de la rusa realaĵo en tiu tempo, neniu el la sovetaj konstitucioj iam estis tiel maproksima kaj de la marksisma ideologio kaj de realaĵo, kiel tiu de 1977. Oni provis argumenti, ke la historio ne konfirmis la prognozon de Marx pri socialismaj revolucioj en la plej evoluintaj industriaj landoj, ĉar montriĝis, ke „la produktorimedoj estis unue sociigitaj en postrestintaj landoj” kaj „postrestintaj landoj povas provizore moviĝi al la frontlinio de revolucia evoluo ... kaj la nesolvintaj problemoj de la burĝa revolucio povas agi kiel eksplodigiloj por transiro al socialisma revolucio”³⁸. Responde oni povus kontraŭargumenti, ke ŝtata proprieto de la produktorimedoj per si mem neniel signifas „sociigon” en la marksisma senco. Similaj formoj de proprieto ekzistis en antikva Egiptio kaj Romio, sed tio neniel transformis tian ŝtatan proprieton en „socialisman” proprieton, nek kiu ajn venis kiam ajn al la ideo nomi tiujn ŝtatojn „socialismaj”.

Oni ankaŭ povus argumenti, ke ĉiuj revolucioj kaj pseŭdorevolucioj en postrestintaj landoj, kvankam sukcesintaj sub marksismaj sloganoj, fakte baldaŭ transformiĝis en ŝtatan kapitalismon, konfirmante tiel la ĝustecon de unu el la plej fundamentaj marksismaj tezoj, nome ke la fakta ekonomia bazo en la lasta analizo determinas la superstrukturon de politikaj, juraj kaj aliaj institucioj, kaj certe ne inverse (tia inverso, kompreneble, transformus marksisman materialismon en idealismon); ke estas vane provi salton el duonfeŭdismo kaj postrestinteco en socialismon ne trairinte unue la stadion de kapitalismo, tute egale pri kia formo de kapitalismo temas; ke vera socialisma revolucio (ne necese perforta), t.e. revolucio kondukanta al vere socialismaj sociaj rilatoj, kiel imagite de Marx kaj Engels, povas okazi nur en alte evoluintaj industriaj landoj.

M. Gjilas en *La Nova Klaso*³⁹ esprimis la opinion, ke ĝuste la ekonomie postrestintaj landoj devas „pasi tra komunista revolucio” por povi, tra la centrigo de ĉiuj produktorimedoj, esti transformitaj en industriajn landojn kaj tiel atingi la

38. E. Fischer, en kunlaboro kun F. Marek, trad. de A. Bostock, *Marx in His Own Words*, (London: Allen Lane, The Penguin Press, 1970), p. 129.

39. M. Gjilas, *The New Class* (London: Thames and Hudson, 1957), p-oj 11-14.

evoluintajn kapitalismajn ŝtatojn. Oni facile povas kontraŭargumenti, ke multaj landoj atingis altan gradon de industriigo surbaze de privata entreprenemo kaj libera merkato, ambaŭ reguligitaj per demokrataj metodoj, sen pasi tra la teruraĵoj de „komunista revolucio” de soveta tipo, aŭ tra la mizeroj de la unuaj industriaj revolucioj en Eŭropo. Nek Marx nek Engels iam imagis, ke „socialisma” revolucio en postrestintaj landoj estus necesa por transformi ilin en industriajn landojn, tiel ke ili povu atingi la kapitalismajn ŝtatojn. Estu kiel ajn, pli ol sesdek jarojn post la Oktobra Revolucio USSR, kvankam milite tre potenca, tamen multrilate konsiderinde postrestas la industriigitajn landojn de la okcidenta mondo.

En *La Kapitalo* Marx esprimis admiron por la kolosaj monumentoj, kiuj ankoraŭ montras la povon de la antikvaj regantoj: „Tiu povo de la aziaj kaj egiptiaj reĝoj, etruskaj teokratoj, ktp., en la moderna socio estis transigita al la kapitalismo, ĉu unuopa, ĉu, kiel en akciaj kompanioj, kolektiva kapitalismo”⁴⁰.

Eble Marx dirus hodiaŭ, pli adekvate, ke tiu povo de la aziaj kaj egiptiaj reĝoj, etruskaj teokrato, ktp., en nia moderna tempo estis transigita unuavice al la regantoj de la „socialismaj” ŝtatoj bazitaj sur ŝtata kapitalismo.

40. Citita laŭ T. B. Bottmore kaj Maximilien Rubel, *Selected Writings in Sociology and Social Philosophy*, (London: G. A. Watts & Co. Ltd., 1963), p. 110.

En: Helmar Frank, Yashovadhan, Reinhard Cziske (komp.):

*la homa lingvo kaj aliaj internacilingvaj aktoj
Kibernetiko de de la IX-a Internacia Kongreso de Kibernetiko.*

Budapest, Paderborn: Hungara Esperanto-Asocio,
Inst. pri Kibernetiko 1981. 192 p., p. 82–91;
ankaŭ en: Helmar G. Frank, Yashovardan,

Brigitte Frank-Böhringer (ed.): *Lingvokibernetiko kaj aliaj
i nternacilingvaj aktoj de la IX-a Internacia Kongreso de
Kibernetiko.*

*Sprachkybernetik und andere internationalsprachige
Akten vom IX. Internationalen Kybernetikkongreß.
Tübingen: Narr (1982). 190 p., p. 82–91.*

JURAJ ASPEKTOJ DE INFORMPERDO PRO TRADUKADO

1. Enkondukaj Rimarkoj

1.1 *Specifeco de lingvo.* – Lingvo ne estas natura, sed socia fenomeno, kies formiĝon, ekeston kaj pluan evoluon regas specifaj sociaj leĝoj, funkciantaj sole en homaj socioj. Tia, la ofta distingado inter la kvazaŭe „naturaj” kaj kvazaŭe „artefaritaj” lingvoj estas science ne allasebla, ĉar lingvo apartenas nek al animala aŭ vegetala mondo, nek ĝi troviĝas sur la nivelo de mekanikaj rimedoj de komunikado. Ĉiu lingvo reflektas difinitan socian realaĵon, servas por pensado kaj komunikado interne de la socia grupo, al kiu ĝi apartenas, kaj efikas kuntene-solidarige rilate la koncernan kolektivon. Tio decide kontribuas al la socia identigo de la koncerna komunaĵo, sed tio samtempe lingve izolas ĝin disde ĉiuj aliaj komunaĵoj. Escepto estas la Internacia Lingvo (Esperanto), la sola el ĉ. 500–600 projektoj, kiu transformiĝis en vivantan lingvon de vivanta internacia lingvokomunaĵo. Ĝi ja efikas internacie solidarige, sed pro sia karaktero de monde internacia lingva komunikilo estas senigita de la izoliga funkcio. En tio konsistas la kvintesenco de la multfaceta lingva problemo en internaciaj rilatoj, inkluzive la pritraktatan temon.

1.2 *Graveco de jura informperdo.* – Traduko ĉiam pli aŭ malpli perfidas, t.e. iugrade perdigas la originalan informon. Se traduko de literarturaĵo povas senigi verkon de cirkonstancaj agordoj kaj de poeziaj nuancoj, tamen sen pliaj malutilaj sekvoj, traduko de jurteksto povas facile perdi la originalan informon, ofte eĉ doni komplete eraran informon, tial ankaŭ kaŭzi erarajn interpretojn kaj aplikojn de juro.

1.3 *Ekzamenotaj sferoj.* – En tiu ĉi prelego mi limigos min al konciza ekzameno de kelkaj aspektoj de informperdoj pro tradukoj nur en la sferoj de mia pli strikta specialeco, nome internacia publika juro kaj kompara juro.

2. Internacia Juro

2.1 *Lingvoj uzataj.* – La fondintoj de la moderna scienco de internacia juro en la 16-a kaj komence de la 17-a jarcentoj uzis la latinan, kiu estis la sola lingvo de la tiamaj interŝtataj rilatoj. Superflue emfazi la avantaĝojn, kiujn donis la uzo de unusola komuna lingvo por scienca branĉo plej esence internacia. La samaj verkoj povis esti legataj kaj studataj ĉie en Eŭropo; en la sama lingvo oni povis prelegi en kiu ajn eŭropa universitato; la kontaktoj estis rektaj, sen la helpo de tradukistoj kaj interpretistoj. Paralele kun la malaperado de la latina kiel diplomacia lingvo, proksimume ekde la mezo de la 17-a jarcento, pro kaŭzoj analizitaj aliloke¹, ĝi malaperis ankaŭ el la doktrino. Sekvis periodo de la franca kiel diplomacia lingvo kaj de la franca kaj angla superregado en la periodo de la Ligo de Nacioj. En la nuntempo praktike ĉiuj naciaj lingvoj estas uzataj kaj en internacijuraj tekstoj kaj en la doktrino.

2.2. *Problemoj.* – Ĉu multlingveco nur en tiu ĉi kampo kaŭzas malfacilaĵojn kaj, se jes, kiujn?

2.2.1 *Doktrino:* Pro la universaleco de internacia juro, la baza terminologia materialo estas unuforma. En kelkaj lingvoj la terminoj estas pli aŭ malpli internaciaj; en aliaj ili estas kreitaj surbaze de nacilingvaj vortoj; en nombro da lingvoj paralele ekzistas ambaŭ formoj por granda nombro da nocioj. Tamen, tio ne kaŭzas apartajn malfacilaĵojn. Ekzemple, ne multe gravas, ĉu oni nomas tiun juran branĉon *Law of Nations*, *Droit des Gens*, *Völkerrecht*, *Mejdunarodnoje Pravo*, *Međunarodno Pravo*, ktp. aŭ *International Law*, *Droit International*, *Diritto Internazionale*, *Derecho Internacional*, *Internacionalno Pravo*, ktp., aŭ simile por aliaj nocioj. Grave estas, ke la terminoj por diversaj konceptoj estas ĝenerale firme establitaj en diversaj lingvoj. Tio koncernas ankaŭ la terminologion por la apartaj nocioj de regiona internacia juro, tute certe en la lingvoj, al kiu ĝi aplikiĝas, sed ĝenerale ankaŭ ekster ĝi. Oni eble povas diskuti pri la pli aŭ malpli granda taŭgeco de tiu aŭ alia esprimo en iu lingvo, sed tio ne ŝanĝas la fakton, ke en la sfero de la doktrino de internacia juro ĝenerale ne ekzistas veraj terminologiaj problemoj en la strikta senco de la vorto. Interalie, tio faciligas la tradukojn de internacijuraj traktaĵoj de unu nacia lingvo al alia. Tamen, kompreneble, oni devas bone koni la precizan juran sencon, kiun oni donas al difinita termino en la koncerna regiona internacijura sistemo. Ekzemple la termino „paca kunekzistado” kiel baza principo de ĝenerala internacia juro laŭ la soveta doktrino havas tute alian sencon en tiu doktrino kaj en la soveta praktiko, ol ĝi havas ekster la jura sistemo de la soveta bloko. La samo rilatas al la termino „socialisma internaciismo”, kiun la sovetaj doktrino kaj praktiko rigardas kiel fundamentan principon de la t.n. „socialisma internacia juro”, sed kiu havas nenion komunan kun la originala marksisma koncepto de la t.n. „proleta internaciismo”². Necesas atenti al tiaj malsamecoj de sencoj kaj doni adekvatajn klarigojn por eviti mistradukojn.

1) En la Internacia Lingvo, interalie, en *Aktualaj Problemoj de la Nuntempa Internacia Vivo*, Roterdam, 1952, p-oj 12 k. sekv.: *Retoriko*, tria eldono, Rotterdam 1971, p-oj 100 k. sekv.; *Esperanto en Perspektivo*, London-Rotterdam, 1974, p. 35.

2) La du konceptoj estas detale analizitaj en miaj studoj „The Legal Aspects and Political Significance of the Soviet Concept of Co-existence”, *The Internacional and Comparative Law Quarterly*, 1963, p-oj 737–777, kaj „The Soviet Concept of ‘Socialist’ International Law”, *The Year Book of World Affairs*, 1975, p-oj 242–264.

2.2.2 *Juraj tekstoj*: Tute alie prezentiĝas la afero en internacia juro mem, nome rilate la fontojn kaj la alireblon de la fontoj por la doktrino. Laŭ art. 38 de la Statuto de la Internacia Kortumo en Hago, la tri ĉefaj formalaj fontoj de internacia juro estas: (i) internaciaj konvencioj, ĉu ĝeneralaj, ĉu specialaj, entenantaj regulojn eksplicite rekonitajn de la ŝtatoj kiel devigajn; (ii) internacia kutimo kiel pruvo de ĝenerala praktiko akceptita kiel juro; (iii) la ĝeneralaj juraj principoj rekonitaj de la civilizitaj nacioj. La juĝdecidoj de internaciaj kaj naciaj kortumoj kaj similaj juĝinstancoj, kiel ankaŭ la instruoj de la plej alte kvalifikitaj jurpublicistoj de diversaj landoj estas rigardataj kiel helpaj rimedoj por establo de la juraj reguloj entenataj en la tri ĉefaj fontoj.

El ĉiuj menciitaj fontoj, hodiaŭ la plej gravaj estas la internaciaj konvencioj en larĝa senco de la vorto, nome ĉiuj eksplicitaj interŝtataj interkonsentoj, kreantaj reciprokajn rajtojn kaj devojn, tute egale ĉu la konkreta akto, depende de la enhavo, nomiĝas konvencio (en strikta senco), aŭ traktato, protokolo, interŝanĝo de notoj, interkonsento, deklaro, ĉarto, konstitucio, statuto, ktp.

Diference de la tempo, kiam sole la latina estis aplikata en interŝtataj rilatoj kaj, poste, la franca estis ĝenerale uzata kiel lingvo de diplomatio, hodiaŭ la internaciaj konvencioj, kiel aludite enkonduke, estas farataj en la lingvoj de ĉiuj ŝtatoj de la mondo. La duflankaj konvencioj estas kutime verkitaj en la oficialaj lingvoj de la du partioj; la plurflankaj estas ofte skribitaj en la lingvoj de ĉiuj ŝtatoj-partioj; por la multflankaj konvencioj – inter ili la plej gravaj, sur kiuj baziĝas la diversaj nuntempaj interŝtataj organizaĵoj – oni uzas kelkajn t.n. oficialajn lingvojn. Ekzemple, la Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj estis verkita en la angla, ĉina, franca, hispana kaj rusa, kaj ĝia art. preskribas, ke la tekstoj de la kvin lingvoj estas egale aŭtentikaj. Tiurilate tre interesa kaj instrua estas la evoluo en la Eŭropa Komunaĵo. Dum la Pariza Traktato de 1951 pri la fondo de la Eŭropa Komunaĵo pri Ŝtalo kaj Karbo estis redaktita en la franca kiel la sola aŭtentika lingvo, la Roma Traktato de 1957 per kiu estis fondita EEK, estis verkita en kvar lingvoj, nome la franca, germana, itala kaj nederlanda, kies tekstoj estas egale aŭtentikaj. La solaj tri artikoloj de la Brusela Traktato de la 22-a de januaro 1972, per kiu Britio, Danlando, Irlando kaj Norvegio aliĝis al la tri kunfandiĝintaj eŭropaj komunaj, estas farita en la 8 oficialaj lingvoj de la partioj: la angla, dana, franca, germana, irlandia, itala, nederlanda kaj norvega, kaj ĉiuj tekstoj estas egale validaj. Do, de unu aŭtentika teksto en 1951 al 8 aŭtentikaj tekstoj en 1972! Ĉar Norvegio, pro la negativa rezulto de la konata referendumo, ne povis ratifi la Traktaton kaj, sekve, fine tamen ne aliĝis, dum Irlando uzas la anglan, la nuna Eŭropo de Naŭ havas 6 oficialajn lingvojn, du pli ol Eŭropo de Ses. El jura kaj ĉiuj aliaj vidpunktoj ili estas egalrajtaj. Post la tre verŝajna baldaŭa aliĝo de Grekio, Hispanio kaj Portugalio, la nombro de egalrajtaj lingvoj altiĝos al 9, kio eĉ pli komplikos la jam komplikitan situacion kaj kaŭzos eĉ pli da tradukproblemoj.

Se iu internacia konvencio estas verkita en unusola aŭtentika lingvo, la eltrovo de la vera senco de ĝiaj reguloj en kazo de konfliktaj starpunktoj ne kaŭzas pli da malfacilaĵoj, ol la interpretado de leĝoj kaj de aliaj normdonaj aktoj en la interna juro de unuopaj ŝtatoj. Al ĝi povas aplikiĝi la jam forme establitaj reguloj de gramatika, logika kaj teleologia interpretado de juraj aktoj.

Tamen, eĉ en kazoj de unulingvaj internaciaj konvencioj povas ekesti problemoj, ŝuldataj ĉefe al semantikaj malsamecoj de juraj terminoj en diversaj juraj sistemoj, simile al la problemoj renkontataj en la sfero de kompara juro, pri kio iom poste. Tipa ekzemplo estas art. 25 de la Varsovia Konvencio pri Unuecigo de Iuj Reguloj Rilataj al Internacia Aertransporto, plu valida en la formo amendita per la Haga Protokolo de la 28-a de septembro 1955 por la ŝtatoj ratifikintaj ĝin. Laŭ tiu Konvencio la kompenso pro damaĝoj kaŭzitaj de aerakcidentoj baziĝas sur senkulpa aŭ objektiva respondeco de la transportisto, kaj estas limigita al difinitaj sumoj en oraj frankoj aparte por ĉiu persono, por pakaĵoj kaj varoj. Sed art. 25 preskribas, ke la respondeco de la transportisto estas senlima, se, laŭ la franca originalo, „*le dommage provient de son dol ou d'une faute qui, d'après la loi du tribunal saisi est considérée comme équivalente au dol*” (se la damaĝo estas rezulto de dolo aŭ de kulpo kiu, laŭ la juro de la kortumo ŝarĝita pri la afero, estas ekvivalento de dolo). Tiu maltaŭga formulo estis akceptita post longaj diskutoj, en kiuj la termino *faute lourde* (ekstrema neglekto) estis proponita, sed malakceptita, ĉar la brita reprezentanto asertis, ke la franca koncepto de *faute lourde* ne ekzistas en la anĝla juro kaj tial, se tradukita per la sole ebla *gross negligence*, havus nenian juran sencon. Aliflanke, la koncepto de *dol* en la franca juro estas eĉ pli malfacile tradukebla en la anglan kaj tial, fine, oni akceptis la supran formulon de *dol ou d'une faute ... équivalente au dol*. Tiuj ĉi terminoj estis ne precize tradukitaj en la anĝla Akto (Leĝo) pri Aera Transporto de 1932 kaj en la oficiala usona traduko per *wilful misconduct or ... default ... equivalent thereto*. Verŝajne neniu regulo de konvencia internacia juro kaŭzis pli da teoriaj diskutoj, juraj argumentoj kaj procesoj, ol la obskuraj kaj neadekvate tradukitaj preskriboj de art. 25 pri la senlima respondeco de la transportisto.

Se temas pri konvencioj redaktitaj en du aŭ pluraj lingvoj, kaj se ĉiuj tekstoj estas egale validaj, la tuta afero konsiderinde komplikiĝas pro la oftaj malsamecoj inter unu versio kaj la alia aŭ aliaj. Eĉ la nomo de Unuiĝintaj Nacioj ne estas identa en la 5 oficialaj lingvoj. En la anĝla, franca kaj hispana aŭtentikaj tekstoj ĝi estas *Unuiĝintaj Nacioj (UN)*, sed en la rusa same aŭtentika teksto ĝi aperas kiel *Organizacio de Unuiĝintaj Nacioj (OUN)*. En la teksto mem troviĝas tre multaj malsamecoj. Dum la tradukado de la Ĉarto en la Internacian Lingvon necesis preni en konsideron la aŭtentikajn tekstojn en la anĝla, franca, hispana kaj rusa (pro la nescio de la ĉina ne estis eble konsulti la tekston en tiu lingvo) por doni kiel eble plej fidelan tradukon de la senco. Kelkfoje la tri tradukintoj – ambasadoro de Aŭstralio Ralph Harry, Eskil Svane kaj mi mem – kombinis tiucele la 4 tekstojn por eltrovi la ĝustan sencon; en aliaj kazoj, precipe en la dubaj, ni prenis tiun aŭtentikan tekston, kiu estis pli klara aŭ pli preciza.

Diference de la Ĉarto de UN, la Statuto de la Internacia Kortumo en Hago, kvankam unu el la ĉeforganoj de UN, estas verkita en la anĝla kaj franca, kaj ambaŭ tekstoj estas aŭtentikaj. Tamen, en pluraj lokoj ili diverĝas, kio kelkfoje obstaklas la eltrovon de la ĝusta senco. Ekzemple, en la franca teksto de art. 36 troviĝas la vortoj *compétence* kaj *jurisdiction*, dum la anĝla teksto uzas por ambaŭ terminoj nur *jurisdiction*, ĉar la anĝla *competence* ne respondas al la franca *compétence*. En la unua proceso inter Britio kaj Albanio pro la incidentoj en la Markolo de Korfuo

(objeto de Albanio), en kiu mi estis konsilisto-advokato de Albanio, la demando stariĝis ĉu la Kortumo havis kompetentecon por juĝi la konkretan kazon, kvankam la ĝenerala jurisdikcio ne estis neata. La demando estis tute konforma al la franca aŭtentika teksto. Sed laŭ la angla teksto, same aŭtentika, tio estis sensencaĵo, ĉar ĝi ne distingas inter kompetenteco kaj jurisdikcio, kio malebligas aserti, ke la Kortumo samtempe havas kaj malhavas jurisdikcion. La internacilingva traduko de art. 36 de la Statuto konservas per la terminoj *kompetenteco* kaj *jurisdikcio* la sencon de la franca aŭtentika teksto, kiu donas la ĝustan informon.

En la Eŭropa Ekonomia Komunaĵo la malfacilaĵoj estas eĉ pli grandaj, ĉar EEK estas iugrade supernacia laŭ sia karaktero, daŭre kreas sian propran, eŭropan juron, kiu parte aplikiĝas rekte al la civitanoj de la ŝtatoj-membroj, do sur teritorioj kun apartaj juraj sistemoj, kun apartaj juraj terminologioj kaj juraj tradicioj³.

Okaze de aliĝo de Britio al EEK necesis traduki la traktatojn kaj amason da aliaj juraj tekstoj el la franca en la anglan. Tiam ankoraŭfoje montriĝis, ke la kvazaŭe „korespondaj” terminoj en la du lingvoj preskaŭ neniam precize korespondis, kiel atestas D. F. Hall en sia *Translating The Treaties* (Tradukado de la Traktatoj), publikigita en la printempa numero de *European Review*, 1972. Se la anglaj tradukistoj estas prenitaj en la konsideron ankaŭ la same aŭtentikajn germanan, italan kaj nederlandan tekstojn, kiel ili estus devintaj fari, ili estus renkontintaj eĉ pli da malfacilaĵoj, ĉar ankaŭ tiuj tekstoj en la kvar originalaj lingvoj de la Komunaĵo ofte diverĝas inter si. Jen 2–3 el centoj da ekzemploj nur por ilustru kelkajn malfacilaĵojn en la tradukado de la Traktato de Romo (1957) el la franca en la anglan pro la malsameco de signifoj en la du lingvoj: la franca *mission* estas tradukita per *task* en art. 2, sed per *objective* en art. 5; la franca *dispositions législatives* per *law*; *dispositions réglementaires* per *regulations*; *dispositions administratives* per *administrative actions* – ĉiuj troviĝas en art. 48; la franca *domicile* ne estas tradukita per la alisenca angla *domicile*, sed per *home*, dum la franca *residence* ja estas tradukita per *residence*, ambaŭ en art. 125, ktp.

Jen plia ekzemplo. Art. 48/2 de la Traktato de EEK preskribas la abolon de kiu ajn diskriminacio inter „la laboristoj de la ŝtatoj-membroj” surbaze de ilia ŝtataneco koncerne dungon, salajron kaj aliajn laborkondiĉojn. Ekestis duboj rilate la demandon, ĉu tiu regulo rilatas al ĉiuj laboristoj rezidantaj (konstante loĝantaj) en la ŝtatoj-membroj, kiel implicas *Arbeitnehmer der Mitgliedstaaten*, aŭ nur al ŝtatanoj de tiuj landoj konforme al *travailleurs des Etats Membres* laŭ la same aŭtentika franca teksto. La Konsilio aplikis la principon de restriktita interpretado kaj limigis tiun rajton nur al ŝtatanoj (Reglamento 1408/71, pli frue Reg. 3). En la komenco eĉ ne estis klare ĉu la vorto *laboristo* en art. 48 rilatas ne nur al manlaboristoj, sed ankaŭ al oficistoj, eĉ tiuj en gvidaj pozicioj, konforme al la senco de *Arbeiter* en la germana juro, aŭ ĝi havas malpli vastan sencon, sed poste la senco estis precizigita per la termino „salajrogajna okupo” (angle: *wage earning occupation*), do rilatas al ĉiuj salajrataj gelaboruloj.

3) Pri la situacio en la Eŭropa Ekonomia Komunaĵo v. la artikolon „Kelkaj Juraj Aspektoj de la Multlingveco en EEK”, publikigita originale en la Internacia Lingvo en *Internacia Jura Revuo*, n-ro 2/1977, kaj poste en nacilingvaj tradukoj en diversaj aliaj periodaĵoj.

Specialaj, tre komplikaj prilingvaj reguloj estas aplikataj en la Kortumo de la Komunaĵo. Ĉi tie sufiĉas diri, ke ĉiuj 6 lingvoj estas oficialaj lingvoj de la Kortumo, sed unu el ili povas esti uzata kiel procedura lingvo.

Montriĝas, ke internacijuraj tekstoj ne malofte ege malsamas malgraŭ la elstara kompetenteco de la tradukistoj. Ju pli da lingvoj estas aŭtentikaj, des pli da problemoj ĉu en la ĝenerala internacia juro, ĉu en la regiona. Tiuj problemoj estas solvataj laŭ la reguloj de jura interpretado, nuntempe entenataj en art. 31–34 de la Viena Konvencio pri la Juro de Traktatoj de 1969, kiu grandparte reflektas la antaŭe ekzistantan praktikon.

La fakto, ke ĉiuj plurlingvaj oficialaj tekstoj estas egale aŭtentikaj signifas, ke kiu ajn el ili povas esti citita kiel entenanta la ĝustan juran regulon, kaj ke, sekve, neniu havas pli da forto ol kiu ajn alia. Se la aŭtentikaj tekstoj malsamas, la baza jura supozo estas, ke la interpreto devas ne kontraŭi kiun ajn el la egale aŭtentikaj versioj. Necesas, do, unuavice establi la sencon de ĉiu teksto en la respektiva lingvo laŭ la reguloj de jurinterpretado en la koncerna nacia jura sistemo; duavice, necesas trovi tian sencon, kiu ne kontraŭas kiun ajn el la aŭtentikaj tekstoj. Se temas pri du aŭtentikaj tekstoj, la malpli vasta senco estas decida, ĉar ĝi estas implicita en la pli vasta. Se temas pri 3 aŭ pli da aŭtentikaj tekstoj, la sama regulo aplikiĝas. Kiel oni vidas, la plej malvasta senco estas fakte decida, kio ne malofte ŝanĝas, aŭ povas ŝanĝi, la sencon, kiun eĉ la plimulto de la partioj, fidante al la jura informo entenata en iliaj respektivaj lingvoj, intencis doni al la koncerna preskribo.

Ankaŭ alia granda fonto – la ĝeneralaj juraj principoj, rekonitaj de la civilizitaj nacioj – estas nesufiĉe konata al la doktrino. Se la Internacia Kortumo de UN pro sia vaste internacia konsisto posedas maksimuman scion pri la ĉefaj juraj sistemoj de la mondo, tion certe oni ne povas diri pri la unuopaj specialistoj de internacia juro. En ĉiuj verkoj pri internacia juro oni mencias la ĝeneralajn jurajn principojn kiel apartan fonton, sed oni nenion diras pri kiuj principoj fakte temas, ĉar la multnombreco de lingvoj obstaklas la esploron. La samon oni povas diri pri la juĝoj de diversaj tribunaloj kaj, almenaŭ parte, pri la „instruoj de la plej alte kvalifikitaj aŭtoroj de diversaj nacioj” kiel helpaj fontoj de internacia juro. Kiamaniere oni povas studi la jurajn doktrinojn de aliaj landoj, se oni ne scias la respektivajn lingvojn? Eĉ la soveta doktrino de internacia juro – do doktrino de unu el la plej potencaj ŝtatoj – estas tre malmulte konata en la okcidento kaj entute ekster la t.n. soveta bloko, por ne paroli pri la internacijuraj skoloj de malpli gravaj landoj.

Al ĉio ĉi aldoniĝas la malfacilaĵoj en internaciaj renkontiĝoj de specialistoj pri internacia juro: la samaj, kiujn frontas ĝenerale la internaciaj renkontiĝoj ne uzantaj unusolan lingvon, inkluzive tiun ĉi Kongreson.

La multlingveco – kaj tial informperdoj pro traduko – sendube, do, kaŭzas seriozajn problemojn en la internacia juro mem kaj prezentas gravan obstaklon al la establo kaj studo de ĉiuj juraj principoj kaj reguloj de tiu jura branĉo surbaze de la rekonitaj ĉefaj kaj helpaj rimedoj; obstaklon por la plua evoluo de la scienco de internacia juro kaj por la senperaj kontaktoj de personoj esplorantaj, studentaj, instruantaj kaj kree produktantaj sur tiu ĉi kampo.

3. Kompara Juro

3.1. *Terminologio*. – La terminologiaj problemoj sur la kampo de kompara juro estas konsiderinde pli grandaj, ol la skize prezentitaj en la sfero de internacia juro. Tio ŝuldiĝas parte al malesto en iu lingvo de fakaj terminoj por juraj nocioj en alia jura sistemo, sed ĉefe al la malsameco de la signifoj de la fakaj juraj terminoj en diversaj lingvoj. Kelkfoje tio ŝuldiĝas ankaŭ al nesufiĉaj konoj de la esplorata jura sistemo, aŭ al nekontentiga scio ĉu de la lingvo de la originalo, ĉu de tiu de la traduko, ĉu de ambaŭ.

Lingvo ĉiam spegulas difinitan socian realaĵon, kiu determinas la bezonojn de pensado kaj komunikado en la koncerna socia medio. Sekve, se en iu jura sistemo tute ne ekzistas difinita jura koncepto, kiu troviĝas en alia sistemo, tiam por tiu koncepto, kompreneble, ekzistas vorto en la alia sistemo, sed ne en la unua. Ekzemple, la anglaj terminoj *solicitor*, *barrister* kaj multaj aliaj ne estas tradukeblaj en la francan aŭ germanan aŭ kiun ajn alian eŭropan lingvon, ĉar tutsimple en ili ne troviĝas identaj vortoj pro la foresto de tiuj nocioj mem en la juraj sistemoj de la koncernaj ŝtatoj. La sola ebleco en tiaj kazoj estas prunti la vorton el alia lingvo kaj uzi ĝin kiel fremdan aŭ naciigitan en la propra nacia lingvo, se la strukturo de la koncerna lingvo tion permesas, aŭ kiel internaciigitan vorton en la Internacia Lingvo. Ekzemple, estas multe pli bone diri *kolĥozo*, *sovĥozo*, *artelo* k.s. surbaze de la rusaj *kolĥoz*, *sovĥoz*, *artel'*, ol traduki per „mastruma kolektivo”, „soveta mastrumado”, „libervola unuiĝo por agrikultura produktado” aŭ simile. En ĉiu okazo necesas difini la terminojn konforme al la preciza signifo, kiun ili havas en la lingvo, el kiu ili estas prenitaj. Tia termino, foje enkondukita en la lingvon, donas, tutcerte almenaŭ en Esperanto, multajn eblecojn de derivado: *kolĥoza proprieto*, *kolĥozano*, *kolĥozanino*, ktp.

Plej ofte en la lingvoj de la komparataj sistemoj (aŭ en tria lingvo, se oni verkas en ĝi) troviĝas ĝeneralaj juraj terminoj por la traktataj konceptoj, sed la termino en unu lingvo ne kovras la saman nocion en la alia. Ekzemple, eĉ la plej elementaj terminoj kiel *proprieto*, *posedo*, *civila juro*, *krimo*, *kortumo*, *juĝisto*, *advokato*, *notario* kaj centoj da aliaj troviĝas en la angla, franca, rusa, kroata, hispana kaj multaj aliaj lingvoj, sed la juraj konceptoj, kiujn ili kovras, estas tre malsamaj en la respektivaj juraj sistemoj. Sekve, nur per precizaj difinoj kaj ofte per multaj aldonaj klarigoj oni povas eviti konfuzon kaj miskomprenojn, alivorte transdoni la ĝustan informon.

3.2. *Mistradukoj pro nescio*. – Gravaj eraroj okazas ankaŭ pro nesufiĉaj lingvoscioj kaj/aŭ nekontentigaj konoj de la komparataj juraj sistemoj.

En verko de mondkonata kolego la rusa *socialistiĉeskij* (socialista) estis tradukita en la angla per *social* anst. per *socialist*. Rezulte la aŭtoro eksplikas sur pluraj paĝoj, ke la sovetaĵ juĝistoj aplikas juron konforme al sia *social consciousness* (socia konscio) anstataŭ *socialist consciousness* kaj, kompreneble, pro tiu mistraduko faras komplete erarajn konkludojn. Cetere, eĉ se li estus korekte tradukinta per *socialist consciousness* (socialista konscio), li estus devinta ekspliki la sencon de tiu esprimo en la sovetaĵ teorio kaj praktiko por transdoni ĝustan informon al kiu ajn eksterversoetia medio, precipe en la angle parolantaj landoj.

En alia verko la rusa kriminaljura termino *umysel* (dolo) estis erare tradukita per *malice* (malico) kun simile eraraj konkludoj, ĉar en la soveta kriminala juro – same kiel en multaj aliaj kriminaljuraj sistemoj – dolo estas unu el la formoj de kulpo, dum malico povas esti unu el la konstituaj elementoj (ruse *sostav*, germ. *Tatbestand*) de iuj krimoj (ekz. malica huliganismo), kiu implicas ankaŭ dolon, dum tuta aro da krimoj povas esti perperitaj dole, sed sen malico.

Preskaŭ amuza estas la traduko de la rusa *pravo* en subjektiva kaj objektiva senco per *right in a subjective and objective sense* en pluraj anglalingvaj verkoj. En unu la aŭtoro asertas ke la „sovetaj verkistoj” faras „distingon inter la *right* (rajto) de proprieto en objektiva kaj subjektiva sencoj”, kaj li klopodas ekspliki tiun ĉi kvazaŭan „distingon”. Fakte, la sovetaj aŭtoroj devas distingi inter *pravo* en objektiva senco kaj *pravo* en subjektiva senco, ĉar *pravo* en la rusa (precize kiel *jus* en la latina, *Recht* en la germana, *droit* en la franca, *diritto* en la itala, *pravo* en la kroata aŭ serba, kaj idente en multaj aliaj lingvoj) havas du malsamajn signifojn: tiun de juro (*law* en la angla), nome la tuto de preskriboj reguligantaj la rilatojn inter personoj (fizikaj kaj juraj), akceptitaj kaj sankciitaj de la ŝtata aŭtoritato (*pravo* en objektiva senco) kaj tiun de rajto (*right* en la angla), nome povo aŭ kapablo, donita de la juro al personoj, agi aŭ ne agi, uzi objekton aŭ disponi pri ĝi, aŭ postuli ion de aliaj (*pravo* en la subjektiva senco). Tio estas la distingo necesa en ĉiuj juraj sistemoj, en kiuj unusola jura termino kovras ambaŭ signifojn de la latina *jus*, certe ne la neekzistanta „distingo inter rajto en objektiva kaj subjektiva sencoj”, kio estas sensenaĵo en la Internacia Lingvo, same kiel ĝi estas en la angla.

Tiaj eraroj abundas kaj ili komplete perdigas la informon.

3.3. *Malsameco de terminoj* . – Necesus ankaŭ atingi – kaj tio estas ebla – ke en difinita lingvo oni uzu ĉiam la saman terminon por la sama nocio el alia jura sistemo por povi tuj identigi la noción en diversaj verkoj. Nun okazas, ke, depende de la personaj preferoj de la aŭtoroj, oni uzas en la sama lingvo plej diversajn terminojn por difinita koncepto en alia jura sistemo. Tio precipe okazas en la angla kaj usona variantoj de la angla lingvo rilate la rusajn terminojn. Ekzemple, la rusa *obŝĉenarodnoje gosudarstvo* (tutpopola ŝtato) estas tradukata per *all-people's state* aŭ *state of the entire people* aŭ simile. La rusa *pravospobnost'* (jura kapablo) per *juridic capacity*, *juridical capacity*, *legal capacity*; la rusa *dejesposobnost'* (aga kapablo) per *capacity to act*, *legal capacity* (vidu la konfuzon kun jura kapablo), *capacity to enter into legal transactions* k.s.; la rusa *umysel* (dol) per *intent*, *intention*, *premeditation* kaj alimaniere, inkluzive la jam menciitan erarigan *malice*. Kaj same tiel pri multaj aliaj terminoj el soveta kaj orienteŭropaj juraj sistemoj.

Aliflanke ofte okazas, ke por malsamaj fakaj terminoj oni uzas unusolan en la lingvo de la traduko, kio siavice kaŭzas konfuzon. Ekzemple, la rusaj fakterminoj *rajon* (distrikto), *kraj* (teritorio) kaj *oblast'* (regiono) kelkfoje estas tradukataj per la sama angla *district* por la tri malsamaj sovetaĵoj. La ses jugoslavaj respublikoj estas kelkfoje nomataj provincoj, dum la provincoj estas same tiel nomataj provincoj, kio rezultigas, ke Jugoslavio konsistas el ses provincoj kaj du provincoj en unu el la provincoj, anstataŭ ses respublikoj kun du provincoj en unu el ili. Ktp., ktp.

Malpli konfuza, sed tamen ĝena, estas la demando de transskribado per latinaj literoj de tekstoj verkitaj en lingvoj, kiuj ne uzas la latinan alfabeton. Ekzemple,

por la latinlitera transskribado de rusaj tekstoj oni aplikas en la angla almenaŭ tri sistemojn. Ankaŭ la solvo de tiu aspekto estas relative simpla en la Internacia Lingvo pro ĝia fonetika ortografio.

4. Konkludo

4.1. *Unuecigo de la terminaro.* – Diversaj provoj estis faritaj por unuecigi la juran terminaron. Ankaŭ en la sino de la Eŭropa Konsilantaro okazis konferencoj, kiuj pritraktis tiun demandon. La rezultoj ne povis kaj verŝajne neniam povos esti tute kontentigaj pro la kaŭzoj ĵus skizitaj, sed tutcerte almenaŭ io povus esti atingita en du stadioj:

(i) Firme unuecigi la terminaron en ĉiu unuopa nacia lingvo por la juraj konceptoj de aliaj juraj sistemoj kaj akcepti internacian transliterumadon, kiam ajn tio eblas. Tiun laboron devus entrepreni la institutoj de internacia kaj de kompara juro aŭ similaj kompetentaj instancoj de diversaj landoj. La aŭtoroj, profesoroj, prelegantoj kaj aliaj fakuloj devus rigore observadi la regulojn tiel formulitajn.

(ii) Paralele, sed ĉefe post tio, estus eble esplori ĝis kiu grado oni povas internacie unuecigi la terminologion. La neŭtrala Internacia Lingvo povus doni ankaŭ en tiu laboro grandajn servojn kiel pontolingvo kaj kiel lingvo por la bazaj juraj difinoj.

4.2. *Ebla utiligo de la Internacia Lingvo.* – La originala literaturo en la Internacia Lingvo sur la kampo de internacia kaj kompara juro certe ne estas granda kompare kun la literaturo en la lingvoj de grandaj nacioj, sed ĝi estas signifa kaj transpasas la fakan literaturon en la lingvoj de malgrandaj nacioj. Jam estas publikigitaj pluraj verkoj kaj konsiderinda nombro da studoj kaj artikoloj rilatantaj al aktualaj demandoj de internacia publika, privata kaj kompara juro. Aperis ankaŭ pluraj internaciaj traktatoj kaj konvencioj en Internacilingva traduko. Krome, ekzistas kontentigaj juraj terminaroj kaj la jura faklingvo plu konstante evoluas.

Sur la kampo de interancia publika juro la principoj estas

(i) uzi la ekzistantajn ĝeneralajn vortojn en faka senco, kiam ajn tio eblas, kaj apartajn fakajn terminojn, se ili jam estas kreitaj;

(ii) se ne ekzistas konvena termino, krei novan laŭ la principo de la *Fundamento de Esperanto*, ke ĉiu internacia vortradiko povas esti transformita en internacilingvan (pro la unversaleco de la bazaj konceptoj de internacia juro kaj pro la internacieco de la Internacia Lingvo tio estas tre simpla);

(iii) konservi tiujn latinajn esprimojn kaj maksimumojn, kiuj estas jam firme internacie establitaj en la doktrino de internacia juro.

En la sfero de kompara juro la situacio estas pli komplika. Komprenoble, ankaŭ verkante en la Internacia Lingvo la aŭtoroj renkontas malfacilaĵojn, kiujn, pro la objektiva malsameco de signifoj, neniu lingvo povas plene solvi. Tamen, la malfacilaĵoj certe estas multe malpli grandaj ol en la naciaj lingvoj. Tio ŝuldiĝas ĉefe al la strukturo mem de tiu lingvo, kies pozitivaj trajtoj estas: fleksebleco, permesanta esprimi en ĝi ĉiujn nuancojn de la penso kaj, en kazo de citaĵoj, adapti ĝin ĝis maksimumo eĉ al la stilo de la originalo; ĝia aglutina karaktero, kiu prezentas praktike senfinajn eblecojn de derivado; la facileco, per kiu oni povas enkonduki novajn necesajn fakajn esprimojn en ĝin.

Fine, la utiligo de la Internacia Lingvo kiel la sola lingvo de internaciaj konvencioj en la larĝa senco de la vorto forigus ĉiujn problemojn, kiujn nuntempe kaŭzas la kreskanta multlingveco en la juro de traktatoj. En la kazo de organizaĵoj kun supernacia karaktero, kia estas iugrade la nuna EEK, la verkado de juraj tekstoj kun precizaj difinoj en unusola vere internacia lingvo malaperigus, se ne komplete, do almenaŭ grandparte la nunajn oftajn konfuzojn kaj misinterpretadojn. Tio, espereble, iam estos la lasta stadio en la evoluprocezo kiu forigos la amasajn informperdojn pro traduko en la pritraktitaj sferoj.

EŬROPA KONVENCIO DE HOMAJ RAJTOJ

En la rubriko NOTOJ de tiu ĉi numero aperas konciza informo pri la kloŝopa kazo¹, sendube unu el la plej gravaj, kiujn ĝis nun prijuĝis la Eŭropa Kortumo de Homaj Rajtoj. Lige kun tio estas utile pritrakti iom pli detale la signifon de la Eŭropa Konvencio de Homaj Rajtoj kaj ĝian elstaran pozicion en la nuntempa internacijura sistemo de homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj.

1. Iom da historio

En 1948, do en la sama jaro, en kiu estis proklamita la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, en Hago kunvenis Kongreso de la Eŭropa Movado sub la prezido de Winston Churchill, en la ĉeesto de Reĝino Juliana kaj de nombro da eminentuloj el eŭropaj landoj. La Kongreso iniciatis la kreon de Eŭropa Konsilantaro kaj akcentis, ke unu el la celoj de la Konsilantaro devus esti la protekto de la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj.

Efektive, kiam en printempo de 1949 estis ellaborita la Statuto de la Eŭropa Konsilantaro, la sugestoj de la Haga Kongreso estis prenitaj en konsideron. Art. 3 de la Statuto tekstas:

„Ĉiu membro de la Eŭropa Konsilantaro devas akcepti la principojn de juregado kaj ĝuado de la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj fare de ĉiuj personoj en la kadro de sia jurisdikcio, kaj sincere kaj efike kunlaboradi por la realigo de la celo de la Konsilantaro kiel ĝi estas difinita en la Unua Ĉapitro”.

La kapablo kaj preteco de ŝtato plenumi la menciitajn preskribojn de Art. 3 estas kondiĉo de membreco laŭ Art. 4 de la Statuto.

Komence de sia Unua Sesio, en aŭgusto 1949, la Konsulta Asembleo de la Eŭropa Konsilantaro decidis meti en la tagordon la studadon de la konservo kaj plua realigado de la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj. Per tio komenciĝis sufiĉe longa kaj komplika procedura vojo, kiu kondukis de la Komitato de Ministroj – la alia ĉeforgano de la Eŭropa Konsilantaro – al Komitato pri Juraj kaj Administraj Demandoj, de tie al la Komitato de Juraj Ekspertoj, ree al la Komitato de Ministroj,

1) Kloŝopo, neologismo troviĝanta en *Internacia Komerca-Ekonomika Vortaro en 9 lingvoj* de F. Munniksmā (Kluver, Deventer, 1974), estas sindikatrezervita entrepreno, t.e. entrepreno kie oni rajtas dungi nur sindikatanojn (p. 51).

de tiu al aparta „kunveno de altrangaj oficialuloj” kaj plian fojon al la Komitato de Ministroj, al la Konsulta Asembleo ktp., ĝis, fine, la Konvencio estis subskribita en Romo la 4-an de novembro 1950.

Laŭ la originala propono de la Konsulta Asembleo, dek rajtoj devis esti inkluzivitaj en la Konvencio. Tiuj rajtoj respondis al la dek fundamentaj rajtoj en la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, akceptita la 10-an de decembro 1948 de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj. Ili estis (parenteze estas indikitaj de artikoloj de la U.D.):

1. Sekureco de la persono (3, 5, 8); 2. ekskludo de sklaveco kaj servuteco (4); 3. ekskludo de arbitraj aresto, malliberigo kaj ekzilo (9, 10, 11); 4. ekskludo de arbitra enmiksiĝo en la privatan kaj familian vivon, hejmon kaj korespondadon (12); 5. libereco de pensado, konscienco kaj religio (18); 6. libereco de opinio kaj opiniesprimado (19); 7. libereco de kunvenado (20); 8. libereco de asociiĝo (20); 9. libereco aliĝi al sindikatoj (23); 10. rajto geedziĝi kaj fondi familion (16).

Tiuj rajtoj estis nur listigitaj, same kiel en la Universala Deklaracio, sed ne difinitaj. Precize la demando pri la difinado de la rajtoj elvokis grandajn diskutojn en la diversaj instancoj, kiuj pritraktis la demandon, tute speciale en la Komitato de Juraj Ekspertoj. Esprimiĝis ĉefe du starpunktoj:

La unua pledis por la nura listigo de la rajtoj, tiel ke la leĝdonaj organoj de la Ŝtatoj-Membroj havus la eblecon – kaj liberecon, kompreneble – difini ilin konforme al la internaj bezonoj kaj la konceptoj de la propra jura scienco. Ili argumentis, ke estas tre malfacile difini en internacia konvencio la homajn rajtojn, kaj ke en ĉiu okazo estus pli oportune atendi la rezultojn de la tiurilataj laboroj de la Komisiono pri la Homaj Rajtoj de UN.

La alia skolo prave argumentis, ke en konvencio oni devas precize difini la protektatajn rajtojn kaj la permesitajn limigojn, por ke ĉiu ŝtato klare vidu ĉu la interna leĝaro estas konforma al la sindevigoj akceptitaj per la konvencio, tiel ke ĝi povu, se necese, adapti siajn leĝojn al la preskriboj de la konvencio.

La fina teksto de la Eŭropa Konvencio enhavas kompromisan formulon: ĝi kaj listigas kaj difinas la rajtojn, kio praktike tamen signifas, ke la dua starpunkto havis pli da pezo en la finredaktado. Por ke oni pli klare vidu la tiurilatan diferencon inter la Universala Deklaracio kaj la Eŭropa Konvencio, estas bone analizi almenaŭ unu artikolon. Tio samtempe klarigos la diferencon inter la t.n. „teorio de listigo” kaj la „teorio de difino”.

La unua rajto, kiun mencias la U.D., estas entenata en Art. 3 kiu tekstas: „Ĉiu havas la rajton je vivo, libereco kaj persona sekureco”. Ankaŭ en la Eŭropa Konvencio tiuj rajtoj estas formulitaj en apartaj artikoloj, sed ĝi ne limigas sin nur al ĝenerala deklaro. Laŭ la adeptoj de la teorio de listigo necesis nur transpreni laŭvorte la tekston de la Universala Deklaracio. Male, la adeptoj de la teorio de difino opiniis, ke, ekzemple, estas necese ne nur principe proklami la rajton je vivo, sed ankaŭ precizigi la cirkonstancojn, en kiuj iu persono povas esti senigita de sia vivo, unuavice en kazoj de mortpuno, se laŭ la interna jura sistemo ĝi estas antaŭvidita por difinitaj escepte gravaj krimoj aŭ en kazoj de necesa defendo aŭ similaj kazoj leĝe rekonitaj. La rezultoj de tiu metodo de difinado vidiĝas klare en Art. 2 de la

Konvencio, kiu precizigas la kazojn, en kiuj iu persono povas esti senigita de sia vivo. Ĝenerale parolante, la sama metodo estas aplikita ankaŭ en la aliaj artikoloj de la Konvencio.

La metodo de difinado havas multajn avantaĝojn. La ordinaraj civitanoj scias precize pri kiuj rajtoj efektive temas kaj ĝis kiu grado ili povas esti limigitaj. Siavice, la aŭtoritatoj kaj ankaŭ la individuoj povas adapti sian konduton, tiel ke la permesitaj limigoj de la homaj rajtoj ne estu transpasitaj. Aliflanke, necesas memori, ke ĉiu difino entenas danĝerojn, ĉar estas ege malfacile fiksi en koncizaj abstraktaj formuloj la konkretajn sennombrajn situaciojn, kiuj povas ekesti en la realo de la vivo. Ĉiam povas okazi, ke neintencaj ellaso estu interpretataj kiel intencaj ekskludoj. Nur en la praktika aplikado elproviĝas ĉiu leĝo, ĉiu internacia interkonsento, inkluzive precipe tian delikatan instrumenton, kia estas la Konvencio de Homaj Rajtoj.

2. Pozicio de la Ŝtatoj-Membroj: la Komisiono

La registaroj de la Ŝtatoj-Membroj akceptis la ideon de la Eŭropa Asembleo, ke aparta komisiono devus esti formita kiel internacia organo, al kiu la Ŝtatoj-Membroj povus plendi, se la rajtoj difinitaj en la Konvencio ne estos observataj.

Tiu ideo trovis eĥon en la Tria Parto de la Konvencio, kiu en Art. 20–37 difinas la rolon kaj funkciadon de la Eŭropa Komisiono de Homaj Rajtoj. Konforme al tiuj artikoloj, la Komisiono konsistas el difinita nombro da personoj, kiu egalas al la nombro de la Ŝtatoj-Membroj de la Eŭropa Konsilantaro, nuntempe 21. La tasko de la Komisiono estas esplori ĉiujn malobservojn de la Konvencio. Tiucele la Ŝtatoj-Membroj devigis sin havigi al ĝi ĉiujn necesajn faciligojn kaj, se iel eble, solvi amike la malkonsenton. Aparta subkomitato estas ŝarĝita, en kazo de konflikto, klopodi pri amika solvo. Tiu subkomitato konsistas ĉiam el 7 membroj, el kiuj ĉiu partio en la konflikto povas nomi unu, dum la aliaj estas elektataj per lotado. Se oni sukcesas atingi amikan interkonsenton, la subkomitato verkos kaj publikigos koncizan raporton. Se la klopodo estas sensukcesa, la tuta Komisiono devas kunmeti raporton, en kiu ĝi esprimos opinion pri la demando ĉu la establita faktoj prezentas malobservon de la Konvencio fare de la koncerna ŝtato. La Komisiono devas sendi sian raporton al la Komitato de Ministroj kaj fari proponojn, kiujn ĝi opinias taŭgaj por solvi la konflikton. Se la Komitato de Ministroj decidas, ke efektive iu ŝtato malobservis la Konvencion, ĝi fiksos periodon, dum kiu la koncerna ŝtato devas entrepreni difinitajn paŝojn por ripari la malobservon. Se la koncerna ŝtato ne konformiĝas al tiu decido en la fiksita tempolimo, la Komitato de Ministroj decidos per dutriona plimulto kion entrepreni, por ke la originala decido estu plenumita. Ĝi ankaŭ publikigos la raporton. Laŭ la Konvencio la Ŝtatoj-Membroj devigis sin akcepti la decidojn de la Komitato de Ministroj, faritajn konforme al la ĵus priskribitaj reguloj.

3. Rajtoj de privatuloj

Ĉio ĝis nun dirita koncernas la rilatojn inter la ŝtatoj mem, kiuj povas plendi unu kontraŭ la alian al la Komisiono pro malobservo de la Konvencio. La valoro

de tiu principo, kvankam grava per si mem, tamen estas limigita. Kiam la celo de internacia konvencio estas protekti ne la ŝtatojn, sed la individuojn – kaj precize pri tio temas en la kazo de homaj rajtoj – tiam, se okazas malobservo de la konvencio, la damaĝita partio ne estas la ŝtato, sed la individuo, kies rajtoj ne estis observataj. Komprenible, plej ofte la malobservanto estas lia propra ŝtato. Oni ne povas atendi, ke la ŝtato mem, kiu malobservis la rajton de la individuo, entreprenos kion ajn por ripari la malbonon. Tial jam delonge sentiĝis la bezono rajtigi la individuon postuli protekton de siaj rekonitaj rajtoj antaŭ internacia organo kontraŭ la propran ŝtaton. La Eŭropa Konvencio estas la unua internacia akto en la tuta historio de internacia juro, kiu donas al la individuo tiun rajton sub difinitaj kondiĉoj.

La afero, komprenible, ne evoluis glate. Estis fortaj kontraŭstaroj. Fine, oni akceptis kompromisan solvon formulitan en Art. 25 de la Konvencio. Laŭ tiu artikolo ĉiu unuopulo, privata organizaĵo aŭ grupo da unuopuloj, kiuj asertas, ke ili estas viktimoj de malobservo de la rajtoj difinitaj en la Konvencio fare de kiu ajn Ŝtato-Membro, povas plendi al la Komisiono, sed nur sub la kondiĉo, ke la koncerna ŝtato anticipe deklaris, ke ĝi akceptas la jurisdikcion de la Komisiono kaj Kortumo por trakti tiaspecajn privatajn plendojn. Plua kondiĉo estas, ke ĉiuj internaj rimedoj, je dispono de la individuo, estis elĉerpitaj. Por malebligi misuzon de tiu gravega rajto, Art. 27 preskribas, ke la Komisiono ne akceptos anonimajn peticiojn, aŭ plendojn pri afero, kiun la Komisiono jam ekzamenis, aŭ kiu estis prezentita al alia internacia instanco, aŭ submetita al alia proceduro. Same tiel la Komisiono ne traktos peticiojn, kiujn ĝi rigardas evidente senbazaj aŭ kontraŭaj al la Konvencio. Art. 25 antaŭvidas, ke la rajto je individua peticio-plendo ekfunkcios en la momento, kiam 6 Ŝtatoj-Membroj deklaras sian akcepton. Svedio kiel la unua akceptis. Sekvis Irlando, Danlando, Islando, Germana Federacia Respubliko kaj Belgio. Sekve, la 5-an de julio 1955 la rajto de individua peticio-plendo, antaŭvidita en Art. 25 de la Konvencio, efektiviĝis. Poste similajn deklariojn faris Norvegio, Luksemburgo, Aŭstrio, Nederlando kaj aliaj ŝtatoj. Britio, kiu inter la unuaj subskribintoj ratifikis la Konvencion, akceptis la devigan jurisdikcion laŭ Art. 25 nur en 1966, kaj tion ĝi faris kun tempa rezervo, t.e. nur por difinita periodo. Sinsekvaj britaj registaroj daŭrigis la praktikon renovigi la akcepton kun tempa rezervo anstataŭ senrezerve, nome por nedifinita tempo. Komence de tiu ĉi jaro Britio denove renovigis la akcepton kun tempa rezervo. Ĝis nun entute 14 Ŝtatoj-Membroj akceptis la jurisdikcion de la Komisiono kaj Kortumo laŭ Art. 25. Estas interese menci, ke el la ŝtatoj nun apartenantaj al Eŭropa Ekonomia Komunuaĵo (EEK) nur Francio neniam akceptis Art. 25. Grekio, unu el la kandidatoj por baldaŭa membreco, ĝis nun firme rifuzis, Hispanio, Turkio kaj Cipro same tiel rifuzis, sed Portugalio – plia kandidato por membreco en EEK – jam rekonis la rajton je individua plendo.

Ĝis nun kelkaj miloj da individuaj plendoj estis prezentitaj al la Komisiono, kaj pliaj estas daŭre prezentataj. La plimulto de la plendoj estis forĵetitaj jam de la Komisiono kiel neakcepteblaj pro diversaj kaŭzoj. Unu el la plej gravaj antaŭaj kazoj, kiujn la Komisiono deklaris neallaseblaj, estis tiu de la germana Komunista Partio, kiu plendis kontraŭ la decidon de la Federacia Konstitucia Kortumo de FR Germanio de aŭgusto 1956, laŭ kiu la KP estis deklarita kontraŭleĝa, dissolvita kaj ĝia havaĵo

konfiskita. La Komisiono en sia decido deklaris, ke la petskribo estas neallasebla surbaze de Art. 17 de la Konvencio, kiu eksplicite preskribas, ke nenio en la Konvencio povas esti interpretata kiel rajto de kiu ajn ŝtato, grupo aŭ persono entrepreni kiun ajn aktivadon aŭ fari kiun ajn agon, kiu celas la nuligon de la rajtoj kaj liberecoj, aŭ pli grandan limigon de tiuj rajtoj, ol estas antaŭvidita en la Konvencio.

La unua kazo de individua plendo estis tiu de Lawless – nomo kiu laŭ stranga koincido signifas „senrajta” – kontraŭ Irlandon pro malliberigo sen juĝa proceduro de suspektata membro de la t.n. Irlanda Respublika Armeo. Tiu kazo estis deklarita allasebla.

La problemo de aparta kortumo por trakti plendojn pro malobservo de la homaj rajtoj same tiel trovis kompromisan solvon per la formulo de fakultativa (libervola) jurisdikcio. Laŭ la Konvencio, la Eŭropa Kortumo de Homaj Rajtoj havas jurisdikcion nur en kazoj koncernantaj tiujn ŝtatojn kiuj eksplicite akceptis ĝin. Nuntempe la Kortumo konsistas el 21 juĝistoj, po unu el ĉiu Ŝtato-Membro. La ofico daŭras 9 jarojn. La Kortumo traktas nur tiujn kazojn, kiujn la Komisiono ne povis solvi. La plendo devas esti prezentita en tempolimo de 3 monatoj post la momento, kiam la Raporto de la Komisiono pri sensukcesa klopodo atingi amikan solvon estis transdonita al la Komitato de Ministroj.

Kiel oni vidas, la Eŭropa Konvencio efektive konsistas el 3 ĉefaj partoj. La unua listigas kaj difinas la homajn rajtojn; la dua pritraktas la internaciajn organojn por protekto de la rekonitaj rajtoj; la tria rilatas al teknikaj demandoj koncerne la kostojn por la funkciigo de la tuta aparato, la privilegiojn kaj imunecon de la membroj de la Komisiono kaj Kortumo, kaj plurajn aliajn aferojn.

4. Konkludo

Malgraŭ la koncizeco de tiu ĉi prezento, klare vidiĝas la esencaj diferencoj inter la Universala Deklaracio kaj la Eŭropa Konvencio. La ĉefaj povas esti resumitaj jene:

La unua okulfrapa diferenco estas, ke la Universala Deklaracio nur abstrakte listigas la fundamentajn homajn rajtojn kaj liberecojn, dum la Eŭropa Konvencio ankaŭ difinas ilin en la plimulto de la kazoj, precizigante la eblecojn jure limigi ilin.

Plue, el formale-jura vidpunkto la Universala Deklaracio, kiel la nomo mem diras, estas deklaro de principoj kaj ne interŝtata konvencio. Tial, kiel eksplikite en la libro *Aktualaj Problemoj de la Nuntempa Internacia Vivo* (p-oj 73–92), la Universala Deklaracio estas el formale-jura vidpunkto nur rekomendo, do nedeviga por la Ŝtatoj-Membroj de UN, kvankam el vidpunkto de sia enhavo tamen deviga laŭ la malrektaj vojoj prezentitaj en la menciita verko (v. ankaŭ IJR 1/77, p-oj 19–30). Male, la Eŭropa Konvencio estas egala al kiu ajn alia interŝtata traktato, kaj tial deviga por ĉiuj ŝtatoj kiuj subskribis kaj ratifikis ĝin.

Trie, malantaŭ la Universala Deklaracio ne troviĝas efika internacia aparato kiel instrumento de garantio por realigo de la homaj rajtoj kaj liberecoj rekonitaj en la Deklaracio. Kontraŭe, la Eŭropa Konvencio antaŭvidis internaciajn organojn por internacia protekto de la rajtoj, kaj tiuj organoj kontentige funkcias. Eĉ pli, la

Eŭropa Konvencio donis la rajton de peticio-plendo ankaŭ al unuopuloj kaj privataj organizaĵoj en difinitaj kazoj, kio signifas grandegan paŝon antaŭen sur tiu ĉi kampo. La unuan fojon en la historio de internacia juro – se oni esceptas la kazojn de piratoj kaj militkrimuloj – la individuo fariĝis, preter la ŝtato, subjekto de internacia juro kiu povas mem, en sia nomo kaj ne nur tra sia ŝtato, defendi siajn rajtojn kaj liberecojn eĉ kontraŭ sian propran ŝtaton.

Temas pri efektive grandaj kaj esencaj diferencoj. La homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj estas hodiaŭ formale rekonitaj ĉie en la mondo, sed nur en la demokrata parto de Eŭropo tiuj rekonitaj rajtoj estas ankaŭ protektataj de internaciaj organoj. La akiroj atingitaj en la sino de la Eŭropa Konsilantaro estis eblaj pro la esence identaj aŭ tre similaj ŝtataj strukturoj, demokrataj politikaj institucioj, kulturaj valoroj, ideologiaj fonoj, tradicioj kaj aspiroj de la nacioj apartenantaj al tiu organizaĵo. Eble iam la Eŭropa Konvencio servos kiel modelo por tutmonda konvencio por protekto de la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj en ĉiuj partoj de la terglobo.

Oni, tamen, neniam forgesu, ke al ĉiu rajto respondas difinita devo, unuavice la devo respekti la samajn rajtojn de aliaj, kaj ke neniu demokrata jura sistemo, eĉ ne la maksimume perfekta, povas sukcese protekti la liberecon de ĉiuj, se forestas minimuma socia memdisciplino, se la misuzo de la rajtoj kaj liberecoj transformas demokration en anarkion, kiu siavice malfermas la pordon al totalismo.

LA KONCEPTO DE KRIMO LAŬ LA KRIMINALA JURO DE USSR KAJ SFR JUGOSLAVIO

1. Pozicio en jura sistemo

Jura sistemo de kiu ajn lando estas la tuto de reciproke kunligitaj kaj inter si nekontraŭdiraj juraj branĉoj. Depende de la aplikataj kriterioj, la juraj sistemoj de Soveta Unio kaj SFR Jugoslavio konsistas el 12–15 juraj branĉoj. En ambaŭ landoj la familia juro estas rigardata kiel aparta jura branĉo, dum en multaj aliaj ŝtatoj ĝi formas parton de civila juro. En USSR la juro rilatanta al kolĥozoj estas aparta jura branĉo, kiun Jugoslavio ne konas. En ambaŭ landoj la ĉefaj juraj branĉoj estas la klasikaj: konstitucia, administracia, buĝeta-financa, civila, civilprocedura, kriminala, kriminal-procedura, laborrilata, k.a.

Same kiel an aliaj ŝtatoj, ankaŭ en USSR kaj SFRJ la kriminala juro estas unu e la plej gravaj kaj sensivaj branĉoj. Ĝi rilatas al la protekto de valoroj rigardataj kiel esencaj por la ekzisto kaj evoluo de la koncernaj socioj, kaj tiun protekton ĝi realigas ne per civiljuraj aŭ administraciaj rimedoj kaj devigoj, sed per kriminaljuraj sankcioj, inkluzive malliberigon aŭ eĉ mortpunon, do ĉiam suferigaj por la individuo, kvankam la celo de la puno estas ankaŭ speciala kaj ĝenerala prevento.

La kerno de kriminala juro estas la koncepto de krimo. En tiu ĉi artikolo estos koncize analizita nur tiu baza koncepto en la kriminala juro de USSR kaj SFR Jugoslavio.

2. Iom de historio kaj nunaj formalaj fontoj

En Ruslando post la Oktobra Revolucio de 1917 la imperia jura sistemo estis abolita. Nova juro estis rapide kreata per diversaj preskaŭ ĉiutagaj dekretoj kun forto de leĝo. Sur la kampo de kriminala juro la unua signifoplena leĝdona akto estis la t.n. Gvidprincipoj de Kriminala Juro de Rusa Soveta Federacia Socialisma Respubliko (RSFSR) de la 12-a de decembro 1919. Art. 6 difinis krimon kiel „agon aŭ preterlason agi, danĝeran por difinita sistemo de sociaj rilatoj”. En la jura teorio de Sovetio oni emfazadis, ke per tiu dokumento la soveta juro „firme ekiris la vojon” de la t.n. materia difino de krimo. La kvintesenco de tiu koncepto estas, ke ne nur iu leĝe difinita ago aŭ preterlaso agi (faro aŭ nefaro, se la kriminala leĝo preskribas faron) estu rigardata kiel krimo, sed ĉiu „socie danĝera” ago (faro aŭ nefaro) direktita

kontraŭ la sovetan ŝtaton aŭ kontraŭ ĝian ekonomian, socian aŭ politikan sistemon. La materia difino de krimo en tiu ĉi senco (nuntempe ĝi havas alian signifon) estis ĝis decembro 1958 emfaze laŭdata en la sovetia teorio kiel unu el la grandaj atingoj de la sovetia jura scienco sur la kampo de kriminala juro. Ekzemple, P. I. Kudrjavcev skribis en la prestiĝa *Vortaro de Juraj Terminoj (Juridiĉeskij Slovar', 1956)*:

„Distinge de la formalaj, politike malplenaj, difinoj de la koncepto de krimo donataj de la burĝaj kriminalaj kodoj (‘krimo estas ago malpermesita sub minaco de puno’), la difino de krimo entenata en la sovetia kriminala leĝaro estas materia, t.e. ĝi malkovras klasan-politikan naturon de tiuj socie danĝeraj agoj aŭ preterlasoj agi, kiuj estas rigardataj krimaj kaj punendaj kiel krimoj”.

La Kriminala Kodo de RSFSR de 1922, la Fundamentaj Principoj de Kriminala Leĝaro de USSR kaj de la Uniaj Respublikoj de la 31-a de oktobro 1924, kiel ankaŭ la postaj kriminalaj kodoj de ĉiuj uniaj respublikoj, entenis la saman materian difinon de krimo. Ekzemple, art. 1 de la Kriminala Kodo de RSFSR kaj la kriminalaj kodoj de la aliaj respublikoj preskribis, ke la tasko de la kriminala leĝaro estas protekti „la socialisman ŝtaton de laboristoj kaj kamparanoj” kontraŭ „socie danĝerajn agojn”. Art. 6 difinis socie danĝeran agon (krimon) kiel „agon aŭ preterlasojn agi direktitan kontraŭ la sovetan sistemon aŭ malobservantan la juran ordon establitan de la laborista-kamparana aŭtoritato por la periodo de transiro al komunisma organizo (de la socio)”. Utilas, eble, klarigi, ke, laŭ la originala marksisma doktrino, ŝtato, juro kaj tial ankaŭ krimo devus komplete malaperi en plena komunismo. Tial la vortoj „por la periodo de transiro al komunisma organizo /de la socio/”.

Ĉiuj sovetiaj kriminalaj leĝoj kaj kodoj antaŭ la 25-a de decembro 1958 permesadis analogion. Ekzemple, art. 16 de la Kriminala Kodo de RSFSR tekstis jene:

„Se tiu aŭ alia socie danĝera ago ne estas eksplicite preskribita en tiu ĉi kodo, la bazo kaj limoj de respondecado devas esti determinitaj per apliko de tiuj artikoloj de la kodo, kiuj difinas krimojn genre la plej similajn”.

La materia difino de krimo kaj analogio en kriminala juro estis siatempe, antaŭ la stalinisma teroro de la tridekaj jaroj, kritikataj eĉ en Soveta Unio kiel provizora retiriĝo desur la vojo de strikta leĝeco. Troviĝis aŭtoroj, kiuj prave asertis, ke la materia difino de krimo kaj analogio transformis la Specialan Parton de la Kriminala Kodo (en la Speciala Parto estis difinitaj la unuopaj krimoj) en simplan listigon de ekzemploj de krimoj. Efektive, analogio eĉ ne estis necesa. Se kiu ajn ago povas esti rigardata de la kortumoj kiel „socie danĝera ago”, do krimo, kaj punata kiel krimo, la analogio estas komplete superflua. Ekde la komenciĝo de la tridekaj jaroj tiaj kritikoj de la materia koncepto kaj de analogio ne plu estis aŭdeblaj. Fakte, en Sovetio la materia koncepto kaj analogio estis abunde utiligataj kiel pliaj rimedoj por arbitraj arestoj, kondamnoj, enkarcerigoj kaj ekzekutoj.

Post la fama „malkovro” de la stalinismaj krimoj fare de Ĥruŝĉov kaj la ioma liberaliĝo de la tuta sistemo, la Supera Soveto de USSR akceptis la 25-an de decembro 1958 novan bazan kriminalan leĝon sub la titolo Fundamentaj Principoj de Kriminala Leĝaro de USSR kaj de la Uniaj Respublikoj. La ĉefa novaĵo estis la enkonduko de la formala elemento, aldone al la materia, en la difinon de la koncepto de krimo. Pri tio pli detale en la sekvantaj sekcioj.

Jugoslavio havis antaŭ la Dua Mondmilito tre modernan Kriminalan Kodon, bazitan sur la principo *nullum crimen, nulla poena sine lege* (nek krimo, nek puno sen leĝo). Post la milito Jugoslavio, kiu tiutempe ĉiurilate imitis la sovetiajn politikan sistemon kaj juron, enkondukis la materian difinon per la Kriminala Kodo (Ĝenerala Parto) de la 4-a de decembro 1947. Art. 3/1 preskribis, ke ne ekzistas kriminala respondeco por ago (faro aŭ nefaro), kiu ne estas socie danĝera, dum art. 3/2 difinis, ke socie danĝera estas „ago, kiu endanĝerigas aŭ detruas la ŝtatan kaj socian ordon, la sendependecon kaj sekurecon de FPR Jugoslavio (en tiu tempo Jugoslavio estis nomata Federacia Popola Respubliko, mia rim.), la personon de la civitanoj, iliajn rajtojn kaj la rajtojn de sociaj organizaĵoj, kaj ĝenerale la juran sistemon establitan per la Federacia Konstitucio kaj per la konstitucioj de la popolaj respublikoj”. Art. 3/3 enkondukis analogion preskribante, ke „ekzistas kriminala respondeco por tiu socie danĝera ago, kiu, kvankam ne difinita eksplicite en leĝo, tamen laŭ simileco de siaj konsistaj elementoj respondas al ago eksplicite difinita en leĝo”.

Malgraŭ la iomaj malsamecoj en la vortigo, la esenco kaj konsekvencoj de la jugoslavia difino estis identaj al la sovetia.

Same kiel en Soveta Unio, sensignifeco de la socia danĝero kaj sensignifeco aŭ foresto de damaĝaj sekvoj senigis la agon (faron aŭ nefaron) de krima karaktero. Ŝanĝitaj sociaj-politikaj cirkonstancoj antaŭ la plenvalideco de la juĝo, pro kiuj la ago perdis sian socie danĝeran karakteron, same tiel perdigis al la ago la karakteron de krimo.

Jam en 1951, do sep jarojn antaŭ Soveta Unio, Jugoslavio aldonis la formalan elementon. La nova, kompleta Kriminala Kodo de la 2-a de marto 1951 jene difinis krimon en art. 4: „Krimo estas socie danĝera ago, kies konsistaj elementoj estas difinitaj en leĝo”. En la dua alineo la sama art. preskribis, ke „ne estas krima tiu ago, kiu, kvankam ĝi entenas la konsistajn elementojn de krimo difinitajn en leĝo, prezentas sensignifan socian danĝeron pro la malgrava signifo kaj pro la sensignifeco aŭ foresto de damaĝaj sekvoj”.

Tiu Kriminala Kodo abolis la analogion.

La nun valida Kriminala Kodo de SFRJ de la 28-a de septembro 1976 akceptis la saman materian-formalan difinon de krimo, sed pliprecizigis ĝin jene: „Krimo estas socie danĝera ago, kiu en leĝo estas determinita kiel krimo kaj kies konsistaj elementoj estas difinitaj en leĝo”. La dua alineo de la sama artikolo estas identa al la dua alineo de art. 4 de la Kriminala Kodo de 1951.

Soveta Unio kaj Jugoslavio estas multnaciaj federacioj. Soveta Unio konsistas el 15 uniaj respublikoj, el kiuj kelkaj siavice konsistas el aŭtonomaj respublikoj, aŭtonomaj regionoj kaj aŭtonomaj distriktoj, aldone al ununaciaj administraciaj teritorioj, regionoj kaj distriktoj. Jugoslavio konsistas el ses respublikoj kaj du provincoj en Respubliko Serbio. Pro tiu federacia strukturo, nuntempe la leĝdona jurisdikcio en diversaj juraj branĉoj, inkluzive kriminalan juron, estas dividita inter la centraj federaciaj organoj kaj la uniaj-respublikaj en Soveta Unio, respektive la respublikaj kaj provincaj en Jugoslavio. Sekve, en Soveta Unio la ĉefaj fontoj de kriminala juro estas la Konstitucio de USSR, la konstitucioj de la 15 uniaj respublikoj, la federacia kriminala leĝaro kaj la 15 kriminalaj kodoj de la 15 uniaj respublikoj.

En Jugoslavio la ĉefaj fontoj estas la Federacia Konstitucio, la konstitucioj de la respublikoj kaj provincoj, la Kriminala Kodo de SFRJ, la 8 kriminalaj kodoj de la 6 respublikoj kaj 2 provincoj. Malgraŭ tiu abunda kriminala leĝaro, la koncepto de krimo estas la sama en la tuta jura sistemo de Sovetio, respektive en la tuta jura sistemo de Jugoslavio.

3. Nuntempa koncepto

Same kiel en Jugoslavio ekde la Kriminala Kodo (en plua teksto KKJ) de 1951, en Soveta Unio ekde la leĝo (Fundamentaj Principoj) de la 25-a de decembro 1958 la difino de krimo entenas du elementojn: la materian kaj la formalan. Laŭ tiu leĝo kaj laŭ ĉiuj postaj kriminalaj kodoj bazitaj sur ĝi, krimo estas socie danĝera ago (estu ripetite: faro aŭ nefaro, se la kriminala leĝo postulas faron) difinita en leĝo (kodo). Tio signifas, ke la ago devas esti ne nur socie danĝera (materia elemento), sed ankaŭ difinita en leĝo, plej ofte en la Speciala Parto de la koncerna KK (formala elemento). Ago, eĉ se ĝi estas objektive danĝera por la socio en la tempo de perpetro*, ne plu povas esti rigardata kiel krimo, se ĝiaj konsistaj elementoj (ruse *sostav*, *biće* en la kroata-serba) ne estas entenataj en la difino de iu krimo.

La materia elemento en la difino nun havas alian signifon ol antaŭe en la kriminala juro de ambaŭ landoj. Pli frue ĝi povis esti aŭ malavantaĝa por la perpetrinto (kutima kazo), ĉar li povis esti kondamnita pro ago ne antaŭvidita kaj formale difinita en leĝo kiel krimo; aŭ avantaĝa, ĉar li povis esti liberigita, se la konkreta ago, kvankam leĝe difinita kiel krimo, fakte prezentis nur sensignifan socian danĝeron aŭ intertempe ĉesis esti socie danĝera. Nuntempe nur la lasta estas jure ebla. La leĝo preskribas (art. 4/2 de la jugoslavia KK, aŭ art. 7/2 de la KK de RSFSR), ke ago (aŭ preterlaso agi), kiu entenas ĉiujn konsistajn elementojn de krimo, sed kiu pro sia sensignifeco ne prezentas kian ajn iel gravan socian danĝeron, ne estas krimo. Por ke estu tute klare: kortumo ne rajtas deklari, ke iu ago abstrakte difinita en leĝo kiel krimo, ne estas krimo, sed ĝi rajtas deklari, ke iu konkreta perpetranta ago estas tiel sensignifa, ke ĝi ne estas krimo. Ekzemple, kortumo ne rajtas deklari, ke ŝtelo ne estas krimo, sed ĝi rajtas establi, ke ŝtelo de kelkaj cigaredoj aŭ de alumetskatolo, aŭ alproprigo de kelkaj kopekoj (en unu kazo eĉ 56 rubloj, t.e. ĉ. 50 dolaroj, kio ne ŝajnas tre sensignifa) aŭ dinaroj k.s. prezentas tiel sensignifan socian danĝeron, ke tiu konkreta ago ne estas krimo.

La nuna materia difino donas al kortumoj ankaŭ aliajn eblecojn. Pritrakti ilin iom detale postulus apartan artikolon. Estu tamen menciita almenaŭ la ebleco liberigi la perpetrinton de kriminala respondeco kaj puno, se la ago perdis sian socie danĝeran karakteron pro ŝanĝitaj cirkonstancoj, aŭ se la perpetrinto ĉesis esti socie danĝera en la tempo de la esplorado aŭ en tiu de la proceso. Ĉi tie ne temas pri

* „Perpetri” estas nepre necesa jura fakesprimo signifanta „fari, plenumi agon leĝe difinita krimo, delikto, kontravencio” (angle *to commit, to perpetrate*; france *commettre*; germane *verüben, begehen*). sekve, „perpetrulo”: persono, kiun karakterizas perpetro de tia ago; „perpetranto” aŭ „perpetrinto” persono, kiu konkrete perpertras aŭ perpertris tian agon, ktp. Komparu la difinon sur p. 38 de *Internacia Jura Revuo* n-ro 1/79 kaj iom korektu ĝin laŭ la supra difino.

deklaro, ke la ago ne estas krimo, sed pri neapliko de puno pro la menciitaj kaŭzoj, kvankam la konkreta ago estas krimo.

Analogio ne plu estas permesita. Tamen, la difinoj de politikaj krimoj – en Soveta Unio ankaŭ de multaj aliaj – estas tiel vaste neprecizaj, ke ili povas kovri ajnan konkretan agon, kiun la suproj de la ŝtataj-partiaj aŭtoritatoj, kaj tial ankaŭ la kortumoj, rigardas danĝeraj por la reĝimo. Eĉ kiam ili estas relative bone difinitaj, la kortumoj ofte malatentas unuopajn konsistajn elementojn, sen kiuj la ago tute ne estas krimo. Tipa ekzemplo estas la misfama art. 70 de la KK de RSFSR (kaj la identaj artikoloj de 14 aliaj KK-oj de USSR), laŭ kiu la konsistaj elementoj de „kontraŭsovetia agitado kaj propagando” estas interalie: „agitado aŭ propagando *celanta subversi aŭ malfortigi* la sovetian aŭtoritaton”, aŭ „cirkuligado, kun la *sama celo*, de *mensogaj inventaĵoj*, kiuj kalumnias la sovetan ŝtaton kaj socian sistemon”. En neniu el la tre multnombraj konataj kazoj (por ne paroli pri la miloj de nekonataj) la prokuroroj eĉ provis pruvi, ke la diroj de la akuzitoj estis mensogaj inventaĵoj kaj ke ilia celo estis subversi aŭ malfortigi la sovetian aŭtoritaton, nek la kortumoj permesis al la akuzitoj pruvi la verecon de la diroj kaj foreston de kia ajn subversa aŭ malfortiga celo. Kvankam en neniu el la kazoj la menciitaj konsistaj elementoj de la krimo laŭ art. 70 estis pruvitaj tamen en absolute ĉiuj kazoj la akuzitoj estis kondamnitaj al severaj punoj de malliberigo ĝis 7 jaroj kun aldona relegacio de 2–5 jaroj.

Plue, multaj krimoj tute ne estas difinitaj. Tio signifas, ke la difinon oni devas serĉi en la ĝenerala senco de la vorto ne nur ekster la kriminala leĝo, sed ankaŭ ekster kiu ajn alia jura akto. Kiam, ekzemple, art. 120 de la KK de RSFSR malpermesas „koruptajn (malĉastigajn) agojn (*razvratnyje dejstvija*) rilate neplenaĝulojn, la jura senco de „neplenaĝulo” ja troviĝas en la civila kodo, sed la senco de „koruptaj agoj” estas nenie jure difinita.

Fine, en multaj kazoj la kodoj preskribas nur la punon, dum la priskribo de la malpermesitaj agoj troviĝas en aliaj leĝoj aŭ dekretoj kun forto de leĝo. Ekzemple, art. 197–198 (reguloj, rilatantaj al ŝtatlimaj regionoj kaj pasportoj), aŭ art. 211–217 (reguloj rilatantaj al transporto, ŝosetrafitiko, sekureco en minejoj, eksplodaj kaj radioaktivaj materialoj ktp.), aŭ art. 142 (apartigado de la eklezio disde la ŝtato, kaj de la lernejo disde la eklezio) en la KK de RSFSR kaj en la aliaj kodoj havas tian karakteron. La kutima formulo estas: „malobservo de reguloj rilatantaj al ...” estas punota per difinita puno sub difinitaj kondiĉoj, sed la enhavon de tiuj reguloj oni devas serĉi en aliaj juraj fontoj, en Soveta Unio ofte tute nekonataj, ĉar nepublikigitaj. Kompreneble, neniu kriminala leĝo povas eviti tian difinadon de iuj krimoj, sed ilia nombro devus esti maksimume limigita. Unu el la karakterizoj de la sovetiaj kodoj (malpli de la jugoslaviaj) estas ĝuste la relative tre granda nombro de krimoj difinitaj laŭ tiu metodo.

Pro tiuj kaŭzoj la abolo de la analogio, kvankam principe salutinda, ne kondukis al iuj aparte notindaj sekvoj en la praktiko.

4. Ekskludo de krimo

La tri ĉefaj cirkonstancoj ekskludantaj krimon estas sensignifeco de socia danĝero, necesa defendo, kaj stato de neceso.

4.1. *Sensignifeco de socia danĝero*, jam pritraktita supre, senigas la agon de krima karaktero: tia ago ne estas krimo.

4.2. *Necesa defendo* en sovetia kriminala juro estas ago perpetrita kun la celo „protekti la interesojn de la soveta ŝtato, aŭ la sociajn interesojn, aŭ la personon aŭ la rajtojn de la defendanto aŭ de alia persono, kontraŭ socie danĝeran atakon per kaŭzado de damaĝo al la atakanto, kondiĉe ke la limoj de la necesa defendo ne estu evidente transpasitaj” (art. 13 de la Fundamentaj Principoj kaj la respondaj artikoloj de la 15 sovetiaj KK-oj).

Esence saman difinon, sed pli bonan el teknika-jura vidpunkto, entenas art. 9 de la jugoslavia KK. Ĝi tekstas:

„Necesa estas tiu defendo, kiu estas nepre bezonata, por ke la perpetrulo repuŝu de si mem aŭ de alia samtempan kontraŭjuran atakon”;

„Perpetrinto, kiu transpasis la limojn de necesa defendo povas esti punita pli milde, kaj, se li perpetrís la transpason pro forta ekscitiĝo aŭ pro teruro kaŭzita de la atako, li povas esti liberigita de puno”.

Kiel oni vidas, la jugoslavia difino postulas samtempecon de la rilato atako-defendo, dum la sovetia leĝa difino ne mencias tion. Tamen, en la kriminalajuraj teorio kaj praktiko samtempeco estas postulata ankaŭ en Sovetio, tiel ke tiurilate ne ekzistas diferenco inter la du sistemoj. Eksceso de necesa defendo estas krimo, sed la jugoslavia art. 9/2 preskribas sub kiuj kondiĉoj la perpetrinto povas esti pli milde punita aŭ liberigita de puno, dum la sovetia art. 13 ne preskribas tion. Tamen, ankaŭ en Soveta Unio, pro aliaj preskriboj de la kriminalaj kodoj, malgranda eksceso aŭ ekscitiĝo pro la karaktero de la atako, mildigas la punon, aŭ eĉ liberigas de puno, depende de la socia danĝero de la eksceso. Tial, kvankam ekzistas diferencoj en la leĝaj difinoj de la du landoj, en la teorio kaj en la praktiko ili malaperas.

4.3. *Stato de neceso* estas difinita en art. 14 de la Fundamentaj Principoj de 1958 kaj en la respondaj artikoloj de la KK-oj de USSR kiel ago perpetrita „kun la celo forturni damaĝon minacantan la interesojn de la soveta ŝtato, aŭ la sociajn interesojn, aŭ la personon aŭ la rajtojn de la koncerna persono aŭ de alia persono, se en la cirkonstancoj la damaĝo ne povis esti forturnita per aliaj rimedoj, kaj se la kaŭzita malbono estas malpli granda, ol la forturnita malbono”.

La difino entenata en art. 10 de la jugoslavia KK estas multe pli preciza. Ĝi tekstas:

„Ekstrema neceso ekzistas, kiam la ago estas perpetrita por tio, ke la perpetrulo forturnu de si mem aŭ de iu alia samtempan nekulpigeblan danĝeron kiu ne estas forturnebla alimaniere, kaj se eĉ tio la farita malbono ne estas pli granda ol la minacita malbono”.

„Perpetrinto, kiu mem kaŭzis la danĝeron /sed/ pro neglekto, aŭ kiu transpasis la limojn de ekstrema neceso, povas esti punita pli milde, kaj, se la traspaso estis perpetrita sub speciale mildigaj cirkonstancoj, li povas esti eĉ liberigita de puno”.

„Ne ekzistas stato de ekstrema neceso, se la perpetrulo havis la devon elmeti sin al danĝero”.

Iom atenta tralego de la du difinoj montras la identecojn kaj partajn malsamecojn. En ambaŭ sistemoj temas pri valoroj protektataj per kriminaljuraj sankcioj (ekzistas sociaj valoroj protektataj per aliaj juraj rimedoj, aŭ jure tute ne protektataj, ekzemple bona konduto, ĝentilaj manieroj kaj amaso da aliaj). Se ekestas situacio pro kiu du aŭ plurajn tiajn valorojn minacas neevitebla pereco, tiam perpetro de ago difinita kiel krimo por savi unu aŭ plurajn valorojn per detruo de alia aŭ aliaj, ne estas krimo. En USSR la leĝo postulas, ke la detruita valoro estu malpli granda ol la savita, dum en Jugoslavio ili devas esti minimume egalaj. Tio signifas, ke en ambaŭ landoj, ekzemple, detruo de materia valoro por savi homvicon troviĝas en la kadro de ekstrema neceso, sed detruo de unu homvivo por savi alian homvicon, inkluzive la propran, en Jugoslavio estas en la limoj de ekstrema neceso, dum en Soveta Unio ĝi estas eksceso, do krimo. Tiu regulo de la sovetia kriminala juro estas ege stranga kaj ne eksplikebla, krom se oni rigardas ĝin kiel eraron kaŭzitan de malbona teknika-jura formulado.

Diference de la sovetia difino, la jugoslavia eksplicite postulas samtempecon kaj senkulpigeblan danĝeron, tio estas danĝeron ne atribueblan al kulpo de la perpetranto. Eĉ se la perpetranto neglekte (ne dole) kaŭzis la danĝeran situacion, tamen li povas esti punita pli milde. La samo okazas, se li transpasis la limojn de ekstrema neceso; li povas esti eĉ liberigita, se la eksceso okazis sub speciale mildigaj cirkonstancoj. Krome, la jugoslavia kodo eksplicite preskribas, ke ne ekzistas stato de ekstrema neceso, se la perpetrulo laŭ sia profesio (ekzemple fajrobrigadisto, policisto, soldato, k.s.) havas la devon elmeti sin al danĝero. Tiujn regulojn ne entenas la sovetia leĝa difino, sed en la praktiko ili estas plejparte aplikataj.

La teorio pritraktas kaj la kortumoj aplikas ankaŭ aliajn cirkonstancojn, kiuj povas ekskludi krimon. Tiaj, ekzemple, estas konsento en iuj kazoj (al kirurgia operacio k.s.), mildaj punoj de infanoj fare de gepatroj, prizorgantoj kaj instruistoj, plenumo de laŭleĝa preskribo (ekzemple ekzekuto), ordonoj de superuloj sub iuj kondiĉoj, k.a. Ĝenerale parolante, la solvo de tiuj demandoj troviĝas en la bazaj principoj rilatantaj al la nuna koncepto de krimo, en la cirkonstancoj ekskludantaj aŭ mildigantaj la kriminaljuran respondecon, kiel ankaŭ en la preskriboj koncerne punon.

5. Kulpo

En ambaŭ sistemoj la principo estas, ke ne ekzistas krimo sen kulpo. Ekzistas du bazaj formoj de kulpo: dolo kaj neglekto.

5.1. *Dolo* estas difinita en art. 8 de la Fundamentaj Principoj kaj en la respektivaj artikoloj de la kodoj jene:

„Krimo estas perpetrita dole, se la perpetrulo estis konscia pri la socia danĝero de sia ago aŭ preterlaso agi, antaŭvidis ĝiajn socie danĝerajn sekvojn kaj deziris ilin, aŭ konscie permesis, ke ili okazu”.

Art. 13 de la jugoslavia KK entenas esence saman difinon:

„Krimo estas perpetrita dole, se la perpetrulo estis konscia pri sia ago kaj volis ĝian plenumiĝon; aŭ se li estis konscia, ke pro lia faro aŭ nefaro povas efektiviĝi la malpermesita sekvo, kaj li konsentis al ĝia efektiviĝo”.

Do, ambaŭ kriminaljuraj sistemoj rekonas ne nur rektan dolon (*dolus directus*), sed ankaŭ konstruitan aŭ nerektan dolon (*dolus indirectus, eventualis*). Rekta dolo ekzistas, se la perpetrulo estas konscia pri sia ago kaj ĝiaj sekvoj, kaj volas precize tiujn sekvojn, dum en la kazo de nereкта dolo la perpetrulo estas konscia, ke lia ago (faro aŭ nefaro) povas rezultigi malpermesitan sekvon kaj li mense konsentas, ke tiu sekvo okazu. Ekzemple, en kazo de krima domincendio la perpetrulo konscias, ke en la domo povas troviĝi homo(j), kiu(j) povas esti mortigita(j) pro incendio. Li volas (deziras) la incendion kaj la neniigon de la domo kiel ĝian sekvon (rekta dolo rilate la incendion) sed li ankaŭ mense konsentas, ke estu mortigita(j) ankaŭ la homo(j) eventuale troviĝanta(j) en la domo, kvankam li tion rekte ne volas aŭ deziras (nereкта dolo rilate la krimon de hommortigo).

Nereкта dolo estas jure same grava, kiel la rekta. La puno en kazo de dolo – ĉu rekta, ĉu nereкта – estas principe ĉiam la sama, sed depende de la grado de socia danĝero la puno povas esti malpli severa en kazo de nereкта dolo. Estas bone aldoni, ke dolon necesas klare distingi disde intenco (aŭ celo) aŭ motivoj de la krimo. Intenco, celo aŭ motivo povas esti konsistaj elementoj de unuopaj dolaj krimoj, ekzemple en la citita art. 70 „celanta subversi aŭ malfortigi...” aŭ, en alia artikolo, hommortigo „pro huliganaj motivoj”.

5.2. *Neglekto* estas pli milda formo de kulpo. Ankaŭ ĝi estas duspeca. Laŭ la kriminala juro de ambaŭ landoj, krimo estas perpetrata neglekte, se la perpetrulo konscias, ke pro lia ago povas efektiviĝi la malpermesita sekvo, sed li facilanime pensas, ke ĝi ne efektiviĝos aŭ ke li povos malebligi ĝin (konscia neglekto); aŭ se li ne estas konscia pri la ebleco de efektiviĝo de la malpermesita sekvo, kvankam en la konkretaj cirkonstancoj kaj laŭ siaj personaj ecoj li estus devinta kaj povinta konscii pri tiu ebleco (nekonscia neglekto).

En la praktiko estas kelkfoje tre malfacile distingi inter la 4 formoj de kulpo. Precipe delikata estas la ekstreme grava distingo inter nereкта dolo kaj konscia neglekto. En ambaŭ kazoj la perpetrulo konscias pri la eblaj malpermesitaj sekvoj de sia ago, sed en la kazo de nereкта dolo li mense konsentas, ke ili okazu (kvankam li rekte ne deziras ilin), dum en la kazo de konscia neglekto li ne konsentas, ke ili efektiviĝu, ĉar li facilanime atendas, ke ili ne efektiviĝos aŭ ke li iel sukcesos malebligi la efektiviĝon. Por resti ĉe la supra ekzemplo de krima incendio: se en la domo fakte troviĝis homo(j), pri kiu ebleco la perpetrulo konsciis, kaj se ili efektive pereis pro la incendio, ĉar la facilanima atendo de la perpetrulo, ke tio okazos, montriĝis malĝusta, la krimo de hommortigo estas perpetrita neglekte.

Por pli bone ilustrati la malfacilaĵojn rilate distingadon inter nereкта dolo kaj konscia neglekto, jen plia ekzemplo el sovetia kortuma praktiko:

Iu K. instalas draton kun kurento ĉirkaŭ sian pomĝardenon por protekti ĝin kontraŭ ŝtelistojn. Post la instalado K. kaj lia najbaro tuŝis la draton kaj ricevis nur malfortajn ŝokojn. Kelkajn tagojn poste 15-jara junulino L. tuŝis la draton kaj

estis mortigita. La unuagrada kaj apelacia kortumoj kondamnis K. pro nereakta dola hommortigo, sed la Supera Kortumo de USSR, surbaze de revizia prokurora protesto, decidis, ke temis pri neglekta hommortigo, ĉar K., testinte la draton kune kun la najbaro, facilanime atendis, ke tiu grava sekvo ne okazos.

Laŭ art. 11 de la jugoslavia KK, perpetrulo estas respondeca pro krimo perpetrita neglekte nur se la leĝo eksplicite preskribas tion. Se, do, en iu artikolo de la Speciala Parto de la KK aŭ de alia kriminala leĝo forestas preskribo pri neglekta perpetro de tiu krimo, la koncerna krimo ne povas esti perpetrita neglekte, sed nur dole. Nek la Fundamentaj Principoj, nek la sovetiaj kodoj havas tian eksplicitan regulon. Tio kaŭzas problemojn kaj al la teorio kaj al la praktiko. Evidente, multaj krimoj – ekzemple ŝtelo, rabo, seksperforto ktp. – povas esti perpetritaj nur dole. Sed pro la neprecizaj difinoj kaj la karaktero de aliaj krimoj ekestis duboj, ĉu ili povas esti perpetritaj nur dole aŭ ankaŭ neglekte. Tiaj krimoj, pri kiuj diskutas la sovetia teorio kaj hezitas la praktiko, estas, ekzemple, kontraŭleĝa uzo de registritaj markoj (art. 155 de la KK de RSFSR), produktado por vendo de malbonkvalitaj, aŭ subnormaj, aŭ nekompletaj varoj fare de ekonomiaj entreprenoj (art. 152), k.a.

Superflue diri, ke la demando, ĉu iu krimo povas esti perpetrita ankaŭ neglekte, estas gravega. Nea respondo signifas, ke krimo tute ne ekzistas, se ne estas eble pruvi dolon. Tiu demando estas klare respondita en la jugoslavia leĝo, sed ne en la sovetia.

6. Ekskludo de kulpo

El la principo, ke neniu povas esti kriminale respondeca sen kulpo, sekvas la regulo, ke personoj kiuj, pro la stato de siaj mensaj kapabloj, ne povas kompreni la signifon de siaj agoj aŭ regi ilin, ne povas esti kriminale respondecaj. En ambaŭ sistemoj du bazaj kaŭzoj ekskludantaj parte aŭ komplete respondecon estas junaĝo kaj mensa malsano.

6.1. *Junaĝo* estas vivperiodo ĝis la kompletigo de la 18-a jaro, kiam en ambaŭ landoj oni atingas plenaĝecon. Kaj en Soveta Unio kaj en Jugoslavio la kriminaljura respondeco komenciĝas per kompletigo de la 14-a jaro. Neplenaĝuloj kriminale respondecaj estas dividitaj en du grupoj: pli junaj neplenaĝuloj (14–16 jarojn aĝaj) kaj pli aĝaj neplenaĝuloj (16–18 jarojn aĝaj).

En Soveta Unio la pli junaj neplenaĝuloj estas kriminale respondecaj nur pro iuj aparte gravaj krimoj, eksplicite menciitaj en la kodoj, ekzemple hommortigo (art. 102–106 de la KK de RSFSR), dola korpodamaĝo kun gravaj sekvoj (art. 108–111 kaj 212/2), seksa perforto (117), ŝtelo (89, 114), rabo (90, 145), malica huliganismo (206/2 kaj 206/3) kaj iuj aliaj, inkluzive dolajn agojn, kiuj povas kaŭzi trajnacidenton. La pli aĝaj neplenaĝuloj estas kriminale respondecaj pro kiu ajn krimo. Tamen, se tia neplenaĝulo perpetrus krimon, kiu ne estas grave socie danĝera, kaj se la kortumo opinias, ke kompulsaj (devigaj) edukaj rimedoj povas esti aplikitaj por reeduki lin sen puno, ĝi devas apliki iun el tiuj rimedoj, kies gamo estas ekde devo pardonpeti, admono, devo kompensi la damaĝon per propra laboro k.a., ĝis sendo de la neplenaĝulo en edukon institucion aŭ kolonion por neplenaĝuloj en tempodaŭro

de ne pli ol 3 jaroj. Kompreneble, ankaŭ al pli junaj neplenaĝuloj estas aplikeblaj la samaj edukaj rimedoj. La edukaj rimedoj ne estas punoj; sekve la perpentrinto restas kriminale „pura”.

Se la kortumo opinias, ke pro la graveco de la socia danĝero neniu el la edukaj rimedoj estas adekvata, ĝi kondamnos la perpentrinton al puno, kiu en kazo de neplenaĝuloj ne povas esti pli granda ol 10 jaroj da malliberigo en iu el apartaj punkolonioj por neplenaĝuloj. Se en la kolonio la kondamnito atingas plenaĝecon, li devas esti transportita en punkolonion por plenaĝuloj.

Eble valoras mencii kazon el sovetia praktiko. Junulo perptris krimon en la posttagmezo de sia 18-a naskiĝtago. La unuagrada kortumo decidis, ke li en tiu tago fariĝis plenaĝa kaj kondamnis lin kiel plenaĝulon pli severe, sed la apelacia kortumo decidis, ke ĝis noktomezo de tiu tago li restis neplenaĝa kaj kondamnis lin kiel neplenaĝulon pli milde konforme al la reguloj por apliko de punoj al neplenaĝuloj.

En *Jugoslavio* al la pli junaj neplenaĝuloj povas esti aplikataj nur edukaj rimedoj, neniam kriminalaj punoj. Ankaŭ en *Jugoslavio* la gamo de tiuj rimedoj estas vasta kaj konsistas el diversaj disciplinaj sankcioj, strikta kontrolo kaj sendo de la perpentrinto en fermitan institucion por ne pli ol 5 jaroj. La pli aĝaj neplenaĝuloj povas esti punitaj nur pro krimoj, por kiuj la leĝo preskribas minimume 5 jarojn da malliberigo. La maksimuma puno aplikebla al tiaj neplenaĝuloj estas 10 jaroj da malliberigo. En ĉiuj aliaj kazoj ankaŭ al la pli aĝaj neplenaĝuloj oni povas apliki nur la edukajn rimedojn.

6.2. *Mensa malsano* estas la alia bazo por ekskludo de respondeco.

Art. 11 de la Fundamentaj Principoj kaj la respektivaj artikoloj de la sovetiaj kodoj preskribas, ke ne estas respondeca persono, kiu en la tempo de perpetro de socie danĝera ago estis malkapabla kompreni la signifon de sia ago aŭ regi sian konduton pro kronika mensa malsano, aŭ provizora perturbo de sia menso, aŭ mensa difekto, aŭ alia psikopatologia stato. Rilate tian personon la kortumo povas ordoni la aplikon de kompulsaj rimedoj kun medicina karaktero, nome aŭ kompulsita kuracado en mensa hospitalo de ĝenerala tipo aŭ, en kazoj de perpentrintoj speciale danĝeraj por la socio, kompulsita kuracado en mensa hospitalo kun speciala karaktero, kie la perpentrintoj troviĝas sub speciale strikta kontrolo. Malfeliĉe, en la lastaj jaroj tiuj rimedoj estis plurfoje aplikitaj kontraŭ komplete sanajn intelektulojn por izoligi ilin aŭ por senkreditigi iliajn aktivadojn aŭ ideojn, pro kiuj ili ne povas esti kriminale akuzitaj, sed kiujn la aŭtoritatoj rigardas politike danĝeraj.

Art. 12 de la jugoslavia KK estas praktite identa. Ĝi tekstas:

„Ne estas respondeca perpentrulo, kiu en la tempo de perpetro ne povis kompreni la signifon de sia ago, aŭ ne povis regi sian konduton pro daŭra aŭ provizora mensa malsano, provizora mensa perturbo, aŭ postrestinta mensa evoluo”.

La jugoslavia leĝo ankaŭ preskribas, ke perpentrulo povas esti punita pli milde, se lia kapablo kompreni la signifon de sia ago aŭ regi sian konduton estis esence malgrandigita. Tiun koncepton de esence malgrandigita respondeco ne estas eksplicite formulita en la sovetia leĝo.

7. Konkludo

La nuna koncepto de socia danĝero kiel formulita en la materia-formala difino de krimo, kune kun la aldonaj principoj ligitaj al ĝi, povus esti sukcese aplikata kaj certe produktus pozitivajn rezultojn el vidpunkto de leĝeco nur en sistemo de vere sendependaj kaj kompetentaj kortumoj, libera kaj alte kvalifikita advokataro, persekuto disigita de la esplorprocedoj, publika kontrolo tra sendependa gazetaro kaj aliaj rimedoj de publika informado, mallonge, en kondiĉoj de politika demokrateco. Iuj el tiuj kondiĉoj estas pli bonaj en Jugoslavio ol en Soveta Unio, kio reflektiĝas en pli altnivela kriminaljura leĝaro kaj multe pli precizaj difinoj en Jugoslavio kompare kun Soveta Unio, kiel ankaŭ je la pli aŭ malpli korekta aplikado de kriminala juro en la ĉiutaga praktiko de la du sistemoj.

KELKAJ SOVETIAJ SPERTOJ PRI APLIKADO DE KIBERNETIKO AL JURO

(Ampleksigita teksto de prelego farita en la Internacia Lingvo al la 10-a Internacia Kongreso pri Kibernetiko en Namur, Belgio, fine de septembro 1983. Internacia Kibernetika Asocio estas la sola neesperantista faka organizaĵo, en kiu Esperanto estas unu el la tri oficialaj lingvoj. La prelego, nun artikolo, estas unika en tiu senco, ke ĝis nun neniu jura periodaĵo en Okcidento publikigis kion ajn, laŭ nia scio, pri la sovetia jura kibernetiko. Nacilingvaj tradukoj estas permesitaj sub la kondiĉo, ke la fonto kaj aŭtoro estu indikitaj. – I.L.)

1. ENKONDUKA RIMARKO

1.1. En mallonga prelego apenaŭ estas eble prezenti eĉ nur la plej ĝeneralajn trajtojn pri aplikado de kibernetiko almenaŭ al kelkaj juraj sferoj en Soveta Unio, por ne paroli pri la aplikoj al ekonomiaj antaŭvidoj, planado kaj administrado, kiel ankaŭ sur multnombraj aliaj kampoj. Tial necesas limigi la eksplikojn sole al kelkaj el la plej esencaj aspektoj.

1.2. La veraj komenciĝoj de jura kibernetiko en Soveta Unio datumas de marto 1965, kiam okazis la Unua Tutunia Kunordiga Konsultiĝo pri Demandoj de Apliko de Kibernetiko al Juro. Ekde tiam la sovetia jura kibernetiko konstante evoluis kaj atingis plurajn interesajn, kvankam ne spektaklajn, rezultojn en jenaj sferoj: (i) aŭtomatigo de la jura informserĉa servo; (ii) perfektigo de jurdona laboro; (iii) aŭtomatigo de kriminologiaj kaj alispecaj socialaj-juraj statistikaj informoj; (iv) aŭtomatigo de juresploraj ekspertizoj; (v) solvado de apartaj juraj taskoj; (vi) perfektigo de la instruprocezo en prijuraj studoj.

1.3. Al ekfloro de kibernetiko ĝenerale kaj jura kibernetiko aparte kontribuis la kuraĝigoj de L. Breĵnev, tiutempe Ĝenerala Sekretario de la Komunista Partio de Soveta Unio, kaj pluraj dekretoj de la KP kaj de la registaro, kiuj ordonis la aplikon de kibernetiko kaj de la t.n. Aŭtomatigitaj Sistemoj de Administrado (ASA, ruse ASU) unue al planado kaj administrado de la ekonomio. MezE de la sepdekaj ASA fariĝis tiel populara, preskaŭ obseda, kiel kibernetiko malgraŭ la multaj, ofte nevenkeblaj obstakloj.

2. Ĉefaj aplikosferoj

2.1. Ĝeneralaj Konsideroj

2.1.1. Ĉiuj sovetiaj juraj kibernetikistoj konsentas, ke apliko de kibernetiko al juro jam donis kontentigajn rezultojn rilate serĉadon kaj registradon de jurnormaj materialoj, kiel ankaŭ en la solvado de specifaj juraj taskoj. Ĉiuj ankaŭ opinias, ke pliaj studoj ebligas precizigojn de la akiritaj rezultoj kaj vastigon de la aplikokampoj. Tamen, dum unuj fidus je preskaŭ senlimaj eblecoj de kibernetiko, inkluzive la juran, aliaj esprimas fortajn dubojn tiurilate. Ekzemple, Akademiano V. M. Golyšov skribis en sia studo „Penso kaj Kibernetiko”, ke principe „kiuj ajn formoj de la homa penso povas (sur la informa nivelo) esti modeligitaj en arte kreataj kibernetikaj sistemoj” (*Voprosy Filosofiji – Filozofiaj Demandoj* – 1963, N-ro 1, p. 42). Aliflanke multaj sovetiaj scienculoj atentigis pri la malebleco utiligi kibernetikon kaj elektronajn komputajn maŝinojn por solvado de taskoj postulantaj homajn pritaksojn kaj juĝojn, ekz. por difini jurajn sankciojn en konkretaj individuaj kazoj, eĉ malpli por fiksi la punojn, se temas pri krimo. Estos montrite iom poste, ke eĉ se temas pri jure precize difinitaj kvantoj (ekz. aĝo rajtiganta al pensio) aŭ kvalitoj (ekz. sekso), kie la elektronaj komputmaŝinoj povas doni kaj jam donas konsiderindan helpon, tamen pro juraj elementoj, kiujn maleblas programigi, la homo-juristo devas interveni por trovi kaj apliki la ĝustan laŭjuran solvon. Tial S. S. Moskvin, unu el la elstaraj sovetiaj juristoj-kibernetikistoj, prave skribis: „Ne estas dubo, ke en la aplikado de juraj normoj la elektronaj komputmaŝinoj povas esti utiligataj nur en difinitaj limoj”. (*Pravovaya Kibernetika – Jura Kibernetiko* – Moskva, 1970, p. 34).

2.1.2 Inter la tro optimismaj atendoj kaj la pli realecaj taksoj evoluis kaj plu evoluas la sovetia jura kibernetiko en kunlaboro inter kibernetikaj specialistoj juristoj kaj matematikistoj. Ili dediĉis apartan atenton al apliko de matematikaj metodoj kaj elimina tekniko en kriminologiaj esploroj, al struktura analizo kaj modeligo de kortumaj pruvoj, al kriminaljura justico kaj logika-semantika analizo de la konsistaj elementoj (*sostav, Tatbestand*) de krimo kaj de la objekto de pruvo, al utiligo de matematikaj modeloj sur la kampo de kriminalistiko, interalie apliko de analiza metodo por identigo de persono laŭ fotografiaĵo, kodigo de skribaj signoj kaj aspektoj de ĝia aŭtomatigo.

2.1.3. En la sekvantaj sekcioj estos prezentitaj kelkaj el la tipaj scienc esploraj laboroj, kiuj karakterizas la klopodojn, problemojn, atingojn kaj malsukcesojn de la sovetia jura kibernetiko.

2.2. Konkretaj Ekzemploj

2.2.1. La komputera kodigo de la sovetia juro, t.e. de la normhavaj juraj aktoj (leĝoj, dekretoj, ukazoj ktp.), estis unu el la plej gravaj kaj urĝaj taskoj. La juraj kaj kibernetikaj problemoj estis multnombraj. Interalie ilin kaŭzis ankaŭ la fakto, ke en la sovetia jura sistemo ne nur juraj aktoj formale nomataj „leĝoj”

(zakony), kiuj ĉiam entenas jurajn normojn, sed ankaŭ ukazoj de la Prezidio de la Supera Soveto de USSR, decidoj, ordonoj, regularoj, instrukcioj kaj aliaj oficialaj aktoj de la registaro kaj de diversaj ŝtataj organoj entenas ofte, sed ne ĉiam, devigajn jurajn normojn, do estas parto de la sovetia juro. Necesis, do, distingi inter la leĝoj kaj aliaj jurhavaj aŭ jurdonaj aktoj ĝenerale aplikeblaj, disde aktoj aplikitaj al individua kazo, ekz. inter ukazo normokrea kaj ukazo rilatanta al unuopulo (nomigo de ambasadoro, honorigo per iu ordeno, medalo k.s.). Alian problemon kaŭzis kaj plu kaŭzas la parta neperfekteco de la rusa jura terminologio kaj eĉ la pli rimarkinda neperfekteco de la jura terminologio en la aliaj oficialaj lingvoj de USSR, t.e. kelkfoje uzado de pluraj terminoj por la sama jura nocio, aŭ de la sama termino por malsamaj juraj nocioj. Post la solvo de tiaj problemoj, necesis programi la juran informon kaj registri ĝin sur magnetajn bendojn, presigi la necesajn esencaĵojn (reduktaĵojn) de la informoj por ebligi ilian transdonon je demando. Ekde 1973 la Esplora Laboratorio de la Jura Informservo en la Tutunia Instituto de Sovetia Leĝdonado posedas kodigan sistemon, kiu ebligis registri normhavajn informojn el 300.000 slipoj de la Ministerio pri Justico sur tri bobenojn de komputera bendo. La komputero kapablas ĝisdatigi la akumulitajn informojn tuj post amendoj en la ekzistantaj leĝoj kaj aliaj normhavaj aktoj, aŭ post akcepto de novaj normkreaĵoj kun samtempa nuligo de la antaŭe ekzistantaj (validaj). Mallonge, ĝi konstante ĝisdatigas la tutan memorigatan normhavan materialon. Je demando la komputera respondo donas informojn ne nur pri la titoloj, numeroj, datoj de la baza kaj de ĉiuj aldonaj normhavaj aktoj pri la pridemandita temo, sed, se necese, ankaŭ pri la respektivaj artikoloj, eĉ paragrafoj aŭ alineoj de la unuopaj artikoloj.

2.2.2. La sovetia normdona tekniko, kvankam plibonigita ekde la mezo de la 50-aj jaroj, tamen plu restas sur ne tre alta nivelo. Tial en la sovetia juro troviĝas kontraŭdiroj kaj neprecizaĵoj, interalie „ktp.” kaj „k.s.”. La granda laboro je programigo kaj kodigo de la enorma normhava materialo, skize prezentita en 2.2.1., ebligis malkovri tiujn mankojn. Tio siavice helpas la normdonajn aŭtoritatojn forigi ilin el la ekzistanta juro kaj eviti ilin en estontaj juraj aktoj.

2.2.3. La kriminalaj juro kaj proceduro, kaj la civilaj juro kaj proceduro estis aparte prilaboritaj por informa priserĉa sistemo (IPS, ruse *Informacionna-Poiskovaja Sistema, IPS*), bazita sur aplikado de elektrona komputa tekniko. Estis prilaboritaj ĉ. 2.000 artikoloj de la Tutuniaj Fundametoj (Fundamentaj Leĝoj) en la kvar menciitaj juraj branĉoj kaj la kriminala, kriminalprocedura, civila kaj civilprocedura kodoj de la Rusa Soveta Federacia Socialisma Respubliko (RSFSR). La informa-priserĉa maso, sur kiu efektiviĝis la kontrola ekzameno de algoritmoj (Algoritmo: Kia ajn metodo de komputado, kutime konsistanta el serio da paŝoj kiel en longaj dividoperacioj) kaj programoj de la labora varianto de IPS, enhavis ĉ. 3.000 leksikajn unuojn de la informa-priserĉa lingvo (ILP, ruse IPJa) kaj ĉ. 63.000 adresojn, t.e. numerojn de la aktoj kaj artikoloj, entute ĉ. 66.000 kodigitajn vortojn. Kompare kun la unua, eksperimenta, varianto de IPS, la labora varianto estis proksimume 30 fojojn pli ampleksa por povi plene kontentigi la bezonojn de informserĉado kaj praktika laboro de la juraj servoj.

2.2.4. La pensia juro kaj difinado de pensioj estas plia detale prilaborita sfero, multe menciata en la sovetia jura-kibernetika literaturo pro la tre kontentigaj rezultoj. Ĉi tie jam temas ne nur pri serĉado de normoj, sed ankaŭ pri ilia korekta apliko al individuaj kazoj. La utiligo de kibernetiko por juraplika agado estas ligita al la ebleco aŭ malebleco analizi la reciprokajn rilatojn inter apartaj juraj normoj kaj la esprimado de tiuj rilatoj per logikaj-matematikaj formuloj. La prilaboro de la pensia juro cele al utiligo de elektronaj komputaj maŝinoj por difinado de pensioj en unuopaj kazoj montras, ke multajn pensirilatajn normojn estas eble analizi, fiksi iliajn reciprokajn rilatojn kaj fine prezenti ilin en formo de logikaj-matematikaj formuloj. Tio ŝuldiĝas al la fakto, ke la plimulto de la pensiaj preskriboj estas sufiĉe precizaj, t.e. entenas preciajn elementojn, kiuj estas necesaj kondiĉoj por establo de la rajto je ŝtata pensio. Tamen, la precizeco kaj rigideco de la koncernaj preskriboj, kiel ankaŭ la longa praktiko en la aplikado de la pensia juro, neniel signifas, ke ĉiuj preskriboj povas esti esprimitaj en formo de logikaj-matematikaj formuloj. Tion eksplicite rekonas la sovetiaj specialistoj, okupiĝantaj pri esprimado de la pensia juro per logikaj-matematikaj formuloj.

2.2.4.1. Jen ekzemplo de simpla formulo rilatanta al Art. 15 de la Regularo pri Difino kaj Elpago de Ŝtataj Pensioj. Ĝi preskribas, ke viroj akiras pensian rajton je atingo de la 60-a vivjaro kaj ne malpli ol 25-jara laborperiodo, dum virinoj akiras ĝin je atingo de la 55-a vivjaro kaj 20-jara laborperiodo. Tiun rajton havas ĉiuj laboristoj kaj oficistoj. Se R estas la rajto je pensio, L = laboristo, O = oficisto, A = aĝo rajtiganta ricevi pension, P = periodo de laboro, la formulo estas:

$$R = (L \begin{matrix} < \\ O \end{matrix} \quad A < P$$

en kiu la signo $>$ signifas operacion disigan, kaj $>$ operacion kunligan.

2.2.4.2. Jen alia ekzemplo de simpla formulo rilatanta al Art. 20 de la menciita Regularo, laŭ kiu laboristoj kaj oficistoj rajtas ricevi 10 % aldonon al la baza pensio laŭaĝa, se ili havis seninterrompan laborperiodon de pli ol 15 jaroj:

$$A = \begin{cases} 0 & \text{ĉe } S < 15 \\ 0,1 P_b & \text{ĉe } S > 15 \end{cases}$$

A = aldono pro seninterrompa servado
 S = seninterrompa laborperiodo
 P_b = procento de la baza ŝtata laŭleĝa pensio.

2.2.4.3. Apenaŭ necesas diri, ke tiaj simplaj kazoj estas tre maloftaj. Kutime tuta aro da aliaj juraj elementoj devas esti prenitaj en konsideron. Laŭ la sovetia juro, ne nur laboristoj kaj oficistoj, sed ankaŭ aliaj kategorioj de laboruloj, ekzemple kolĥozanoj aŭ membroj de arteloj de produktaj kooperativoj, havas pensiajn rajtojn laŭ apartaj reguloj. En la laborperiodon estas enkalkulataj ankaŭ la tempo de

instruiĝo, deviga servado en la defendofortoj de USSR, periodoj de portempa labora malkapablo. La altecon de la laŭaĝa pensio difinas ankaŭ aliaj faktoroj, kaj la loko de servado (ekz. „en distriktoj norde de la polusa cirklo”, t.e. en la malproksima Nordo), nombro de labore malkapablaj personoj, kiujn la pensirajtigito vivtenas, k.a. Ĉio ĉi kondukas al diversspecaj vastigoj de la bazaj formuloj rilatantaj nur al laŭaĝa pensio. Aliaj formuloj estas ellaboritaj por la invalidaj pensioj kaj por ĉiuj aliaj kazoj antaŭviditaj en la pensia juro. La sovetiaj specialistoj emfazas la gravecon de absolute kompletaj kaj precizaj informoj en la memoro de la komputero kaj de la same kompletaj kaj precizaj informoj pri la konkreta kazo. Alie la rezulto de komparado inter la informo entenata en la komputero kaj la informo pri konkreta kazo liverita al ĝi, estos malĝusta.

2.2.5. Pri la analizo de la konsistaj elementoj (*sostav, Tatbestand*) de unuopaj krimoj okupiĝis pluraj specialistoj pri kriminala juro, precipe V. N. Kudrjavcev, kiu en 1973, verŝajne pro siaj meritoj en aplikado de kibernetiko al kriminaljuraj kaj kriminologiaj esploroj, fariĝis prezidanto de la Instituto pri Ŝtato kaj Juro de la Akademio de Sciencoj de USSR. Laŭ Kudrjavcev, se oni imagas algoritmon pri apliko de kriminaljuraj normoj kiel „labirinton”, inkluzivantan ĉiujn alternativojn de taksado ĝis la konkluda solvo, la nombro de etapoj (nodaj punktoj aŭ krucpunktoj) estas tre granda. Tia labirinto devas havi tiom da alternativoj (testoj), kiom estas necese por trovi solvon laŭ la vojo de aŭtomata, „blinda” serĉo. Kudrjavcev trovis, ke eĉ en relative mallonga algoritmo, rilatanta al ŝtelo de socialisma proprieto, la nombro de la testoj estas 32. En ĝenerala programo celanta kvalifiki ĉiujn krimojn de la Kriminala Kodo de RSFSR (en la plua teksto KKE), ilia nombro estus pli ol mil. Se oni enkondukus en la programon pliajn kvalifikajn elementojn, ekzemple la komplicecon kaj la evolustadiojn de kriminala agado (preparlaboroj, atenco, kompletigo de la krimo), la nombro de testoj altiĝus al pli ol 2.000. Programo de kvalifikoj rilatantaj al la tuto de krimoj konsistus el minimume 10.000 testoj, kaj se oni aldonus la jure rekonitajn cirkonstancojn, kiuj mildigas aŭ gravigas la kriminaljuran respondecon, tiu nombro fariĝus 10–15 fojojn pli granda. Tamen, eĉ longegaj algoritmoj ne povas doni jure fidindajn solvojn, ĉar (i) la kriminala leĝo kelkloke mem permesas al la kortumoj preni en konsideron ankaŭ aliajn elementojn, eksplicite ne antaŭviditajn en la leĝo, ekz. pliajn mildigajn cirkonstancojn, aldone al la eksplicite preskribitaj, (ii) kompetenta juristo utiligas vicon da heŭristikaj metodoj, kiujn tutsimple ne eblas enprogramigi. Tial la sovetia kriminaljura scienco turnis sian atenton al la studado de tiuj realecaj vojoj, kiuj kondukas al praktikaj solvoj de juraj taskoj fare de la homo, kaj kiuj montriĝis multe pli rapidaj kaj pli efikaj, ol la aplikado de elektronaj komputmaŝinoj. La subaj du ekzemploj, ambaŭ prenitaj el artikolo de V. N. Kudrjavcev en la kolekto *Pravovaja Kibernetika* (Jura Kibernetiko), ilustras la karakteron de heŭristikaj metodoj, rekomendataj por kvalifikado de krimoj. Tiuj du (kaj aliaj) ekzemploj estis uzitaj de Kudrjavcev por eksperimente eltrovi la pensajn procezojn de tricento da kriminaljuraj esploristoj aŭ estintaj esploristoj de la Prokurorato kaj de la Ministerio pri Internaj Aferoj, kaj de 17 kriminaljuraj sciencaj fakuloj cele al korekta kvalifiko de krimoj.

2.2.5.1. La faktoj pri la unua kazo estis:

„Ketov, direktoro de distrikta kulturdomo en N., havigis de sia konato Ivanov, laboranta en presejo, biletojn jam delonge presitajn kaj ne registritajn. Ivanov ne interesiĝis por kiu celo K. Bezonis la biletojn. Dum rondvojaĝo de la kulturbrigado en kolĥozoj K. vendadis tiujn falsajn biletojn paralele kun la registritaj. La 400 rublojn (ĉ. 400 dolarojn) ricevitajn per la vendo de falsaj biletoj K. utiligis por aĉeto de mantelo kaj vesto por si. La membroj de la kulturbrigado ricevis siajn salajrojn laŭ la loko de sia laboro konforme al la leĝo”.

La tasko de la enketatoj estis kvalifiki la kriman agon de K. ĉu laŭ Art. 92 ĉu laŭ Art. 170 de la RKK. Art. 92 (ŝtelo de ŝtata aŭ socia proprieto) preskribas:

„Alproprigo aŭ misuzo de ŝtata aŭ socia proprieto konfidita al la perpetrulo, aŭ preno de ŝtata aŭ socia proprieto por profitaj celoj per misuzo fare de oficialulo de sia ofico, estos punita per malliberigo dum ne pli ol kvar jaroj...”.

Art. 170 (misuzo de aŭtoritato aŭ de oficiala pozicio) preskribas:

„Misuzo de aŭtoritato aŭ de oficiala pozicio, t.e. dola utiligo de sia oficiala pozicio fare de oficialulo kontraŭe al la interesoj de la ofico, perpetrata por profita aŭ kiu ajn alia persona intereso, kaj kaŭzinta gravan damaĝon al la ŝtato, aŭ al sociaj interesoj, aŭ al la jure protektataj interesoj de civitanoj, estos punita per malliberigo dum ne pli ol tri jaroj...”.

Laŭ la enketinto, la plej korekta kaj ekonomia vojo por solvi tiun taskon estis konsideri la subajn demandojn kaj respondi al ili per JES aŭ NE.

1. Ĉu la perpetrinto havigis al si kiun ajn materian valoron? JES
2. Ĉu tiu havigo estis jure pravigebla (ekz. pago por farita laboro)? NE
3. Ĉu per tio estis kaŭzita damaĝo al persona proprieto de civitanoj? NE
4. Ĉu per tio estis kaŭzita damaĝo al socialisma proprieto? JES
5. Ĉu tiu damaĝo konsistigas rektan materian perdon al la ŝtato aŭ socia organizaĵo (malgrandigo de la fonduso de socialisma proprieto)?

Se la respondo al tiu demando estas NE, post ĝi sekvas:

- 6a. Ĉu la kaŭzita damaĝo prezentigas kiel neakirita gajno? JES.
- 7a. Ĉu la perpetrinto agis misuzante sian oficialan pozicion? JES.
- 8a. Ĉu la materia damaĝo estas grava (konsiderinda)? JES.

KONKLUDO: La ago de la perpetrinto konsistigas misuzon de oficiala pozicio laŭ Art. 170 de RKK.

Se la respondo al demando 5 estas JES, devas sekvi jenaj pliaj demandoj:


6b. Ĉu la damaĝo estas kaŭzita per preno de havaĵo troviĝanta en proprieto de la ŝtato aŭ de socia organizaĵo? NE.

7b. Ĉu la damaĝo estas farita per deteno de havaĵo per utiligo de la progra oficiala pozicio? JES.

8b. Ĉu la perpetrinto agis por profita celo? JES.

KONKLUDO: La ago de la perpetrinto konsistigas ŝtelon de ŝtata aŭ socia proprieto laŭ Art. 92 de RKK.

Skeme oni povas prezenti la „labirinton” en formo de grafikaĵo, en kiu la ascendaj linioj indikas jesajn kaj la descendaj neajn respondojn:



Evidente, la respondo al demando 5 estas decida: nea respondo kondukas al korekta kvalifiko laŭ Art. 170, nome misuzo de aŭtoritato aŭ oficiala pozicio; jesa respondo kondukas al erara kvalifiko de la krimo kiel ŝtelo de ŝtata aŭ socia proprieto laŭ Art. 92. La esenca diferenco inter la du krimoj en la konkreta kazo estas klara, se oni iom atente konsideras iliajn respektivajn konsistajn elementojn. En la kazo de Art. 92 temas pri kiu ajn valorajo, kiu jam troviĝas en proprieto de la ŝtato aŭ socia organizaĵo kaj kiun la perpétrulo alproprigas; en la kazo de Art. 170 la valorajo ankoraŭ ne estas proprieto de la ŝtato aŭ socia organizaĵo, sed la perpétrulo laŭjure devus ĝin transdoni en proprieton de la ŝtato aŭ socia organizaĵo. Sen la algoritmo de Kudrjavcev, kiun li rigardas la plej taŭga, sed kiun, cetere, multaj el la enketintoj ne sekvis, ĉiu iom kompetenta juristo devus esti kapabla rapide solvi la konkretan simplan taskon. Tamen, tre surprize, multaj el la enketitoj (45 % de la kriminaljuraj esploristoj) malatentis iujn el la konsistaj elementoj de la du krimoj kaj erare kvalifikis la konkretan krimon de Ketov aŭ laŭ Art. 92 aŭ laŭ aliaj artikoloj de la RKK, dum pluraj eĉ konsideris moralajn aspektojn, kiuj havas nenion komunan kun la jura difino de krimo. Bona algoritmo aŭ bona heŭristika metodo sendube povas helpi bonan juriston. Al nekompetenta ĝi donas nenian helpon.

2.2.5.2. La alia tasko estis kvalifiki jenan krimon:

„Tamara, edzino de Ivan Semenov, fordonis sin al vindrinkado. La edzo komencis batadi ŝin „por dekutimigi ŝin de ebriiĝado”, sed tio ne helpis. La Novjaraŭ Tagon la geedzoj gastigis ĉe geamikoj kaj multe drinkis. Reveninte hejmen, la edzino denove volis drinki vodkon. La edzo komencis ŝin bati unue per bastono kaj poste per fera stango. Post 15 horoj Tamara mortis. Laŭ la jurmedicina ekspertizo, la morton kaŭzis cerboskua kaj rompo de tri vertebroj. Semenov deklaris, ke li batis la edzinon por dekutimigi ŝin de ebriiĝado, sed li ne pensis (atendis), ke ŝi mortos”.

La tasko de la enketatoj estis kvalifiki la krimon de Semenov aŭ kiel dolan homicidon laŭ Art. 103, aŭ kiel dolan gravan korpan damaĝon kaŭzintan morton laŭ Art. 108, aŭ laŭ iu alia Art. de la RKK. Laŭ Kudrjavcev, pro doni korektan respondon necesis sinsekve konsideri jenajn demandojn:

1. Ĉu la viktimo suferis gravan korpan damaĝon? JES.
2. Ĉu la damaĝo estas perpetrita dole? JES.
3. Ĉu ĝi kaŭzis la morton? JES.
4. Ĉu ekzistis dolo rilate la morton? JES/NE.
5. En kazo de nea respondo al 4, ĉu ekzistis neglekto rilate la morton? JES.

En la plimulto de la respondoj la demandoj 2, 4 kaj 5 tute ne estis konsiderataj. Kvalifikon laŭ Art. 103 aŭ eĉ 102 (dola homicido sub gravigaj cirkonstancoj) donis 25 % de la kriminaljuraj esploristoj de la Ministerio pri Internaj Aferoj kaj 36 % de tiuj de la Prokurorato. La aliaj kvalifikis la krimon laŭ Art. 108, t.e. kiel dolan gravan korpan damaĝon kaŭzintan morton. Korekte, se oni limigas sin nur al la faktoj prezentitaj en la ekzemplo. Sed tiuj faktoj, ekskuze por la enketitoj kaj precipe por la erarintoj, estas eĉ pli mankaj, ol tiuj de la antaŭa ekzemplo. En la realo, neniu kortumo en la mondo, inkluzive sovetian, limigus sin al ili, sed ekzamenus tutan aron da demandoj por povi korekte kvalifiki la agon de S.: longeco de la geedzeco kaj ĝeneralaj rilatoj inter la geedzoj, kaŭzo de ebriiĝoj, komenciĝo kaj ofteco de batadoj, ĉu interbatiĝoj aŭ batadoj nur fare de la edzo, konduto de la geedzoj ĉe la gastigantoj, ĉu la edzino estis agresema aŭ alimaniere provoka antaŭ la fatala evento, konduto de la perpetrinto post kiam la viktimo (verŝajne?) senkonsciiĝis, ktp. Efektive, nur konscienca ekzameno de ĉiu individua kazo fare de kompetentaj juristoj laŭ la reguloj de la kriminala proceduro povas certigi maksimume korektan kvalifikon kaj tial ankaŭ adekvatan aplikon de sankcioj. Tamen, eĉ en tiaj cirkonstancoj povas okazi kaj, kiel konate, ne malofte okazas eraroj.

2.2.6. La provoj prezenti la principojn de pruvado per simboloj kaj formuloj PRENITAJ EL MATEMATIKA LOGIKO NE NUR MALSUKCESIS, SED EĈ SE ILI ESTUS SUKCESINTAJ, ESTUS KONTRAŬAJ AL FUNDAMENTAJ DEMOKRATAJ-LIBERALAJ PRINCIPOJ DE MODERNA KRIMINALA PROCEDURO.

2.2.6.1. Simpla ekzemplo, prezentita de A. A. Ejsman en la menciita kolekto *Pravovaja Kibernetika*, montras la pravecon de tiu opinio. Jen la kazo:

„La 5-an de junio Firsov (F) – persono sen difinita okupo – penetris en la loĝejon de Rakov (R), rezidanta en la sama distrikto kiel F., kaj ŝtelis veston kaj botojn de R. La botoj estis trovitaj ĉe F. dum la esplortraserĉo de lia loĝejo. La veston li vendis kaj per la ricevita mono F. okazigis drinkkunvenon. Kaj en la antaŭprocesa esplorprocedo kaj dum la kortuma proceso F. neis sian kulpon. Unu el la atestantoj konfirmis la aserton de F., ke li pasigis la nokton de la 5-a al la 6-a de junio ĉe la atestanto; alia atestis, ke F. ricevis de li pagon por riparo de akvopumpilo, per kiu F. aranĝis la drinkkunvenon. F. estis kondamnita pro ŝtelo”.

La pruvojn kaj kontraŭpruvojn en tiu simpla kazo – kiu tamen postulas plurajn kompletigojn – Ejsman klasigis en ses grupojn da pruvoj kaj en du grupojn da kontraŭpruvoj, ĉiu el ili kun 3–6 demandoj kaj respondoj sur tri plenaj paĝoj. Al tio li aldonis du skeletajn skemojn de la pruvsystemo en la kazo Firsov (v. fotokopiojn en aldonoj 1 kaj 2, kiujn ne eblas komenti ĉi tie).

2.2.6.2. Tamen, malgraŭ la nombro de grupoj, multnombraj demandoj laŭ la metodo JES/NE kaj komplikaj skemoj, restas jure nepardoneblaj vakuoj. Ekzemple, eĉ se oni akceptas la alibion de F. kiel pruvitan, restas aperta la demando, ĉu la ŝtelo okazis la 5-an dum taglumo, aŭ nokte kaj, se nokte, ĉu F. ne havis komplikon, al kiu li donis la ŝlosilon por penetri en la domon de R., ĉar el la demandoj sekvas, ke F. havis tian ŝlosilon; plue, ĉu la mono ricevita por la riparo de la akvopumpilo sufiĉis por la elspezoj de la drinkkunveno aŭ, eĉ se sufiĉis, ĉu li ne povis kaŝi la monon, aŭ parton de ĝi, ricevitan el vendo de la vesto (al kiu, cetere?), se li aŭ la eventuala komplico fakte ŝtelis ĝin. Cetere, Ejsman mem rekonas, ke la establo de la vero per kortuma pruvado havas ne nur kvalitan karakteron (JES/NE), sed ankaŭ kvantan (pli kredeble, malpli kredeble) kaj ke tial estas maleble formuli ilin laŭ la kriterioj de formala logiko. Se tiel, do, kial oni perdas tempon por provi solvadi taskojn ne solveblajn per matematikaj formuloj kaj skemaj grafikaĵoj? La teorio de pruvoj estas unu el la plej malfacilaj partoj de la kriminaljura scienco, kaj la pritaksado de pruvoj en ĉiuj stadioj de kriminala proceduro estas unu el la plej delikataj taskoj de ĉiuj koncernaj justic-organoj. Nur en senpera kontakto kun la akuzitoj, viktimoj, atestantoj, ekspertoj, materiaj pruvoj kaj ĉiuj aliaj permesitaj rimedoj de pruvado kaj kontestado, tiuj organoj povas formi siajn pritaksojn kaj juĝojn. Ĝuste tial la principoj de senpereco kaj publikeco apartenas al la kvintesenco de moderna kriminala proceduro, sen kiuj justeco, multrilate ankoraŭ neperfekta eĉ en evoluintaj demokratioj, komplete kolapsus. Simboloj, abstraktaj matematikaj formuloj kaj elektronaj komputmaŝinoj ne rajtas kaj – feliĉe – ne povas, nek iam povos anstataŭigi ilin.

2.2.7. Por solvado de kriminologiaj problemoj ankaŭ en Soveta Unio estas abunde utiligitaj matematikaj metodoj kaj komputa tekniko, unuavice por statistikaj celoj. Tion ebligas la fakto, ke la objekto de kriminologiaj esploroj estas amaskarakteraj fenomenoj en statistika senco. O. A. Gavrilov kaj V. A. Kolemajev emfazas en la kolekto *Pravovaja Kibernetika*, ke krimeco posedas sian statistikan leĝecon, ĉar krimo ne estas hazarda aŭ arbitra fenomeno, kies kvanta flanko ne povus esti matematike analizita. Al la kvantaj faktoroj apartenas, ekzemple, la nombro de krimoj sur difinita teritorio (loko, distrikto, ktp.); la nombro de perpertrintoj en tiu aŭ alia periodo; la nombro de personoj perpertrintaj en la perperetro; la longeco de punaj malliberigoj por difinita krimspeco; la alteco de la kaŭzigitaj materiaj damaĝoj; la alteco de salajroj de kondamnitaj perpertrintoj, k.a. Rilate la mezureblajn kvalitajn aspektojn de kriminalaj statistikoj (sekso, profesio/okupo, loko de krimperperetro, k.a.) la sovetia kriminologio aplikas la teorion de kvalitaj indicoj, prilaboratan de matematika statistiko. Grava, plu solvata problemo, estas tiu de metriĝo, t.e. nombra prezento de kvalitaj konceptoj. Matematikaj kriminologiaj modeloj, al kiuj estas dediĉita aparta atento al prognozado de kresko aŭ malkresko de krimeco, karakterizas la kvantajn kaj kvalitajn aspektojn de krimeco kiel socia fenomeno. Korekte ellaboritaj kaj testitaj modeloj ebligas solvi kun granda probablo de precizeco la fundamentan kriminologian demandon, ĉu difinita socia faktoro influas aŭ ne influas difinitan specon kaj dinamismon de krimeco. Se la ekzamenata faktoro influas

en pozitiva aŭ negativa senco, la matematika modelo povas doni precizan kvantan mezuron de tiu influo. Kun la helpo de kriminalologiaj modeloj, ellaboritaj surbaze de la teorio de probableco kaj de matematika statistiko, oni povas ankaŭ evidenti tiajn faktorojn, kiuj tute ne estis, aŭ estis nur nesufiĉe, prenitaj en konsideron. La sovetiaj kriminologoj fidis, ke korektaj kriminalologiaj modeloj donas la eblecon science prognozi la kreskon de krimoj de difinita speco, kio siavice ebligas organizi adekvatajn preventajn metodojn. Ĝis nun la provoj korekte prognozadi ne donis kiajn ajn rimarkindajn rezultojn. Tio ŝuldiĝas almenaŭ parte al la kaŭzoj menciitaj sube en 2.2.7.2.

2.2.7.1. En Soveta Unio la ĉefa institucio okupiĝanta pri kriminologio estas la Tutunia Instituto por Studado de la Kaŭzoj de Krimo kaj pro Ellaborado de Rimedoj por ĝia Prevento, iom longa sovetia titolo anstataŭ la simpla kaj mallonga Instituto pri Kriminologio. Ĝi konsistas el deko da departementoj, en kiuj laboras pli ol cento da renomaj sovetiaj specialistoj kaj ducento da teknikaj kaj administraj oficistoj. La studoj de la Instituto ĉefe rilatas al (i) ĝeneralaj sociaj kondiĉoj influantaj la specojn kaj kvantojn de krimoj (urbo – vilaĝo, industriaj – neindustriaj kvartaloj, denseco de la loĝantaro, migrado, ktp.); (ii) ofteco de difinitaj specoj de krimoj (ekz. ekonomiaj, kontraŭ la ŝtaton, ktp.) kaj kategorioj de personoj, kiuj perpertas ilin (ekz. oficialuloj, intelektuloj, junularo, virinoj – viroj, ktp.); (iii) kaŭzoj (ekz. ebrieco, rompita familio, ktp.) kaj motivoj (ekz. profito) en kazo de motivitaj krimoj; konkretaj cirkonstancoj, kiuj faciligas perptron de difinitaj krimspecoj (ekz. supraĵa librotenado, aŭ/kaj nesufiĉa kontrolo en kazoj de ekonomiaj krimoj, k.a.). la rezultojn de tiuj esplorkomunikaĵoj la Instituto publikigas en formo de raportoj aŭ libroj, kiuj en la konkludaj partoj ĉiam entenas rekomendojn pri diversaj prevento-rimedoj aplikendaj al la pritrakitaj kategorioj de krimoj. Tio sendube estas pozitivaj atingoj, al kiuj multe kontribuas la apliko de kibernetiko en la esplorkomunikaĵoj de la Instituto kaj de aliaj sovetiaj institucioj okupiĝantaj pri kriminologio. Sed ekzistas ankaŭ la negativa flanko.

2.2.7.2. En 1967, okaze de unumonata studvojaĝo en Soveta Unio, mi pasigis kelkajn tagojn ankaŭ en la menciita Instituto, havis la okazon priparoli kriminalologiajn problemojn kun multaj kriminologoj laborantaj tie (interalie kun V. N. Kudrjavcev), kaj sufiĉe detale konatiĝi kun iliaj labormetodoj kaj kun la obstakloj malhelpantaj pli realecajn rezultojn. En mia verko *Soviet Penal Policy* (Sovetia Punjura Politiko), publikigita post tiu studvojaĝo antaŭ 15 jaroj, estis, interalie, prezentitaj kaj analizitaj ankaŭ la ideologiaj kaj faktaj malavantaĝoj de la sovetia kriminologio, tial ankaŭ la apliko de kibernetiko al kriminalologiaj esploroj. Resume ili estas:

(i) Pro la marksisma dogmo en leninisma varianto, laŭ kiu krimecon kaŭzas nur ekonomiaj-sociaj kondiĉoj, la sovetia kriminologio centrigis sian atenton preskaŭ ekskluzive al sociaj kaŭzoj de tiu fenomeno. Tamen, eĉ tiu limigita studado ne iris tre longan vojon. Se la sovetiaj kriminologoj deziris, aŭ se la suproj de la KP permesus al ili, komplete ekzameni la sociajn aspektojn de krimeco, ili devus

vastigi la esplorkampon de la „kaŭzoj”, kiuj fakte estas nur simptomoj de la malsano, al la plej profundaj redikoj de krimo, specifaj por la sovetaj ekonomiaj, sociaj kaj politikaj kondiĉoj.


(ii) Pro la samaj kaŭzoj la soveta kriminologio forĵetas apriorie „biologiismon”, nome eĉ nuran provekzamenadon de kia ajn biologia faktoro.

(iii) Ĝi devas akcepti la tezon pri „laŭgrada malaperado de krimo en socialismo”. Fakte, laŭ la taksoj de I. Zeldes, eminenta soveta kriminologo nun rezidanta en Usono la krimeco en USSR atingis fantaziajn proporciojn: ĉ. 16–20 milionoj da krimoj jare, kio signifas, ke du krimoj okazas ĉiujn tri sekundojn. Tio estas duoble pli ol en Usono, kvankam necesas konsideri, ke multaj agoj, difinitaj kiel krimoj en USSR, ne estas krimoj en Usono.

(iv) Plia malavantaĝo sekvas el la sekreteco de la krimstatistikoj, el kiuj multajn ne rajtas konsulti eĉ la scienculoj kriminologoj. Evidente, eĉ ne la plej perfektaj komputeroj povas doni pli da informoj, ol oni enmetis en ilin. Kaj mankaj aŭ falsaj informoj necese rezultigas mankajn aŭ falsajn konkludojn.

3. KONKLUDO

La koncize prezentitaj formoj de apliko de kibernetiko al juro kaj la kelkaj, eĉ pli koncizaj, kritikaj komentoj montras, ke la soveta jura kibernetiko atingis tre kontentigajn rezultojn en la jurnorma informaserĉa sfero, parte kontentigajn sur la kampo de jurnorma aplikado, se temas pri precizaj kvantaj kaj kvalitaj preskriboj kiel en la pensia juro, kaj neniajn, kiam ajn la juro postulas pritaksojn kaj juĝojn de homo-juristo, ekz. rilate pritakson de pruvoj aŭ decidojn pri sankcioj. La apliko de kibernetiko al kriminologiaj esploroj povas doni multe pli efikajn rezultojn, se iam la soveta kriminologio liberiĝos de dogmoj kaj tabuoj.



Adono 1.




Рис. 12

Aldono 2.

MARKSISMA KONCEPTO PRI ŜTATO KAJ JURO

La marksisma koncepto pri ŝtato kaj juro povas esti reduktita – kun ĉiuj rezervoj, necese implicitaj en tiaj koncizaj prezentoj de ampleksa doktrino – je la sekvantaj **dek** esencaj tezoj:

1. Ŝtato kaj juro apartenas al la fenomenoj de superstrukturo, kies bazo troviĝas en la ekonomia strukturo de la socio (infrastrukturo).

2. Ŝtato kaj juro estas klasaj kategorioj, ekestintaj samtempe rezulte de la malintegriĝo de la antaŭa senklasa socio – malintegriĝo kaŭzita de la multmiljara evoluo de la unuaj, primitivaj laboriloj kaj de ilia alproprigo fare de la pli fortaj – kaj de ĝia dividiĝo en malamikajn, antagonismajn klasojn de la proprietuloj de produktorimedoj, unuflanke, kaj de tiuj, kiuj estas senigitaj de tiuj rimedoj: la ekspluatantoj kaj ekspluatatoj.

3. La maniero de produktado en ĉiu historia epoko difinas *en la lasta analizo* la karakteron de la klasa divido de la socio: sklav-proprietuloj kaj sklavoj, feŭduloj kaj servutuloj, kapitalistoj kaj laboristoj. Same tiel ĝi difinas ĉiujn fenomenojn de la superstrukturo, kiuj siavice, kune kun aliaj faktoroj (kiel la geografia situo, historio, kutimoj, religio kaj aliaj restaĵoj de la antaŭaj superstrukturoj en la konscio de la homo), influas la evoluon de la ekonomia bazo. Ekzistas konstanta reciproka influo inter la bazo kaj la superstrukturo, sed en la lasta linio la ekonomia infrastrukturo estas decida.

4. Al ĉiu evoluŝtupo de la produktofortoj respondas difinitaj sociaj rilatoj. Ĉar la evoluo de la produktofortoj (laboriloj, maŝinoj, energio ktp.) ne dependas de la homa volo, kaj tial ne povas esti arbitre ŝanĝita, ankaŭ la produktaj rilatoj, t.e. la klasaj rilatoj, ne povas esti ŝanĝitaj, dum ili respondas al la produktofortoj. Ekzistas ekvilibro inter unuj kaj la aliaj, sed ekvilibro kun internaj kontraŭaĵoj pro la klasa karaktero de la socio.

Kiam la produktofortoj, pro novaj inventoj, plupasas la postrestintajn kaj malnoviĝintajn produktajn rilatojn, la baza dialektika kontraŭaĵo atingas sian pinton. Socia revolucio – ne necese perforta – solvas tiun antagonismon, kondukas al nova ekonomia-socia organizo (formacio) kaj reestablas la dialektikan ekvilibron ĝis la momento, kiam la plua evoluo de la produktofortoj postulos novajn revoluciajn ŝanĝojn. Marx tre firme asertis, ke „neniu socia ordo kiam ajn pereas *antaŭ ol evoluis ĉiuj produktofortoj, por kiuj ekzistas spaco en ĝi*”; kaj ke „*novaj, pli altaj*

produktaj rilatoj neniam aperas antaŭ ol la materiaj kondiĉoj por ilia ekesto maturiĝis en la utero de la malnova socio” (emfazite de I.L.). La citataj vortoj entenas la kvintesencon de la marksisma historia materialismo kaj klare malkovras la marksisman komprenon de la kondiĉoj por la transformiĝo de difinita socia sistemo en novan sistemon sur la sekvanta pli alta ŝtupo.

Evidente, nek la industrie postrestinta, duonfeŭdisma Ruslando de 1917 kun primitiva agrikulturo kaj ĉ. 75 % da analfabetoj, nek la aliaj industrie kaj agrikulture postrestintaj landoj (nomataj nuntempe „socialismaj”) estis maturaj por socialisma revolucio en la marksisma senco de la vorto. Lenin, ja, formale rekonadis tiun bazan marksisman tezon, sed nur por la transiro de feŭdismo en kapitalismon. En sia parolado de la 7-a de marto 1918 al la Sepa Kongreso de la Partio li diris, ke ĉiu burĝa revolucio havas nur unu taskon: detrui la barojn de la antaŭa sistemo al la libera kreskado de kapitalismo, jam ekestinta en la kadro de feŭdismo; kontraŭe, „socialisma revolucio troviĝas en tute malsama pozicio”, ĉar „ju pli postrestinta estas la lando, kiu pro la historiaj zigzagoj estas vokita komenci socialisman revolucion, des pli malfacile estas por tiu lando pasi el la malnovaj kapitalismaj rilatoj en novajn socialismajn rilatojn.”

Ne estas konate, kie Lenin trovis en la verkoj de Marx kaj Engels, ke la postrestintaj landoj – en tiu ĉi kazo la duonfeŭdisma Ruslando, en kiu estis ĵus aperintaj la komenciĝoj de „novaj, pli altaj produktorilatoj” ne de socialismo, sed de kapitalismo – estus maturaj por la transiro de la „malnovaj feŭdismaj rilatoj” ne en „novajn burĝajn-kapitalismajn”, sed tuj en novajn „socialismajn” rilatojn. Estus utile aldoni, ke Engels en respondo al letero de la rusa revoluciulo P. N. Tkaĉev diris pli ol klare, ke ĉiu, kiu kredas je la ebleco de socialisma revolucio en la postrestinta Ruslando, devus lerni la abocon de socialismo. La realaĵo devigis Lenin enkonduki jam en 1921 la t.n. Novan Ekonomian Politikon (NEP). En sia raporto de la 15-a de marto 1921 al la Deka Kongreso de la Rusa Komunista Partio li diris, ke la „monda revolucio estas prokrastita”, kaj rekonis, ke la sekvoj de la milito, postrestinteco de la lando, malamika sinteno de la kamparanoj, manko de industria ilaro kaj aliaj cirkonstancoj postulas reenkondukon de „liberaj interŝanĝoj” bazitaj sur privata proprieto (privata kapitalismo) paralele kun la „ŝtata kapitalismo” por eviti senperan katastrofon kaj falon de la reĝimo.

Jam en 1929 malaperis la „liberaj interŝanĝoj” kaj restis sole la ŝtata kapitalismo. Montriĝis ke la „socialisma” Oktobra Revolucio, kiu poste servis kiel modelo por similaj „socialismaj” revolucioj en aliaj industrie postrestintaj landoj, kvankam gvidata sub la ruĝa standardo de marksismo kaj socialismo, fakte estis la plej kontraŭmarksisma evento en la historio de socialismo ĝenerale.

5. Ekzistas tri ĉefaj tipoj de ŝtato kaj juro, reflektantaj la tri ĉefajn sociajn-ekonomiajn formaciojn, bazitajn sur privata proprieto: sklavproprietula, feŭdisma kaj burĝa-kapitalisma ŝtatoj. Ĉiu el ili signas progresan epokon en la ekonomio de la socio. Ĉiu ŝtato estas instrumento, kiun la reganta klaso utiligas por la progresigo de siaj interesoj. Juro, nedisigeble ligita al ŝtato, estas aro da devigaj kondutreguloj, sankciitaj de la ŝtata potenco kaj reflektantaj la volon de la reganta klaso, sed tiu volo estas kondiĉita de la konkreta produktomaniero, kvankam ekzistas eblecoj de elekto

de juraj solvoj en la kadro de tiu ĝenerala kondiĉiteco. Juro unuavice kontentigas la interesojn de la reganta klaso, sed ĝi samtempe respondas al la produktomaniero en la periodoj de ekvilibro inter la produktfortoj kaj produktorilatoj, kiujn ĝi siavice fortikigas kaj tiamaniere apogas la pluan evoluon kaj kreskon de ekonomiaj fortoj (vidu supre en p-to 4). En tiuj periodoj de ekvilibro kaj en tiu senco juro respondas al „ĝeneralaj ekonomiaj kondiĉoj”, kaj tial ankaŭ al ĝeneralaj intereso kaj bezonoj de la socio, kiel Engels emfazis en sia letero de la 27-a de oktobro 1890 al C. Schmidt.

6. La grandega centriĝo de ĉiuj produktorimedoj kaj same tiel la grandega koncentriĝo de la laboristaj amasoj en gigantaj fabrikoj kaj uzinoj estas la plej grava antagonisma kontraŭaĵo en la malfrua kapitalismo. La kontraŭaĵo inter la socia karaktero de la laboro kaj la privata alproprigo de la fruktoj de la laboro fare de la proprietuloj de la produktorimedoj samtempe estas la baza formo de kontraŭaĵo inter la novaj, alte evoluintaj produktorimedoj kaj la malnoviĝintaj klasaj rilatoj en kapitalismo. Tio obstaklas la pluan ekonomian evoluon kaj fine atingas la punkton, kiu postulas la sociigon de la produktorimedoj konforme al la jam efektivigita sociigo de la laboro, aŭ, kiel Marx diris en *La Kapitalo*: „La kapitalisma ŝelo krevas. La funebra sonorilo de la kapitalisma privata propio sonoratas. La ekspropriigintoj estas ekspropriigataj”.

Apenaŭ necesas diri, ke tiu funebra sonorilo sonoratas jam pli ol tutan jarcenton pro la erara diagnozo; ke la ŝelo ne krevis, sed ke en la demokratioj kaj la kapitalo kaj la laboristaro sukcesis grandparte adaptiĝi al la postuloj de la teknika progreso sen sangoverŝado kaj gulagoj, kio montras, ke en ĝi plu troviĝis „spaco por la evoluo de la produktfortoj”, por uzi la vortojn de Marx mem.

7. Al la internacia klasa solidareco de la burĝaro devas esti kontraŭstarigita la internacia solidareco de la laboristaro. La lasta frazo de la *Komunista Manifesto* „laboristoj de ĉiuj landoj, unuiĝu!” entenas la kvintesencon de la t.n. proleta internaciismo, kiu estas esenca elemento de la marksisma teorio pri formortado de la ŝtato kaj juro transire al la senklasa monda socio, kie ili devus komplete malaperi.

Stalin transformis ankaŭ la marksisman „proletan internaciismon” en instrumenton de sia partia imperialisma agresiva politiko. Jam en 1927 li difinis la „sole ĝustan internaciismon” jene: „Internaciisto estas tiu, kiu estas preta defendi SSSR sen rezervoj, sen hezitado, senkondiĉe, ĉar SSSR estas la bazo de la monda revolucia movado, kaj ne estas eble protekti, progresigi tiun revolucion movadon sen protektado de SSSR. Ĉar tiu, kiu kredas, ke li protektas la mondan revolucion movadon preter SSSR kaj kontraŭ ĝin, elpaŝas kontraŭ la revolucion kaj necese glitas en la kamparon de la malamikoj de la revolucio”.

Tia stalinisma „proleta internaciismo”, kiu havas nenion komunan kun la originala marksisma koncepto, fariĝis ideologia bazo de la siatempa „monolita” komunisma bloko. Nur post la konata disputo inter la jugoslaviaj kaj sovetiaj partiaj gvidantaroj, la stalinisma monolita bloko komencis rompiĝadi, kaj tio sendube estas merito de la tiama partia gvidantaro de Jugoslavio, eĉ senkonsidere al la veraj kaŭzoj de la konflikto, pri kiuj estas jam sufiĉe skribite.

La grava kompromitiĝo de „socialisma internaciismo” en la stalinisma senco de la esprimo neniel signifas ke internaciismo estas morta: ne la marksisma

„proleta”, aŭ stalinisma, aŭ „burĝa”, aŭ kristana, aŭ kiu ajn alia aparta, sed tutsimple internaciismo en sia ĝenerala, objektiva, pura formo. La nuntempa internaciismo ekestis kaj plu evoluas pro la ĉiam pli sentebla interdependeco de ĉiuj partoj de la mondo kaj de ĉiuj nacioj. Kiel la esprimo mem implicas, internaciismo neas nek la naciojn, nek sanan patriotismon, t.e. patriotismon, kiu ne transiras en ekstreman ŝovinismon. Demokrata internaciismo kunligas tion, kio postulas unuiĝon, kaj lasas al ĉiu nacio ĝian individuecon kaj protektas ĝian identecon. Lingva esprimo de tia internaciismo estas la internacia lingvo (Esperanto). Estas surprize, ke tia profunda kaj vasta menso, kiel tiu de Marx, ne pritraktis tiun aspekton, kvankam sen komuna, nacie neŭtrala lingvo por internacia komunikado, internaciismo estas lama kaj evidente ne povas adekvate fortikiĝi.

8. Kiam ekzistas ĉiuj menciitaj antaŭkondiĉoj, la situacio estas matura por socialisma revolucio, kiu detruas la burĝan ŝtatan aparaton, sociigas la produktajn rimedojn, unuavice tra laŭgrada naciigo, kaj kreas la socialismajn ŝtaton kaj juron de la transira periodo. Tiu periodo kondukas en plenan komunismon, en kiu ŝtaton kaj juron anstataŭos „la administrado de aferoj kaj direktado de la procezoj de produktado” (Engels).

Laŭ la nuntempa oficiala sovetia doktrino, USSR precize la 31-an de oktobro 1961 (la tago de unuanima akcepto de la Partia Programo) fariĝis „tutpopola” ŝtato, t.e. ŝtato sen antagonismaj klasoj, kio signifas neadon de fundamenta marksisma, eĉ leninisma tezo, ke ne ekzistas ŝtato sen antagonismaj klasoj, nek klasoj sen ŝtato.

9. La ŝtato de la transira periodo „povas esti nenio alia ol la diktaturo de la proletaro” (emfazite en la originalo), t.e. „diktaturo” realigata de la grandega plimulto de la popolo, ĉar en industrie alte evoluintaj landoj la laboristaj amasoj necese konsistigas la grandegan plimulton. Analizante la spertojn de la Pariza Komuno en *La Civila Milito en Francio*, Marx esprimis la opinion, ke la proleta ŝtato devus esti bazita sur kompleta demokratio, universala voĉdonrajto, revokeblaj reprezentantoj, kaj unueco de povo, distinge de la „burĝa” apartigo de povo, nome la leĝdona, ekzekutiva kaj juĝa. La originala marksisma koncepto de la „diktaturo de la proletaro” ne estas la malo de politika demokratio, sed la malo de la diktaturo de la burĝaro en la kapitalisma ŝtato, kiu estas „nenio alia ol maŝino por subpremo de unu klaso fare de alia, en demokratia respubliko ne malpli ol en la monarkio”.

La tezo kaj antitezo ne estas, do, diktaturo-demokratio, sed proletaro-burĝaro. Tio vidiĝas ankaŭ el la fakto, ke en kapitalisma ŝtato la burĝaro en sia kvalito de proprietuloj de la produktorimedoj utiligas la ŝtaton kaj juron por siaj klasaj interesoj kaj altrudas sian volon (diktaturon) eĉ en la periodoj, kiam – pro la stabileco de la socia-ekonomia ordo (v. supre en p-to 4) – politika demokratio estas ebla. Tiun burĝan „diktaturon” de la malplimulto anstataŭas la „proleta diktaturo” de la grandega plimulto kaj „venkas en la batalo por demokratio”, kiel Marx diris en la *Kritiko de la Gota Programo*.

Kiel ĉion alian, ankaŭ tiun marksisman „diktaturon”, kiu havas nenion komunan kun la kutima senco de tiu vorto, Lenin, Stalin kaj ĉiuj postaj gvidantoj de „socialismaj revolucioj” transformis en sian totalecan diktaturon super la „laboristaro, kamparanaro kaj la laboranta intelektularo” en la konata terminologio,

super la tuta popolo, eĉ super la partia membraro mem, kiam ajn tiuj partiaj gvidantaroj opiniis tion necesa por fortikigo de siaj diktatorecaj potencoj. Ĉio-ĉi tiel renversis la originalan marksisman sencon kaj tiel kompromitis la esprimon mem, ke kelkaj komunistaj partioj en la Okcidento sentis sin devigitaj elĵeti la „diktaturon de la proletaro” el siaj programoj.

10. Diference de ĉiuj aliaj tipoj de ŝtato, kiuj protektas kaj progresigas la interesojn de la ekspluatantoj kontraŭ la ekspluatataj amasoj, la socialisma ŝtato estas armilo en la lukto kontraŭ la restaĵojn de la klasa socio kun la tasko prepari la kondiĉojn por la transiro en senklasan komunismon. Tial la ŝtato de la transira periodo kaj ĝia juro komencas formortadi kaj fine por ĉiam malaperas samtempe kun la likvido de ĉiuj antagonismaj klasaj restaĵoj. „La enmiksiĝo de la ŝtata potenco en la sociajn rilatojn fariĝas superflua en unu sfero post la alia, kaj tiam per si mem malaperas ... La ŝtato ne estas abolita, ĝi formortas” (Engels).

Per sia konata „dialektiko” Stalin transformis ankaŭ tiun marksisman tezon en antitezon, kiam li, unue dum la aprila Plenkunsido de la Centra Komitato de la Partio en 1929 atakis la „buĥarinisman” koncepton pri formortado de la ŝtato, kaj poste en la Raporto de la 27-a de junio 1930 al la Deksepa Kongreso de la KP de Soveta Unio, kiam li diris, ke „la evoluigo de la ŝtata potenco ĝis la plej alta grado kun la celo prepari la kondiĉojn por la formortado de la ŝtato” estas la sola korekta „marksisma formulo”. Tion li ripetis multfoje dum la likvidado de „sabotantoj” kaj „kontraŭrevoluciuloj”, kiuj kredis je la marksisma formortado de la ŝtato. La Programo de la Komunsita Partio de Soveta Unio de 1961 entenas la saman ideon de „ĉiuflanka fortikigado de la ŝtato” por prepari la kondiĉojn de ĝia „formortado”, kiu, laŭ la programo, estas en ĉiu okazo prokrastita al senfina estonteco.

Tiamaniere ankaŭ tiu ĉi marksisma tezo, kiu, eble pli ol kio ajn alia en la marksismo, inspiradis junajn homojn en la sekretaj marksismaj rondetoj en ŝtatoj de burĝaj diktaturoj, ĉar ili sur si mem sentadis la pezan ŝarĝon de nedemokrata potenco kun ĉiuj akompanaj fenomenoj de fremdiĝo de la civitano for de la ŝtato kaj de la individuo for de la socio, realiĝis en formo de antitezo, dum la tezo estas metita en fridujon por la estontaj jarcentoj, aŭ eble en fandformon por ĉiam.

Ne enirante ĉi tie en la sciencan valoron de la marksisma materialisma filozofio, kies parto estas la koncepto pri ŝtato kaj juro (multaj tezoj povus esti sukcese teorie kritikataj, dum aliajn dementis la realaĵo), ĝi devas esti prenita en konsideron kiel ideologia fono kaj motoro de la t.n. „marksismaj socialismaj ŝtatoj”. En tiu ĉi kunteksto ne multe gravas, ke en la sovetia ideologio praktike nenio restas el la originala marksismo. Ankaŭ falsaj aŭ deformitaj ideologioj povas skui la mondon. Same tiel ne gravas, ke verŝajne 90 % de la komunistoj en tiuj landoj, inkluzive multaj el la gvidantoj, neniam legis Markson kaj ke, kompanse, verŝajne 90 % de la antimarksistoj en la Okcidento same tiel neniam legis Markson. Sed ja gravas la pretendo, ke tiuj ŝtatoj estas realiĝo de marksismo. Se la pretendo estas ĝusta, tiam la tuta sistemo ricevas legitimecon almenaŭ por tiuj, kiuj plu fidis, ke marksismo donas ne nur sciencan eksplikon de la socio, sed ankaŭ science apogitajn formulojn por agadoj cele al rapidigo kaj reguligo de spontaneaj aŭ latentaj procezoj, kondukantaj al pli feliĉa socio sur la plej alta ŝtupo kun pli feliĉaj unuopuloj en tiu

feliĉa socio. Se la pretendo ne estas ĝusta, do malaperas kia ajn legitimeco eĉ por tiuj, kiuj akceptas marksismon.

Unu afero estas certa: se Marx vivus en Soveta Unio de Stalin, li estus likvidita kiel antimarksisto-leninisto-stalinisto; se li hodiaŭ vivus en la okcidentaj demokratioj, plu bazitaj sur privata proprieto, sed kun multaj socialismaj elementoj, li plej kredeble multilate revizius sian filozofion; kaj se li leviĝus el sia tombo en Highgate kaj konstatus, kion ambaŭ flankoj nomas marksismo, verŝajne li tuj revenus en sian tombon por plu ripozi en paco kaj resti tio, kio li estas: unu el la plej grandaj pensuloj de la moderna epoko.

DIKTATURO DE LA PROLETARO KAJ TUTPOPOLA ŜTATO EN LA LUMO DE ORIGINALA MARKSISMO

(Adaptita teksto de anglalingva aldona prelego, farita en oktobro 1980 dum la Dua Monda Kongreso pri Sovetaj kaj Orienteŭropaj Studoj en Garmisch (FR Germanio) la Sekcio „Ŝtato kaj Juro”, kiun la aŭtoro prezidis. La tuta prelegaro ĵus aperis en libro, kiun mi mallonge recenzas en tiu ĉi numero. IJR publikigas tiun ĉi kontribuaĵon por memorigi la 100-jaran datrevenon de la morto de Karl marx (14.02.1983), verŝajne la plej granda kaj certe la plej diskutata pensulo de la nuna epoko, kies grandioza verko trovis multajn sekvantojn, same multajn kontraŭulojn, sed ĉefe amason da ĉiaspecaj ignorantoj kaj falsantoj en ambaŭ tendaroj. Ekster tiuj ekstremoj troviĝas la nuntempa scienca, kritika analizo de la originala marksismo.)

Ĉar Profesoro O. Ĵidkov de la Universitato de Amikeco de Popoloj en Moskvo, kiu estis prezentanta kompletigan prelegon al tiu de Profesoro Ginsburg, en la tute lasta momento informis la Planadan Komitaton, ke li ne povas partopreni la Kongreson, mi ne trovis alian solvon ol mem transpreni lian taskon.

Ĉiuj ses ŝlosilaj motivoj je kiuj, laŭ la tre interesa prelego de Profesoro Ginsburg, la aŭtoro de la Sovetia Konstitucio de 1977 fidis – stabileco, socialigo, unueco, produktado, demokratio kaj leĝeco – meritas atentan konsideron. Pluraj demandoj pritraktitaj de nia eminenta kolego en lia elstara analizo de la konstituciaj kontrastoj sur tiu ĉi kampo eble estos pli vaste lumigitaj en la diskuto. Por komenci mi deziras aldoni nur kelkajn vortojn pri la originala marksisma koncepto de la diktaturo de la proletaro kaj pri la malebleco de ia „tutpopola ŝtato” el marksisma, aŭ eĉ el leninisma vidpunkto.

Laŭ la marksismo, ŝtato kaj juro apartenas al la t.n. fenomenoj de superstrukturo. Ili estas klasaj kategorioj. Ili ekestis rezulte de la malintegriĝo de la praa senklasa socio – malintegriĝo siavice ŝuldata al la ekesto kaj evoluo de la unuaj, plej primitivaj, laboriloj kaj de ilia alproprigo fare de la pli fortaj – kaj de ĝia dividiĝo en malamikajn, antagonismajn klasojn de tiuj, kiuj proprietas, kaj de tiuj, kiuj estas senigitaj de la produktorimedoj: la ekspluatantoj kaj la ekspluatatoj. Ĉiu ŝtato estas instrumento de povo en la manoj de la reganta klaso, kaj utiligata por antaŭenigo de ĝiaj propraj interesoj, dum juro estas la tuto de devigaj reguloj sankciitaj de la ŝtata aŭtoritato kaj esprimantaj la volon de la reganta klaso kiel determinita de la

produktomaniero. La burĝa-kapitalisma ŝtato estas karakterizita de siaj propraj specifaj kontraŭdiroj aldone al la kontraŭdiroj troviĝantaj en ĉiuj klasaj socioj. Unu el ili estas la grandega centralizo de la produktorimedoj en la manoj de la kapitalistoj, kaj la same grandega centriĝo de la laborulaj amasoj en enormaj fabrikoj kaj entreprenoj. Tiu ĉi kontraŭdiro inter la socia karaktero de la produktado kaj la privata alproprigo de la fruktoj de la laboro fare de la proprietuloj de la produktorimedoj konstituas la bazan formon de antagonismo inter la novaj, alte evoluintaj produktorimedoj kaj la malnoviĝintaj klasaj rilatoj en *matura* kapitalismo, kaj tial ĝi postulas la socialigon de la produktorimedoj. Tamen, estas necese memori, ke – por citi Marx – „neniu socia ordo iam pereas antaŭ ol *ĉiuj produktofortoj*, por kiuj ankoraŭ ekzistas spaco en ĝi, finevoluis; kaj novaj, pli altaj produktorilatoj *neniam aperas antaŭ ol la materiaj kondiĉoj por ilia ekzisto finmaturiĝis en la utero de la malnova socio mem*” (amfazo de I.L.).

Kiam ĉiuj menciitaj kaj aliaj antaŭkondiĉoj ekzistas – inkluzive la tre gravan, sed kutime forgesatan, proletan internaciismon en la originala marksisma senco – la situacio estas matura por socialisma revolucio, kiu detruas la burĝajn ŝtatan aparaton kaj juron, socialigas ĉiujn produktorimedojn en la komenca periodo tra laŭgrada ŝtatigo, kaj kreas socialismajn ŝtaton kaj juron de la t.n. transira periodo de kapitalismo – ne de feŭdismo aŭ duonfeŭdismo, sed de alte evoluinta kapitalismo – en plenan komunismon, en kiu ŝtato kaj juro estos anstataŭigitaj „per la administrado de aferoj kaj la direktado de la evoluprocezoj” (Engels).

Ĉiam laŭ marksismo, la ŝtato de la transira periodo „povas esti nenio alia, ol la revolucia diktaturo de la proletaro”, t.e. „diktaturo” plenumata de la laborulaj amasoj – necese la grandega plimulto – super la eta minoritato de senproprigitaj kapitalistoj. La originala marksisma „diktaturo de la proletaro” ne signifas diktaturon de unu homo aŭ de malgranda grupo da personoj („kolektiva gvidantaro”), nek ĝi havas la sencon kutime donatan al tiu esprimo. La marksisma „diktaturo de la proletaro” ne estas la malo de politika demokratio, sed la malo de la diktaturo de la burĝaro en la kapitalisma ŝtato, kiu „estas nenio alia ol maŝino por subpremo de unu klaso fare de alia, kaj *efektive en demokrata respubliko ne malpli ol en monarkio*” (Enkonduko, *La Civila Milito en Francio*, emfazo de I.L.). La tezo kaj antitezo, do, estas proletaro – burĝaro, kaj ne diktaturo – demokratio. Ĝi estas tiel, ĉar la burĝaro proprietas la produktorimedojn kaj utiligas la ŝtaton kaj juron por siaj propraj klasaj interesoj eĉ kiam, dank’ al stabileco de la socia *ekonomia ordo en la periodoj de ekvilibro inter la produktofortoj kaj la produktorilatoj, politika demokratio estas ebla*. Tiu „burĝa diktaturo” de la minoritato estas anstataŭigita per la „proleta diktaturo” de la grandega plimulto kaj „venkas en la batalo por demokratio” ĝis la tempo kiam „generacio edukita en novaj, liberaj sociaj kondiĉoj estos kapabla forĵeti la tutan ĉifonaĵon de la ŝtato en rubujon” (Marx) aŭ, kiel Engels diris: „La interveno de la ŝtata potenco en la socialajn rilatojn fariĝas superflua en unu sfero post la alia, kaj tiam ĉesas per si mem ... La ŝtato ne estas abolita, ĝi formortas”.

Senkonsidere al la valoro de la originala marksisma koncepto pri ŝtato kaj juro, ĝi devas esti prenita en konsideron, ĉar la sovetia doktrino pri ŝtato kaj juro pretendas, kaj ekde la Oktobra Revolucio ĉiam pretendis, ke la socia-ekonomia,

politika kaj jura organizo de la sovetia ŝtato estas bazita sur marksismaj principoj kaj spegulas la originalan marksisman ideologion. Tio rilatas ankaŭ al la t.n. „tutpopola” ŝtato kaj juro.

Kiel konate, la nova sovetia tezo koncerne la „tutpopolan” karakteron de la sovetia ŝtato kaj la kunligitaj demandoj estis unue formulita en la Programo de la Komunista Partio de USSR de 1961. Unuavice tie troviĝas la nova oficiala linio, laŭ kiu „la diktaturo de la laborista klaso”, plenuminte sian taskon, finiĝis „en la aktuala stadio”, t.e. dum la potencperiodo de Ĥruŝĉov. Lasante flanke la fakton, ke en la realaĵo la diktaturo de la proletaro en la marksisma senco de la vorto neniam ekzistis, nek povis ekzisti, en la sovetia ŝtato, ĉar Ruslando de 1917 – duonfeŭdisma, postrestinta, en la komenciĝoj de industria evoluo, kun tre malforta proletaro kaj eĉ pli malforta kapitalista klaso – tute ne estis matura por marksisma socialisma revolucio, tiu ĉi tezo egalas al aserto, ke en Soveta Unio jam estas establita senklasa socio. La plua ekzistado de la kvazaŭe „du amikaj klasoj” (laboristoj kaj kamparanoj) kaj de la t.n. „aparta socia tavolo” (la intelektularo), plu rekonita de la doktrino, ŝanĝas nenion, ĉar en la lumo de la markisma politika-jura teorio la ekzisto de *antagonismaj klasoj* („eksploatantoj” kaj „eksploatatoj”) estas esenca por la ekzisto de la ŝtato kaj tial ankaŭ por la kompreno de ĝia vera naturo. Ne nur la „antagonismaj klasoj” estas nun oficiale abolitaj, unue en la Programo de 1961 kaj poste en la Konstitucio de 1977, sed ankaŭ la Komunista Partio same oficiale fariĝis „la partio de la tuta sovetia popolo”.

Tio estas duoble absurda. El marksisma vidpunkto ĝi estas sensencaĵo ĉar, laŭ la marksismo, partio estas nenio alia ol la plej valora, la organizita parto de klaso: ĝi esprimas la interesojn de tiu klaso kaj protektas ilin en la politika lukto. Sed „partio de la tuta popolo” estas sensencaĵo ankaŭ ekster la marksisma doktrino, ĉar ĝi kontraŭdiras la signifon de la vorto „partio” sur tiu ĉi kampo.

Plue, tie troviĝas la tezo pri la malapero de la „diktaturo de la laborista klaso” antaŭ la formorto de la ŝtato kaj lige kun tio, la tezo pri la nuntempa sovetia ŝtato kiel „tutpopola ŝtato”, do ŝtato de la popolo kiel unueca tuto, alivorte: senklasa ŝtato. Marksisme tio estas kompleta plia sensencaĵo, ĉar ne ekzistas ŝtato sen antagonismaj klasoj, nek antagonismaj klasoj sen ŝtato, aŭ, kiel Lenin diris tre klare kaj decide en sia prelego „Ŝtato” (*Gosudarstvo*) farita en la Universitato de Sverdlov en 1919:

„La Ŝtato estas produkto kaj manifestiĝo de nepacigeblo de klasaj antagonismoj. Kiam, kie kaj kiomgrade la ŝtato estiĝas dependas de tio, kiam, kie kaj kiomgrade la klasaj antagonismoj de difinita socio objektive ne povas esti pacigitaj. Kaj inverse, la ekzisto de la ŝtato pruvas, ke la klasaj antagonismoj *estas* nepacigeblaj” (emfazo en la originalo).

Ŝajnas al mi ke la ekzisto de la potenca sovetia ŝtato, bazita sur ŝtata kapitalismo kaj tre malproksima de la marksisma socialisma tezo pri formortado, estas evidenta pruvo pri la ekzisto de antagonismaj klasoj kun nepacigeblaj klasaj intereso en Soveta Unio. Almenaŭ por tiuj, kiuj rigardas sin marksistoj aŭ leninistoj, kaj kiuj opinias, ke marksismo donas kontentigan eksplikon pri la vera naturo de ŝtato kaj juro.

KONCEPTO DE JURA PERSONO LAŬ SOVETIA JURO

1. Difino

La unua sovetia civila kodo – tiu de la Rusa Soveta Federacia Socialisma Respubliko (RSFSR) de 1922 – difinis juran personon en Art. 13 jene:

„Juraj personoj estas tiuj asocioj de personoj (fizikaj), aŭ institucioj, aŭ organizaĵoj, kiuj povas en sia propra nomo akiri havaĵajn rajtojn, obligaciigĝi (sin devontigi) kaj aperi antaŭ kortumoj kiel plendantoj aŭ defendantoj”¹

Tio estis nepreciza difino, kiu kaŭzis multajn diskutojn en la sovetia civil-jura teorio pri la karaktero de la sovetiaj juraj personoj. Kelkaj opiniis, ke la sendependa partopreno de iu ento en civiljuraj transakcioj² estas tiel esenca, ke nur ĝi faras iun enton jura persono. A. V. Venediktov, unu el la plej grandaj sovetiaj juristoj, analizante Art. 13 de la Civila Kodo (en la plua teksto CK), skribis:

„Sendependa partopreno en civiljuraj transakcioj, eniro en ilin en kvalito de sendependa tenanto de civilaj rajtoj kaj devoj – do en sia propra nomo – estas la decida kriterio, formulita de la sovetia leĝdona aŭtoritato en perfekte klara difino, komuna al ĉiuj juraj personoj”.

La saman opinion esprimis D. M. Genkin, konata sovetia civilisto, kiu emfazis, ke „agado en sia propra nomo” estas la difina karakterizo de jura persono. Aliaj asertis, ke „sendependa partopreno en civiljuraj transakcioj” ne estas ia aparta karakterizo, sed simple nur sekvo de la jura personeco. Ekzemple, S. N. Bratus, alia kompetenta sovetia civilisto, skribis:

„La kapablo agi en sia propra nomo en civiljuraj transakcioj estas nek antaŭkondiĉo, nek elemento, nek signo de jura persono, sed manifestiĝo kaj esprimiĝo de jam ekzistanta jura persono, kreita kolektive. Tio, kio estas jure rekonita subjekto, agas en civiljuraj rilatoj en sia propra nomo, ĉu rekte, ĉu pere de siaj reprezentantoj”.

Malgraŭ la neklara difino kaj la malsameco de opinioj pri la jura karaktero de juraj personoj, en la praktiko ili funkciis pli-malpli kontentige ne nur en la periodo

¹) Estas necese distingi inter la kriminaljura „akuzo” kaj ĝiaj derivaĵoj (akuzanto, akuzito, ktp.), unuflanke, kaj la civiljura „plendo”, aliflanke. Plendo estas civila, laŭleĝe prezentita postulo de iu jura subjekto (plendanto) antaŭ kortumo aŭ alia juĝa instanco kontraŭ alian juran subjekton (defendanton en la proceso) por havigi juĝon konforman al la plendo.

²) „Transakcio”, aldone al la signifo donita en PIV, estas ĉiu ago kaŭzanta ekeston, modifon aŭ ĉesigon de civiljura rilato.

de NEP (Nova Ekonomia Politiko), iniciatita de Lenin por savi la reĝimon de plena kolapso, sed certgrade ankaŭ post la abolicio de NEP kaj la transiro al ŝtate planita ekonomio.

Dum la absolutisma regado de Stalin juro perdis kian ajn valoron. La stalinisma regno estis administrata per dekretoj, ordonoj, sekretaj instrukcioj kaj teroro. Ĉiuj leĝoj de la dudekaj jaroj komplete malaktualiĝis, kaj novaj leĝoj ne aperadis. Nur post la morto de Stalin komenciĝis ampleksa leĝdona aktivado en ĉiuj juraj branĉoj, interalie en civila juro. La Bazaj Principoj (Fundamentoj) de Civila Leĝaro de Soveta Unio kaj de la Unuaj Respublikoj – tutunia leĝo aplikata sur la tuta teritorio de USSR – estis promulgita la 8-an de decembro 1961. Post tio sekvis la CK-oj de la unuopaj uniaj respublikoj. La Civila Kodo de RSFSR, la plej granda kaj la plej grava el inter la 15 uniaj respublikoj – estis akceptita la 11-an de junio 1964 kaj plu validas.

En la nova civila leĝaro ankaŭ la parto pri juraj personoj estas komplete reviziita. Unu tuta sekcio (Art. 23–41) de la CK de RSFSR (kaj similaj sekcio en la CK-oj de la aliaj respublikoj) entenas preskribojn pri juraj personoj. Art. 11 de la Bazaj Principoj kaj Art. 23 de la CK de RSFSR difinas jurajn personojn kiel „tiajn organizaĵojn, kiuj posedas apartan havaĵon, kaj kiuj povas en sia nomo akiradi havaĵajn kaj personajn nehavaĵajn rajtojn kaj obligacii sin, (kiel ankaŭ) esti plendantoj kaj defendantoj antaŭ kortumoj, (ŝtata) arbitracio kaj interkonsentita arbitracia tribunalo”.

Tiu difino, tre preciza, rilatas al ĉiuj specoj de juraj personoj. Kiel oni vidas, ĉiu jura persono devas posedi difinitan havaĵon. La karaktero de tiu posedado kaj tial la rajto disponadi dependas de la speco de jura persono laŭ la leĝo kaj/aŭ ĝia statuto. En iuj kazoj temas pri veraj proprietaj rajtoj, en aliaj nur pri operacia manaĝado, nomata ankaŭ „operacia propio”. En la limoj fiksitaj de la leĝo kaj/aŭ statuto, ĉiu jura persono povas en sia nomo, unuflanke, akiradi havaĵon kaj nehavaĵajn personajn rajtojn, ekz. la rajtojn je nomo, aŭ la rajton je honoro kaj digno, kaj, aliflanke, sin obligacii (sin devontigi). Fine, jura persono povas aperi kiel partio antaŭ ordinara kortumo, aŭ ŝtata arbitracia instanco, aŭ ĝi povas submetiĝi al decido de interkonsente elektita arbitracia tribunalo, ĉio depende de la karaktero de la jura persono. Ekzemple, ŝtataj entreprenoj ne prezentas siajn antaŭkontraktajn aŭ postkontraktajn malkonsentojn al ordinaraj kortumoj, sed al instancoj de la ŝtata arbitracio (*arbitraj*)³.

2. Specoj

Laŭ la nun valida leĝaro, en USSR ekzistas la sekvantaj kvin specoj de juraj personoj:

3) Antaŭkontrakta arbitracio estas deviga, se la partioj (entreprenoj) ne povas interkonsenti pri iu aŭ pluraj klaŭzoj de kontrakto. Postkontrakta arbitracio okazas pro neplenumado aŭ neadekvata plenumado de kontrakto. En ambaŭ kazoj la decido de la ŝtata arbitracia instanco estas deviga kaj ekzekuciebla.

(1) *Ŝtataj entreprenoj* kaj aliaj ŝtataj organizaĵoj funkciantaj surbaze de *hozrasĉot* (laŭvorte: ekonomia kalkulo⁴, aŭ mastruma kalkulo), t.e. komerca bilanco, laŭ kiu la sovetaj ŝtataj entreprenoj devas funkcii konforme al la leĝo. Ilia ekonomia bazo estas la fiksa kapitalo kaj la cirkulantaj rimedoj, kiujn ili ricevas de la ŝtata fondorgano el la nedividebla ŝtata proprietaĵo pro operacia manaĝado. Pri tiu porcio de la ŝtata proprietaĵo ili ĝuas la rajton de operacia proprieto. La ŝtataj entreprenoj havas siajn buĝetojn kaj bilancojn. La elspezojn ili kovras el la enspezoj. Komprenoble, ili devas plenumadi la ŝtatajn ekonomiajn planojn. Por fortikigi la produktodisciplinon kaj por fiksi la detalojn, ili eniras en reciprokajn civiljurajn kontraktajn rilatojn. Se, ekzemple, ŝufabriko (entrepreno) ricevas laŭplanan taskon produkti difinitan kvanton da ŝuoj je fiksitaj prezoj, ledfabriko samtempe ricevas la taskon produkti difinitan kvanton da ledoj kaj vendi ĝin je fiksitaj prezoj al la ŝufabriko.

La limdatoj por livero kaj akcepto de la ledo, eble la koloro(j) kaj similaj detaloj, estos fiksitaj en civiljura kontrakto inter la du entreprenoj. Se interkonsento ne estas atingebla, la malkonsento devas esti prezentita al ŝtata arbitracia instanco, kies decido estas fina. Tiom, treege simpligite, nur por komprenigi la rilatojn inter la devigaj laŭplanaj taskoj kaj la civiljuraj rilatoj inter diversaj ŝtataj entreprenoj cele al plenumado de la laŭplanaj taskoj.

(2) *Institucioj* kaj aliaj ŝtataj organizaĵoj ricevantaj siajn rimedojn el la ŝtata buĝeto, sed havantaj siajn proprajn elspezotaskojn (*smeta*), kies direktoroj havas la rajton disponi pri la aprobitaj kreditoj, se la leĝo ne preskribas alimaniere. Temas, ĉefe, pri diversgradaj lernejoj, universitatoj, institutoj, akademioj kaj similaj sciencaj, edukaj kaj kulturaj institucioj. Depende de siaj karaktero kaj administracia subgiteco, ili ricevas la neceajn financajn rimedojn el la buĝetoj de la respektivaj sovetoj, al kiuj ili estas subigitaj.

(3) *Ŝtataj organizaĵoj financataj el aliaj fontoj*, sed havantaj sendependan elspezotakson kaj sendependajn konton kaj bilancon. Al tiu grupo apartenas, ekzemple, la ŝtataj poŝta, telefona, telegrafa kaj aliaj komunikadaj organizaĵoj, kiuj realigas siajn celojn plenumante laborojn kaj servojn por pago.

(4) *Kolĥozoj*, interkolĥozaj kaj aliaj kooperativaj organizaĵoj kaj iliaj unuiĝoj, kiel ankaŭ diversaj t.n. sociaj organizaĵoj kaj iliaj unuiĝoj, ekz. la Komunista Partio de Soveta Unio, diversaj sindikatoj, profesiaj organizaĵoj k.s. Por eviti miskomprenon necesas diri, ke libervolaj asociiĝoj de civitanoj por progresigi siajn ekonomiajn, profesiajn, kulturajn kaj aliajn interesojn en la spirito de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, ne ekzistas en Soveta Unio. Ĉiam temas nur pri organizaĵoj plene kontrolataj de la ŝtataj/partiaj instancoj, se entute tiaj instancoj donas la permeson organiziĝi. Al tiu kategorio apartenis ankaŭ Asocio de Sovetaj Esperantistoj (ASE), pri kies fondo kelkaj Esperanto-periodaĵoj multe bruis, sed pri kiu oni nenion plu aŭdas en la lastaj 2–3 jaroj.

4) Eble estus utile enkonduki neologismon „hozrasĉoto” por la tipe soveta *hozrasĉot* (*hozrastvennyj rasĉot*) simile al la jam delonge enkondukitaj *sovĥozo* kaj *kolĥozo*.

(5) *Ŝtataj-kolĥozaj* kaj aliaj *ŝtataj-kooperativaj organizaĵoj*, t.e. miksitaj organizaĵoj, en kiuj partoprenas la ŝtato kaj kolĥozo aŭ kooperativo. Tiaj, ekzemple, povas esti elektrostacio, konstruorganizaĵo, k.s.

3. Diferencoj kaj Sekvoj

Ekzistas pluraj gravaj diferencoj inter tiuj diversaj tipoj de juraj personoj. La plimulto el ili funkcias surbaze de propra ĉarto aŭ statuto konforma al la leĝo kaj aprobita de la kompetenta ŝtata aŭtoritato. Institucioj kaj aliaj ŝtataj organizaĵoj ricevantaj siajn financajn rimedojn el la ŝtata buĝeto, kiel ankaŭ aliaj organizaĵoj antaŭviditaj en la tutuniaj aŭ respublikaj leĝoj, povas funkcii surbaze de ĝeneralaj preskriboj rilatantaj al difinita tipo de jura persono. Ĉiuj juraj personoj havas civilan agokapablon en la limoj de siaj laŭleĝaj aŭ/kaj laŭstatutaj celoj. Transpaso de tiuj celoj nuligas la transakcion. Ili akiras rajtojn kaj sin obligacias en civiljuraj transakcioj pere de siaj organoj, kies rajtoj kaj devoj estas difinitaj en la leĝo kaj/aŭ statuto. Jura persono respondecas pri siaj obligacioj per havaĵo, kiun ĝi proprietas, aŭ, en kazo de ŝtataj entreprenoj kaj aliaj ŝtataj organizaĵoj, per la havaĵo donita al ĝi por operacia manaĝado (en ambaŭ kazoj nur havaĵo, kiu laŭleĝe estas ekzekuciebla). Gravega – ankaŭ el vidpunkto de internaciaj transakcioj de sovetiaj ŝtataj entreprenoj – estas la preskribo, ke la ŝtato ne respondecas pri la ŝuldoj de la ŝtataj entreprenoj kaj de aliaj ŝtataj organizaĵoj, kaj ke tiuj organizaĵoj ne respondecas pri la ŝuldoj de la ŝtato. Tio ne rilatas al institucioj kaj aliaj ŝtataj organizaĵoj financataj el la ŝtata buĝeto, kies ŝuldojn pagas la ŝtato laŭ speciala proceduro, se la ŝuldoj ne povas esti pagitaj el iliaj kreditoj bazitaj sur la elspezotaksoj.

Alia grava demando lige kun la karaktero de diversaj tipoj de la sovetiaj juraj personoj, estas tiu de imuneco antaŭ alilandaj jurisdikcioj. Ne povas esti dubo, ke laŭ internacia juro ĉiuj sovetiaj institucioj kaj aliaj organizaĵoj financataj el la ŝtata buĝeto estas, jure, parto de la sovetia ŝtato kaj tial ili kaj ilia havaĵo ĝuas imunecon en alilandaj jurisdikcioj. USSR postulis la saman imunecon ankaŭ por siaj ŝtataj entreprenj engaĝitaj en komercaj aktivadoj, ekzemple ŝipkompanioj. Tiu postulo, al kiu pli frue cedadis pluraj ŝtatoj, inkluzive Britio, estas malprava. En la lastaj du jardekoj la aŭtoro de tiuj ĉi linioj sukcese argumentis kiel jura konsultisto en pluraj konkretaj disputoj antaŭ arbitraciaj tribunaloj, ke pro sia jura sendependeco (distinga de la politika-administra dependeco) en civilaj transakcioj, kiel ankaŭ pro la fakto, ke USSR ne respondecas pri iliaj ŝuldoj, la sovetiaj ŝtataj entreprenoj kaj iliaj havaĵoj troviĝantaj en eksterlando ne povas ĝui imunecon antaŭ kiu ajn eksterversvetia jurisdikcio.

4. Materia kaj Kriminala Respondecoj

La sovetiaj juraj personoj kiel tiaj ne povas perpetri krimon. Tial ne ekzistas kriminala respondeco. Pri la krimoj perpetritaj de iliaj funkciuloj kriminale respondecas la perpetrintoj.

La civila respondeco de juraj personoj – same kiel la civila respondeco ĝenerale – estas principe reguligita en la Bazaj Principoj kaj pli detale en la CK-oj de la uniaj respublikoj. La civila respondeco ekestas pro neplenumo aŭ neadekvata plenumo de kontrakto, aŭ pro eksterkontrakte kaŭzita damaĝo. En la unua kazo la principo estas, ke la debitoro devas kompensi ne nur la efektivan damaĝon, sed ankaŭ la profiton, kiun la kreditoro estus havinta, se la debitoro estus plenuminta sian obligacion. La leĝo antaŭvidas ankaŭ la eblecon de kontraktitaj rondaj monpunoj por kovri la tutan damaĝon, aŭ parton de ĝi, en diversaj juraj cirkonstancoj.

Ankaŭ en la dua kazo la baza principo estas, ke la damaĝo devas esti plene kompensita, krom se la kaŭzinto de la damaĝo pravas, ke ĝi estis kaŭzita sen lia kulpo (dolo aŭ neglekto). Do, ne la domaĝinto devas pruvi la kulpon de la domaĝinto, sed la domaĝinto devas pruvi sian senkulpecon. Organizaĵoj (kaj unuopuloj), kies aktivadoj estas ligitaj al uzado de „fontoj de pli granda danĝero” (industriaj entreprenoj, transportaj kaj konstruaj organizaĵoj, uzantoj de motorveturiloj, k.s.) civile respondecas pri ĉiu ajn damaĝo kaŭzita de iu el tiuj „fontoj de pli granda danĝero” (senkulpa aŭ objektiva repondeco), krom se ili pravas, ke la damaĝo okazis rezulte de nekontrollebla forto (*vis major*) aŭ ke ĝi estis dole kaŭzita de la viktimo.

5. Jura Personeco de Alilandaj kaj Internaciaj Organizaĵoj

Alilanda organizaĵo havanta juran personecon laŭ la juro de sia ŝtato, ĝuas juran personecon en Soveta Unio lige kun transakcioj en la sfero de eksterlanda komerco kun sovetiaj asocioj kaj organizaĵoj por eksterlanda komerco.

Interŝtataj ĝeneralaj organizaĵoj (UN, Unesko, k.a.) kun karaktero de subjektoj (personoj) de internacia juro, ĝuas juran personecon kaj imunecon ankaŭ en USSR en la limoj de siaj celoj kaj aktivadoj.

La sovetia juro ne entenas eksplikitajn regulojn pri la jura personeco de privataj internaciaj organizaĵoj, tre multnombraj en la sferoj de scienco, profesioj, edukado, homaj rajtoj, kulturo ĝenerale. Tamen, ŝajnas eksterdube, ke la internaciaj sovetiaj frontorganizaĵoj, t.e. organizaĵoj plene kontrolataj de Moskvo, havas aŭ povas havigi al si juran personecon en USSR kun la permeso de la respektiva administracia-politika aŭtoritato.

6. Konkluda Pritakso

En la supra teksto estas koncize prezentitaj nur la plej karakterizaj trajtoj de juraj personoj en Soveta Unio. Tre similan, preskaŭ identan, karakteron havas la juraj personoj en la landoj apartenantaj al la Konsilio de Ekonomia Reciproka Asistado (KERA). Ĉie en la mondo la juraj personoj ludas kreskante gravan rolon en la publika vivo, sed nenie ili estas tiel esence necesaj, kiel en la landoj kun ŝtate planita ekonomio, precipe en USSR mem. La funkciado aŭ misfunkciado de la tuta sovetia ekonomio dependas de la bona aŭ malbona funkciado de la sovetiaj juraj personoj, unuavice de tiuj en la kategorio de entreprenoj. Sen tiu amasego da juraj personoj kaj milionoj da civiljuraj kontraktoj inter ili, USSR kaj la landoj kun praktike identaj strukturoj ne estas imageblaj.

ETAPOJ EN LA FORMIĜO DE UN

En tiu ĉi jaro la monda organizaĵo de ŝtatoj fariĝis 40-jara. En mia libro *Aktualaj Problemoj de la Nuntempa Internacia Vivo*, verkita originale en Esperanto kaj publikigita en 1952, du ĉapitroj pritraktas la formiĝadon, fondon kaj ekfunkciigon de UN. La Ĉarto de UN en Esperanto-traduko estis unue publikigita de UEA sub aŭspicio de nia Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj en 1970. En 1979 la Oficejo de Publika Informado de Unuiĝintaj Nacioj en Novjorko publikigis alian eldonon, enhavantan ankaŭ la amendon de 1973.

Por memori la datrevenon sube estas koncize prezentitaj la ĉefaj etapoj en la formiĝado de UN, ĉiu el ili markita de grava dokumento kun internacijura karaktero. La informoj estas ĉerpitaj el la menciita verko *Aktualaj Problemoj**.

1. **Atlantika Ĉarto.** – Ĝin proklamis Roosevelt, la tiama Prezidento de Usono kaj Churchill, la tiama ĉefministro de Britio, la 14an de aŭgusto 1941. Poste aliĝis al ĝi, unu post la alia, ankaŭ la ceteraj membroj de la kontraŭhitlera koalicio. Soveta Unio deklaris sian aprobon de la Ĉarto en septembro 1941. En tiu dokumento Usono kaj Britio deklaris, ke ili ne celas teritoriajn pligrandigojn, sed ke ili ankaŭ ne akceptos kiun ajn teritorian ŝanĝon, kiu ne estas farita kun la aprobo de la interesitaj popoloj. Laŭ la Ĉarto, ĉiu popolo „havas la rajton elekti la formon de regado, en kiu ĝi deziras vivi”.

La aliaj principoj estis: ekonomia kunlaborado de ĉiuj nacioj kun la celo atingi ekonomian progreson kaj socian sekurecon; partopreno de ĉiuj ŝtatoj en la mondkomerco kaj en la utiligo de la fontoj de krudmaterialoj; libera navigado; restarigo de tia paco, kiu al la nacioj certigos sufiĉajn rimedojn por trankvila vivo; senarmigo de la agresaj nacioj kun la celo konservi la pacon.

2. **Deklaracio de Unuiĝintaj Nacioj.** – La 1-an de januaro 1942 la reprezentantoj de 26 ŝtatoj subskribis en Washington plian gravan dokumenton, konatan sub la nomo „Deklaracio de Unuiĝintaj Nacioj”. En ĝi ili deklaris, ke la plena venko super la malamiko estas nepre necesa por protekto de la vivo, libereco, sendependeco, homaj rajtoj kaj justeco. La 26 nacioj interkonsentis pri kunlaborado

* *Aktualaj Problemoj de la Nuntempa Internacia Vivo* estas mendebla ĉe la Libroservo de „Perspektivo”, Nørregaardsvej 91, DK-2610 Rødovre, Danlando, pĉk. 9 32 95 95 (prezo 70 danaj kronoj); ĉe la Libroservo de UEA kaj ĉe aliaj bonaj libroservoj.

kaj pri reciproka helpo „en la komuna batalo kontraŭ la sovaĝajn kaj bestajn potencojn, kiuj celas sklavigi la tutan mondon”. Ĉiu el la subskribintaj ŝtatoj sin devontigis ne konkludi apartan armisticon aŭ pacon kun kiu ajn el la malamikaj ŝtatoj.

La ŝtatoj, kiuj subskribis tiun Deklaracion aŭ kiuj poste aliĝis al ĝi, estis kutime nomataj „Unuiĝintaj Nacioj”. Sub tiu nomo ili estis ofte menciataj en diversaj internacijuraj dokumentoj, ekzemple en la Britia-Sovetia Traktato pri Alianco. Tiele la nomo hejmiĝis en la internacia kaj interŝtata praktiko.

3. Deklaracio pri Ĝenerala Sekureco. – Por la formiĝo de UN apartan gravecon havis la Moskva Konferenco, okazinta de la 9-a ĝis la 30-a de oktobro 1943. Ĝin partoprenis la ministroj pri eksterlandaj aferoj de USSR, Usono kaj Britio. Interalie, la tri ŝtatoj akceptis la Deklaracion pri Ĝenerala Sekureco. En la Deklaracio por la unua fojo oni klare parolis pri la fundamento, sur kiu devus baziĝi la estonta internacia organizaĵo por konservo de internacia paco: suverena egaleco de ĉiuj pacamaj ŝtatoj.

4. Dumbarton Oaks kaj Jalta. – La favora evoluo de la milita situacio sur ĉiuj frontoj kaj la principa interkonsento pri la neceso fondi novan internacian organizaĵon ebligis la kunvokon de aparta konferenco por ellabori projekton de statuto por tia organizaĵo. La konferenco okazis en Dumbarton Oaks, proksime de Washington, en aŭgusto kaj septembro 1944. Ĝi ne estis konferenco de politikistoj, sed de fakuloj, kies tasko estis ellabori projekton de statuto de la planita organizaĵo. La projekto, publikigita tuj post la finiĝo de la konferenco, baziĝis sur la principo de kolektiva sekureco. Tio signifas, ke paco estas nedividebla kaj ke, sekve, rompo de la paco en kiu ajn parto de la mondo interesas ĉiujn ŝtatojn, kiuj tial devas entrepreni komunajn paŝojn por konservi aŭ restarigi ĝin. La aliaj bazaj principoj estis: suverena egaleco de ĉiuj pacamaj ŝtatoj, rezigno pri perforto en internaciaj rilatoj, respekto de internacia juro. La projekto entenis regulojn pri membreco, pri la organoj de la estonta organizaĵo, pri iliaj funkcioj, rajtoj kaj devoj. Unu tuta ĉapitro pritraktis la metodojn kaj rimedojn por konservi internaciajn pacon kaj sekurecon.

Pri unu punkto ne estis eble atingi interkonsenton en Dumbarton Oaks: la voĉdonado en la estonta Konsilio de Sekureco. Tiu problemo estis solvita nur poste, en februaro 1945, dum la konferenco en Jalta (Krimeo). Tie Roosevelt, Churchill kaj Stalin interkonsentis, ke ĉiuj decidoj de la Konsilio de Sekureco devos esti faritaj kun la aprobo de kvin konstantaj membroj de tiu organo, nome Britio, Ĉinio, Francio, Soveta Unio kaj Usono.

5. Konferenco de San Francisko kaj Subskribo de la Ĉarto. – Post la solvo de la problemo pri la proceduro kaj voĉdonado en la Konsilio de Sekureco maturiĝis la cirkonstancoj por kunvoki grandan konferencon de ĉiuj Unuiĝintaj Nacioj. Ĝi okazis en la lastaj tagoj de la milito, inter la 26-a de aprilo kaj la 26-a de junio 1945 en San Francisko. Entute ĉeestis 282 delegitoj kaj 1444 fakuloj kaj konsilantoj. Dum du monatoj okazis 335 kunsidoj de la pleno, apartaj komisionoj kaj komitatoj.

La Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj, solene subskribita la 26-an de junio 1945 en San Francisko, havas 19 ĉapitrojn kun entute 111 artikoloj. Al la Ĉarto estas aldonita la Statuto de la Internacia Kortumo, kiu havas pliajn kvin ĉapitrojn kun 70 artikoloj.

La Ĉarto devis esti ratifita de minimume 29 membroj-fondintoj, t.e. la 50 ŝtatoj, kiuj estis reprezentitaj en San Francisko plus Pollando, kiu ne povis partopreni la laborojn de San Francisko, sed por kiu estis lasita libera loko sur la Ĉarto, tiel ke ĝi povis poste subskribi la dokumenton. Por ke la Ĉarto jure ekvalidu, necesis ke inter la 29 minimume necesaj ratifoj troviĝu la ratifoj de la kvin grandaj potencoj. Ĝis la 5-a de oktobro 1945 la Ĉarton ratifis 30 ŝtatoj. La 24-n de oktobro 1945 la ŝtatestretario (ministro pri eksterlandaj aferoj) de Usono subskribis solenan Protokolon pri la ekvalido de la Ĉarto.

6. UN ekfunkciis. – Intertempe la milito finiĝis. La Preparkomisiono kaj Plenumkomitato, elektitaj de la Konferenco por pretigi la unuan sesion de la Ĝenerala Asembleo, finis siajn laborojn. Ankaŭ la aliaj membroj fondintoj ratifis unu post la alia la Ĉarton. Ne plu estis obstakloj, ke la Organizaĵo ekfunkciu. Efektive, estis kunvokita la Ĝenerala Asembleo al sia unua sesio. Ĝi komenciĝis la 10-an de januaro 1946 je la 4-a horo posttagmeze en la Centra Halo de la Westminster-Palaco en Londono, en la ĉeesto de la reprezentantoj de 51 Unuiĝintaj Nacioj**.

La okuloj de la mondo estis direktitaj tien. La koroj de milionoj pleniĝis per nova espero. La lukto por paco kaj sekureco en libereco komenciĝis. Bedaŭrinde, kvardek jarojn post la fondiĝo de UN la esperoj grandparte plu restas nur esperoj, sed tio eliras la kadrojn de tiu ĉi resuma historia trarigardo.

** Nuntempe UN konsistas el 159 ŝtatoj-membroj.

LA MORTPUNO EN SOVETA UNIO

Intervjuo de BBC Monda Servo kun Prof. D-ro Ivo Lapenna

La Monda Servo de la Brita Radio (*BBC World Service*) entreprenis vastan enketon ĝenerale pri la mortpuno kaj aparte pri ĝia aplikado en la landoj, kiuj ankoraŭ ne abolis ĝin. La enketistino, S-ino Zina Rohan (ZR), intervjuis nombron da profesoroj pri kriminologio kaj specialistojn pri kriminala juro de diversaj ŝtatoj. La 21-an de novembro 1986 ZR intervjuis Prof. D-ron Ivo Lapenna, profesoron pri kompara soveta kaj orienteŭropa juro en la Universitato de Londono. Jen la demandoj de ZR en Esperanto-traduko kaj la respondoj de Prof. Lapenna (IL) en Esperanto-traduko, ampleksigitaj por la legantoj de *Internacia Jura Revuo*:

ZR: Kiel oni pravigas, Profesoro Lapenna, la mortpunon en Soveta Unio?

IL: Oni nek pravigas, nek malpravigas. Oni tutsimple akceptas ĝin kiel necesan rimedon por kontraŭbatali iujn specojn de krimo laŭ soveta kriminala juro. Evidente, oni kredas, ke la mortpuno estas ne nur reprezalio, nome repago pro la perpetrita krima ago, sed ankaŭ efika metodo por malinstigi perpetradon de tiaspecaj krimoj fare de aliaj. Necesas tamen diri, ke kaj la leĝo kaj la doktrino rigardas la mortpunon kiel certagrade hontige kontraŭan al socio, kiun ekde la Oktobra Revolucio en 1917 oni ne ĉesas deklari „socialisma” en la marksisma senco de la vorto. Kompreneble, ekzistas granda kontraŭdiro inter la marksisma konceptado de krimo kaj la mortpuno. La ĝeno vidiĝas el la fakto, ke la mortpuno estas antaŭvidita en tute aparta artikolo de la leĝo, disde la ceteraj punoj (senigo de libereco, relegacio, rilego, monpuno, konfisko de proprieto, k.a.), kiuj estas antaŭviditaj en alia artikolo. Tion eĉ pli evidentigas la maniero, laŭ kiu estas formulita „la permeso” apliko la mortpunon: Art. 22 de la Fundamentaj Principoj (*Osnovy*) de la Kriminaljura Leĝaro de USSR kaj la Uniaj Respublikoj deklaras, ke „la mortpuno estas escepta punrimedo ĝis ĝia kompleta abolo”, kaj ke ĝia apliko „estas permesita” nur por la plej gravaj krimoj. La samon ripetas la 15 krimnalaj kodoj de la 15 Uniaj Respublikoj.

ZR: Ĉu iam en la historio de Soveta Unio la mortpuno estis abolita?

IL: Jes, plurfoje. Tuj post la Oktobra Revolucio, jam la 26-an de oktobro 1917 la mortpuno estis abolita, sed en 1918, nur kelkajn monatojn post la abolo, ĝi estis reenkondukita por „la plej seriozaj kontraŭrevoluciaj krimoj”. En 1920 ĝi estis denove abolita, sed tre baldaŭ reenkondukita por kontraŭbatali „la eksterlandan intervenadon en la sovetaĵn hejmajn aferojn”. Sub la regado de Stalin multaj centmiloj

da civitanoj, inter kiuj ankaŭ amaso da membroj de la Komunista Partio, eĉ granda parto de la membroj de ĝia Centra Komitato, estis kondamnitaj en monstraj procesoj al mortpuno kaj ekzekutitaj. Aliaj centmiloj estis ekzekutitaj sen kia ajn proceso, dum pluraj milionoj pereis en gulagoj (punkcentrejoj). Laŭ la plej modestaj taksoj eĉ 25 milionoj estis ekzekutitaj aŭ alimaniere pereigitaj dum la t.n. „granda purigo” de Stalin. Post la Dua Mondmilito la mortpuno en tempo de paco estis plian fojon abolita, ĉi-foje per Ukazo de la Prezidio de la Supera Soveto de USSR de la 26-a de majo 1947 „je la peto de sindikatoj, junularaj kaj aliaj amasaj organizaĵoj”, sed jam en januaro 1950 ĝi estis reenkondukita „je la peto” de la samaj „sindikatoj, junularaj kaj aliaj amasaj organizaĵoj”, kvankam, fakte, tiuj organizaĵoj petis nek abolon, nek reenkondukon.

ZR: Por kiuj krimoj estas preskribita la mortpuno?

IL: La menciita Ukazo de la 26-a de majo 1947 preskribis mortpunon nur por perfido de patrolando, spionado kaj sabotado, sed en 1954 la mortpuno estis preskribita ankaŭ por murdo sub pligravigaj cirkonstancoj. Poste per diversaj leĝdonaj aktoj la apliko de la mortpuno estis vastigita al tuta aro da aliaj krimoj, tiel ke nuntempe la mortpuno estas preskribita („permesita”) por dudeko da krimoj en tempo de paco. Inter ili troviĝas perfido de la patrolando, fuĝo eksterlanden aŭ rifuzo reveni el eksterlando, spionado, terorismaj agoj, sabotado, banditismo, murdo sub pligravigaj cirkonstancoj, monfalsado, spekulado per valutoj aŭ valoraĵoj grandskale aŭ en formo de negoco, ŝtelado aŭ defraŭdado de ŝtata proprieto grandskale, seksperforto de infano aŭ fare de recidivulo, k.a. En tempo de milito aŭ de militsimila situacio la mortpuno estas preskribita ankaŭ por nombro da aliaj agoj difinitaj kiel krimoj, ekz. evito mobiliziĝi, nesubiĝo al ordonoj de superulo, dizerto k.a. Ŝajnas al mi, ke por via enketo gravas ne nur la demando, ĉu en iu lando ekzistis mortpuno, sed ankaŭ – eĉ pli grave – kiuj agoj estas difinitaj kiel krimoj puneblaj per mortpuno. En Soveta Unio, kiel mi diris, eĉ fuĝo eksterlanden aŭ rifuzo reveni el eksterlando estas tiaspeca krimo en difinitaj cirkonstancoj. Same grava estas la demando ĝis kiu grado la kortumoj aplikas la mortpunon anstataŭ la alternativan maksimuman senigon de libereco. Ankaŭ en Soveta Unio la kriminalaj kodoj preskribas alternative la punojn de „15-jara senigo de libereco kun aŭ sen aldona relegacio (interna ekzilo) ĝis 5 jaroj, aŭ mortpuno”. Kvankam en multaj kazoj la kortumoj kondamnas al 15 jaroj da senigo de libereco kun aldonaj 5 jaroj da relegacio, tamen en tro multaj kazoj la kortumoj aplikas la mortpunon.

ZR: Dankon pro la atentigo pri la graveco de la du demandoj. Ĉu estas konata la nombro de mortkondamnoj kaj ekzekutoj en Soveta Unio?

IL: De tempo al tempo la sovetia gazetaro informas pri tiu aŭ alia krimulo, kiu grandskale priŝtelis aŭ defraŭdis ŝtatan proprieton, aŭ alia tiaspeca krimulo, kiu estis kondamnita al mortpuno kaj ekzekutita. Tiuj informoj estas nuntempe pli oftaj, ol antaŭe, kaj tio siavice ŝuldiĝas al nuna kampanjo de M. Gorbaĉov kontraŭ korupton, spekuladon, priŝteladon de ŝtata proprieto kaj similaj krimoj. Tamen, statistikoj ne estas publikigataj. Tio plu restas ŝtata sekreto. Laŭ Ilja Zeldes, antaŭe kunlaboranto en la Instituto pri Jurmedicino de la Ministerio pri Justico en Moskvo, nun vivanta

en Usono, la nombro de ekzekutoj estas ĉ. 1.700 jare. Tion li asertis en sia verko „*The Problem of Crime in the USSR*” (La Problemo de Krime en USSR), publikigita en Usono en 1981. Verŝajne lia aserto estas ĝusta, ĉar li laboris en institucio, en kiu devus troviĝi precizaj informoj pri tio.

ZR: Ĉu alkoholismo estas unu el la kaŭzoj de krimoj kontraŭ personon?

IL: Alkoholismo estas unu el grandaj plagoj en la sovetia socio. Ĝi kaŭzas grandegajn damaĝon al la ekonomio, al la rilatoj en la familio, inter najbaroj, fakte ĉie. Ĝi estas ankaŭ unu el la kaŭzoj de violentaj krimoj, ofte en plej kruelaj formoj, kontraŭ personon: murdo, gravaj korpaj lezoj, seksperforto, malica huliganismo, k.a. Por kelkaj el tiuj krimoj estas preskribita la mortpuno. Necesas atentigi, ke laŭ sovetia kriminala juro eĉ stato de kompleta ebrieco, pro kiu la perpetrulo ne kapablas kompreni la signifon de siaj agoj aŭ kontroli ilin, ne malaltigas la kriminaljuran respondecon. Kiel konate, Gorbaĉov lanĉis antaŭ nelonge vastan kampanjon ankaŭ kontraŭ alkoholismon sur ĉiuj sociaj niveloj. Similan kampanjon siatempe lanĉis ankaŭ Nikita Ĥruŝĉov, sen granda sukceso. Ĉu Gorbaĉov estos pli sukcesa, montros la proksima estonteco. Mi dubas, ĉar alkoholismon en tre granda procento kaŭzas malespero pro la ege malfacilaj vivkondiĉoj, ekzemple tro ŝtopitaj loĝlokoj, tial ankaŭ foresto de privateco, kvereloj kun la kunloĝantoj, personaj internaj tensioj kaj multaj aliaj. Ebriiĝado ofte estas nenio alia ol fuĝo el neeltenebla ĉiutaga malfeliĉo. Tial, laŭ mia opinio, alkoholismo ne povas esti elradikigita malgraŭ la nuna kampanjo kaj la bonaj intencoj malantaŭ ĝi, se oni samtempe ne altigas tre konsiderinde la ĝeneralan vivnivelon de la loĝantaro. Ataki oni devas ne nur la malbonon, sed ankaŭ kaj unuavice ĝiajn kaŭzojn.

ZR: Unu el la motivoj, pro kiuj multaj kontraŭas la mortpunon, estas la neripareblo en okazo de justiceraro. Ĉu en Soveta Unio la eblecoj de justiceraroj estas grandaj?

IL: Mi mem estis ekde miaj studentaj jaroj kaj plu restas kontraŭulo de la mortpuno interalie ankaŭ pro la neripareblo en okazo de justiceraro, kvankam en la lastaj jaroj mi iom ŝanceliĝas, se temas pri terorismaj agoj, kies viktimoj estas komplete senkulpaj personoj, eĉ centoj da senkulpaj personoj, kaj se la perpetrintoj estas establitaj kun absoluta certeco. Ankaŭ en Soveta Unio, aldone al misuzo de justico en kazoj de politikaj „krimoj”, kiel Ĥruŝĉov mem rekonis en sia „sekreta” parolado al la 20-a Partia Kongreso en 1956, ofte okazas ankaŭ justiceraroj en kazoj de ordinara krimoj. Tion faciligas pluraj reguloj de la kriminala proceduro. Jen la plej gravaj el ili:

En la antaŭprocesa esplorstadio la esplororganoj ne estas kontrolataj de esplorjuĝisto, sed subigitaj al prokuroro, kiu poste, dum la proceso, reprezentas la ŝtatan akuzon. Tiamaniere la tuta esplorproceduro kaj la akuzo troviĝas en la manoj de la sama organo. Kun la escepto de neplenaĝuloj kaj de fizike aŭ mense difektitaj personoj, la suspektitoj kaj ŝarĝitoj ne havas la rajton esti reprezentitaj de advokato aŭ de alia laŭleĝa defendanto, sed nur povas ricevi la permeson havi tian reprezentanton dum la esplorperiodo ekde la momento, kiam la koncerna persono estas formale ŝarĝita pri perpedita krimo. Tiu permeso estas tute arbitra kaj

dependas plene de la starpunkto de la esploristo, kiu preskaŭ ĉiam estas negativa. Nur post la finiĝo de la esplorproceduro la ŝarĝito rajtas havi advokaton, paroli kun li konfidence kaj ekzameni la materialojn de la kazo. En tiaj kondiĉoj facile okazas malĝustaj „konfesoj” sub premo de la policaĵ aŭ prokuroraj esploristoj. Mi mem vidis tian kazon en moskva kortumo – la akuzito retiris sian konfeson pri ŝtelo, faritan post plurmonata ĉiutaga premo de la esploristo, kaj firme neis la ŝtelon dum la publika proceso; kvankam tiu „konfeso” estis la sola „pruvo”, tamen ŝi estis kondamnita al trijara senigo de libereco.

Plue, eĉ en kazoj de krimoj, por kiuj la mortpuno estas preskribita kiel alternativa puno, la juĝistaro ĉiam konsistas el unu profesia juĝisto (kiu eĉ nuntempe povas ne esti kvalifikita juristo) kaj el du popolaj asesoroj, do jure tre malforta. Kontraŭ la decidon de tiu unuinstanca kortumo estas eble apelacii al pli alta kortumo, kiu en gravaj kazoj ĉiam estas la Supera Kortumo de la koncerna Unia Respubliko. La juĝistaro de la apelacia kortumo konsistas el tri profesiaj juĝistoj, kutime kun juraj kvalifikoj. Ne ekzistas ebleco apelacii kontraŭ la juĝon de la apelacia kortumo, ĉar la sovetia kriminala proceduro, diference de tiu en multaj aliaj landoj, ne konas la revizian apelacion (en la plej gravaj kazoj) al tria instanco, kutime la supera kortumo de la ŝtato. Eĉ pli, en Soveta Unio ĉiu pli alta kortumo povas preni kiun ajn kazon de kiu ajn malpli alta, kaj juĝi ĝin kiel kortumo de unua instanco, en kiu okazo la juĝistaro eĉ de la Supera Kortumo de USSR konsistas el unu profesia juĝisto kaj du popolaj asesoroj. Ĉar kontraŭ la decidojn de la Superaj Kortumoj de la Uniaj Respublikoj kaj, kompreneble, kontraŭ la decidojn de la Supera Kortumo de USSR ne ekzistas ebleco apelacii, en okazo de mortpuno forestas eĉ tiu plej elementa rajto de la kondamnito, nome apelacii almenaŭ al kortumo de dua instanco, por ne paroli pri revizia apelacio al tria instanco.

La koncizege prezentitaj proceduraj reguloj ne donas eĉ la minimumajn garantiojn de leĝeco kaj necese kaŭzas amason da justiceraroj rilate kulpon kaj punon, inkluzive de mortpuno, sed ankaŭ pri tio oni nenion aŭ preskaŭ nenion aŭdas en Soveta Unio.

ZR: Profesoro Lapenna, koran dankon pro viaj tre valoraj eksplikoj.

SOVETIA KONCEPTO DE PACA KUNEKZISTADO *

1. Enkonduko

La 29-an de aprilo 1954 Ĉinio kaj Hindio subskribis la Traktaton pri Tibeto, kiu enhavis jenajn kvin principojn: (1) reciproka respekto al teritoria integreco kaj suvereneco, (2) reciproka neagreso, (3) reciproka neinterveno en internajn aferojn, (4) egaleco kaj reciprokaj avantaĝoj, (5) paca kunekzistado. Tiutempe la traktato estis apenaŭ notita kiel io kreanta novan doktrinon en la sfero de monda politiko kaj, eĉ malpli, kiel io enkondukanta novan principon de internacia juro, sed tre baldaŭ, spite al la posta evoluo, kiu kondukis al la armita agreso de Ĉinio kontraŭ Hindion, la kvin principoj fariĝis konataj en la tuta mondo kiel „la principoj de paca kunekzistado” aŭ „Panĉ Sila”. Tamen, tiu populareco kaj la polemikoj elvokitaj de la termino „paca kunekzistado”, ŝuldiĝas multe pli al N. S. Ĥruŝĉov kaj al la postaj sovetiaj gvidantoj, ol al la enhavo de la Ĉinia-Hindia Traktato de 1954.

En 1956, dum la Dudeka Kongreso de la Komunista Partio, Ĥruŝĉov fakte faris la unuan grandan amendon de la leninisma doktrino koncerne la demandon pri neeviteblo de milito inter la „diametre kontraŭstarantaj sistemoj”. Li emfazis „la historian gravecon de la kvin principoj” kaj demandis: „Kial ne fari ilin fundamento de pacaj rilatoj inter ĉiuj ŝtatoj en kiu ajn parto de la mondo?”. Kompreneble, la ideoj de Ĥruŝĉov eniris en la Kongresan Rezolucion, kiu emfazas, ke „la ĝenerala linio de la eksterlanda politiko de Soveta Unio estis kaj restas la leninisma principo de paca kunekzistado de ŝtatoj kun malsamaj sociaj organizoj”¹, kvankam Lenin opiniis, kiel montrite sube, ke daŭra kunekzistado estas malebla.

Estas utile menciĝi, ke la termino „paca kunekzistado” estis trovebla ankaŭ pli frue en la sovetia politika literaturo kaj en verkoj pri internacia juro, ĉefe en ligo kun la formulo „lukto kaj kunlaborado” kiel esenca elemento en la difino pri internacia juro donita siatempe de A. J. Vyŝinskij, la laŭtparolilo de Stalin sur la jura kampo. Tamen, nur la sankciigo de „paca kunekzistado” fare de la Dudeka Partia Kongreso kiel gvidprincipo de la sovetia eksterlanda politiko, kun enhavo konforma al la interesoj de USSR, donis al tiu principo la aktualan gravecon.

* Artikolo bazita sur lekcio, kiun Prof. D-ro Ivo Lapenna (Universitato de Londono) faris al la 12-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado, okazinta en Ateno (Greko) de la 26-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 1986.

1. *XX S^ojezd Kommunističeskoy partii Sovetskogo Sojuza* (Dudeka Kongreso de la Komunsita Partio de Soveta Unio), Moskvo, 1956, vol. II, p. 413.

Ekde tiu sankciigo, konfirmita eĉ en la Konstitucio de USSR (Art. 28) kaj rekonfirmita denove en la Raporto de M. Gorbaĉov al la 27-a Partia Kongreso la 25-an de februaro 1986 kaj en la nova Partia Programo, okazis vera inundo de libroj, artikoloj, paroladoj, raportoj, intervjuoj ktp., en kiuj la „paca kunekzistado” estis pritraktita aŭ menciita en diversaj kunteksto. Ĥruŝĉov mem revenis al la temo ne nur dum la Dudekunua kaj Dudekdua Partiaj Kongresoj en januaro 1959 kaj oktobro 1961, sed preskaŭ en ĉiu sia parolado, artikolo aŭ gazetara konferenco, ĉiam insistante, ke „la tezo pri paca kunekzistado de la du sistemoj estis unue formulita de nia granda instruisto V. I. Lenin”², aŭ ke „la sovetia ŝtato, ekde la tute unuaj tagoj post sia naskiĝo proklamis la pacan kunekzistadon kiel bazan principon de sia eksterlanda politiko”³, aŭ simile en sennombraj aliaj okazoj. Kaj nun M. Gorbaĉov eĥas: „Por ni la paca kunekzistado estas politika linio, kiun USSR intencas daŭrigi sen devojigiĝoj”⁴.

La nombro de internaciaj traktatoj, deklaroj kaj aliaj dokumentoj kun mencio de „paca kunekzistado”, estas hodiaŭ tiel granda, ke pluraj paĝoj nesufiĉus por listigi ilin. Jam en la periodo antaŭ 1961, laŭ unu el la aŭtoroj, ekzistis kvar internaciaj traktatoj, kvardek duflankaj aŭ plurflankaj deklaroj kaj tridek unuflankaj deklaroj, en kiuj estis menciita la principo de paca kunekzistado. Mia persona katalogo entenas pli ol 400 titolojn de libroj, studoj kaj artikoloj pri paca kunekzistado. Efektive, la termino „paca kunekzistado” fariĝis unu el la plej uzataj aŭ misuzataj esprimoj en monda politiko kaj temo de diskuto, ofte tre akra, sur la kampo de la teorio de internacia publika juro⁵. Ĥruŝĉov foje eĉ asertis, ke homoj en la Okcidento lernis diri „kunekzistado” ne nur en siaj propraj lingvoj, sed ankaŭ en la rusa – kvankam mi iom dubas pri la prononcado de *sosušĉestvovanije* fare de iu, kiu ne scias tiun lingvon – tiel klare pretendante monopolon je la koncepto „kunekzistado”, kvazaŭ ĝi estus sovetia invento, kvazaŭ ŝtatoj neniam antaŭe estus kunekzistintaj, kvazaŭ ĝi neniam antaŭe estus uzita en internaciaj rilatoj, diplomatio kaj juraj aktoj.

Fakte, ŝtatoj kun tre malsamaj sociaj kaj politikaj strukturoj kunekzistis ekde kiam ili estiĝis. La tuta internacia juro estas bazita ĝuste sur la kunekzistado de diversaj subjektoj. En la fama *Lotus* kazo la tiama Konstanta Kortumo de Internacia Justico en Hago nur ripetis bone konatan fakton, kiam ĝi asertis, ke „internacia juro regas la rilatojn inter sendependaj ŝtatoj”. Aliflanke, pli ol kvarcent jarojn antaŭ Ĥruŝĉov, Francisko la Unua de Francio en sia Apologio adresita al Papo Paŭlo la Tria, en kiu li pravigadis la Pactraktaton kaj Aliancon kun Solimano la Granda nur dek kvin jarojn post kiam li partoprenis en planado de krucmilio kontraŭ la turkojn, parolis pri kunekzistado de kristanoj kaj muzulmanoj, kvankam li ne uzis la vorton mem, kiam li diris:

2. *Pravda* de la 12-a de decembro 1958.

3. *Pravda* de la 6-a de septembro 1959.

4. *Soviet News*, Londono, n-ro 6313 de la 28-a de februaro 1986.

5. Ankaŭ la aŭtoro de tiu ĉi artikolo kontribuis per multnombraj lekcioj, prelegoj, recenzoj kaj artikoloj, el kiuj estu menciitaj „The Legal Aspects and Political Significance of the Soviet Concept of Co-Existence” (Juraj Aspektoj kaj Politika Signifo de la Sovetia Koncepto de Kunekzistado), *The International and Comparative Law Quarterly*, Londono, n-ro de julio 1963, p-oj 737–777; kaj „The Soviet Concept of ‘Socialist’ International Law” (La Sovetia Koncepto de ‘Socialisma’ Internacia Juro), *The Year Book of World Affairs*, Londono, 1975, vol. 29, p-oj 242–264.

„La eraroj de la homoj kaj iliaj malperfektecoj malebligas al ili unuiĝi en la sama religio, sed la diverseco de la kultoj, same kiel tiu de la kutimoj, ne detruas la identecon de la homaro”.⁶

Ne estas, do, nova la fakto mem de kunekzistado. Nek troviĝas kio ajn nova en la uzo de tiu termino por priskribi la interŝtatajn rilatojn, aŭ por ekspliki la bazon de internacia juro. Kio fakte estas nova, estas la vasteco kaj uzmaniero de la termino „paca kunekzistado” en la nuntempa mondo, la sovetiaj pretendoj je ia ekskluziva eksterlanda politiko bazita kvazaŭe sur „paca kunekzistado” kiel kontraŭstaranta al „la imperialisma politiko de agreso”, la politika koloro kiu tial ligiĝis kun tiu esprimo kaj la kompreneblaj reagoj en la politikaj rondoj de la Okcidento. Tio, interalie, kaŭzis, ke post longaj debatoj en la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj (UN), precipe en ĝia Sesa Komitato, en la fruaj sesdekaj jaroj, fine la termino „paca kunekzistado” estis ŝanĝita al „amikaj rilatoj kaj kunlaborado inter ŝtatoj”.

Do, ne la vorto „kunekzistado” estas nova. Nova estas la konfuzo pri ĝia signifo.

En la ordinara senco de la vorto „kunekzisti” signifas „ekzisti kune aŭ kun, ekzisti en la sama tempo” kaj povas rilati al objektoj, personoj, ideoj. Aplikata al la internacia komunaĵo de ŝtatoj, kunekzistado indikas la fakton de simultana ekzistado de ŝtatoj kiel sendependaj politikaj entoj kaj subjektoj de internacia juro, kaj tio laŭdifine implicas la principan rekonon de ĝia paca karaktero, same kiel la kunekzisto de individuoj en socio regata de juro implicas la ideon, ke ili pace kunvivas unu apud la alia. Tio, tamen, bedaŭrinde ne ekskludas konfliktojn kaj malobservojn de juro fare de kaj ŝtatoj kaj individuoj.

Sed kio estas la senco de la sovetia koncepto de kunekzistado?

2. De Lenin ĝis Gorbaĉov

En la sovetia doktrino la koncepto de kunekzistado estas ligita al la demando pri la ebleco aŭ malebleco de kunlaborado inter la du „diametre kontraŭstarantaj” ekonomiaj, sociaj kaj politikaj sistemoj. Tio, siavice, estas determinita per nombro da rigidaj marksismaj tezoj, el kiuj la plej gravaj estas la klasa karaktero de ŝtato kaj juro, la interpretado de la tuta historio de la homaro ekde la „malintegriĝo de la senklasa scio” kiel historio de klasaj bataloj, la internacia solidareco de la laboristaj klasoj de diversaj ŝtatoj, la monda revolucio, kolapso de kapitalismo kaj neevitebla venko de socialismo, kio ekde Stalin egalas al la sovetia regad sistemo, aŭ tutsimple sovetiismo⁷. La sovetia koncepto de kunekzistado ricevas sian plenan signifon – kaj ankaŭ diversaj unuavide kontraŭdiraj deklaroj povas esti korekte komprenataj – nur se oni konsideras tiujn demandojn, kiel ankaŭ la internan kaj eksteran politikan situacion de Sovetio en diversaj etapoj de ĝia evoluo.

6. Citata laŭ Suzanne Bastid en la Antaŭparolo al la verko de la aŭtoro *Conceptions Soviétiques de Droit International Public* (Sovetiaj Konceptoj de Publika Internacia Juro), Ed. Pedone, Paris, 1954, p. 10.

7. Por la sovetia sistemo la aŭtoro de tiu ĉi artikolo jam delonge enkondukis en siaj fakaj-sciencaj verkoj la terminon „sovetiismo” por indiki ekonomian, socian, politikan kaj juran strukturon, kiu havas nenion komunan kun la originala marksismo, kaj por distingi ĝin disde diversaj socialismaj kaj komunismaj fluoj, movadoj kaj partioj.

Jam en februaro 1919, en artikolo publikigita en *Izvestija*, Stalin starigis la tezon pri „du tendaroj” kaj skribis, ke la mondo „estas nepacigeble dividita” tute konforme al la teorio pri la nepacigeblo de la klasa antagonismo kaj la neeviteblo de monda proleta revolucio. Ankaŭ Lenin opiniis, ke daŭra kunekestado estas malebla. En sia Raporto al la Centra Komitato de la 18-a de marto 1918 li plian fojon distingis inter „milito kaj milito” kaj emfazis, ke la bolŝevikoj kondamnas nur „la imperialisman militon”, sed *ne malaprobas „militon kiel tian”*. Responde al Kautsky, kiu dum la Berna Konferenco pri demokratio kaj diktaturo asertis, ke la bolŝevikoj ne kreis socialismon, sed militarismon⁸, Lenin diris:

„Ni ne vivas nur en unu ŝtato, sed en *sistemo de ŝtatoj* (emfazite en la originalo), kaj la ekzisto de la sovetia respubliko kaj la imperialismaj ŝtatoj unu apud la aliaj dum pli longa tempo ne estas imagebla. Fine aŭ unu aŭ la alia venkos. Ĝis tiu fina momento, nombro de plej teruraj kolizoj inter la sovetia respubliko kaj la burĝaj ŝtatoj estas neeviteblaj”⁹.

Tial Lenin alvokis la rusan „regantan klason, la proletaron”, konstrui „fortan militistaron”. Jam antaŭ la Oktobra Revolucio Lenin havis la saman agresan sintenon en artikolo „Pri la Slogano de Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo”, en kiu li pritraktis la eblecon de sukcesa revolucio en pluraj aŭ en unusola kapitalisma lando. Li konkludis:

„La venkinta proletaro de tiu ĉi lando, post la ekspropriigo de la kapitalistoj kaj la organizo de socialisma produktado en sia propra lando, leviĝos *kontraŭ* (emfazite en la originalo) la ceteron de la kapitalista mondo, altirante al si la subprematajn klasojn de aliaj landoj, instigante ilin al ribelo kontraŭ la kapitalistojn, utiligante, se necese, militan forton kontraŭ la ekspluatantajn klasojn kaj iliajn ŝtatojn”¹⁰.

Diference de tiuj kaj multaj aliaj deklaroj pri la malebleco de kunekestado, oni trovas jam ekde la unuaj tagoj post la Oktobra Revolucio ankaŭ asertojn pri la ebleco de kunekestado kaj kunlaborado, precipe sur la kampo de internacia komerco.

Ŝajnas, ke la termino „paca kunekestado” estis por la unua fojo uzita en la sovetia diplomatio en 1920 fare de G. V. Ĉiĉerin, la tiama komisaro pri eksterlandaj aferoj, kiu karakterizis la Packontrakton kun Estonio de la 2-a de februaro 1920 kiel „la unuan eksperimenton de paca kunekestado kun burĝaj ŝtatoj”¹¹. Estas bone konate kio okazis al Estonio malgraŭ tiu „paca kunekestado”. Ĝia sorto kaj la sorto de aliaj tiutempe sendependaj ŝtatoj, al kiuj Sovetio garantiis suverenecon, troviĝas en la radikoj mem de la sovetia koncepto de kunekestado. Kvankam Stalin asertis en 1927, ke la periodo de „paca kunekestado estas afero de la pasinteco”, post la Dua Mondmilito li plurfoje deklaris, ke kunlaborado „kompreneble estas ne nur ebla, sed eĉ dezirinda”. Tion li diris en la konversacio kun Elliot Roosevelt de la 21-a de decembro 1946, ripetis en intervjuo kun Harold Stassen en aprilo 1947 kaj en pluraj aliaj okazoj. Identan ideon esprimis la stalinista ideologo A. A. Ĵdanov en la

8. Laŭ *Die Freiheit*, n-ro 29 de la 11-a de februaro 1919.

9. V. I. Lenin, *Soĉinenija* (Verkoj), 3-a rusa eldono, vol. XXIV, p. 122.

10. *Ibid.* Lenin ne uzis la vorton „kunekestado”, sed „ekzisti unu apud la alia”, aŭ „paralela ekzistado”, aŭ simile, sed tio ne multe gravas, ĉar ja temas pri kunekestado.

11. Citita laŭ R. Goodman, *The Soviet Design for a World State* (La Sovetia Projekto de Monda Ŝtato), New York, 1960, p. 166.

Konferenco de Kominformo en 1947, same G. Malenkov en sia Raporto al la 19-a Partia Kongreso en 1952 kaj en la funebra parolado de la 9-a de marto 1953 okaze de la entombigo de J. V. Stalin.

La praktiko faradi deklarojn pri „paca kunekzistado” estis intensigita post la morto de Stalin, sed nur la 20-a Partia Kongreso de 1956 markas la komenciĝon de mondvasta kampanjo, iniciatita de Ĥruŝĉov dum tiu Kongreso. En pluraj okazoj li pravigadis la konkludon de la Kongreso, ke „ne ekzistas fatala neeviteblo de milito”, kaj rekonfirmis la eblecon de „paca kunekzistado” precipe en la sfero de monda komerco. La ideoj de Ĥruŝĉov eniris en la Programon de la Komunista Partio de Soveta Unio de 1961 kaj ili estos analizitaj iom poste, ĉar ili plu konsistigas la esencon de la sovetia koncepto de „paca kunekzistado”.

Kvankam, kiel montrite, Lenin opiniis, ke „paca kunekzistado” inter la du sistemoj estas malebla, Ĥruŝĉov daŭre invokadis la nomon de Lenin apoge al sia koncepto, precipe en la polemikoj kun la tiamaj politikaj gvidantaroj de Ĉinio kaj Albanio, aŭ sen mencio de la kontraŭuloj. Tial la deklaro de G. V. Ĉiĉerin, ĉefo de la sovetia delegacio en la Ĝenova Konferenco de 34 Landoj pri Eŭropa Ekonomia Rekonstruo en 1922, kaj la korespondado inter Lenin kaj Ĉiĉerin rilatanta al tiu deklaro meritas apartan atenton. Des pli ĉar en Soveta Unio mem la ruslanda pozicio¹² en Ĝenovo estas nun rigardata kiel la komenciĝo de la „leninisma politiko de paca kunekzistado”. La 10-a de aprilo 1922 – la tago de la Deklaro de Ĉiĉerin – „estas signifa dato en la historio de internaciaj rilatoj”, skribis *Novoje Vremja* (Nova Tempo) en la angla versio de n-ro 13/1962, ĉar „en tiu tago la principo de paca kunekzistado, formulita de Lenin, estis oficiale proklamita en internacia konferenco.

El la publikigita korespondado inter Lenin kaj Ĉiĉerin sekvas, ke Lenin fakte rigardis la Ĝenovan Konferencon tre grava. En sia Deklaro Ĉiĉerin postulis la rekonon de la sovetia formo de ŝtata proprieto cele al pravigo de naciigoj de alilandaj havaĵoj en Ruslando sen kompenso¹³. Li ankaŭ pledis favore al internaciaj komerco kaj ekonomiaj interŝanĝoj, kiujn tiama Ruslando, same kiel nuntempa Soveta Unio, urĝe bezonegis. La Deklaro enhavis ankaŭ alvokon por paco kaj malarmado. La korespondado inter Lenin kaj Ĉiĉerin antaŭ la Konferenco montras, ke Lenin speciale aprobis la „vastan pacifisman programon”. En sia letero de la 10-a de marto 1922 Ĉiĉerin prezentis al Lenin sian agadplanon. Interalie li skribis: „Samtempe ni proponas ĝeneralan reduktion de armiloj” kaj Lenin trifoje substrekis tiujn vortojn...

La respondo de Lenin de la 14-a de marto 1922 enhavis la sekvantajn gravajn partojn: „Mi opinias, ke en ĝi (la agadplano) vi starigis la *pacifisman programon* plej admirinde. La ĉefa afero estas proklami ĝin, kune kun niaj *komercaj proponoj*, klare kaj laŭte antaŭ la kolapso (se „ili” kaŭzas rapidan kolapson)... Ni konfuzos ĉiujn deklarante ‚Ni havas tre vastan kaj kompletan programon’. Se ili ne permesos al ni

12. La Konferenco de Ĝenovo (Italio) estis la unua internacia konferenco, kiun partoprenis sovetia Ruslando. En tiu tempo Soveta Unio ankoraŭ ne ekzistis.

13. Pri la starpunkto de la sovetia registaro en Ĝenovo, v. *op. cit.* en n- 6, supre, p-oj 280 kaj sekvaj.

anonci ĝin, ni presigos ĝin kun protesto. Eta ‚rezervo‘ rilate la tuton: ni, komunistoj, havas nian propran programon (Tria Internacio): tamen ni rigardas nia devo *kiel komercistoj* apogis (eĉ se la ŝanco estas nur 1/10.000) la pacifistojn en la alia, t.e. la burĝa tendaro (en kiu estas inkluzivitaj la Dua kaj Dua-kaj-Duona Internacio). *Ĝi estos samtempe morda kaj ‚amika‘*, kaj helpos al *demoralizo* de la malamiko. Kun tia taktiko ni venkos eĉ se Ĝenovo malsukcesos¹⁴. (emfazite de I.L.)

Estas malfacile trovi pli sinceran konfesion de malsincereco. Komprenoble, Lenin sincere deziris periodon de paco, ĉar Ruslando bezonegis pacon por solvi la internan brulantan krizon, sed la „vasta pacifisma programo“ celis kaj apogi la urĝe bezonatan „komercadon kun la kapitalistoj“ kaj, samtempe, konfuzi, „mordi“ kaj „esti amika“, „demoralizi la malamikon“. Tio estis lerta politika movo, rekonita de Lenin mem kiel „taktiko“, kaj tial tute ne kontraŭa al lia fundamenta tezo pri la malebleco de kunkezigado dum pli longa tempo. La homoj estis tiam lacaj de milito kaj sangverŝado, same kiel ili estas nuntempe, kaj packampanjo ne povas ne esti alloga kaj por la amasoj kaj por la intelektaj elitoj. La ruslanda propono en Ĝenovo atingis sian veran celon. Unu el la delegitoj deklaris poste: „Nia unua alvoko por malarmado havigis al ni popularecon tra la tuta mondo“. La Tut-Rusa Centra Ekzekutiva Komitato aprobis la laboron de la Sovetia Delegacio kaj en sia Rezolucio de la 17-a de majo 1922 emfazis „la korektan kaj ĝustatempan agon de nia Delegacio per propono de ĝenerala malarmado en sia plej unua deklaro“¹⁵.

Komprenoble, alvoki al malarmado por „demoralizi la malamikon“ estas unu afero. Mem komenci malarmadon estis tiam, same kiel estas nuntempe, tute alia afero. RSFSR, poste USSR, daŭrigis sinarmadon tiutempe, same kiel ĝi daŭrigas nuntempe.

3. Politika signifo

Necesas nun respondi al la demando: kio estas la enhavo kaj la politika signifo de la aktuala sovetia koncepto de „paca kunkezigado“ kaj ĉu tiu koncepto diferencas de la sovetia ekstera politiko kiel formita de Ĉiĉerin kaj Lenin en la fruaj dudekaj?

La respondon donas la Programo mem de la Komunista Partio de Soveta Unio (KPSU), akceptita de la Dudek-Dua Kongreso la 31-an de oktobro 1961¹⁶. La nuna

14. *New Times* (angla versio de *Novoje Vremja*), n-ro 11/62, p. 11.

15. *Ibid.*, p. 13.

16. Ĉiuj subaj laŭ la angla versio de la Programo, publikigita kiel speciala suplemento de la sovetia periodaĵo *New Times*, n-ro 48/61. Detala analizo de la Programo, inkluzive artikolon de la aŭtoro de tiuj ĉi linioj, aperis en la verko de L. Schapiro (ed.), *The USSR and the Future* (USSR kaj la Estonteco), New York – London, 1963. En longa studo de la aŭtoro „*The Legal Aspects...*“, citita en n- 6, supre, estas detale pritraktita ankaŭ la jura aspekto de la sovetia „paca kunkezigado“ kiel kvazaŭe baza *jura* principo de la ĝenerala publika internacia juro, diference de la „socialisma internaciismo“ kiel baza principo de la t.n. „socialisma“ internacia publika juro.

Programo, akceptita en februaro 1986, nur plurloke asertas, ke la rilatoj de Soveta Unio kun la „kapitalismaj ŝtatoj” baziĝas sur la principo de „paca kunekestado”, sed ne redefinas tiun principon. Sekve, tiurilate restas valida la antaŭa Programo.

La Programo de 1961 konsistas el Enkonduko kaj du partoj. La Enkonduko karakterizas la nuntempan situacion en la mondo kiel epokon, „kies ĉefa enhavo estas la transiro de kapitalismo en socialismon”, epokon de „lukto inter la du kontraŭ-starantaj sociaj sistemoj ... socialismaj kaj naciliberigaj revolucioj ... kolapso de imperialismo ... abolo de la kolonia sistemo ... triumfo de socialismo kaj komunismo en mondaj kadroj” (p. 6)¹⁷. La fundamenta kredo pri la „fina venko de komunismo”, t.e. de la sovetia regadsistemo kaj ŝtata proprieto en la mondo, estas detale prilaborita en la Unua Parto. Ĉapitro ok, precize en la mezo de la Programo, rilatas al „Paca Kunekestado kaj la Lukto por Monda Paco”. Ĝi prezentiĝas kiel ponto inter la du partoj kaj eĉ laŭ tiu centra pozicio montras la gravecon, kiun la KPSU atribuas al sia koncepto de „paca kunekestado” por la plua fortikigo de USSR. La ĉapitro pri kunekestado konstituas la konkludon de la Unua Parto kaj samtempe enkondukon al la Dua Parto.

La kvintesenco de la rezonado tra la sep ĉapitroj antaŭantaj tiun pri „Paca Kunekestado kaj la Lukto por la Monda Paco” kondukas al logika konkludo, ke en la aktuala situacio la ĉefa celo de la ekstera politiko de KPSU „estas prizorgi pacajn kondiĉojn por la konstruado de komunisma socio en USSR kaj por la evoluigo de la monda socialisma sistemo kaj, kune kun la aliaj pacamantaj popoloj, savi la homaron de mondmilito de ekstermo” (p. 25).

La bazaj premisoj de la politiko de „paca kunekestado” reflektas la kredon, eble eĉ la konvinkon de la sovetiaj politikaj gvidantoj (pasintaj kaj nuna), ke la okcidentaj demokratioj – senkonsidere al la okazantaj ŝanĝoj en iliaj ekonomiaj, sociaj kaj politikaj strukturoj – estas daŭre malfortiĝantaj kaj fine devas esti venkitaj, kiel „historia neceso”, de la „kreskantaj fortoj de socialismo”, t.e. per la establo de la sovetia regadsistemo en la tuta mondo¹⁸, kaj ke – ĝuste pro tiu „historia neceso” – en la nuna evolustadio militoj ne estas necesaj por atingi la „finan celon”.

En la lumo de tiuj premisoj, la sovetia koncepto de „paca kunekestado” kiel formulita en Ĉapitro Ok de la Programo povas esti koncize difinita jene:

1. La principo de „paca kunekestado” estas bazita sur la malnova leninista-stalinista tezo de la „*du tendaroj*”: la „socialismo” kaj la „imperialismo”. Ĝi estas rigardata kiel gvidprincipo de la sovetia eksterlanda politiko nur en la rilatoj inter la ŝtatoj apartenantaj al la „du tendaroj” kaj – se necese kun modifoj diktataj de la politika situacio en difinita momento – aplikata ankaŭ al la t.n. neengaĝitaj landoj. La rilatoj interne de la „socialisma tendaro” estas regataj de la „supera” principo

17. La terminoj „kapitalismo”, „socialismo”, „imperialismo”, „demokratio” kaj aliaj estas prenitaj en la sovetia senco, kutime tute deformita, de tiuj vortoj eĉ kiam ili troviĝas en citosignoj por indiki, ke ili estas prenitaj el la Programo.

18. En la sovetia politika lingvo „socialismo” ĉiam signifas nur la sovetian regadsistemon, kiu, fakte, tute ne estas socialismo, sed totaleca ŝtatkapitalismo. Nur en tute esceptaj politikaj cirkonstancoj oni permesas „propran vojon al socialismo”.

de „socialisma internaciismo”¹⁹, dum la rilatojn inter la ŝtatoj de la „imperialisma tendaro” necese determinas reciprokaj antagonismoj, „esence propraj al kapitalismo”. La grandaj antagonismoj inter la landoj de la „socialisma tendaro” estas ignorataj.

2. „Paca kunekzistado” implicas *rezignon pri milito* kiel rimedo por solvado de internaciaj disputoj. Tio ĉefe rilatas al monda milito, kiun eblas eviti „per la kombinitaj fortostreĉoj de la potenca socialisma tendaro kaj de la fortoj ĉampionantaj pacon” (p. 20). Ĝi ankaŭ implicas la sovetian kontraŭstaron al „militoj de konkero”, eĉ al tiuj „inter kapitalismaj landoj”, kiel ankaŭ al „regionaj militoj celantaj sufoki la emancipiĝajn movadojn de popoloj”, sed ne rilatas al „justaj kontraŭimperialismaj liberigaj militoj” (p. 27). Plian fojon ĝi estas la sama malnova sovetia tezo pri „justaj” kaj „maljustaj” militoj. Plue, civilaj militoj ne estas ekskluditaj, se ili estas „revoluciaj”. Male, militoj klasigitaj kiel „kontraŭrevoluciaj” ne estas entenataj en la principo de „paca kunekzistado”. Apenaŭ necesas diri, ke la supro de la KPSU decidis en ĉiu unuopa okazo, ĉu iu milito estas „justa” aŭ „maljusta”, „revolucia” aŭ „kontraŭrevolucia”, ĉio depende de la konkretaj interesoj de Soveta Unio.

3. La politiko de „paca kunekzistado” inkluzivas la *kampanjon por paco* kaj por ĝenerala kaj kompleta *malarmado* sub „strikta internacia kontrolo” (p. 26). Paralele kun tiu kampanjo direktita al ĉiuj „pacifistaj movadoj” kaj al la „pacamantaj” landoj, la „KPSU rigardas la fortikigon de la defendpotencialo de USSR, de la potenco de la Sovetiaj Armitaj Fortoj” kiel „sanktan devon de la tuta sovetia popolo”, kiel „gravan funkcion de la socialisma ŝtato” (p. 45). Do: kampanjo por malarmado, fakte malarmado de aliaj, sed samtempe maksimuma sinarmado. La kampanjo por malarmado estas limigita al demokratioj, kie ĝi povas libere disvolviĝi, kaj al eksterblokaj landoj. En Soveta Unio kaj en la landoj sub la regado de Moskvo ekzistas tiurilate strikta ŝtata-partia monopolo. Ĉiu ajn honesta kaj sincera agado por paco kaj malarmado estas malpermesita kaj povas esti kvalifikita kiel krimo de „kontraŭsovetia agitado aŭ propagando”, aŭ eĉ kiel krimo de „perfido de la patrolando”, por kiuj estas preskribitaj plej severaj punoj. Kiel konate, ekde 1974 ankaŭ en la Esperanto-Movado libere furoras la sovetie inspirita kampanjo por „paco kaj malarmado” – de la grandaj demokratioj, kompreneble.

4. La sovetia „paca kunekzistado” enhavas la principon de *ekonomia kunlaboro* „surbaze de plena egaleco kaj reciproka avantaĝo” (p. 26). Formale, la Programo allasas ankaŭ „kulturan kunlaboron” (p. 26), sed tiu allaso minimumiĝas pro la tezo pri la neceso de „ideologia lukto” lige kun la „klasbatalo” (p-oj 23 kaj 26).

19. Pri la „socialisma internaciismo” kaj „socialisma internacia juro”, v. *op. cit.* en n. 5, supre. Apenaŭ necesas diri, ke la supro de KPSU decidis kiu lando apartenas al la „socialisma tendaro” kaj kiu ne apartenas. Ekzemple, en la Programo de 1961 Albanio kaj Ĉinio apartenis al la „socialisma tendaro”, dum Jugoslavio, pro la „reviziismo de Tito kaj ko.”, „glitis en la imperialisman tendaron” (J. B. Tito eĉ estis nomata „agento de la usona imperialismo”). Baldaŭ, tamen, al Jugoslavio estis permesite „iri sian vojon al socialismo”, ktp., dum Albanio kaj Ĉinio fariĝis „reviziismaj”, „kontraŭmarksismaj”, ktp. Cetere, Jugoslavio, Ĉinio kaj Albanio aperte forĵetas la sovetian doktrinion de „Socialisma Internaciismo”, kiu pravigas armitan intervenon kiel „fratan helpon”, ekz. en Hungario (1956) kaj Ĉeĥoslovakio (1968). Fakte, ankaŭ Rumanio malakceptas tiun doktrinion de limigita suvereneco kaj armita interveno sub la masko de „frata helpo” laŭ la sovetia „socialisma internaciismo”.

5. „Paca Kunekzistado” ne signifas „*kunekzistadon de ideoj*”. *Kommunist*, la teoria-politika revuo de la Centra Komitato de KPSU skribis tiurilate: „Socialismo neeviteble venkos kapitalismon, sed tiu venko estas malebla sen lukto de ideoj, en senmaskigado de la burĝa ideologio, sen la venko de la revolucia marksisma-leninisma ideologio²⁰. Eĉ se nun la supro de KPSU sub la gvidado de M. Gorbaĉov eble permesos al sovetiaj civitanoj iom ĝui la modernajn „burĝajn” literaturon, muzikon, artojn, kaj aliajn kulturajn valorojn, kaj eĉ se ĝi havos la grandan kuraĝon permesi la eldonon en la rusa de tia „kontraŭrevolucia” verko, kiel la romano „Doktoro Ĵivago” de la Nobelpremiito B. Pasternak, aŭ liberigi el kontraŭleĝa ekzilo Doktoron Saĥarov – eĉ se ĉio ĉi eble okazos, la tezo pri „ideologia lukto” restas plene valida. Per Esperanto kaj en la kadro de pluraj Esperanto-organizaĵoj ĝi estas, interalie, realigata per la kampanjo direktita al senideigo de Esperanto kaj per pseŭdosciencaj provoj senigi la Internacian Lingvon de ĝia solidara socia funkcio laŭ la slogano „nur teknika komunikilo, nenio pli”.

6. Fine, la sovetia doktrino rigardas la „pacan kunekzistadon” kiel „specifan formon de *klasbatalo*” en mondaj kadroj. Ĉar laŭ la oficiala sovetia doktrino klasoj en Soveta Unio ne plu ekzistas precize ekde la 31-a de oktobro 1961 (dato de la Programo), la tezo pri la „klasbatalo” praktike signifas la politikan batalon inter la „du tendaroj”, inkluzive ĉiujn formojn de ideologia lukto. Ankaŭ tiu „klasbatalo”, kompreneble, rilatas sole al la landoj ekster la sovetia bloko. En Soveta Unio kaj en la landoj sub ĝia regado ĉiuj agadoj, aŭ eĉ nuraj planadoj, celantaj organizon de liberaj laboristaj sindikatoj, aŭ rekonon de naciaj-etnaj kulturaj rajtoj, aŭ religian praktikadon ekster la altruditaj striktaj limoj, aŭ entute eĉ modestan realigadon de la internacie rekonitaj homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj, estas krude subpremataj per apliko de severaj kriminaljuraj sankcioj aŭ per alispecaj molestadoj.

4. Apliko

Tio estas la enhavo de la sovetia „paca kunekzistado”, plene konforma al la hipokrita politiko de Lenin, formulita okaze de la tute unua elpaŝo de Sovetio en internacia konferenco. Ĝi estas duvizaĝa kaj samtempe ofertas amikecon kaj malamikecon, kunlaboradon kaj lukton, pacon kaj militon.

Ĉiu el la du flankoj konsistas el pluraj elementoj, kiuj povas esti uzataj kune, aŭ aparte, aŭ en kombinaĵoj depende de la cirkonstancoj kaj de la medioj, al kiuj ili estas direktitaj, ekzemple:

„Frata helpo” kaj „paco” por la novaj, plejparte neengaĝitaj landoj por eltiri ilin elsub la influo de la „imperialisma bloko” kaj fine puŝi ilin en la „socialisman tendaron”;

Apogo al „naciliberigaj movadoj”, kelkfoje kombinita kun „justa liberiga milito”, por ĉiuj „subpremataj popoloj” (nome ĉie, kie troveblas malkontento aŭ socia tensio), sed ne por tiuj sub la regado de Moskvo;

20. *Kommunist* (Komunisto), n-ro 8/62, p. 62.

„Komerca kaj ekonomia kunlaborado”, kelkfoje en societo de „malarmado”, por ĉiuj komercistoj kaj negocistoj;

„Kultura kunlaborado” kombinita kun „paco” por ĉiuj verkistoj, artistoj, sciencistoj kaj, ĝenerale, intelektuloj en la ekstersonetia mondo;

„Ideologia lukto” kaj „klasbatalo” por la sama kategorio en la „socialisma tendaro” kaj en la „internacia laborista movado de la laborista klaso”;

„Paco” aŭ „paco kaj malarmado” por ĉiuj.

Uzata ripete, ĉiutage en sia plej mallonga formo – simple „paca kunekzistado” – la aloga slogano havas sugestian forton je la amasoj ĝuste tial, ĉar ĝi maskas la veran sencon de „paca kunekzistado” en la sovetia politika doktrino. Ordinara homoj kun ordinara prudento akceptas kaj aprobas la ideon en la ordinara senco de la termino: ekzisti kune, unu apud la alia, en paco; vivi kaj lasi vivi la aliajn. Kiu, escepte de krimuloj kaj frenezuloj, ne sopiras al prospero en paco kaj libero?

En la realo, „paca kunekzistado” estas potenca propaganda instrumento de la sovetia ekstera politiko. Ĝi estas vaste utiligata por „demoralizi la malamikon”, kiel diris Lenin, kaj por antaŭenigi la sovetiajn interesojn ĝenerale. La intenco de tiu politiko estas atingi simultane plurajn celojn, kiuj povas esti resumitaj en tri punktoj: (i) populareco pro la granda altirpovo de la ideo de paco; (ii) atingo de maksimumo en ekstera politiko, inkluzive vastigon de influferoj kaj akiron de novaj teritorioj, sen implikiĝo en monda milito; (iii) interna ekonomia evoluo, por kiu longa periodo de paco estas esenca antaŭkondiĉo. Tio estas la kvintesenco de la sovetia imperialisma politiko sub masko de socialismo ekde Lenin ĝis Gorbaĉov. Ĉu kelkaj el la lastmonataj deklaroj – parte ankaŭ agoj – de Gorbaĉov sub la premo de grandiganta nuklea danĝero eĉ sen milito indikas malrigidiĝon kaj sinceriĝon de tiu politika linio, montros la estonteco.

5. Konkludo

Kion diri konklude? Ĉu fakte estas necese forĵeti la ideon mem de paca kunekzistado pro la deformita senco, kiun la termino ricevis en la sovetia doktrino kaj propaganda agitada praktiko? Ĉu estas saĝe permesi, ke la plej noblaj ideoj – kiel frateco, egaleco, libereco, demokrateco, por kiuj la plej bonaj cerboj laboris kaj ne malofte suferis, kaj kiuj ĉiam estis inspiraj por ordinara viroj kaj virinoj – perdis sian valoron tial, ĉar en la sovetia, ne rusa, lingvo tiuj vortoj estas senigitaj de sia kutima senco?

Ŝajnas al mi, ke la respondo devas esti negativa.

Kunekzistado estas historia fakto, kiu datumas ekde la tempo kiam estiĝis la unuaj homaj komunaj kiel apartaj sociaj grupoj, poste akirintaj la karakteron de ŝtato. En la ordinara senco de „ekzistado kune en paco” ĝi estas nepre necesa principo de rilatoj inter ŝtatoj, rasoj, nacioj, etnoj kaj unuopuloj. Tia kunekzistado devus reflektiĝi en konsiderinda kresko de ĉiaspacaj kontaktoj ne nur inter ŝtatoj, sed ankaŭ – kaj ĉefe – inter ordinara homoj sur ĉiuj niveloj: ekde la rilatoj sur simpla turisma bazo ĝis la intelektaj suproj de la homaro, ĉio ĉi sen krudaj ŝtataj intervenoj, en plena libero. Kaj tiu lasta vorto – libero – estas esenca: ne paca kunekzistado en

sklaveco, sed paca kunekzistado en libero. Por tia kunekzistado en libero ne estas alternativo, aŭ, pli ĝuste, la sola alternativo estas neekzisto. Nur kadre de paca kunekzistado en libero ankaŭ la Internacia Lingvo akiras sian plenan valoron kaj povas efike plenumi sian solidarigan socian funkcion.

JURAJ TERMINOLOGIAJ PROBLEMOJ KUN APARTA KONSIDERO AL LA ESPERANTLINGVA JURA TERMINOLOGIO

1. Ĝeneralaj Konsideroj

El ĉiuj naturaj kaj sociaj sciencaj branĉoj juro sendube prezentas la plej grandajn problemojn por trovi adekvatajn internaciajn terminologiajn solvojn. Tion kaŭzas la socia karaktero de lingvo, unufanke, kaj la specifeco de juro, aliflanke.

1.1. *Lingvo*

Lingvo ne estas natura, sed socia fenomeno, kies formiĝon, ekeston kaj pluan evoluon regas sociaj leĝoj, funkciantaj sole en homaj socioj. Tial, la ofta distingado inter la kvazaŭe „naturaj” kaj kvazaŭe „artefarita” lingvoj estas science ne allasebla, ĉar lingvo apartenas nek al animala aŭ vegetala mondo, nek ĝi troviĝas sur la nivelo de mekanikaj rimedoj de komunikado. Ĉiu lingvo reflektas difinitan socian realaĵon, servas por pensado kaj komunikado interne de la socia grupo, al kiu ĝi apartenas, kaj efikas kulture-solidarige rilate la koncernan kolektivon. Tio decide kontribuas al la socia identigo de la koncerna komunaĵo, sed tio samtempe lingve izoligas ĝin disde ĉiuj aliaj komunaĵoj. Escepto estas la Internacia Lingvo (Esperanto), la sola el ĉiuj komunaĵoj, kiu transformiĝis en vivantan lingvon de vivanta internacia lingvokomunaĵo. Ĝi ja efikas internacie solidarige, sed pro sia karaktero de neŭtrala monde internacia lingva komunikilo estas senigita de la izoliga funkcio. En tio konsistas la kvintesenco de la multfaceta lingva problemo en internaciaj rilatoj, inkluzive la pritraktatan temon.

La evoluon de la lingvo daŭre influas pluraj unuecigaj kaj diferencigaj faktoroj¹. Unu el la plej gravaj diferencigaj faktoroj estas la faka en la plej vasta senco de la vorto, progresive efikanta pro la multobliĝanta divido de la laboro en la moderna socio. Ĉiu fako kaj subfako, ĉiu profesio kaj okupo havas siajn proprajn terminojn,

1) Detalojn v. en Ivo Lapenna, *Retoriko*, 3-a eldono, Rotterdam, 1971, p-oj 73–78; Ivo Lapenna (ĉefred.), U. Lins (red.) kaj T. Carlevaro, *Esperanto en Perspektivo. Faktoj kaj Analizoj pri la Internacia Lingvo*. London-Rotterdam, 1974, p-oj 28–35.

kiuj ofte ne estas konataj ekster ĝi. Al tio aldoniĝas ankaŭ la specialaj terminoj, ekestintaj surbaze de diversaj akcesoraj aktivadoj, kiaj sporto, ludoj, turismo ktp. La tuta vortprovizo de la plej evoluintaj lingvoj atingas nuntempe plurajn centmilojn da vortoj kun aŭtonoma lingva valoro. El ili, relative nur tre malgranda nombro – ne pli ol kelkaj centoj – estas komuna al ĉiuj uzantoj de la koncerna lingvo. La cetero apartenas al fakaj, profesiaj, okupaj, flankokupaj k.a. lingvaj esprimoj. Tiamaniere, la aktuala monda lingva situacio, plena de evolua dinamismo, donas bildon ne de lingvoj dividitaj inter si per firme difinitaj linoj, sed prezentiĝas kiel eksterordinara kubforma spektro, en kiu la diversaj lingvoj (inkluzive la dialektojn, slangojn kaj aliajn lingvoformojn) simile al la spektraj koloroj, transiĝas unu en la alian kaj interpenetras sin reciproke. Tamen, laŭ siaj kernaj strukturoj la lingvoj ne nur malsamas sur la horizontala nivelo, nome de unu lingva teritorio al alia, sed ankaŭ varias vertikale de unu klaso, fako, profesio, okupo kaj simile al alia.

Unu el la karakterizoj de la fakaj lingvoj en la strikta senco de la vorto estas, ke en ĉiu faka aŭ scienca branĉo la fakaj terminoj estas maksimume internaciigitaj: por la sama nocio ekzistas unusola faka termino en kiu ajn evoluinta lingvo, aŭ, inverse, ĉiu faka termino kovras difinitan nocion. Tiurilate ne multe gravas, ĉu ankaŭ la fakaj terminoj mem estas internaciigitaj, kio ja okazis kaj plu okazas en tre multaj naciaj lingvoj, aŭ la koncernaj terminoj estas formataj el nacilingvaj vortradikoj. La sola fako kaj la respektiva scienca branĉo, en kiu internacia unuecigo de terminologio renkontas grandajn, ofte ne venkeblajn obstaklojn, estas juro.

1.2. *Juro*

En la plej ĝenerala senco de la vorto, t.e. ne enirante en detalojn de diversaj jursciencaj skoloj, juro estas la tuto de devigaj preskriboj kun sankcioj, ordigantaj la rilatojn inter homoj kaj homkolektivoj (fizikaj kaj juraj personoj), kaj difinantaj iliajn rajtojn kaj deojn. Tia vasta koncepto povas rilati al nuntempe ekzistanta juro, al juro de la pasinteco, eĉ al reguloj de konduto en socioj tribe organizitaj, do antaŭ la formiĝo de ŝtato. En la hodiaŭa mondo la koncepto pri juro estas ligita al ŝtato. La jurdonaj organoj de ĉiu unuopa ŝtato kreas la juron de la koncerna ŝtato kaj difinas la sankciojn en okazo de malobservo de la preskriboj. Tio estas *la interna aŭ hejma juro* de ĉiu ŝtato. Kompreneble, en ĉiu interna juro la juraj nocioj estas difinitaj kaj la preskriboj donitaj en la koncerna nacia lingvo, aŭ en pluraj naciaj lingvoj, se temas pri plurnacia federacia ŝtato. En tiu mallarĝa kadro de sole interna juro ne ekzistas terminologiaj problemoj. Ekster tiu kadro, t.e. sur la kampoj de fremda, kompara kaj internacia juro, ili tuj manifestiĝas en pli aŭ malpli alta grado depende de la pritraktata jura branĉo kaj de la karaktero de similecoj aŭ malsimilecoj inter unu interna juro kaj alia. Tio ŝuldiĝas parte al malesto en iu lingvo de fakaj terminoj por juraj nocioj troviĝantaj en alilanda juro, sed precipe al la malsameco de la signifoj de la fakaj juraj terminoj en diversaj lingvoj, siavice rezulto de la juraj nocioj, al kiuj la terminoj rilatas. Ne povas esti alimaniere, ĉar en la tuta mondo ekzistas eĉ ne nur du absolute identaj internaj juroj.

Pri la ekzamenado de du, pluraj aŭ multaj internaj juroj por eltrovi la similecon aŭ malsimilecon inter ili, kaj la kaŭzojn de la diferencoj, okupiĝas kompara juro kiel aparta jurscienca branĉo. La rezulto de tiuj esploroj estas nombro de klasigitaj juraj sistemoj aŭ juraj familioj en la nuntempa mondo.

La esprimo „jura sistemo” havas tri bazajn sencojn: unu en kompara juro, alian en hejma juro kaj la trian en unuopa jura branĉo.

Komparante la internaciajn jurojn de diversaj landoj oni konstatis, ke inter kelkaj el ili ekzistas similecoj, kelkrilate eĉ identecoj, dum en aliaj kazoj ili grave malsamas unu de la alia. Esplorante la kaŭzojn de similecoj kaj partaj identecoj oni trovis, ke ili ŝuldiĝas al tri grupoj de faktoroj: (i) komuna ekonomia strukturo, ekzemple feŭdismo, kapitalismo, ŝtatkapitalismo; (ii) komuna ideologio, ekzemple kristanismo, islamismo, marksismo, kaj (iii) komuna karaktero de juraj fontoj kaj juraj teknikoj, ekzemple ĉefe kodigita, aŭ ĉefe komuna, kutima juro. En tiu senco oni parolas pri angla-usona aŭ komunjura (*common law*) sistemo; okcidenteŭropa sistemo inkluzive la ŝtatojn de Suda Ameriko kaj Skotlando; antikva ĉinia, islama, hindia, sovetiisma kaj, laŭ kelkaj aŭtoroj, ankaŭ aliaj juraj sistemoj. En tiu pli vasta senco de jura sistemo aŭ jura familio, la sovetiisma sistemo estas ne nur la juro de Soveta Unio, sed ankaŭ de ĉiuj aliaj ŝtatoj kun la sama aŭ tre simila ekonomia, ideologia, socia kaj politika strukturo.

Laŭ la originala marksismo, la kriterio estas la klasa strukturo de la ŝtato, kiu siavice dependas de la maniero de produktado. Laŭ tiu kriterio oni distingas juron bazitan sur sklaveco, juron de feŭdismo, tiun de kapitalismo kaj tiun de la t.n. transira periodo inter kapitalismo kaj plena komunismo, kiam ŝtato kaj juro devus komplete malaperi kaj esti anstataŭigitaj per sociaj reguloj de konduto.

Laŭ nia opinio, hodiaŭ ekzistas kvar grandaj juraj sistemoj aŭ familioj: (i) la romiisma jura familio, t.e. internaj juroj bazitaj ĉefe sur la antikva romia juro; (ii) angla-usona familio bazita ĉefe sur la principo de komunjuro (*common law*); (iii) islama religia-jura familio, kaj (iv) sovettipa aŭ sovetiisma familio bazita sur ŝtata proprieto kaj sur diversmaniere deformita marksisma ideologio. Al tiu lasta apartenas ankaŭ la jugoslavia varianta bazita sur la t.n. socia proprieto (jure ankoraŭ nedifinita) kaj memadministrado.

„Jura sistemo” ankaŭ signifas kunordigitan tuton de bazaj juraj principoj kaj juraj normoj/preskriboj de unuopa ŝtato. En tiu senco oni parolas pri aŭstria, angla, franca, sovetia (en strikta senco) ktp. juraj sistemoj.

Fine la termino „sistemo” estas aplikata ankaŭ al unuopaj juraj branĉoj. Depende de la jura sistemo de iu lando, la nombro de bazaj juraj branĉoj varias, sed kutime ekzistas dekduo da ili, ekz. konstitucia, administra, financa, civila, kriminala, familia ktp. juro. Ĉiuj branĉoj estas reciproke kunligitaj kaj devus ne kontraŭdiri unu la alian. Jura branĉo havas sian internan sistemon, kiu kutime konsistas el ĝenerala parto, entenanta preskribojn rilatantajn al la tuta koncerna jura branĉo kaj speciala parto kun multaj subdividoj, rilatantaj al unuopaj sferoj en la kadro de tiu branĉo.

Internacia publika juro estas aparta jura branĉo, ekster la kadro de kiu ajn interna jura sistemo. Internacia publika juro estas la tuto de juraj principoj kaj preskriboj, kiuj reguligas la jurajn rilatojn inter la ŝtatoj kaj aliaj subjektoj (personoj)

de internacia juro, formitaj de la ŝtatoj. Ĝi estas tre ampleksa jura branĉo kaj konsistas el ĝenerala internacia juro, aplikata al ĉiuj ŝtatoj de la mondo, speciala internacia juro (ekz. tiu de Unuiĝintaj Nacioj), regiona internacia juro (ekz. la amerika, aŭ tiu de la sovetia alianco de ŝtatoj, nomata „socialisma” internacia juro). Krome, ekzistas ankaŭ supernacia juro: tiu de la Eŭropa Ekonomia Komunajo (EEK).

Internacia publika juro estas la sola internacia jura branĉo.

Post tiuj koncizaj eksplikoj, oni facile komprenos, ke laŭ la grado de terminologiaj malfacilaĵoj plej simpla estas la afero sur la kampo de internacia publika juro, multe pli malfacila enkadre de unu jura familio, kaj plej komplika en pritraktado de internaj juroj apartenantaj al malsamaj juraj familioj.

1. 3. *Ekzamenotaj sferoj*

En tiu ĉi artikolo mi limigos min al konciza ekzameno de kelkaj terminologiaj problemoj nur en la sferoj de mia pli strikta specialeco, nome internacia publika juro kaj kompara juro. Unue, en la sekvanta sekcio, pri terminologiaj malfacilaĵoj en naciaj lingvoj, kaj poste, en nova sekcio, pri la specifeco de terminologiaj juraj problemoj kaj eblaj solvoj en la Internacia Lingvo.

2. Malfacilaĵoj en naciaj lingvoj

2.1. *Internacia Publika Juro*

La fondintoj de la moderna scienco de internacia juro en la 16-a kaj komence de la 17-a jarcentoj uzis la latinan, kiu estis la sola lingvo de la tiamaj interŝtataj rilatoj. Superflue emfazi la avantaĝojn, kiujn donis la uzo de unusola komuna lingvo pro scienca branĉo plej esence internacia. La samaj verkoj povis esti legataj kaj studataj ĉie en Eŭropo; en la sama lingvo oni povis lekcii en kiu ajn eŭropa universitato; la kontaktoj estis rektaj, sen la helpo de tradukistoj kaj interpretistoj.

Paralele kun malaperado de la latina kiel diplomatia lingvo, proksimume ekde la mezo de la 17-a jarcento, pro kaŭzoj analizitaj aliloke², ĝi malaperis ankaŭ el la doktrino. Sekvis periodo de la franca kiel diplomatia lingvo, kaj de la franca kaj angla superregado en la periodo de la Ligo de Nacioj³. En la nuntempo praktike ĉiuj naciaj lingvoj estas uzataj en la doktrino kaj en internacijuraj tekstoj.

2.1.1. Doktrino

Pro la universaleco de internacia juro, la baza terminologia materialo estas unuforma. En kelkaj lingvoj la terminoj estas pli aŭ malpli internaciaj; en aliaj ili estas kreitaj surbaze de nacilingvaj vortoj; en nombro da aliaj lingvoj paralele

2) En la Internacia Lingvo, interalie, en *op. cit.* en n-1, p-oj 100 kaj sekv., resp. p. 35.

3) Ivo Lapenna, „La situation juridique des langues officielles avant la formation des Nations Unies”, en *La Monda Lingvo-Problemo*, vol. 1, 1968, p-oj 5-18.

ekzistas ambaŭ formoj por granda nombro da nocioj. Tamen, tio ne kaŭzas apartajn malfacilaĵojn. La samo koncernas ankaŭ la terminologion por la apartaj nocioj de regiona internacia juro, tutcerte en la lingvoj, al kiuj ĝi aplikiĝas, sed ĝenerale ankaŭ ekster ĝi. Oni eble povus diskuti pri la pli aŭ malpli granda taŭgeco de tiu aŭ alia fakesprimo en iu lingvo, sed tio ne ŝanĝas la fakton, ke en la sfero de la doktrino de internacia juro ĝenerale ne ekzistas veraj terminologiaj problemoj en la strikta senco de la vorto. Interalie, tio faciligas la tradukojn de internacijuraj traktaĵoj de unu nacia lingvo en alian. Tamen, kompreneble, oni devas bone koni la precizan juran sencion, kiun oni donas al difinita termino en la koncerna regiona internacijura sistemo. Ekzemple, la termino „paca kunekzistado”, kiel baza principo de ĝenerala internacia juro laŭ la sovetia doktrino, havas tute alian sencion en tiu doktrino kaj en la sovetia praktiko, ol ĝi havas ekster la jura sistemo de la sovetia bloko. La samo rilatas al la termino „socialisma internaciismo”, kiun la sovetiaj doktrino kaj praktiko rigardas kiel fundamentan principon de la t.n. „socialisma internacia juro”, sed kiu havas nenion komunan kun la origina marksisma koncepto de la t.n. „proleta internaciismo” aŭ „socialisma internaciismo”⁴.

2.1.2 Juraj tekstoj

Tute alia prezentiĝas la afero en internacia juro mem, nome rilate la fontojn kaj alireblon de la fontoj por la doktrino. Laŭ Art. 38 de la Statuto de la Internacia Kortumo en Hago, la tri ĉefaj formalaj fontoj de internacia juro estas: (i) internaciaj konvencioj, ĉu ĝeneralaj, ĉu specialaj, entenantaj regulojn eksplicite rekonitajn de la ŝtatoj kiel devigajn; (ii) internacia kutimo kiel pruvo de ĝenerala praktiko akceptita kiel juro, kaj (iii) ĝeneralaj juraj principoj rekonitaj de la civilizitaj nacioj.

El la menciitaj fontoj, hodiaŭ la plej gravaj estas la internaciaj konvencioj en larĝa senco de la vorto, nome ĉiuj eksplicitaj interŝtataj interkonsentoj, kreantaj reciprokajn rajtojn kaj devojn, tute egale ĉu la koncerna akto, depende de la enhavo, nomiĝas konvencio (en strikta senco), aŭ traktato, protokolo, interŝanĝo de notoj, interkonsento, deklaro, ĉarto, konstitucio, statuto ktp.

Diference de la tempo, kiam sole la latina estis aplikata en interŝtataj rilatoj kaj, poste, la franca estis ĝenerale uzata kiel la lingvo de diplomatio, hodiaŭ la internaciaj konvencioj, kiel aludite supre, estas farataj en la lingvoj de ĉiuj ŝtatoj de la mondo. La duflankaj konvencioj estas kutime verkitaj en la oficialaj lingvoj de la du partioj; la plurflankaj estas ofte skribitaj en la lingvoj de ĉiuj ŝtatoj-partioj; por la multflankaj konvencioj – inter ili la plej gravaj, sur kiuj baziĝas la diversaj nuntempaj interŝtataj organizaĵoj – oni uzas kelkajn t.n. oficialajn lingvojn. Ekzemple, la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj estis verkita en la angla, ĉina, franca, hispana kaj rusa, kaj ĝia Art. 111 preskribas, ke la tekstoj de la kvin lingvoj estas egale aŭtentikaj. Tiurilate tre interesa kaj instrua estas la evoluo de la Eŭropa Ekonomia Komunuaĵo (EEK). Dum

4) La du konceptoj estas detale analizitaj en I. Lapenna, „The Legal Aspects and Political Significance of the Soviet Concept of Co-existence”, en *The International and Comparative Law Quarterly*, 1963, p-oj 737–777, kaj „The Soviet Concept of ‚Socialist’ International Law”, en *The Year Book of World Affairs*, 1975, p-oj 242–264.

la Pariza Traktato de 1951 pri la fondo de la Eŭropa Komunaĵo pri Ŝtalo kaj Karbo estis redaktita en la franca kiel la sola aŭtentika lingvo, la Roma Traktato de 1957, per kiu estis fondita EEK, estis verkita en kvar lingvoj, nome la franca, germana, itala kaj nederlanda, kies tekstoj estas egale aŭtentikaj. La solaj tri artikoloj de la Brusela Traktato de la 22-a de januaro 1972, per kiu Britio, Danlando, Irlando kaj Norvegio aliĝis al la tri kunfandiĝintaj eŭropaj komunaĵoj, estis verkitaj en la ok oficialaj lingvoj de la partioj: la angla, dana, franca, germana, irlanda, itala, nederlanda kaj norvega, kaj ĉiuj tekstoj estas egale validaj. Do, de unu aŭtentika teksto en 1951 al ok aŭtentikaj tekstoj en 1972! Ĉar Norvegio, pro la negativa rezulto de la konata referendumo, ne povis ratifiki la Traktaton kaj, sekve, fine tamen ne aliĝis, kaj Irlando uzas la anglan, dum intertempe aliĝis Grekio, Eŭropo de Dek havis sep oficialajn lingvojn, tri pli ol Eŭropo de Sep. Post la aliĝo de Hispanio kaj Portugalio, la nombro de egalrajtaj lingvoj altiĝis al naŭ, kio eĉ pli komplikis la jam komplikitan situacion kaj kaŭzis eĉ pli da terminologiaj problemoj – kaj kostoj.

Se iu internacia konvencio estas verkita en unusola aŭtentika lingvo, la eltrovo de la vera senco de ĝiaj reguloj en kazo de konfliktaj starpunktoj kutime ne kaŭzas pli da malfacilaĵoj, ol la interpretado de leĝoj kaj aliaj normdonaj aktoj en la interna juro de unuopaj ŝtatoj. Al ĝi povas aplikiĝi la jam firme establitaj reguloj de gramatika, logika kaj teleologia⁵ interpretado de juraj aktoj.

Tamen, eĉ en kazoj de unulingvaj internaciaj konvencioj povas ekesti problemoj, ŝuldataj ĉefe al semantikaj malsamecoj de juraj terminoj en diversaj internaj juraj sistemoj, simile al la problemoj renkontataj en la sfero de kompara juro, pri kio poste.

Tipa ekzemplo estas Art. 25 de la Varsovia Konvencio pri Unuecigo de Iuj Reguloj Rilataj al Internacia Aertransporto, plu valida en la formo amendita per la Haga Protokolo de la 28-a de septembro 1955 por la ŝtatoj ratifikintaj ĝin. Laŭ tiu Konvencio la kompenso pro damaĝoj kaŭzitaj per akcidentoj baziĝas sur senkulpa aŭ objektiva respondeco de la transportisto, kaj estas limigita al difinitaj sumoj aparte por ĉiu persono, por pakajoj kaj varoj. Sed Art. 25 preskribas, ke la respondeco de la transportisto estas senlima, se, laŭ la franca originalo, „*le dommage provient de son dol ou d'une faute qui, d'après la loi du tribunal saisi est considérée comme équivalente au dol*” (se la damaĝo estas rezulto de ĝia dolo aŭ de kulpo kiu, laŭ la juro de la kortumo ŝarĝita pri la afero, estas ekvivalento de dolo). Tiu maltaŭga formulo estis akceptita post longaj diskutoj, en kiuj la termino *faute lourde* (ekstrema neglekto) estis proponita, sed malakceptita, ĉar la brita reprezentanto prave asertis, ke la franca koncepto de *faute lourde* ne ekzistas en la angla juro kaj tial, se tradukita per la sole ebla *gross negligence*, havus neniun juran sencon. Aliflanke, la koncepto de *dol* en la franca juro (kaj en juro de pluraj aliaj landoj) estas eĉ pli malfacile tradukebla en la anglan kaj tial, fine, oni akceptis la supran formulon de *dol ou d'une faute... équivalente au dol*. Tiuj ĉi terminoj estis malprecize tradukita en la angla Akto (leĝo) pri Aera Transporto de 1932 kaj en la oficiala usona traduko per *wilful misconduct or... default... equivalent thereto*. Verŝajne neniun regulo de konvencia

5) T.e. konforme al la celo de la jura akto.

internacia juro kaŭzis pli da teoriaj diskutoj, juraj argumentoj kaj procesoj, ol la obskuraj kaj neadekvate tradukitaj preskriboj de Art. 25 pri senlima respondeco de la transportistoj.

Se temas pri plurlingvaj konvencioj, kaj se ĉiuj tekstoj estas egale validaj, la tuta afero konsiderinde komplikiĝas pro la oftaj malsamecoj inter unu versio kaj la alia aŭ aliaj. Eĉ la nomo de Unuiĝintaj Nacioj ne estas identa en la kvin oficialaj lingvoj. En la angla, franca kaj hispana aŭtentikaj tekstoj ĝi estas *Unuiĝintaj Nacioj (UN)*, sed en la rusa same aŭtentika teksto ĝi aperas kiel *Organizacio de Unuiĝintaj Nacioj (OUN)*. En la teksto mem troviĝas tre multaj malsamecoj.

Diference de la Ĉarto de UN, la Statuto de la Internacia Kortumo en Hago, kvankam unu el la ĉeforganoj de UN, estas verkita en la angla kaj franca, kaj ambaŭ tekstoj estas aŭtentikaj. Tamen, en pluraj lokoj ili diverĝas, kio kelkfoje obstaklas la eltrovon de la ĝusta senco. Ekzemple, en la franca teksto de Art. 36 troviĝas la vortoj *compétence* kaj *jurisdiction*, dum la angla teksto uzas por ambaŭ nocioj nur *jurisdiction*, ĉar la angla *competence* ne respondas al la franca *compétence*. En la unua proceso inter Britio kaj Albanio pro la incidentoj en la Markolo de Korfujo (objeto de Albanio), en kiu la aŭtoro de tiu ĉi artikolo estis konsilisto-advokato de Albanio, la demando stariĝis ĉu la kortumo havis kompetentecon por juĝi la konkretan kazon, kvankam ĝia ĝenerala jurisdikcio ne estis neata. La demando estis tute konforma al la franca aŭtentika teksto. Sed laŭ la angla teksto, same aŭtentika, tio estis sensencaĵo, ĉar ĝi ne distingas inter kompetenteco kaj jurisdikcio, kio malebligas aserti, ke la Kortumo samtempe havas kaj malhavas *jurisdikcion*. La Esperantlingva traduko de Art. 36 de la Statuto konservas per la terminoj *kompetenteco* kaj *jurisdikcio* la sencon de la franca aŭtentika teksto, kiu donas la ĝustan juran informon.

En la Eŭropa Ekonomia Komunaĵo la malfacilaĵoj estas eĉ pli grandaj, ĉar EEK estas multlilate supernacia laŭ sia karaktero, daŭre kreas sian propran, eŭropan juron, kiu parte aplikiĝas rekte al la civitanoj de la ŝtatoj-membroj, do sur teritorioj kun apartaj internaj juraj sistemoj, tial kun apartaj juraj terminoj kaj juraj tradicioj⁶.

Jen 2–3 el centoj da ekzemploj nur por ilustru kelkajn malfacilaĵojn en la tradukado de la Traktato de Romo (1957) el la franca en la anglan pro la malsameco de signifoj en la du lingvoj. La franca *mission* estas tradukita per *task* en Art. 2, sed per *objective* en Art. 5; la franca *disposicions législatives* per *law*; *dispositions réglementaires* per *regulations*; *dispositions administratives* per *administrative actions* – ĉiuj troviĝantaj en Art. 48; la franca *domicile* ne estas tradukita per la alisenca angla *domicile*, sed per *home*, dum la franca *résidence* ja estas tradukita per *residence*, ambaŭ en Art. 125, ktp.

Jen plia ekzemplo. Art. 48/2 de la Traktato de EEK preskribas la abolon de kia ajn diskriminacio inter „la laboristoj de la ŝtatoj-membroj” surbaze de ilia ŝtataneco koncerne dungon, salajron kaj aliajn laborkondiĉojn. Ekestis duboj pri la demando, ĉu tiu regulo rilatas al ĉiuj laboristoj rezidantaj (konstante loĝantaj) en la

6) Pri la situacio en la Eŭropa Ekonomia Komunaĵo v. la artikolon „Kelkaj juraj aspektoj de multlingveco en EEK”, publikigita originale en la Internacia Lingvo en *Internacia Jura revuo*, n-ro 2/1977, kaj poste en pluraj nacilingvaj tradukoj en diversaj periodaĵoj.

ŝtatoj-membroj, kiel implicas *Arbeitnehmer der Mitgliedstaaten*, aŭ nur al la ŝtatanoj de tiuj landoj konforme al *travailleurs des États Membres* laŭ la same aŭtentika franca teksto. La Konsilio aplikis la principon de restriktita interpretado kaj limigis tiun rajton nur al la ŝtatanoj (Reglamento 1408/71, pli frue Teg. 3). En la komenco eĉ ne estis klare ĉu la vorto *laboristo* en Art. 48 rilatas ne nur al manlaboristoj, sed ankaŭ la oficistoj, eĉ al tiuj en gvidaj pozicioj, konforme al la senco de *Arbeiter* en la germana juro, aŭ ĝi havas malpli vastan senco. Poste la senco estis precizigita per la termino „salajrogajna okupo” (angle: *wage earning occupation*), do rilatas al ĉiuj salajrataj gelaboruloj.

Specialaj, tre komplikaj prilingvaj reguloj estas aplikataj en la Kortumo de la Komunaĵo. Ĉi tie sufiĉas diri, ke ĉiuj naŭ lingvoj estas oficialaj lingvoj de la Kortumo, sed unu el ili povas esti uzata kiel procedura lingvo.

Montriĝas, ke internacijuraj tekstoj ne malforte ege malsamas malgraŭ la elstara kompetenteco de la tradukistoj. Ju pli da lingvoj estas aŭtentikaj, des pli da problemoj ĉu en la ĝenerala internacia juro ĉu en iu el la regionaj. Tiuj problemoj estas solvataj laŭ la reguloj de jura interpretado, nuntempe entenataj en Art. 31–34 de la Viena Konvencio pri la Juro de Traktatoj de 1969, kiu grandparte reflektas la antaŭe ekzistantan praktikon.

Ankaŭ alia granda fonto – la ĝeneralaj juraj principoj, rekonitaj de la civilizitaj nacioj – estas ne sufiĉe konata al la doktrino. Se la Internacia Kortumo de UN pro sia vasta internacia konsisto posedas maksimuman scion pri la ĉefaj juraj sistemoj kaj juraj familioj de la mondo, tion certe oni ne povas diri pri la unuopaj specialistoj de internacia juro.

La multlingveco kaj la terminologiaj malsamecoj sendube, do, kaŭzas seriozajn problemojn ankaŭ en la internacia juro mem kaj prezentas obstaklon al la establo kaj studo de ĉiuj juraj principoj kaj reguloj de tiu jura branĉo; obstaklon al la plua evoluo de la scienco de internacia juro kaj al senperaj kontaktoj de personoj esplorantaj, studentaj, instruantaj kaj kree produktantaj sur tiu ĉi kampo.

2.2. Kompara Juro

2.2.1. Terminologio

La terminologiaj problemoj sur la kampo de kompara juro estas konsiderinde pli grandaj, ol la skize prezentitaj en la sfero de internacia juro.

Kiel menciite en la sekcio 1.1, supre, lingvo ĉiam spegulas difinitan socian realaĵon, kiu determinas la bezonojn de pensado kaj komunikado en la koncerna socia medio. Sekve, se en iu jura sistemo tute ne ekzistas difinita jura koncepto aŭ nocio, kiu ekzistas en alia interna sistemo, ankaŭ la respektiva jura faktermino troviĝas, kompreneble, en la dua interna jura sistemo, sed ne en la unua. Ekzemple, la anglaj terminoj *solicitor*, *barrister*, *manslaughter* kaj multaj aliaj ne estas tradukeblaj en la francan, aŭ germanan, aŭ kiun ajn alian eŭropan lingvon, ĉar tutsimple en ili ne troviĝas la respondaj fakaj terminoj pro la foresto de tiuj nocioj mem en la juraj sistemoj de la koncernaj ŝtatoj. La sola racia ebleco en tiaj kazoj estas prunti la

terminon el alia lingvo kaj uzi ĝin kiel fremdan aŭ naciigitan en la propra nacia lingvo, se la strukturo de la koncerna lingvo tion permesas, aŭ kiel internaciigitan vorton en la Internacia Lingvo. Ekzemple, estas multe pli bone diri *kolĥozo*, *sovĥozo*, *artelo* k.s. surbaze de la rusaj *kolĥoz*, *sovĥoz*, *artelj*, ol traduki per „mastruma agrikultura kolektivo”, „sovetia agrikultura entrepreno”, „libervola unuiĝo por agrikultura produktado”, aŭ simile. En ĉiu okazo necesas difini kaj klarigi la terminojn konforme al la preciza signifo, kiun ili havas en la lingvo, el kiu ili estas prenitaj. Tia termino, foje enkondukita en la lingvon, donas tutcerte, almenaŭ en Esperanto, multajn eblecojn de derivado: *kolĥoza proprieto*, *kolĥozano*, *kolĥozanino*, ktp.

Plej ofte en la lingvoj de la komparataj internaj juraj sistemoj, apartenantaj al la sama jura familio (aŭ en alia lingvo se oni verkas en ĝi), troviĝas ĝeneralaj juraj terminoj por la traktataj konceptoj aŭ nocioj, sed la termino en unu lingvo ne kovras la saman koncepton aŭ nocion en la alia. Ekzemple, eĉ la plej elementaj terminoj kiel *proprieto*, *posedo*, *civila juro*, *krimo*, *kortumo*, *juĝisto*, *advokato*, *notario* kaj centoj da aliaj troviĝas ne nur en la franca, itala, germana, hispana kaj aliaj lingvoj de la romiisma jura familio, sed ankaŭ en la angla, rusa, pola, kroata kaj aliaj lingvoj de internaj juroj apartenantaj al aliaj juraj familioj. Tamen, la juraj nocioj, kiujn ili kovras, estas tre malsamaj en la respektivaj juraj sistemoj. Sekve, nur per precizaj difinoj kaj ofte per multaj aldonaj klarigoj oni povas eviti konfuzon kaj miskomprenojn.

2.2.2. Mistradukoj pro nescio

Gravaj eraroj okazas ankaŭ pro nesufiĉaj lingvoscioj kaj/aŭ nekontentigaj konoj de la komparaj juraj sistemoj.

En verko de mondkonata usona kolego la rusa *socialistiĉeskij* (socialista) estis tradukita en la angla per *social* anstataŭ per *socialist*. Rezulte la aŭtoro eksplikas sur pluraj paĝoj, ke la sovetaĵaj juĝistoj aplikas juron konforme al sia *social consciousness* (socia konscio) anstataŭ *socialist consciousness* kaj, kompreneble, pro tiu mistraduko faris komplete erarajn konkludojn. Cetere, eĉ se li estus korekte tradukinta per *socialist consciousness* (socialista konscio), li estus devinta ekspliki la sencon de tiu esprimo en la sovetaĵa teorio kaj praktiko por prezenti la ĝustan sencon en kiu ajn eksterversovetia medio, precipe en la angle parolantaj landoj.

En alia verko la rusa kriminaljura termino *umysel* (dolo) estis erare tradukita per *malice* (malico) kun simile eraraj konkludoj, ĉar en la sovetaĵa kriminala juro – same kiel en multaj aliaj kriminaljuraj sistemoj – dolo estas unu el la formoj de kulpo, dum malico povas esti unu el la konstituaj elementoj (ruse *sostav*, germane *Tatbestand*) de iuj krimoj (ekzemple malica huliganismo), kiu implicas ankaŭ dolon, dum tuta aro da krimoj povas esti perperitaj (faritaj) dole, sed sen malico.

Tiaj eraroj abundas kaj kaŭzas amason da miskomprenoj.

2.2.3. Malsameco de terminoj

Necesus atingi – kaj tio estas ebla –, ke en difinita lingvo oni uzu ĉiam la saman terminon por la sama nocio el alia jura sistemo por povi tuj identigi la nocion

en diversaj verkoj. Nun okazas, ke, depende de la personaj preferoj de la aŭtoroj, oni uzas en la sama lingvo diversajn terminojn por difinita nocio en alia jura sistemo. Tio precipe okazas en la angla kaj usona variantoj de la angla lingvo rilate la rusajn terminojn. Ekzemple, la rusa *obščënarodnoje gosudarstvo* (tutpopola ŝtato) estas tradukata per *all-people's state* aŭ *state of the entire people*, aŭ simile. La rusa *pravosposobnostj* (jura kapablo) per *juridic capacity, juridical capacity, legal capacity*; la rusa *dejesposobnostj* (agokapablo) per *capacity to act, legal capacity* (vidu la konfuzon kun jura kapablo), *capacity to enter into legal transaction*, k.s.; la rusa *umysel* (dolo) per *intent, intention, premeditation* kaj alimaniere inkluzive la jam menciitan erarigan *malice*. Same tiel pri multaj aliaj terminoj el sovetia kaj orienteŭropaj internaj juraj sistemoj.

Aliflanke ofte okazas, ke por malsamaj fakaj terminoj, indikantaj malsamajn nociojn, oni uzas unusolan en la lingvo de la traduko, kio siavice kaŭzas konfuzon. Ekzemple, la rusaj fakterminoj *rajon* (distrikto), *kraj* (teritorio) kaj *oblastj* (regiono) kelkfoje estas tradukataj per la sama angla *district* por la tri malsamaj sovetiaj nocioj. La ses jugoslaviaj respublikoj estas kelkfoje nomataj *provinces* (provincoj), dum la provincoj estas same tiel nomataj *provinces*, kio rezultigas, ke Jugoslavio konsistas el ses provincoj kaj du provincoj en unu el la provincoj, anstataŭ ses respublikoj kaj du provincoj en unu el ili. Ktp.

2.3. Eblaj Plibonigoj

Diversaj provoj estis faritaj por unuecigi la juran terminaron. Ankaŭ en la sino de la Eŭropa Konsilantaro okazis konferencoj, kiuj pritraktis tiun demandon. La rezultoj ne povis kaj verŝajne neniam povos esti tute kontentigaj pro la ĵus skizitaj kaŭzoj, sed tucerte almenaŭ io povus esti plibonigita en du stadioj:

(i) Firme unuecigi la terminaron en ĉiu unuopa nacia lingvo por la juraj konceptoj kaj nocioj de aliaj juraj sistemoj, kaj akcepti internacian transliterumadon, kiam ajn tio eblas. Tiun laboron devus entrepreni la institutoj pri internacia kaj pri kompara juro, aŭ similaj kompetentaj instancoj de diversaj landoj. La aŭtoroj, profesoroj, diplomatoj, interpretistoj, tradukistoj kaj aliaj fakuloj devus rigore observadi la terminojn tiel establitajn.

(ii) Paralele, sed precipe post tio, estus eble esplori ĝis kiu grado oni povas internacie unuecigi la juran terminologion. La neŭtrala Internacia Lingvo povus doni ankaŭ en tiu laboro grandajn servojn kiel pontolingvo kaj kiel lingvo por la bazaj juraj difinoj.

3. Problemoj kaj solvoj en la Internacia Lingvo

3.1. Karakterizoj

3.1.1. Aktuala stato

La originala kaj traduka jurfaka verkaro en la Internacia Lingvo certe ne estas granda kompare kun la jurfaka literaturo en la lingvoj de la grandaj nacioj, sed ĝi estas

tamen rimarkinda el pluraj vidpunktoj, precipe el tiu de la preparolata terminologia demando. En Esperanto jam estas publikigitaj juraj verkoj kaj konsiderinda nombro da studoj kaj artikoloj rilatantaj al historio de juro, jurisprudenco, kaj aktualaj temoj en la sfero de internacia publika juro, internacia privata juro kaj kompara juro en multaj juraj branĉoj. Gravan rolon por la evoluigado de la jura terminologio en Esperanto ludis kaj plu ludas *Internacia Jura Revuo*, organo de Internacia Esperanto-Asocio de

Juristoj, publikigata kiel 48-paĝa kajero du fojojn jare ekde 1957⁷. Aperis ankaŭ pluraj internaciaj traktatoj kaj konvencioj en internacilingva traduko, inter kiuj la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj, la Statuto de la Internacia Kortumo en Hago, la Traktato pri Limigo de Strategiaj Ofensivaj Armiloj, la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, parte la Fina Akto de Helsinki, k.a. Kvankam ankoraŭ ne ekzistas en Esperanto ia GRANDA JURA TERMINARO laŭ la modeloj de tiaj terminaroj en pluraj naciaj lingvoj, tamen troviĝas kelkaj juraj terminaroj⁸, kiuj, kune kun la fakaj terminoj uzataj en *Internacia Jura Revuo*, kontentigas la nunajn bezonojn. Paralele kun la kreskanta uzo de la Internacia Lingvo por juraj celoj, kio siavice dependas de la ĝenerala disvastiĝo de Esperanto en la mondo, plu kreskas ankaŭ la nombro de la internacilingvaj juraj terminoj laŭ la vojoj prezentotaj sube en 3.2 kaj 3.3.

3.1.2. Specifeco

Esperanto ankoraŭ ne estas – kaj verŝajne dum sufiĉe longa tempo ne estos – oficiala lingvo de kiu ajn interŝtata organizaĵo. Ĝis nun neniu internacia konvencio estas verkita en la Internacia Lingvo. Ne ekzistas unusola leĝo aŭ alispeca jurdona akto originale farita en Esperanto. Sekve, el internacilingva vidpunkto la tuta juro – ne nur la hejma de diversaj landoj, sed ankaŭ la internacia – estas „fremda juro”. Tio havas sian malavantaĝan flankon, ĉar forestas aŭtentikaj internacilingvaj difinoj pri juraj konceptoj, nocioj kaj preskriboj. Sed, kompare kun la pritraktado de kiu ajn „fremda juro” en kiu ajn nacia lingvo, tio havas ankaŭ sian avantaĝan flankon, ĉar (i) la juraj terminoj en Esperanto ne estas ŝarĝitaj de unuopaj apartaj nacilingvaj sentoj, kaj (ii) la monde internacia konsisto de la Esperantlingva komunaĵo, inkluzive la juristojn, faciligas la solvodon de terminologiaj problemoj laŭ la principo de maksimuma internacieco, konsiderante tamen la nacilingvajn sencojn kaj nuancojn de la koncernaj terminoj. La avantaĝoj superas la malavantaĝojn, se tiun malfacilan

7) Sufiĉas trarigardi la indeksojn en n-ro 1/1983 de *Internacia Jura Revuo* por konstati la ampleksojn kaj variecon de la temoj pritraktitaj en tiu revuo ĝis 1983.

8) D-ro S. Liebeck, *Juristisches Wörterbuch Deutsch-Esperanto*, Berlin, Max Haase, 1931 (ankoraŭ bone utiligebla por la germana juro, parte por la romiisma kaj eĉ sovetiisma familioj); D-ro A. Mildwurf, *Leĝa Terminaro*, IEL, Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo, 1946 (konsultebla, sed ne tre fidinda); G. Waringhien (ĉefred.), *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (PIV)*, Paris, SAT, 1970, kunaŭtoroj pri juro I. Lapenna kaj L. Roll (la aŭtoro de tiu ĉi artikolo prenas respondecon nur pri la juraj terminoj kun difinoj, kiujn li mem enkondukis, kaj pri aliaj juraj difinoj kaj ekzemploj, kiujn li mem kontrolis, kio neniel signifas, ke multaj aliaj difinoj kaj ekzemploj ne estas adekvataj); F. Munniksmas (red.), *Internacia Komerca-Ekonomika Vortaro en Naŭ Lingvoj*, Kluwer-Deventer, Nederlando, 1974 (tre bona, ĝisdata por la komercaj/ekonomiaj juraj rilatoj en la Okcidento); D-ro L. Dubravsky, *Sugestoj por Kompletigo de la Jura/Diplomatia Terminaro*, Oslo, IEAJ, 1984 (entenas novajn utilajn jurajn terminojn kaj aldonajn jurajn sencojn al kelkaj vortoj troveblaj en *PIV*).

laboron entreprenas juristoj alte kompetentaj en siaj juraj branĉoj, konsciaj pri la kondiĉiteco de la nacilingvaj juraj terminoj, kaj, krome, bonegaj sciantoj kaj de la respektivaj naciaj lingvoj kaj de Esperanto.

3.2. *Internacia Juro*

Pro la internacia identeco de la bazaj nocioj, kiel eksplikite en 2.1, en tiu ĉi jura branĉo temas pli multe pri dilemoj, ol pri veraj problemoj. La demando estas, ĉu krei fakan terminon el radikoj jam troviĝantaj en Esperanto, aŭ uzi ekzistantan radikon kun aldona faka senco, aŭ enkonduki novan terminon konforme al Regulo 15 de la Fundamento de Esperanto.

Efektive, prenante en konsideron la postulaton de jura precizeco, la principon de internacieco kaj la aglutinan karakteron de Esperanto, necesis kaj plu necesos apliki jen unu, jen alian eblecon por trovi la plej adekvatan terminologian solvon, ebligantan ankaŭ, se iel eble, vastan derivadon el la elektita termina radiko. En ĉiu el la tri kazoj necesas doni difinojn kaj/aŭ klarigojn. Kelkaj ekzemploj ilustros la tri metodojn.

3.2.1. Ekzistantaj radikoj

Tiu ĉi metodo estas multe aplikata, interalie ankaŭ por la nomoj de diversaj interŝtataj organizaĵoj kaj de iliaj organoj aŭ instancoj. Al tiu speco de fakaj terminoj apartenas, ekzemple, juro, internacia publika juro, regiona juro, interna juro, fremda juro, juraj sistemoj, juraj familioj, komunjuro, konvencio, traktato kaj aro da aliaj por menciĝi nur la jam uzitajn en tiu ĉi artikolo, eĉ ne parolante pri tre multaj aliaj, samkarakteraj.

El la nomoj de la organizaĵoj kaj de iliaj organoj aŭ instancoj estu menciitaj nur kiel ekzemploj: Ligo de Nacioj, Unuiĝintaj Nacioj (UN), Ĝenerala Asembleo (ekz. de UN), Konsilio de Sekureco, Ekonomia kaj Socia Konsilio, Kuratoreca Konsilio, Internacia Kortumo, Internacia Labor-Organizaĵo (ILO), Internacia Organizaĵo por Civila Aviado (IOCA), Eŭropa Komunaĵo, Eŭropa Konsilantaro⁹, Konsulta Asembleo (ekz. de la Eŭropa Konsilantaro) ktp.

Oni ne ricevu la impreson, ke la enkonduko de tiaspecaj fakaj terminoj, bazitaj sur ekzistantaj Esperanto-radikoj, estis ĉiam afero tre simpla, ne postulanta kian ajn pripensadon. Eĉ se temis sole pri la nomo de iu organizaĵo aŭ de iu el ĝiaj organoj, necesis atente konsideri almenaŭ la veran sencon de la nomo kaj certgrade, la komencliterojn de ĝiaj konsistaj vortoj, por ke la mallongigo, se iel eble, respondu al la plej oftaj mallongigoj en la plimulto de naciaj lingvoj. Ekzemple, kiam en miaj unuaj postmilitaj artikoloj en Esperanto pri iu internacijura temo kaj en la verko *Aktualaj Problemoj de la Nuntempa Internacia Vivo* mi uzis la nomon „Unuiĝintaj Nacioj”, kelkaj opiniis, ke la nomo devus esti „Unuigitaj Nacioj”. Ekestis

9) Por tiu organizaĵo estas preferinda la termino „Konsilantaro”, jam delonge enkondukita, tiel ke „konsilio” estu rezervita por administra organismo en la senco donita al ĝi en *PIV*.

publika diskuto en gazetoj. Mi klarigadis, ke oni devas ne sklavece traduki el la okcidenteŭropaj oficialaj lingvoj de la Ĉarto (la ĉinan, bedaŭrinde, mi ne scias), en kiuj mankas adekvata aktiva participa formo, kaj eĉ en la rusa ĝi estus netaŭga en tia kunteksto, sed ke oni devas reflekti en Esperanto la faktan juran karakteron de UN. Ĉar la vera senco estas, ke tiuj nacioj (ŝtatoj) ja unuiĝis (bedaŭrinde, ne tre sukcese, kio estas eksterterminologia afero), sed ne estis unuigitaj de kiu ajn, mi forte pledis por Unuiĝintaj Nacioj. Tiu formo fine enkondukiĝis kaj nun ĝi estas ĝenerale uzata.

Ankaŭ pri la baza indika nomo de la tri eŭropaj ekonomiaj organizaĵoj, grandparte kunfandiĝintaj per la Traktato de 1965, estis dilemo, ĉu uzi por ili la vorton „komunumo” aŭ „komunaĵo”, ambaŭ taŭgaj laŭ la Fundamento kaj spirito de Esperanto. Jam antaŭ trideko da jaroj, kiam la aŭtoro de tiu ĉi artikolo skribis por la unua fojo ion lige kun la Pariza Traktato de la 18-a de aprilo 1951, li decidigis por „Komunaĵo”, do Eŭropa Komunaĵo pri Karbo kaj Ŝtalo. Poste, en 1957, venis la Eŭropa Komunaĵo pri Atoma Energio (Eŭratomo) kaj la Eŭropa Ekonomia Komunaĵo. La vorton „komunaĵo” favoris la fakto, ke „komunumo” estis jam delonge uzata en la senco de baza teritoria-administra unuo kaj historie kaj aktuale en multaj ŝtatoj, kaj ke necesis klare distingi inter, ekzemple, „eŭropaj komunumoj” en la senco de bazaj teritoriaj-administraj unuoj, unuflanke, kaj la novaj „Eŭropaj Komunaĵoj”, aliflanke. Krome, en ĉiuj lingvoj sciataj de la aŭtoro – kaj verŝajne ankaŭ en aliaj – oni faras tiun necesan distingon: kroate aŭ serbe *općina/opština-zajednica*, ruse *obščina-obščestvo*, angle *commune-community*, france *commune-communauté*, itale *comune-comunità*, germane *Gemeinde-Gemeinschaft*. Fine, ankaŭ en la interna juro de iuj ŝtatoj oni distingas inter la du nocioj. Ekzemple, en la jugoslavia konstitucia strukturo oni distingas inter *općina/opština* (komunumo) kaj *zajednica općina/opština* (komunaĵo de komunumoj), kaj diversaj aliaj *zajednice* (komunaĵoj).

Tiel enkondukiĝis „Komunaĵo”. En tiu senco ĝi estas difinita ankaŭ en la *Plena Ilustrita Vortaro (PIV)*. Ĝis antaŭ nelonge ĝi estis ĝenerale kaj unuforme uzata por EEK aŭ por kiu ajn el la tri eŭropaj ekonomiaj komunaĵoj, distinge de la eŭropaj komunumoj. Sed en la lastaj 3–4 jaroj oni senrespondece ekuzis por tiuj Komunaĵoj aliajn vortojn: ne nur „Komunumo”, sed ankaŭ „Komunumaro”, eĉ „Komuno” kaj „Komunoj”, per kio oni kreis kaj plu kreas absolute superfluan, neallaseblan konfuzon, malutilan al Esperanto kaj malakcepteblan en jura lingvo, kiu postulas maksimume eblan precizecon.

Unesko estas iom speciala terminologia kazo. La organizaĵo de UN por Edukado, Scienco kaj Kulturo fariĝis konata en la tuta mondo laŭ la mallongigo de sia anglalingva nomo *United Nations Educational, Scientific and Cultural Organization*: U.N.E.S.C.O. aŭ UNESCO. Kvankam ankaŭ pri ĝia nomo en Esperanto estis en la komenco iom da diskutoj, tamen tre baldaŭ post la fondiĝo en 1945 establiĝis la nomo UNESKO, skribata nuntempe ankaŭ Unesko.

3.2.2. Aldona faka senco

Laŭ tiu ĉi metodo oni utiligas ekzistantan Esperantan terminon, sed aldonas al ĝi fakjuran sencan, aŭ la necesajn pliajn sencojn. Serio B de la *Sugestoj por*

Kompletigo de la Jura/Diplomatia Termianro de D-ro L. Dubravsky¹⁰ entenas konsiderindan nombron da tiaj sencoj, facile aldoneblaj al la difinoj en *PIV*. Jen nur kelkaj el ili:

Agenturo (PIV 15): la personalo de agentejo kiel funkcia korporacio.

Aĝdojeno (PIV 200): la plejaĝulo inter samranguloj.

Bonaj servoj (PIV 980): okaze de diskutoj inter du ŝtatoj, tria ŝtato proponas siajn bonajn servojn por forigi la krizon inter la kontestantaj (disputantaj) partioj. Bonaj servoj ne estas rigardataj kiel enmiksiĝo en la internajn aferojn de la kontestantaj (disputantaj) ŝtatoj.

Diplomatia imuneco (PIV 420): ŝirmiteco de diplomatoj kontraŭ la leĝoj de la ŝtato, en kiu ili plenumas sian funkcion kaj de aliaj ŝtatoj dum oficialaj vojaĝoj.

Ĝentlemana interkonsento (PIV 366): parola, nesribita interkonsento inter diplomatoj.

Nunciaturo (PIV 750): buroo de la Apostola Nuncio en rango de ambasado.

Pupŝtato (PIV 888): ŝtato, kie suvereneco estas kontrolata de alia ŝtato.

Ankaŭ: satelita ŝtato.

Multaj aliaj ekzistantaj vortradikoj kun aldonaj fakaj sencoj estas uzataj en Esperantaj tekstoj rilatantaj al internacia juro. Jen nur kelkaj ekzemploj:

Blokado (PIV 114): efektiva izoligo de malamika marbordo per militŝipoj por preventi eniron aŭ eliron de kiu ajn ŝipo; laŭ iuj aŭtoroj, blokadon oni povas efektivigi ankaŭ per militaviadiloj.

Kompromiso (PIV 538): speciala interkonsento, per kiu du aŭ pluraj ŝtatoj submetas sian disputon al arbitracia aŭ kortuma instanco por prijuĝo.

Okupacio (PIV 761): (i) akiro de titolo (v. sube en 3.2.3.) al nenies teritorio (*territorium nullis*) per efektiva, paca, aperta posedo; (ii) ĉeesto de ŝtataj organoj (armeaj fortoj) sur teritorio de alia ŝtato kun ties konsento en tempo de paco (paca okupado), kaj (iii) posedo de malamika teritorio dum milito (milita okupacio).

Opcio (PIV 766): rajto donita al loĝantoj de cedita teritorio konservi la antaŭan ŝtatanecon, aŭ akiri tiun de la ŝtato, al kiu la teritorio estas cedita.

Rezervo (PIV 923): (i) eksplicita deklaro, per kiu subjekto de internacia juro (ŝtato aŭ alia rekonita subjekto) preventas, ke ĝiaj rajtoj estu prejudicita (v. sube en 3.2.3) pro silento (nereago); (ii) klaŭzo, per kiu unu partio limigas la akcepton de iu traktato, aŭ unuopajn preskribojn de iu traktato.

Tiuj kelkaj ekzemploj montras la grandajn eblecojn uzi ekzistantajn Esperanto-radikojn en internacijura senco, aŭ kun plia internacijura senco. Al specialistoj pri internacia juro kaj grandparte ankaŭ al aliaj juristoj ne necesas doni klarigojn; en internacijuraj tekstoj celantaj ankaŭ pli vastan publikon, ekzemple en tiu ĉi artikolo, almenaŭ minimumaj klarigoj pri la sencoj ŝajnas utilaj.

3.2.3. Novaj terminoj

Se ne eblas solvi iun terminologian demandon laŭ la du prezentitaj metodoj, necesas enkonduki novan terminon. En la kunligitaj sferoj de internacia juro,

10) *Op. cit.* en n. 8.

internaciaj rilatoj kaj diplomatio abundo da necesaj terminoj estas enkondukitaj post la Dua Mondmilito. Tio okazis laŭgrade, paralele kun la ampleksiĝanta pritraktado de internacijuraj/diplomatiaj temoj en Esperanto ne nur en *Internacia Jura Revuo* kaj en aliaj periodaĵoj aŭ kolektoj de artikoloj kaj studoj¹¹, sed ankaŭ en prelegoj kadre de la iama Internacia Somera Universitato, ekster tiu kadro de diverslandaj universitatoj¹² kun nacilingvaj tradukoj, kaj multnombraj aliloke.

Sufiĉas nur kelkaj el la multaj kazoj por montri kial necesis enkonduki novajn terminojn. Tipaj ekzemploj estas: asembleo, sesio, konciliacio kaj mediacio. Neniu el tiuj vortoj troviĝis en la *Plena Vortaro (PV)* de E. Grosjean-Maupin, la plej granda kaj valora antaŭ 1953.

Asembleo/sesio. En la komenco mi uzis „kunveno” por tiu ĉeforgano de UN, laŭ la principo en 3.2.2. Poste montriĝis, ke tamen necesas distingi inter nomo de organo kaj ordinara kunveno. Sekve, jam en la menciita libro *Aktualaj Problemoj de la Nuntempa Internacia Vivo* (1952) mi ekuzis por tiu organo la terminon „asambleo”. Post la apero de la *Suplemento* de G. Waringhien al *PV*, pro lingva disciplino mi ŝanĝis al „asambleo”¹³. Samtempe montriĝis, ke necesas distingi inter unufoja kunveno aŭ kunsido, unuflanke, kaj serio da tiaj kunvenoj aŭ kunsidoj, aliflanke. Tiel estis enkondukita la termino „sesio”. Do, tute klare: la Dua Kunveno de la Tria Sesio de la Ĝenerala Asembleo de UN, anstataŭ la tute malklara: la Dua Kunveno de la Tria Kunveno de la Ĝenerala Kunveno de UN. Tamen, ankaŭ tion oni siatempe devis klarigadi al tiuj, kiuj riproĉe demandadis kial ni havu du „superflujajn” neologismojn „aldone al la samsenca” kunmetaĵo „kunveno”. Tiel ĉiam okazas, kiam nefakuloj, kvankam eble eĉ bonaj sciantoj de Esperanto, enmiksiĝas en demandojn, pri kiuj ili ne kompetentas. Ambaŭ terminoj nun troviĝas en *PIV* kaj estas ĝenerale uzataj. Tial ili jam apartenas al la kategorio de ekzistantaj radikoj.

Mediacio/konciliacio. Skribante en la fruaj kvindekaj jaroj pri la pacaj metodoj por solvado de interŝtataj disputoj, mi iom hezitis, ĉu uzi en Esperanto la vortojn „perado” kaj „pacigo” konforme al la principo en 3.2.2, aŭ apliki Regulon 15 de la Fundamento kaj enkonduki la tre internaciigitajn terminojn „mediacio” kaj „konciliacio”, laŭ la francaj *médiation* kaj *conciliation*, kaj la anglaj *mediation* kaj *conciliation*. Pro la tre vasta uzado de „perado” kaj „pacigo” kun diversaj nuancoj, kiel ankaŭ pro la specifeco de tiuj du metodoj en internacia juro (kaj ankaŭ ekster tiu jura branĉo), mi decidiĝis enkonduki la terminojn „mediacio” kaj „konciliacio” en la sencoj eksplikitaj sur p-oj 55–56 de *Aktualaj Problemoj*. La du terminoj poste eniris en la Esperanto-tradukon de ĉap. VI de la Ĉarto de UN pri Paca Solvado de Disputoj.

„Mediacio” kun bona ĝenerala difino troviĝas en *PIV*, sed „konciliacio” forestas. Tial, konciza ekspliko: diference de la mediacia metodo, laŭ la konciliacia la pacigan rolon ludas konciliacia komisiono konsistanta el malpara nombro da

11) Ekzemple en *Somera Universitato Malmö 1948*, Rickmansworth, 1949; Paul Neergaard (red.), *Sciencaj Studoj*, Kopenhago, ISAE, 1958; H. Behrman (kompilinto), *La mondpercepto de la modernaj natursciencoj*, Nürnberg, 1967; *Internacia Scienca Revuo*.

12) Ekzemple en Sorbonne (Parizo), Reykjavik (Islando) kaj en la finnaj universitatoj.

13) Bedaŭrinde, la ekzemplo donita en la *Suplemento* kaj ripetita en *PIV* – la *Asembleo de Unesko* – ne estas ĝusta, ĉar la koncerna organo de Unesko estas *Ĝenerala Konferenco*, ne *Asembleo*.

neŭtralaj kompetentuloj (famaj juristoj kaj ev. aliaj fakuloj), elektitaj de la disputantaj partioj. La konciliacia komisiono proponas solvon, kiun la partioj povas akcepti aŭ rifuzi. En la lasta okazo la komisiono povas proponi alian solvon, eventuale plian, se ankaŭ la dua estas rifuzita. Tiu paciga metodo estas pli ŝatata, ol mediacio.

Pluraj novaj internacijuraj terminoj kun taŭgaj difinoj troviĝas en Serio A de la *Sugestoj* de D-ro Dubravszky. Jen kelkaj: denonci, desavui, designi, detento, devoluacio, dispensi, konferi, notifikii, portofolio, preamblo, ŝmugli, talvego, k.a.

El aliaj necesaj terminoj estu koncize difinitaj nur la du uzitaj supre en 3.2.2: „titlo” kaj „prejudico”.

Titlo (latine *titulus*, france *titre*, angle *title*, itale *titolo*, kaj internaciigite ankaŭ en aliaj lingvoj) estas jura kaŭzo aŭ bazo de iu rajto. En la difino de „okupacio”

(i) en 3.2.2, la efektiva, paca, aperta posedo de nenies teritorio estas la titlo por akiro de tiu teritorio. En Esperanto, same kiel en kelkaj naciaj lingvoj, oni eble povus uzi „titolo” por tiu jura nocio, sed „titlo” estas preferinda por eviti konfuzojn: „titlo je titolo” estas klara, „titolo je titolo” malklara.

Prejudico (angle *prejudice*, france *préjudice*, itale *pregiudizio*, internaciigite ankaŭ en aliaj lingvoj, precipe en adjektiva kaj adverba formoj) egalas al antaŭjuĝo, sed en jura senco ĝi signifas materian aŭ moralan damaĝon, kaŭzitan per erara opinio bazita sur neadekvataj faktoj. Uzata ĉefe en negativa formo (sen prejudico, senprejudice) por preventi tiajn damaĝajn sekvojn, kiel en la difino pri „rezervo” (i) en 3.2.2. En tiu senco ŝtatoj deklaras ion sen prejudico por siaj rajtoj, ekz. rekonas ian damaĝon sen prejudico rilate sian respondecon; aŭ partoprenas ian konferencon sen prejudici la akcepton aŭ malakcepton de ĝiaj decidoj. Uzi la vortojn „antaŭjuĝo” kaj derivaĵojn ne estas eble, ĉar en Esperanto „antaŭjuĝo” ne povas indiki la damaĝon kaŭzitan de antaŭjuĝo. „Prejudico” troviĝas en la *Sugestoj* de Dubravszky, sed la supraj aldonaj klarigoj montras kial necesis enkonduki tiun terminon.

3.3. *Kompara kaj Internacia Juro*

En la sfero de kompara juro, necese inkluzivanta internacian juron, la situacio estas pli komplika.

Kompreneble, ankaŭ verkante en la Internacia Lingvo la aŭtoroj renkontas malfacilaĵojn, kiujn, pro la prezentita objektiva malsameco de signifoj en internaj juroj, neniuj lingvoj povas plene solvi. Tamen, la malfacilaĵoj estas multe malpli grandaj pro la neŝarĝiteco de la internacilingvaj terminoj per nacilingvaj sencoj, ol en la naciaj lingvoj. La ĉefa problemoj estas difini la jurajn terminojn vaste, sed ne pli vaste ol nepre necese, por ke ili maksimume precize kovru la koncernajn jurajn konceptojn kaj nociojn en la kvar juraj familioj (ekz. proprieto, krimo), aŭ almenaŭ en tri aŭ du el ili (ekz. dolo, civila juro), aŭ eĉ nur en unusola (ekz. ekvito). Tio ebligas la uzon de la sama termino pro tradukado de juraj tekstoj aŭ pritraktado de juraj temoj rilatantaj al ĉiuj aŭ al la respektivaj juraj familioj kaj iliaj internaj juroj. Post la jam faritaj analizoj, apenaŭ necesas aldoni, ke, aplikante iun juran terminon al difinita jura familio aŭ interna juro, necesas klarigi la precizan senco, kiun ĝi havas en tiu familio aŭ interna juro. Krome, se iu jura nocio – kaj tial ankaŭ la termino

– ekzistas en iu interna juro, sed ne en aliaj, la plej taŭga solvo estas enkonduki en Esperanton tian nacilingvan terminon en internaciigita formo (ekz. *solicitoro*, *soveto*), aŭ uzi ekzistantan Esperantan vorton kun aldono, parenteze, de la originala nacilingva termino (ekz. „kontraŭjura ordinara hommortigo” /*manslaughter*/ distinge de „antaŭplanita aŭ antaŭpripensita hommortigo” /*murder*/ en la angla juro)¹⁴.

Sur tiu ĉi kampo ekzistas tri specoj de terminoj en Esperanto: (i) ĝeneralaj vortoj uzataj en jura senco, (ii) juraj terminoj en ĝenerala uzo, kaj (iii) specifaj terminoj uzataj ekskluzive aŭ preskaŭ ekskluzive por juraj celoj. Plian fojon estu donitaj nur kelkaj ekzemploj por klarigi la karakteron de ĉiu el la tri grupoj.

3.3.1. Ĝeneralaj vortoj en faka senco

Ekster la juristaj medioj verŝajne troviĝas nur tre malmultaj personoj, kiuj scias, ke „aĵo” havas specialan, tre gravan juran sencon en ĉiuj juraj branĉoj, precipe en civila juro. Tamen, en tiu senco ĝi estas uzata almenaŭ ekde 1931, kiam D-ro Liebeck difinis ĝin en sia *Juristisches Wörterbuch* (Jura Vortaro): „aĵoj en la senco de la leĝo estas nur (konkretaj) materiaj objektoj”. Tio estas traduko de difino de la germana *Sache* laŭ germana juro, sed bonege uzebla ankaŭ en aliaj juraj sistemoj. Tiel ni havas: movebla aĵo, nemovebla aĵo, individue difinita aĵo, genre difinita aĵo, konsumebla, nekonsumebla, ĉefa, akcesora aĵoj ktp. Alia afero estas kian precizan sencon havas tiuj terminoj en iu jura familio aŭ en unuopa interna juro. Ekzemple, ĉu elektra kurento, gaso, telefono, atoma energio k.s. estas moveblaj aĵoj, kiujn oni povas ne nur vendi, aĉeti, ktp., sed ankaŭ ŝteli, aŭ ili ne havas tian karakteron. Tion difinas la leĝoj de unuopaj ŝtatoj.

Alia tiaspeca vorto estas „teni”, iom tro ĝenerale difinita por juraj celoj en *PIV* sur p. 1026 (signifo 6). En strikte jura senco „teni” signifas havi moveblan aŭ nemoveblan aĵon sub sia fakta regado, diference de „posedi” aŭ „proprieti”.

3.3.2. Juraj terminoj en ĝenerala uzo

Al tiu grupo apartenas la ĵus menciitaj „posedi” kaj „proprieti”. En *PIV* (852 kaj 877) ambaŭ estas kontentige difinitaj kiel juraj terminoj en ĝenerala uzo, kvankam la egaligo „posedrajto=proprieto” estas malĝusta. En strikte jura senco

¹⁴) Tiu ĉi ekzemplo ankaŭ montras kiel atente oni devas uzi jurajn esprimojn. Por *manslaughter* ne ekzistas ekvivalento en romiisma kaj sovetiisma juraj familioj, ĉar *manslaughter* povas esti perpetrita ne nur per kriminaljura kulpa neglekto (ekz. kontraŭleĝa tro rapida veturado), sed ankaŭ en stato de ekscitiĝo kaŭzita de la viktimo per provoko; aŭ pro akcidenta koincido (ekz. pugnobato sen intenco mortigi aŭ kaŭzi gravan damaĝon al la sano, sed la viktimo mortas); aŭ en kazo de malaltigita kriminala respondeco pro mensa malsano. En la internaj juroj de la romiisma kaj sovetiisma familioj parto de la agoj entenataj en la nocio *manslaughter* estas kvalifikita kiel neglekta hommortigo (ekz. tro rapida kontraŭleĝa veturado), kaj la aliaj kiel dola hommortigo (murdo) simpla, aŭ sub malgravigaj cirkonstancoj, aŭ kiel dola grava korpdamaĝo, rezultiganta morton, aŭ kiel murdo perpetrita en stato de malaltigita kriminala respondeco. Oni ne forgesu, ke „dolo” ne estas konata en la angla/usona komunjura sistemoj, kaj ke ankaŭ „neglekto” en la romiisma kaj sovetiisma sistemoj ne estas identa kun la komunjura.

posedrajto ne estas egala al proprieto, sed io alia. Por nejuristoj estas utile iom ekspliki la diferencon.

„Posedo” estas fakta plenumado de povoj ligitaj al iu rajto kaj konduto de la posedanto kiel titlohavanto (v. en 3.2.2) senkonsidere al la valideco de la titolo. En la romia juro necesis *corpus*, t.e. la fakta tenado de la aĵo, kaj *animus*, t.e. la jure rekonita volo realigadi la povon en sia nomo. Diference, simpla tenado (*detentio*) estis fakta tenado de la aĵo sen la volo teni ĝin kiel sian (*possessio naturalis* = natura posedo). Tial ne nur ŝtelisto, sed ankaŭ luprenanto, lombardisto k.a. estis tenantoj, ne posedantoj.

Laŭ la moderna koncepto, enirinta, interalie, en la svisan kaj germanan civilajn kodojn, ekzistas du specoj de posedo: proprieta posedo (*Eigenbesitz*) kaj uzo-posedo (*Fremdbesitz*). La proprieta posedo egalas al la romia: la posedanto kondutas al la aĵo kiel al sia. Male, se temas pri uzoposedo, la posedanto ne kondutas kiel proprieto de la aĵo, sed rilate al ĝi plenumas iajn faktajn agojn en sia intereso: luprenanto, uzoprenanto, titlohavanto de servitudo, lombardisto estas posedantoj de la respektivaj rajtoj, kaj ĝuas ne proprietan, sed posedan juran protekton. Nur la proprieta posedo povas transformiĝi en proprieton tra uzukapo sub difinitaj kondiĉoj. Tial ni havas ankaŭ en Esperanto: proprieto, posedo de aĵo aŭ rajto, simpla fakta tenado sen posedaj rajtoj.

3.3.3. Specifaj terminoj

Temas pri terminoj indikantaj specife jurajn nociojn, malofte uzataj ekster prijuraj tekstoj. En *PIV* estas sufiĉe multaj kun tia karaktero, ekzemple: asizo, ekscpecio, fideikomiso, promulgi, servitudo, uzukapo kaj aliaj tiaspecaj. Unu el ili estas ankaŭ „transakcio”, kiu tamen bezonas kompletigon per plia senco en civila juro: ago aŭ neago kaŭzanta establon, modifon aŭ ĉesigon de rajtoj kaj devoj. Pluraj el la laste enkondukitaj, ne troviĝantaj en *PIV*, estas adekvate difinitaj en la *Sugestoj* de Dubravszky, ekzemple: faŭto, inkvesto, inserti, konivi, kontravencio, perpetri, rehabiliti, solliciti, stipuli, k.a. Multaj pliaj estas uzataj (kun piednotaj klarigoj) en la Esperanta literaturo pri juraj aferoj, sed ankoraŭ neregistritaj en aparta terminaro. Jen 2–3 el la multaj, kiujn la aŭtoro jam uzis plurfoje.

Restitucio: restrarigo de stato (situacio) kiel ĝi ekzistis antaŭ la perpetro de kontraŭjura ago.

Sukcedo (latine *successio*): transpaso de la tuta havaĵo (proprietaj kaj aliaj rajtoj) de mortinta persono al unu aŭ pluraj vivantaj personoj; analoge: transpaso de havaĵo de malaperinta jura persono al ekzistanta aŭ ĵus formita alia jura persono; analoge: en internacia juro transpaso de la rajtoj kaj devoj de malaperinta ŝtato al nove formitaj ŝtatoj sur ĝia teritorio, aŭ entute transpaso de rajtoj kaj devoj de unu ŝtato al alia(j) pro teritoriaj ŝanĝoj.

Udienvo (itale *udienza*, france *audience*, angle *hearing*, ruse *razbirateľstvo /dela/*, kroat-serbe *rasprava*): konsidero de jura afero fare de kortumo aŭ de alia juĝa instanco en publika aŭ nepublika kunsido en ĉeesto de la partioj.

3.4. Komunaj Terminoj kaj Latinaj Maksimoj

Necesas atentigi, sed certe ne klarigi, ke multaj el la samaj jurfakaj terminoj estas aplikataj kaj al internacia juro kaj al kompara/interna juro, sed kun malsamaj signifoj, ŝuldataj al la esencaj diferencoj inter la du grandaj juraj tavoloj – la internacia kaj la interna – pro kio ĉiu el ili estas pritraktata aparte. Krome, en verkoj pri internacia juro kaj en tiuj rilatantaj al la romiisma familio, grandparte ankaŭ al la komunjura kaj sovetiisma¹⁵, oni povas sukcese utiligi ankaŭ latinajn maksimumojn, eventuale kun Esperantaj tradukoj aŭ eksplikoj. Ekzemple:

Ad hoc: por aparta aŭ speciala celo.

Accessio cedit principali: akcesora aĵo, se aligita al ĉefa aĵo, fariĝas parto de la ĉefa (masto fariĝas parto de ŝipo).

Audiatur et altera pars: estu aŭdita ankaŭ la alia flanko; pli strikte: neniu estu kondamnita antaŭ ol oni donis al li la eblecon aŭdigi siajn eksplikojn kaj argumentojn.

Ex aequo et bono: solvo de disputo laŭ principo de aktuala justeco, malatentante, se necese, la preskribojn de pozitiva juro.

Nullum crimen sine lege: nenia krimo sen leĝo, t.e. se jam ekzistanta leĝo ne difinas iun agon aŭ neagon kiel krimon.

Res judicata: decidita, prijuĝita afero, kiun oni ne rajtas reiniciati antaŭ kiu ajn juĝa instanco.

Res nullius: nenies aĵo, t.e. aĵo super kiu neniu havas ian ajn rajton.

Ultra vires: ekster laŭjura povo aŭ ekster jurisdikcio.

Intra vires: enkadre de rajto aŭ jurisdikcio.

3.5. Terminologia Disciplino

Grandega laboro jam estas plenumita rilate la Esperantlingvan juran terminologion. Plua laboro estas farata. Ankoraŭ multo estas farendata. Inter la internacilingve parolanta juristaro troviĝas specialistoj pri internacia juro kaj pri unuopaj branĉoj de internaj juroj, apartenantaj al tri el la kvar grandaj juraj familioj, bedaŭrinde ankoraŭ ne al la islama. Pro tiu multflankeco la tuto konsistigas grandegan kolektivan juran scion, veran, aktualan kaj, eĉ pli, potencialan jursciencan kapitalon. Oni povas ĝin plene ekspluati per kreskigo de la nombro de kompetentaj juristoj plene regantaj la Internacian Lingvon kaj ĝian juran terminologion; per altigo de la ĝenerala lingva nivelo; per strikta observado de la terminologia disciplino.

Tio signifas, ke ne nur juristoj verkantaj en la Internacia Lingvo devas uzi la jam establitajn jurajn terminojn en la difinitaj internacilingvaj sencoj, sed ankaŭ ekster la jura medio oni nepre devas respekti ilin. Devus ne okazi, kiel kelkfoje okazas, ke jure nekompetentaj personoj pro nescio aŭ pro personaj kapricoj subite ekuzas alian terminon anstataŭ la establita por la sama nocio. Per tio oni ne nur kreas superfluan konfuzon, sed ankaŭ minacas la lingvan unuecon. Kiel en aliaj lingvoj, ankaŭ

15) Bedaŭrinde, la islaman mi ne konas sufiĉe por povi prijuĝi.

en Esperanto al jura terminologio estas afero de kompetentaj juristoj, samtempe kompetentaj sciintoj de la lingvo. Tio ne estas ia „privilegio”, sed respondeca devo. Identan devon havas specialistoj pri aliaj sciencaj branĉoj en rilato al la respektivaj fakaj terminoj. La aliaj helpe apliku.

4. KONKLUDO

El ĉio dirita almenaŭ du koncizaj konkludoj altrudiĝas:

(i) La Internacia Lingvo jam montriĝis escepte taŭga instrumento de jura komunikado. Tio ŝuldiĝas al la strukturo de tiu lingvo, kies pozitivaj trajtoj estas: fleksebleco permesanta esprimi en ĝi ĉiujn nuancojn de la penso kaj, okaze de citaĵoj, adapti ĝin ĝis maksimumo eĉ al la stilo de la originalo; ĝia aglutina karaktero, kiu prezentas praktike senfinajn eblecojn de derivado; la facileco, per kiu oni povas enkonduki novajn necesajn fakajn esprimojn en ĝin.

(ii) Aparte en internacia juro, la utiligo de la Internacia Lingvo kiel la sola lingvo de internaciaj konvencioj en la larĝa senco de la vorto forigus la problemojn, kiujn nuntempe kaŭzas la kreskanta multlingveco en la juro de traktatoj. En la kazo de organizaĵoj kun supernacia karaktero, kia estas iugrade la nuna EEK, la verkado de juraj tekstoj kun precizaj difinoj en unusola, vere internacia lingvo malaperigus, se ne komplete, do almenaŭ grandparte la nunajn oftajn konfuzojn kaj misinterpretadojn. Espereble, tio okazos iam en la estonteco, paralele kun la iom-post-ioma anstataŭigado de la naciaj lingvoj en internaciaj rilatoj per unusola, nacie neŭtrala, tuthoma lingvo: la Internacia Lingvo (Esperanto).

TRIDEK JAROJ DE INTERNACIA ESPERANTO- ASOCIO DE JURISTOJ (IEAJ)

1. Konciza Historia Enkonduko

Jam en 1906, dum la Dua UK en Ĝenevo, estis fondita Internacia Societo de Esperantistoj Juristoj (ISEJ). La iniciatinto estis advokato A. Michaux, la fama organizinto de la Unua Kongreso de Esperanto en Bulonjo ĉe Maro. Li fariĝis ĝia unua prezidanto, dum D-ro P. Degon, advokato en Neuilly-sur-Seine, estis elektita kiel sekretario. la organo de ISEJ estis *La Revuo*. Post la Unua Mondmilito la societeton gvidis D-ro J. Litauer, advokato en Varsovio, kaj D-ro S. Liebeck, advokato-notario en Berlino, dum advokato Chapron el Le Mans estis ĝia ĝenerala sekretario. La kunvenoj de ISEJ okazadis dum la universalaj kongresoj de Esperanto. En 1931 aperis la 86-paĝa *Juristisches Wörterbuch Deutsch-Esperanto* (Jura Vortaro Germana-Esperanto) de D-ro S. Liebeck. Tiu valora verko estas plu bonege utiligebla por juraj sistemoj bazitaj sur romia juro. Kiam Hitler malpermesis Esperanton en Germanio, ankaŭ ISEJ ĉesis funkcii.

La nuna Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj (IEAJ) estis fondita en 1957 dum la 42-a UK de Esperanto en Marseille, laŭ iniciato de la subskribinto, kiu fariĝis ĝia prezidanto kaj restis en tiu funkcio seninterrompe dum la pasintaj 30 jaroj. La aliaj membroj de la unua Plenuma Komitato (PK) estis D-ro W. Hermann, juĝisto (FR Germanio) kaj advokato R. Sakowicz (Pollando), vicprezidantoj; advokato J. Duthilleul (Francio), sekretario. La konsisto de la Plenuma Komitato plurfoje ŝanĝiĝis ĉu pro forpasoj, ĉu pro alta aĝo aŭ aliaj kaŭzoj. La nuna PK, elektita en 1978, konsistas el la subskribinto (Britio) kiel prezidanto, Prof. D-ro St. C. Anagnostakis (Grekio) kaj Ambasadoro Ralph Harry (Aŭstralio) kiel vicprezidantoj, kaj D-ro Klaus Perko (Aŭstrio) kiel sekretario-kasisto.

Jam fine de 1957 IEAJ havis 70 membrojn en 27 landoj. La maksimuman membro-nombrojn ĝi atingis en 1972, kiam ĝi havis 208 membrojn en 31 landoj. Pli ol la duono troviĝis tiam en Orienta Eŭropo kaj, bedaŭrinde, praktike neniu el ili kiam ajn povis pagi sian jaran kotizon al la Asocio, tiel ke fakte ili estis pli fikciaj ol realaj membroj. Kvankam en 1975–76 pro la financa situacio IEAJ necesis insisti, ke pago de kotizo estas kondiĉo de membreco konforme al la Statuto, tamen neniu el ili pagis kaj sekve devis esti rigardataj kiel ekzigintaj. Tio kaŭzis la perdon de tre multnombraj fikciaj membroj, sed tio ankaŭ ebligis al la Asocio sanigi la financojn kaj agadi pli efike surbaze de la reala membro-nombro. La nuna stato vidiĝos el la Raporto de la sekretario-kasisto al la ĉefkunveno en Graz.

Tuj post la fondiĝo IEAJ faris kontrakton pri kunlaboro kun UEA kaj en 1961 ĝi fariĝis aliĝinta faka neŭtrala asocio de UEA, sed en 1974 la ĉefkunveno unuanime decidis ekŝi el UEA pro la konataj eventoj okazintaj en UEA dum la UK de Hamburgo. La fondkunveno de 1957 interalie akceptis la Statuton de IEAJ. Tiu nur 10-artikola dokumento restis senŝanĝa ĝis nun, ebligis glatan funkciadon de la Asocio kaj bonege servis kiel bazo de ĉiuj ĝiaj agadoj.

Laŭ Art. 2 de la Statuto, la celoj de IEAJ estas: (a) disvastigi la Internacian Lingvon inter la juristoj kaj antaŭenigi ĝian praktikan uzadon en la internaciaj rilatoj de juristoj; (b) helpi la utiligon de la Internacia Lingvo por fakaj, profesiaj kaj sciencaj celoj de la membroj.

La realigado de la celoj estas prezentita en la subaj sekcioj.

2. Kontribuo al Juraj Sciencoj

Ekde 1957 la kontaktoj inter la membroj, diskutoj pri juraj problemoj, inkluzive terminologiajn, okazadis skribe, per cirkuleroj kaj dum la jaraj kunvenoj de IEAJ. Aldone, en 1958 la Asocio enkondukis publikajn kunvenojn dum la universalaj kongresoj de Esperanto, kiam ajn la lokaj cirkonstancoj permesis tion. Al ili estis invitataj ĉiuj membroj de la Asocio kaj kongresurbaj eminentaj juristoj por pritrakti internacijuran kaj komparjuratan temon. La oficialaj lingvoj de tiuj kunvenoj estis Esperanto kaj la nacia lingvo de la koncerna lando kun simultana interpretado. Jen la pritraktita temaro por la periodo 1958–1968:

1958, Mainz (FR Germanio): Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj;

1960, Bruxelles (Belgio): La Pozicio de Advokato en Diversaj Landoj;

1961, Harrogate (Britio): La Respondeco de la Aŭtoposedantoj;

1962, København (Danlando): Evoluoj en la Soveta Juro 1958–1962;

1964, Den Haag (Nederlando): La Koncepto de Proprieto kaj Ĝiaj Ĉefaj Limigoj en Diversaj Landoj;

1966, Budapest (Hungario): La Principo de Egalrajteco de Seksoj en la Familia Juro de Diversaj Landoj;

1967, Rotterdam (Nederlando): La Ŝtataneco laŭ la Juro de Diversaj Landoj;

1968, Madrid (Hispanio): La Rajto de Kunveno kaj Organiziĝo laŭ la Juro de Diversaj Landoj.

Ofte la kunvenoj okazis en la ejoj de la respektivaj landaj aŭ lokaj juristaj organizaĵoj. Aparte menciinda estas la grandega kunveno de 1966 en Budapeŝto, okazinta en la ejoj de la Hungara Jurista Asocio kaj organizita de ĝia sekretario kaj tiama sekretario de IEAJ, D-ro Lajos Márton, kaj de D-ro J. Máttéffy, juĝisto de la Supera Kortumo de Hungario kaj membro de IEAJ. Preskaŭ ĉiam okazadis vizitoj al la lokaj kortumoj, juraj fakultatoj kaj aliaj juraj institucioj. La plej sukcesa estis tiu de 1969 en Helsinko (Finnlando), organizita de E. Gadd, juĝisto de la Supera Kortumo de Finnlando kaj tiama vicprezidanto de IEAJ.

Tiuj kunvenoj, vizitoj al juraj institucioj kaj alispecaj kontaktoj ne sole vastigis jurajn sciojn, sed ankaŭ kontribuis al diskonigo de Esperanto en juristaj medioj.

Nur en 1966 povis komenciĝi la publikigado de *Internacia Jura Revuo (IJR)* kiel organo de IEAJ. La unuaj 10 kajeroj – meze 28-paĝaj, grandformataj – aperis en Budapeŝto sub la redaktoreco de D-ro Lajos Márton. Pro financaj kaŭzoj, en 1969 IJR ĉesis aperadi, sed en 1975 ĝi povis reaperi en Oslo (Norvegio) en la nuna formato, bele presita en la presejo de la Universitata Biblioteko en Oslo dank’ al la granda helpo de Kand. jur. T. A. Høeg, membro de IEAJ. N-roj 11 kaj 12 (1 kaj 2 de la nova serio) estis redaktitaj de D-ro L. Márton; n-ro 13 (1/76) de li kaj de la subskribinto; n-roj 14–21 (2/76 – 1/80) nur de la subskribinto. Ekde n-ro 22 (2/80) la revuon redaktas D-ro K. Perko kaj la teknika redaktoro plu restas Kand. jur. T. A. Høeg. En la nuna serio IJR havas 48 paĝojn plus 4 kovrilpaĝojn kaj aperadas du fojojn jare. Ĝis la fino de 1986 entute aperis 34 kajeroj, el kiuj 24 en la nuna serio.

Internacia Jura Revuo pritraktas demandojn en la sferoj de jurhistorio, jurisprudenco, internacia juro (publika kaj privata) kaj kompara juro. La tuto entenataj en la ĝisnunaj 34 kajeroj prezentas valoregan jursciencan materialon ekde la *Leĝlibro de la Gulatinga Provinco* kaj la antikvaj *Asiriaj Leĝoj*, tra multaj juraj konceptoj pritraktitaj kompare, ĝis spacjuro. Sufiĉas ĵeti eĉ nur supraĵan rigardon al la sistema indekso por konstati la grandan variecon de la pridiskutitaj demandoj. Pluraj artikoloj, precipe tiuj rilatantaj al la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj, aperis poste en juraj kaj aliaj periodaĵoj en nacilingvaj tradukoj, kio siavice helpis ankaŭ al diskonigo de Esperanto en juristaj medioj. Inter la sesdeko da kunlaborantoj el dudeko da landoj troviĝis profesoroj pri juro, juĝistoj de kortumoj, inkluzive de superaj, diplomatoj, advokatoj, notarioj kaj aliaj kompetentaj juristoj. Multaj el la publikigitaj artikoloj, precipe tiuj rilatantaj al kompara juro, havis ankaŭ praktikan valoron por praktikantaj juristoj, membroj de IEAJ.

Aldone al artikoloj *Internacia Jura Revuo* daŭre informadis pri gravaj internaciaj traktatoj kaj pri novaj leĝoj en diversaj landoj. Krome, en la rubriko *Recenzoj* ĝi kritike prezentis multajn elstarajn prijurajn verkojn, publikigitajn en naciaj lingvoj.

Kelkaj prijuraj verkoj en Esperanto estis eldonitaj antaŭ la fondiĝo de IEAJ. En 1919 aperis la Esperanto-traduko de la *Pakto de la Ligo de Nacioj, Kriminologio*, verko de R. Vambéry, aperis en 1924 en traduko de V. Toth. La traktaĵo *Krimuloj Profesiaj* de J. Vavrovsky estis publikigita en 1930. La libro *Aktualaj Problemoj de la Nuntempa Internacia Vivo* de la subskribinto, originale verkita en Esperanto, aperis en 1952. IEAJ mem publikigis la kolektivan verkon *La Pozicio de Advokato en Diversaj Landoj* originale en Esperanto (1960) kaj la Esperanto-tradukojn de la *Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj* (unuafaĵe en 1963, poste aliaj eldonoj), de la *Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj* kaj *Statuto de la Internacia Kortumo* (1970, tradukintoj R. Harry, E. Svane kaj la subskribinto). La amendita teksto de la Ĉarto kaj la Statuto en reviziitaj Esperanto-tradukoj estis eldonitaj de la Oficejo de Publika Informado de Unuiĝintaj Nacioj en New York en 1979. Prespretaj estas aliaj internaciaj konvencioj, inter kiuj la *Konvencio pri Diplomatiaj Rilatoj* kaj *Konvencio pri la Juro de Traktatoj*, ambaŭ en traduko de Ambasadoro Ralph Harry, vicprezidanto de IEAJ.

Tiu abunda jura materialo – ĉu originale verkita en la Internacia Lingvo, ĉu aperinta en Esperanto-traduko – konsiderinde evoluigis la *esperantlingvan*

juran terminologion, kio siavice estas unu el la pliaj rimarkindaj atingoj de IEAJ sur la jurscienca kampo. Krome, la subskribinto kaj D-ro L. Röhl, tiama sekretario de IEAJ, donis grandan helpon al Prof. G. Waringhien, la ĉefredaktoro de *Plena Ilustrita Vortaro*, en difinado de novaj juraj terminoj kaj precizigado de la jam troviĝintaj en la *Plena Vortaro*. En 1984 aperis *Sugestoj por Kompletigo de la Jura-Diplomatia Terminaro* de D-ro Ladislao Dubravszky kun antaŭparolo de la subskribinto. Ĝi estis la unua kontribuado de IEAJ al la Jubilea Esperanto-Jaro (JEJ). La ĵus publikigita (1987) dua kaj lasta kontribuado al JEJ, estas la traktaĵo *Juraj Terminologiaj Problemoj kun Aparta Konsidero al Esperantlingva Jura Terminologio* de la subskribinto kun antaŭparolo de D-ro K. Perko. Kiel la titolo indikas, la traktaĵo unue ekzamenas la ĝeneralajn jurajn terminologiajn problemojn en naciaj lingvoj, grandparte nevenkeblajn sur la kampo de kompara juro, kaj en la cetera parto, surbaze de la notindaj ĝisnunaj terminologiaj atingoj en la Internacia Lingvo, montras la vojon por plua evoluigo de la esperantlingva jura terminologio.

3. Praktikaj Servoj

Granda parto de la materialoj publikigitaj en *Internacia Jura Revuo* havis praktikan valoron por la membroj, precipe por advokatoj bezonantaj fidindajn informojn pri iu jura problemo en alilanda juro. Aldone, per rektaj kontaktoj la membroj ofte helpis kaj plu helpas unu la alian en sia profesia laboro per respondado al demandoj pri alilandaj juraj preskriboj rilatantaj al konkretaj kazoj. Ne ekzistas statistiko pri la nombro de tiaj servoj, sed ĝi verŝajne estis sufiĉe granda. Kelkaj el ili povis esti sukcese solvitaj antaŭ kortumoj aŭ aliaj aŭtoritatoj, dum en aliaj kazoj la donitaj konsultaj opinioj ebligis eviti multekostajn procesojn.

Aparte menciinda estas la kazo de Juris Sergejeviĉ Belov, sovetia esperantisto, kiun la aŭtoritatoj persekutis eĉ pro liaj kontaktoj per Esperanto kun eksterlandanoj. Li estis alterne arestita kaj kondamnita pro kontraŭsoveta agitado kaj propagando laŭ art. 70 de la Kriminala Kodo de R.S.F.S.R., sendita en la misfaman „Serbskij” Psikiatrian Instituton en Moskvo, denove kondamnita ktp. En n-ro 1/78 de *Internacia Jura Revuo* aperis bone dokumentita, longa artikolo kun ĉiuj detaloj pri tiu kazo. Jam antaŭ la publikigo de la artikolo en IJR, resumoj aperis en nacilingvaj tradukoj en gazetoj de pluraj landoj dank’ al kunlaboro de membroj de IEAJ kaj aliaj esperantistoj. Tiu kampanjo multe helpis al Amnestio Internacia, kiu estis adoptinta J. Belov kiel „malliberulon de konscienco”, atingi lian liberigon kaj elmigron el Soveta Unio.

4. Konkluda Rimarko

Verŝajne ĉiu leginto de la supra koncizega prezento de la agadoj de IEAJ konsentas, ke la Asocio faris grandegan laboron en tridek jaroj de sia ekzistado. La atingoj des pli rimarkindaj, se oni konsideras la tre malgrandajn financajn rimedojn, konsistantajn nur el kotizoj, abonoj kaj modestaj donacetoj. *Internacia Jura Revuo* estas laŭ sia enhavo favore komparebla kun bonaj nacilingvaj juraj periodaĵoj. Sen

kia ajn troigo oni povas diri, ke en la internacia esperantlingva komunaĵo ĝi estas la plej bona faka periodaĵo kaj el enhavo kaj el lingva vidpunktoj. Ĝi devus interesi ne nur ĉiujn juristojn-esperantistojn, sed ankaŭ ĉiujn aliajn klerajn esperantistojn eĉ se ili ne interesiĝas pri specife juraj demandoj, ĉar juro multrilate reflektas la ekonomiajn, sociajn kaj politikajn cirkonstancojn en unuopaj landoj. Tute speciale almenaŭ parto de internacia juro, precipe materialoj koncernantaj la homajn rajtojn kaj fundamentajn liberecojn, estas tiel ligitaj al la nuna stato kaj perspektivoj de Esperanto, ke ĉiu serioza esperantisto devas sciiĝi pri ili.

Malgraŭ ĉio-ĉi, tamen nur malgranda frakcio de juristoj-esperantistoj estas membroj de IEAJ kaj la nombro de nejuristoj, kiuj abonas la organon de la Asocio, estas neglektebla.

En la Esperanto-Movado ofte aŭdiĝas voĉoj, laŭ kiuj la utiligado de Esperanto por sciencaj kaj fakaj celoj estas la vojo, aŭ almenaŭ unu el la gravaj vojoj, por plua progresigo kaj disvastigo de la lingvo. Konsentite. Tamen, kiam per grandaj fortostreĉoj oni fakte utiligas Esperanton por sciencaj kaj fakaj celoj, kiel en la kazo de IEAJ, tion oni malatentas kaj neglektas. Estas ankaŭ fakto, ke en la sfero de juro ekzistas pli da kompetentaj juristoj, kiuj kapablas kree verkadi tutajn librojn en Esperanto, ol troviĝas juristoj kaj aliaj esperantistoj, kiuj emas aŭ povas legi ilin. Tio estas la bedaŭrinda realaĵo. Se tiu rilato inter la relative granda nombro da esperantistoj-verkistoj sur la jura kampo kaj la tre malgranda nombro da legantoj ne ŝanĝiĝos radikale, la perspektivoj por la plua utiligado de Eesperanto por juraj sciencoj kaj praktikaj celoj estas preskaŭ nulaj. Espereble tiu admono almenaŭ iom pensigos la juristojn-esperantistojn kaj, pli vaste, la esperantistaron.

En: Paul Neergaard, Christer Kiselman (red.):

Aktoj de Internacia Scienca Akademio Comenius.
Vol. 1. Pekino: Ĉina Esperanto-Eld. 1992. 118 p., p. 7–13.

LA PRINCIPO DE LEĜECO EN LA SOVETIA KAJ JUGOSLAVIA JURAJ SISTEMOJ

I. Enkonduka Rimarko

En Soveta Unio la demando pri leĝeco estis aktuala ekde la Oktobra Revolucio en 1917 ĝis niaj tagoj.

En la teorio de Lenin, kaj eĉ pli en liaj praktikaj agadoj, la marksisma koncepto pri diktaturo de la proletaro estis fakte transformita en diktaturon de la supro de la Komunista (tiutempe Bolŝevista) Partio, bazitan sur rekta perforto. La rolon de juro en tia sistemo de rekta perforto Lenin tre klare difinis en sia konata *Proleta Revolucio kaj Renegato Kautsky*: „Diktaturo estas regado bazita rekte sur perforto kaj nelimigita per kiaj ajn leĝoj. La revolucia diktaturo de la proletaro estas regado akirita kaj tenata per uzo de perforto fare de la proletaro kontraŭ la burĝaro, regado ne limigita per kiaj ajn leĝoj”. En alia okazo Lenin skribis: „La diktaturo signifas, notu unufoje por ĉiam, sinjoroj, senliman potencon, kiu baziĝas sur forto, ne sur juro”.

Tiu starpunkto estis kompletigita per nombro da dekretoj, kiuj fakte leĝigis arbitrecon, senleĝecon kaj teroron. Aparte menciindaj estas la Dekreto de la 7-a (20-a) de decembro 1917, per kiu estis fondita la Tut-Rusia Eksterordinara Komisiono por la lukto kontraŭ la Kontraŭrevolucion kaj Sabotadon (ĈEKA, kies heredanto estas la nuna KGB), kaj la Dekreto pri la Ruĝa Teroro de la 5-a de septembro 1918. Aliflanke, oni trovas en la skribaĵoj kaj paroladoj de Lenin ankaŭ pledojn por leĝeco, ĉar, kiel li foje diris, „ni vivas en maro da senleĝeco”. Jam en novembro 1918 li skizis nombron de tezoj por dekreto pri strikta observado de la leĝoj kaj emfazis, ke leĝeco devas esti fortikigita. Li ripetis la samon en pluraj aliaj okazoj, ekzemple en sia Raporto al la Naŭa Kongreso de Sovetoj en decembro 1921.

Sub la regado de Stalin la t.n. „socialisma” leĝeco fariĝis kovrilo por la plej teruraj krimoj kaj estis transformita en veran sistemon de absoluta senleĝeco. Nur post la morto de Stalin en 1953, kaj precipe post la Dudeka Kongreso de la Komunista Partio de Soveta Unio (1956), kiu postulis „fortigon de sovetia leĝeco”, komenciĝis serioza diskuto pri leĝeco en tiu lando. Aperis multaj libroj pri la temo, kaj amaso da artikoloj estis publikigitaj en la sovetiaj juraj kaj aliaj periodaĵoj. Kristaliĝis du starpunktoj: la reakcia de profesoro A. I. Denisov, laŭ kiu juro devas esti aplikata „dialektike” laŭ cirkonstancoj (t.n. *korrektirovka*, t.e. „jurkorekta” apliko fare de la aŭtoritatoj); kaj la liberala de profesoro M. S. Strogoviĉ, kiu forte kritikis la

korrektirovka-koncepton kaj insistis pri strikta aplikado de juro en ĉiuj cirkonstancoj. Formale venkis Strogoviĉ. La nuna starpunkto de la doktrino (praktiko estas alia afero) estas plej bone formulita en difino troviĝanta en *Enciklopediĉeskij Slovar' Pravovih Znanij* (Enciklopedia Vortaro de Juraj Scioj), Moskvo, 1965:

„Socialisma leĝeco estas strikta kaj firma apogo al kaj plenumo de la sovetiaj leĝoj fare de ĉiuj organoj de la sovetia ŝtato, fare de ĉiuj organizaĵoj, oficialuloj kaj civitanoj.”

Praktike identan komprenon de leĝeco havas ankaŭ la jugoslavia jura doktrino.

Tia akademia starpunkto, kvankam tre progressa en sovetiaj kondiĉoj, ĉar ĝi forĵetas la *korrektirovka*-teorion, tamen malatentis aliajn esencajn elementojn de leĝeco, inkluzive konstituciecon. Laŭ mia opinio ili estas: jura sistemo, kontrolo pri ĝusta apliko de juro, minimuma jura nivelo.

2. Esencaj Elementoj

2.1. Sistemo. Baza elemento de leĝeco estas ekzisto de jura sistemo, kiu donas adekvatajn kaj klarajn solvojn por ĉiuj eblaj juraj rilatoj. En tiu senco jura sistemo signifas kunordigitan tuton de fundamentaj juraj principoj kaj juraj normoj (preskriboj) de unuopa ŝtato*. Kie ne ekzistas jura sistemo, ne povas ekzisti leĝeco. Kaj jura vakuo kaj jura ĝangalo kun tro da juraj preskriboj, ne sistemigitaj kaj tial ofte kontraŭdiraj, estas fontoj de arbitreco.

En la diskutoj, kiuj postsekvis la Dudekan Kongreson de KPSU (1956), oni interalie emfazadis, ke la kadukeco de multaj leĝoj, la „obskura lingvaĵo” de la preskriboj kaj la internaj kontraŭdiroj kontribuis al la reĝimo de senleĝeco sub Stalin. Oni povas diri sen troigo, ke meze de la kvindekaj en Soveta Unio estis preskaŭ kompleta jura vakuo en multaj juraj branĉoj.

Male, Jugoslavion de la unuaj postmilitaj jaroj karakterizis abundego da leĝoj, dekretoj kaj aliaj normdonaj aktoj. Tre ofte okazadis, ke iu leĝo estis amendita post nuraj kelkaj semajnoj, tiam sekvis amendoj kaj korektoj de amendoj, ktp. Okazadis ankaŭ, ke tiu aŭ alia normdona akto kontraŭdiris unu la alian, tiel ke fine neniu sciis kio estas valida en difinita momento. Tia jura ĝangalo kontribuis al senleĝeco en Jugoslavio.

Intertempe en ambaŭ landoj oni faris notindajn progresojn. En Soveta Unio tuta aro da juraj branĉoj estis kodigitaj, inter ili kriminala juro, kriminala proceduro, civila juro, civila proceduro, familia juro. Tiurilate la situacio certe pliboniĝis. Ankaŭ en Jugoslavio, post multaj konstituciaj ŝanĝoj ekde 1946, la jura sistemo sufiĉe stabiliĝis surbaze de la Konstitucio de 1974. Tamen, en ambaŭ landoj tro ofte okazas ŝanĝoj en la leĝoj kaj subleĝaj aktoj.

Estas utile aldoni, ke hodiaŭ kaj la sovetia kaj la jugoslavia doktrinoj konsentas, ke jura sistemo estas antaŭkondiĉo de leĝeco. En la tre aŭtoritata verko

* Pri la aliaj signifoj de la esprimo „jura sistemo” v. I. Lapenna, *Juraj Terminologiaj Problemoj kun Aparta Konsidero al Esperantlingva Jura Terminologio*, eldono de IEAJ, 1987, p. 11 kaj sekv.

Sovetiaj Ŝtato kaj Juro (Chkhikvadze 1969) estas dirite: „La leĝaro estas la bazo de leĝeco kaj la norma premiso por reĝimo de leĝeco.”

2.2. Kontrolo. Kontrolo de leĝeco povas organiziĝi diversmaniere depende de la konstitucia strukturo de la ŝtato, kiu siavice dependas de multaj faktoroj, inkluzive la rilatojn de la politikaj fortoj, la gradon de demokrateco, la jurajn tradiciojn kaj la akceptitajn konceptojn de justeco. La instrumentoj por kontrolo de leĝeco malsamas ne nur de unu ŝtato al alia, sed ankaŭ diferencas en la tri grandaj sferoj de la sama jura sistemo: aplikado de juro fare de la kortumoj, publika administrado kaj normdonaj aktoj.

Por kontrolo de la **aplikado de juro fare de kortumoj** la kutimaj rimedoj estas apelacioj al pli altaj kortumoj (sistemo de du instancoj) aŭ, en la plej gravaj kazoj, eĉ al kortumo de tria instanco.

En Soveta Unio la unuagrada juĝistaro eĉ en la plej seriozaj kriminalaj kazoj ĉiam konsistas el unu profesia juĝisto (ne necese kvalifikita juristo) kaj du popolaj asesoroj. Kontraŭ la juĝon de la unuagrada kortumo estas eble apelacii al pli alta kortumo, kiu en la plej gravaj kazoj ĉiam estas la supera kortumo de la koncerna unua respubliko. La juĝistaro de la apelacia kortumo ĉiam konsistas el tri profesiaj juĝistoj. Ĝia decido estas fina. Nur escepte, surbaze de la t.n. kasacia protesto de la prokurorato por protekto de leĝeco, iu kazo povas atingi la Superan Kortumon de USSR. Necesas aldoni, ke, laŭ la sovetia kortuma proceduro, ĉiu ajn pli alta kortumo povas transpreni kiun ajn kazon for de la jurisdikcio de kiu ajn pli malalta kortumo, kaj juĝi ĝin kiel kortumo de unua instanco, en kiu okazo la juĝistaro, kompreneble, konsistas el unu profesia juĝisto kaj du popolaj asesoroj. Tio signifas, ke precize en la plej gravaj kazoj, kiam ajn supera kortumo de unia respubliko, aŭ eĉ la Supera Kortumo de USSR, agas kiel kortumo de unua instanco, la akuzito estas senigita de la rajto apelacii.

En Jugoslavio en la plej gravaj kazoj (krimoj, por kiuj la leĝo preskribas 15-jaran senliberigon aŭ pli severan punon) la juĝistaro de la unuagrada kortumo konsistas el du profesiaj juĝistoj (kvalifikitaj juristoj) kaj tri juĝistoj-asesoroj, dum la apelacia kortumo, t.e. la supera kortumo de la koncerna respubliko aŭ provinco, konsistas el kvin profesiaj juĝistoj. En iuj speciale gravaj kazoj, en kiuj la akuzito estis kondamnita al mortpuno aŭ 20-jara senigo de libereco, kiel ankaŭ en kelkaj aliaj kazoj, la leĝo permesas kasacian apelacion aŭ al la Federacia Kortumo, aŭ al tria instanco kadre de la superaj kortumoj de la respublikoj kaj provincoj, depende de tio, ĉu la federacia kriminala kodo, aŭ la kriminalaj kodoj de la respublikoj kaj provincoj estis malobservitaj. En tiuj speciale gravaj kazoj la kasacia juĝistaro konsistas el kvin profesiaj juĝistoj, kio signifas, ke la akuzito troviĝas en la manoj de 15 juĝistoj, el kiuj 12 estas profesiaj kaj 3 laikoj.

El tiu konciza prezento de la du sistemoj klare sekvas, ke la jugoslavia donas multe pli da formalaj garantioj por observo de leĝeco sur tiu ĉi kampo, ol la sovetia. Tio, tamen, neniel signifas, ke en Jugoslavio ne okazas malobservoj de leĝeco, precipe en la kazoj de la t.n. politikaj krimoj.

Sur la kampo de **publika administrado** la kutima rimedo estas apelacio al pli alta administracia aŭtoritato, sed en diversaj landoj ekzistas ankaŭ aliaj eblecoj,

ekzemple pliaj apelacioj al ordinaraĵoj kortumoj, aŭ plendoj al specialaj administraciaj kortumoj aŭ tribunaloj.

En Soveta Unio oni povas apelacii al pli alta administracia aŭtoritato, kies decido estas fina. Manko de leĝo pri ĝenerala administra proceduro faciligas arbitrecon, des pli, ke multaj dekretoj, ordonoj, instrukcioj tute ne estas publikigataj, sed nur komunikataj al la respektivaj administraj aŭtoritatoj por interna uzo kaj plenumo.

En Jugoslavio ekzistas Kodo de Ĝenerala Administra Proceduro. Laŭ ĝi, oni rajtas apelacii al pli alta administracia instanco, kies decido estas fina. Tamen en pluraj kazoj la leĝo permesas plendon al Federacia Supera Kortumo, aŭ al la Supera Milita Kortumo, aŭ al la superaj kortumoj de la respublikoj kaj provincoj, depende de la karaktero de la atakita administracia akto.

Evidente, ankaŭ sur tiu vastega kampo de publika administrado la garantioj de leĝeco estas konsiderinde pli grandaj ol en Soveta Unio. Plian fojon tamen, malgraŭ tiuj formalaj garantioj, ankaŭ en Jugoslavio abundas senleĝeco kaj arbitreco ne nur en kazoj, kiuj laŭ la aŭtoritatoj havas politikan karakteron.

Sur la kampo de **normdonaj aktoj** leĝeco signifas konformecon aŭ nekontraŭecon de kiu ajn normdona akto al kiu ajn pli alta normdona akto en la hierarkio de normdonaj aktoj. En tiu senco leĝeco implicas ankaŭ konstituciecon, t.e. konformecon aŭ nekontraŭecon de la leĝoj kaj de la subleĝaj normdonaj aktoj (dekretoj de la registaro, dekretoj de unuopaj ministroj, decidoj, ordonoj, ktp.) al la konstitucio. Formale, la sovetia doktrino havas la saman starpunkton. „La sovetia jurscienco”, deklaras V. M. Chkhikvadze en la menciita aŭtoritata verko, „rigardas socialisman leĝecon kiel precizan observon de la Soveta Konstitucio, kaj de la leĝoj kaj subleĝaj aktoj bazitaj sur ĝi, fare de ĉiuj ŝtataj organoj, amasaj organizaĵoj, oficialuloj kaj civitanoj”.

Kiel konate, pro la multnacia karaktero de Soveta Unio kaj Jugoslavio, ambaŭ ŝtatoj estas federacie organizitaj. Formale, pro la konstitucia rajto de la 15 uniaj respublikoj havi proprajn eksterlandajn rilatojn kaj ekzisti el la Unio, USSR estus pli konfederacio, ol federacio, sed fakte ĝi estas multe pli centralizita ol Jugoslavio sub la nuna Konstitucio, kiu donas al la 6 respublikoj kaj la 2 provincoj en SR Serbio konsiderindajn rajtojn en ĉiuj sferoj, kvankam ne la rajton ekzisti. Tio reflektiĝas en la konstitucioj de la du landoj.

Laŭ Art. 76 de la Konstitucio de USSR (1977), la konstitucioj de la uniaj respublikoj devas esti **konformaj** al la Konstitucio de USSR. Same tiel la uniaj leĝoj kaj subleĝaj normdonaj aktoj, kiel ankaŭ la leĝoj kaj subleĝaj normdonaj aktoj de la uniaj respublikoj, en la lasta analizo devas esti **konformaj** al la Konstitucio de USSR.

Laŭ Art. 206–207 de la Konstitucio de SFR Jugoslavio, la konstitucioj de la respublikoj kaj de la provincoj devas esti **ne kontraŭaj** al la Konstitucio de SFRJ. Tio donas al la respublikoj kaj provincoj la eblecon reguligi en siaj konstitucioj multajn demandojn laŭ propraj bezonoj sub la sola kondiĉo, ke tiuj reguloj **ne estu kontraŭaj** al la federacia Konstitucio. Plue, la federaciaj leĝoj kaj subleĝaj normdonaj aktoj devas esti **konformaj** al la Konstitucio de SFRJ, sed la leĝoj

kaj la subleĝaj normdonaj aktoj de la respublikoj kaj provincoj devas nur esti **ne kontraŭaj** al la Konstitucio kaj leĝoj de SFRJ. Tiun gravegan konstitucian distingon inter „konformaj” kaj „ne kontraŭaj” la respublikoj kaj provincoj abunde utiligis, tiel ke nuntempe SFRJ en multaj juraj branĉoj havas ok malsamajn jurojn, en iuj okazoj eĉ naŭ pro la respektiva federacia leĝo.

Kiu, do, kontrolas la leĝecon kaj konstituciecon de la du landoj? Laŭ la Sovetia Konstitucio (Art. 164), la kontrolo de ĉiuj malpli altaj normdonaj aktoj, inkluzive dekretojn de unuopaj ministroj, troviĝas en la manoj de la Ĝenerala Prokuroro de USSR kaj de la prokuroroj subigitaj al li konforme al iliaj kompetentecoj laŭ la Leĝo pri la Prokuroreco. Tio signifas, ke la kontrolon efektivas institucio, kiu ekde 1922, kiam ĝi estis reestabla de Lenin, perpertris (faris) sennombrajn kontraŭjurajn agojn kaj kontribuis al stato de senleĝeco, precipe sub la regado de Stalin, kiel rekonite en la „sekreta” parolado de Ĥruŝĉov en 1956. La Prezidio de la Supera Soveto de USSR havas la rajton nuligi la dekretojn kaj decidojn de la Konsilio de Ministroj (Registaro) de USSR kaj de la konsilioj de ministroj de la uniaj respublikoj, se ili ne estas konformaj al la leĝo. Krome, la Prezidio rajtas doni devigajn interpretojn de la leĝoj (Art. 121). Neniu kontrolas la konstituciecon de la leĝoj akceptitaj de la Supera Soveto de USSR. Teorie, la Supera Soveto rajtas malaprobi la leĝdonajn ukazojn de la Prezidio (Art. 122), sed tio ĝis nun neniam okazis.

En Soveta Unio amaso da leĝoj, dekretoj kaj aliaj normdonaj aktoj estas kontraŭkonstituciaj. Unusola ekzemplo sufiĉos. Kiel dirite supre, ĉiu unia respubliko havas la rajton ekzigi el la Unio. Tamen, kia ajn aktivado por la respekto de lingvaj kaj kulturaj rajtoj de nerusaj nacioj estas persekutata kiel „burĝa naciismo”, dum agado direktita al ekzigi el la Unio estas krimo de perfido, por kiu la mortpuno estas preskribita en la kriminala leĝaro de USSR kaj de la uniaj respublikoj.

En Jugoslavio funkcias sistemo de naŭ konstituciaj kortumoj. La Konstitucia Kortumo de SFRJ kontrolas la konstituciecon kaj leĝecon de ĉiuj federaciaj leĝoj kaj subleĝaj normdonaj aktoj, kiel ankaŭ de la respublikaj kaj provincaj konstitucioj, leĝoj kaj subleĝaj normdonaj aktoj (Art. 175 de la Konstitucio de SFRJ) laŭ la jam prezentita konstitucia formulo de „konforme al” kaj „ne kontraŭa al”. La ses respublikaj kaj la du provincaj konstituciaj kortumoj kontrolas la konstituciecon kaj leĝecon, t.e. la konformecon de la koncernaj respublikaj kaj provincaj leĝoj kaj subleĝaj normdonaj aktoj kun la respektivaj konstitucio, leĝoj ktp., ĉiam laŭ la baza principo, ke pli malalta normdona akto devas esti konforma al pli alta.

La kontrolo de konstitucieco kaj leĝeco fare de la jugoslaviaj konstituciaj kortumoj donis almenaŭ certgrade pozitivajn rezultojn. Tiuj kortumoj solvis ĝis nun plurajn milojn da kazoj. Tamen, ankaŭ en Jugoslavio multaj leĝoj kaj subleĝaj preskriboj, precipe tiuj kun politika karaktero – fakte la plej gravaj el vidpunkto de civitanaj liberecoj – eskapas la kontrolon de la konstituciaj kortumoj.

Apenaŭ necesas diri, ke la jugoslavia sistemo okulfrape superas la sovetian ankaŭ en tiu ĉi sfero.

2.3. **Minimuma jura nivelo.** En jura sistemo, kiu ignoras la minimuman juran nivelon de la civilizita mondo en difinita epoko, necese forestas leĝeco.

Kompreneble, estas malsaĝe taksi la gradon de leĝeco el la limigita vidpunkto de iuj principoj de justeco akceptitaj nur en malsama socio aŭ en alia historia epoko. Ankaŭ la principoj de la t.n. natura justeco ne estas aplikeblaj, ĉar tiuj principoj estas absolutaj nur se ili estas senigitaj de kia ajn konkreta enhavo.

Aliflanke, estas eble aserti, ke iuj bazaj juraj principoj, rekonitaj de ĉiuj civilizitaj ŝtatoj senkonsidere al iliaj ekonomiaj kaj sociaj strukturoj, estas entenataj en la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj (UD) de la 10-a de decembro 1948, kiel ankaŭ en la du paktoj kaj multnombraj konvencioj ligitaj al la UD. Kaj Soveta Unio kaj Jugoslavio rekonas la juran validecon de la Universala Deklaracio. En artikolo pri „revolucia leĝeco”, publikigita en 1974 en la Bulteno de la Supera Kortumo de USSR (*BV SSR* 1974, n-ro 2,11), L. M. Smirnov, la tiama prezidanto de la Supera Kortumo, fiere skribis: „Sufiĉas kompreni, ni diru, Art. 8–12 de la Universala Deklaracio kun la sovetiaj leĝoj por konvinki sin, ke ĉiuj preskriboj de la Deklaracio koncerne la garantiojn de la homaj rajtoj de la individuo troviĝas en la sovetia juro.” Nu, se oni fakte komparas, oni konstatas precize la malon. Ekzemple, laŭ Art. 19 kaj 20 de la UD ĉiu havas la rajton je libereco de opinio kaj esprimado; la rajton peti, ricevi kaj komuniki informojn kaj ideojn per kiu ajn rimedo kaj senkonsidere al la landlimoj; la liberecon je paca kunvenado kaj asociiĝo. Laŭ la Sovetia Konstitucio la civitanoj „ĝuas” tiujn rajtojn nur se ili estas „konformaj al la interesoj de la popolo kaj kun la celo fortikigi kaj evoluigi la socialisman sistemon” (Art. 50), aŭ, se ili estas „konformaj al la celo konstrui komunismon” (Art. 51)!

Krome, kaj USSR kaj SFR Jugoslavio ratifikis du gravegajn paktojn: la Internacian Pakton pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj, kaj la Internacian Pakton pri Civilaj kaj Politikaj Rajtoj, kiel ankaŭ nombron da internaciaj konvencioj pri diversaj apartaj homaj rajtoj. Fine, ambaŭ ŝtatoj estas partioj de la Fina Akto de Helsinki.

Malgraŭ tiuj multnombraj internacijuraj obligacioj, la formalaj juraj preskriboj de ambaŭ ŝtatoj kaj, eĉ pli, la praktiko en la sferoj de homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj estas ege malproksimaj de la juraj niveloj entenataj en la menciitaj internacijuraj dokumentoj. En Soveta Unio eĉ pli malproksimaj, ol en Jugoslavio. Laŭ la tre aŭtoritata verko *World Human Rights Guide* (Gvidlibro pri la Homaj Rajtoj en la Mondo) de Charles Humana (1983), la observo de homaj rajtoj en Jugoslavio estas 55 % de la tuto, dum en USSR ĝi estas nur 27 %. Kompreneble, ankaŭ la jugoslaviaj 55 % estas malproksimaj de la 96 % en Danlando kaj Finnlando, sed ili estas multe pli bonaj, ol la 27 % en Soveta Unio.

3. Konkludo

Konklude mi deziras fari nur kvin koncizajn rimarkojn:

1. En tiu ĉi traktaĵo mi limigis min nur al esencaj juraj preskriboj kaj intence ellasis kiun ajn el la multnombraj konkretaj kazoj de kontraŭleĝeco en ambaŭ landoj.
2. Tri apartaj niveloj estas distingendaj: doktrino (jura teorio), formalaj preskriboj en la leĝlibroj kaj juro en la ĉiutaga praktiko. Inter ili ekzistas grandegaj, ofte ŝokaj diferencoj.

3. La plej bona efika kontrolo de konstitucieco kaj leĝeco estas la libereco de informado kaj kritikado konforme al Art. 19 de la Universala Deklaracio. Tio kaj la observo de aliaj homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj estas la plej decida el la tri esencaj elementoj de leĝeco. Vane oni havas formale perfektan, sed tiranecan juran sistemon. Vane oni havas eĉ la plej subtilajn rimedojn por kontrolo de leĝeco en tia tirana sistemo. Se forestas la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj, necese forestas leĝeco laŭ la nuntempaj postulatoj, kaj restas kruda tiraneco.

4. Se la kampanjo de M. Gorbaĉov kaj de liaj apogantoj en la suproj de la Komunista Partio por *glasnost'* (malfermiteco) en la publika vivo kaj *perestrojka* (rekonstruigo) de la ekonomia sukcesos, tio donos multflankajn pozitivajn rezultojn ankaŭ el vidpunkto de leĝeco ne nur en USSR, sed ankaŭ en la aliaj landoj de la sovetia bloko. Aldone al pli libera spirado de multmilionaj amasoj en tiuj landoj, kio per si mem estas la plej granda valoro de la homa vivo, tio – kaj ne la limigo aŭ eĉ nuligo de la nukleaj armiloj – estos en la lasta linio la plej grava reala kontribuado ankaŭ al la monda paco.

5. Leĝeco vaste transpasas la kadrojn de unu aŭ kelkaj landoj. Pro la interdependeco de la ŝtatoj en la nuntempaj internaciaj rilatoj, la demando pri leĝeco aŭ senleĝeco en kiu ajn lando koncernas la mondon.

Esenca Bibliografio

- Chkhivadze, V. M. (ed.), 1969: *The Soviet State and Law*. Moscow. 365 p.
- Gomilanović, Ljubomir, 1979: *Pravosudni Sistem, Ustavni Sudovi, Društveni Pravobranilac Samoupravljanja*. Beograd: Službeni List SFRJ. 190 p.
- Gončarov, A. K. (kaj aliaj), 1958: *Lenin o Socialistiĉeskoj Zakonnosti (1917–1922)*. Moskva: eld. Sovetskaja Rossija. 720 p.
- Humana, Charles, 1983: *World Human Rights Guide*. London: Hutchinson & Co.. 350 p.
- Lapenna, Ivo, 1967: *Lenin, Law and Legality*. En: L. Schapiro kaj P. Reddway (ed.), *Lenin: the Man, the Theorist, the Leader – A Reappraisal*. London: 248–269.
- Lapenna, Ivo, 1973: *Liberties Under the Law: Legal Theory and Practice in the USSR*. En: B. Crozier (ed.), *The Peactime Strategy of the USSR*. London: Institute for the Study of Conflict: 66–78.
- Lapenna, Ivo, 1975: *Contemporary Crisis of Legality in the Soviet Union – Substantive Criminal Law. – Review of Socialist Law 1975: 73–97*.
- Lapenna, Ivo, 1977: *Human Rights: Soviet Theory and Practise – Helsinki and International Law*. London: Institute for the Study of Conflict. 18 p.
- Lenin, V. I., 1933: *State and Revolution*, 21st English translation. London.
- Lenin, V. I., 1965: *The Proletarian Revolution and the Renegade Kautsky*. Peking.
- Loeber, D. A., 1970: *For Internal Use Only. – International and Comparative Law Quarterly 1970: 70–98*.